

LA BLUA FELIBRO

REDAKTITA DE ANDREW LANG

*TRADUKITA DE
DONALD BROADRIBB*

2005



PRINCO KARULO TRANSFORMITA EN LA MONSTRON

La BLUA FELIBRO



Redaktita de Andrew Lang

Tradukita de Donald Broadribb

*Kun Multaj Ilustraĵoj
desegnitaj de H. J. Ford kaj G. P. Jacomb Hood*

La Blua Felibro

Redaktita de Lang, Andrew, 1844–1912

Ilustrita de Ford, Henry Justice, 1860–1941

kaj ankaŭ de Jacomb Hood, George Percy, 1857–1929

Tradukita el la Angla al Esperanto de Broadribb, Donald (Donald Richard), 1933–

Unue eldonita en la Angla kiel The Blue Fairy Book de Longmans, Green, and Co., ĉ.
1889. LCCN 05-018484.

Unue eldonita en Esperanto de Bookleaf Publishing, 1997.

Ĉi tiu eldono de decembro 2000 de Books Reborn

reeldonita kiel elibro 2005.

Ĉi tiu traduko kopirajta © 1997 Donald Broadribb.

ix, 356 p. : front., ill., 7 pl. ; 22 cm.

398.21

La ilustraĵoj kaj aranĝo de ĉi tiu eldono laŭeble plej konformas al tiuj de la originala Angla eldono de ĉ. 1889. La literotipo estas 11 sur 13,2 pkt Minion Pro.

DEDICITA AL
ELSPETH ANGELA CAMPBELL

ANTAŬPAROLO

LA RAKONTOJ en ĉi tiu volumo estas intencitaj por infanoj, al kiuj, ni esperas, plaĉos la malnovaj rakontoj kiuj plaĉis al tiom da generacioj.

La rakontoj de Perrault estas el la malnova Angla versio 18-jarcenta.

La rakontoj el la *Cabinet des Fées* kaj de Madame d'Aulnoy, estis tradukitaj [Anglen]—pli precize, adaptitaj—de F-ino Minnie Wright, kiu ankaŭ, laŭ afabla permeso de M. Henri Carnoy, interpretis “La bronza ringo” el lia *Traditions Populaires de l'Asie Mineure* (Maisonnette, Parizo, 1889).

La rakontoj el Grimm estis tradukitaj de F-ino May Sellar; alia el la Germana de F-ino Sylvia Hunt; la Norenaj rakontoj estas versio de S-ino Alfred Hunt; “La terura kapo” estas adaptita el Apollodoro, Simonido, kaj Pindaro de la Redaktoro; F-ino Violet Hunt kondensis “Aladdin”; F-ino May Kendall simile kondensis *La vojaĝoj de Gulivero*; “La feino Paribanou” estas mallongigo de la malnova Angla traduko de Galland.

S-roj Chambers afable permesis ke ni represu “La Ruĝa Etin” kaj “La nigra taŭro de Norovegio” el *Popular Traditions of Scotland* de S-ro Robert Chambers.

“Dick Whittington” estas el la populara broŝuro redaktita de S-ro Gomme kaj S-ro Wheatley por la Societo Villon; “Joĉjo la Gigantomortigisto” estas el populara broŝuro, sed bona versio de tiu malnova kaj tre populara verko estas malfacile havebla.

ANDREW LANG.

ENHAVO

<i>La bronza ringo</i>	1	<i>La historio de bela Orbuklulino</i>	193
<i>Princo Hiacinto kaj la Kara Princineto</i>	12	<i>La historio de Whittington</i>	206
<i>Oriente de la Suno kaj Okcidente de la Luno</i>	19	<i>La mirinda ŝafo</i>	214
<i>La flava nano</i>	30	<i>Dikfingreto</i>	231
<i>Eta Ruĝa Rajdkapuĉo</i>	47	<i>La kvardek ŝtelistoj</i>	242
<i>La Dormanta Belulino en la Arbaro</i>	54	<i>Hanĉjo kaj Grenjo</i>	251
<i>Cindrulino, aŭ La malgranda vitra pantoflo</i>	64	<i>Neĝblanka kaj Rozruĝa</i>	259
<i>Aladino kaj la mirinda lampo</i>	72	<i>La anser-knabino</i>	266
<i>La rakonto pri junulo kiu entreprenis lerni kio estas timo</i>	86	<i>Bufoj kaj diamantoj</i>	274
<i>Rumpelŝtilckino</i>	96	<i>Princo Karulo</i>	278
<i>Belulino kaj la Besto</i>	100	<i>Blubarbulo</i>	290
<i>La Mastro-Knabino</i>	120	<i>Fidela Johano</i>	296
<i>Kial la maro estas sala</i>	136	<i>La brava tajloreto</i>	304
<i>La Mastro-Kato; aŭ Kaĉjo en Botoj</i>	141	<i>Vojaĝo al Liliputo</i>	313
<i>Felicio kaj la poto da diantoj</i>	148	<i>La princino sur la vitra monteto</i>	332
<i>La Blanka Kato</i>	157	<i>La rakonto pri Princo Aĥmedo kaj la Feino Paribanuo</i>	342
<i>La Nimfeo. La Or-ŝpinistoj</i>	174	<i>La historio de Joĉjo la Gigantomortigisto</i>	374
<i>La terura kapo</i>	182	<i>La nigra virbovo de Norovegio</i>	380
		<i>La ruĝa ogro</i>	385
		<i>Nekutimaj vortoj</i>	390

LA BRONZA RINGO

FOJE en certa lando vivis reĝo kies palacon ĉirkaŭis vasta ĝardeno. Sed, kvankam la ĝardenistoj estis multaj kaj la tero estis bona, tiu ĝardeno donis nek florojn nek fruktojn, eĉ ne herbon aŭ ombrantajn arbojn.

La Reĝo malesperis pri ĝi, sed saĝa maljunulo diris al li:

“Viaj ĝardenistoj ne komprenas sian metion: sed kion oni rajtas anticipi de viroj kies patroj estis ŝufaristoj kaj ĉarpentistoj? Kiel ili povus esti lernintaj kultivi vian ĝardenon?”

“Vi plene pravas,” kriis la Reĝo.

“Tial,” daŭrigis la maljunulo, “vi devus venigi ĝardeniston kies patro kaj avo estis jam ĝardenistoj, kaj baldaŭ via ĝardeno estos plena de verda herbo kaj gajaj floroj, kaj vi ĝuos ĝiajn bongustajn fruktojn.”

Do la Reĝo sendis mesaĝistojn al ĉiuj urbo, vilaĝo, kaj vilaĝeto en sia regno, por serĉi ĝardeniston kies prapatroj ankaŭ estis ĝardenistoj, kaj post kvardek tagoj oni trovis viron tian.

“Venu kun ni kaj estu ĝardenisto por la Reĝo,” ili diris al li.

“Kiel mi povus iri al la Reĝo,” diris la ĝardenisto, “malriĉulo kia mi?”

“Tio ne gravas,” ili respondis. “Jen novaj vestoj por vi kaj via familio.”

“Sed mi ŝuldas monon al pluraj personoj.”

“Ni pagos viajn ŝuldojn,” ili diris.

Do la ĝardenisto akceptis esti persvadita, kaj foriris kun la mesaĝistoj, kunprenante siajn edzinon kaj filon; kaj la Reĝo, ĝojega ĉar li trovis veran ĝardeniston, konfidis al li la zorgadon de sia ĝardeno. La viro tute ne trovis malfacilon instigi la reĝan ĝardenon produkti florojn kaj fruktojn, kaj fine de jaro la parko

ne aspektis sama, kaj la Reĝo ŝutis donacojn sur sian novan serviston.

La ĝardenisto, kiel vi jam aŭdis, havis filon, kiu estis tre bela junulo, tre agrablakonduta, kaj ĉiutage li portis la plej bonajn fruktojn el la ĝardeno al la Reĝo, kaj ĉiujn plej belajn florojn al lia filino. Nu, tiu princino estis mirinde bela kaj ĝuste dekses-jaraĝa, kaj la Reĝo komencis pensi ke estas la ĝusta tempo por ke ŝi edziniĝu.

“Mia kara infano,” diris li, “vi estas ĝustaĝa por preni edzon, tial mi pensas edzinigi vin al la filo de mia ĉefministro.”

“Patro,” diris la Princino, “mi tute ne edziniĝos kun la filo de la ministro.”

“Kial ne?” demandis la Reĝo.

“Ĉar mi amas la filon de la ĝardenisto,” respondis la Princino.

Aŭdinte tion la Reĝo unue estis tre kolera, poste li ploris kaj ĝemis, kaj deklaris ke tia edzo ne meritas lian filinon; sed ne eblis turni la junan Princinon de ŝia decido edziniĝi kun la filo de la ĝardenisto.

Post tio la Reĝo konsultis siajn ministrojn. “Jen kion vi faru,” ili diris. “Por senigi vin de la ĝardenisto sendu ambaŭ edziĝemulojn al tre distanca lando, kaj tiu kiu la unua revenos edzinigos via filinon.”

La Reĝo obeis tiun konsilon, kaj al la filo de la ministro prezentiĝis bonega ĉevalo kaj monujo plena de orpecoj, dum la filo de la ĝardenisto havis nur maljunan laman ĉevalon kaj monujon plenan de kupra mono, kaj ĉiuj pensis ke li neniam revenos de sia veturo.

La tagon antaŭ ol ili ekveturis la Princino renkontis sian amanton kaj diris al li:

“Estu kuraĝa, kaj memoru ĉiam ke mi amas vin. Prenu ĉi tiun monujon plenan de juveloj kaj laŭeble plej bone utiligu ilin pro via amo al mi, kaj revenu rapide kaj postulu mian manon.”

La du edziĝemuloj foriris kune el la urbo, sed la filo de la ministro forgalopis sur sia bona ĉevalo, kaj baldaŭ estis nevidebla preter la plej foraj montetoj. Li rajdadis dum pluraj tagoj, kaj atingis fonton apud kiu maljunulino vestita tute per ĉifonoj sidis sur ŝtono.

“Bonan tagon al vi, juna veturanto,” diris ŝi.

Sed la filo de ministro ne respondis.

“Kompatu min, veturanto,” ŝi diris denove. “Mi mortas pro malsato, kiel vi vidas, kaj jam tri tagojn mi estas ĉi tie kaj neniu donis al mi ion ajn.”

“Lasu min, olda sorĉulinaĉo,” kriis la junulo; “mi nenion povas fari por vi,” kaj dirinte tion li plurajdis.

Tiun saman vesperon la filo de la ĝardenisto rajdis al la fonto sur sia lama griza ĉevalo.

“Bonan tagon al vi, juna veturanto,” diris la almozpetantino.

“Bonan tagon, honorindulino,” respondis li.

“Juna veturanto, kompatu min.”



“Prenu mian saketon, honorindulino,” diris li, “kaj rajdu malantaŭ mi, ĉar certe viaj kruroj ne estas tre fortaj.”

La maljuna virino ne atendis duafojan inviton, ŝi suriris la ĉevalon, tuj malantaŭ li, kaj tiel atingis la ĉefurbon de potenca regno. La filo de la ministro ekloĝis en granda gastejo, la filo de la ĝardenisto kaj la maljunulino deĉevaliĝis ĉe la gastejo por almozuloj.

La sekvan tagon la filo de la ĝardenisto aŭdis grandan bruon

en la strato, kaj la heroldoj de la Reĝo pasis, sonigante ĉiajn instrumentojn, kaj kriante:

“La Reĝo, nia mastro, estas maljuna kaj malsana. Li donos grandan rekompenco al tiu persono kiu kuracos lin kaj redonos al li lian junecan forton.”

La maljuna almozpetantino diris al sia bonfarinto:

“Ĉi tion vi devos fari por akiri la rekompenco kiun promesas la Reĝo. Foriru el la urbo tra la suda pordo, kaj tie vi trovos tri hundetojn diverskolorajn; la unua estos blanka, la dua nigra, la tria ruĝa. Vi devos mortigi ilin kaj post tio bruligu ĉiun aparte, kaj kolektu la cindrojn. Metu la cindrojn de ĉiu hundo en apartan sakon kun la koloro de tiu hundo, poste iru antaŭ la pordon de la palaco kaj krii, ‘Fama kuracisto venis el Ĵanino en Albanio. Nur li povas kuraci la Reĝon kaj redoni al li lian junecan forton.’ La kuracistoj de la Reĝo diros, ‘Jen fraŭdisto, ne klerulo,’ kaj ili faros multajn malfacilaĵojn, sed vi superos fine, kaj prezentos vin antaŭ la malsana Reĝo. Tiam postulu tiom da ligno kiom povas porti tri muloj, kaj grandan kaldronon, kaj fermu vin en ĉambron kun la Sultano, kaj kiam la kaldrono bolos vi devos ĵeti lin en ĝin, kaj lasu lin tie ĝis lia karno estos plene disigita for de liaj ostoj. Tiam aranĝu la ostojn laŭ iliaj ĝustaj pozicioj, kaj ŝutu sur ilin la cindrojn el la tri sakoj. La Reĝo reviviĝos, kaj li estos tute sama kiel kiam li estis dudekjaraĝa. Kiel rekompenco postulu la bronzan ringon kiu kapablas doni al vi ĉion kion vi deziras. Iru, mia filo, kaj forgesu neniun el miaj instrukcioj.”

La junulo obeis la instrukciojn de la maljuna almozpetantino. Foririnte el la urbo li trovis la blankan, ruĝan, kaj nigran hundojn kaj mortigis kaj bruligis ilin, kaj kolektis la cindrojn en tri sakojn. Post tio li kuris al la palaco kaj kriis:

“Fama kuracisto ĵus venis el Ĵanino en Albanio. Nur li povas kuraci la Reĝon kaj redoni al li lian junecan forton.”

La kuracistoj de la Reĝo unue mokis la nekonatan veturanton, sed la Sultano ordonis enlasi la fremdulon. Ili alportis la kaldronon kaj la amason da ligno, kaj baldaŭ la Reĝo estis boligata. Ĉirkaŭ la tegmezo la filo de la ĝardenisto aranĝis la ostojn en iliaj pozicioj, kaj li nur ĵus ŝutis la cindrojn sur ilin kiam la maljuna Reĝo reviviĝis, kaj trovis sin denove juna kaj fortika.

“Kiel mi povas rekompenci vin, mia bonfarinto?” li kriis. “Ĉu vi prenos duonon de miaj trezoroj?”

“Ne,” diris la filo de la ĝardenisto.

“La manon de mia filino?”

“Ne.”

“Prenu duonon de mia regno.”

“Ne. Donu al mi nur la bronzan ringon kiu povas tuj doni al mi kion ajn mi deziras.”

“Ve!” diris la Reĝo, “mi multe alte taksas tiun mirindan ringon; tamen, vi havos ĝin.” Kaj li donis ĝin al li.

La filo de la ĝardenisto reiris adiaŭi la maljunan almozpetant-inon; post tio li diris al la bronza ringo:

“Pretigu grandiozan ŝipon en kiu mi povos daŭrigi mian veturon. Ĝia korpo estu el pura oro, la mastoj el arĝento, la veloj el brokaĵo; la ŝipistaro konsistu el dek du junuloj noblaspektaj, vestitaj kiel reĝoj. Sankta Nikolao estu ĉe la rudro. Rilate al la kargo, ĝi konsistu el diamantoj, rubenoj, smeraldoj, kaj karbunkoloj.”

Kaj tuj ŝipo ekaperis sur la maro, konforma ĉiurilate al la postulo de la filo de la ĝardenisto, kaj suririnte, li daŭrigis sian veturon. Baldaŭ li atingis grandan urbon kaj establis sin en grandioza palaco. Post pluraj tagoj li renkontis sian rivalon, la filon de la ministro, kiu jam elspezis sian tutan monaron kaj devis malfeliĉe labori kiel portisto de polvo kaj rubaĵoj. La filo de la ĝardenisto diris al li:

“Kiel vi nomiĝas, kiu estas via familio, kaj el kiu lando vi venis?”

“Mi estas la filo de la ĉefministro de granda nacio, tamen vidu al kia malhonorinda laboro mi malpromociiĝis.”

“Aŭskultu min; kvankam mi nenion pli scias pri vi, mi akceptas helpi vin. Mi donos al vi ŝipon kiu reportos vin al via lando, sed mi postulos unu aferon.”

“Kia ajn ĝi estas, mi volonte akceptas ĝin.”

“Sekvu min al mia palaco.”

La filo de la ministro sekvis la riĉan nekonaton, kiun li ja ne rekonis. Kiam ili atingis la palacon la filo de la ĝardenisto signis al siaj sklavoj, kiuj tute malvestis la novulon.

“Plene ardigu ĉi tiun ringon,” ordonis la mastro, “kaj signu la

viron per ĝi, sur lia dorso.”

La sklavoj obeis lin.

“Nun, junulo,” diris la riĉa nekonato, “mi donas al vi ŝipon kiu reportos vin al via lando.”

Kaj elirinte, li prenis la bronzan ringon kaj diris:

“Bronza ringo, obeu vian mastron. Pretigu por mi ŝipon kies duone putraj traboj estu nigre farbitaj, la veloj estu ĉifonaj, kaj la velistoj malsanaj kaj malfortaj. Unu estu perdinta kruron, alia brakon, la tria estu ĝibulo, alia estu lama aŭ bulpieda aŭ blinda, kaj la plejparto estu hida¹ kaj kovrita de cikatroj. Iru, plenumigu miajn ordonojn.”

La filo de la ministro ekvelis en tiu malnova ŝipo, kaj, dank’ al favoraj ventoj, fine li atingis sian propran landon. Malgraŭ la kompatinda stato kiun li havis revenante ili akceptis lin ĝoje.

“Mi revenis la unua,” diris li al la Reĝo; “nun plenumu vian promeson, kaj donu al mi la princinon kiel edzinon.”

Do ili tuj komencis pretigi la geedziĝfeston. Kaj la povra princino lamentis kaj multe koleris.

La sekvan matenon, je la tagiĝo, mirinda ŝipo, kun ĉiu velo uzata, venis kaj ankris antaŭ la urbo. La Reĝo hazarde tiu-momente estis ĉe fenestro de la palaco.

“Kiu stranga ŝipo estas,” li kriis, “kun ora korpo, arĝentaj mastoj, kaj silkaj veloj, kaj kiuj estas la junuloj kiuj aspektas princoj kaj servas kiel velistoj? Kaj ĉu mi ne vidas Sanktan Nikolaon ĉe la rudro? Iru kaj invitu la kapitanon de la ŝipo veni al la palaco.”

Liaj servistoj obeis lin, kaj baldaŭ envenis ĉarme bela juna princo, vestita per riĉaj silkoj, ornamita per perloj kaj diamantoj.

“Junulo,” diris la Reĝo, “vi estas bonvena, kiu ajn vi estas. Bonvolu komplezi min per gastado ĉi tie dum vi restos en mia ĉefurbo.”

“Multajn dankojn, sinjoro,” respondis la kapitano, “mi akceptos vian proponon.”

“Mia filino baldaŭ edziniĝos,” diris la Reĝo; “ĉu vi bonvolos prezenti ŝin dum la ceremonio?”

“Min multe plezurigos tio, sinjoro.”

¹. Nekutimaj vortoj estas klarigitaj en la listo “Nekutimaj Vortoj” sur p. 355.

Baldaŭ post tio venis la Princino kaj ŝia fianĉo.

“Sed, ĉu eblas?” kriis la juna kapitano; “ĉu vi edzinigos vian filinon al tia viro?”

“Sed li estas la filo de mia ĉefministro!”

“Kiel gravas? Mi ne povas prezenti vian filinon. Ŝia fianĉo estas servisto mia.”

“Via servisto?”

“Sen dubo. Mi renkontis lin en fora urbo, malpromociita tiel ke li devis forporti polvon kaj rubaĵojn el la domoj. Mi kompatis lin kaj dungis lin kiel serviston mian.”

“Estas neeble!” kriis la Reĝo.

“Ĉu vi volas ke mi pruvu mian diron? Ĉi tiu junulo revenis en ŝipo kiun mi pretigis por li, ŝipo maltaŭga por velado, kun nigra difekta korpo, kaj la velistoj estis malsanaj kaj kriplaj.”

“Estas tute vere,” diris la Reĝo.

“Estas false,” kriis la filo de la ministro. “Mi ne konas ĉi tiun viron!”

“Sinjoro,” diris la juna kapitano, “ordonu nudigi la fianĉon de via filino, kaj vidu la signon de mia ringo bruligitan en lian dorson.”

La Reĝo estis tuj faronta tiun ordonon, kiam la filo de la ministro, por ŝpari sin de tia maldigniĝo, agnoskis ke la deklaro ja estas vera.

“Kaj nun, sinjoro,” diris la juna kapitano, “ĉu vi ne rekonas min?”

“Mi rekonas vin,” diris la Princino; “vi estas la filo de la ĝardenisto kiun me de ĉiam amas, kaj al vi mi deziras edziniĝi.”

“Junulo, vi estos mia bofilo,” kriis la Reĝo. “La geedziĝffesto jam komenciĝis, do vi edzinigos mian filinon jam hodiaŭ.”

Do tiun saman tagon la filo de la ĝardenisto edzinigis la belan Princinon.

Pasis pluraj monatoj. La juna paro estis tiom feliĉa kiel longas la tago, kaj la Reĝo pli kaj pli ĝojis ĉar li akiris tian bofilon.

Sed, baldaŭ, la kapitano de la ora ŝipo trovis ke necesas longe vojaĝi, kaj tenere ĉirkaŭbrakinte sian edzinon li ekveturis.

Nu, iomete ekster la ĉefurbo loĝis viro kiu dediĉis sian vivon al studado pri la nigraj artoj—alkemio, astrologio, magio, kaj

sorĉado. Tiu viro trovis ke la filo de la ĝardenisto sukcesis edziniĝi la Princinon nur per helpo de la ĝino kiu obeas la bronzan ringon.

“Mi havigos al mi tiun ringon,” diris li al ŝi. Do li iris al la marbordo kaj kaptis kelkajn ruĝajn fiŝetojn. Efektive, ili estis mirinde belaj. Post tio li revenis, kaj, pasante la fenestron de la Princino, li komencis krii:

“Kiu deziras belajn ruĝajn fiŝetojn?”

La Princino aŭdis lin, kaj elsendis sklavinon, kiu diris al la magiisto:

“Kion vi akceptos interŝanĝe por la fiŝoj?”

“Bronzan ringon.”

“Bronzan ringon, stultulo! Kie mi trovos tion?”

“Sub la kuseno en la ĉambro de la Princino.”

La sklavino reiris al sia mastrino.

“La olda folulo akceptos nek oron nek arĝenton,” diris ŝi.

“Kion do li volas?”

“Bronzan ringon kaŝitan sub kuseno.”

“Trovu la ringon kaj donu ĝin al li,” diris la Princino.

Kaj fine la sklavino trovis la bronzas ringon, kiun la kapitano de la ora ŝipo estis senintence postlasinta, kaj portis ĝin al la magiisto, kiu tuj foriris kun ĝi.

Apenaŭ atinginte sian propran domon, preninte la ringon li diris, “Bronza ringo, obeu vian mastron. Mi deziras ke la ora ŝipo fariĝu nigra ligno, kaj la ŝipistaro ogroj; ke Sankta Nikolao forlasu la rudron, kaj ke la kargo konsistu nur el nigraj katoj.”

Kaj la ĝino de la bronza ringo obeis lin.

Trovinte sin sur la maro en tia mizera stato, la juna kapitano ekkomprenis ke iu nepre ŝtelis de li la bronzan ringon, kaj li lamentis laŭte pri sia misfortuno; sed tio tute ne helpis lin.

“Ve,” li diris al ŝi, “kiu prenis mian ringon verŝajne ankaŭ prenis mian karan edzinon. Kiel utilis mia reiro al mia propra lando?” Kaj li velis de insulo al insulo, de bordo al bordo, kredante ke ĉie, kien ajn li iris, ĉiuj mokas lin, kaj baldaŭ lia malriĉeco estis tiel granda ke li kaj lia ŝipistaro kaj la povraj nigraj katoj havis kiel manĝaĵon nur herbojn kaj radikojn. Vaginte longatempe li atingis insulon loĝatan de musoj. La kapitano surteriĝis sur la bordo kaj



La maljunulo montras la fiŝetojn al la Princino.

komencis esplori la landon. Estis musoj ĉie, sole musoj. Kelkaj el la nigraj katoj estis sekvintaj lin, kaj, ĉar ili ne manĝis jam de pluraj tagoj, ili ege malsatis, kaj faris terurajn ruinojn inter la musoj.

Do la reĝino de la musoj okazigis konsilion.

“Tiu katoj manĝos ĉiun el ni,” ŝi diris, “se la kapitano de la ŝipo ne enfermos la ferocajn bestojn. Ni sendu delegitaron al li, konsistantan el la plej kuraĝaj el ni.”

Pluraj musoj proponis sin por tiu takso kaj eliris trovi la junan kapitanon.

“Kapitano,” diris ili, “rapide foriru de nia insulo, alie ni pereos, ĉiu muso inter ni.”

“Volonte,” respondis la juna kapitano, “sed mi faras unu postulon. Ke vi unue reportu al mi bronzan ringon kiun iu lerta magiisto ŝtelis de mi. Se vi ne faros tion mi surterigos ĉiujn miajn katojn sur vian insulon, kaj vi ekstermiĝos.”

La musoj fortiris sin tre konsternite. “Kion ni faru?” diris la reĝino. “Kiel ni povos trovi tiun bronzan ringon?” Ŝi reokazigis konsilion, kaj alvokis musojn el ĉiu angulo de la terĝlobo, sed neniuj sciis kie estas la bronza ringo. Subite tri musoj alvenis el tre fora lando. Unu estis blinda, la dua lama, kaj la tria havis tranĉitajn orelojn.

“Ho, ho, ho!” diris la novuloj. “Ni venis el tre fora lando.”

“Ĉu vi scias kie estas la bronza ringo kiun obeas la ĝinoj?”

“Ho, ho, ho! ni scias; fia viro ekposedis ĝin, kaj nun li gardas ĝin en sia poŝo dumtage kaj en sia buŝo domnokte.”

“Iru forpreni ĝin de li, kaj revenu kiel eble plej baldaŭ.”

Do la tri musoj faris boaton por si kaj ekvelis al la lando de la magiisto. Atinginte la ĉefurbon ili surteriĝis kaj kuris al la palaco, postlasante nur la blindan muson sur la bordo por prizorgi la boaton. Post tio ili atendis ĝis la nokto. La magiisto kuŝiĝis en sia lito kaj metis la bronzan ringon en sia buŝon, kaj baldaŭ li dormis.

“Nun, kion ni faru?” diris la du bestetoj, unu al la alia.

La muso kun la tranĉitaj oreloj trovis lampon plenan de oleo, kaj botelon plenan de pipro. Do ŝi trempis sian voston unue en la oleon kaj poste en la pipron, kaj tenis ĝin apud la nazo de la viro.

“Atiŝa! atiŝa!” li ternis, sed li ne vekiĝis, kaj la ŝoko saltigis la bronzan ringon el lia buŝo. Pensrapide la lama muso kaptis la valoregan talismanon kaj forportis ĝin al la boato.

Imagu la malesperon de la magiisto kiam li vekiĝis kaj la bronza ringo estis nenie trovebla!

Sed jam niaj tri musoj veladis kun sia kaptaĵo. Favana venteto portadis ilin cele la insulon kie atendas ilin la reĝino de la musoj. Kompreneble ili komencis diskuti la bronzan ringon.

“Kiu el ni plej meritas gratulon?” ili ĉiuj kriis samtempe.

“Mi,” diris la blinda muso, “ĉar sen mia gardo nia boato estus drivinta en la vastan maron.”



“Tute ne,” kriis la muso kun tranĉitaj oreloj; “la gratulon ricevu mi. Ĉu mi ne saltigis la ringon el la buŝo de la viro?”

“Ne, ĝi estas mia,” kriis la lama muso, “ĉar mi forkuris kun la ringo.”

Kaj de altaj vortoj ili baldaŭ atingis batojn, kaj, ve!, kiam la kverelo estis plej feroce la bronza ringo falis en la maron.

“Kiel ni frontos nian reĝinon,” diris la tri musoj, “kiam pro nia malsaĝeco ni perdis la talismanon kaj kondamnis nian popolon al ekstermiĝo? Ni ne povas reiri al nia lando; ni surteriĝu sur ĉi tiu dizerta insulo kaj tie finu niajn mizerajn vivojn.” Dirite, farite. La boato atingis la insulon, kaj la musoj surteriĝis.

La blindan muson rapide dizertis liaj du fratinoj, kiuj foriris ĉasi muŝojn, sed dum ŝi vagadis mizere laŭ la bordo ŝi trovis mortan fiŝon, kaj manĝadis ĝin, kiam ŝi eksentis ion tre malmolan. Pro ŝiaj krioj la aliaj musoj alkuris.

“Estas la bronza ringo! Estas la talismano!” ili kriis goje, kaj, reenirinte sian boaton, ili baldaŭ atingis la insulon de musoj. Estis ĝustatempe, ĉar la kapitano estis tuj surterigonta sian kargon da katoj, kiam delegitaro de musoj portis al li la valoregan bronzan ringon.

“Bronza ringo,” ordonis la junulo, “obeu vian mastron. Mia ŝipo ekaperu, precize kia ĝi estas antaŭe.”

Tuj la ĝino de la ringo eklaboris, kaj la malnova nigra ŝipo fariĝis la mirinda ora ŝipo kun brokajaj veloj; la belaj velistoj kuris al la arĝentaj mastoj kaj la silkaj ŝnuregoj, kaj baldaŭ ili ekvelis cele la ĉefurbon.

Ha! kiom gaje kantis la velistoj dum ili rapidis trans la glacean maron!

Fine ili atingis la havenon.

La kapitano surteriĝis kaj kuris al la palaco, kie li trovis la magiiston dormanta. La Princino alpremis sian edzon per longa ĉirkaŭbrakado. La magiisto penis eskapi, sed li estis kaptita kaj ligita per fortikaj ŝnuroj.

La sekvan tagon la magiisto, ligite al la vosto de sovaĝa mulo ŝarĝita per nuksoj, disrompiĝis en tiom da pecoj kiom estis nuksoj sur la dorso de la mulo.¹

¹*Traditions Populaires de l'Asie Mineure*. Carnoj et Nicolaïdes. Parizo: Maisonneuve, 1889.

PRINCO HIACINTO
KAJ LA KARA PRINCINETO

FOJE vivis reĝo kiu profunde amis principon, sed ŝi povis edzigi neniun, ĉar ŝi estis sorĉita. Do la Reĝo entreprenis serĉi feon, kaj demandis kion li povas fari por ke la Princino amu lin. La Feino diris al li:

“Sciuj ke la Princino havas grandan katon kiun ŝi multe amas. Kiu estos sufiĉe lerta por treti la voston de tiu kato estas la viro kiun laŭ la destino ŝi edzigos.”



La Reĝo diris al si ke tio ne estos tre malfacila, kaj li foriris de la Feino, firme intencante dispulvorigi la voston de la kato anstataŭ tute ne treti ĝin.

Vi povas imagi ke ne estis nelonge antaŭ ol li iris renkonti la Principon, kaj kaĉjo, kiel kutime, enmarŝis antaŭ li, arkante sian dorson. La Reĝo faris longan paŝon, kaj plene kredis ke la vosto

estas sub lia piedo, sed la kato tiom subite turnis sin ke li tretis nur aeron. Kaj tiel daŭris dum ok tagoj, ĝis la Reĝo komencis kredi ke tiu fatala vosto nepre estas plena de hidrargo—ĝi neniam paŭzis eĉ dum momento.

Fine, tamen, li bonfortune ektrovis kaĉjon dormanta kun sia vosto bele etendita. Do la Reĝo, sen perdi momenton, metis sian piedon sur ĝin forte.

Farante grandegan krion la kato eksaltis kaj tuj fariĝis alta viro, kiu, kolere rigardante la Reĝon, diris:

“Vi edzinigos la Princinon ĉar vi rompis la sorĉon, sed mi venĝos min. Al vi naskiĝos filo, kiu neniam estos feliĉa antaŭ ol trovi ke lia nazo estas tro longa, kaj se iam vi diros al iu ajn kion mi ĵus diris al vi, vi tuj malaperos, kaj neniuj iam revidos vin aŭ reaŭdos pri vi.”

Kvankam la Reĝo ege timis la sorĉiston, li ne povis ne ridi pro tiu minaco.

“Se mia filo havos tiom longan nazon,” li diris al si, “li nepre ĉiam vidos ĝin aŭ sentos ĝin; almenaŭ, se li ne estos blinda aŭ sen manoj.”

Sed, ĉar la sorĉinto jam malaperis, li ne malŝparis pli da tempo per pensado, sed iris serĉi la Princinon, kiu baldaŭ konsentis edzigi lin. Sed efektive, ili ne estis jam de longe geedzoj kiam la Reĝo mortis, kaj la Reĝino havis neniun prizorgindan alian ol sian fileton nomatan Hiacinto. La Princeto havis grandan bluajn okulojn, la plej belajn okulojn en la mondo, kaj dolĉan malgrandan nazon, sed, ve! lia nazo estis tiel enorma ke ĝi kovris duonon de lia vizaĝo. La Reĝino estis nekonsolebla kiam ŝi vidis tiun grandegan nazon, sed ŝiaj servistinoj certigis al ŝi ke ĝi ne estas vere tiel granda kiel ĝi aspektas; ke ĝi estas Roma nazo, kaj oni bezonas nur malfermi iun ajn historilibron por trovi ke ĉiu heroo havas grandan nazon. Al la Reĝino, kiu amegis sian bebon, plaĉis tio kion ili diris al ŝi, kaj kiam ŝi denove rigardis Hiacinton, lia nazo certe ne aspektis laŭ ŝi *vere* tre granda.

La Princo estis tre zorgoplene vartata; kaj, tuj kiam li povis paroli, ili rakontis al li ĉiajn rakontaĉojn pri homoj kiuj havas mallongajn nazojn. Al neniuj estis permesite proksimiĝi al li se ties nazo ne pli-malpli similis al lia, kaj la korteganoj, por favoriĝi

la Reĝinon, komencis tiri la nazojn de siaj beboj plurfoje dum ĉiu tago por longigi ilin. Sed, negrave kion ili faris, tiuj nazoj estis tute neatentindaj kompare kun tiu de la Princo.

Kiam li povis kompreni, li lernis la historion; kaj kiam ajn granda princo aŭ bela princino estis menciata, liaj instruistoj tre atente informis lin ke tiu persono havas longan nazon.

En lia ĉambro pendis bildoj, nur portretoj pri homoj kun tre grandaj nazoj; kaj la Princo kreskis tiom konvinkite ke longa nazo estas tre bela, ke li nenial volus ke lia propra nazo estu eĉ centimetron malpli longa!

Kiam jam pasis lia dudeka naskiĝtago, la Reĝino opiniis ke estas ĝustatempe ke li edziĝu, do ŝi ordonis ke oni portu al li portretojn de diversaj princinoj, kaj inter la aliaj estis bildo de la Kara Princineto!

Nu, ŝi estis filino de granda reĝo, kaj iam ŝi mem posedos plurajn regnojn; sed Princo Hiacinto tute ne povis dediĉi penson al io tia, ĉar lin tro frapis ŝia beleco. La Princino, kiun li opiniis tre ĉarma, tamen, havis malgrandan impertinentan nazon, kiu, sur ŝia vizaĝo, estis kiel eble plej bela, sed ĝi tre embarasis la korteganojn, kiuj tiom kutimiĝis al mokado pri nazetoj ke ili kelkfoje trovis sin mokantaj ŝian antaŭ ol ili pripensis sian agon; sed tio tute ne plaĉis al la Princo, kiu tute ne opiniis ĝin priŝercinda, kaj li eĉ forpelis du el siaj korteganoj kiuj aŭdacis menci i malrespekteme la nazeton de la Kara Princineto!

La aliaj, avertite de tiu ago, lernis zorge pripensi antaŭ ol paroli, kaj unu eĉ diris al la Princo ke, kvankam estas tute vere ke neniu viro povus esti eĉ iomete inda se li ne havus longan nazon, tamen, la beleco de virino estas tre diferenca; kaj li konas klerulon kiu komprenas la Grekan kaj legis en iuj malnovaj manuskriptoj ke la bela Keopatro mem havis “suprenturnitan” nazon!

La Princo donis al li grandiozan donacon rekompence pro tiu plaĉa informo, kaj tuj sendis ambasadorojn por peti la Karan Princineton kiel edzinon. La Reĝo, ŝia patro, konsentis; kaj Princo Hiacinto, kiu, fervora vidi la Princinon, jam antaŭeniris longan distancon por renkonti ŝin, estis antaŭenpaŝanta por kisi ŝian manon kiam, metante hororon en la koron de ĉiuj apudstarantoj, la sorĉisto ekaperis subite kiel fulmo, kaj, preninte la Karan

Princineton, haste forportis ŝin el ilia vidpovo!

La Princo rezulte estis nekonsolebla, kaj deklaris ke nenio instigus lin reiri al sia regno antaŭ ol li retrovos ŝin, kaj rifuzante permesi ke iu ajn el liaj korteganoj sekvu lin, li suriris sian ĉevalon kaj forrajdis malfeliĉe, lasante la beston elekti sian propran vojon.

Do okazis ke post kelka tempo li atingis grandan ebenajon, trans kiun li rajdis dum plena tago sen vidi eĉ unu domon, kaj la ĉevalo kaj rajdanto estis ege malsataj, kiam, dum noktigiĝis, la Princo ekvidis lumon, kiu ŝajne lumis el kaverno.

Li rajdis al ĝi, kaj vidis maljuna virineton, kiu aspektis almenaŭ centjaraĝa.

Ŝi surmetis siajn okulvitrojn por rigardi Princon Hiacinton, sed ŝi bezonis tre longan tempon por povi fiksi ilin sur sin, ĉar ŝia nazo estis ege malgranda.

La Princo kaj la Feino (ĉar tiu ŝi estis), tuj kiam ili rigardis unu la alian, ekridegis kaj kriis sammomente: “Ho, kia komika nazo!”



“Ne tiom komika kiel via,” diris Princo Hiacinto al la Feino; “sed, sinjorino, mi petas ke vi forlasu konsideradon pri niaj nazoj—kiaj ili estas—kaj bonvolu doni al mi ian manĝaĵon, ĉar mi malsategas, ankaŭ mia povra ĉevalo.”

“Plenkore,” diris la Feino. “Kvankam via nazo estas tiom ridinda, tamen, vi estas la filo de mia plej bona amiko. Mi amis vian patron kvazaŭ fraton. Nu, *li* havis tre belan nazon!”

“Kaj bonvolu diri kio mankas al la mia?” diris la Princo.

“Ho! Nenio *mankas* al ĝi,” respondis la Feino. “Tute male, estas tro multe da ĝi. Sed ne gravas, oni povas esti tre inda persono kvankam kun tro longa nazo. Mi diris al vi ke mi estis amiko de via patro; li ofte venis viziti min dum la antaŭaj tagoj, sed sciu ke mi estis tre bela tiutempe; almenaŭ, tion li kutimis diri. Mi deziras paroli al vi pri konversacio kiun ni faris kiam mi lastafoje vidis lin.”

“Certe,” diris la Princo, “jam manĝinte, mi multe plezuriĝos aŭskultante ĝin; sed pensu, sinjorino, mi petegas, ke mi neniom manĝis hodiaŭ.”

“La povra knabo pravas,” diris la Feino; “mi ja forgesis. Envenu, do, kaj mi donos al vi manĝaĵojn, kaj dum vi manĝos mi povos diri al vi la historion per tre malmultaj vortoj—ĉar al mi ne plaĉas senfinaj rakontoj. Tro longa lango estas pli malbona ol tro longa nazo, kaj mi memoras ke kiam mi estis juna oni multe admiris min ĉar mi ne estis vigla babilanto. Oni ofte diris al la Reĝino, mia patrino, ke tiel estas. Ĉar kvankam vi vidas kio mi estas nun, mi estis filino de granda reĝo. Mia patro—”

“Via patro, verŝajne, ricevis manĝaĵon kiam li estis malsata!” interrompis la Princo.

“Ho! certe,” respondis la Feino, “kaj tuj vi ricevos manĝaĵojn. Mi nur volis diri al vi ke—”

“Sed vere mi ne povos aŭskulti ion ajn antaŭ ol iom manĝi,” kriis la Princo, kiu komencis fariĝi tre kolera; sed, memorante ke plejbone estos ke li estu ĝentila ĉar li multe bezonas helpon de la Feino, li aldonis:

“Mi scias ke pro la plezuro aŭskulti vin mi tute forgesus mian propran malsaton; sed mia ĉevalo, kiu ne povas aŭdi vin, nepre devas manĝi!”

La Feinon multe flatis tiu komplimento, kaj ŝi diris, vokinte al siaj servistoj:

“Vi ne atendas eĉ minuton plian, vi estas tiom ĝentila, kaj malgraŭ la enorma dimensio de via nazo vi estas vere agrabla.”

“La Plago prenu la oldulinon! Kiom ŝi babilas pri mia nazo!” diris la Princo al si. “Oni preskaŭ supozus ke mia nazo prenis tiom da ekstra longo kiom mankas al la ŝia! Se mi ne estus tiom

malsata mi baldaŭ ĉesus atenti tiun babilulon kiu kredas malmulte paroli! Kiom stultaj estas homoj, kiuj ne rimarkas siajn proprajn misojn! Tio rezultis el ŝia princina stato: ŝin tro dorlotis flatantoj, kiuj kredigis ŝin ke ŝi tre modere parolas!”

Intertempe la servistoj metis la manĝaĵojn sur la tablon, kaj la Princon multe amuzis aŭdi la Feinon, kiu faras al ili mil demandojn nur por plezuriĝi per aŭdi sian propran parolon; precipe li rimarkis unu servistinon kiu, ne grave kio estis dirata, ĉiam sukcesis iel laŭdi la saĝecon de sia mastrino.

“Nu!” li pensis, dum li manĝis, “mi tre ĝojas ke mi venis ĉi tien. Tio ja montras al mi kiom prudenta mi estas ĉar mi neniam atentis flatantojn. Tiaj personoj laŭdas nin rekte, senhonte, kaj kaŝas niajn mankojn aŭ ŝanĝas ilin en virtojn. Rilate al mi, min ili neniam trompos. Mi konas miajn proprajn difektojn, mi esperas.”

Povra Princo Hiacinto! Li vere kredis kion li diras, kaj tute ne konceptis ke la homoj kiuj laŭdis lian nazon nur mokas lin, same kiel la servistino de la Feino mokas ŝin; ĉar la Princo vidis ŝin ridi kaŝe kiam ŝi povis fari tion sen ke la Feino rimarkas ŝin.

Tamen, li diris nenion, kaj baldaŭ, kiam lia malsato komencis malaperi, la Feino diris:

“Mia kara Princo, mi petas ke vi bonvolu movi vin iomete tiudirekte, ĉar via nazo faras tian ombron ke mi vere ne povas vidi kion mi havas sur mia telero. Ha! dankon. Nun ni parolu pri via patro. Kiam mi iris al lia kortego li estis nur knabeto, sed tio estis antaŭ kvardek jaroj, kaj mi estas en ĉi dezerta loko ekde tiam. Diru al mi kio



okazas aktuale; ĉu la damoj tiom amas amuziĝi kiel antaŭe? Mia-tempe oni vidis ilin ĉe festoj, teatroj, baloj, kaj promenadoj ĉiutage. Ve! *Kiom* longa estas via nazo! Mi ne povas kutimiĝi al ĝi!”

“Vere, sinjorino,” diris la Princo, “bonvolu ĉesi menciigi mian nazon. Ne povas gravi al vi kia ĝi estas. Mi tre kontentas pri ĝi,

kaj ne deziras ke ĝi estu malpli longa. Oni devas akcepti kion oni ricevis.”

“Nun vi koleras kontraŭ mi, mia povra Hiacinto,” diris la Feino, “kaj mi certigas al vi ke mi ne intencis ĉagreni vin; male, mi volis helpi vin. Kvankam vere ne povas ne ŝoki min via nazo, mi penos nenion diri pri ĝi. Mi eĉ penos kredi ke vi havas ordinaran nazon. Efektive, oni povus fari el ĝi tri normalajn nazojn.”

La Princo, kiu ne plu estis malsata, tiom senpacienciĝis pro la konstantaj komentoj de la Feino pri lia nazo ke fine li ĵetis sin sur sian ĉevalon kaj forrajdis. Sed kien ajn li iris dum sia veturado li opiniis onin frenezaj, ĉar ili ĉiuj parolis pri lia nazo, sed li ne povis agnoski ke ĝi estas tro longa, ĉar li kutimis dum sia tuta vivo aŭdi ĝin nomata bela.

La olda Feino, kiu volis feliĉigi lin, fine elpensis planon. Ŝi fermis la Karan Princineton en kristalan palacon, kaj metis tiun palacon tien kie la Princo ne povus ne trovi ĝin. Lia ĝojo pro revidi la Princinon estis ekstrema, kaj li eklaboris laŭeble plej forte penante rompi ŝian karceron; sed malgraŭ ĉiuj penoj liaj li plene malsukcesis. Senespere li pensis ke almenaŭ li provos proksimiĝi sufiĉe por paroli al la Kara Princineto, kiu, siaflanke, etendis sian manon por ke li kisu ĝin; sed negrave kiudirekte li turnis sin, li tute ne povis levi ĝin al ŝiaj lipoj, ĉar lia longa nazo ĉiam malebligis tion. La unua fojon li ekkomprenis kiom longa ĝi vere estas, kaj kriis:

“Nu, estas agnoskende ke mia nazo ja estas tro longa!”

Tuj la kristala karcero ekmilpeciĝis, kaj la olda Feino, prenante la Karan Princineton per mano, diris al la Princo:

“Nun, diru ĉu vi ne multe dankemas al mi. Estis senutile paroli al vi pri via nazo! Vi neniam trovus kiom eksterordinara ĝi estis se ĝi ne malebligus ke vi faru kion vi deziras. Atentu ke sinamo nebligas ke ni konu niajn proprajn mens- kaj korpo-difektojn. Nia racio vane penas montri ilin al ni; ni rifuzas vidi ilin antaŭ ol ni trovas ilin kontraŭantaj niajn celojn.”

Princo Hiacinto, kies nazo nun tute similas tiun de ĉiu alia, ne perdis la oportunon profiti per tiu leciono. Li edzinigis la Karan Princineton, kaj ili vivis feliĉe por ĉiam.¹

¹*Le Prince désir et la Princesse Mignonne.* Par Madame Leprince de Beaumont.

ORIENTE DE LA SUNO KAJ OKCIDENTE DE LA LUNO

FOJE estis malriĉa kultivisto kiu havis multajn infanojn kaj malmulton por doni al ili ĉu manĝan ĉu vestan. Ili ĉiuj estis belaj, sed plej bela el ĉiuj estis la plej juna filino, kiu estis tiom bela ke ne estis limo de ŝia beleco.

Do foje—tre malfrue dum ĵaŭda vespero en la aŭtuno, dum sovaĝa vetero regis, kaj estis terure mallume, kaj pluvegis tiom forte kaj blovis tiom forte ke la muroj de la dometo skuiĝis—ili ĉiuj sidis kune apud la kameno, ĉiu el ili estis okupata pri io, kiam subite iu frapis trifoje la fenestrovitron. La viro eliris por vidi kio okazas, kaj kiam li estis ekstere li vidis ke tie staras grandega blanka urso.

“Bonan vesperon al vi,” diris la Blanka Urso.

“Bonan vesperon,” diris la viro.

“Ĉu vi donos al mi vian plej junan filinon?” diris la Blanka Urso; “se jes, vi estos tiom riĉa kiom malriĉa vi estas nun.”

Efektive la viro tute ne kontraŭus riĉiĝon, sed li pensis: “Unue mi devos demandi pri tio al mia filino,” do li eniris kaj diris al ili ke estas granda blanka urso ekster la domo, kiu fidiinde promesis riĉiĝi ilin ĉiujn se li povos havi la plej junan filinon.

Ŝi diris ne, kaj plene rifuzis; do la viro reeliris, kaj konsentis kun la Blanka Urso ke li revenu la sekvan ĵaŭdan vesperon por ricevi ŝian respondon. Post tio la viro persvadis ŝin, kaj tiom parolis al ŝi pri la riĉoj kiujn ili havos, kaj kiel bonege estos por ŝi, ke fine ŝi decidis akcepti, kaj lavis kaj riparis ĉiujn siajn ĉifonajn vestojn, beligis sin laŭeble, kaj tenis sin preta foriri. Malmulton ŝi posedis por kunpreni.

La sekvan ĵaŭdan vesperon la Blanka Urso venis forpreni ŝin. Ŝi sidiĝis sur lian dorson kun sia sako, kaj tiel ili foriris. Kiam ili

estis irintaj grandan parton de la veturo, la Blanka Urso diris: “Ĉu vi timas?”

“Ne, tute ne,” diris ŝi.

“Firme tenu mian pelon, tiel ne estos danĝero,” diris li.

Kaj tiel ŝi rajdis, tre tre for, ĝis ili atingis grandan monton. La Blanka Urso frapis sur ĝin, kaj pordo malfermiĝis, kaj ili eniris kastelon kie estis multaj brile iluminataj ĉambroj kiuj brilis pro oro kaj arĝento, ankaŭ granda halo en kiu tablo kun multaj manĝaĵoj, kaj estis tiel grandioze ke estus malfacile komprenigi



kiom grandioze estis. La Blanka Urso donis al ŝi arĝentan sonorilon, kaj diris al ŝi ke kiam ŝi ion bezonos ŝi nur sonigu la sonorilon kaj tuj aperos kion ajn ŝi volas. Do manĝinte, dum la nokto proksimiĝis, ŝi dormemis post sia veturo, kaj pensis ke ŝi deziras enlitiĝi. Ŝi sonigis la sonorilon, kaj apenaŭ ŝi tuŝis ĝin ŝi trovis sin en ĉambro kie estas lito pretigita por ŝi, tiel bela dormomeblo kiel oni povus deziri. Ĝi havis kapkusenojn el silko, kaj kurtenojn el silko kun oraj franĝoj, kaj ĉio en la ĉambro estis el oro aŭ arĝento; sed kiam ŝi estis kuŝiĝinta kaj estingiinta la

lumon viro venis kaj kuŝiĝis apud ŝi, kaj jen li estas la Blanka Urso, kiu formetas la formon de besto dumnokte. Ŝi neniam vidis lin, tamen, ĉar ĉiam li venis kiam ŝi estis estinginta la lumon, kaj foriris antaŭ ol aperis la taglumo.

Do ĉio okazis bone kaj feliĉe dum kelka tempo, sed post tio ŝi komencis estis tre malfeliĉa kaj malgaja, ĉar la tutan tagon ŝi devis estis sola; kaj ŝi vlegis hejmeniri al siaj patro kaj patrino kaj fratoj kaj fratinoj. La Blanka Urso demandis kion ŝi deziras, kaj ŝi diris al li ke estas tiom tede en la monto, kaj ke ŝi devas esti tute sola, kaj ke en la domo de ŝiaj gepatroj hejme estas ĉiuj ŝiaj fratoj kaj fratinoj, kaj ĉar ŝi ne povas iri al ili ŝi tiom malĝojas.

“Eble tio estus kuracebla,” diris la Blanka Urso, “se vi nur promesus al mi ke vi neniam sola parolos kun via patrino, sed nur kiam ĉeestas la aliaj; ĉar ŝi volos preni vian manon,” li diris, “kaj volos konduki vin en ĉambron por paroli sola kun vi; sed tion vi nepre ne faru, alie vi kaŭzus grandan mizeron al ni ambaŭ.”

Do unu dimanĉon la Blanka Urso venis kaj diris ke ili nun povos ekveturi por viziti ŝiajn patron kaj patrinon, kaj ili veturis tien, ŝi sidis sur lia dorso, kaj ili veturis tre tre longe, kaj necesis tre tre longa tempo; sed fine ili atingis grandan blankan domon de kultivisto, kaj ŝiaj fratoj kaj fratinoj ĉirkaŭkuradis ekster ĝi, ludante, kaj ĝi estis tiom bela ke estis plezurige rigardi ĝin.

“Viaj gepatroj loĝas ĉi tie, nun,” diris la Blanka Urso; “sed ne forgesu kion mi diris al vi, alie vi multe damaĝos kaj vin kaj min.”

“Tute ne,” diris ŝi, “mi neniom forgesos,” kaj tuj kiam ŝi estis hejme la Blanka Urso turnis sin kaj reiris.

Estis tiom da ĝojado kiam ŝi eniris al siaj gepatroj ke ŝajnis ke neniam ĝi povus finiĝi. Ĉiu kredis ke neniam eblus esti sufiĉe dankema al ŝi pro ĉio kion ŝi faris por ili ĉiuj. Nun ili havas ĉion deziratan, kaj ĉio estas kiel eble plej bona. Ili ĉiuj demandis kiel ŝi sukcesas kie ŝi loĝas. Ankaŭ por ŝi ĉio estas bona, ŝi diris; kaj ŝi havas ĉion kion ŝi povus deziri. Kiajn aliajn respondojn ŝi faris mi ne povas diri, sed mi estas iom certa ke ili ne ricevis multan informon de ŝi. Sed dum la posttagmezo, kiam ili estis tagmezmanĝintaj, ĉio okazis precize kiel antaŭdiris la Blanka Urso. Ŝia patrino volis paroli sola kun ŝi en sia propra ĉambro. Sed ŝi

memoris kion diris la Blanka Urso, kaj tute rifuzis. “Kion ni povas diri, ni povos diri iam ajn,” ŝi respondis. Sed iel aŭ tiel ŝia patrino fine persvadis ŝin, kaj ŝi devis rakonti la tutan historion. Do ŝi rakontis ke ĉiun nokton viro venas kaj kuŝiĝas apud ŝi kiam la lumoj estas ĉiuj estingitaj, kaj ke ŝi neniam vidas lin, ĉar li ĉiam foriras antaŭ ol fariĝas lume en la mateno, kaj ŝi estas konstante malfeliĉa, pensante kiom feliĉa ŝi estus se ŝi nur povus vidi lin, kaj ke dum la tuta tago ŝi devas esti sola, kaj estas tre tede kaj solece. “Ho!” kriis la patrino, hororoplene, “verŝajne vi dormas kun trolo! Sed mi instruos al vi metodon vidi lin. Vi havu parton de unu el miaj kandeloj, kiun vi povos forpreni kaŝitan inter viaj mamoj. Rigardu lin per tio dum li dormos, sed atentu ne lasi sebon fali sur lin.”

Do ŝi prenis la kandelon, kaj kaŝis ĝin inter siaj mamoj, kaj kiam proksimiĝis la vespero la Blanka Urso venis forporti ŝin. Kiam ili jam iris iom longe dum sia veturo, la Blanka Urso demandis al ŝi ĉu ĉio okazis precize kiel li antaŭdiris, kaj ŝi devis agnoski ke jes. “Do, se vi faris kion deziris via patrino,” diris li, “vi kaŭzis grandan mizeron al ni ambaŭ.” “Ne,” ŝi diris, “mi tute nenion faris.” Do kiam ŝi atingis la hejmon kaj enlitiĝis estis tute same kiel antaŭe, kaj viro venis kaj kuŝiĝis apud ŝi, kaj malfrue dum la nokto, kiam ŝi povis aŭdi lin dormanta, ŝi ellitiĝis kaj faris fajreton, flamigis sian kandelon, lasis la lumon brili sur lin, kaj vidis lin, kaj li estas la plej bela princo kiun iam vidis okuloj, kaj ŝi tiom amegis lin ke ŝajnis al ŝi ke nepre ŝi mortos se ŝi ne tuj tiumomente kisis lin. Do ŝi ja kisis lin; sed farante tion ŝi lasis tri gutojn da varmega sebo fali sur lian ĉemizon, kaj li vekiĝis. “Kion vi nun faris?” diris li; “vi kaŭzis mizeron al ni ambaŭ. Se vi eltenus dum nur unu jaro mi fariĝus libera. Mi havas duon-patrinon kiu sorĉis min tiel ke mi estas blanka urso tage kaj viro nokte; sed nun ĉio finiĝis inter vi kaj mi, kaj mi devas forlasi vin kaj iri al ŝi. Ŝi loĝas en kastelo kiu situas oriente de la suno kaj okcidente de la luno, kaj ankaŭ tie estas princino kun nazo tri ulnojn² longa, kaj nun ŝi estas la persono kiun mi devos edzinigi.”

Ŝi ploris kaj lamentis, sed tute vane, ĉar li devas foriri. Ŝi

² Ulnoj estas arkaika mezuruno variinta laŭ landoj kaj tradicioj; eble 50 cm.

demandis al li ĉu ŝi ne povos iri kun li. Sed ne, tio ne povos esti. “Ĉu vi povas do diri al mi la vojon, kaj mi serĉos vin—tion certe mi rajtos fari!”

“Jes, vi rajtas fari tion,” diris li; “sed ne ekzistas vojo tien. La loko situas oriente de la suno kaj okcidente de la luno, kaj neniam vi povus trovi vian vojon tien.”

Kiam ŝi vekiĝis en la mateno kaj la Princo kaj la kastelo mankis, kaj ŝi kuŝadis sur malgranda verda spaco en la mezo de



obskura densa arbaro. Flanke de ŝi kuŝis la sama ĉifonaro kiun ŝi estis kunportinta el sia propra hejmo. Do kiam ŝi forfrotis la dormon el siaj okuloj, kaj ploris ĝis laciĝo, ŝi komencis sian veturon, kaj sekve ŝi marŝis multe multajn longajn tagojn, ĝis fine atingi grandan monton. Ekster ĝi sidis olda virino, ludanta per ora pomo. La knabino demandis al ŝi ĉu ŝi konas la vojon al la Princo kiu loĝas kun sia duonpatrino en la kastelo situanta oriente de la suno kaj okcidente de la luno, kaj kiu edzinigos

princinon kun nazo tri ulnojn longa. “Kiel estas ke vi scias pri li?” demandis la oldulino; “eble vi estas tiu kiu devus edzigi lin.” “Jes ja,” ŝi diris. “Do, vi, ĉu?” diris la oldulino; “mi scias pri li nur ke li loĝas en kastelo oriente de la suno kaj okcidente de la luno. Vi bezonos multan tempon por atingi ĝin, se efektive vi ja atingos ĝin; sed vi rajtos prunti mian ĉevalon, kaj per ĝi vi povos rajdi al oldulino kiu estas najbaro mia: eble ŝi povos informi vin pri li. Veninte tien vi devos frapi la ĉevalon malantaŭ ties liva orelo kaj ordoni ke ĝi reiru hejmen; sed vi rajtas kunpreni la oran pomon.”

Do la knabino sidigis sin sur la ĉevalon, kaj rajdis longe longan distancon, kaj fine ŝi venis al la monto, kie oldulino sidas ekstere kun ora kardilo. La knabino demandis al ŝi ĉu ŝi konas la vojon al la kastelo situanta oriente de la suno kaj okcidente de la luno; sed ŝi diris kion diris la unua oldulino: “Mi scias pri li nur ke li loĝas en kastelo oriente de la suno kaj okcidente de la luno. Vi bezonos multan tempon por atingi ĝin, se efektive vi ja atingos ĝin; sed vi rajtos prunti mian ĉevalon, kaj per ĝi vi povos rajdi al oldulino kiu loĝas plej proksime al mi: eble ŝi povos informi vin pri li. Veninte tien vi frapu la ĉevalon malantaŭ ties liva orelo kaj ordonu ke ĝi reiru hejmen.” Dirinte tion ŝi donos al ŝi la oran kardilon, ĉar eble ĝi utilos al ŝi, ŝi diris.

Do la knabino sidigis sin sur la ĉevalon, kaj rajdis lacige longan distancon denove, kaj post tre longa tempo ŝi venis al granda monto, kie oldulino sidas, ŝpinante per ora ŝpinrado. Ankaŭ al tiu virino ŝi demandis ĉu ŝi konas la vojon al la Princo, kaj kie trovi la kastelon situantan oriente de la suno kaj okcidente de la luno. Sed estis nur same kiel antaŭe. “Eble vi estas tiu kiu devus edzigi lin,” diris la oldulino. “Jes ja, mi estas tiu,” diris la knabino. Sed ĉi tiu oldulino ne konis la vojon pli bone ol la aliaj—ĝi estas oriente de la suno kaj okcidente de la luno, tion ŝi sciis, “kaj vi bezonos multan tempon por atingi ĝin, se efektive vi ja atingos ĝin,” ŝi diris; “sed vi rajtos prunti mian ĉevalon, kaj mi konsilas ke plej bone estos ke vi rajdu al la Orienta Vento, kaj demandu al li: eble li scias kie estas la kastelo, kaj blovos vin tien. Sed atinginte lin vi devos frapi la ĉevalon malantaŭ ties liva orelo kaj li revenos hejmen.” Kaj dirinte tion ŝi donis al ŝi la oran ŝpinradon, kaj diris: “Eble vi trovos ĝin utila.”

La knabino devis rajdi dum ege multaj tagoj, kaj longan kaj lacigan periodon, antaŭ ol atingi tien; sed fine ŝi ja alvenis, kaj ŝi demandis al la Orienta Vento ĉu li scias indiki al ŝi la vojon al la Princo kiu loĝas oriente de la suno kaj okcidente de la luno. “Nu,” diris la Orienta Vento, “mi ja aŭdis pri la Princo, kaj pri lia kastelo, sed mi ne konas la vojon al ĝi, ĉar neniam mi tiom foren blovis; sed, se vi deziras, mi akompanos vin al mia frato la Okcidenta Vento: eble li scias, ĉar li estas multe pli forta ol mi. Vi rajtas sidi sur mia dorso, kaj tiel mi povos porti vin tien.” Do ŝi sidigis sin sur lian dorson, kaj ili iris rapidege! Kiam ili alvenis, la Orienta Vento eniris kaj diris ke la knabino kiun li alportis estas tiu kiu devus edzigi la Princon ĉe la kastelo situanta oriente de la suno kaj okcidente de la luno, kaj ke nun ŝi disveturas serĉante lin, do li venis tien kun ŝi, kaj deziras aŭdi ĉu la Okcidenta Vento scias kie estas la kastelo. “Ne,” diris la Okcidenta Vento; “tiom foren mi neniam blovis: sed se vi deziras mi akompanos vin al la Suda Vento, ĉar li estas multe pli forta ol ni ambaŭ, kaj li vagis tre multe, kaj eble li povos diri al vi tion kion vi volas scii. Vi rajtas sidigi vin sur mian dorson, kaj mi portos vin al li.”

Do ŝi faris tion, kaj veturis al la Suda Vento, kaj ne bezonis longan tempon por la veturo. Veninte tien, la Okcidenta Vento demandis al li ĉu li povas indiki al ŝi la vojon al la kastelo situanta oriente de la suno kaj okcidente de la luno, ĉar ŝi estas la knabino kiu devus edzigi la Princon loĝantan tie. “Ho, ĉu vere!” diris la Suda Vento, “ĉu ŝi? Nu,” diris li, “mi vagis tre multe dum mia vivo, kaj en ĉiaj lokoj, sed mi neniam blovis tiom foren. Se vi deziras, tamen, mi akompanos vin al mia frato la Norda Vento; li estas la plej aĝa kaj plej forta de ni ĉiuj, kaj se li ne scias kie ĝi estas neniu en la tuta mondo povos informi vin. Vi rajtas sidi sur mia dorso, kaj tiel mi portos vin tien.” Do ŝi sidigis sin sur lian dorson, kaj li foriris de sia domo ege haste, kaj ili ne longe bezonis veturi. Kiam ili proksimiĝis al la loĝejo de la Norda Vento, li estis tiom sovaĝa kaj frenezaga ke ili sentis fridajn blovojn longe antaŭ ol alveni. “Kion vi volas?” li muĝis el for, kaj ili ekhaltis aŭdante. Diris la Suda Vento: “Jen mi, kaj jen ŝi kiu devus edzigi la Princon loĝantan en la kastelo situanta oriente de la suno kaj okcidente de la luno. Kaj nun ŝi volas demandi al vi ĉu vi iam estis tie, kaj ĉu vi

povas indiki al ŝi la vojon, ĉar ŝi volonte retrovus lin.”

“Jes,” diris la Norda Vento, “mi scias kie ĝi estas. Foje mi blovis tremolan folion tien, sed mi tiom laciĝis ke dum multaj sekvaj tagoj mi tute ne povis blovi. Tamen, se vi vere firme deziras iri tien, kaj ne timas akompani min, mi portos vin sur mia dorso, kaj provos ĉu mi povos blovi vin tien.”

“Iri tien mi devas,” diris ŝi; “kaj se ekzistas metodo iri tien mi uzos ĝin; kaj mi ne timas, negrave kiom vi rapidos.”

“Bone, do,” diris la Norda Vento; “sed vi devos dormi ĉi tie hodiaŭ nokte, ĉar por atingi tien ni devos havi plenan tagon antaŭ ni.”



La Norda Vento vekis ŝin akurate la sekvan matenon, kaj pufigis sin, kaj faris sin tiom granda kaj tiom forta ke estis timige vidi lin, kaj foren ili iris, alte tra la aero, kvazaŭ ili ne haltus ĝis atingi la finon mem de la mondo. Sube estis grandega ŝtormo! Ĝi blovfrakasis arbarojn kaj domojn, kaj kiam ili estis super la maro la ŝipoj baldaŭ pereis centope. Kaj tiel ili pli kaj pli forrapidis, kaj longa tempo pasis, kaj post tio ankoraŭ pli da tempo, kaj ankoraŭ ili estis super la maro, kaj la Norda Vento laciĝis pli kaj pli, kaj fine li tiom ellaciĝis ke li apenaŭ plu povis blovi, kaj li subiris, pli kaj pli suben, ĝis fine li tiom subiris ke la pintoj de la ondoj batadis la kalkanojn de la povra knabino kiun li portas. “Ĉu vi timas?” diris la Norda Vento. “Mi ne timas,” diris ŝi; kaj tio estis vera.

Sed ili ne estis tre tre for de la tero, kaj restis ankoraŭ ĝuste sufiĉa forto en la Norda Vento por ke li povu ĵeti ŝin sur la bordon, tuj sub la fenestroj de kastelo situanta oriente de la suno kaj okcidente de la luno; sed tiam li estis tiom laca kaj elĉerpita ke li devis ripozi dum pluraj tagoj antaŭ ol povi reiri al sia propra hejmo.

La sekvan matenon ŝi sidiĝis sub la muroj de la kastelo por ludi per la ora pomo, kaj la unua persono kiun ŝi vidis estis la knabino kun la longa nazo, kiu edzigos la Princon. “Kiom vi volas por tiu ora pomo via, knabino?” diris ŝi. “Ĝi ne estas aĉetebla per oro aŭ mono,” respondis la knabino. “Se ĝi ne estas aĉetebla per oro aŭ mono, per kio ĝi ja estas aĉetebla? Proponu kion vi deziras,” diris la Princino.

“Nu, se mi rajtos iri al la Princo kiu estas ĉi tie, kaj resti kun li hodiaŭ nokte, vi povos havi ĝin,” diris la knabino veninta kun la Norda Vento. “Vi rajtas fari tion,” diris la Princino, ĉar ŝi jam decidis kion fari. Do la Princino ricevis la oran pomon, sed kiam la knabino supreniris al la ĉambro de la Princo tiunokte li jam dormis, ĉar la Princino okazigis tion. La povrulino vokis al li, kaj skuis lin, kaj intertempe ŝi ploris; sed ŝi ne povis veki lin. Matene, tuj je la tagiĝo, envenis la Princino kun la longa nazo, kaj elpelis ŝin. Dum la tago ŝi denove sidis sub la fenestroj de la kastelo, kaj komencis kardi per sia ora kardilo; kaj ĉio okazis same kiel antaŭe. La princino demandis al ŝi kiom ŝi volas por ĝi, sed ŝi respondis ke ĝi ne estas aĉetebla per oro aŭ mono, sed se ŝi rajtos iri al la Princo, kaj resti kun li dum la nokto, ŝi ricevos ĝin. Sed kiam ŝi supreniris al la ĉambro de la Princo li denove dormis, kaj, negrave kiom ŝi vokis al li, aŭ skuis lin, aŭ ploris, li plu dormis, kaj ŝi ne povis vigligi lin. Kiam taĝigis en la mateno, la Princino kun la longa nazo ankaŭ venis, kaj denove elpelis ŝin. Kiam la tago estis plene veninta, la knabino sidigis sin sub la fenestroj de la kastelo, por ŝpini per sia ora ŝpinrado, kaj la Princino kun la longa nazo volis ankaŭ tion. Do ŝi malfermis la fenestron, kaj demandis kiom ŝi akceptos por ĝi. La knabino diris kion ŝi diris ambaŭfoje antaŭe—ke ĝi ne estas aĉetebla per oro aŭ mono, sed se ŝi rajtos iri resti dum la nokto kun la Princo kiu loĝas tie, ŝi ricevos ĝin.

“Jes,” diris la Princino, “mi volonte konsentos al tio.”

Sed en tiu loko estis kelkaj homoj kiuj estis antaŭe forportitaj, kaj ili sidis en la ĉambro kiu estis apud tiu de la Princo, kaj informiĝis ke virino estis tie kiu ploris kaj vokis lin du noktojn sinsekve, kaj ili parolis al la Princo pri tio. Do tiun vesperon, kiam la Princino denove venis kun la dormiga trinkaĵo, li ŝajnis trinki ĝin, sed elverŝis ĝin malantaŭ si, ĉar li suspektis ke ĝi estas dormigaĵo. Do kiam la knabino iris en la ĉambron de la Princo ĉifoje li estis veka, kaj ŝi devis diri al li kiel ŝi venis tien. “Vi venas ĝustatempe,” diris la Princo, “ĉar mi edziĝus morgaŭ; sed mi rifuzas la longanazan Princinon, kaj nur vi povas savi min. Mi diros ke mi volas trovi kion povas fari mia novedzino, kaj petos ke ŝi lavu la ĉemizon sur kiu estas la tri gutoj da sebo. Tion ŝi akceptos fari, ĉar ŝi ne scias ke vi faligis la gutojn sur ĝin; sed neniuj povas ellavi ilin escepte de persono naskita homo: tion ne



povas fari ulo el grupo de troloj; kaj tiam mi diros ke neniuj estos mia edzino escepte de virino povanta fari tion, kaj mi scias ke vi ja povas.” Estis granda ĝojo kaj gajo inter ili dum tiu tuta nokto, sed la sekvan tagon, kiam la geedziĝo okazu, la Princo diris: “Mi devas trovi kion povas fari mia novedzino.” “Tion vi rajtas fari,” diris la duonpatrino.

“Mi havas valoran ĉemizon, kiun mi deziras surhavi dum mia edziĝo, sed tri gutoj da sebo falis sur ĝin kaj mi volas ke ili estu ellavitaj, kaj mi ĵuris

edzinigi nur virinon kapablan fari tion. Se ŝi ne povas fari tion, ŝi ne estas edziniginda.”

Nu, tio estas facilaĵo, ili opiniis, kaj akceptis fari tion. La

Princino kun la longa nazo komencis lavi laŭeble, sed ju pli ŝi lavis kaj frotis, des pli grandaj fariĝis la makuloj. “Ha! vi tute ne povas lavi,” diris la olda trolinaĉo, kiu estis ŝia patrino. “Donu ĝin al mi.” Sed ankaŭ ŝi ne longe havis la ĉemizon en siaj manoj antaŭ ol ĝi aspektis ankoraŭ pli malbona, kaj ju pli ŝi lavis ĝin kaj frotis ĝin, des pli grandaj kaj nigraj fariĝis la makuloj.

Do la aliaj troloj devis veni kaj lavi, sed, ju pli ili lavis, des pli nigra kaj malbela fariĝis la ĉemizo, ĝis fine ĝi estis nigra kvazaŭ tiritita el la kamentubo. “Ho,” kriis la Princo, “neniu el vi eĉ iomete taŭgas! Almozpetantino sidas ekster la fenestro, kaj mi certas ke ŝi povas lavi pli bone ol ĉiu el vi! Envenu knabino!” li kriis. Do ŝi envenis. “Ĉu vi povas purigi ĉi tiun ĉemizon?” li kriis. “Ho! mi ne scias,” ŝi diris; “sed mi provos.” Kaj tuj kiam ŝi prenis la ĉemizon kaj trempis ĝin en la akvon ĝi fariĝis blanka kiel nova neĝo, kaj eĉ pli blanka ol tio. “Mi edzinigos vin,” diris la Princo.

Je tio la olda trolinaĉo ekfuriozis tiom ke ŝi krevis, kaj la Princino kun la longa nazo kaj ĉiuj troletoj evidente ankaŭ krevis, ĉar oni neniam poste aŭdis pri ili. La Princo kaj lia edzino liberigis ĉiujn homojn kaptitajn tie, kaj forportis kun si la tutajn oran kaj arĝenton kiun ili povis porti, kaj foriris tre for de la kastelo situanta oriente de la suno kaj okcidente de la luno.¹

¹ Asbjornsen kaj Möe.

LA FLAVA NANO

FOJE vivis reĝino kiu estis la patrino de tre multaj infanoj, kaj el ili ĉiuj restis nur unu filino. Sed ŝi tamen valoris almenaŭ mil infanojn.

Ŝia patrino kiu, post morto de la Reĝo ŝia patro, havis tute nenion en la mondo tiom valoran al ŝi kiel ĉi tiun principeton, tiom terure timis perdi ŝin ke ŝi ege dorlotis ŝin, kaj neniam provis korekti iun ajn mison ŝian. La konsekvenco estis ke tiu personeto, kiu estis kiel eble plej bela, kaj iun tagon surhavas kronon, kreskis tiom fiera kaj tiom amanta sian propran belecon ke ŝi malestimis ĉiun alian en la mondo.

La Reĝino, ŝia patrino, per siaj karesoj kaj flatado, helpis kredigi al ŝi ke nenio estas tro bona por ŝi. Ŝi vestis sin preskaŭ ĉiam per la plej belaj roboj, kiel feino, aŭ kiel reĝino ĉasonta, kaj la damoj de la Kortego sekvis ŝin vestite kiel arbarfeinoj.

Kaj kaŭzante ke ŝi estu eĉ pli vanta la Reĝino pentrigis ŝian portreton fare de la plej lertaj pentristoj kaj sendis ĝin al pluraj najbaraj reĝoj al kiuj ŝi estis tre amikema.

Kiam ili vidis tiun portreton ili ekamis la Princinon—ĉiu el ili, sed ĉiun el ili ĝi efektis alie. Unu malsaniĝis, unu plene freneziĝis, kaj kelkaj el la plej bonfortunaj ekiris renkonti ŝin tuj kiam eble; sed tiuj povraj princoj fariĝis ŝiaj sklavoj tuj kiam ili ekvidis ŝin.

Neniam ekzistis pli gaja Kortego. Dudek plaĉegaj reĝoj faris ĉion elpenseblan por agrabligi sin, kaj elspezinte ege multan monon por fari unusolan distraĵon ili opiniis sin tre bonfortunaj se la Princino diris “Jen io bela”.

Tiom da admirado ege plaĉis al la Reĝino. Pasis eĉ ne unu tago dum kiu ŝi ne ricevis sep aŭ ok mil sonetojn, kaj egale

multajn elegiojn, madrigalojn, kaj kantojn, kiujn sendis al ŝi ĉiuj poetoj en la mondo. La tutaj prozo kaj poezio verkataj ĝuste tiam temis pri Bellissima—ĉar tiel nomiĝis la Princino—kaj ĉiuj kampadfajroj kiujn ili havis bruligis tiujn versojn, kiuj krakadis kaj scintilis pli bone ol ĉiu alia lignospeco.

Bellissima estis jam dekkvinjaraĝa, kaj ĉiu el la Princoj volis edzinigi ŝin, sed eĉ ne unu el ili kuraĝis diri tion. Kiel ili ja povus, sciante ke iu ajn el ili povus detranĉi sian kapon kvin aŭ ses-foje ĉiutage nur por plaĉi al ŝi, kaj ŝi opinius tion trivialaĵo, tiom malgrave por ŝi estis? Vi povas imagi kiom malmolkoraj ŝiaj amantoj kredis ŝin; kaj la Reĝino, kiu deziris ke ŝi edziniĝu, ne scipovis persvadi ŝin serioze pripensi la aferon.

“Bellissima,” ŝi diris, “mi ja volas ke vi ne estu tiom fiera. Pro kio vi malestimas ĉiujn la afablajn reĝojn? Mi deziras ke vi edzigu iun el ili, kaj vi ne provas plaĉi al mi.”

“Mi estas tiom feliĉa,” Bellissima respondis: “lasu min paca, sinjorino. Mi ne deziras ami iun ajn.”

“Sed vi estus tre feliĉa kun iu ajn el tiuj princoj,” diris la Reĝino, “kaj mi multe kolerus se vi ekamus iun personon kiu ne indas vin.”

Sed la Princino tiel alte taksis sin ke ŝi ne opiniis iun el siaj amantoj sufiĉe lerta aŭ bela por ŝi; kaj ŝia patrino, kiu komencis vere koleri pro ŝia firma decido ne edziniĝi, komencis voli ne esti permesinta ke ŝi tiom laŭdezire agu.

Fine, ne sciante kion alian fari, ŝi decidis konsulti certan sorĉistinon kiun oni nomis “la Feino de la Dezerto”. Nu, tio estis tre malfacile farebla, ĉar ŝin gardadis kelkaj teruraj leonoj; sed feliĉe la Reĝino jam antaŭ longe aŭdis ke kiu volas pasi tiujn leonojn sekure devas ĵeti al ili kukon konsistantan el milifaruno, kandaĵo, kaj krokodilovoj. Tiun kukon ŝi propramane preparis, kaj metinte ĝin en korbeton, ŝi ekiris serĉi la Feinon. Sed ĉar ŝi ne kutimiĝis al longa marŝado, ŝi baldaŭ tre laciĝis kaj sidiĝis ĉe la piedo de arbo por ripozi, kaj baldaŭ ekdormis. Kiam ŝi vekiĝis ŝin ĉagrenis trovi la korbon malplena. La kuko tute mankis! Kaj eĉ pli ĉagrene, tiumomente ŝi aŭdis la muĝadon de la grandaj leonoj, kiuj ektrovis ke ŝi estas proksima kaj venas serĉi ŝin.

“Kion mi faru?” ŝi kriis; “mi estos plene manĝita,” kaj ĉar ŝi

multe tro timis por kuri eĉ unusolan paŝon, ŝi komencis plori, kaj apogis sin kontraŭ la arbo sub kiu ŝi dormadis.

Ĝuste tiam ŝi aŭdis iun diri: “Hm, hm!”



Ŝi rigardis tute ĉirkaŭ sin, kaj poste la arbon, kaj tie ŝi vidis vireton kiu manĝas oranĝojn.

“Ho! Reĝino,” diris li, “mi bone konas vin, kaj mi scias kiom vi timas la leonojn; kaj ja vi plene pravas, ĉar ili jam manĝis

multajn aliajn personojn: kaj kion vi rajtas anticipi, ĉar vi ne havas kukon doneblan al ili?”

“Mi devas akcepti ke mi mortos,” diris la povra Reĝino. “Ve! Mi ne tiom bedaŭrus, se nur mia kara filino estus edzino.”

“Ho! vi havas filinon,” kriis la Flava Nano (kiu tiel nomiĝis ĉar li ja estis nano kaj havis tre flavan vizaĝon, kaj loĝis en la oranĝarbo). “Min vere ĝojigas aŭdi tion, ĉar mi jam ĉie en la mondo serĉas edzinon. Nu, se vi promesos ke ŝi edzigos min, neniun el la leonoj, tigroj aŭ ursoj tuŝos vin.”

La Reĝino rigardis lin kaj preskaŭ tiom timis lian hidan vizaĝeton kiel antaŭe la leonojn, tiel ke ŝi ne povis paroli eĉ vorton.

“Kio? vi hezitas, sinjorino,” kriis la Nano. “Certe vi multe amas esti manĝata viva.”

Kaj, dum li parolis, la Reĝino vidis la leonojn, kiuj mal-suprenkuras iliadirekte.

Ĉiu havas du kapojn, ok piedojn, kaj kvar vicojn de dentoj, kaj iliaj haŭtoj estis duraj kiel la ŝeloj de testudoj, kaj helruĝaj.

Pro tiu terura vidaĵo, la povra Reĝino, kiu tremadis kvazaŭ kolombo vidanta falkon, kriis kiel eble plej laŭte, “Ho! kara S-ro Nano, Bellissima edzigos vin.”

“Ho, ĉu?” diris li malestime. “Bellissima estas sufiĉe bela, sed mi ne vere deziras edzinigi ŝin—vi konservu ŝin.”

“Ho! nobla sinjoro,” diris la Reĝino tre malĝoje, “ni rifuzu ŝin. Ŝi estas la plej ĉarma Princino en la mondo.”

“Ho! nu,” li respondis, “karitate mi akceptos ŝin; sed atentu ne forgesi ke ŝi estas mia.”

Dum li parolis pordeto malfermiĝis en la trunko de la oranĝarbo, enkuris la Reĝino, nur ĝustatempe, kaj la pordo ekfermiĝis brue tuj antaŭ la leonoj.

Unue la Reĝino pro konfuzego ne rimarkis alian pordeton en la oranĝarbo, sed baldaŭ ĝi apertiĝis kaj ŝi trovis sin en kampo da kardoj kaj urtikoj. Ĝin ĉirkaŭis kotoplana fosaĵo, kaj iom pretere estis eta pajla budo, el kiu venis la Flava Nano tre gaje. Li surhavis lignajn ŝuojn kaj malgrandan flavan mantelon, kaj ĉar li ne havis harojn kaj li havis tre longajn orelojn li aspektis plene ŝoka uleto.

“Min ĝojigas,” diris li al la Reĝino, “ke, ĉar vi estos mia bo-patrino, vi vidas la dometon en kiu via Bellissima loĝas kun mi.

Per ĉi tiuj kardoj kaj urtikoj ŝi povos manĝigi azenon sur kiu ŝi povos rajdi kien ajn ŝi deziros; sub ĉi tiu humila tegmento nenia vetero povos damaĝi ŝin; ŝi trinkos la akvon el ĉi tiu roĵeto, kaj manĝos ranojn—kiuj kreskas tre dikaj ĉi tie; kaj ŝi havos min ĉiam kun si, belan, agrablan, kaj gajan kia vi vidas min nun. Ĉar se ŝia ombro restos apud ŝi pli konstante ol mi mi miros.”

La malfeliĉa Reĝino, komprenante tuj kian mizeran vivon ŝia filino havos kun tiu Nano, ne povis toleri la ideon, kaj ekfalis svene tute sen paroli.

Kiam ŝi rekonsciigis ŝi trovis tre surprizate ke ŝi kuŝas en sia propra lito ĉehejme, kaj, pli surprizate, ke ŝi surhavas la plej belan puntan noktoĉapon kiun ŝi vidis dum sia tuta vivo. Unue ŝi kredis ke ĉiuj ŝiaj aventuroj, la teruraj leonoj, kaj ŝia promeso al la Flava Nano ke li edzinigos Bellissiman, nepre estis sur sonĝo, sed jen la nova ĉapo kun sia bela rubando por memori al ŝi ke ĉio estas vera, kaj tio tiom malfeliĉigis ŝin ke ŝi nek povis manĝi, trinki, nek dormi pro pensado pri ĝi.



La Princino, kiu, malgraŭ sia obstinemo, vere amis sian patrinon plenkore, multe malĝojis vidante ŝin tiom malfeliĉaspekta, kaj ofte demandis al ŝi kio ĝenas; sed la Reĝino, kiu ne volis ke ŝi trovu la veron, diris nur ke ŝi estas malsana, aŭ ke iu el la najbaroj minacas militi kontraŭ ŝin. Bellissima tute bone sciis ke ŝi kaŝas de ŝi ion—kaj ke neniuj el tiuj kialoj estas la vera kaŭzo de la malkvieto de la Reĝino. Do ŝi decidis iri konsulti la Feinon de la Dezerto pri la afero, precipe ĉar ŝi ofte aŭdis pri kiom saĝa ŝi estas, kaj ŝi pensis ankaŭ peti samtempe konsilon pri ĉu jes aŭ ne estus bone edziniĝi.

Do tre zorge ŝi pretigis iom de la konvena kuko por kontentigi la leonojn, kaj unu nokton ŝi iris al sia ĉambro tre frue, ŝajnigante ke ŝi enlitiĝos; sed, anstataŭ enlitiĝi, ŝi volvis ĉirkaŭ sin longan blankan vualon, kaj malsupreniris laŭ sekreta ŝtuparo, kaj tute sola eliris serĉi la Sorĉistinon.

Sed atinginte la saman fatalan oranĝarbon, kaj vidante ĝin kovrata de floroj kaj fruktoj, ŝi haltis kaj komencis kolekti kelkajn oranĝojn—kaj poste, surteren metinte sian korbon, ŝi sidiĝis por manĝi ilin. Sed kiam estis la horo por rekomenci marŝadon la korbo estis malaperinta, kaj, kvankam ŝi serĉis ĉie, ŝi povis trovi eĉ ne spuron de ĝi. Ju pli ŝi serĉis ĝin des pli timoplena ŝi fariĝis, kaj fine ŝi komencis plori. Subite ŝi ekvidis antaŭ si la Flavan Nanon.

“Kio ĝenas vin, mia belulino?” diris li. “Pro kio *vi* ploras?”

“Ve!” ŝi respondis; “ne mirigas ke mi ploras, ĉar mi perdis la korbon da kukoj kiuj devus helpi min sekure atingi la kavon de la Feino de la Dezerto.”

“Kaj kial *vi* volas renkonti ŝin, belulino?” diris la monstreto, “ĉar mi estas amiko ŝia, kaj, efektive, mi estas egale lerta kiel ŝi.”

“La Reĝino, mia patrino,” respondis la Princino, “lastatempe tiom profunde malfeliĉiĝis ke mi timas ke ŝi mortos; kaj mi timas ke eble mi estas la kaŭzo de tio, ĉar ŝi tre multe volas ke mi edzinigu, kaj mi devas diri vere al *vi* ke ĝis nun mi ne trovis personon kiu laŭ mia opinio indas esti mia edzo. Do pro ĉio ĉi mi deziris paroli kun la Feino.”

“Ne plu ĝenu vin, Princino,” respondis la Nano. “Mi povas diri al *vi* kion ajn *vi* volas scii, pli bone ol ŝi. La Reĝino, via patrino, promesis ke *vi* edzigos—”

“Promesis ke *mi*!” interrompis la Princino. “Ho! ne. Mi certas ke ne. Ŝi certe dirus al mi se ŝi farus tion. Min multe tro interesas la afero ol ke ŝi promesus ion sen mia konsento—nepre *vi* eraras.”

“Bela Princino,” kriis la Nano subite, ekjetante sin sur siajn genuojn antaŭ ŝi, “mi flatas min per la kredo ke al *vi* ne malplaĉos ŝia decido kiam mi diros al *vi* ke al *mi* ŝi promesis la feliĉon edzinigi vin.”

“Vin!” kriis Bellissima, retirante sin. “Mia patrino volas ke mi edzigu vin! Kiel *vi* povus esti tiel stulta ke *vi* supozas ion tian?”

“Ho! ne estas ke mi multe volas tiun honoron,” kriis la Nano kolere; “sed jen venas la leonoj; ili plenmanĝos vin per tri mordoj, kaj tiel finiĝos kaj *vi* kaj via fiero.”

Kaj, efektive, je tiu momento la povra Princino aŭdis iliajn terurajn muĝojn pli kaj pli proksimiĝi.

“Kion mi faru?” ŝi kriis. “Ĉu ĉiuj miaj feliĉaj tagoj devos tiel finiĝi?”

La malica Nano rigardis ŝin kaj komencis ridi spite. “Almenaŭ,” diris li, “vin kontentigos ke vi mortas fraŭlina. Bela princino kia vi nepre preferas morti anstataŭ esti edzino de povra naneto kia mi.”

“Ho! ne koleru kontraŭ mi,” kriis la Princino, kunpremante siajn manojn. “Mi preferus edzigi ĉiujn nanojn en la mondo ol morti terure tiel.”

“Rigardu min bone, Princino, antaŭ ol promesi,” diris li. “Mi ne volas ke vi haste promesu al mi.”

“Ho!” kriis ŝi, “la leonoj venas. Mi sufiĉe rigardis vin. Mi timegas. Savu min jam ĉimminute, alie mi mortos pro timego.”

Efektive, parolante ŝi ekfalis senkonscia, kaj kiam ŝi rekonsciiĝis ŝi trovis sin en sia propra liteto ĉeĥejme; kiel ŝi alvenis tien, tion ŝi ne sciis, sed ŝi estis vestita per plej belaj punto kaj rubandoj, kaj sur ŝia fingro estis ringeto, konsistanta el unusola ruĝa haro, kiu estis tiel strikta sur la fingro ke malgraŭ ĉia peno ŝi ne povis deigi ĝin.

Kiam la Princino vidis ĉion ĉi, kaj memoris kio okazis, ankaŭ ŝin kovris plej profunda malfeliĉo, kio surprizis kaj alarmis la tutan Kortegon, kaj precipe la Reĝinon. Centfoje ŝi demandis al Bellissima ĉu io ĝenas ŝin; sed ĉiam ŝi diris ke nenio.

Fine la ĉefoj de la reĝno, fervoraj ke ilia Princino edziniĝu, sendis mesaĝon al la Reĝino petante ke ŝi elektu edzon por ŝi tuj kiam eble. Ŝi respondis ke nenio pli plaĉus al ŝi, sed ke ŝia filino ŝajnas malvolontegi edziniĝi, kaj ŝi rekomendis ke ili mem iru paroli kun la Princino pri la afero; do tion ili tuj faris. Nu, Bellissima estis malpli fiera post sia aventuro kun la Flava Nano, kaj ŝi ne povis elpensi pli bonan rimedon por senigi de si la monstreton ol edzigi iun potencan reĝon, tial ŝi respondis al ilia peto multe pli favore ol ili esperis, dirante ke, kvankam si estas feliĉa pro sia nuna statu, tamen, por plaĉi al ili, ŝi konsentas edzigi la Reĝon de la Orminoj. Nu, li estis tre bela kaj potenca Princo, kiu jam de jaroj amas la Princinon, sed ne supozis ke iam ŝi havos favoran senton al li. Vi povas facile imagi kiom ĝoja li fariĝis kiam li aŭdis la informon, kaj kiom koleriĝis ĉiuj aliaj reĝoj

ĉar ili por ĉiam perdis esperon edzinigi la Princinon; sed efektive Bellissima ne povus edzigi dudek reĝojn—vere, por ŝi estis tre malfacile elekti nur unu, ĉar ŝia vanto kredigis al ŝi ke neniu en la mondo indas ŝin.

Oni tuj komencis prepari la plej grandiozan geedziĝon kiu iam okazis en la palaco. La Reĝo de la Orminoj sendis tiom grandegajn kvantojn da mono ke la ŝipoj alportantaj ĝin kovris la tutan maron. Oni sendis mesaĝistojn al la plej gajaj kaj altaklasaj Kortegoj, precipe al la Franca Kortego, por serĉi ĉion raran kaj valoran por beligi la Princinon, kvankam ŝia beleco estis tiom perfekta ke nenio kiun ŝi surhavas povus plibeligi ŝin. Almenaŭ, tion opiniis la Reĝo de la Orminoj, kaj li estis neniam feliĉa kiam li ne estis kun ŝi.



Rilate al la Princino, ju pli ŝi vidis la Reĝon des pli li plaĉis al ŝi; li estis tiom malavara, tiom bela kaj lerta, ke fine ŝi amis lin preskaŭ tiom kiom li amis ŝin. Kiom feliĉaj ili estis kune vagante tra la belaj ĝardenoj, kelkfoje aŭskultante dolĉan muzikon! kaj la Reĝo verkadis kantojn por Bellissima. Ĉi tiu tre multe plaĉis al ŝi:

Gajas ĉiu arbarpino
Pro la veno de l' Princino.
Teren falas la burĝonoj
Pro percepto de la sonoj,

Esperante ke surtretos
ŝi; kaj l' floroj ĉiam pretos
rigardi ŝin dum ŝia paso
tra l' abunda herba raso.
Ho! Princino, birdoj supre
amokantojn eĥas plu tre;
Dum ni tra la lando ame
Gaje vagas, man-en-mane.

Vere ili estis tiom feliĉaj kiom longas la tagoj. Ĉiuj nesukcesintaj rivaloj de la Reĝo estis reirintaj hejmen perdinte siajn esperon. Ili adiaŭis la Princinon tiom malĝoje ke ŝi ne povis ne kompati ilin.

“Ha! sinjorino,” la Reĝo de la Orminoj diris al ŝi, “kial estas? Kial vi malŝparas kompaton al tiuj princoj, kiuj amas vin tiom ke iliajn ĉagrenojn rekompencus sufiĉe unusola rideto via?”

“Mi bedaŭrus,” respondis Bellissima, “se vi ne rimarkus kiom mi kompatas tiujn princojn forirantajn de mi por ĉiam; sed rilate al vi, sinjoro, estas tre malsimile: vi plene rajtas kontentiĝi pro mi, sed ili foriras lamente, do ne domaĝu al ili mian kompaton.”

La Reĝon de la Orminoj plene kaptis la bonnatura maniero de la Princino per kiu ŝi traktis lian kritikon, kaj, ĵetinte sin al ŝiaj piedoj, li kisis ŝian manon milfoje kaj petegis ke ŝi pardonu lin.

Fine alvenis la feliĉa tago. Ĉio estis preta por la edziniĝo de Bellissima. La trumpetoj sonis, laŭ ĉiuj stratoj de la urbo abundis flagoj kaj sternaĝis floroj, kaj la homoj kuris amase al la granda placo antaŭ la palaco. La Reĝino tiom ĝojis ke ŝi apenaŭ povis dormi, kaj ŝi ellitiĝis antaŭ la taglumo por fari la necesajn ordonojn kaj elekti la juvelojn kiujn surportos la Princino. Ili ja estis diamantoj, eĉ sur ŝiaj ŝuoj, kiuj estis kovritaj per ili, kaj ŝia robo el arĝenta brokaĵo estis brodita per dekduo de la sunradioj. Imagu kiom ili kostis, sed nenio povus brili pli, escepte de la beleco de la Princino! Sur sia kapo ŝi portis grandiozan kronon, ŝia bela hararo ondis belorde preskaŭ al ŝiaj piedoj, kaj ŝia digna figuro estis facile rimarkebla inter ĉiuj damoj servantaj ŝin.

La Reĝo de la Orminoj ne estis malpli nobla kaj grandioza;

estis facile vidi per lia vizaĝo kiom feliĉa li estas, kaj ĉiu kiu proksimiĝis al li revenis portante multajn donacojn, ĉar tute ĉirkaŭ la granda bankedhalo estis aranĝitaj mil bareloj plenaj da oro, kaj sennombraj sakoj el veluro broditaj per perloj kaj plenigitaj per mono, en ĉiu el ili estis almenaŭ cent mil orpecoj, kiuj doniĝis al ĉiu persono kiu deziris etendi sian manon, kion haste faris multaj personoj, ne dubu pri tio—efektive, kelkaj trovis tion nepre la plej amuza parto de la geedziĝfestoj.

La Reĝino kaj la Princino estis tuj elirontaj kun la Reĝo kiam ili vidis veni cele ilin de la fino de la longa galerio du grandajn baziliskojn, kiuj trenis post si tre malbone fabrikitan keston; malantaŭ ili venis alta olda virino, kies malbeleco surprizis eĉ pli ol ŝia ekstrema oldeco. Ŝi surhavis krispon el nigra tafeto, ruĝan veluran kapuĉon, kaj tute ĉifonan ringojupon, kaj ŝi peze apogis sin per lambastono. Tiu stranga oldulino, sen diri eĉ unu vorton, lamis trifoje ĉirkaŭ la galerion, sekvate de la baziliskoj, kaj haltis en la mezo, kie minace gestante per sia lambastono ŝi kriis:

“Ho, ho, Reĝino! Ho, ho, Princino! Ĉu vi kredas ke vi rompos senpune la promeson kiun vi faris al mia amiko la Flava Nano? Mi estas la Feino de la Dezerto; sen la Flava Nano kaj lia oranĝarbo miaj grandaj leonoj estus tre rapide manĝintaj vin, certu pri tio, kaj en Felando ni ne permesas ke oni insultu nin tiel. Decidu tuj kion vi faros, ĉar mi ĵuras ke vi edziniĝos kun la Flava Nano. Se tion vi ne faros, mi bruligu mian lambastonon!”

“Ha! Princino,” diris la Reĝino, plorante, “kion mi aŭdas? Kion vi promesis?”

“Ha! mia patrino,” respondis Bellissima malĝoje, “kion vi mem promesis?”

La Reĝo de la Orminoj, indigna ĉar tiu fioldulino volas mal-ebligi al li lian feliĉecon, iris al ŝi, kaj minacis ŝin per sia glavo, kaj diris:

“Foriru tuj el mia lando, por ĉiam, mizerulino, alie mi mortigos vin kaj tiel senigos de ni vian malicon.”

Apenaŭ li diris tiujn vortojn kiam la kovrilo de la kesto refalis sur la plankon farante teruran bruon, kaj hororigante ilin elsaltis la Flava Nano, rajdante grandan Hispanan katon. “Fijunulo!” li kriis, rapidante inter la Feinon de la Dezerto kaj la Reĝon. “Aŭ-

daco eĉ perŝingre tuŝi ĉi tiun honorindan Feinon! Nur kontraŭ mi vi rajtas kvereli. Mi estas via malamiko kaj rivalo. Tiu malfidela Princino kiu edzigus vin estas promesita al mi. Vidu ĉu ŝi ne havas sur sia fingro ringon el unu el miaj haroj. Nur provu depreni ĝin, kaj vi baldaŭ trovos ke mi estas pli potenca ol vi!”



“Fimonstreto!” diris la Reĝo; “ĉu vi aŭdacas nomi vin amanto de la Princino, kaj pretendi tian trezoron? Ĉu vi scias ke vi estas nano—ke vi estas tiom hida ke oni ne povas toleri rigardi vin—kaj ke mi mem devus esti mortiginta vin jam longe antaŭ nun se vi meritus tiom gloran morton?”

La Flava Nano, furiozega pro tiuj vortoj, spronis sian katon, kiu kriis terure, kaj saltis tien kaj tien—terurante

ĉiun escepte de la brava Reĝo, kiu ĉasis la Nanon ĝis li, elpreninte grandan tranĉilon per kiu li estis armita, defuis la Reĝon partopreni en dupersona batalo, kaj rapidis en la korton de la palaco farante teruran bruon. La Reĝo, multe provokite, sekvis lin haste, sed apenaŭ ili prenis siajn poziciojn vizaĝ-al-vizaĝe, kaj la tuta Kortego havis nur sufiĉan tempon por kuri sur la balkonojn por rigardi kio okazas, kiam subite la suno fariĝis ruĝa kiel sango, kaj estiĝis tiom senlume ke ili apenaŭ povis vidi. La tondro bruegis, kaj la fulmo aspektis kvazaŭ forbruligonte ĉion; la du baziliskoj aperis, unu ĉiufanke de la finano, kiel gigantoj, altaj kiel montoj, kaj fajro flugis el iliaj buŝoj kaj oreloj, ĝis ili aspektis flagrantaj fornoj. Nenio el tio povis timigi la noblan junan Reĝon, kaj la aŭdaco de liaj aspekto kaj agado kuraĝigis ĉiun rigardanton, kaj

eble eĉ embarasis la Flavan Nanon mem; sed eĉ *lia* kuraĝo cedis kiam li vidis kio okazas al lia amata Princino. Ĉar la Feino de la Dezerto, aspektante pli terura ol antaŭe, rajdante flugilhavan grifon, kaj kun longaj serpentoj volviĝintaj ĉirkaŭ ŝia kolo, tiom forte batis ŝin per la lanco kiun ŝi portas ke Bellissima falis en la brakojn de la Reĝino sangante kaj senkonscie. Ŝia amoplena patrino, sentante la frapvundon tiom kiom la Princino mem, tiom akre kriegis kaj lamentadis ke la Reĝo, aŭdante ilin, plene perdis siajn kuraĝon kaj prudenton. Cedante la batalon, li rapidis cele la Princinon, por savi ŝin aŭ morti kun ŝi; sed la Flava Nano tro rapidis por li. Saltinte kun sia Hispana kato sur la balkonon, li kaptis Bellissiman de la brakoj de la Reĝino, kaj antaŭ ol la damoj de la Kortego povis haltigi lin li saltis sur la tegmenton de la palaco kaj malaperis kun sia rabaĵo.

La Reĝo, senmova pro hororo, rigardis senespere tiun teruran eventon, kiun li tute ne kapablis malebligi, kaj eĉ pli malfaciligis aferojn paneo de lia vidkapablo, fariĝis tute obskure, kaj li sentis sin portata de forta mano tra la aero.

Tiu nova misfortuno estis verko de la fifeino de la Dezerto, kiu venis kun la Flava Nano por helpi lin forporti la Princinon, kaj kiu ekamis la belan junan Reĝon de la Orminoj tuj kiam ŝi ekvidis lin. Ŝi kredis ke se ŝi forportos lin al iu terura kaverno kaj ĉenligos lin al roko, timo pri morto forgesigos al li Bellissiman kaj li fariĝos ŝia sklavo. Do tuj kiam ili atingis la lokon, ŝi redonis al li lian vidpovon, sed sen liberigi lin de liaj ĉenoj, kaj per sia magia potenco ŝi ekaperis antaŭ li kiel juna kaj bela feino, kaj ŝajnigis esti tute hazarde veninta tien.

“Kion mi vidas?” ŝi kriis. “Ĉu *vin*, kara Princo? Kia misfortuno venigas vin al ĉi tiu morna loko?”

La Reĝo, plene trompita de ŝia ŝanĝita aspekto, respondis:

“Ve! bela Feino, la feino kiu portis min ĉi tien unue forprenis mian vidkapablon, sed per ŝia voĉo mi rekonis ŝin kiel la Feinon de la Dezerto, kvankam pro kio ŝi forportis min mi ne scias diri al vi.”

“Ha!” kriis la ŝajnfeino, “se vi falis en *ŝiajn* manojn, vi povos foriri nur se vi edzinigos ŝin. Ŝi jam forportis pli ol unu Princon tiel, kaj ŝi certe prenas kion ajn ŝi volas.” Dum ŝi tiel ŝajnigis

bedaŭri la sorton de la Reĝo, li ekrimarkis ŝiajn piedojn, kiuj similas al piedoj de grifo, kaj tuj eksciis ke sendube jen la Feino de la Dezerto, ĉar nur ŝiaj piedoj ne povas ŝanĝiĝi, negrave kiom ŝi beligas sian vizaĝon.

Sen montri ke li rimarkis ion li diris, kvazaŭ sekrete:

“Efektive mi ne malŝatas la Feinon de la Dezerto, sed mi vere ne povas toleri ke ŝi protektas la Flavan Nanon kaj tenas min ĉenita ĉi tie kvazaŭ krimulon. Estas vere ke mi amas ĉarman principinon, sed se la Feino liberigus min mia dankemo devigus min ami nur ŝin.”

“Ĉu vi vere honeste diras tion, Princo?” diris la Feino, plene trompita.

“Certe,” respondis la Princo; “kiel mi provus trompi vin? Sciu, estas multe pli flate al mi ke min amas feino ol simpla principino. Sed, eĉ kvankam mi mortos pro amo al ŝi, mi ŝajnigos malami ŝin ĝis mi liberiĝos.”

La Feino de la Dezerto, tute trompita per tiuj vortoj, decidis tuj transporti la Princon al pli plaĉa loko. Do, deviginte lin suriri ŝian ĉaron, al kiu ŝi jungis cignojn anstataŭ la vespertojn kiuj kutime trenis ĝin, ŝi forflugis kun li. Sed imagu la malĝojon de la Princo kiam, de la kapturna alteco je kiu ili rapidis tra la aero, li vidis sian amatan Principinon en kastelo el polurita ŝtalo, kies muroj spegulis la radiojn de la suno tiel varmege ke neniu povus proksimiĝi sen bruli ĝiscindre! Bellissima sidis en malgranda arbaro apud rojo, apogante sian kapon per sia mano kaj amare plorante, sed ĝuste dum ili pasis ŝi suprenrigardis kaj vidis la Reĝon kaj la Feinon de la Dezerto. Nu, la Feino estis tiel lerta ke ŝi povis aspekti bela ne nur al la Reĝo; eĉ la povra Principino kredis ŝin la plej bela persono kiun iam ŝi vidis.

“Kio!” ŝi kriis; “ĉu mi ne sufiĉe malfeliĉis en ĉi tiu soleca kastelo al kiu portis min tiu terura Flava Nano? Ĉu mi ankaŭ devas scii ke la Reĝo de la Orminoj ĉesis ami min tuj kiam li ne plu vidis min? Sed kiu povas esti tiu mia rivalo, kies fatala beleco estas pli granda ol mia?”

Dum ŝi diris tion, la Reĝo, kiu vere amis ŝin same kiel antaŭe, sentis teruran malfeliĉon pro sia rapida forportiĝo for de sia amata Principino, sed li tro bone sciis kiom potenca estas la Feino

do li ne esperis eskapi de ŝi krom per multaj pacienco kaj ruzeco.

La Feino de la Dezerto ankaŭ vidis Bellissiman, kaj ŝi provis legi en la okuloj de la Reĝo la efekton kiun faris al li tiu neanticipita vidaĵo.

“Neniu pli bone ol mi povas diri al vi tion kion vi volas scii,” diris li. “Tiu hazarda renkontiĝo kun malfeliĉa princino al kiu mi foje efemere sentis ameton, antaŭ ol mi bonfortune renkontis vin, efektis min iomete, mi agnoskas tion, sed vi signifas tiom pli ol ŝi al mi ke mi preferus morti ol foresti de vi.”

“Ha! Princo,” ŝi diris, “ĉu mi povas kredi ke vere vi tiom amas min?”

“La tempo montros tion, sinjorino,” respondis la Reĝo; “sed se vi volas konvinki min ke vi iom ŝatas min, mi petas, bonvolu ne rifuzi helpi Bellissiman.”

“Ĉu vi scias kion vi petas?” demandis la Feino de la Dezerto, sulkante la frunton kaj rigardante lin suspekteme. “Ĉu vi volas ke mi uzu mian arton kontraŭ la Flava Nano, kiu estas mia plej bona amiko, kaj ke mi forprenu de li fieran principon kiun mi devas rigardi kiel mian rivalon?”

La Reĝo ĝemis sed ne respondis—efektive, kion li povus diri al tiel klarvida persono? Fine ili atingis vastan kampon, gajaspektan per ĉiaj floroj; profunda rivero ĉirkaŭis ĝin, kaj multaj malgrandaj rojoj murmuris softe sub la ombrantaj arboj, kie estis ĉiam milde kaj freŝe. Iomete for situis grandioza palaco, kies muroj konsistis el travideblaj smeraldoj. Tuj kiam la cignoj trenintaj la ĉaron de la Feino surteriĝis sub verando, kiu estis pavimita per diamantoj kaj havis rubenajn arkaĵojn, ilin salutis ĉiuflanke miloj da beluloj kiuj venis renkonti ilin ĝoje, kantante ĉi tiujn vortojn:

Se Amo volas kore regi,

Ne utilas kontraŭstrebi.

Fier' renkontas nur doloron

Sed am' sentigas triumfgloron.

La Feinon de la Dezerton gajigis aŭdi ilin kanti pri ŝiaj triumfoj; ŝi kondukis la Reĝon en la plej grandiozan ĉambron imageblan, kaj lasis lin sola dum kelka tempo, por ke li ne sentu sin kaptito; sed li estis certa ke ŝi ne vere foriris, sed rigardas lin el iu kaŝejo. Do, paŝinte al granda spegulo, li diris al ĝi, “Fidela

konsilisto, mi vidu kiel agrable beligi min por la ĉarma Feino de la Dezerto; ĉar mi povas pensi pri nenio alia ol kiel plaĉi al ŝi.”

Kaj li tuj ekkomencis bukligi sian hararon, kaj vidante sur tablo mantelon pli belan ol la propra, li zorge surmetis ĝin. La Feino revenis tiom ĝoja ke ŝi ne povis kaŝi sian ĝojon.

“Mi plene konscias pri kiom vi strebis plaĉi al mi,” diris ŝi, “kaj mi devas diri al vi ke vi jam plene sukcesis. Sciu ke tio ne estas malfacila se vi vere amas min.”

La Reĝo, kiu sekrete volis daŭrigi la bonhumoron de la Feino, ne mankis belajn parolojn, kaj post iom da tempo li ricevis permeson promeni sola laŭ la marbordo. La Feino de la Dezerto per siaj ŝorcagoj okazigis tiel teruran ŝtormon ke eĉ plej kuraĝa piloto ne aŭdacus eniri ĝin, do ŝi ne timis ke ŝia kaptito povos eskapi; kaj li sentis ioman animsenŝarĝiĝon pro oportuno pripensi sian teruran situacion sen interrompo fare de lia kruela kaptinto.

Baldaŭ, marŝinte sovaĝe tien kaj reen, li skribis ĉi tiujn versojn sur la sablo per sia vergo:

*Nun fine sur ĉi bordo mi
Mildigu la suferon per
Larmoj. Ve! mankas l' amatin',
Kaj restas nur malgaj' sur ter'.*

*Kaj vi, sovaĝa, ŝtorma Mar'
Sur kiu tiom forte ventas,
L' Amatinon for de mia larm'
Kaj min kaptita tenas.*

*Sed pli sovaĝas mia kor',
Dum Fat' kruelas plu al mi.
Kial venis ĉi ekzila hor'?
Kial forkaptiĝis la Princin'?*

*Ho! Belaj Nimfoj de l' ocean'
Sciu kiom dolĉas amo vera!
Pacigu l' akvon via man'
Liberigu min de l' pen' severa!*

Dum li plu skribis li aŭdis voĉon kiu altiras lian atenton mal graŭ lia volo. Rimarkante ke la ondoj alruliĝas pli alte ol antaŭe, li

atente ĉirkaŭrigardis, kaj baldaŭ vidis belulinon flosantan leĝere liadirekte sur la kresto de giganta ondo, kun sia longa hararo tute ĉirkaŭetendita; per unu mano ŝi tenis spegulon, kaj per la alia kombilon, kaj anstataŭ piedojn ŝi havis belan voston kvazaŭ fiŝan, per kiu ŝi naĝis.

La Reĝon mutigis mirego pro tiu neatendita vidaĵo; sed tuj kiam ŝi proksimiĝis sufiĉe ŝi diris al li, “Mi scias kiom malĝojas vi ĉar vi perdis vian Princinon kaj vin tenas kaptita la Feino de la Dezerto; se vi deziras, mi helpos vin eskapi el ĉi tiu fatala loko, kie alie vi eble devus ekzistadi enue dum tridek jaroj aŭ pli.”

La Reĝo de la Orminoj apenaŭ sciis respondi al tiu propono. Ne ĉar li ne multe volis eskapi, sed li timis ke eble temas nur pri nova rimedo per kiu la Feino de la Dezerto volas trompi lin. Dum



li hezitis la Marvirino, kiu divenis liajn pensojn, diris al li:

“Vi povas fidi min; mi ne provas superruzi vin. Mi tiom koleras kontraŭ la Flava Nano kaj la Feino de la Dezerto ke mi malverŝajne volus helpi ilin, des pli ĉar mi konstante vidas vian povran Princinon, kies beleco kaj boneco instigas min tiom kompati ŝin: kaj mi diras al vi ke se vi fidus min mi helpos vin eskapi.”

“Mi fidis vin absolute,” kriis la Reĝo, “kaj mi faros kion ajn vi ordonos; sed se vi vidis mian Princinon, bonvolu diri al mi kiel ŝi fartas kaj kio okazas al ŝi.”

“Ni ne malŝparu tempon pri parolado,” diris ŝi. “Venu kun mi

kaj mi portos vin al la Kastelo el Ŝtalo, kaj ni lasos sur ĉi tiu bordo figuron tiel similan al vi ke eĉ la Feinon mem ĝi trompos.”

Dirinte tion ŝi kolektis amason da marherboj, kaj, blovinte sur ĝin trifoje, ŝi diris:

“Miaj afablaj marherboj, mi ordonas ke vi restu ĉi tie etenditaj sur la sablo ĝis venos la Feino de la Dezerto por forporti vin.” Kaj tuj la marherboj eksimilis al la Reĝo, kiu staris rigardante ilin miroplenege, ĉar ili eĉ estis vestitaj per mantelo simila al lia, sed kuŝis tie palaj kaj senmovaj kiel kuŝas la Reĝo mem se iu el la grandaj ondoj superfortus lin kaj ĵetus lin senkonscia sur la bordon. Post tio la Marvirino ekprenis la Reĝon, kaj ili fornaĝis gaje kune.

“Nun,” diris ŝi, “mi havas sufiĉan tempon por rakonti al vi pri la Princino. Malgraŭ la bato kiun faris al ŝi la Feino de la Dezerto, la Flava Nano devigis ŝin rajdi malantaŭ li sur lia terura Hispana kato; sed ŝi baldaŭ svenis pro doloro kaj teroro, kaj ne rekonsciigis ĝis ili estis inter la muroj de lia timiga Kastelo el Ŝtalo. Tie ŝin akceptis la plej belaj knabinoj troveblaj, kiujn alportis tien la Flava Nano, kiuj rapidis servi ŝin kaj kiel eble plej atentis ŝin. Ili kuŝigis ŝin sur sofon kovritan per ŝtofo el oro, brodita per perloj grandaj kiel nuksoj.”

“Ha!” interrompis la Reĝo de la Orminoj, “se Bellissima forgesos min, kaj konsentos edzigi lin, rompiĝos mia koro.”

“Ne necesas timi pri tio,” respondis la Marvirino; “la Princino pensas nur pri vi, kaj la timiga Nano ne povas persvadi ŝin rigardi lin.”

“Bonvolu plu rakonti,” diris la Reĝo.

“Kion pli rakonti?” respondis la Marvirino. “Bellissima sidadis en la arbaro kiam vi pasis, kaj vidis vin kun la Feino de la Dezerto, kiu estis tiom lerte maskita ke la Princino kredis ŝin pli bela ol ŝi mem; imagu ŝian malesperon, ĉar ŝi kredis ke vi enamiĝis kun la Feino.”

“Ŝi kredas ke mi amas la Feinon!” kriis la Reĝo. “Kia fatala eraro! Kion fari por maltrompi ŝin?”

“Vi plej bone scias,” respondis la Marvirino, ridetante afable al li. “Kiam oni tiom amas unu la alian kiel vi ambaŭ, oni ne bezonas konsilon de alia persono.”

Dum ŝi parolis ili atingis la Kastelon el Ŝtalo; la flanko apud la maro estis la sola flanko kiun la Flava Nano lasis ne protektata de la teruraj brulantaj muroj.

“Mi bone scias,” diris la Marvirino, “ke la Princino sidas apud la roĵo, ĝuste kie vi vidis ŝin dum vi pasis, sed ĉar vi devos batali multajn malamikojn antaŭ ol atingi ŝin, prenu ĉi tiun glavon; armite per ĝi vi prave frontos ĉian danĝeron, kaj superos la plej grandajn malfacilaĵojn, nur evitu unu aferon—nome, neniam lasu ĝin fali el via mano. Adiaŭ; nun mi atendos apud tiu roĵo, kaj se vi bezonos ke mi helpu forporti vian amatan Princinon, mi ne mankos al vi, ĉar la Reĝino, ŝia patrino, estas mia plej bona amiko, kaj pro ŝi mi iris savi vin.”

Dirante tion ŝi donis al la Reĝo glavon el ununura diamanto, kiu brilis pli ol la suno. Li ne povis trovi vortojn por sufiĉe esprimi sian dankon, sed li fervore petis ŝin kredi ke li plene komprenas la gravecon de ŝia donaco, kaj neniam forgesos ŝiajn helpojn kaj afablecon.

Nun ni devas reiri al la Feino de la Dezerto. Kiam ŝi trovis ke la Reĝo ne revenas, ŝi elrapidis por serĉi lin, kaj atingis la bordon, kun cent damoj el sia servistaro, portantaj aregon da grandiozaj donacoj por li. Kelkaj portis korbojn plenajn de diamantoj, aliaj orajn tasojn mirige lerte faritajn, kaj sukconon, koralojn, kaj perlojn, aliaj, tamen, ekvilibrigis sur siaj kapoj garbojn de plej riĉaj kaj plej belaj ŝtofoj, kaj la aliaj alportis fruktojn kaj florojn, kaj eĉ birdojn. Sed kiom hororiĝis la Feino, kiu sekvis tiun gajan trupon, kiam ŝi vidis, etenditan sur la sablo, la figuron de la Reĝo kiun estis farinta la Marvirino el la marherboj. Superite de mirego kaj lamento, ŝi faris teruran krion, kaj ĵetis sin apud la ŝajnreĝon, plorante kaj kriante, kaj vokante siajn dek unu fratinojn, kiuj estis ankaŭ feinoj, veni helpi ŝin. Sed ilin ĉiujn trompis la ŝajnfiguro de la Reĝo, ĉar, kvankam ili estis lertaj, la Marvirino estis eĉ pli lerta, kaj ili nur povis helpi la Feinon de la Dezerto fari mirindan monumenton super tio kion ili kredis la tombo de la Reĝo de la Orminoj. Sed dum ili kolektis jaspon kaj porfiron, agaton kaj marmoron, oron kaj bronzon, statuojn kaj ilojn, por senmortigi la memoron pri la Reĝo, li dankadis la bonan Marvirinon kaj petis ŝin plu helpi lin, kion ŝi gracie promesis dum ŝi malaperis; kaj

post tio li komencis iri al la Kastelo el Ŝtalo. Li marŝis rapide, ĉirkaŭrigardante maltrankvile, kaj sopirante revidi sian amatan Bellissiman, sed li ne longe iris antaŭ ol esti ĉirkaŭita de kvar teruraj sfinksoj kiuj tre baldaŭ disŝirus lin per siaj akraj ungoj se li ne havus la diamantan glavon de la Marvirino. Ĉar, tuj kiam li flagrigis ĝin antaŭ iliaj okuloj ili falis ĉe liajn piedojn tute senhelpaj, kaj li mortigis ilin per unu bato. Sed apenaŭ li turnis sin por daŭrigi sian serĉon, li renkontis ses drakojn kovritajn de skvamoj pli duraj ol fero. Kvankam tiu renkonto estis timiga, la kuraĝo de la Reĝo restis firma, kaj per tiu mirinda glavo li dispecigis ilin unu post la alia. Nun li esperis ke liaj malfacilaĵoj finiĝis, sed ĉe la sekva angulo lin renkontis problemo kiun li ne sciis superi. Dudek kvar belaj graciaj nimfoj antaŭenpaŝis al li, tenante florgirlandojn, per kiuj ili baris la vojon.

“Kien vi iras, Princo?” ili diris; “ni devas gardi ĉi lokon, kaj se ni lasos vin pasi, grandaj misfortunoj trafos vin kaj nin. Ni petas vin ne insisti pluiri. Ĉu vi volas mortigi dudek kvar knabinojn kiuj neniam kaj neniel malplaĉis al vi?”

La Reĝo ne sciis kion fari aŭ diri. Estis kontraŭ liaj kavaliraj konceptoj fari ion kion, laŭ peto de damo, li ne faru; sed, dum li hezitis, voĉo en lia orelo diris:


“Batu! batu! kaj ne kompatu, alie via Princino estos por ĉiam perdita!”

Do, sen respondi al la nimfoj, li antaŭenkuris tuj, rompis iliajn girlandojn, kaj disigis ilin ĉiudirekten; kaj post tio li pluiris sen plia problemo al la arbareto kie li estis vidita Bellissiman. Ŝi sidis apud la roĝo aspektante pala kaj laca kiam li atingis ŝin, kaj li volonte ĵetus sin surteren antaŭ ŝiaj piedoj, sed ŝi retiris sin de li tiom indigne kiom se li estus la Flava Nano.

“Ha! Princino,” li kriis, “ne koleru kontraŭ mi. Mi klarigu ĉion. Mi ne estas malfidela nek mi kulpas pri kio okazis. Mi estas mizerulo kiu malplaĉis al vi kontraŭvole.”

“Ha!” kriis Bellissima, “ĉu mi ne vidis vin flugi tra la aero kun la plej bela ino imagebla? Ĉu tio estis kontraŭvola?”

“Jes ja, Princino,” li respondis; “la fia Feino de la Dezerto, kiu ne kontentiĝis nur per sia ligo de mi al roko, forportis min en sia kaleŝo al la alia finaĵo de la tero, kie mi plu restus kaptita se ne es-



LA REĜO DE LA ORMINOJ RENKONTAS LA DUDEK KVAR KNABINOJN

tus helpinta min amikema Marvirino kiu portis min ĉi tien por savi min, mia Princino, el la neindaj manoj kiuj vin tenas. Ne rifuzu ke vin helpu via plej fidela amanto.” Dirinte tion, li ĵetis sin ĉe ŝiajn piedojn kaj tenis ŝin per ŝia robo. Sed, ve! farante tion li lasis fali la magian glavon, kaj la Flava Nano, kiu kaŭris malantaŭ laktuko, vidante ĝin tuj elsaltis kaj kaptis ĝin, ĉar li bone konis ĝian mirindan potencon.

La Princino ekkriis pro teruriĝo vidante la Nanon, sed tio nur iritis la monstreton; murmurante kelkajn magiajn vortojn li alvokis du gigantojn, kiuj ligis la Reĝon per grandaj feraj ĉenoj.

“Nun,” diris la Nano, “mi mastras la sorton de mia rivalo, sed mi donos al li lian vivon kaj permeson foriri nedamaĝite se vi, Princino, konsentos edzigi min.”

“Prefere mi mortu milfoje,” kriis la malfeliĉa Reĝo.

“Ve!” kriis la Princino, “ĉu vi devas morti? Ĉu povus esti io pli terura?”

“Ke vi edzinigus tiun mizeruleton estus multe pli terure,” respondis la Reĝo.

“Almenaŭ,” daŭrigis ŝi, “ni kune mortu.”

“Mi kontentiĝu per morto por vi, mia Princino,” diris li.

“Ho, ne, ne!” ŝi kriis, turnante sin al la Nano; “prefere, mi plenumos vian volon.”

“Kruela Princino!” diris la Reĝo, “ĉu vi fiigus mian vivon por mi edziniĝante kun alia dum mi rigardas?”

“Ne tiel,” respondis la Flava Nano; “vi estas rivalo kiun mi tro timas: vi ne vidus nian geedziĝon.” Dirinte tion, malgraŭ la larmoj kaj krioj de Bellissima, li pikis la koron de la Reĝo per la diamanta glavo.

La kompatinda Princino, vidante sian amaton kuŝanta morta ĉe ŝiaj piedoj, ne plu povis vivi sen li; ŝi surteren falis apud li kaj mortis pro rompiĝinta koro.

Tiel finiĝis tiuj misfortunaj amantoj, kiujn ne povis helpi eĉ la Marvirino, ĉar la tuta magia povo perdiĝis kun la diamanta glavo.

Rilate al la Nano, li preferus vidi la Princinon morta ol edziniĝinta al la Reĝo de la Orminoj; kaj la Feino de la Dezerto, aŭdinte pri la aventuroj de la Reĝo, detruis la grandan monumenton kiun ŝi konstruis, kaj tiom koleris pro lia trompo al

li ke ŝi malamis lin tiom kiom antaŭe ŝi amis lin.

La afabla Marvirino, lamentante pro la malĝoja fato de la amantoj, ŝanĝis ilin en du altajn palmarbojn, kiuj staras ĉiam flank'-al-flanke, interfluŝtante pri sia fidela amo kaj karesante unu la alian per siaj interplektitaj branĉoj.¹

¹Madame d'Aulnoy



ETA RUĜA RAJDKAPUĈO

FOJE en certa vilaĝo loĝis malgranda kampara knabino, la plej bela uleto iam vidita. Ŝia patrino ege amis ŝin; kaj ŝia avino amegis ŝin eĉ pli. Tiu bonulino faris por ŝi etan ruĝan rajdkapuĉon; kiu tiom beltaŭgis al la knabino ke ĉiu nomis ŝin Eta Ruĝa Rajdkapuĉo.

Unu tagon ŝia patrio, farinte kelkajn kustardojn, diris al ŝi:

“Iru, karulino, kaj vidu kiel fartas via avino, ĉar mi aŭdis ke ŝi estas tre malsana; portu al ŝi kustardon, kaj ĉi poteton da butero.”

Eta Ruĝa Rajdkapuĉo tuj eliris cele sian avinon, kiu loĝas en alia vilaĝo.

Trairante la arbaron, ŝi renkontis oldan Lupon, kiu tre emis manĝi ŝin, sed li ne aŭdacis, pro kelkaj faskofaristoj proksimaj en la arbaro. Li demandis al ŝi kien ŝi iras. La povra infano, kiu ne sciis ke estas danĝere resti kaj aŭskulti lupon paroli, diris al li:

“Mi vizitos mian avinjon kaj portos al ŝi kustardon kaj poteton da butero de mia panjo.”

“Ĉu ŝi loĝas tre for?” diris la Lupo.

“Ho! jes,” respondis Eta Ruĝa Rajdkapuĉo; “preter tiu muelejo kiun vi povas vidi, tie, en la unua domo en la vilaĝo.”

“Nu,” diris la Lupo, “kaj ankaŭ mi iros viziti ŝin. Mi iros ĉivoje kaj vi iru tiuvoje, kaj ni trovos kiu la unua atingos tien.”

La Lupo komencis kuri laŭeble plej rapide, prenante la plej proksiman vojon, kaj la knabineto iris per tiu plej malproksima, distrante sin per noksokolektado, ĉasado al papilioj, kaj preparo de bukedetoj da malgrandaj floroj kiujn ŝi trovis. La Lupo post nelonge atingis la domon de la maljunulino. Li frapis sur la pordon—tap, tap.

“Kiu estas?”

“Via nepino, Eta Ruĝa Rajdkapuĉo,” respondis la Lupo,

falsante ŝian voĉon; “kiu portis al vi kustardon kaj poteton da butero senditajn al vi de panjo.”

La bona avino, kiu estis en la lito, ĉar ŝi estis iom malsana, vokis:

“Tiru la bobenon kaj la riglilo supreniros.”

La Lupo tiris la bobenon, kaj la pordo malfermiĝis, kaj post tio li tuj falis sur la bonulinon kaj ekvoris ŝin, ĉar jam de pli ol tri tagoj li neniom manĝis. Post tio li fermis la pordon kaj eniris la



liton de la avino, anticipante Etan Ruĝan Rajdkapuĉon, kiu venis post kelka tempo kaj frapis sur la pordon—tap, tap.

“Kiu estas?”

Eta Ruĝa Rajdkapuĉo, aŭdante la grandan voĉon de la Lupo, unue timis; sed kredante ke ŝia avino malvarmumas kaj estas raŭka, respondis:

“Estas via nepino, Eta Ruĝa Rajdkapuĉo, kiu portis al vi kustardon kaj poteton de butero senditajn al vi de panjo.”

La Lupo vokis al ŝi, moligante sian voĉon laŭeble:

“Tiru la bobenon kaj la riglilo supreniros.”

Eta Ruĝa Rajdkapuĉo tiris la bobenon, kaj la pordo malfermiĝis.

La Lupo, vidante ŝin eniri, diris al ŝi, kaŝinte sin sub la litkovriloj:

“Metu la kustardon kaj la poteton da butero sur la tabureton, kaj venu kuŝi kun mi.”

Eta Ruĝa Rajdkapuĉo malvestis sin kaj eniris la liton, kie, ĉar ŝin mirigis vidi kia aspektas ŝia avino en la noktovestoj, ŝi diris al ŝi:

“Avinjo, kiajn grandajn brakojn vi havas!”



“Por des pli bone ĉirkaŭbraki vin, karulino.”

“Avinjo, kiajn grandajn kruojn vi havas!”

“Por des pli bone kuri, infano.”

“Avinjo, kiajn grandajn orelojn vi havas!”

“Por des pli bone aŭdi, infano.”

“Avinjo, kiajn grandajn okulojn vi havas!”

“Por des pli bone vidi, infano.”

“Avinjo, kiajn grandajn dentajn vi havas!”

“Por manĝi vin.”

Kaj dirinte tiujn vortojn, tiu filupo ĵetis sin sur Etan Ruĝan Rajdkapuĉon kaj ekvoris ŝin.

LA DORMANTA BELULINO EN LA ARBARO

ANTAŬE estis reĝo kaj reĝino, kiuj bedaŭregis ke ili ne havas infanojn; estas neesprimeble kiom ili bedaŭregis. Ili iris al ĉiuj kuracakvoj en la mondo; votojn, pilgrimadojn, ĉiun rimedon ili provis, tute vane.

Fine, tamen, la Reĝino naskis filon. La bapto estis tre bela; kaj la Princino havis kiel baptopatrinojn ĉiujn feinojn kiujn ili povis trovi en la tuta regno (ili trovis sep), por ke ĉiu el ili donu al ŝi donacon, laŭ la kutimo de feinoj dum tiu epoko. Tiel la Princino ricevis ĉiajn perfektecojn imageblajn.

Post la baptoceremonioj, la tuta grupo reiris al la palaco de la Reĝo, kie granda festeno estis preparita por la feinoj. Antaŭ ĉiu el ili estis metita grandioza kloŝo el masiva oro, en kiu estis kulero, tranĉilo, kaj forko, ĉiuj el pura oro inkrustita per diamantoj kaj rubenoj. Sed dum ili ĉiuj sidiĝis ĉe la tablo ili vidis veni en la halon tre maljunan feinon, kiun ili ne invitis, ĉar jam de pli ol kvindek jaroj ŝi ne estis ekster certa turo, kaj oni kredis ŝin aŭ mortinta aŭ sorĉita.

La Reĝino ordonis por ŝi kloŝon, sed ne povis provizi al ŝi oran, kiel al la aliaj, ĉar oni fabrikigis nur sep por la sep feinoj. La maljuna Feino opiniis sin malrespektata, kaj neklare murmuris kelkajn minacojn. Unu el la junaj feinoj sidanta apud ŝi aŭdis ke ŝi grumbas; kaj, opiniante ke eble ŝi donos al la Princineto ian misfortunan donacon, tuj kiam ili levis sin de la tablo ŝi kaŝis sin malantaŭ la drapiraĵoj, por paroli la plej lasta kaj ripari, laŭeble, la mison kiun intencas la maljuna Feino.

Intertempe, la feinoj ĉiuj komencis doni siajn donacojn al la Princino. La plej juna donis al ŝi kiel donacon ke ŝi estos la plej bela persono en la mondo; la sekva, ke ŝi havos la intelekton de

anĝelo; la tria, ke ŝi estos mirinde gracia negrave kion ŝi faras; la kvara, ke ŝi perfekte dancos; la kvina, ke ŝi kantos kvazaŭ najtingalo; kaj la sesa, ke ŝi plej perfekte ludos ĉiajn muzikojn.

Sekvis la vico de la maljuna Feino. Per kapo tremanta pli pro spito ol pro aĝo, ŝi diris ke la mano de la Princino estos pikita per spindelo kaj ke ŝi mortos pro la vundo. Tiu terura donaco tremigis la tutan grupon, kaj ĉiu komencis plori.

Je tiu momento mem la juna Feino venis el malantaŭ la drapiraĵoj, kaj diris ĉi tiujn vortojn:



“Estu certaj, Reĝo kaj Reĝino, ke via filino ne mortos pro ĉi tiu katastrofo. Estas vere ke mi ne kapablas plene malefektivigi kion faris mia pliagŭlino. La manon de la Princino ja pikos spindelo; sed anstataŭ morti, ŝi nur profunde endormiĝos, kaj la dormo daŭros dum cent jaroj, je la fino de tiu periodo filo de reĝo venos kaj vekos ŝin.”

La Reĝo, por eviti la misfortunon aŭguritan de la maljuna Feino, tuj proklamigis ke al ĉiu estas malpermesate ŝpini per bastono kaj spindelo, aŭ eĉ havi spindelon en sia domo, kaj malobeon sekvas mortpuno. Post ĉirkaŭ dek kvin aŭ dek ses jaroj, la Reĝo kaj Reĝino iris al iu siaj plezurdomoj. Unu tagon,

hazarde, la juna Princino distris sin per kurado tien kaj tien en la palaco; irante de unu ĉambro al alia, ŝi trovis ĉambreton ĉe la supro de la turo, kie bona maljunulino, tutsola, ŝpinadis per sia spindelo. Tiu bonulino neniam aŭdis pri la proklamo kontraŭ spindeloj farita de la Reĝo.

“Kion vi faras, bonulino?” diris la Princino.

“Mi ŝpinas, bela infano,” diris la maljunulino, kiu ne sciis kiu ŝi estas.

“Ha!” diris la Princino, “ĉi tio estas tre bela; kiel vi faras ĝin? Donu ĝin al mi, por ke mi vidu ĉu mi povos simile fari.”

Tuj kiam ŝi prenis ĝin per sia mano, eble ĉar ŝi tro hastis, aŭ estis iom mallerta, aŭ ĉar la dekreto de la Feino neprigis, ĝi ekpikis ŝian manon, kaj ŝi falis svene.

La maljuna bonulino, ne bone sciante kion fari pri la afero, kriis vokante helpon. Oni venis el ĉiu direkto multenombre; oni ĵetis akvon sur la vizaĝon de la Princino, malstriktigis ŝiajn vestojn, frapis ŝiajn polmojn, kaj frotis ŝiajn tempiojn per Hungariakvo; sed nenio rekonsciigis ŝin.

Kaj nun la Reĝo, kiu venis pro la bruoj, memoris la aŭguron de la feinoj, kaj, komprenante tre bone ke tio nepre okazos, ĉar la feinoj parolis, portigis la Princinon en la plej belan ĉambron en sia palaco, kaj kuŝigis ŝin sur liton tute broditan per oro kaj arĝento.

Oni kredus ŝin anĝeleto, ĉar ŝi estis vere bela; ŝia sveno tute ne malpliigis eĉeron de ŝia koloro: ŝiaj vangoj estis kariofil-diantaj, ŝiaj lipoj estis koralaj; efektive; ŝiaj okuloj estis fermitaj, sed eblis aŭdi ŝin mole spiradi, kio konvinkis la ĉirkaŭstarantojn ke ŝi ne mortis. La Reĝo ordonis ke oni ne ĝenu ŝin, sed lasu ŝin dormi kviete ĝis ŝia horo de vekigo.

La bona Feino kiu savis vivon ŝian per la kondamno ke ŝi dormu cent jarojn estis en la regno Matakino, sesdek mil kilometrojn for, kiam tiu akcidento trafis la Princinon; sed ŝin tuj informis malgranda nano, kiu havis dekkilometrajn botojn, t.e. botojn per kiu li povis marŝi dek kilometrojn per unu paŝo. La Feino venis tuj, kaj ŝi alvenis, post ĉirkaŭ unu horo, en flamanta ĉaro tirata de drakoj.

La Reĝo helpis ŝin paŝi el la ĉaro, kaj ŝi aprobis ĉion faritan de

li; sed ĉar ŝi tre bone antaŭvidis aferojn, ŝi opiniis ke kiam la Princino vekigōs ŝi eble ne scios kion fari, estante tute sola en tiu malnova palaco; kaj jen kion ŝi faris: ŝi tuŝis per sia sceptro ĉion en la palaco (escepte de la Reĝo kaj la Reĝino)—vartistinojn, servistinojn, helpistinojn, nobelojn, oficirojn, mastrumistojn, kuiristojn, helpkuiristojn, kuirejservistinojn, gardistojn, kun iliaj milicanoĵoj, paĝiojn, lakeojn; ŝi simile tuŝis ĉiujn ĉevalojn en la staloj, ankaŭ hundojn, la grandajn hundojn en la ekstera korto kaj belan etan Mopsin, la spanieleton de la Princino, kiu kuŝis apud ŝi sur la lito.

Tuj kiam ŝi tuŝis ilin ĉiuj ekdormis por ne vekigĝi antaŭ sia mastrino, kaj por esti pretaj servi ŝin kiam ŝi volos ilin. La rostostangoj mem ĉe la fajro, laŭeble plej plenaj de perdrikoj kaj fazanoj, ankaŭ ekdormis. Ĉio ĉi efektiviĝis dum nur momento. Feinoj ne longatempas kiam ili laboras.

Kaj nun la Reĝo kaj la Reĝino, kisinte sian amatan infanon sen veki ŝin, eliris el la palaco kaj dissendis proklamon ke neniu aŭdacu proksimiĝi al ĝi.

Tio, tamen, ne estis necesa, ĉar jam post nur kvarono de horo ekplenkreskis tute ĉirkaŭ la parko tiom vasta nombro da arboj, grandaj kaj malgrandaj, arbustoj kaj dornarbustoj, interplektiĝantaj tiel ke nek homo nek besto povus trapasi; tiel ke videblis nur la plejsupro de la turoj de la palaco; kaj ankaŭ tio videblis nur de tre granda distanco. Neniu dubis ke la Feino tiel faris eksterordinaran ekzemplon de sia arto, por ke la Princino, dum ŝi plu dormis, bezonu nenion timi pro scivolemuloj.

Post la forpaso de cent jaroj la filo de la tiam reganta Reĝo, kiu estis de alia familio ol tiu de la dormanta Princino, ĉasante en tiu parto de la lando, demandis:

Kiuj estas tiuj turoj, kiujn li vidas en la mezo de granda densa arbaro?

Ĉiu respondis laŭ onidiroj aŭditaj. Kelkaj diris:

Ke ĝi estas ruina malnova kastelo, kiun hantas spiritoj;

Aliaj, Ke ĉiuj sorĉistoj kaj sorĉistinoj de la lando kunvenas tie por sia “sabata” aŭ nokta kunveno.

La plej ofta opinio estis: Ke ogro loĝas tie, kaj ke li portas tien ĉiujn malgrandajn infanojn kiujn li povas kapti, por manĝi ilin

laŭdezire, kaj neniu povas sekvi lin, ĉar nur li mem povas pasi tra la arbaron.

La Princo estis perpleksa, ne sciante kion kredi, sed tre olda kamparano parolis al li ĉi tiel:

“Laŭ permeso de via reĝa moŝto: antaŭ ĉirkaŭ kvindek jaroj mi aŭdis de mia patro, kiu aŭdis mian avon diri, ke en tiu tempo estis princino en tiu kastelo, la plej bela kiun iam oni vidis; ke ŝi devas dormi tie cent jarojn, kaj ŝin vekos filo de princo, por kiu ŝi estas rezervita.”

La juna Princo ekardis pro tiuj vortoj, kredante, sen pripensi la aferon, ke li povos fini tiun raran aventuron; kaj, puŝate de amo kaj honoro, decidis jam tiam atenti ĝin.

Apenaŭ li antaŭeniris cele la arbaron kiam ĉiuj grandaj arboj,



arbustoj, kaj dornarbustoj propravole lasis lin trapasi; li paŝis al la kastelo kiun li vidis ĉe la finaĵo de larĝa avenuo en kiun li paŝis; kaj iomete surprizis lin vidi ke neniu el liaj servistoj povas sekvi lin, ĉar la arboj refermiĝis tuj post lia traĭro. Tamen, li ne ĉesis plu marŝi; juna kaj amcela princo estas ĉiam tre kuraĝa.

Li venis en grandan eksteran korton, kie ĉio kion li vidi povus frostigi la plej sentiman personon pro hororo. La bildo de morto ĉie montris sin,

kaj nenio estis videbla escepte de etenditaj korpoj de homoj kaj bestoj, ĉiuj laŭaspekte mortaj. Li, tamen, tute bone sciis, per la rubenaj vizaĝoj kaj aknaj nazoj de la milicanoj, ke ili nur dormas; kaj iliaj kalikoj, en kiuj plu restis kelkaj gutoj da vino, montris klare ke ili ekdormis trinkante.

Post tio li transiris korton pavimitan per marmoro, supreniris la ŝtupojn, kaj eniris la gardejon, kie gardistoj staris en vicoj, kun siaj musketoj sur la ŝultroj, ronkante kiel eble plej laŭte. Post tio li

trairis plurajn ĉambrojn plenajn de nobeloj kaj damoj, ĉiuj dormantaj, kelkaj starantaj, aliaj sidantaj. Fine li eniris ĉambron tute tegitan per oro, kie li vidis sur lito, kies kurtenoj ĉiuj estis malfermaj, la plej belan vidaĵon iam rigarditan—princinon, kiu aspektis eble dekkvin- aŭ dek ses-jaraĝa, kaj kies hela, kaj, kelkmaniere, grandioza beleco, enhavis ian diecon. Li proksimiĝis tremante kaj admirante, kaj ĵetis sin antaŭ ŝin sur siajn genuojn.

Kaj nun, ĉar la sorĉo finiĝis, la Princino vekigis, kaj rigardante lin per okuloj pli teneraj ol laŭsupoze pravigus unua rigardo:

“Ĉu vi, mia Princo?” diris ŝi al li. “Vi longe atendis.”

La Princo, ĉarmite de tiuj vortoj, kaj multe pli de la maniero laŭ kiu ili diriĝis, ne scipovis montri siajn ĝojon kaj dankon; li certigis al ŝi ke li amas ŝin pli ol sin mem; ilia konversacio ne estis tre bonorda, ili ploris pli ol parolis—malmulta elokvento, multa amo. Li pli perpleksis ol ŝi, kaj tio ne mirigu nin: ŝi havis multan tempon por pripensi kion diri al li; ĉar estas tre verŝajne (kvankam la historio tute ne mencias tion) ke la bona Feino, dum tia longa dormo, donis al ŝi tre agrablajn sonĝojn. Koncize: ili interparolis kvar horojn, tamen ili diris ne eĉ duonon de tio kion ili volis diri.

Intertempe la tuta palaco vekigis; ĉiu ekpensis pri sia specifa afero, kaj ĉar ili ĉiuj tute ne estis amantoj ili estis baldaŭ mortontaj pro malsato. La ĉefa servistino, kiu estis tiom rigidpensa kiel aliaj homoj, tre senpacienciĝis, kaj laŭte diris al la Princino ke la vespermanĝo pretas. La Princo helpis la Princinon stariĝi; ŝi estis tute vestita, kaj tre grandioze, sed lia reĝa moŝto zorge atentis ne diri al ŝi ke ŝi estas vestita simile al lia praavino, kaj havas pintobandon kiu videblas super alta kolumo; ŝi aspektis neniel malpli ĉarma kaj bela pro tio.

Ili eniris la grandan halon de speguloj, kie ili manĝis, kaj al ili kelneris la oficiroj de la Princino; la violonoj kaj hobojoj ludis malnovajn melodiojn, sed tre belajn, kvankam nun jam pasis pli ol cent jaroj post kiam ili furoris; kaj post la manĝo, sen perdi tempon, la ĉefpastro geedzigis ilin en la kapelo de la kastelo, kaj la ĉefservistino fermis la kurtenojn. Ili nur malmulte dormis—la Princino ne bezonis; kaj la Princo foriris de ŝi la sekvan matenon

por reiri en la urbon, kie lia patro nepre domaĝas lin. La Princo diris al li:

Ke li perdis sian vojon en la arbaro dum li ĉasis, kaj ke li kuŝis en la dometo de braĝobrudigisto, kiu donis al li fromaĝon kaj brunan panon.

La Reĝo, lia patro, kiu estis bonulo, kredis lin; sed lia patrino ne povis konvinkiĝi ke li diris la veron; kaj vidante ke preskaŭ ĉiutage li foriras ĉasi, kaj ke li ĉiam havas preta ian pretekston por tio, kvankam li jam ekstere estis dum tri aŭ kvar sinsekvaj noktoj, ŝi komencis suspekti ke li estis edziĝinta, ĉar li loĝis kun la Princino pli ol du plenajn jarojn, kaj naskigis de ŝi du infanojn, el kiuj la plej aĝa, filino, nomiĝis Mateno, kaj la plej junan, filon, ili nomis Tago, ĉar li estis multe pli allogaspekta kaj bela ol sia fratino.

La Reĝino parolis plurfoje al sia filo, por ke li informu ŝin pri kiel li pasigas la tempon, kaj ke per tia informo li devas kontentigi ŝin. Sed li neniam kuraĝis konfidi al ŝi sian sekreton; li timis ŝin, kvankam li amis ŝin, ĉar ŝi estis el la Ogra raso, kaj la Reĝo ja tute ne estus edziniginta ŝin se ŝi ne havus vastan riĉaĵaron; oni eĉ flustradis tra la Kortego ke ŝi havas Ograjn inklinojn, kaj ke, kiam ajn ŝi vidis malgrandajn infanojn pasi, ŝi ege malfacile detenis sin de ĵeti sin sur ilin. Kaj tial la Princo neniam volis diri al ŝi eĉ unu vorton.

Sed kiam la Reĝo mortis, kio okazis post ĉirkaŭ du jaroj, kaj li trovis sin estro kaj mastro, li senhezite proklamis sian edziĝon; kaj li grandafeste iris konduki sian Reĝinon al la palaco. Ili grandioze eniris la ĉefurbon, kaj ŝi rajdis inter siaj du infanoj.

Post nelonge la Reĝo foriris militi kontraŭ la Imperiestro Kontalabuto, sia najbaro. Li lasis la regadon de la regno al la Reĝino sia patrino, kaj elkore konfidis al ŝia zorgado siajn edzinon kaj infanojn. Li devis daŭrigi sian ekspedicion dum la tuta somero, kaj tuj post lia foriro la Patrino-Reĝino forsendis sian bofilinon al kampara domo en la arbaro, por pli facile povi satigi sian teruran sopiron.

Kelkajn tagojn poste ŝi mem iris tien, kaj diris al sia kuirejestro:

“Mi emas manĝi malgrandan Matenon kiel mian ĉefmanĝon

morgaŭ.”

“Ha! sinjorino,” kries la kuirejestro.

“Tion mi ordonas,” respondis la Reĝino (kaj tion ŝi parolis per la tono de Ogrino fortege volanta manĝi freŝan viandon), “kaj mi manĝos ŝin kun *saŭco Roberta*.”

La povrulo, kiu tute bone sciis ke li devas ne provi trompi Ogrinojn, prenis sian grandan tranĉilon kaj supreniris en la ĉambron de malgranda Mateno. Ŝi tiam estis kvarjaraĝa, kaj venis al li saltante kaj ridante, por ĉirkaŭbraki lian kolon, kaj peti de li kandaĵon. Pro tio li komencis plori, la granda tranĉilo falis el lia mano, kaj li eniris la malantaŭan korton, kaj mortigis ŝafideton, kaj surverŝis tiel bonan saŭcon ke lia mastrino certigis al li ke



neniam antaŭe ŝi manĝis ion egale bonan. Li samtempe prenis malgrandan Matenon, kaj portis ŝin al sia edzino, por kaŝi ŝin en la loĝejo kiun li havis ĉe la finaĵo de la korto.

Ĉirkaŭ ok tagojn poste la fia Reĝino diris al la kuirejestro, “Mi manĝos malgrandan Tagon.”

Li responde diris eĉ ne unu vorton, sed li firme decidis trompi ŝin same kiel antaŭe. Li eliris trovi malgrandan Tagon, kaj vidis lin kun malgranda rapiro en la mano, per kiu li skermis kun granda simio, la infano estis tiam nur trijaraĝa. Li prenis lin en siaj brakoj kaj portis lin al sia edzino, por ke ŝi kaŝu lin en sia ĉambro kun lia fratino, kaj en la ĉambro de malgranda Tago li

kuiris junan kapridon, tre molan, kiun la Ogrino trovis mirinde bongusta.

Ĝis tiam ĉio bonege sukcesis; sed unu vesperon tiu fia Reĝino diris al sia kuirejestro:

“Mi manĝos la Reĝinon kun la sama saŭco kiel por ŝiaj infanoj.”

Nun la povra kuirejestro malesperis povi trompi ŝin. La juna Reĝino estis dudekjara, sen enkalkulo de la cent jaroj de ŝia dormado; kaj kiel trovi en la korto beston egale firman perpleksigis lin. Li decidis tiam, por savi sian propran vivon, tranĉi la kolon de la Reĝino, kaj irinte en ŝian ĉambron, intencante fari tion jam tuj, li laŭeble plej furiozigis sin, kaj venis en la ĉambron de la juna Reĝino kun sia ponardo en la mano. Tamen li ne volis trompi ŝin, do li diris al ŝi, tre respektoplene, pri la ordono kiun li ricevis de la Patrin-Reĝino.

“Faru; faru” (diris ŝi, etende proponante sian kolon). “Plenumu viajn ordonojn, kaj tiel mi iros vidi miajn infanojn, miajn povrajn infanojn, kiujn mi tiom kaj tiel tenere amis.”

Ĉar ŝi kredis ilin mortaj, ekde kiam ili estis forprenitaj sen ŝia scio.

“Ne, ne, sinjorino” (kriis la povra kuirejestro, plenplore); “vi ne mortos, tamen vi ja revidos viajn infanojn; sed por tio vi devos hejmerniri kun mi al mia loĝejo, kie mi kaŝis ilin, kaj mi denove trompos la Reĝinon, donante anstataŭ vin junan cervinon.”

Dirinte tion li tuj kondukis ŝin al sia ĉambro, kie, lasante ŝin ĉirkaŭbraki siajn infanojn, kaj ploradi kun ili, li foriris pretigi junan cervinon, kiun la Reĝino vespermanĝis, kaj glutis samapetite kiel se ĝi estus la juna Reĝino. Ege ŝi ĝuis sian kruelecon, kaj ŝi elpensis rakonton direblan al la Reĝo, kiam li revenos, ke la sovaĝaj lupoj manĝis la Reĝinon lian edzinon kaj ŝiajn du infanojn.

Unu vesperon, dum ŝi, laŭ sia kutimo, vagadis en la kortoj kaj ĝardenoj de la palaco serĉante freŝan viandon, ŝi aŭdis. el teretaĝo, malgrandan Tagon ploradi, ĉar lia panjo vipos lin, ĉar li misagis; kaj ŝi aŭdis, samtempe, malgrandan Matenon petadi pardonon por sia frato.

La Ogrino tuj rekonis la voĉon de la Reĝino kaj ŝiaj infanoj, kaj kolerega ĉar ŝi estis tiel trompita, ŝi ordonis, la sekvan

matenon, je la krepusko (per plej teruraĉa voĉo, kiu tremigis ĉiujn), ke ili konduku en la mezon de la granda korto grandan kuvon, kiun ŝi plenigis per bufoj, viperoj, kaj ĉiaj serpentoj, por ĵetigi en ĝin la Reĝinon kaj ŝiajn infanojn, la kuirejestrinon, liajn edzinon kaj servistinojn; ilin ĉiujn ŝi ordonis alvenigi kun la manoj malantaŭe ligitaj.

Oni elvenigis ilin laŭordone, kaj la ekzekutistoj estis tuj ĵetontaj ilin en la kuvon, kiam la Reĝo (kiun oni ne tiel frue anticipis) eniris la korton surĉevale (ĉar li venis rapidege) kaj demandis, ege mirante, kion signifas tiu aĉe terura vidaĵo.

Neniu kuraĝis informi lin, sed la Ogrino furioza kiam ŝi vidis kio okazis, ĵetis sin kapantaŭe en la kuvon, kaj ŝin tuj voris la fibestoj kiujn ŝi antaŭe ordonis ĵeti en ĝin por manĝi aliajn. La Reĝo malgraŭ sia volo devis multe bedaŭri, ĉar ŝi ja estis lia patrino; sed baldaŭ li konsolis sin per siaj bela edzino kaj siaj belaj infanoj.

CINDRULINO
AŬ LA MALGRANDA VITRA PANTOFLO

FOJE estis nobelo kiu edzinigis, kiel sian duan edzinon, la plej fieran kaj plej arogantan virinon iam viditan. Ŝi havis, per antaŭa edzo, du filinojn samhumorajn, kiuj estis, efektive, identaj al ŝi ĉiumaniere. Li simile havis, per alia edzino, junan filinon, sed nekompareble bonan kaj dolĉhumoran, kion ŝi heredis de sia patrino, kiu estis la plej bona ulo en la mondo.

Tuj kiam la geedziĝceremonioj finiĝis la bopatrino komencis montri sian veran naturon. Ŝi ne povis toleri la bonajn ecojn de tiu belulino, des malpli ĉar ili aĉaspektigis ŝiajn proprajn filinojn. Ŝi devigis ŝin faradi la plej malplaĉajn taskojn de la domo: ŝi frotlavadis la telerojn, tablojn, kc., kaj la ĉambron de sia estrino, kaj de siaj estrinetoj, ŝiaj filinoj; ŝi kuŝis en mizera mansardo, sur mizerega pajla lito, dum ŝiaj fratinoj kuŝis en belaj ĉambroj, kun inkrustitaj plankoj, sur litoj plej novmodaj, kaj kie ili havis spegulojn tiel grandajn ke ili povis vidi sin plene, de la kapo ĝis la piedo.

La povrulino toleris ĉion pacience, kaj ne aŭdacis informi sian patron, kiu severe riproĉus ŝin; ĉar lia edzino plene regis lin. Fininte sian laboron, ŝi kutimis eniri la kamenangulon, kaj sidiĝi inter cindroj, tiel ke oni kutimiĝis nomi ŝin *Cindraĉulino*; sed la plej juna, kiu ne estis tiel malĝentila kiel la plej aĝa, nomis ŝin Cindrulino. Tamen, Cindrulino, malgraŭ siaj mizeraj vestoj, estis centoble pli bela ol siaj fratinoj, kvankam ili ĉiam estis tre riĉe vestitaj.

Nu, okazis ke la filo de la Reĝo estigis balon, kaj invitis ĉiujn modulojn partopreni. Niaj junaj estrinetoj ankaŭ ricevis inviton, ĉar ili estis tre grandiozaspektaj inter la nobelinaro. Ili multege ĝojis pro tiu invito, kaj ege okupis sin per elektado de roboj,

subroboj, kaj kapvestoj kiuj beltaŭgos al ili. Tio kaŭzis novan problemon por Cindrulino; ĉar ŝi mem devis gladi la ŝtofon de siaj fratinoj, kaj plekti iliajn hararojn; ili parolis dum la tuta tago pri nenio alia ol kiel ili vestos sin.



“Nu, rilate al mi,” diris la plejaĝa, “mi surhavas mian ruĝan veluran kompleton kun Francaj falbaloj.”

“Kaj mi,” diris la plej juna, “havas mian kutiman subrobon; sed sur tion, por kaŝi ĝin, mi surmetos mian orfloran superrobon, kaj mian diamantan korsajon, kiu estas neniel la plej ordinara en

la mondo.”

Ili alvokis la plej lertajn ĉapelistinojn atingeblajn por pretigi kapvestojn kaj ĝustigi la duoblajn klapojn, kaj ili akiris siajn ruĝajn brosojn kaj nigrajn silkpecojn de Mademoiselle de la Poche.

Cindrulino ankaŭ alvokis por konsulti ŝin pri ĉio ĉi, ĉar ŝi havis tre inspiroplenajn ideojn, kaj konsilis ilin ĉiam pri kio estas plej bona, efektive ŝi proponis sin por aranĝi iliajn hararojn, kion ili tre volonte akceptis. Dum ŝi faris tion, ili diris al ŝi:

“Cindrulino, ĉu ne ankaŭ vi volonte partoprenus en la balo?”

“Ve!” diris ŝi, “vi nur mokas min; persono kia mi ne rajtas tien iri.”

“Vi pravas pri tio,” respondis ili; “oni ja ridus vidante Cindraĉulinon en balo.”

Ĉiu escepte de Cindrulino misaranĝus iliajn hararojn, sed ŝi estis tre bonkondata, kaj tute bone aranĝis ilin. Ili dum preskaŭ du tagoj ne manĝis, pro sia abunda ĝojo. Ili rompis pri ol dekdu laĉojn penante strikte laĉiĝi, por ke ili havu ŝike sveltan formon, kaj ili konstante rigardis sian spegulon. Fine alvenis la feliĉa tago; ili iris al la Kortego, kaj Cindrulino sekvis ilin per siaj okuloj laŭeble longe, kaj kiam ŝi ne plu povis vidi ilin ŝi ekploris.

Ŝia baptopatrino, kiu vidis ŝin larmoplena, demandis kio ŝin ĝenas.

“Mi volegas—volegas—;” ŝi ne povis diri la ceteron, ĉar ŝin interrompis la larmoj kaj plorado.

Tiu baptopatrino ŝia, kiu estis feino, diris al ŝi, “Vi volegas partopreni en la balo; ĉu ne?”

“J—es,” kriis Cindrulino, kun granda ĝemo.

“Nu,” diris ŝia baptopatrino, “estu obeema, kaj mi ebligas ke vi iros.” Post tio ŝi kondukis ŝin en ŝian ĉambron kaj diris al ŝi, “Kuru en la ĝardenon, kaj portu al mi kukurbon.”

Cindrulino eliris tuj por akiri la plej bonan troveblan, kaj portis ĝin al sia baptopatrino, ne povante imagi kiel tiu kukurbo povus ebligi ŝian iron al la balo. Ŝia baptopatrino elprenis ĝian tutan internon, tiel ke restis nur la ŝelo; farinte tion, ŝi frapis ĝin per sia sceptro, kaj la kukurbo tuj transformiĝis en belan kaleŝon, tute orkovritan.

Post tio ŝi rigardis en sian muskaptilon, kie ŝi trovis ses mus-

ojn, ĉiuj ankoraŭ vivaj, kaj ordonis ke Cindrulino levu iomete la lukon, kaj ĉiun muson, dum ĝi eliris, ŝi frapetis per sia sceptro, kaj tuj la muso transformiĝis en belan ĉevalon, tiel ke ensume estis tre bela grupo de ses ĉevaloj bele muskolore makulite grizaj. Ĉar plene mankis kaleŝŝoforo,



“Mi iros vidi,” diras Cindrulino, “ĉu eble estas rato en la ratkaptilo—eble ni povus fari el li kaleŝŝoforon.”

“Vi pravas,” respondis ŝia baptopatrino; “iru rigardi.”

Cindrulino portis la kaptilon al ŝi, kaj en ĝi estis tri gigantaj ratoj. La feino elektis tiun el la trio kiu havis la plej grandan barbon, kaj tuŝite per ŝia sceptro, li fariĝis dika, gaja kaleŝŝoforo, kiu havis la plej elegantan barbon kiun iam vidis okuloj. Post tio ŝi diris al ŝi:

“Reiru en la ĝardenon, kaj vi trovos ses lacertojn malantaŭ la akvumpoto, portu ilin al mi.”

Tuj kiam ŝi faris tion ŝia baptopatrino ŝanĝis ilin en ses lakeojn, kiuj kuris tuj malantaŭ la kaleŝon, kun livreoj ornamitaj per oro kaj arĝento, kaj tiom kroĉis sin unu al la alia kvazaŭ ili nenion alian faris dum sia tuta vivo. La Feino diris al Cindrulino:

“Nu, ĉi tie vi vidas plene ekipitan kaleŝon taŭgan por iri al la balo; ĉu ĝi ne plaĉas al vi?”

“Ho! ĝi plaĉas,” kriis ŝi; “sed ĉu mi devos iri tien kia mi estas, en ĉi tiuj ĉifonaĉoj?”

Ŝia baptopatrino nur tuŝis ŝin per sia sceptro, kaj, sam-momente, ŝiaj vestoj fariĝis ŝtofo el oro kaj arĝento, tute inkrust-itaj per juveloj. Farinte tion, ŝi donis al ŝi paron da vitraj pantofl-oj, la plej belaj en la tuta mondo. Tiel vestite, ŝi eniris la kaleŝon; sed ŝia baptopatrino, plej emfaze, ordonis al ŝi ke ŝi ne restu post la noktomezo, dirante al ŝi, samtempe, ke se ŝi restos eĉ unu momenton pli, la kaleŝo refariĝos kukurbo, ŝiaj ĉevaloj musoj, ŝia kaleŝoŝoforo rato, ŝiaj lakeoj lacertoj, kaj ŝiaj vestoj tutsamaj kiel antaŭe.

Ŝi promesis al sia baptopatrino ke ŝi nepre foriros de la balo antaŭ la noktomezo; kaj post tio foren ŝi veturas, apenaŭ kapabla reteni sian ĝojesprimon. La filo de la Reĝo, informite ke granda princino, kiun neniu konas, alvenis, elkuris akcepti ŝin; li donis al ŝi sian manon dum ŝi paŝis el la kaleŝo, kaj kondukis ŝin en la ha-lon, inter la gastojn. Tuj estiĝis profunda silento, oni ĉesis danci, la violonoj ĉesis ludi, tiom atente ĉiuj rigardadis la nekutimajn belecojn de la nekonata novulino. Nenio tiam aŭdiĝis krom konfuzita bruo de:

“Ha! kiom bela ŝi estas! Ha! kiom bela ŝi estas!”

La Reĝo mem, kvankam maljuna, ne povis ne rigardi ŝin, kaj diri nelaŭte al la Reĝino ke jam de tre longe li ne vidis egale belan ulinon.

Ĉiuj damoj okupis sin per konsiderado pri ŝiaj vestoj kaj kap-vesto, por ke ili provu farigi similajn la sekvan tagon, se nur ili povos trovi egale fajnajn materialojn kaj egale kapablajn manojn por fari ilin.

La filo de la Reĝo gvidis ŝin al la plej honoroplena seĝo, kaj poste li elkondukis ŝin por danci kun li; ŝi dancis tiel gracie ke ili pli kaj pli admiris ŝin. Bonan manĝaĵaron oni provizis, sed la juna

princo manĝis eĉ ne peceton, ĉar li tiom intense okupis sin per rigardado al ŝi.

Ŝi sidiĝis apud siajn fratinojn, milmaniere ĝentilaĵojn farante al ili, donante al ili kelkajn el la oranĝoj kaj citronoj kiujn donacis al ŝi la Princo, kio multe surprizis ilin, ĉar ili ne rekonis ŝin. Dum Cindrulino tiel distris siajn fratinojn, ŝi aŭdis la horloĝon batsoni la dekonuan horon plus tri horkvaronoj, kaj je tio ŝi tuj riverencis al la grupo kaj foriris laŭeble plej rapide.

Alveninte hejmen, ŝi kuris serĉi sian baptopatrinojn, kaj, dankinte ŝin, ŝi diris ke ŝi ne povas ne elkore voli reiri al la balo la sekvan tagon, ĉar la filo de la Reĝo deziris ŝin.

Dum ŝi fervore rakontis al sia baptopatrino tion kio okazis ĉe la balo, ŝiaj du fratinoj frapis sur la pordon, kaj Cindrulino kuris malfermi ĝin.

“Kiom longe vi restis!” kriis ŝi, gapante, frotante siajn okulojn kaj streĉante sin kvazaŭ ĵus vekiĝinte; ŝi neniel, tamen, emis dormi ekde ilia foriro el la hejmo.

“Se vi estus ĉe la balo,” diris unu ŝia fratino, “vi ne fariĝus laca. Tien venis la plej eleganta princino, la plej bela kian iam vidis homokuloj; ŝi milmaniere faris ĝentilaĵojn al ni, kaj donacis al ni oranĝojn kaj citronojn.”

Cindrulino ŝajnis sin tre indiferenta pri la afero; efektive, ŝi demandis al ili pri la nomo de tiu princino; sed ili diris al ŝi ke ili ne konas ĝin, kaj ke la filo de la Reĝo tre maltrankvilas pro ŝi kaj donus la tutan mondon por scii kiu ŝi estas. Je tio, Cindrulino, ridetante, respondis:

“Nepre, do, ŝi ja estas tre bela; kiom feliĉaj vi estis! Ĉu mi ne povus vidi ŝin. Ha! kara F-ino Ŝarloto, bonvolu prunti al mi vian flavan vestokompleton kiun vi ĉiutage portas.”

“Ja, nepre!” kriis F-ino Ŝarloto; “mi pruntu miajn vestojn al tia malpura Cindraĉulino kia vi! Mi estus stultulino.”

Cindrulino, efektive, bone anticipis tian respondon, kaj tre ĝojis pro la rifuzo; ĉar ŝi malfacile reagis, se ŝia fratino pruntus al ŝi kion ŝi ŝerce petis.

La sekvan tagon la du fratinoj estis ĉe la balo, ankaŭ Cindrulino, sed vestite pli grandioze ol antaŭe. La filo de la Reĝo estis konstante apud ŝi, kaj neniam ĉesis komplimenti kaj afable

paroli ŝin; al ŝi ĉio estis tiom maleda ke ŝi plene forgesis kion rekomendis al ŝi ŝia baptopatrino; tiel ke ŝi, fine, kalkulis ke la horloĝo batsonas la dekduan horon kvankam ŝi kredis ke ne estas pli malfrue ol la deknua; ŝi ekstaris kaj forkuris, vigle kiel cervo. La Princo sekvis, sed ne povis atingi ŝin. Ŝi postlasis unu el siaj vitraj pantofloj, kiun la Princo prenis tre zorge. Ŝi alvenis hejmen, sed tute senspire, kaj portante siajn aĉajn ĉifonvestojn, konservante nenion el la bela vestaĵaro krom unu el la malgrandaj pantofloj, parulo de la postlasita. Al la gardistoj de la pordo de la palaco fariĝis la demando:

Ĉu ili vidis princinon eliri.

Kiuj diris: Ili vidis neniun eliri escepte de junulino, tre mizere vestita, kiu mienis pli kiel povra kamparanino ol nobelino.

Kiam la du fratinoj revenis de la balo Cindrulino demandis al ili: Ĉu ili bone distriĝis, kaj ĉu la bela damo ĉeestis.

Ili diris al ŝi: Jes, sed ke ŝi forhastis tuj kiam sonis la dekdua horo, kaj tiom haste ke ŝi faligis unu el siaj malgrandaj vitraj pantofloj, la plej belaj en la mondo, kiun prenis la filo de la Reĝo; ke li faris nenion alian ol rigardi ŝin tutdum ŝi estis ĉe la balo, kaj ke plej certe li multege amas la belulinon kiu posedas la vitran pantoflon.

Tio kion ili diris estis tute vera; ĉar kelkajn tagojn poste la filo de la Reĝo proklamigis, trumpete, ke li edziĝos kun tiu al kies piedo ĉi tiu pantoflo precize taŭgas laŭ sia grandeco. Liaj dungitoj komencis provi ĝin sur la princinoj, poste la dukinoj kaj la tuta Kortegano, sed vane; oni portis ĝin al la du fratinoj, kiuj faris ĉion eblan por puŝi sian piedon en la pantoflon, sed ili ne povis sukcesi pri tio. Cindrulino, kiu vidis ĉion ĉi, kaj rekonis sian pantoflon, diris al ili, ridante:

“Ankaŭ mi provu ĝin.”

Ŝiaj fratinoj ekridis, kaj komencis moki ŝin. La nobelo sendita por provi la pantoflon rigardis Cindrulinon serioze, kaj, trovante ŝin tre bela, diris:

Estas tute juste ke ŝi provu, kaj ke oni ordonis ke li lasu ĉiun provi.

Li sidigis Cindrulinon, kaj, metinte la pantoflon al ŝia piedo, li trovis ke ĝi tre facile suriras, kaj taŭgas al ŝia piedo kvazaŭ farita



LA FUGA DE CINDRULINO

el vakso. La miro de ŝiaj du fratinoj estis eksterordinare grandega, sed eĉ pli abunde granda kiam Cindrulino tiris el sia poŝo la alian pantoflon, kaj metis ĝin sur sian piedon. Tiumomente, envenis ŝia baptopatrino, kiu, tuŝinte la vestojn de Cindrulino per sia sceptro, kaŭzis ke ili estu pli riĉaj kaj pli grandiozaj ol ĉiuj ŝiaj antaŭaj vestoj.

Kaj nun ŝiaj du fratinoj trovis ŝin tiu nobla, bela damo kiun ili vidis ĉe la balo. Ili ĵetis sin ĉe ŝiajn piedojn por peti pardonon pro la mistraktado kiun ili faris al ŝi. Cindrulino starigis ilin, kaj, ĉirkaŭbrakante ilin, kriis:

Ke ŝi pardonas ilin plenkore, kaj deziras ke ili ĉiam amu ŝin.

Oni kondukis ŝin al la juna Princo, en ŝiaj tiamaj vestoj; li opiniis ŝi eĉ pli ĉarma ol antaŭe, kaj, kelkajn tagojn poste, li edzinigis ŝin. Cindrulino, kiu estis egale bona kiel bela, donis al siaj du fratinoj loĝlokojn en la palaco, kaj tiun tutsaman tagon parigis ilin kun du grandaj nobeloj de la Kortego.¹

¹Charles Perrault

ALADINO KAJ LA MIRINDA LAMPO

FOJE vivis malriĉa tajloro, kiu havis filon nomitan Aladino, senzorga, pigra knabo kiu volis fari nenion dum la tuta tago krom ludi en la stratoj kun aliaj similaj pigraj knabetoj. Tio tiom ĉagrenis lian patron ke li mortis; tamen, malgraŭ la larmoj kaj preĝoj de sia patrino, Aladino ne reformis sin. Unu tagon, dum li ludis en la stratoj laŭ sia kutimo, nekonato demandis al li lian aĝon, kaj ĉu li estas la filo de Mustafo, la tajloro. “Mi estas, sinjoro,” respondis Aladino; “sed li mortis antaŭ longe.” Aŭdinte tion, la nekonato, kiu estas fama Afrika magiisto, ĵetis sin al lia kolo kaj kisis lin, dirante: “Mi estas via onklo, kaj rekonis vin pro via simileco al mia frato. Iru al via patrino kaj diru al ŝi ke mi venas.” Aladino kuris hejmen kaj informis sian patrinon pri sia nove trovita onklo. “Efektive, infano,” ŝi diris, “via patro ja havis fraton, sed mi ĉiam kredis lin morta.” Tamen, ŝi preparis la vespermanĝon, kaj ordonis al Aladino ke li serĉu sian onklon, kiu venis portante vinon kaj fruktojn. Li tuj faligis sin kaj kisis la lokon kie Mustafo kutimadis sidi, petante ke la patrinon de Aladino ne surprizu ke ŝi ne antaŭe vidis lin, ĉar li dum kvardek jaroj estis eksterlande. Li turnis sin al Aladino, kaj demandis pri lia metio, pro kio la knabo mallevis sian kapon, dum lia patrino ekploris. Informite ke Aladino estas pigra kaj rifuzas lerni metion, li proponis akiri butikon por li kaj provizi ĝin per varoj. La sekvan tagon li aĉetis por Aladino belan vestaron kaj gvidis lin tra la tuta urbo, montrante al li la vidindaĵojn, kaj rekondukis lin hejmen je la noktiĝo al lia patrino, kiun multe ĝojigis vidi sian filon tiel belaspekta.

La sekvan tagon la magiisto kondukis Aladinon al kelkaj belaj ĝardenoj longe ekster la urbopordoj. Ili sidiĝis apud fontano kaj la magiisto tiris kukon el sia zono, kiun li dividis inter ili. Post tio ili plu marŝis ĝis ili preskaŭ atingis la montojn. Aladino tiom laciĝis ke li petegis retroiri, sed la magiisto distris lin per plaĉaj rakontoj, kaj plu kondukis lin malgraŭe. Fine ili atingis du

montojn dividitajn de nelarĝa valo. “Ni ne plu marŝos,” diris la falsa onklo. “Mi montros al vi mirindaĵon; vi nur bezonos kolekti vergetojn dum mi ardigos fajron.” Kiam ĝi ardis la magiisto ĵetis sur ĝin pulvoron kiun li havis kun si, kaj samtempe li diris kelkajn magiajn vortojn. La tero tremis iomete kaj malfermiĝis antaŭ ili, montrante kvadratan platan ŝtonon en kies mezo estis latuna ringo per kiu oni povus levi ĝin. Aladino penis forkuri, sed la magiisto kaptis lin kaj tiom forte batis lin ke li ekfalis. “Kion mi faris, onklo?” li diris kompatige; kaj je tio la magiisto diris pli afable: “Nenion timu, nur obeu min. Sub ĉi tiu ŝtono kuŝas trezoro kiu estos via, kaj neniu alia rajtos tuŝi ĝin, do vi devos fari precize kion mi diros al vi. Je la vorto “trezoro” Aladino forgesis siajn timojn, kaj ekprenis la ringon laŭordone, dirante la nomojn de siaj patro kaj avo.



La ŝtono tre facile leviĝis, kaj kelkaj ŝtupoj videblis. “Mal-supreniru,” diris la magiisto; “ĉe la piedo de tiuj ŝtupoj vi trovos malferman pordon kiu kondukas en tri grandajn halojn. Supren-tiru vian robon kaj trairu ilin sen tuŝi ion ajn, alie vi tuj mortos. Tiuj haloj kondukas en ĝardenon de belaj fruktarboj. Plu marŝu ĝis vi atingos niĉon en teraso kie staras lumanta lampo. Elverŝu la oleon kiu estas en ĝi, kaj portu ĝin al mi.” Li tiris ringon de sia fingro kaj donis ĝin al Aladino, dirante ke li prosperu.

Aladino trovis ĉion kia antaŭdiris la magiisto, prenis kelkajn fruktojn de la arboj, kaj, akirinte la lampon, alvenis ĉe la buŝo de la kavo. La magiisto kriis tre hasteme: “Rapide donu al mi la

lampon.” Tion Aladino rifuzis fari antaŭ ol li estos ekster la kavo. La magiisto terure ekpasiĝis, kaj ĵetinte pli da pulvoro sur la fajron, li diris ion, kaj la ŝtono reruliĝis en sian lokon.

La magiisto foriris de Persio por ĉiam, kio klare indikis ke li ne estas onklo de Aladino, sed ruza magiisto, kiu legis en siaj magilibroj pri mirinda lampo, kiu faros el li la plej potenca personon en la mondo. Kvankam nur li sciis kie trovi ĝin, li povus ricevi ĝin nur de la mano de alia persono. Li elektis malsaĝan Aladinon tiucele, intencante akiri la lampon kaj poste mortigi lin.

Du tagojn Aladino restis en la mallumo, plorante kaj lamen-tante. Fine li kunmetis siajn manojn preĝe, kaj farante tion frotis la ringon, kiun la magiisto forgesis kunpreni. Tuj enorma kaj timiga ĝino leviĝis el la tero, dirante: “Kion vi deziras de mi? Mi estas la Sklavo de la Ringo, kaj ĉiel obeos vin.” Aladino sentime respondis: “Savu min el ĉi tiu loko!” kaj tuj la tero apertiĝis, kaj li trovis sin ekstere. Tuj kiam liaj okuloj povis toleri la lumon li hejmeniris, sed svenis sur la sojlo. Kiam li rekonsciiĝis li rakontis al sia patrino kio okazis, kaj montris al ŝi la lampon kaj la fruk-tojn kiujn li kolektis en la ĝardeno, kiuj vere estis valoraj gemoj. Poste li petis manĝaĵojn. “Ve! infano,” ŝi diris, “mi havas nenion en la domo, sed mi ŝpinis iom da kotonon kaj mi iros vendi ĝin.” Aladino petis ŝin konservi la kotonon, ĉar li anstataŭe vendos la lampon. Ĉar ĝi estis tre malpura ŝi komencis froti ĝin, por ke ĝi okazigu pli altan prezon. Tuj hida ĝino aperis, kaj demandis kion ŝi deziras. Ŝi eksvenis, sed Aladino, kaptinte la lampon, diris aŭ-dace: “Portu al mi manĝaĵon!” La ĝino revenis kun arĝenta bovlo, dek du arĝentaj pladoj en kiuj estas riĉaj manĝaĵoj, du arĝentaj tasoj, kaj du boteloj da vino. La patrino de Aladino, kiam ŝi re-konsciiĝis, diris: “El kie venis ĉi grandioza festeno?” “Ne deman-du, nur manĝu,” respondis Aladino. Do ili sidiĝis matenmanĝi ĝis la ĉefmanĝa horo, kaj Aladino informis sian patrinon pri la lam-po. Ŝi fervore petis lin vendi ĝin, kaj tute ne rilati kun demonoj. “Ne,” diris Aladino, “ĉar la hazardo konsciigis nin pri ĝiaj kapa-bloj, ni uzos ĝin, kaj ankaŭ la ringon, kiun mi ĉiam portos sur-fingre.” Kiam ili plenmanĝis ĉion alportitan de la ĝino Aladino vendis unu el la arĝentaj pladoj, kaj cetere ĝis neniuj restis. Post tio li utiligis la ĝinon, kiu donis al li novan aron da pladoj, kaj tiel

ili vivis dum multaj jaroj.

Unu tagon Aladino aŭdis ordonon proklamitan de la Sultano ke ĉiu devos resti enhejme kaj fermi la ŝutrojn dum la Princino, lia filino, iros al kaj de la banejo. Aladinon kaptis deziro vidi ŝian vizaĝon, kio estis tre malfacila, ĉar ŝi ĉiam vualis sin. Li kaŝis sin malantaŭ la pordo de la banejo, kaj rigardis tra breĉeto. La Princino levis sian vualon enirante, kaj aspektis tiel bela ke Aladino ekamis ŝin je la unua vido. Li hejmeniris tiom ŝanĝita ke lia patrino ektimis. Li diris al ŝi ke li amas la Princinon tiom ke li ne pov-



os vivi sen ŝi, kaj ke li intencas peti ŝin de ŝia patro kiel edzinon. Lia patrino, aŭdinte tion, ekridis, sed Aladino fine sukcesis persvadi ŝin iri antaŭ la Sultanon portante lian peton. Ŝi alportis tukon kaj volvis per ĝi la magiajn fruktojn de la sorĉita ĝardeno, kiuj scintilis kaj brilis kiel plej belaj juveloj. Ŝi kunprenis ilin por plaĉi al la Sultano, kaj ekiris, fidante la lampon. La Ĉefveziro kaj la konsilianoj ĵus eniris kiam ŝi eniris la halon kaj metis sin antaŭ la Sultanon. Li, tamen, ne atentis ŝin. Ĉiutage dum semajno ŝi aliris, kaj staris samloke. Kiam la konsilo finiĝis dum la sesa tago

la Sultano diris al sia Veziro: “Mi vidas certan virinon en la aŭdiencejo ĉiutage, kiu portas ion en tuko. Voku ŝin sekvafoje, por ke mi trovu kion ŝi volas.” La sekvan tagon, je gesto de la Veziro, ŝi iris al la piedo de la trono kaj restis surgenuje ĝis la Sultano diris al ŝi: “Staru, bonulino, kaj diru al mi kion vi volas.” Ŝi hezitis, do la Sultano forsendis ĉiujn escepte de la Veziro, kaj petis ŝin paroli malkaŝe, promesante antaŭpardonon al ŝi kion ajn ŝi diros. Ŝi do parolis al li pri la freneza amo de sia filo al la Princino. “Mi petegis lin forgesi ŝin,” ŝi diris, “sed vane; li minacis fari ĉion teruraĵon se mi rifuzos iri peti de via Moŝto la manon de la Princino. Nun me petas vin pardonon ne nur min, sed ankaŭ mian filon Aladino.” La Sultano afable demandis al ŝi kion ŝi havas en la tuko, kaj obee ŝi malvolvis la juvelojn kaj prezentis ilin. Li miregis, kaj turninte sin al la Vizero diris: “Kion vi diras? Ĉu mi ne donacu la Princinon al persono kiu tiel altege taksas ŝin?” La Veziro, kiu volis ŝin por sia propra filo, petis la Sultanon reteni ŝin dum tri monatoj, kaj diris ke li esperas ke dum tiuj monatoj lia filo sukcesos fari por li pli riĉan donacon. La Sultano akceptis tion, kaj diris al la patrino de Aladino ke, kvankam li konsentas pri la geedziĝo, dum tri monatoj ŝi ne denove aperu antaŭ li.

Aladino atendis pacience dum preskaŭ tri monatoj, sed post la forpaso de du lia patrino, enirinte la urbon por aĉeti oleon, trovis ke ĉiuj ĝojas, kaj demandis kio okazas. “Ĉu vi ne scias,” estis la respondo, “ke la filo de la Ĉefveziro edzinigos la filinon de la Sultano ĉinokte?” Senspire ŝi kuris informi Aladinon, kiu unue stuporis, sed baldaŭ ekpensis pri la lampo. Li frotis ĝin, kaj la ĝino ekaperis, dirante: “Kion vi deziras?” Aladino respondis: “La Sultano, kiel vi scias, rompis sian promeson al mi, kaj la filo de la Vizero ricevos la Princinon. Mi ordonas ke ĉinokte vi portu ĉi tien la edzinon kaj edzon.” “Mastro, mi obeas,” diris la ĝino. Aladino do eniris sian ĉambron, kien, tutvere, je la noktomezo la ĝino transportis la liton en kiu estas la filo de la Vizero kaj la Princino. “Prenu ĉi tiun novelon,” li diris, “kaj metu lin eksteren en la fridon, kaj revenu je la tagiĝo.” Sekve la ĝino prenis la filon de la Vizero el la lito, lasante Aladinon kun la Princino. “Neniom timu,” Aladino diris al ŝi; “vi estas mia edzino, promesita al mi de via maljusta patro, kaj nenio damaĝos vin.” La Princino tro timis

por paroli, kaj pasigis la plej mizeran nokton de sia vivo, dum Aladino kuŝis apud ŝi kaj dormis profunde. Je la planita horo la ĝino enportis la frostotremantan novedzon, kuŝigis lin en lian lokon, kaj retransportis la liton al la palaco.

Baldaŭ la Sultano venis saluti sian filinon. La malfeliĉa filo de la Vizero eksaltis kaj kaŝis sin, dum la Princino rifuzis paroli, kaj estis tre malfeliĉa. La Sultano sendis ŝian patrinon al ŝi, kiu diris: “Kial estas, infano, ke vi rifuzis paroli al via patro? Kio okazis?” La Princino profunde ĝemis, kaj fine rakontis al sia patrino ke, dum la nokto, la lito estis portita en iun nekonatan domon, kaj kio okazis tie. Ŝia patrino tute ne kredis ŝin, sed ordonis ke ŝi ellitiĝu kaj kredu ĝin stulta sonĝo.

La sekvan nokton precize samaj eventoj okazis, kaj la sekvan matenon, kiam la Princino rifuzis paroli, la Sultano minacis detranĉi ŝian kapon. Do ŝi konfesis ĉion, petante ke li demandu al la filo de la Vizero ĉu ne estas vere. La Sultano ordonis ke la Vizero demandu al sia filo, kaj la filo agnoskis la veron, aldonante ke, kvankam li elkore amas la Princinon, li preferus morti ol trapasi plian tiel teruran nokton, kaj ke li deziras apartiĝi de ŝi. Lia deziro plenumiĝis, kaj ĉesis la festenado kaj ĝojado.

Post la forpaso de la tri monatoj, Aladino sendis sian patrinon por memoriĝi al la Sultano lian promeson. Ŝi staris samloke kiel antaŭe, kaj la Sultano, kiu estis forgesinta Aladinon, tuj memoris lin, kaj alvokis ŝin. Vidante ŝian malriĉecon la Sultano des malpli emis plenumi sian promeson, kaj li petis de sia Vizero konsilon, la Viziro konsilis ke li tiel alte taksu la valoron de la Princino ke neniuj vivanto povus pagi ĝin. La Sultano do turnis sin al la patrino de Aladino, kaj diris: “Bonulino, sultano devas plenumi siajn promesojn, kaj mi plenumos mian, sed unue via filo devos sendi al mi kvardek orajn pelvojn plenegajn de juveloj, portatajn de kvardek nigraj sklavo, gvidataj de egala nombro de blankaj sklavo, elegante vestitaj. Diru al li ke mi atendas lian respondon.” La patrino de Aladino profunde riverencis kaj iris hejmen, kredante ke ĉio fiaskis. Ŝi diris al Aladino la mesaĝon, aldonante: “Li verŝajne devos longe atendi vian respondon!” “Ne tiom longe, patrino, kiom vi supozas,” ŝia filo respondis. “Mi farus multe pli ol tion por la Princino.” Li alvokis la ĝinon, kaj post

kelkaj momentoj la okdek sklavoj alvenis, kaj plenigis la dometon kaj ĝardenon. Aladino marŝigis ilin al la palaco, duope, sekvataj de lia patrino. Ili estis tiel riĉe vestitaj, kaj havis tiel grandiozajn juvelojn en siaj zonoj, ke ĉiuj amasiĝis por rigardi ilin kaj la orajn pelvojn kiujn ili portas sur siaj kapoj. Ili eniris la palacon, kaj, surgenuiĝinte antaŭ la Sultano, staris duoncirkle ĉirkaŭ la trono kun krucitaj brakoj, dum la patrino de Aladino prezentis ilin al la Sultano. Li ne plu hezitis, sed diris: “Bonulino, reiru kaj informu vian filon ke mi atendas lin kun malfermaj brakoj.” Ŝi ne malŝparis tempon antaŭ ol informi Aladinon, petante lin hasti. Sed unue



Aladino alvokis la ĝinon. “Mi volas belodoran banon,” li diris, “riĉe broditan kostumon, ĉevalon pli gloran ol tiu de la Sultano, kaj dudek servistajn sklavojn. Krome, ses sklavojn, bele vestitajn, por servi mian patrino; kaj fine, dek mil orpecojn en dek ujoj.” Jam dirite, jam farite. Aladino surgrimpis sian ĉevalon kaj pasis tra la stratoj, dum la sklavoj disŝutis oran kunirante. La personoj ludintaj kun li dum lia infaneco ne rekonis lin, ĉar li fariĝis tiel bela. Kiam la Sultano vidis lin li deiris de sia trono, ĉirkaŭbrakis lin, kaj kondukis lin en halon kie festeno estis pretigita, intencante geedziĝi lin kaj la Princinojn jam tiutage. Sed Aladino rifuzis,

dirante, “Mi devos konstrui palacon taŭgan por ŝi,” kaj adiaŭis. Ĉeĥejme, li diris al la ĝino: “Konstruu por mi palacon el plej bona marmoro, inkrustitan per jaiso, agato, kaj aliaj valoraj ŝtonoj. En la mezo konstruu por mi grandan halon kun kupolo, ĝiaj kvar muroj estu el puraj oro kaj arĝento, ĉiu flanko havu ses fenestrojn, kies latisoj, escepte de unu kiu devas esti nefinita, estu inkrustitaj per diamantoj kaj rubenoj. Estu staloj kaj ĉevaloj kaj ĉevalzorgistoj kaj sklavoj; iru kaj efektivigu tion!”

La palaco jam estis finita antaŭ la sekva tago, kaj la ĝino portis lin tien kaj montris al li ke ĉiuj liaj ordonoj estas fidele plenumitaj, eĉ velura tapiŝo estis sternita ekde la palaco de Aladino ĝis tiu de la Sultano. La patrino de Aladino vestis sin zorge, kaj marŝis al la palaco kun siaj sklavoj, dum li sekvis ŝin sur ĉevalo. La Sultano sendis muzikistojn kun trumpetoj kaj cimbaloj por renkonti ilin, tiel ke la aero estis plena de muziko kaj huraoj. Ŝi estis gvidita al la Sultano, kiu salutis ŝin kaj tre honoris ŝin. Je la noktigo la Princino diris adiaŭ al sia patro, kaj ekmarŝis sur la tapiŝo cele la palacon de Aladino, kun lia patrino apud ŝi, kaj sekvate de la cent sklavoj. Ŝin ĉarmis la ekvido de Aladino, kiu kuris akcepti ŝin. “Princino,” li diris, “kulpigu vian belecon pro mia troaŭdaco, se mi malplaĉis al vi.” Ŝi diris al li ke, vidinte lin, ŝi volontas obeas sian patron pri ĉi afero. Post la geedziĝo Aladino gvidis ŝin en la halon, kie estis pretigita festeno, kaj ŝi manĝis kun li, kaj post tio ili dancis ĝis la noktomezo.

La sekvan tagon Aladino invitis la Sultanon rigardi la palacon. Enirante la halon kun la dudek kvar fenestroj, kun iliaj rubenoj, diamantoj, kaj smeraldoj, li kriis: “Jen mirindaĵo de la mondo! Nur unu afero surprizas min. Ĉu hazarde unu fenestro estas nefinita?” “Ne, sinjoro, laŭplane,” respondis Aladino. “Mi volis ke al via Moŝto estu la gloro de la finkonstruo de ĉi tiu palaco.” Al la Sultano tio plaĉis, kaj li venigis la plej bonajn juvelistojn en la urbo. Li montris al ili la nefinitan fenestron, kaj ordonis ke ili pretigu ĝin por ke ĝi simulu al la aliaj. “Sinjoro,” respondis ilia proparolanto, “ni ne povos trovi sufiĉajn juvelojn.” La Sultano venigis siajn proprajn, kiujn ili baldaŭ uzis, sed sencele, ĉar post monato la laboro estis ankoraŭ eĉ ne duone kompletigita. Aladino, sciante ke ilia tasko estas vana, ordonis ke ili malfaru sian laboron kaj

reportu la juvelojn, kaj la ĝino finis la fenestron laŭ lia ordono. La Sultanon surprizis rericevi siajn juvelojn, kaj li vizitis Aladinon, kiu montris al li la fenestron finita. La Sultano ĉirkaŭbrakis lin, sed la envia Veziro dume sugestis ke temas pri laboro sorĉe farita.

Aladino kaptis la korojn de la popolo per sia milda traktado. Li fariĝis kapitano de la armeoj de la Sultano, kaj sukcesis en pluraj bataloj por li, sed restis modesta kaj ĝentila kiel antaŭe, kaj tiel vivis pace kaj kontente dum pluraj jaroj.

Sed tre malproksime, en Afriko, la magiisto memoris Aladinon, kaj per siaj magiaj artoj trovis ke Aladino, anstataŭ pereii mi-zere en la kavo eskapis, kaj edzinigis principon kun kiu li loĝas tre honorate kaj riĉe. Li sciis ke la filo de la malriĉa tajloro povus fari tion nur per la lampo, kaj li veturis nokte kaj tage ĝis atingi la ĉefurbon de Ĉinio, fervore intencante ruinigi Aladinon. Trapasante la urbon li aŭdis onin ĉie paroli pri mirinda palaco. “Pardonu mian senscion,” li demandis, “kiu estas tiu palaco pri kiu vi parolas?” “Ĉu vi ne aŭdis pri la palaco de Princo Aladino,” estis la respondo, “la plej granda mirindaĵo de la mondo? Mi gvidos vin al ĝi se vi deziras vidi ĝin.” La magiisto dankis la parolinton, kaj vidante la palacon konsciis ke ĝin konstruis la Ĝino de la Lampo, kaj duone freneziĝis pro furiozo. Li firme decidis akiri la lampon, kaj denove puŝi Aladinon en plej profundan malriĉecon.

Misfortune, Aladino forestis ĉasante dum ok tagoj, pro kio la magiisto havis multan tempon. Li aĉetis dek du kuprajn lampojn, metis ilin en korbon, kaj iris al la palaco, kriante: “Novaj lampoj anstataŭ malnovaj!” sekvate de mokanta homamaso. La Princino, sidante en la halo de dudek kvar fenestroj, sendis sklavinton trovi pro kio estas la bruoj, kaj ŝi revenis ridante, tiel ke la Princino ri-proĉis ŝin. “Sinjorino,” respondis la sklavino, “kiu povas ne ridi, vidante oldan malsaĝulon proponi interŝanĝi belajn novajn lampojn kontraŭ malnovaj?” Alia sklavino, aŭdinte tion, diris: “Estas olda lampo sur tiu kornico kiun li povos preni.” Nu tiu estis la magia lampo, kiun Aladino postlasis tie, ĉar li ne povis kunpreni ĝin ĉasante. La Princino, ne konante ĝian valoron, ridante ordonis ke la sklavino prenu kaj interŝanĝu ĝin. Do ŝi iris kaj diris al la magiisto: “Donu al mi novan lampon interŝanĝe por ĉi tiu.” Li ekkaptis ĝin kaj lasis ke la sklavino elektu, dum la homamaso

mokadis. Je ne gravis al li, li ĉesis kriadi pri siaj lampoj, kaj foriris tra la urbopordoj al soleca loko, kie li restis ĝis la noktĝo, kaj ti-am li eltiris la lampon kaj frotis ĝin. La ĝino ekaperis, kaj je ordo-no de la magiisto portis lin, kaj ankaŭ la palacon en kiu estas la Princino, al soleca loko en Afriko.

La sekvan matenon la Sultano rigardis tra la fenestro cele la palacon de Aladino kaj frotis siajn okulojn, ĉar ĝi mankis. Li venigis la Veziron kaj demandis kio okazis al la palaco. La Veziro ankaŭ rigardis, kaj plene miregis. Denove li opiniis ke temas pri sorĉo, kaj ĉifoje la Sultano kredis lin, kaj sendis tridek virojn sur ĉevaloj revenigi Aladinon ĉenita. Ili renkontis lin dum li rajdis hejmen, ligis lin, kaj devigis lin iri kun ili surpiede. La popolo, tamen, kiu amis lin, sekvis lin, armite, por certigi ke neniam dama-ĝo okazos al li. Li estis portita antaŭ la Sultanon, kiu ordonis ke la ekzekutisto detranĉu lian kapon. La ekzekutisto devigis Aladinon surgenuiĝi, bandaĝis liajn okulojn, kaj levis sian sabron por bati. Tiumomente la Veziro, kiu vidis ke la homamaso trudis sin en la korton kaj grimpas la murojn por savi Aladinon, vokis al la ekze-kutisto ke li haltigu sian manon. La popolo, efektive, aspektis tiel minaca ke la Sultano cedis kaj ordonis malligi Aladinon, kaj pardonis lin dum la homamaso rigardis. Aladino nun petis scii kion li misfaris. “Falsisto!” diris la Sultano, “venu ĉi tien,” kaj montris al li el la fenestro la lokon kie antaŭe staris lia palaco. Aladino tiom miris ke li ne povis paroli. “Kie estas mia palaco kaj mia filino?” demandis la Sultano. “Pri tiu mi ne multe ĝenas min, sed mi devas havi mian filinon, kaj vi devos trovi ŝin aŭ perdi vi-an kapon.” Aladino petis kvardek tagojn por trovi ŝin, promes-ante ke se li malsukcesos li revenos kaj suferos morton laŭ la deziro de la Sultano. La Sultano konsentis, kaj li eliris malfeliĉe de antaŭ la Sultano. Tri tagojn li vagadis kvazaŭ frenezulo, demand-ante al ĉiu kio okazis al lia palaco, sed ili nur ridis kaj kompatis lin. Li venis al la bordo de rivero, kaj surgenuis por preĝi antaŭ ol enĵeti sin. Farante tion li frotis la magian ringon kiun li ankoraŭ surhavis. La ĝino kiun li vidis en la kavo aperis, kaj demandis kion li deziras. “Savu mian vivon, ĝino,” diris Aladino, “kaj repor-tu mian palacon.” “Tion mi ne kapablas,” diris la ĝino; “mi estas nur la Sklavo de la Ringo. Vi devos peti al tiu de la lampo.” “Ta-

men,” diris Aladino, “vi povos porti min al la palaco, kaj meti min sub la fenestron de mia kara edzino.” Li tuj trovis sin en Afriko, sub la fenestro de la Princino, kaj ekdormis pro plena laco.

Lin vekis la kantado de la birdoj, kaj lia koro estis pli leĝera. Li vidis klare ke ĉiuj liaj misfortunoj ŝuldiĝis al la perdo de la lampo, kaj vane demandis al si kiu ŝtelis ĝin de li.



Tiun matenon la Princino ellitiĝis pli frue ol ekde kiam ŝin portis en Afrikon la magiisto, kies ĉeeston ŝi devis toleri unufoje dum ĉiu tago. Ŝi tamen traktis lin tiel malmilde ke li tute ne kuraĝis loĝi tie. Dum ŝi vestis sin, unu el ŝiaj servistinoj elrigardante vidis Aladinon. La Princino kuris kaj malfermis la fenestron, kaj pro ŝia bruo Aladino supren rigardis. Ŝi vokis al li ke li venu al ŝi, kaj granda estis la ĝojo de tiuj amantoj revidantaj unu la alian. Kisinte ŝin Aladino diris: “Mi petas vin, Princino, je la nomo de Dio, ant-

aŭ ol ni parolos pri io alia, por vi kaj por mi, diru al mi kio okazis al malnova lampo kiun mi havis sur la kornico en la halo de kvardek fenestroj, kiam mi foriris ĉasi.” “Ve!” ŝi diris, “mi estas la senkulpa kaŭzo de niaj mizeroj,” kaj informis lin pri la interŝanĝo de la lampo. “Nun mi scias,” kriis Aladino, “ke ĉi tio okazis dank’ al la Afrika magiisto! Kie estas la lampo?” “Li portas ĝin kun si,” diris la Princino. “Mi scias, ĉar li tiris ĝin el sub sia brustovesto por montri ĝin al mi. Li volas ke mi malfidelu al vi kaj edzigu lin, dirante ke vi estis senkapigita laŭ ordono de mia patro. Li ĉiam fiparolas pri vi, sed mi respondas nur per miaj larmoj. Se mi persistos, mi ne dubas ke li uzos perforton.” Aladino konsolis

ŝin, kaj lasis ŝin provizore. Li interŝanĝis vestojn kun la unua renkontato en la urbo, kaj aĉetinte certan pulvoron li reiris al la Princino, kiu enlasis lin per malgranda flankpordo. “Vestu vin per via plej bela robo,” li diris al ŝi, “kaj akceptu la magiiston ridetante, kredigu al li ke vi forgesis min. Invitu lin manĝi kun vi, kaj diru ke vi volas gustumi la vinon de lia lando. Li foriros akiri ĝin kaj dum li estos por mi diros al vi kion fari.” Ŝi aŭskultis atente Aladinon, kaj post lia foriro ŝi vestis sin gaje la unuan fojon post sia foriro el Ĉinio. Ŝi surmetis zonon kaj kapveston diamantajn, kaj, vidinte per spegulo ke ŝi estas pli bela ol iam antaŭe, ŝi akceptis la magiiston, dirante, mirigante lin, “Mi decidis ke Aladino mortis, kaj ke ĉiuj miaj larmoj ne revenigos lin al mi, do mi firme decidis ne plu lamenti, kaj tial mi invitis vin manĝi kun mi; sed mi enuas pro la vinoj el Ĉinio, kaj deziras gustumi tiujn de Afriko.” La magiisto hastis al sia kelo, kaj la Princino metis la pulvoron donitan al ŝi de Aladino en sian tason. Post lia reveno ŝi petis ke li trinku al ŝia sano per la vino de Afriko, kaj donis al li sian tason interŝanĝe por lia, kiel indikon ke ŝi reamikiĝis kun li. Antaŭ ol trinki la magiisto paroladis laŭde al ŝia beleco, sed la Princino haltigis lin, dirante: “Unue ni trinku, kaj poste vi parolu laŭ via deziro.” Ŝi metis la tason al siaj lipon kaj tenis ĝin tie, dum la magiisto eltrinkis sian ĝis la feĉo kaj retrofalis senviva. Tiam la Princino malfermis la pordon al Aladino, kaj ĵetis siajn brakojn ĉirkaŭ lian kolon. Sed Aladino forpuŝis ŝin, petante ke ŝi lasu lin, ĉar li havas pli da taskoj. Post tio li iris al la morta magiisto, elprenis la lampon el lia veŝto, kaj ordonis ke la ĝino reportu la palacon kaj ĉion en ĝi al Ĉinio. Tio fariĝis, kaj la Princino en sia ĉambro sentis nur du ŝoketojn, kaj malmulte konceptis ke ŝi estas denove hejme.

La Sultano, kiu sidis en sia kabineto, lamentante pro sia perdita filino, hazarde supren rigardis, kaj frotis siajn okulojn, ĉar jen tie staras la palaco same kiel antaŭe! Li hastis tien, kaj Aladino akceptis lin en la halo de la kvardek fenestroj, kun la Princino apud si. Aladino informis lin pri kio okazis, kaj montris al li la mortan korpon de la magiisto, por ke li kredu. Dektaga festo proklamiĝis, kaj ŝajnis ke Aladino nun povos vivi pace dum la cetero de sia vivo; sed tiel ne okazis.

La Afrika magiisto havis pli junan fraton, kiu estis, se eble, eĉ pli fia kaj pli ruza ol li. Li veturis al Ĉinio por venĝi la morton de sia frato, kaj iris viziti piulinon nomitan Fatimo, opiniante ke eble ŝi utilis al li. Li eniris ŝian ĉelon kaj metis ponardon al ŝia brusto, dirante ke ŝi starigu kaj obeu lin por ke li ne mortigu ŝin. Li interŝanĝis vestojn kun ŝi, kolorigis sian vizaĝon por simili ŝian, surmetis ŝian vualon, kaj murdis ŝin, por ke ŝi ne informu al aliaj



personoj. Post tio li marŝis cele la palacon de Aladino, kaj ĉiuj homoj, kredante lin la sanktulino, grupiĝis ĉirkaŭ lin, kisante liajn manojn kaj petante lian benon. Kiam li atingis la palacon okazadis tiom da bruo ĉirkaŭ li ke la Princino ordonis al sia sklavino rigardi tra la fenestro kaj demandi kio okazas. La sklavino diris ke jen la sanktulino, kiu kuracas homojn de iliaj malsanoj per sia tuŝo; tuj la Princino, kiu de longe deziris vidi Fatimon, ordonis venigi ŝin. Veninte al la Princino la magiisto

faris preĝon por ŝiaj sano kaj prospero. Kiam li finis tion la Princino sidigis lin apud si, kaj petis lin resti por ĉiam kun ŝi. La falsa Fatimo, kiu nenion pli bonan volis, konsentis, sed zorgis ke lia vualo restu mallecita, por ke li ne vidiĝu. La Princino montris al li la halon, kaj demandis al li lian opinion pri ĝi. “Ĝi estas vere bela,” diris la falsa Fatimo. “Laŭ mia opinio mankas al ĝi nur unu afero.” “Kaj kio estas tio?” diris la Princino. “Se nur ovo de Rokò,¹” respondis li, “pendus de la mezo de ĉi kupulo, ĝi estus plejmirindaĵo de la mondo.”

Post tio la Princino povis pensi pri nenio alia ol la ovo de Rokò, kaj kiam Aladino revenis de ĉasado li trovis ŝin tre mis-humora. Li petis scii kio misas, kaj ŝi diris al li ke ŝian plezuron pri la halo plene ruinigas la manko de ovo de Rokò pendants de la kupolo. “Se nur tio,” respondis Aladino, “vi baldaŭ feliĉiĝos.” Li lasis ŝin kaj frotis la lampon, kaj kiam la ĝino ekaperis li ordonis ke li alportu ovon de Rokò. La ĝino faris tiom laŭtan kaj teruran kriegon ke la halo tremis. “Fiulo!” li kriis, “ĉu ne sufiĉas ke mi faris ĉion por vi, sed vi devas ordoni ke mi alportu mian mastron kaj pendigu lin en la mezo de ĉi kupolo? Vi kaj via edzino kaj via palaco meritas cindriĝon per brulado, tamen ĉi peto ne venis de vi, sed de la frato de la Afrika magiisto, kiun vi detruis. Li nun estas en via palaco ŝajnigante sin la sanktulino—kiun li murdis. Li metis tiun deziron en la kapon de via edzino. Atentu, ĉar li celas mortigi vin.” Dirinte tion, la ĝino malaperis.

Aladino reiris al la Princino, dirante ke doloras lia kapo, kaj petante ke sankta Fatimo estu alvokita por meti siajn manojn sur ĝin. Sed kiam la magiisto proksimiĝis, Aladino, kaptinte sian ponardon, pikis lin ĝis en la koron. “Kion vi faris?” kriis la Princino. “Vi mortigis la sanktulino!” “Tute ne,” respondis Aladino, “nur fian magiiston,” kaj li informis ŝin pri kiel ŝi trompiĝis.

Post tio Aladino kaj lia edzino vivis pace. Li ekregis post la morto de la Sultano, kaj regis dum multaj jaroj, kaj postlasis longan vicon da reĝoj.²

²Arabaj Noktoj

¹Rokò estis mita birdo enorma kaj fortega.

*LA RAKONTO PRI JUNULO KIU ENTREPRENIS
LERNI KIO ESTAS TIMO*

PATRO havis du filojn, el kiuj la plej aĝa estis lerta kaj inteligenta, kaj ĉiam sciis kion li faras; sed la plej juna estis stulta, kaj povis nek lerni nek kompreni ion ajn. Tiom ke kiuj vidis lin ekkriis: “Kia ŝarĝo li devas esti por sia patro!” Nu, kiam io estis farenda, la plej aĝa ĉiam devis fari ĝin; sed se io estis postulita malfrue aŭ dum la nokto, kaj la vojo iris tra la tombaro aŭ iu tia hantata loko, li ĉiam respondis: “Ho! ne, patro: nenio instigus min iri tien, tio timetremigas min!” ĉar li timis. Aŭ, kiam ili sidis vespere ĉirkaŭ la fajro dirante rakontojn kiuj timefrostar la haŭton, la aŭskultantoj kelkfoje diris: “Ho, tio timetremigas,” la plej juna sidis en angulo, aŭdis la krion, kaj ne povis kompreni ĝian signifon. “Ili ĉiam diris ke io timetremigas! timetremigas! Nenio timetremigas min. Verŝajne tio estas arto kiun mi ne kapablas.”

Nu, okazis ke unu tagon lia patro diris al li: “Aŭskultu, vi en la angulo; vi kreskas granda kaj forta, kaj vi devos lerni perlabori vian propran panon. Rigardu vian fraton, kiom li strebas; sed la tuta monaro kiun mi elspezis por edukigi vin estas forĵetita.” “Mia kara patro,” li respondis, “mi volonte lernos—efektive, se estus eble mi volonte lernus tremi pro timo; mi ankoraŭ neniom komprenas tion.” La plej aĝa ridis aŭdante tion, kaj pensis: “Je Dio! Kia stultulo estas mia frato! li neniam sukcesos; kiel misformiĝis la vergeto, tiel miskreskos la arbo.” La patro ĝemis, kaj respondis al li: “Vi baldaŭ lernos tremi pro timo; sed tio ne helpas vin perlabori la vivon.”

Post nelonge, kiam la sakristiano venis viziti ilin, la patro ekkonfesis al li, dirante al li kia mallertulo estas lia plej juna filo pri ĉio: li scias nenion kaj lernas nenion. “Nur pensu! kiam mi demandis al li kiel li intencas perlabori sian vivon, li vere petis

instruon pri timotremado.” “Se nur tion li volas,” diris la sakristiano, “mi povos instrui tion al li; nur sendu lin al mi, mi baldaŭ poluros lin.” Al la patro multe plaĉis tiu propono, ĉar li pensis: “Jen bona disciplino por la junulo.” Do la sakristiano prenis lin en sian domon, kaj lia tasko estis sonigadi la sonorilon. Post kelkaj tagoj li vekis lin je la noktomezo, kaj ordonis lin ellitiĝi



kaj grimpi en la turon kaj sonorigi. “Nun, mia amiko, mi instru-
os vin tremi pro timo,” pensis li. Li kaŝsekrete antaŭiris, kaj kiam
la junulo estis supre, kaj turnis sin por preni la sonoriloŝnuron, li
vidis, staranta kontraŭ la truo de la sonorilturo, blankan figuron.
“Kiu estas?” li vokis, sed la figuro ne respondis, kaj ne moviĝis.
“Respondu,” kriis la junulo, “aŭ foriru; vi ne rajtas esti ĉi tie je ĉi
horo de la nokto.” Sed la sakristiano restis senmova, tiel ke la
junulo kredu lin fantomo. La junulo duafoje kriis: “Kion vi volas

ĉi tie? Parolu, se vi estas honestulo, alie mi batfaligos vin laŭ la ŝtuparo.” La sakristiano pensis: “Li certe ne seriozas,” do li faris nenian sonon, kaj staris kvazaŭ el ŝtono. La junulo kriis al li triafoje, kaj ĉar ankaŭ tio ne efikis li kuris kontraŭ la fantomon kaj batfaligis ĝin laŭ la ŝtuparo, tiel ke ĝi falis ĉirkaŭ dek ŝtupojn kaj restis kuŝanta en angulo. Post tio li sonigis la sonorilon, hejmeniris por enlitiĝi sen diri eĉ vorton, kaj endormiĝis. La edzino de la sakristiano longatempe atendis sian edzon, sed li ne revenis. Fine ŝi maltrankvilis, kaj vekis la junulon, kaj demandis: “Ĉu vi ne scias kie estas mia edzo? Li iris en la turon antaŭ vi.” “Ne,” respondis la junulo; “sed iu staris sur la ŝtupoj tie, tuj kontraŭ la luko en la sonorilturo, kaj ĉar li rifuzis respondi al mi, aŭ foriri, mi supozis lin krimulo kaj batfaligis lin. Plej bone vi iru trovi ĉu ja estis li; mi multe malgajus se jes.” La edzino kuris kaj trovis sian edzon, kiu kuŝas ĝemante en angulo, kun rompita kruro.

Ŝi malsupren portis lin, kaj poste hastis laŭte protestante al la patro de la junulo. “Via filo kaŭzis belan misfortunon,” ŝi kriis; “li malsupren ĵetis mian edzon laŭ la ŝtuparo tiel ke lia kruro rompiĝis. Prenu la aĉan sentaŭgulon el nia domo.” La patro ege ĉagreniĝis, rapidis al la junulo, kaj riproĉis lin.

“Kiaj malsanktaj petolaĵoj estas? La Maliculo nepre metis ilin en vian kapon.” “Patro,” li respondis, “nur aŭskultu min; mi estas tute senkulpa. Li staris tie en la nokto, kiel intencante damaĝi min. Mi ne sciis kiu estas, kaj trifoje mi avertis lin paroli aŭ foriri.” “Ho!” ĝemis la patro, “vi portos al mi nur misfortunon; foriru de mi, mi volas neniom plu rilati kun vi.” “Jes, patro, volonte; nur atendu la tagiĝon, tiam mi eliros kaj lernos tremi pro timo, kaj tiel mi estos majstro de arto per kiu mi perlaboros mian vivon.” “Lernu kion ajn,” diris la patro, “tute ne gravas al mi. Jen kvindek dolaroj por vi, foriru kun ili en la grandan mondon; sed atentu al neniuj diri el kie vi venis aŭ kiu estas via patro, ĉar mi hontas pro vi.” “Jes, patro, kion ajn vi deziras; kaj se nur tion vi petas, mi facile memoros ĝin.”

Je la tagiĝo la junulo metis la kvindek dolarojn en sian poŝon, ekmarŝis sur la dura alta vojo, kaj konstante murmuradis al si: “Se nur mi povus tremi pro timo! se nur mi povus timotremi!” Ĝuste

tiumomente viro proksimiĝis kiu aŭdis la junulon paroli al si, kaj kiam ili iomete pli iris kaj povis vidi la pendumigilon la viro diris al li: “Rigardu! jen la arbo kie sep homoj estis pendumigitaj, kaj nun ili lernas flugi; sidiĝu sub ĝi kaj atendu la noktiĝon, kaj tre rapide vi lernos tremi pro timo.” “Se nur tion mi devos fari,” respondis la junulo, “estas facile; sed se mi lernos tremi pro timo tiel rapide, do vi ricevos miajn kvindek dolarojn. Nur revenu al mi frue morgaŭ matene.” Post tio la junulo iris al la pendumiga arbo kaj sidiĝis sub ĝi, kaj atendis la vesperon; kaj ĉar li sentis malvarmon li ardigis por si fajron. Sed je la noktomezo fariĝis tiel fride ke malgraŭ la fajro li ne povis teni sin varma. Kaj dum la vento blovis la kadavrojn unu kontraŭ la alian, ĵetante ilin tien kaj reen, li pensis: “Se vi pereas ĉi tie apud la fajro, kiel nepre skuigĝas kaj frostetremas tiuj povruloj tie supre!” Kaj ĉar li havis teneran koron, li starigis eskalon kiun li grimpis, malhokis unu kadavron post la alia, kaj deprenis ĉiujn sep. Post tio li vigligis la fajron, blovis ĝin, kaj metis ilin ĉirkaŭ ĝin vice, por ke ili varmigu sin. Sed ili nur sidis senmove, kaj la fajro kaptis iliajn vestojn. Li parolis, do: “Zorgu, alie mi rependigos vin.” Sed la mortintoj ne aŭdis, kaj lasis siajn ĉifonojn plu bruladi. Do li koleriĝis, kaj diris: “Se vi mem rifuzas zorgi, mi ne povas helpi vin, kaj mi ne intencas bruli kun vi,” kaj li rependigis ilin vice. Post tio li sidiĝis ĉe sia fajro kaj ekdormis. La sekvan matenon la viro venis al li, kaj, volante akiri siajn kvindek dolarojn, diris: “Nun vi scias kio estas timotremo.” “Ne,” li respondis, “kiel do? Tiuj uloj supre eĉ ne malfermis siajn buŝojn, ili tiom stultis ke ili lasis la pokajn ĉifonaĉojn sur la korpoj bruli.” La viro komprenis ke li ne ricevos siajn kvindek dolarojn tiutage, kaj foriris dirante: “Nu, benu min, mi neniam renkontis tian personon antaŭ nun en mia vivo!”

Ankaŭ la junulo iris sian vojon, kaj komencis murmuradi al si: “Ho! se nur mi povus tremi pro timo! se nur mi povus timotremi!” Portisto marŝanta malantaŭ li aŭdis tiujn vortojn, kaj demandis al li: “Kiu vi estas?” “Mi ne scias,” diris la junulo. “El kie vi venis?” “Mi ne scias.” “Kiu estas via patro?” “Mi ne rajtas diri.” “Kion vi konstante murmuris al vi?” “Ho!” diris la junulo, “mi donus mondojn por povi tremi pro timo, sed neniu povas instrui min.” “Absurdaĵo!” diris la portisto; “venu kun mi, kaj mi baldaŭ

ĝustigos tion.” La junulo iris kun la portisto, kaj vespere ili atingis gastejon, kie ili pasigos la nokton. Tie, ĝuste dum li eniris la ĉambron, li denove diris, tre laŭte, “Ho! se nur mi povus tremi pro timo! se nur mi povus timotremi!” La gastejestro, kiu aŭdis tion, ridis kaj diris: “Se tion vi sopiras, ĉi tie vi havos ĉian oportunon.” “Ho, detenu la langon!” diris la edzino de la gastejestro; “tiom da personoj pagis sian scivolemon per siaj vivoj, estus miloble domaĝe se tiuj belaj okuloj neniam denove vidus la taglumon.” Sed la junulo diris: “Ne gravas kiom malfacile estos, mi insistas lerni; ja tiucele mi venis.” Li ne ĉesis ĝeni la gastejestrinon ĝis li diris al li ke en la najbarejo situas hantata kastelo, kie oni facile povus lerni tremi pro timo se oni nur gvatus en ĝi dum tri noktoj. La Reĝo promesis ke la viro kiu kuraĝos fari tion ricevos lian filinon kiel edzinon, kaj ke ŝi estas la plej bela knabino sub la suno. Ankaŭ estis multa trezoro kaŝita en la kastelo, gardata de malicaj spiritoj, kiu ankaŭ tiam liberiĝos kaj sufiĉos por pli ol riĉigi senhavulon. Multaj jam eniris, sed ĝis nun neniu revenis. Do la junulo iris al la Reĝo kaj parolis: “Se mi ricevos permeson, mi volonte gvatos dum tri noktoj en la kastelo.” La Reĝo rigardis lin, kaj ĉar li plaĉis al li li diris: “Vi rajtas peti tri aferojn, nenion vivan, kaj tiujn vi rajtos kunpreni en la kastelon.” Do li respondis: “Nu, mi petos fajron, tornilon, kaj ĉizbenkon al kiu tranĉilo estas fiksita.”

La sekvan tagon la Reĝo metigis ĉion en la kastelon; kaj kiam la nokto proksimiĝis la junulo prenis pozicion tie, ardigis helan fajron en unu el la ĉambroj, metis la ĉizbenkon kun la tranĉilo apud ĝin, kaj sidiĝis sur la tornilon. “Ho! se nur mi povus tremi pro timo!” li diris; “sed ankaŭ ĉi tie mi ne lernos tion.” Ĉirkaŭ la noktomezo li volis vigligi la fajron, kaj dum li blovis por fortigi ĝin li aŭdis kriaĉon el angulo. “U, miaŭ! kiom fridaj ni estas!” “Stultuloj!” li kriis; “kial vi kriaĉas? Se vi estas fridaj, venu sidi ĉe la fajro kaj varmigu vin.” Kaj dum li parolis du gigantaj nigraj katoj saltis feroce antaŭen kaj sidiĝis, po unu ambaŭflanke de li, kaj gapis lin sovaĝe per siaj ardaĵ okuloj. Post kelka tempo, kiam ili jam varmigis sin, ili diris: “Amiko, ĉu ni ludetu per kartoj?” “Kial ne?” li respondis; “sed unue mi vidu viajn manojn.” Do ili etendis siajn piedojn. “Ha!” diris li; “kiajn longajn ungojn vi havas! Atendu dum minuto: mi unue devos pritondi ilin.” Tuj li

kaptis ilin per la nukoj, levis ilin sur la ĉizbenkon, kaj firme ŝraŭbfiksis iliajn piedojn. “Atente rigardinte vin,” diris li, “mi ne plu emas kartludi kun vi;” kaj dirante tiujn vortojn li mortbatis ilin kaj elĵetis ilin en la akvon. Sed sendinte ilin ambaŭ al ilia finripozo, kiam li estis tuj residonta ĉe la fajro, el ĉiu niĉo kaj angulo alsvarmis nigraj katoj kaj nigraj hundoj kun ardantaj ĉenoj tiom amase ke li neniel povis fuĝi de ili. Ili kriegis plej terure, saltis sur lian fajron, disĵetis ĝin, kaj penis estingi ĝin. Li rigardis trankvile dum kelka tempo, sed kiam ne plu ŝajnis ŝerce,



li kaptis sian rostotranĉilon kaj vokis: “For! friponaro!” kaj ekbatadis ilin. Kelkaj el ili forfuĝis, kaj la aliajn li mortbatis kaj elĵetis ilin en la suban lageton. Reveninte li blovis la fajrerojn denove, kaj varmigis sin. Kaj dum li sidis tiel liaj okuloj rifuzis plu resti malfermaj, kaj deziro dormi kaptis lin. Do li ĉirkaŭrigardis kaj vidis en angulo grandan liton. “Ĝuste tion mi bezonas,” li diris, kaj li kuŝigis sin en ĝi. Sed kiam li deziris fermi siajn okulojn la lito komencis movi sin, kaj kuris tra la tuta kastelo. “Bonege,” li diris, “nur pli rapide, mi petas.” Responde la lito ekrapidegis kva-

zaŭ tirate de ses ĉevaloj, trans sojlojn kaj ŝtuparojn, supren tiu-direkte, malsupren ĉidirekte. Eksubite—kriŝ! kraŝ! Saltinte ĝi renversiĝis kaj kuŝis kiel monto sur li. Sed li ĵetis la kovrilojn kaj kusenojn en la aeron, puŝis sin el sub ĝi, kaj diris: “Nu, kiu ajn deziras, tiu ŝoforu ĝin,” kuŝigis sin apud sia fajro, kaj dormis ĝis la tagiĝo. En la mateno la Reĝo venis, kaj vidante lin kuŝanta sur la tero li supozis ke la fantomoj superfortis lin, kaj ke li mortis. Do li diris: “Vere domaĝe! Kaj kia bravulo li estis.” La junulo aŭdis tion, stariĝis, kaj diris: “Ankoraŭ tio ne okazis.” Tio ege mirigis la Reĝon, sed li multe ĝojis, kaj demandis kiel estis por li. “Estis bonege,” li respondis; “kaj nun travivinte unu nokton, mi ankaŭ travivos la aliajn du.” La gastejestro, kiam li iris al li, malfermegis siajn okulojn, kaj diris: “Nu, mi tute ne anticipis revidi vin vivanta. Ĉu nun vi lernis kio estas tremi pro timo?” “Ne,” li respondis, “estas tute senespere; se nur iu povus instrui tion al mi!”

La duan nokton li reiris al la malnova kastelo, sidiĝis ĉe la fajro, kaj rekomencis siajn ripetaĵon: “Se nur mi povus tremi pro timo!” Dum proksimiĝis la noktomezo, brua bruaĉo komenciĝis, unue milde, sed iom post iom ĝi pliintensiĝis; sekvis minuto da silento, kaj fine, dum laŭta kriego, duono de viro falis en la kamentubo antaŭ lin. “He, tie supre!” kriis li; “mankas ankoraŭ duono ĉi tie, ankoraŭ ne estas sufiĉe;” do la bruaĉo rekomenciĝis, okazis kriaĉado kaj kriegado, kaj sekve la dua duono alfalas. “Atendu iomete,” li diris; “mi vigligos la fajron por vi.” Farinte tion li turnis sin kaj rerigardis: la du pecoj estis kuniĝintaj, kaj aĉaspekta viro sidis sur lia seĝo. “Nu,” diris la junulo, “mi ne enkalkulis tion, la seĝo estas por mi.” La viro provis forpuŝi lin, sed la junulo neniel permesis tion, kaj perforte forpuŝinte lin li residiĝis en sia loko. Sekve, pli da viroj alfalas, unu post alia, kiuj, alportinte naŭ skeletokruojn kaj du kraniojn, aranĝis ilin kaj kegloludis per ili. La junulo pensis ke estus plezure kunludi, kaj li diris: “Jen, ĉu ĝenus vin se mi kunludus?” “Ne, ne se vi havas monon.” “Mi havas sufiĉan monon,” li respondis, “sed viaj globoj ne estas sufiĉe rondaj.” Do li prenis la kraniojn, metis ilin sur sian tornilon, kaj tornis ilin ĝis ili estis rondaj. “Nun ili ruliĝos pli bone,” diris li, “kaj hup-la! nun komenciĝas la gajeco.” Li ludis kun ili kaj perdis iom da mono, sed kiam sonis la dekdua horo

ĉio ekmalaperis antaŭ liaj okuloj. Li kuŝiĝis kaj dormis pace. La sekvan matenon la Reĝo venis, fervore dezirante scii kio okazis. “Kiel estis ĉifoje?” li demandis. “Mi kegloludis,” li respondis, “kaj perdis kelkajn pencojn.” “Ĉu vi ne tiam timotremis?” “Domaĝe ne,” diris li; “mi multe ĝuis. Ho! se nur mi scius kio estas tremi pro timo!”

La trian nokton li residiĝis sur sian benkon, kaj diris, plej senespere: “Se nur mi povus tremi pro timo!” Kiam malfruiĝis, ses grandaj viroj envenis portante ĉerkon. Do li kriis: “Ha! ha! plej verŝajne jen mia kuzeto kiu mortis antaŭ nur kelkaj tagoj;” kaj gestante per sia fingro li vokis: “Venu, mia kuzeto, venu.” Ili metis la ĉerkon sur la teron, kaj li proksimiĝis al ĝi kaj deprenis la kovrilon. En ĝi kuŝis mortinto. Li sentis lian vizaĝon, kaj ĝi estis froste malvarma. “Atendu,” li diris, “mi iom varmigis vin,” li iris al la fajro, varmigis sian manon, kaj metis ĝin sur la vizaĝon de la viro, sed la mortinto restis malvarma. Post tio li ellevis lin, sidiĝis ĉe la fajro, sternis lin sur sia genuo, kaj frotis liajn brakojn por ke la sango denove cirkuladu. Ĉar ankaŭ tio ne efikis li ekpensis ke kiam du homoj kune kuŝas en lito ili varmigas unu la alian; do li metis lin en la liton, kovris lin, kaj kuŝiĝis apud li; post kelka tempo la kadavro fariĝis varma kaj komencis moviĝi. La junulo diris: “Nu, mia kuzeto, kio okazus se mi ne estus varmiginta vin?” Sed la mortinto leviĝis kaj kriis: “Nun mi strangolos vin.” “Kio!” diris li, “ĉu nur tian dankon mi ricevas? Do vi tuj remetiĝos en vian ĉerkon,” levis lin, enĵetis lin, kaj fermis la kovrilon. Sekve la ses viroj venis kaj reelportis lin. “Mi tute simple ne kapablas tremi pro timo,” li diris, “kaj estas klare ke mi ne lernos tion dum tuta vivo ĉi tie.”

Eniris viro, pli ol kutime granda kaj tre timigaspekta; sed li estis olda kaj havis blankan barbon. “Ho! mizerulo, nun vi baldaŭ ekscios kio estas tremi pro timo,” li kriis, “ĉar vi devas morti.” “Ne tiel rapide,” respondis la junulo. “Se mi devas morti, unue vi devas kapti min.” “Mi baldaŭ ekkaptos vin,” parolis la monstro. “Milde, milde; ne tro fanfaronu, mi estas forta kiel vi, kaj eĉ pli forta.” “Ni baldaŭ trovos,” diris la oldulo; “se vi estas pli forta ol mi, do mi lasos vin; venu, ni provu.” Tiam li gvidis lin tra kelkaj obskuraj koridoroj al forĝejo, kaj preninte hakilon, per unu frapo li batis

amboson en la teron. “Mi povas fari pli ol nur tion,” kriis la junulo, kaj li iris al la alia amboso. La oldulo proksimiĝis al li por atente rigardi, kaj lia blanka barbo pendis rekte. La junulo kaptis la hakilon, batfendis la amboson kaj ekenfiksas la barbon de la oldulo. “Nun mi kaptis vin,” diris la junulo; “ĉifoje venis via vico morti.” Post tio li kaptis feran stangon kaj batadis la oldulon per ĝi, ĝis li, ploretante, petegis lin ĉesigi tion, kaj diris ke se li ĉesos li donos al li multajn riĉaĵojn. La junulo eltiris la hakilon kaj liberigis lin. La oldulo rekondukis lin al la kastelo kaj montris al li



en kelo tri kestojn da oro. “Unu el ĉi tiuj,” li diris, “apartenas al la malriĉuloj, unu al la Reĝo, kaj la tria estas via.” Je tiu momento sonis la dekdua horo, kaj la spirito malaperis, lasante la junulon sola en la mallumo. “Certe mi povos trovi elirvojon,” diris li, kaj ĉirkaŭpalpante li fine trovis sian vojon al la ĉambro, kaj ekdormis apud sia fajro. La sekvan matenon la Reĝo venis, kaj diris: “Nu, certe ĉifoje vi lernis tremi pro timo?” “Ne,” li respondis; “kio povas esti? Mia morta kuzo ĉeestis, kaj alvenis olda barbulo, kiu montris al mi amasojn da mono ĉisube, sed kio estas tremi pro

timo, neniŭ informis min.” Parolis la Reĝo: “Vi liberigis la kastelon de ĝia malbeno, kaj vi edzinigos mian filon.” “Tute ĉarme,” li diris; “sed mi ankoraŭ ne scias kio estas tremi pro timo.”

Oni suprenportis la oron, kaj festis la geedziĝon, sed la juna Reĝo, kvankam li elkore amis sian edzinon, kaj kvankam li estis tre feliĉa, ankoraŭ diradis: “Se nur mi povus tremi pro timo! se nur mi povus tremi pro timo!” Fine tio plene malgajigis ŝin. Sed ŝia servistino diris: “Mi helpos vin; ni baldaŭ timotremigos lin.” Do ŝi eliris al la roĝo kiu fluis tra la ĝardeno, kaj portigis al ŝi sitelon plenan de malgrandaj gobioj. En la nokto, dum la juna Reĝo dormis, lia edzino devis tiri la vestojn de li, kaj verŝi la siteloplenon da malgrandaj gobioj sur lin, tiel ke la fiŝetoj naĝis tute ĉirkaŭ li. Pro tio li vekigis kaj kriis: “Ho! kiom mi tremas, kiom mi tremas, kara edzino! Jes, nun mi scias kio estas tremi pro timo.”¹

¹Grimm

RUMPELŜTILCKINO

FOJE estis malriĉa muelisto kiu havis tre belan filinon. Nu, unu tagon okazis ke li havis aŭdiencon kun la Reĝo, kaj por ŝajni persono iom grava li diris al li ke li havas filinon kapablan ŝpini oron el pajlo. “Nu jen talento havinda,” diris la Reĝo al la muelisto; “se via filino estas tiel lerta kiel vi diras, venigu ŝin al mia palaco morgaŭ, kaj mi provos ŝin.” Kiam la knabino alvenis li kondukis ŝin en ĉambron plenan de pajlo, donis al ŝi ŝpinradon kaj spindelon, kaj diris: “Nun eklaboru kaj ŝpinu dum la tuta nokto ĝis la frua krepusko, kaj se ĝis tiam vi ne ŝpinis oron el la pajlo vi mortos.” Dirinte tion li fermis la pordon malantaŭ si kaj lasis ŝin sola en la ĉambro.

Do la filino de la malriĉa muelisto sidiĝis, kaj ne sciis kion en la mondo ŝi devas fari. Ŝi tute ne scipovis ŝpini oron el pajlo, kaj fine tiom mizeriĝis ke ŝi komencis plori. Subite la pordo malfermiĝis, kaj enpaŝis malgranda vireto kaj diris: “Bonan vesperon, F-ino Muelistidino; kial vi tiom amare ploras?” “Ho!” respondis la knabino, “mi devas ŝpini oron el pajlo, kaj tute ne scias fari tion.” “Kion vi donos al mi se mi ŝpinos ĝin por vi?” demandis la hometo. “Mian kolĉenon,” respondis la knabino. La vireto prenis la kolĉenon, sidigis sin ĉe la rado, kaj zum, zum, zum, la rado rotaciis trifoje, kaj la bobeno jam estis plena. Sekve li surmetis alian, kaj zum, zum, zum, la rado rotaciis trifoje, kaj ankaŭ la dua estis plena; kaj tiel daŭris ĝis la mateno, kiam la pajlo estis tute elŝpinita, kaj ĉiuj bobenoj estis plenaj de oro. Tuj kiam la suno leviĝis la Reĝo venis, kaj kiam li perceptis la oron li miregis kaj ĝojis, sed lia koro nur avidis pli da valorega metalo. Li metigis la filinon de la muelisto en alian ĉambron plenan de pajlo, multe pli grandan ol la unua, kaj ordonis al ŝi, ke se ŝi volas plu vivi, ŝi ŝpinu ĝin tute en oron antaŭ la sekva mateno. La knabino

ne sciis kion fari, kaj komencis plori; tiam la pordo malfermiĝis kiel antaŭe, kaj la malgranda vireto ekaperis kaj diris: “Kion vi donos al mi se mi ŝpinos oron el la pajlo por vi?” “La ringon de



de mia fingro,” respondis la knabino. La hometo prenis la ringon, kaj zum! denove rotaciis la ŝpinrado, kaj je la mateniĝo li jam ŝpinis scintilantan oron el la tuta pajlaro. Al la Reĝo egege plaĉis la vidaĵo, sed lia avido al oro ankoraŭ ne satiĝis, kaj li kondukigis

la filinon de la muelisto en ankoraŭ pli grandan ĉambron plenan de pajlo, kaj diris: “Vi devos elŝpini ĉion ĉi dum la nokto; sed se vi sukcesos ĉifoje vi fariĝos mia edzino.” “Ŝi estas nur filino de muelisto, estas vere,” li pensis; “sed mi ne povus trovi pli riĉan edzinon eĉ se mi traserĉus la tutan mondon.” Kiam la knabino estis sola la vireto aperis la trian fojon kaj diris: “Kion vi donos al mi se mi ŝpinos la pajlon por vi denove?” “Mi havas nenion pli doneblan,” respondis la knabino. “Do promesu al mi ke kiam vi estos Reĝino vi donos al mi vian unuan infanon.” “Kiu scias kio eble okazos antaŭ tio?” pensis la filino de la muelisto; kaj krome, ŝi konis neniun alian rimedon, do ŝi promesis al la hometo kion li postulis, kaj li denove eklaboris kaj ŝpinis oron el la pajlo. Kiam la Reĝo venis en la mateno, kaj trovis ĉion kian li deziris, li tuj edzinigis ŝin, kaj la filino de la muelisto fariĝis reĝino.

Post la forpaso de jaro bela filo naskiĝis de ŝi, kaj ŝi ne plu pensis pri la vireto, ĝis subite unu tagon li paŝis en ŝian ĉambron kaj diris: “Nun donu al mi kion vi promesis.” La Reĝino iĝis mizerega kaj proponis al la vireto ĉiujn riĉaĵojn en sia regno se li nur lasos al ŝi la infanon. Sed la vireto diris: “Ne, vivanto estas pli kara por mi ol ĉiuj trezoroj en la mondo.” Je tio la Reĝino komencis plori kaj larmi tiel amare ke la vireto kompatis ŝin, kaj diris: “Mi donos al vi tri tagojn en kiuj diveni mian nomon, kaj se vi trovos ĝin dum tiu tempo vi rajtos reteni vian infanon.”

Nu la Reĝino cerbumadis dum la tuta nokto pri ĉiuj nomoj kiujn iam ŝi aŭdis, kaj sendis mesaĝiston traserĉi la landon, kaj preni el for kaj malfor ĉiujn nomojn kiujn li renkontos. Kiam la vireto alvenis la sekvan tagon ŝi komencis per Kaspero, Melĥioro, Belŝazaro, kaj ĉiuj aliaj nomoj kiujn ŝi konis, vice, sed je ĉiu la vireto kriis: “Jen ne mia nomo.” La sekvan tagon ŝi sendis demandi la nomojn de ĉiuj homoj en la najbarejo, kaj ekhavis longan liston de la plej nekutimaj kaj eksterordinaraj por la vireto kiam li revenis. “Ĉu eble via nomo estas Ŝafsuro, Kruksuro, Spindelsuro?” sed li daŭre respondis: “Jen ne mia nomo.” La trian tagon la mesaĝisto revenis kaj anoncis: “Mi ne sukcesis trovi novajn nomojn, sed kiam mi trovis altan monteton preter la angulo de la arbaro, kie la lupoj kaj leporoj bonannoktas unu la alian, mi vidis dometon, kaj antaŭ la domo brulis fajro, kaj ĉirkaŭ

la fajron saltadis plej groteska vireto, saltante per unu kuro kaj kriante:

*Morgaŭ infuz', hodiaŭ bako,
Poste l' infan' en mia pako;
Apenaŭ scias reĝina hom'
Pri Rumpelstilckino mia nom'!*

Konceptu la ĝojon de la Reĝino kiam ŝi aŭdis la nomon, kaj kiam la vireto enpaŝis post nelonge kaj demandis: “Nun, Damo Reĝino, kiel mi nomiĝas?” ŝi unue demandis: “Ĉu via nomo estas Konrado?” “Ne.” “Ĉu via nomo estas Henĉjo?” “Ne.” “Ĉu eble via nomo estas Rumpelstilckino?” “Iu demono diris tion al vi, iu demono diris tion al vi,” kriaĉis la vireto, kaj pro sia furiozo li batis sian dekstran piedon tiom profunden en la teron ke ĝi enfalis ĝis lia talio; je tio pasie li kaptis sian maldekstran piedon per ambaŭ manoj kaj disduonigis sin.¹

¹Grimm



BELULINO KAJ LA BESTO

FOJE, en tre malproksima lando, vivis komercisto kiu tiom bonfortunis rilate al ĉiuj siaj entreprenoj ke li estis ege riĉa. Kvankam li havis ses filojn kaj ses filinojn, li trovis ke lia mono sufiĉas por ke li donu al ili ĉion kion ili deziras, kaj ili kutimiĝis al tio.

Sed unu tagon tre neanticipita misfortuno trafis ilin. Ilia domo incendiigis kaj rapide brulis ĝis la tero, kun sia tuta grandioza meblaro, la libroj, portretoj, oro, arĝento, kaj valorajoj en ĝi; kaj tio estis nur la komenco de iliaj problemoj. Ilia patro, kiu ĝis tiu momento ĉiel prosperis, subite perdis ĉiun ŝipon kiun li havis sur la maro, aŭ pro piratoj, pereoj, aŭ fajro. Post tio li aŭdis ke liaj filiistoj en foraj landoj, kiujn li estis plene fidinta, montriĝis malfidelaj; kaj fine, de granda riĉo li falis en plej profundan malriĉon.

Restis al li nur dometo en izola loko almenaŭ 500 kilometrojn de la urbo en kiu li loĝis, kaj tien li devis retiri sin kun siaj infanoj, kiuj perdis ĉiun esperon pro la ideo tiel diference vivi. Efektive, la filinoj unue esperis ke iliaj amikoj, kiuj estis tiom multenombraj dum ili estis riĉaj, insistos ke ili gastu en iliaj domoj nun kiam ili ne plu posedas propran. Sed ili baldaŭ trovis ke ili estas lasataj tute solaj, kaj ke iliaj eksamikoj eĉ atribuas ilian misfortunon al ilia propra tromalŝparado, kaj tute ne indikas intencon proponi al ili helpon. Do restis nenio por ili ol foriri al la dometo kiu situis en la mezo de obskura arbaro, kaj aspektis la plej malĝoja loko sur la faco de la tero. Ĉar ili estis tro malriĉaj por havi servistojn, la knabinoj devis forte labori, kiel kamparanoj, kaj la filoj, siavice, kultivadis la kampojn por perlabori sian vivon. Malnete vestite, kaj vivante plej simple, la knabinoj bedaŭris senĉese la mankon de la luksoj kaj distraĵoj de sia antaŭa vivo; nur la plej juna penis esti brava kaj bonhumora. Ŝi unue est-

is same malfeliĉa kiel la aliaj kiam la misfortuno unue trafis ilian patron, sed ŝi baldaŭ reakiris sian naturan gajecon, kaj ekpenis laŭeble bonhumori, distri siajn patron kaj fratojn laŭeble plej, kaj peni persvadi siajn fratinojn partopreni en dancado kaj kantado. Sed ili rifuzis fari ion tian, kaj, ĉar ŝi ne estis tiel morna kiel ili, ili deklaris ke nur ĉi tia mizera vivo taŭgas por ŝi. Sed ŝi estis vere multe pli bela kaj lerta ol ili; efektive ŝi estis tiel bela ke oni ĉiam nomis ŝin Belulino. Post du jaroj, kiam ili ĉiuj komencis kutimiĝi al sia nova vivo, okazis io por ĝeni ilian trankvilecon. Ilia patro ricevis informon ke unu el liaj ŝipoj, kiujn ili kredis perdita, sekure enhaveniĝis kun riĉa ŝarĝo. Ĉiuj filoj kaj filinoj tuj supozis ke ilia malriĉeco nun finiĝis, kaj volis tuj iri al la urbo; sed ilia patro, pli prudenta, petis ilin iom atendi, kaj, kvankam estis la rikoltotempo, kaj estus malfacile se li mankus, li decidis mem iri la unua, por enketi. Nur la plej juna filino dubis ke ili baldaŭ estos tiel riĉaj kiel antaŭe, aŭ almenaŭ sufiĉe riĉaj por vivi komforte en iu urbo kie ili trovos distriĝon kaj gajajn kunulojn denove. Do ili ĉiuj ŝarĝis sian patron per petoj ke li alportu por ili juvelojn kaj robojn kiujn aĉeti necesigus trezoregon; nur Belulino, certa ke estus senutile, nenion petis. Ŝia patro, rimarkante ŝian silenton, diris: “Kaj kion mi portu al vi, Belulino?”

“Mia sola deziro estas vidi vin reveni hejmen sekure,” ŝi respondis.

Sed tiu respondo ĉagrenis ŝiajn fratinojn, kiuj imagis ke ŝi kulpigas ilin pro iliaj petoj ke li alportu tiel multekostajn aĵojn. Al ŝia patro, tamen, plaĉis, tamen ĉar li opiniis ke je ŝia aĝo ŝi certe devus ami belajn donacojn, li diris ke ŝi elektu ion.

“Nu, kara patro,” ŝi diris, “ĉar vi insistas pri tio, mi petas ke vi alportu al mi rozon. Mi ekde nia alveno ĉi tie ne vidis tion, kaj mi tre multe amas ilin.”

Do la komercisto formariĝis kaj atingis la urbon laŭeble plej rapide, sed li trovis ke liaj iamaj kampanoj, kredante ke li mortis, jam dividis inter si la varojn kiujn alportis la ŝipo; kaj post ses monatoj da problemoj kaj elspezoj li trovis sin same malriĉa kiel je la komenco, ĉar li nur sukcesis regajni sufiĉan monon por pagi la koston de sia veturo. Eĉ pli malbone, li devis foriri el la urbo en plej terura vetero, tiel ke kiam li estis parte irinta al sia hejmo li

estis preskaŭ elĉerpita pro frido kaj laco. Kvankam li sciis ke necesos pluraj horoj por trairi la arbaron, li tiom fervoris esti ĉe la fino de sia veturo ke li decidis pluiri; sed la nokto trafis lin, kaj la profunda neĝo kaj amara frosto malebligis ke lia ĉevalo plu portu lin. Neniu domo estis videbla; la sola ŝirmejo kiun li povis trovi estis la kava trunko de granda arbo, kaj tie li kaŭris dum la tuta nokto, kiu ŝajnis al li la plej longa kiun iam li renkontis. Malgraŭ



lia laco la hurlado de la lupoj tenis lin veka, kaj eĉ kiam fine tagiĝis li ne estis multe pli bonstata, ĉar la falinta neĝo kovris ĉiun vojon, kaj li ne sciis kien sin turni.

Post kelka tempo li sukcesis vidi ian vojeton, kaj kvankam je la komenco ĝi estis tiel malglata kaj glitiga ke li falis pli ol unufoje, baldaŭ ĝi fariĝis pli facila, kaj kondukis lin en avenuon de arboj kiu finiĝis ĉe grandioza kastelo. Ŝajnis tre strange al la

komercisto ke neniom da neĝo falis en la avenuon, kiu konsistis tute el oranĝarboj, kovritaj de floroj kaj fruktoj. Atinginte la unua korton de la kastelo li vidis antaŭ si aron da agataj ŝtupoj, kaj supreniris ilin, kaj trapasis plurajn grandioze meblitajn ĉambrojn. La plaĉa varmeco de la aero revivigis lin, kaj li sentis sin tre malsata; sed ŝajne estis tute neniu persono en ĉi tiu vasta kaj grandioza palaco kiun li povus peti doni al li manĝaĵon. Profunda silento regis ĉie, kaj fine, enua pro vagado tra vakaj ĉambroj kaj galerioj, li haltis en ĉambro malpli granda ol la aliaj, kie klara fajro bruladis kaj sofo estis komforte situigita proksime al ĝi. Kredante ke tio sendube estis preparita por iu venonto, li sidiĝis atendi ties alvenon, kaj tre baldaŭ li eniris dolĉan dormon.

Kiam lia grandega malsato vekis lin post pluraj horoj, li ankoraŭ estis sola; sed tableto, sur kiu estis granda manĝo, estis tiritaj proksimen al li, kaj, ĉar li jam de dudek kvar horoj nenion manĝis, li ne perdis tempon antaŭ ol komenci manĝi, esperante ke baldaŭ li havos oportunon danki sian afablan gastiganton, kiu ajn tiu estas. Sed neniu aperis, kaj eĉ post plia longa dormo, el kiu li vekigis tute freŝigita, estis neniu spuro de persono, kvankam freŝa manĝo da delikataj kuketoj kaj fruktoj estis preta sur la tableto ĉe lia kubuto. Ĉar li estis nature timida, la silento komencis timigi lin, kaj li decidis denove traserĉi ĉiujn ĉambrojn; sed estis senutile. Eĉ neniu servisto estis videbla; nenia signo de vivo en la palaco! Li komencis demandi al si kion li faru, kaj distri sin per imago ke ĉiuj trezoroj vidataj apartenas al li, kaj pripensi kiel li dividus ilin inter siaj infanoj. Post tio li eniris la ĝardenon, kaj kvankam estis vintro en ĉiu alia loko, ĉi tie la suno brilis, kaj la birdoj kantis, kaj la floroj belis, kaj la aero estis leĝera kaj dolĉa. La komercisto, ekstaza pro ĉio vidata kaj aŭdata, diris al si:

“Ĉio ĉi certe estas intencita por mi. Mi iros jam nun konduki miajn infanojn por ke ili partoprenu en ĉi tiuj ĝuoj.”

Kvankam li estis tiom malvarma kaj laca kiam li atingis la kastelon, li tamen estis kondukinta sian ĉevalon al la stalo kaj doninta al ĝi manĝon. Nun li pensis seli ĝin por la hejmeniro, kaj li komencis sekvi la vojeton kondukantan al la stalo. Tiu vojeto havis heĝon de rozoj ambaŭflanke, kaj la komercisto kredis neniam esti vidinta aŭ flarinta tiel belegajn florojn. Ili memorigis

al li lian promeson al Belulino, kaj li haltis kaj ĵus plukis rozon por porti ĝin al ŝi kiam lin alarmis stranga bruo malantaŭ li. Turninte sin, li vidis timigan Beston, kiu aspektis tre kolera kaj diris, per terura voĉo:

“Kiu diris al vi ke vi rajtas pluki miajn rozojn? Ĉu ne sufiĉas ke mi permesis vin esti en mia palaco kaj komplezis al vi? Tiel vi



montras vian dankon, ŝtelante miajn florojn! Sed via malĝentileco ne estos nepunita.” La komercisto, terurite de tiuj furiozaj vortoj, faligis la fatalan rozon, kaj, ĵetinte sin sur siajn genuojn, kriis: “Pardonu min, nobla sinjoro. Mi vere dankas vin pro via komplezemo, kiu estis tiel grandioza ke mi ne povis imagi ke vin

ofendus ke mi prenas ion tiel malgrandan kiel rozo.” Sed la kolero de la Besto ne estis malpliigita de tiu parolo.

“Verŝajne vi havas pretekstojn kaj flatojn pretaj,” li kriis; “sed tio ne savos vin de la morto kiun vi meritas.”

“Ve!” pensis la komercisto, “se mia filino Belulino nur povus scii en kian danĝeron kondukis min ŝia rozo!”

Kaj pro malespero li komencis rakonti siajn misfortunojn al la Besto, kaj la kaŭzon de lia veturo, kaj li ne forgesis mencii la peton de Belulino.

“Riĉo sufiĉa por elaĉeti reĝon ne povus aĉeti ĉion kion petis miaj aliaj filinoj,” li diris; “sed mi pensis ke mi eble almenaŭ povos porti al Belulino ŝian rozon. Mi petas pardoni min, ĉar vi komprenas ke mi nenian malicon intencis.”

La Besto konsideris dum momento, kaj post tio li diris, per malpli furioza tono:

“Mi pardonos vin kun unu postulo—nome, ke vi donu al mi unu el viaj filinoj.”

“Ha!” kriis la komercisto, “se mi estus sufiĉe kruela por aĉeti mian propran vivon koste de tiu de infano mia, kian pretekston mi povus elpensi por konduki ŝin ĉi tien?”

“Nenia preteksto necesus,” respondis la Besto. “Se efektive ŝi venos ŝi devos volonte veni. Pro nenio alia mi akceptos ŝin. Trovu ĉu iu el ili estas sufiĉe kuraĝa, kaj sufiĉe multe amas vin por veni savi vian vivon. Vi ŝajnas honestulo, do mi fidus vin reiri hejmen. Mi donos al vi monaton por trovi ĉu iu el viaj filinoj akceptos reveni kun vi kaj resti ĉi tie por ke vi estu libera. Se neniu el ili akceptos, vi devos veni sola, por ĉiam adiaŭinte ilin, ĉar tiam vi apartenos al mi. Kaj ne imagu ke vi povos kaŝi vin de mi, ĉar se vi ne plenumos vian promeson mi venos forpreni vin!” pludiris la Besto makabre.

La komercisto akceptis tiun proponon, kvankam li ne opiniis ke efektive eblos persvadi iun el siaj filinoj veni. Li promesis reveni je la nomita tempo, kaj post tio, fervorante eskapi de la ĉeesto de la Besto, li petis permeson tuj ekiri. Sed la Besto respondis ke li ne povos foriri ĝis la sekva tago.

“Tiam vi trovos ĉevalon preta por vi,” li diris. “Nun iru vespermanĝi, kaj atendu miajn ordonojn.”

La povra komercisto, pli morta ol viva, reiris al sia ĉambro, kie plej bongusta vespermanĝo jam staris preta sur la tableto apud ardanta fajro. Sed li estis tro terurita por manĝi, kaj nur gustumis kelkajn el la manĝaĵoj, timante ke la Besto koleros se li ne obeos liajn ordonojn. Fininte li aŭdis grandan bruon en la apuda ĉambro, kaj li sciis ke tio signifas ke la Besto venas. Ĉar li povis nenion fari por eviti lian viziton, la sola eblo estis aspekti kiel eble plej sentima; do kiam la Besto aperis kaj demandis severe ĉu li bone manĝis, la komercisto respondis humile ke jes, dank' al la komplezo de lia gastiganto. Kaj la Besto avertis lin memori ilian interkonsenton, kaj informi sian filinon precize pri kion ŝi anticipu.

“Ne ellitiĝu morgaŭ,” li pludiris, “antaŭ ol vidi la sunon kaj aŭdi oran sonorilon. Tiam vi trovos vian matenmanĝon atendanta vin ĉi tie, kaj la ĉevalo kiun vi rajdos estos preta en la korto. Li ankaŭ reportos vin ĉi tien kiam vi revenos kun via filino post monato. Adiaŭ. Portu rozon al Belulino, kaj memoru vian promeson!”

La komercisto vere ĝojegis pro la foriro de la Besto, kaj kvankam li ne povis dormi pro malfeliĉeco, li kuŝis ĝis la leviĝo de la suno. Post hasta matenmanĝo, li eliris pluki rozon por Belulino, kaj surgrimpis sian ĉevalon, kiu forportis lin tiel rapide ke post malpli ol momento la palaco ne plu estis videbla, kaj li ankoraŭ estis en la mezo de malfeliĉa pensado kiam ĝi haltis antaŭ la pordo de la dometo.

Liaj filoj kaj filinoj, kiuj maltrankvilis pro lia longa foresto, elkuris renkonti lin, fervoraj scii la rezulton de lia veturo, kiun ili supozis favora, kiam ili vidis lin rajdanta grandiozan ĉevalon kaj vestita per riĉa mantelo. Sed unue li kaŝis de ili la veron, dirante nur malfeliĉe al Belulino dum li donis al ŝi la rozon:

“Jen kion vi petis min porti al vi; vi ne povas konjekti kiom ĝi kostis.”

Sed tio vigligis ilian scivolemon tiom ke baldaŭ li rakontis al li siajn aventurojn de la komenco ĝis la fino, kaj rezulte ili estis ĉiuj tre malfeliĉaj. La knabinoj laŭte lamentis pro siaj fiaskintaj esperoj, kaj la filoj deklaris ke ilia patro ne reiru al tiu terura kastelo, kaj komencis fari planojn mortigi la Beston se ĝi venos

forporti lin. Sed li memorigis al ili ke li ja promesis reiri. Krome la knabinoj multe koleris kontraŭ Belulino, kaj diris ke nur ŝi kulpas, kaj ke se ŝi estus petinta ion pli bonsencan tio ja ne okazus, kaj plendis amare ke ili devas suferi pro ŝia malsaĝeco.

Povra Belulino, tre malgaja, diris al ili:

“Jes, mi ja kaŭzis ĉi misfortunon, sed mi certigas al vi ke mi faris tion sence. Kiu povus konjekti ke peti rozon en la mezo de la somero kaŭzos tiom da mizero? Sed ĉar mi misagis estas juste ke mi suferu pro tio. Sekve mi reiros kun mia patro por plenumi lian promeson.”

Unue ĉiuj rifuzis tiun planon, kaj ŝiaj patro kaj fratoj, kiuj el-kore amis ŝin, deklaris ke neniel ili akceptos ke ŝi foriru; sed Belulino restis senŝanĉela. Kiam la horo por foriro proksimiĝis ŝi dividis ĉiujn siajn posedaĵetojn inter siaj fratinoj, kaj diris adiaŭ al ĉio amata, kaj kiam la fatala tago venis ŝi kuraĝigis kaj gajigis sian patron dum ili kune surgrimpis la ĉevalon kiu reportis lin. Ĝi ŝajnis flugi anstataŭ galopi, sed tiel glate ke Belulino ne timis; efektive, ŝi ĝuus la veteron se ŝi ne timus kio eble okazos al ŝi je ĝia fino. Ŝia patro ankoraŭ penis persvadi ŝin reiri, sed vane. Noktiĝis dum ili parolis, kaj tiam, surprize al ili, mirindaj buntaj lumoj komencis brili ĉiudirekte, kaj grandiozaj pireteknikaĵoj ekflagris antaŭ ili; ili iluminis la tutan arbaron, kaj estis eĉ plaĉe varme, kvankam estis amare malvarme antaŭe. Tio daŭris ĝis ili atingis la avenueon de oranĝarboj, kie estis statuoj tenataj flamantajn torĉojn, kaj kiam ili pli proksimiĝis al la palaco ili vidis ke ĝi estas iluminata ekde la tegmento ĝis la tero, kaj muziko sonadas leĝere el la korto. “Nepre la Besto multe malsatas,” diris Belulino, penante ridi, “se li tiom ĝojas pro la alveno de sia predo.”

Sed, malgraŭ ŝia malkvieto, ŝi ne povis ne admiri ĉiujn mirindaĵojn vidatajn.

La ĉevalo haltis ĉe la piedo de la ŝtuparo kondukanta al la teraso, kaj post ilia degrimpo ŝia patro gvidis ŝin al la ĉambreto en kiu li antaŭe estis, kie ili trovis belegan fajron brulanta, kaj la tablon beldelicate provizita per bongustega vespermanĝo.

La komercisto sciis ke tio estas por ili, kaj Belulino, kiu nun estis malpli timoplena ĉar ŝi trairis multajn ĉambrojn kaj tute ne vidis Beston, volonte komencis manĝi, ĉar ŝia longa rajdado mul-

te malsatigis ŝin. Sed ili apenaŭ finis sian manĝon kiam aŭdiĝis la bruoj de la paŝoj de la Besto alvenanta, kaj Belulino kroĉis sin al sia patro terurite, des pli kiam ŝi vidis kiom li timas. Sed kiam la Besto efektive aperis, kvankam ŝi tremis vidante lin, ŝi klopodegis kaŝi sian teruriĝon, kaj salutis lin respektoplene.

Tio evidente plaĉis al la Besto. Rigardinte ŝin li diris, per tono kiu povus terurigi la plej kuraĝan koron, kvankam ŝajne li ne koleris:

“Bonan vesperon, oldulo. Bonan vesperon, Belulino.”

La komercisto estis tro terurita por respondi, sed Belulino respondis dolĉe:

“Bonan vesperon, Besto.”

“Ĉu vi venis propravole?” demandis la Besto. “Ĉu vi estos kontenta resti ĉi tie kiam via patro foriros?”

Belulino respondis kuraĝe ke ŝi tute pretas resti.

“Vi plaĉas al mi,” diris Besto. “Ĉar vi venis propravole, vi rajtos resti. Kaj vi, oldulo,” li aldonis, turninte sin al la komercisto, “je la sunleviĝo morgaŭ vi ekforiros. Kiam la sonorilo sonos ellitiĝu rapide kaj matenmanĝu, kaj vi trovos la saman ĉevalon atendantanta por reporti vin hejmen; sed memoru ke vi neniam anticipu revidi mian palacon.”

Post tio li turnis sin al Belulino kaj diris:

“Gvidu vian patron en la apudan ĉambron, kaj helpu lin elektiti ĉion kion laŭ via opinio volonte ricevos viaj fratoj kaj fratinoj. Vi trovos du kofrojn tie; plenigu ilin laŭeble plej multe. Estas tute juste ke vi sendu al ili ion tre valoran memorige pri vi.”

Post tio li foriris, dirinte, “Ĝis, Belulino; adiaŭ, oldulo,” kaj kvankam Belulino komencis pensi tre ĉagrenite pri la foriro de sia patro, ŝi timis malobei la ordonojn de la Besto; kaj ili eniris la apudan ĉambron, kies muroj ĉiuj havis bretojn kaj ŝrankojn. Ilin multe surprizis la riĉaĵoj en ĝi. Estis grandiozaj roboj taŭgaj por reĝino, kun ili estis ĉiuj ornamaĵoj kiujn oni surhavu; kaj kiam Belulino malfermis la ŝrankojn, ŝin vere blindumis la belegaj juveloj kuŝantaj amase sur ĉiu breto. Elektinte vastan kvanton, kiun ŝi dividis inter siaj fratinoj—ĉar ŝi amasigis mirigajn robojn por ĉiu el ili—ŝi malfermis la lastan kofron, kiu estis plena de oro.

“Mi opinias, patro,” ŝi diris, “ke, ĉar la oro estos pli utila al vi,

estos pli bone ke ni elprenu la aliajn objektojn, kaj plenigu la kofrojn per ĝi.” Do ili faris tion; sed ju pli ili enmetis, despli da libera spaco aperis, kaj fine ili reenmetis ĉiujn juvelojn kaj robojn kiujn ili estis elprenintaj, kaj Belulino eĉ aldonis tiom pli da juveloj kiom ŝi povis porti; kaj ankoraŭ la kofroj ne estis tro plenaj, sed ili estis tiel pezaj ke elefanto ne povus porti ilin!

La Besto mokis nin,” kriis la komercisto; “li nur ŝajnis donaci al ni ĉion ĉi, sciante ke mi ne povus forporti ilin.”

“Ni atendu por vidi,” respondis Belulino. “Mi ne povas kredi ke li intencis trompi nin. Ni nur povas ligi ilin kaj lasi ilin pretaj.”

Do ili faris tion kaj reiris al la ĉambreto, kie, mirige al ili, ili trovis matenmanĝon preta. La komercisto manĝis bonapetite, ĉar la malavido de la Besto kredigis al li ke li eble povos riski baldaŭan revenon por viziti Belulinon. Sed ŝi sentis certecon ke ŝia patro foriros de ŝi for ĉiam, do ŝi estis tre malfeliĉa kiam la sonorilo duan fojon sonis akre, kaj avertis ilin ke venis la horo por ilia apartiĝo. Ili iris en la korton, kie atendis du ĉevaloj, unu ŝarĝita per la du kofroj, la alia por ke li rajdu ĝin. Ili piedumis la teron, ĉar ili senpacienis ekiri, kaj la komercisto devis haste adiaŭi Belulinon; kaj tuj kiam li estis sur sia ĉevalo li foriris tiel rapide ke jam post momentono li ne plu estis videbla. Tiam Belulino komencis plori, kaj revagis malfeliĉe al sia propra ĉambro. Sed baldaŭ ŝi trovos sin tre dormema, kaj ĉar nenio alia estis pli farinda ŝi kuŝiĝis kaj tuj ekdormis. Kaj ŝi sonĝis ke ŝi marŝas apud rojo kiun bordas arboj, kaj lamentas sian tristan faton, kiam juna princo, pri bela ol ĉiu kiun iam ŝi vidis, kaj kun voĉo kiu rekte trafis ŝian koron, venis kaj diris al ŝi, “Ha, Belulino! vi ne estas tiom misfortuna kiom vi supozas. Ĉi tie vi estos rekompencata pro ĉiuj viaj alilokaj suferoj. Ĉiu via deziro plenumiĝos. Nur penu trovi min, negrave kiom mi aliaspektos, ĉar mi elkore amas vin, kaj feliĉigante min vi trovos propran feliĉon. Estu fidelkora kiel bela, kaj nenion pli ni povos deziri.”

“Kion mi povos fari, Princo, por feliĉigi vin?” diris Belulino.

“Nur estu dankema,” li respondis, “kaj ne tro fidu viajn okulojn. Kaj, plejgrave, ne dizertu min antaŭ ol savi min de mia kruela mizero.”

Post tio ŝi kredis trovi sin en ĉambro kun solena bela virino,

kiu diris al ŝi:

“Kara Belulino, penu ne bedaŭri ĉion postlasitan de vi, ĉar via destino estas pli bona sorto. Nur ne lasu vin trompi aspektoj.”

Belulino trovis siajn sonĝojn tiom interesaj ke ŝi tute ne volis rapide vekiĝi, sed baldaŭ la horloĝo vekis ŝin vokante ŝin softe dekdufoje, kaj ŝi ellitiĝis kaj trovis sian tualettablon plena de ĉio kion ŝi povus voli; kaj fininte sian tualeton ŝi trovos ke manĝo atendas en la ĉambro apud ŝia. Sed manĝo ne bezonas longan tempon kiam oni estas sola, kaj tre baldaŭ ŝi sidiĝis komforte en



angulo de sofo, kaj komencis pensi pri la ĉarma Princo kiun ŝi vidis en sia sonĝo.

“Li diris ke mi povos feliĉigi lin,” diris Belulino al si.

“Ŝajnas, do, ke tiu Bestaĉo tenas lin kaptita. Kiel mi povos liberigi lin? Kaj kial ili ambaŭ diris al mi ke mi ne fidu aspektojn? Mi ne komprenas. Sed, efektive, ja estis nur sonĝo, do kial mi ĝenu min pri ĝi? Pli bone estos ke mi iru trovi ion por distri min.”

Do ŝi starigis kaj komencis esplori kelkajn el la multaj ĉambroj de la palaco.

La unua ĉambro en kiun ŝi iris havis spegulojn sur ĉiu muro,

kaj Belulino vidis sin reflektata ĉiuflanke, kaj pensis ke neniam antaŭe ŝi vidis tiel ĉarman ĉambron. Post tio braceleto pendanta de lustro logis ŝian okulon, kaj kiam ŝi prenis ĝin tre surprizis ŝin trovi ke en ĝi estas portreto de ŝia nekonata admiranto, tutsimila al la aspekto kiun ŝi vidis en sia sonĝo. Tre ĝue ŝi puŝis la braceleton sur sian brakon, kaj eniris galerion de bildoj, kie ŝi baldaŭ trovis portreton de la sama bela Princo, grandan kiel la vivo, kaj tiel lerte pentritan ke dum ŝi studis ĝin li mem ŝajnis rideti al ŝi afable. Fortirinte sin de la portreto fine, ŝi pasis en ĉambron kiu enhavis ĉian muzikinstrumenton sub la suno, kaj tie ŝi distris sin longatempе provante kelkajn el ili, kaj kantante ĝis laciĝo. La sekva ĉambro estis librejo, kaj ŝi vidis ĉion kion iam ŝi volis legi, ankaŭ ĉion kion ŝi ja legis, kaj ŝajnis al ŝi ke tuta vivo ne sufiĉus por legi la nomojn de la libroj, ĉar ili estis tiomaj. Jam krepuskiĝis, kaj vaksaj kandeloj en diamantaj kaj rubenaj ingoj komencis flamigi sin en ĉiu ĉambro.

Belulino trovis sian vespermanĝon pretigita je precize la tempo kiam ŝi preferis manĝi, sed ŝi vidis neniun kaj aŭdis nenion, kaj, kvankam ŝia patro avertis ŝin ke ŝi estos sola, ŝi komencis iom enui.

Sed baldaŭ ŝi aŭdis la Beston veni, kaj demandis al si tremante ĉu li intencas manĝi ŝin nun.

Tamen, ĉar li tute ne ŝajnis feroĉa, kaj nur diris raŭke: “Bonan vesperon, Belulino,” ŝi respondis gaje kaj sukcesis kaŝi sian teruriĝon. La Besto demandis al ŝi kiel ŝi distradis sin, kaj ŝi parolis al li pri ĉiuj ĉambroj kiujn ŝi vidis.

Post tio li demandis ĉu ŝi opinias ke ŝi povos esti feliĉa en lia palaco; kaj Belulino respondis ke ĉio estis tiel bela ke ŝi estus tre malfacile plaĉebla se ŝi ne povus esti feliĉa. Kaj post ĉirkaŭ horo da konversacio Belulino komencis pensi ke la Besto vere ne estas tiel terura kiel unue ŝi supozis. Li stariĝis por foriri de ŝi, kaj diris per sia raŭka voĉo:

“Ĉu vi amas min, Belulino? Ĉu vi edzigos min?”

“Ho! kion mi diru?” kriis Belulino, ĉar ŝi timis kolerigi la Beston per rifuzo.

“Diru ‘jes’ aŭ ‘ne’ sentime,” li respondis.

“Ho! ne, Besto,” diris Belulino haste.

“Ĉar vi rifuzas, do bonan nokton, Belulino,” li diris. Kaj ŝi respondis:

“Bonan nokton, Besto,” kaj ĝojis ĉar ŝi trovis ke ŝia rifuzo ne provokis lin. Kaj post lia foriro ŝi tre baldaŭ estis en la lito kaj dormanta, songante pri sia nekonata Princo. Ŝi kredis lin veni kaj diri al ŝi:

“Ha, Belulino! kial vi tiel malafablas al mi? Mi timas ke mia sorto estos resti malfeliĉa dum ankoraŭ multaj tagoj.”

Kaj ŝiaj songoj ŝanĝiĝis, sed la ĉarma Princo rolis en ĉiu el ili; kaj kiam la mateno venis ŝia unua penso estis rigardi la portreton kaj vidu ĉu vere ĝi similas al li, kaj ŝi trovis ke nepre tiel estas.

Tiun matenon ŝi decidis distri sin en la ĝardeno, ĉar la suno brilis, kaj ĉiuj fontanoj ŝprucis; sed ŝin mirigis trovi ke ĉiu loko estas familiara al ŝi, kaj baldaŭ ŝi atingis la rojon kie la mirteloj kreskas kie ŝi unue renkontis la Princo en sia songo, kaj tio des pli kredigis ŝin ke certe li estas kaptito de la Besto. Kiam ŝi laciĝis ŝi reiris al la palaco, kaj trovis novan ĉambron plenan de materialoj por ĉiuspeca laboro—rubandoj el kiuj fari bantojn, kaj silkan ŝtofon el kiu fari florojn. Ankaŭ estis birdejo plena de raraj birdoj, kiuj estis tiel malsovaĝaj ke ili flugis al Belulino tuj kiam ili vidis ŝin, kaj staris sur ŝiaj ŝultroj kaj kapo.

“Belaj uletoj,” ŝi diris, “kiom volonte mi havus vian kaĝon pli proksima al mia ĉambro, por ke mi ofte aŭdu vin kanti!”

Dirante tion ŝi malfermis pordon, kaj ĝoje trovis ke ĝi kondukas en ŝian propran ĉambron, kvankam ŝi estis supozinta ĝin ĉe la tre fora flanko de la palaco.

Estis pli da birdoj en pretera ĉambro, papagoj kaj kakatuoj parolkapablaj, kaj ili salutis Belulinon per ŝia nomo; efektive, ŝi trovis ilin tiel interesaj ke ŝi reportis unu aŭ du al sia ĉambro, kaj ili konversaciis kun ŝi dum ŝi manĝis; post tio la Besto kiel kutime vizitis ŝin, kaj demandis same kiel antaŭe, kaj poste per raŭka “bonan nokton” li foriris, kaj Belulino enlitiĝis por sonĝi pri sia mistera Princo. La tagoj pasis rapide per diversaj distraĵoj, kaj post iom da tempo Belulino trovis alian strangaĵon en la palaco, kiu ofte plaĉis al ŝi kiam ŝi enuis pro sia solestado. Estis unu ĉambro kiun si ne precipe rimarkis ĝis tiam; ĝi estis vaka, escepte ke sub ĉiu fenestro staris tre komforta seĝo; kaj kiam ŝi unuafoje

rigardis tra la fenestro ŝajnis al ŝi ke nigra kurteno malebligas ke ŝi vidu ion eksteran. Sed kiam ŝi duafoje eniris la ĉambron, estante tre laca, ŝi sidiĝis en unu el la seĝoj, kaj tuj la kurteno



flankenruliĝis, kaj ege amuza pantomimo aktoriĝis antaŭ ŝi; estis dancoj, kaj koloraj lumoj, kaj muziko, kaj belaj roboj, kaj ĉio estis tiom gaja ke Belulino ekstaziĝis. Post tio ŝi provis la aliajn sep

fenestrojn laŭvice, kaj estis nova kaj surpriza distraĵo videbla en ĉiu el ili, tiel ke Belulino povos neniam denove senti solecon. Ĉiun vesperon post la manĝo la Besto venis viziti ŝin, kaj ĉiam antaŭ ol diri bonan nokton li demandis al ŝi per sia terura voĉo:

“Belulino, ĉu vi edzigos min?”

Kaj ŝajnis al Belulino, nun kiam ŝi pli bone komprenas lin, ke kiam ŝi diris “Ne, Besto,” li foriris tre malfeliĉa. Sed ŝiaj feliĉaj sonĝoj pri la bela juna Princo baldaŭ forgesigis al ŝi la povran Beston, kaj la sola afero kiu ĝenis ŝin estis konstantaj ordonoj ke ŝi malfidu aspektojn, lasu sian koron kaj ne siajn okulojn gvidi ŝin, kaj multaj aliaj perpleksigaj diroj kiujn negrave kiom ŝi pripensis ilin, ŝi ne kapablis kompreni.

Tiel ĉio daŭris dum longa tempo, ĝis fine, kvankam tre feliĉa, Belulino komencis sopiri vidi siajn patron kaj fratojn kaj fratinojn; kaj unu nokton, vidante ŝin tre malfeliĉaspekta, la Besto demandis al ŝi kio ĝenas ŝin. Belulino jam tute ĉesis timi lin. Nun ŝi sciis ke li estas vere milda malgraŭ sia feroĉa aspekto kaj sia terura voĉo. Do ŝi respondis ke ŝi sopiras revidi sian hejmon. Aŭdinte tion la Besto aspektis tre malĝoja, kaj li ploris mizere.

“Ha! Belulino, ĉu via koro permesas ke vi dizertu malfeliĉan Beston tiel? Kion pli vi volas por feliĉigi vin? Ĉu pro malamo al mi vi volas eskapi?”

“Ne, kara Besto,” respondis Belulino softe, “mi ne malamas vin, kaj min tre bedaŭrigus neniam revidi vin, sed mi sopiras revidi mian patron. Nur lasu min foriri por du monatoj, kaj mi promesas reveni al vi kaj resti dum mia tuta cetera vivo.”

La Besto, kiu ĝemadis mizere dum ŝi parolis, nun respondis:

“Mi ne povas rifuzi al vi kion ajn vi petas, eĉ kvankam ĝi eble kostus mian vivon. Prenu la kvar kestojn kiujn vi trovos en la ĉambro apud via, kaj plenigu ilin per ĉio kion vi volas kunpreni. Sed memoru vian promeson kaj revenu kiam estos pasintaj la du monatoj, alie vi eble devos penti, ĉar se vi ne venos akurate vi trovos vian fidelan Beston morta. Vi ne bezonos kaleŝon por reporti vin. Nur diru adiaŭ al ĉiuj viaj fratoj kaj fratinoj la nokton antaŭ via forveno, kaj enlitiĝinte turnu ĉi tiun ringon sur via fingro kaj diru firme: ‘Mi volas reiri al mia palaco kaj revidi mian Beston.’ Bonan nokton, Belulino. Nenion timu, dormu pace, kaj

post nelonge vi revidos vian patron.”

Tuj kiam Belulino estis sola ŝi hastis plenigi la kestojn per ĉiaj raraj kaj valoregaj aĵoj kiujn ŝi vidis ĉirkaŭ si, kaj nur kiam ŝi laciĝis pro amasa enŝutado en ilin ili aspektis plenaj.

Post tio ŝi enlitiĝis, sed ŝi apenaŭ povis dormi pro sia ĝojo. Kaj kiam fine ŝi komencis sonĝi pri sia amata Princo ŝin malgajigis vidi lin etendita sur herbokovrita rojbordo malfeliĉa kaj laca, kaj apenaŭ normalaspekta.

“Kio estas?” ŝi kriis.

Sed li rigardis ŝin riproĉe, kaj diris:

“Kiel vi povas demandi al mi tion, kruelulino? Ĉu vi ne forlasas min tiel ke mi eble mortos?”

“Ha! Ne tiom tristu,” kriis Belulino; “mi foriras nur per certigi al mia patro ke mi estas sekura kaj feliĉa. Mi promesis al la Besto fidele ke mi revenos, kaj li mortus pro malĝojo se mi ne plenumus mian promeson!”

“Kial gravus al vi?” diris la Princo. “Certe tio ne ĝenus vin?”

“Vere mi estus maldankema se al mi ne gravus tiel afabla Besto,” kriis Belulino indigne. “Mi volonte mortus por savi lin de doloro. Mi certigas al vi ke li ne kulpas pri sia malbeleco.”

Ĝuste tiam stranga sono vekis ŝin—iu parolas al ŝi el ne tre for; kaj malferminte siajn okulojn ŝi trovis sin en ĉambro kiun neniam antaŭe ŝi vidis, kiu estas certe neniel egale grandioza kiel tiu al kiu ŝi kutimas en la palaco de la Besto. Kie do ŝi estas? Ŝi ellitiĝis kaj haste vestis sin, kaj ekvidis ke la kestoj kiujn ŝi pakis la antaŭan nokton ĉiuj estas en la ĉambro. Dum ŝi demandadis al si per kia magio la Besto transportis ilin kaj ŝin al ĉi tiu stranga loko ŝi subite aŭdis la voĉon de sia patro, kaj elkuris kaj salutis lin ĝoje. Ŝiajn fratojn kaj fratinojn ĉiujn mirigis ŝia ekapero, ĉar ili ja anticipis neniam revidi ŝin, kaj ili demandis al ŝi senfinan nombron da demandoj. Ŝi ankaŭ devis aŭdi multon pri kio okazis al ili dum ŝia foresto, kaj pri la hejmenveturo de ŝia patro. Sed kiam ili aŭdis ke ŝi venis por nur nelonge esti kun ili, kaj poste devos reiri al la palaco de la Besto por ĉiam, ili lamentis laŭte. Belulino demandis al sia patro kion li kredas esti la signifo de ŝiaj strangaj sonĝoj, kaj kial la Princo konstante petadis ŝi ne fidi aspektojn. Post multa konsiderado li respondis: “Vi mem diras al

mi ke la Besto, kvankam terura, elkore amas vin, kaj indas viajn amon kaj dankemon pro liaj amemo kaj afableco; mi kredas ke la Princo volas ke vi komprenu ke vi devas kompensi lin plenumante lian deziron, malgraŭ lia malbeleco.”

Belulino ne povis ne kompreni ke tio estas tre verŝajna; tamen, kiam ŝi pensis pri sia kara Princo tiel bela, ŝi tute ne sentis emon edzigi la Beston. Nu, dum du monatoj ne necesos fari decidon, kaj ŝi povos ĝui kuneston kun siaj fratinoj. Tamen, kvankam ili nun estas riĉaj, kaj denove loĝas en urbo, kaj havas multajn konatojn, Belulino trovis ke nenio multe distras ŝin; kaj ŝi ofte pensis pri la palaco, kie ŝi estis tiel feliĉa, precipe ĉar enhejme ŝi eĉ ne unufoje songis pri sia kara Princo, kaj ŝi estis tre trista sen li.

Krome, ŝajne ŝiaj fratinoj estis tre kutimiĝintaj al vivo sen ŝi, kaj eĉ trovas ŝin iom obstakla, do ne bedaŭrigos ŝin kiam la du monatoj estos finitaj—se ne petegus ŝin resti ŝiaj patro kaj fratoj, kaj ili ŝajnis tiom tristaj pro pensoj pri ŝia foriro ke ŝi ne kuraĝis diri adiaŭ al ili. Ĉiutage kiam ŝi ellitiĝis ŝi intencis adiaŭi kiam venos la nokto, sed kiam la nokto venis ŝi denove prokrastis, ĝis fine ŝi havis tristegan songon kiu helpis ŝin decidi. Ŝi kredis vagadi en soleca vojo en la palacaj ĝardenoj, kaj ŝi aŭdis ĝemojn kiuj laŭŝajne venis el kelkaj arbustoj kaŝantaj la enirejon de kavo, kaj kurinte rapide por trovi kio okazas, ŝi trovis la Beston etenditan sur sia flanko, evidente mortantan. Li riproĉis ŝin malforte ke ŝi kaŭzis lian misstaton, kaj sammomente solena damo ekaperis, kaj diris tre serioze:

“Ha! Belulino, vi nur lastamomente venis por savi lian vivon. Vidu kio okazas kiam oni ne plenumas siajn promesojn! Se via prokrasto daŭrus unu tagon pli, vi trovus lin morta.”

Belulinon tiom teruris tiu songo ke la sekvan matenon ŝi anoncis sian intencon tuj reiri, kaj tiun nokton mem ŝi adiaŭis al sia patro kaj al ĉiuj siaj fratoj kaj fratinoj, kaj tuj post sia enlitiĝo ŝi turnis sian ringon sur sia fingro, kaj diris firme:

“Mi volas reiri al mia palaco kaj revidi mian Beston,” laŭ la ordono.

Ŝi tuj endormiĝis, kaj vekiĝis nur kiam ŝi aŭdis la horloĝon diri, “Belulino, Belulino,” dekdufoje per sia muzika voĉo, kio tuj

informis ŝin ke ŝi vere estas denove en la palaco. Ĉio estas precize kiel antaŭe, kaj ŝiaj birdoj ĝojegis vidi ŝin! sed Belulino pensis neniam esti koninta tiel longan tagon, ĉar ŝi tiom fervoregis revidi la Beston ke ŝi sentis ke la vespermanĝo neniam venos.

Sed kiam ĝi ja venis kaj neniuj Bestoj aperis ŝi vere timis; do aŭskultinte kaj atendinte longe, ŝi kuris en la ĝardenon por serĉi lin. Tien kaj reen laŭ la vojetoj kaj avenuoj kuris povra Belulino, vokante lin vane, ĉar neniuj respondis, kaj neniun lian spuron ŝi povis trovi; ĝis fine, lacega, ŝi haltis por ripozi dum minuto, kaj vidis ke ŝi staras kontraŭ la ombrata vojeto kiun ŝi vidis en sia



sonĝo. Ŝi rapidis laŭ tiu vojeto, kaj, jes vere, jen la kavo, kaj en ĝi kuŝas la Besto—dormante, laŭ la supozo de Belulino. Tre ĝoja pro trovi lin, ŝi alkuris kaj karesis lian kapon, sed, hororoplenige al ŝi, li ne moviĝis nek malfermis siajn okulojn.

“Ho! li mortis; kaj mi mem kulpas,” diris Belulino, plorante amare.

Sed kiam ŝi ririgardis lin, ŝi imagis ke li ankoraŭ spiras, kaj, haste alportinte iom da akvo el la plej proksima fontano, ŝi ŝprucigis ĝin sur lian vizaĝon, kaj ege ĝojige al ŝi li komencis reviviĝi.

“Ho! Besto, kiom vi timigis min!” ŝi kriis. “Mi neniam sciis kiom mi amas vin ĝis nun, kiam mi timis esti tro malfrua por savi vian vivon.”

“Ĉu vere vi povas ami tiel malbelan personon kia estas mi?” diris la Besto malforte. “Ha! Belulino, vi nur lastamomente venis. Mi komencis morti ĉar mi kredis ke vi forgesis vian promeson. Sed reiru nun kaj ripozu, mi revidos vin post nelonge.”

Belulinon, kiu duonsupozis ke li koleros ŝin, recertigis lia milda voĉo, kaj ŝi reiris al la palaco, kie la vespermanĝo atendas ŝin; kaj poste la Besto envenis kiel kutime, kaj parolis pri la tempo kiun ŝi pasigis kun sia patro, demandante ĉu ŝi bone distris sin, kaj ĉu ili ĉiuj tre ĝojis vidi ŝin.

Belulino respondis ĝentile, kaj vere ĝuis rakonti al li ĉion okazintan al ŝi. Kaj kiam fine venis la horo por lia foriro, kaj li demandis, kiel tiom ofte li jam antaŭe demandis:

“Belulino, ĉu vi edzigos min?” ŝi respondis softe:

“Jes, kara Besto.”

Dum ŝi parolis lumardo ekaperis antaŭ la fenestroj de la palaco; piroteknikaĵoj krakis kaj pafiloj sonis, kaj skribita trans la avenueon de oranĝarboj, per literoj konsistantaj tute el lampiroj, estis “Vivu la Princo kaj lia Nova Edzino.”

Turninte sin por demandi al la Besto kion ĉio ĉi povas signifi, Belulino trovis ke li malaperis, kaj en lia loko staras ŝia delonge amata Princo! Sammomente aŭdiĝis la radoj de kaleŝo sur la teraso, kaj du damoj eniris la ĉambron. Belulino rekonis unu el ili kiel la solenan damon kiun ŝi vidis en siaj songoj; la alia ankaŭ estis tiel nobla kaj reĝineca ke Belulino apenaŭ sciis kiun saluti unue.

Sed tiu kiun ŝi jam konis diris la sia kunulo:

“Nu, Reĝino, jen Belulino, kiu kuraĝis savi vian filon de la terura sorĉo. Ili amas unu la alian, kaj mankas nur via konsento al la geedziĝo por perfekte feliĉigi ilin.”

“Mi konsentas plenkore,” kriis la Reĝino. “Kiel mi povus sufiĉe danki vin, ĉarma knabino, pro via redono de lia natura formo al mia filo?”

Kaj ŝi tenere ĉirkaŭbrakis Belulinon kaj la Princon, kiu intertempe salutadis la Feinon kaj ricevis ŝiajn gratulojn.

“Nu,” diris la Feino al Belulino, “mi supozas ke vi deziras ke mi voku ĉiujn viajn fratojn kaj fratinojn por danci ĉe via geedziĝo?”

Kaj tion ŝi faris, kaj oni celebris la geedziĝon jam la sekvan tagon plej grandioze, kaj Belulino kaj la Princo por ĉiam vivis feliĉe.¹

¹*La Belle et la Bête*. Par Madame de Villeneuve.

LA MASTRO-KNABINO

FOJE estis reĝo kiu havis multajn filojn. Mi ne scias precize kiom estis da ili, sed la plej juna ne povis resti kviete enhejme, kaj insistis eliri en la mondon kaj provi siajn ŝancojn, kaj post longa tempo la Reĝo devis cedi al li permeson foriri. Disveturinte dum pluraj tagoj, li atingis domon de giganto, kaj dungigis sin kiel serviston al la giganto. En la mateno la giganto devis eliri paŝti siajn kaprojn, kaj elirinte el la domo li ordonis al la filo de la Reĝo ke li purigu la stalon. “Kaj farinte tion,” li diris, “vi ne bezonos pli labori hodiaŭ, ĉar vi venis al afabla mastro, kaj tion vi komprenas. Sed kion mi ordonas ke vi faru, vi devos fari kaj bone kaj plene, kaj nenial iru en iun el la ĉambroj kiuj kondukas el la ĉambro en kiu vi dormis pasintanokte. Se vi malobeos, mi mortigos vin.”

“Nu vere, li ja estas facila mastro!” diris la Princo al si dum li marŝis tien kaj reen en la ĉambro zumante kaj kantante, ĉar li supozis ke estos multa tempo restanta por purigi la stalon; “sed estus distre ekrigardeti ankaŭ en liajn aliajn ĉambrojn,” pensis la Princo, “ĉar nepre li timas ke mi vidos ion, tial li ne permesas ke mi eniru ilin.” Do li eniris la unuan ĉambron. Kaldrono pendis de la muroj; ĝi boladis, sed la Princo ne povis vidi fajron sub ĝi. “Kio do povas estis en ĝi?” li pensis, kaj li entrempis harbuklon, kaj la harbuklo fariĝis kvazaŭ konsistanta tute el kupro. “Jen bela speco de supo. Se iu gustumus tion lia gorĝo kupriziĝus,” diris la junulo, kaj post tio li eniris la sekvan ĉambron. Ankaŭ tie kaldrono pendis de la muro, bebelante kaj bolante, sed ankaŭ sub ĝi ne estis fajro. “Nu, mi provu ankaŭ ĉi tiun,” diris la Princo, ĵetante plian harbuklon en ĝin, kaj ĝi eltiriĝis perarĝente kovrita. “Tia multevalora supo ne haveblas en la palaco de mia patro,” diris la Princo; “sed ĉio dependas de sia gusto, kaj post tio li eniris la trian ĉambron. Ankaŭ tie kaldrono pendis de la muro, bolante,

precize kiel en la du aliaj ĉambroj, kaj la Princo plezure provis ankaŭ tiun, li entrempis karbuklon, kaj ĝi eltiriĝis tiel brile orkovrita ke ĝi devove brilis. “Kelkaj pretendas ke ĉio iĝas pli kaj pli malbona,” diris la Princo; “sed ĉi tio estas pli kaj pli bona. Se li boligas oron ĉi tie, kion li eble boligas tie?” Li firme intencis vidi, kaj iris tra la kvara pordo en la kvaran ĉambron. Neniu kaldrono videblis tie, sed sur benko sidis iu simila al filino de reĝo, sed, kiu ajn ŝi estis, ŝi estis tiom bela ke neniam en la vivo de la Princo li vidis similulon.

“Ho! je la ĉielo kion vi faras ĉi tie?” diris ŝi kiu sidis sur la benko.

“Mi havas la postenon de la hieraŭa servisto,” diris la Princo.

Ke vi baldaŭ havu pli bonan postenon, se vi venis servi ĉi tie!” diris ŝi.

“Ho! sed mi kredas havi afablan mastron,” diris la Princo. “Li ne donis al mi malfacilan taskon hodiaŭ. Puriginte la stalon mi estos fininta.”

“Jes, sed kiel vi povos fari tion?” ŝi denove demandis. “Se vi purigos ĝin kiel aliaj homoj, dek forkegoplenoj enĵetiĝos por ĉiu kiun vi elĵetos. Sed mi instruos al vi kiel fari la taskon: vi devos renversi vian forkegon, kaj uzu la tenilon, kaj tiam ĉio elflugos per si mem.”

“Jes, mi agos tiel,” diris la Princo, kaj li restis la tutan tagon sidante kie li estas, ĉar baldaŭ estis aranĝite inter ili ke ili geedz-



iĝos, li kaj la filino de la Reĝo; do lia unua tago da servado al la giganto ne ŝajnis al li longa. Sed kiam la vespero proksimiĝis ŝi diris ke estos nun plej bone ke li purigu la stalon antaŭ ol revenos hejmen la giganto. Veninte tien li emis provi ĉu tio kion ŝi diris estas vera, do li komencis labori sammaniere kiel li iam vidis la staloknabojn labori en la staloj de lia patro, sed li baldaŭ vidis ke li devos ĉesi, ĉar kiam li jam laboris nur tre mallonge apenaŭ restis starloko. Do li faris kion instruis al li la Princon, li turnis la forkegon kaj ŝovelis per la tenilo, kaj post palpebrumeto la stalo estis pura kvazaŭ frotlavita. Fininte tion, li reiris denove en la ĉambron en kiu la giganto permesis ke li restu, kaj tie li marŝadis tien kaj reen sur la planko, kaj komencis zumi kaj kanti.

Revenis hejmen la giganto kun la kaproj. “Ĉu vi purigis la stalon?” demandis la giganto.

“Jes, nun ĝi estas pura kaj dolĉa, mastro,” diris la filo de la Reĝo.

“Mi kontrolas tion,” diris la giganto, kaj li ĉirkaŭiris al la stalo, sed ĝi estis ĝuste kia diris la Princo.

“Nepre vi parolis al mia Mastro-knabino, ĉar vi neniel elpensus tion per via propra kapo,” diris la giganto.

“Mastro-knabino! Kia aĵo estas tio, mastro?” diris la Princo, mienante stulte kiel azeno; “volonte mi vidus tion.”

“Nu, vi sufiĉe baldaŭ vidos ŝin,” diris la giganto.

La duan matenon la giganto denove devis eliri kun siaj kaproj, do li ordonis al la Princo ke tiutage li revenigu hejmen lian ĉevalon, kiu estas sur la montoflanko, kaj farinte tion li povos ripozi dum la resto de la tago, “ĉar vi venis al afabla mastro, kaj tion vi komprenos,” diris la giganto denove. “Sed ne eniru iun el la ĉambroj pri kiuj mi parolis hieraŭ, alie mi fortordos vian kapon,” diris li, kaj post tio li foriris kun sia grego da kaproj.

“Jes, vere, vi estas afabla mastro,” diris la Princo; “sed mi eniros paroli denove kun la Mastro-knabino; eble post nelonge ŝi preferos esti mia ol via.”

Do li eniris al ŝi. Ŝi demandis al li kion li devos fari tiutage.

“Ho! ne tre danĝeran laboron, mi opinias,” diris la filo de la Reĝo. “Mi devos nur revenigi lian ĉevalon de sur la montoflanko.”

“Nu, kiel vi intencas fari tion?” demandis la Mastro-knabino.

“Ho! ne necesas granda arto por rajdi ĉevalon hejmen,” diris la filo de la Reĝo. “Mi opinias ke mi sendube rajdis pli viklemaĵojn ĉevalojn antaŭ nun.”

“Jes, sed ne estas tiel facile kiel vi supozas, rajdi la ĉevalon hejmen,” diris la Mastro-knabino; “sed mi instruos al vi kion fari. Kiam vi proksimiĝos al ĝi, fajro ekflamos el ĝiaj nazotruoj kvazaŭ flamoj el pina torĉo: sed ege zorgu, prenu la bridon kiu pendas de la pordo tie, kaj ĵetu la mordajon rekte inter ĝiajn makzelojn, kaj ĝi tuj fariĝos tiel malsovaĝa ke vi povos fari kion ajn vi deziros per ĝi.” Li diris ke li gardos tion enmense, kaj post tio li denove sidis la tutan tagon tie apud la Mastro-knabino, kaj ili babilis kaj konversaciis pri tio kaj alio, sed la unua temo kaj la lasta nun estis, kiom feliĉe kaj ĝoje estos se nur ili povos geedziĝi, kaj sekure foriri de la giganto; kaj la Princo forgesus kaj la montoflankon kaj la ĉevalon se la Mastro-knabino ne memorigus ilin al li kiam proksimiĝis la vespero, kaj dirus ke nun estos plej bone ke li iru venigi la ĉevalon antaŭ ol venos la giganto. Do li faris tion, kaj prenis la bridon kiu pendis de hokostango, kaj paŝis laŭ la montoflanko, kaj antaŭ nelonge li renkontis la ĉevalon, kaj fajro kaj ruĝaj flamoj fluus el ĝiaj nazotruoj. Sed la junulo zorge atendis oportunon, kaj ĝuste dum ĝi kuris kontraŭ lin kun la makzeloj malfermitaj li ĵetis la mordajon rekte en ĝian buŝon, kaj la ĉevalo staris trankvile kiel juna ŝafido, kaj tute ne estis malfacile reirigi ĝin en la stalon. La Princo reiris en sian ĉambron, kaj komencis zumi kaj kanti.

Ĉirkaŭ la vesperiĝo la giganto venis hejmen. “Ĉu vi alvenigis la ĉevalon de sur la montoflanko?” li demandis.

“Jes ja, mastro; estis amuze rajdi ĝin, sed mi rajdis lin rekte hejmen, kaj ankaŭ metis lin en la stalon,” diris la Princo.

“Mi kontrolos tion,” diris la giganto, kaj li ekiris al la stalo, sed la ĉevalo staris tie ĝuste kiel diris la Princo. “Nepre vi parolis al mia Mastro-knabino, ĉar vi neniel elpensus tion per via propra kapo,” diris la giganto denove.

“Hieraŭ, mastro, vi parolis pri tiu Mastro-knabino, kaj hodiaŭ vi parolas pri ŝi; ha! la ĉielo benu vin, mastro, kial vi ne montras ĝin al mi? ĉar por mi estus vera plezuro vidi ĝin,” diris la Princo, kiu denove ŝajnis sin malsaĝa kaj stulta.

“Ho! vi sufiĉe baldaŭ vidos ŝin,” diris la giganto.

La matenon de la tria tago la giganto denove devis iri en la arbaron kun la kaproj. “Hodiaŭ vi devos iri subteren kaj reporti ĉi tien miajn impostojn,” li diris al la Princo. “Kaj farinte tion, vi povos ripozi dum la resto de la tago, ĉar vi vidos al kia malsevera mastro vi venis,” kaj dirinte tion li foriris.

“Nu, negrave kiom malsevera mastro vi eble estas, vi elektis por mi tre malfacilan taskon,” pensis la Princo; “sed mi penos trovi vian Mastro-knabinon; vi diras ke ŝi estas via, sed malgraŭ tio ŝi eble povos diri al mi kion fari nun,” kaj li iris al ŝi. Do, kiam la Mastro-knabino demandis al li kian taskon la giganto elektis por li tiutage, li diris al ŝi ke li devos iri subteren kaj akiri la impostojn.

“Kaj kiel vi intencas fari tion?” diris la Mastro-knabino.

“Ho! vi devos diri al mi kiel fari ĝin,” diris la Princo, “ĉar ĝis nun neniam mi estis subtere, kaj eĉ se mi konus la vojon mi ne scias kiom mi postulu.”

“Ho! jes, mi baldaŭ diros tion al vi; vi devos iri al la roko tie sub la montokresto, kaj preni la klabon kiu estas tie, kaj bati la rokan muron,” diris la Mastro-knabino. “Iu elvenos kiu scintilos pro fajreroj: diru al li vian taskon, kaj kiam li demandos al vi kiom vi volas, diru ‘Kiom mi povas porti.’”

“Jes, mi gardos tion enmense,” diris li, kaj post tio li sidis tie la tutan tagon kun la Mastro-knabino, ĝis proksimiĝis la nokto, kaj li volonte restus tie ĝis nun se la Mastro-knabino ne memorigus al li ke venis la horo foriri por alporti impostojn antaŭ ol venos la giganto.

Do li ekiris, kaj faris precize kion diris al li la Mastro-knabino. Li iris al la roka muro, kaj prenis la klabon, kaj batis per ĝi. Venis iu tiel plena de fajreroj ke ili flugis el liaj okuloj kaj lia nazo. “Kion vi volas?” diris li.

“Mi devis veni ĉi tien por la giganto, kaj postuli la imposton por li,” diris la filo de la Reĝo.

“Kiom do vi devos ricevi?” diris la alia.

“Mi petas nur kiom mi povas porti kun mi,” diris la Princo.

“Estas bone por vi ke vi ne petis ĉevalŝarĝon,” diris tiu kiu venis el la roko. “Sed nun envenu kun mi.”

Tion la Princo faris, kaj kiom da oro kaj arĝento li vidis! Ĝi kuŝis en la monto kvazaŭ amasoj da ŝtonoj en dezertaĵo, kaj li akiris ŝarĝon tiom grandan kiom li povis porti, kaj kun tio li



foriris. Do en la vespero, kiam la giganto venis hejmen kun la kaproj, la Princo eniris la ĉambron kaj zumis kaj kantis denove same kiel dum la aliaj du vesperoj.

“Ĉu vi alvenigis la imposton?” demandis la giganto.

“Jes mi faris tion,” diris la Princo.

“Do kien vi metis ĝin?” diris la giganto denove.

“La sako da oro staras tie sur la benko,” diris la Princo.

“Mi kontrolas tion,” diris la giganto, kaj li foriris al la benko, sed la sako staris tie, kaj ĝi estis tiel plena ke oro kaj arĝento elfalis kiam la giganto malligis la ŝnuron.

“Nepre vi parolis kun mia Mastro-knabino!” diris la giganto, “kaj se tiel estis mi tordos vian kolon.”

“Mastro-knabino?” diris la Princo; “hieraŭ mia mastro parolis pri tiu Mastro-knabino, kaj hodiaŭ li denove parolas pri ŝi; kaj la plej unuan tagon la parolo estis simila. Volontege mi mem vidus ĝin,” diris li.

“Jes, jes, atendu ĝis morgaŭ,” diris la giganto, “kaj tiam mi mem gvidos vin al ŝi.”

“Ha! mastro, mi dankas vin—sed vi nur mokas min,” diris la filo de la Reĝo.

La sekvan tagon la giganto gvidis lin al la Mastro-knabino. “Nun mortigu lin, kaj boligu lin en la grandega kaldrono kiun vi konas, kaj pretiginte la brogaĵon alvoku min,” diris la giganto; post tio li kuŝiĝis sur la benko por dormi, kaj preskaŭ tuj komencis ronki tiel ke sonis kiel tondro inter la montetoj.

Do la Mastro-knabino prenis tranĉilon, kaj trancis la etfingrojn de la Princo, kaj faligis tri gutojn da sango sur lignan tabureton; post tio ŝi prenis ĉiujn malnovajn ĉifonojn, kaj ŝuplandumojn, kaj ĉian rubaĵon kiun ŝi povis trovi, kaj metis ilin el la kaldronon; kaj post tio ŝi plenigis skatolon per orpulvoro, kaj prenis pecon da salo, kaj akvoflaskon kiu pendis apud la pordo, kaj ŝi ankaŭ prenis kun si oran pomon, kaj du orajn kokidojn; kaj post tio ŝi kaj la Princo foriris kiel eble plej rapide, kaj irinte iom ili atingis la maron, kaj post tio ili velis, sed el kie ili akiris la ŝipon mi neniam povis eltrovi.

Nu, kiam la giganto dormis jam longe, li komencis streĉi sin sur la benko sur kiu li kuŝis. “Ĉu baldaŭ ĝi bolos?” diris li.

“Ĝi nur nun komencas,” diris la unua guto da sango sur la tabureto.

Do la giganto rekuŝigis sin por dormi, kaj dormis tre tre

longe. Post tio li rekomencis moviĝeti. “Ĉu nun baldaŭ ĝi estos preta?” diris li, sed li ne suprenrigardis ĉifoje, same kiel la unuan fojon, ĉar li ankoraŭ duondormis.

“Duone preta!” diris la dua guto da sango, kaj la giganto denove kredis ke parolis la Mastro-knabino, kaj turnis sin sur la benko, kaj rekuŝigis sin por denove dormi. Dorminte denove dum multaj horoj, li komencis movi kaj streĉi sin. “Ĉu ankoraŭ ĝi ne estas preta?” diris li.

“Ĝi estas tutepreta,” diris la tria guto da sango. La giganto komencis sidiĝi, kaj froti siajn okulojn, sed li ne povis vidi kiu parolis al li, do li petis la Mastro-knabinon, kaj vokis ŝin. Sed neniu estis tie por respondi al li.


“Ha! nu ŝi nur provizore eliretis,” pensis la giganto, kaj li prenis kuleron, kaj iris al la kaldrono por gustumi; sed estis en ĝi nur ŝuplandumoj, kaj ĉifonoj, kaj tiaj trompaĵoj, kaj ĉiu estis kunboligita, tiel ke li ne povis scii ĉu ĝi estas kaĉo aŭ laktosupo. Vidante tion, li komprenis kio okazis, kaj li ekfuriozis tiom ke li apenaŭ konsciis kion li faras. Foren li iris sekvante la princon kaj la Mastro-knabinon, tiom rapide ke la vento fajfis malantaŭ li, kaj post nelonge li atingis la akvon, sed li ne povis transiri ĝin. “Nu, nu, mi baldaŭ trovos kuracilon por tio: mi nur bezonas alvoki mian riverosuĉiston,” diris la giganto, kaj li ja vokis lin. Do lia riverosuĉisto venis kaj kuŝiĝis, kaj trinkis unu, du, tri glutojn, kaj per tio la akvo en la maro tiom malaltiĝis ke la giganto vidis la Mastro-knabinon kaj la Princon por sur la maro en ilia ŝipo. “Nun vi devas elĵeti la pecon de salo,” diris la Mastro-knabino, kaj la Princo faris tion, kaj ĝi fariĝis tiel granda alta monto tute kovranta la maron ke la giganto ne povis transiri ĝin, kaj la riverosuĉisto ne povis plu trinki la akvon. “Nu, nu, mi baldaŭ trovos kuracilon por tio,” diris la giganto, do li alvokis sian montoboriston veni kaj trabori la monton tiel ke la riverosuĉisto denove povos eltrinki la akvon. Sed tuj kiam la truo estis farita, kaj la riverosuĉisto komencis trinki, la Mastro-knabino diris al la Princo ke li elĵetu unu-du gutojn el la flasko, kaj antaŭ ol la riverosuĉisto povis unufoje gluti ili atingis la teron kaj estis sekuraj. Do ili decidis hejmeniri al la patro de la Princo, sed la Princo nenial permesis ke la Mastro-knabino marŝu tien, ĉar li opiniis ke estus malkonvene ke

aŭ ŝi aŭ li iru surpiede.

“Atendu ĉi tie nur iomete, dum mi iros hejmen por alvenigi la sep ĉevalojn kiuj staras en la stalo de mia patro,” diris li; “ne estas malproksime, kaj mi ne longe forestos, sed mi rifuzas ke mia estonta edzino marŝu al la palaco surpiede.”

“Ho! ne, ne iru, ĉar se vi iros hejmen al la palaco de la Reĝo vi forgesos min, mi antaŭvidas tion.”

“Kiel mi povus forgesi vin? Ni tiom suferis misaĵojn kune, kaj amas unu la alian tiom,” diris la Princo; kaj li insistis iri hejmen



por venigi la kaleŝon kun la sep ĉevaloj, kaj ŝi atendu lin tie, apud la marbordo. Do fine la Mastro-knabino devis cedi, ĉar li tiom absolute insistis fari tion. “Sed veninte tien vi devos eĉ ne permesi al vi sufiĉan tempon por saluti iun, sed iru rekte en la stalon, kaj prenu la ĉevalojn, kaj metu ilin en la kaleŝon, kaj reveturu kiel eble plej rapide. Ĉar ili ĉiuj venos ĉirkaŭ vin; sed vi devos kondukti precize kvazaŭ vi ne vidas ilin, kaj nenial gustumu ion ajn, ĉar se vi faros tion tio kaŭzos grandan mizeron al kaj vi kaj mi,” diris ŝi; kaj tion li promesis.

Sed kiam li hejmenvenis al la palaco de la Reĝo unu el liaj fratoj estis tuj edziĝonta, kaj la novedzino kaj ĉiuj ŝiaj parencoj venis al la palaco; do ili ĉiuj amase ĉirkaŭis lin, kaj demandis lin pri tio kaj alio, kaj volis ke li tuj eniru kun ili; sed li kondukis kvazaŭ ne vidante ilin, kaj iris rekte al la stalo, kaj elprenis la ĉevalojn kaj komencis jungi ilin. Vidinte ke ili neniel povas devigi lin eniri kun ili, ili elvenis al li portante manĝaĵojn kaj trinkaĵojn, kaj la plej bonan parton de ĉio kion ili preparis por la geedziĝo; sed la Princo rifuzis tuŝi ion ajn, kaj faris nenion krom pretigi la ĉevalojn laŭeble plej rapide. Fine, tamen, la fratino de la novedzino rulis pomon trans la korton al li, kaj diris: “Ĉar vi rifuzis manĝi ion alian, eble vi deziras mordi tion, ĉar nepre vi kaj malsatas kaj soifas post via longa veturo.” Kaj li prenis la pomon kaj elmordis pecon. Sed tuj kiam li havis pompecon en sia buŝo li forgesis la Mastro-knabinon kaj ke li devas reiri en la kaleŝo por alvenigi ŝin.

“Nepre mi estas freneza! pro kio mi volas ĉi tiun kaleŝon kaj la ĉevalojn?” diris li; kaj li remetis la ĉevalojn en la stalon, kaj iris en la palacon de la Reĝo, kaj tie estis decidite ke li edzinigu la fratinon de la edzino, tiun kiu rulis la pomon al li.

La Mastro-knabino sidis apud la marbordo tre tre longan tempon, atendante la Princon, sed ne venis la Princo. Do ŝi foriris, kaj marŝinte iom ŝi atingis malgrandan kabanon starantan tute sola en arbareto, tre proksime al la palaco de la Reĝo. Ŝi eniris ĝin kaj demandis ĉu ŝi rajtos resti tie. La kabano apartenis al oldulinaĉo, kiu ankaŭ estis mishumora malica trolo. Unue ŝi ne permesis ke la Mastro-knabino restu kun ŝi; sed fine, post longe, per bonaj vortoj kaj bona pago, ŝi ricevis permeson. Sed la kabano estis tiel malpura kaj nigra interne kiel porkejo, do la Mastro-knabino diris ke ŝi plibeligos ĝin iomete, por ke ĝi aspektu iomete pli simila al la interno de la domoj de aliaj homoj. Al la oldulinaĉo ankaŭ tio ne plaĉis. Ŝi sulkis la frunton, kaj estis tre mishumora, sed la Mastro-knabino ne lasis sin ĝeni per tio. Ŝi elprenis sian skatolon da oro, kaj ĵetis unu-du manplenojn da ĝi en la fajron, kaj la oro bolis kaj verŝiĝis sur la tutan kabanon, ĝis ĉiu ĝia parto kaj interne kaj ekstere estis orkovrita. Sed kiam la oro komencis bobeli la oldulinaĉo tiom teruriĝis ke ŝi forfuĝis kvazaŭ la Malbonulo mem sekvas ŝin, kaj ŝi ne memoris klini sian kapon

dum ŝi trairis la pordejon, do ŝia kapo fendiĝis kaj ŝi mortis. La sekvan tagon la ŝerifo venis veturante tiuloke. Lin ege mirigis vidi la oran kabanon brilanta kaj scintilanta en la arbareto, kaj des pli lin mirigis, kiam li eniris, ekvidi la belan junulinon kiu sidas tie; li ekamis ŝin tuj, kaj tuj surloke li petis ŝin, kaj bele kaj afable, edzigi lin.

“Tamen, ĉu vi havas multe da mono?” diris la Mastro-knabino.

“Ho! jes; rilate al tio, ĝi ne mankas al mi,” diris la ŝerifo. Do nun li devis hejmeniri por alporti la monon, kaj en la vespero li revenis, kunportante sakon en kiu estis du buŝeloj da mono, kiun li metis sur la benkon. Nu, ĉar li havis tiel belan sumon da mono, la Mastro-knabino diris ke ŝi akceptas lin, do ili sidiĝis por kunparoladi.

Sed apenaŭ ili kunsidiĝis, la Mastro-knabino volis eksalti. “Mi forgesis prizorgi la fajron,” ŝi diris.

“Kial vi eksaltu por fari tion?” diris la ŝerifo; “mi faros tion!” Do li eksaltis, kaj per unu salto li atingis la kamenon.

“Nur diru al mi kiam vi tenos la ŝovelilon,” diris la Mastro-knabino.

“Nu, mi tenas ĝin nun,” diris la ŝerifo.

“Do vi tenu la ŝovelilon, kaj la ŝovelilo vin, kaj ŝutu ardantajn karbojn sur vin, ĝis la matenkrepusko,” diris la Mastro-knabino. Do la ŝerifo devis stari tie dum la tuta nokto kaj ŝuti ardantajn karbojn sur sin, kaj, negrave kiom li kriis kaj petis kaj petegis, la ardantaj karboj malgraŭe ne malvarmiĝis. Kiam la mateno komencis krepuski, kaj li kapablis deĵeti la ŝovelilon, li ne longe restis kie li estas, sed forfuĝis laŭeble plej rapide; kaj ĉiu renkontanta lin gapis kaj sekvis lin per siaj okuloj, ĉar li flugis kvazaŭ frenezulo, kaj li ne povus aspekti malpli bela se li estus kaj senhaŭtigita kaj tanita, kaj ĉiu scivolis kie li estis, sed pro hontego li rifuzis informi.

La sekvan tagon la advokato venis rajdonte preter la lokon kie loĝas la Mastro-knabino. Li vidis kiel hele brilas la kabano lumante tra la arbaro, kaj ankaŭ li eniris ĝin por vidi kiu loĝas tie, kaj kiam li eniris kaj vidis la belan junulinon li ekamis ŝin eĉ pli ol la ŝerifo, kaj tuj komencis amindumi ŝin. Do la Mastro-knabino de-

mandis al li, kiel ŝi antaŭe demandis al la ŝerifo, ĉu li havas multe da mono, kaj la advokato diris ke ĝi ne mankas al li, kaj ke li tuj iros hejmen por alpreni ĝin; kaj je la nokto li venis kun granda sako da mono—ĉifoje ĝi estis kvarbuŝela sako—kaj metis ĝin sur la benkon apud la Mastro-knabino. Do ŝi promesis akcepti lin, kaj li sidiĝis sur la benkon apud ŝi por aranĝi tion, sed subite ŝi diris ke ŝi forgesis ŝlosi la pordon de la verando tiunokte, kaj devas fari tion.

“Kial vi faru tion?” diris la advokato; “sidu kviete, mi faros ĝin.”

Do li tuj surpiediĝis kaj eliris en la verandon.

“Diru al mi kiam vi tenos la pordoriglilon,” diris la Mastro-knabino.

“Mi tenas ĝin nun,” kriis la advokato.

“Do vi tenu la pordon, kaj la pordo vin, kaj vi iradu inter muro kaj muro ĝis la matenkrepusko,” diris la Mastro-knabino.

Kian dancon la advokato faris tiunokte! Li neniam tiel valzis antaŭe, kaj li neniam volis refari tian dancon. Kelkfoje li estis antaŭ la pordo, kaj kelkfoje la pordo estis antaŭ li, kaj ĝi iradis de unu flanko de la verando al la alia, ĝis la advokato estis preskaŭ mortigita. Unue li komencis riproĉi la Mastro-knabinon, kaj poste peti kaj petegi, sed al la pordo gravis nenio alia ol devigi lin resti kie li estas ĝis la tagiĝo.

Tuj kiam la pordo ĉesis teni lin, forfuĝis la advokato. Li forgesis kiun puni pro siaj suferoj, li forgesis kaj sian sakon da mono kaj sian amindumadon, pro sia timego ke la dompordo venos dancante ĉasi lin. Ĉiu renkontanta lin gapis kaj sekvis lin per siaj okuloj, ĉar li flugis kvazaŭ frenezulo, kaj li ne povus aspekti pli malbela se grego da virŝafoj kapbatadus lin dum la tuta nokto.

Je la tria tago venis la distriktestro, kaj ankaŭ li vidis la oran domon en la arbareto, kaj ankaŭ li sentis devon iri vidi kiu loĝas tie; kaj kiam li ekvidis la Mastro-knabinon li tiom ekamis ŝin ke li amindumis ŝin preskaŭ antaŭ ol saluti ŝin.

La Mastro-knabino respondis al li kiel ŝi respondis al la du aliaj, ke se li havas multe da mono ŝi akceptos lin. “Rilate al tio, ĝi ne mankas al mi,” diris la distriktestro; do ŝi tuj diris ke li hejmeniru por alporti ĝin, kaj tion li faris. Je la nokto li revenis, kaj li

kunhavis eĉ pli grandan sakon da mono ol alportis la advokato; ĝi nepre estis almenaŭ ses-buŝela, kaj li metis ĝin sur la benkon. Do decidiĝis ke li edzinigos la Mastro-knabinon. Sed apenaŭ ili kun-sidiĝis, ŝi diris ke ŝi forgesis enirigi la bovidon, kaj ke ŝi devos eliri meti ĝin en la brutdomon.

“Ne, vere, vi ne faros tion,” diris la distriktestro; “mi estas kiu faros tion.” Kaj, kvankam granda kaj dika, li eliris vigle kiel knabo.

“Diru al mi kiam vi tenos la voston de la bovido,” diris la Mastro-knabino.

“Mi tenas ĝin nun,” kriis la distriktestro.

“Do vi tenu la voston de la bovido, kaj la vosto de la bovido



tenu vin, kaj kune vi ĉirkaŭiradu la mondon ĝis la maten-krepusko!” diris la Mastro-knabino. Do la distriktestro devis vigligi sin, ĉar la bovido transiris malglatajn kaj glatajn terenojn, montetojn kaj valojn, kaj, ju pli kriis kaj kriaĉis la distriktestro, des pli rapide iris la bovido. Kiam la taglumo komencis aperi, la distriktestro estis duone morta; kaj tiom ĝojis li delasi la voston de la bovido ke li forgesis la sakon da mono kaj ĉion alian. Li marŝis nun malrapide—pli malrapide ol la ŝerifo kaj la advokato, sed ju pli malrapide li iris, des pli da tempo ĉiu havis por gapi kaj rigardi lin; kaj ili tiel uzis tiun tempon, kaj neniu povas imagi kiom laca kaj ĉifona li aspektis post sia danco kun la bovido.

La sekvan tagon oni intencis ke la geedziĝo okazu en la palaco de la Reĝo, kaj la pli aĝa frato veturu al la preĝejo kun sia edziniĝonto, kaj la frato kiu estis kun la giganto kun ŝia fratino. Sed kiam ili sidiĝis en la kaleŝo kaj estis veturontaj de la palaco unu el la tirrimenaj pingloj rompiĝis, kaj, kvankam ili faris unu novan, eĉ duan, trian novan, por anstataŭigi ĝin, tio ne helpis ilin, ĉar ĉiu siavice rompiĝis, negrave kian lignon ili utiligis por fari la pinglojn. Tio daŭris longe, kaj ili ne povis foriri de la palaco, do ĉiuj estis en granda embaraso. La ŝerifo diris (ĉar ankaŭ li estis invitita al la geedziĝo ĉe la Kortego): “Tie for en la arbareto loĝas junulino, kaj se vi povos instigi ŝin prunti al vi la tenilon de la ŝovelilo kiun ŝi uzas por pretigi sian fajron mi tre bone scias ke ĝi ne rompiĝos.” Do ili sendis mesaĝiston al la arbareto, kaj petis tiel bele ke ili ricevu prunte ŝian ŝoveltenilon pri kiu parolis la ŝerifo ke ŝi ne rifuzis; do nun ili havis tirrimenpinglon kiu ne rompiĝos.

Sed subite, ĝuste kiam ili komencis veturi, la planko de la kaleŝo dispeciĝis. Ili faris novan plankon laŭeble plej rapide, sed, negrave kiel ili kunnajlis ĝin, aŭ kian lignon ili utiligis, tuj kiam ili metis la novan plankon en la kaleŝon kaj estis forveturontaj ĝi re-rompiĝis, tiel ke ili estis eĉ malpli bonstataj ol kiam la tirrimena pinglo estis rompita. Do la advokato diris, ĉar ankaŭ li ĉeestis la geedziĝon en la palaco: “Tie for en la arbareto loĝas junulino, kaj se vi povos instigi ŝin prunti al vi duonon de sia verandopordo mi estas certa ke ĝi ne rompiĝos.” Do denove ili sendis mesaĝiston al la arbareto, kaj tiel bele petis pruntepreni la orumitan verandopordon pri kiu parolis al ili la advokato ke ili tuj ricevis ĝin. Denove ili estis forveturontaj, sed nun la ĉevaloj ne kapablis tiri la kaleŝon. Ili jam havis ses ĉevalojn, kaj nun ili enmetis ok, kaj poste dek, kaj poste dek du, sed ju pli ili enmetis, kaj ju pli la kaleŝo ŝoforo vipis ilin, des malpli utilis; kaj la kaleŝo tute ne moviĝis. Jam komencis malfruiĝi en la tago, kaj al la preĝejo ili devas kaj volas iri, do ĉiu en la palaco estis treege mizera. Ekparolis la distriktestro dirante: “Tie for en la orumita dometo en la arbareto loĝas junulino, kaj se vi povos instigi ŝin prunti al vi sian bovidon mi scias ke ĝi povus tiri la kaleŝon, eĉ se ĝi estus peza kiel monto.” Ĉiuj opiniis ke estus ridinde esti tirataj de bovido al la preĝejo, sed nenio alia fareblis krom denove sendi mesaĝiston, kaj peti

laŭeble bele, por la Reĝo, ke ŝi pruntu al ili la bovidon pri kiu parolis al ili la distriktestro. La Mastro-knabino lasis ilin havi ĝin tuj—ankaŭ ĉifoje ŝi ne volis diri “ne”.

Do ili jungis la bovidon por trovi ĉu la kaleŝo moviĝos; kaj foren ĝi veturis, trans malglatajn kaj glatajn surfacojn, trans sablojn kaj ŝtonojn, tiel ke ili apenaŭ povis spiri, kaj kelkfoje ili estis sur la tero kaj kelkfoje en la aero; kaj kiam ili atingis la preĝejon la kaleŝo komencis rotacii cirkle kvazaŭ ŝpinrado, kaj nur plej mal-facile kaj danĝere ili sukcesis grimpi el la kaleŝo kaj eniri la preĝejon. Kaj kiam ili reiris la kaleŝo veturis eĉ pli rapide, tiel ke la plejparto de ili tute ne konsciis kiel ili reatingis la palacon.



Kiam ili sidigis sin ĉe la tablo la Princo kiu servadis la giganton diris ke li opinias ke ili devus inviti la knabinon kiu pruntis al ili la ŝoveltenilon, kaj la verandopordon, kaj la bovidon al la palaco, “ĉar,” diris li, “sen tiuj tri aĵoj ni tute ne estus foririntaj de la palaco.”

Ankaŭ la Reĝo opiniis ke tio estus justa kaj deca, do li sendis kvin el siaj plej bonaj servistoj al la orumita dometo, por saluti la knabinon ĝentile nome de la Reĝo, kaj peti ŝin bonvoli veni al la palaco por tagmanĝi je la tagmezo.

“Salutu la Reĝon, kaj diru al li ke, se li tro fieras veni al mi, mi tro fieras veni al li,” respondis la Mastro-knabino.

Do la Reĝo devis mem iri, kaj la Mastro-knabino iris kun li tuj, kaj, ĉar la Reĝo kredis ŝin esti pli ol ŝi aspektas, li sidigis ŝin en la honorpozicio apud la plej unua edzo. Kiam ili jam sidis ĉe la tablo dum kelketa tempo, la Mastro-knabino elprenis la virkokon, kaj la kokinon, kaj la oron pomon kiujn ŝi estis forkunpreninta el la domo de la giganto, kaj metis ilin sur la tablon antaŭ si, kaj tuj la virkoko kaj la kokino komencis interbatali por la ora pomo.

“Ho! vidu kiel tiuj batalas por la ora pomo,” diris la filo de la Reĝo.

“Jes, kaj tiel ni ambaŭ batalis por fuĝi tiam kiam ni estis en la monto,” diris la Mastro-knabino.

Do la Princo rekonis ŝin, kaj vi povas imagi kiom li ĝojis. Li ordonis ke la trolsorĉistino kiu rulis la pomon al li disŝiriĝu inter dudek kvar ĉevaloj, tiel ke neniam peco de ŝi restis, kaj tiam unuafoje ili vere komencis festi la geedziĝon, kaj, kvankam lacegaj, ankaŭ la ŝerifo, la advokato, kaj la distriktestro festis ĝin.¹

¹Asbjornsen kaj Mö.

KIAL LA MARO ESTAS SALA

FOJE, antaŭ tre tre longe, estis du fratoj, unu estis riĉa kaj la alia malriĉa. Kiam venis la vespero antaŭ Kristnasko, la malriĉulo havis tute nenian manĝaĵon en sia domo, nek viandan nek panan; do li iris al sia frato, kaj petegis lin, en la nomo de Dio, doni al li ion por la Kristnaska Tago. Ja ne la unuan fojon la frato devis doni al li ion, kaj al li ne pli plaĉis nun la peto ol kutime.

“Se vi faros kion mi postulos, vi ricevos tutan ŝinkon,” diris li. La malriĉulo tuj dankis lin kaj promesis tion.

“Nu, jen la ŝinko, kaj nun vi devos iri rekte al Halo de Mortulo,” diris la riĉa frato, ĵetante la ŝinkon al li.

“Nu, mi plenumos mian promeson,” diris la alia, kaj li prenis la ŝinkon kaj foriris. Li pluiris kaj pluiris la tutan tagon kaj je la noktiĝo li atingis lokon kie estas brila lumo.

“Mi tute ne dubas ke jen la loko,” pensis la viro kun la ŝinko.

Maljunulo kun longa blanka barbo staris en la kromdometo, hakante julŝtipojn.

“Bonan vesperon,” diris la viro kun la ŝinko.

“Bonan vesperon al vi. Kien vi iras tiel malfrue?” diris la viro.

“Mi iras al Halo de Mortulo, se nur mi sekvas la ĝustan vojon,” respondis la malriĉulo.

“Ho! jes, vi tute pravas, ĉar jen ĝi,” diris la maljunulo. “Kiam vi eniros, ili ĉiuj volos aĉeti vian ŝinkon, ĉar ili ne ricevas multan viandon por manĝoj tie: sed nepre ne vendu ĝin krom se vi ricevos interŝanĝe la manmuelilon kiu staras malantaŭ la pordo. Kiam vi reeliros mi instruos al vi ĉesigi la manmuelilon, kiu estas utila por preskaŭ ĉio.”

Do la viro kun la ŝinko dankis la alian pro la bona konsilo, kaj frapis sur la pordon.

Kiam li eniris, ĉio okazis same kiel antaŭdiris la maljunulo: ĉiuj homoj, grandaj kaj malgrandaj venis ĉirkaŭ lin kvazaŭ formikoj sur formikomonteto, kaj ĉiu penis pliproponi por aĉeti la ŝinkon.

“Laŭjuste mia oldulino kaj mi devus havi ĝin kiel nian Kristnaskan manĝon, sed ĉar vi elkore deziras ĝin, mi tamen eble cedos ĝin al vi,” diris la viro. “Sed, sed mi vendos ĝin, mi ricevu la manmuelilon kiu staras tie malantaŭ la pordo.”

Unue ili plene rifuzis tion, kaj marĉandis kaj marĉandadis kun la viro, sed li insistis pri kion li diris, kaj la homoj devis doni



al li la manmuelilon. Kiam la viro revenis en la korton, li demandis al la maljuna lignohakisto kiel ĉesigi la manmuelilon, kaj lerninte tion li dankis lin kaj foriris hejmen laŭeble plej rapide, sed li alvenis tie nur post kiam la horloĝo sonigis la dekduan horon je la vespero antaŭ Kristnasko.

“Sed kie en la mondo vi estis?” diris la maljunulino. “Mi sidas ĉi tie horon post horo, havante ne eĉ du vergetojn kiujn mi povus kunmeti sub la kaĉopoto por Kristnasko.”

“Ho! mi ne povis pli frue veni; mi devis prizorgi ion gravan, kaj ankaŭ iri longan vojon; sed nun vi ja vidis!” diris la viro, kaj li

metis la manmuelilon sur la tablon, kaj ordonis al ĝi ke ĝi unue muelu lumilon, poste tablotukon, poste viandon, kaj bieron, kaj ĉion alian bonan por vespermanĝo je la vespero antaŭ Kristnasko; kaj la muelilo muelis ĉion ordonitan. “Benu min!” diris la maljunulino kiam unu afero post alia aperis; kaj ŝi volis scii kie ŝia edzo akiris la muelilon, sed li rifuzis diri tion al ŝi.

“Ne gravas kie mi akiris ĝin; vi povas vidi ke ĝi estas bona, kaj la akvo kiu turnas ĝin neniam glaciigis,” diris la viro. Do li mueligis viandon kaj trinkaĵojn, kaj ĉiajn bonaĵojn, sufiĉe por la tuta Kristnaska periodo, kaj la trian tagon li invitis ĉiujn siajn amikojn veni al festeno.

Nu, kiam la riĉa frato vidis ĉion kio estas en la bankedo kaj en la domo, li estis kaj ĉagrenita kaj kolera, ĉar li ĵaluzis ĉion havatan de lia frato. “La vesperon antaŭ Kristnasko li estis tiel malriĉa ke li venis al mi kaj petegis ereton, je Dio, kaj nun donas festenon kvazaŭ li estus kaj grafo kaj reĝo!” pensis li. “Sed, je la ĉielo, diru al mi kie vi akiris viajn riĉojn,” diris li al sia frato.

“Malantaŭ la pordo,” diris la posedanto de la muelilo, ĉar li ne deziris kontentigi la scivolemon de sia frato pri tio; sed poste dum la vespero, kiam li trinkis unu-du gutojn troe, li ne povis ne rakonti pri kiel li akiris la manmuelilon. “Vidu kio donis al mi ĉiujn miajn riĉaĵojn!” diris li, kaj li alportis la muelilon, kaj mueligis unue unu aferon kaj poste alian. Vidinte tion la frato insistis havi la muelilon, kaj post multa persvadado li sukcesis; sed li devis pagi tricent dolarojn por ĝi, kaj la malriĉa frato gardos ĝin ĝis la fino de la fojnrinkoltado, ĉar li pensis: “Se mi konservos ĝin tiom longe, mi povos devigi ĝin mueladi manĝaĵojn kaj trinkaĵojn sufiĉajn por multaj jaroj.” Dum tiu tempo, kiel vi povas imagi, la muelilo ne rustiĝis, kaj kiam la fojnrinkolto venis la riĉa frato ricevis ĝin, sed la alia zorge atentis ne instrui al li kiel ĉesigi ĝin. Estis vespero kiam la riĉulo reportis la muelilon hejmen, kaj en la mateno li ordonis ke la maljunulino eliru kaj sternu la fojnon post la rikoltistoj, kaj li mem prizorgos la domon tiutage, li diris.

Do kiam proksimiĝis la manĝohoro, li metis la muelilon sur la tablon en la kuirejo, kaj diris: “Muelu haringojn kaj laktan supon, kaj faru tion kaj rapide kaj bone.”

Do la muelilo komencis mueli haringojn kaj laktan supon, kaj

unue pleniĝis ĉiuj pladoj kaj kuvoj, kaj post tio ĝi kovris la plankon de la kuirejo. La viro tordis kaj turnis ĝin, kaj faris ĉion eblan por ĉesigi la muelilon, sed negrave kiel li turnis ĝin kaj ŝraŭbturnis ĝin, la muelilo daŭre mueladis, kaj post nelonge la supo tiom altiĝis ke la viro preskaŭ dronis. Do li malfermis la pordon de la salono, sed post nelonge la muelilo plenigis ankaŭ la salonon, kaj nur malfacile kaj danĝere la viro povis trairi la supofluon kaj premi la pordoriglilon. Malferminte la pordon, li ne restis longe en la ĉambro, sed elkuris, kaj la haringoj kaj supo sekvis lin, kaj ĝi fluis sur kaj la agrojn kaj la sovaĝajn kampojn. Nu, la maljunulino, kiu ekstere sternadis la fojnon, komencis pensi ke la manĝo longe prokrastiĝas, kaj diris al la virinoj kaj la rikoltistoj: “Kvankam la mastro ne vokas nin hejmen, ni iru. Eble li trovas ke li ne lerte faras supon, kaj plej bone estos ke mi helpi lin.” Do ili komencis lanti hejmen, sed iomete suprenirinte la monteton ili renkontis la haringojn kaj supon kaj panon, kiuj ĉiuj elverŝiĝas kaj serpentumas unu super la alia, kaj la viro mem estas antaŭ la inundo. “Je la ĉielo, se nur ĉiu el vi havus cent stomakojn! Atentu ne droni en la supo!” li kriis dum li pasis ilin kvazaŭ Petolo ĉasas lin, al kie loĝas lia frato. Tie li petegis lin, je Dio, repreni la muelilon, kaj jam tuj, ĉar, diris li: “Se ĝi muelos unu horon pli, haringoj kaj supo detruos la tutan distrikton.” Sed la frato rifuzis preni ĝin antaŭ ol la alia pagos al li tricent dolarojn, do tion li devis fari. Nun la malriĉa frato rehavis kaj la monon kaj la muelilon. Do ne estis longe antaŭ ol li posedis agrodomon multe pli bonan ol tiu en kiu loĝas lia frato, sed la muelilo muelis por li tiom da mono ke li kovris ĝin per plakoj el oro; kaj la agrodomo situis tre proksime al la marbordo, do ĝi brilis kaj scintilis ĝis malproksime sur la maro. Ĉiu pretervelanto nun devis alteriĝi ĉe la haveno por viziti la riĉulon en la ora agrodomo, kaj ĉiu volis vidi la mirindan muelilon, ĉar famo pri ĝi etendiĝis ĉien, kaj al neniuj mankis aŭdi pri ĝi.

Post tre tre longa tempo venis ankaŭ kapitano kiu volis vidi la muelilon. Li demandis ĉu ĝi povas fari salon. “Jes, ĝi povas fari salon,” diris ĝia posedanto, kaj kiam la kapitano aŭdis tion li plenforte volis havi la muelilon, negrave kiom ĝi kostos, ĉar, li pensis, se li havos ĝin, li ne plu devos veli longegan distancon trans la

danĝeroplenan maron por ŝarĝoj da salo. Unue la viro rifuzis akcepti vendi ĝin, sed la kapitano petis kaj petegis, kaj fine la viro vendis ĝin al li, por multe multaj miloj da dolaroj. La kapitano, metinte la muelilon sur sian ŝultron, ne longe restis tie, ĉar li tiom timis ke la viro ŝanĝos sian decidon, kaj li ne paŭzis por demandi kiel ĉesigi la mueladon, sed li eniris sian ŝipon laŭeble plej rapide.

Irinte iomete sur la maron li portis la muelilon al la ferdeko. “Muelu salon, kaj muelu kaj rapide kaj bone,” diris la kapitano. Do la muelilo komencis mueli salon, ĝis ĝi elŝprucis kvazaŭ akvo, kaj kiam la kapitano jam plenigis la ŝipon li volis ĉesigi la muelilon, sed, negrave kiel li turnis ĝin, kaj kiom li penis, ĝi plu mueladis, kaj la amaso da salo kreskis pli kaj pli alten, ĝis fine la ŝipo subakviĝis. Tie kuŝas la muelilo sur la fundo de la maro, kaj ankoraŭ, tagon post tago, ĝi plu mueladas: kaj jen kial la maro estas sala.¹

¹Asbjornsen kaj Møe.

LA MASTROKATO; AŬ, KAĈJO EN BOTOJ

FOJE estis muelisto kiu kiel heredaĵon al siaj tri filoj postlasis nur sian muelejon, sian azenon, kaj sian katon. La disdivido estis facile farita. Oni alvokis nek la skribiston nek advokaton. Ili ja rapide vorus la tutan malriĉan heredaĵon. La plej aĝa ricevis la muelejon, la dua la azenon, kaj la plej juna nenion escepte de la kato.

La povra junulo estis vere nekonsolebla pro sia mizera sorto.

“Miaj fratoj,” diris li, “povos tre bone vivi se ili kunmetos siajn posedaĵojn; sed rilate al mi, manĝinte mian katon, kaj farinte por mi mufon el lia haŭto, mi devos morti pro malsato.”

La Kato, kiu aŭdis tion, sed ŝajnis ne esti aŭdinta, diris al li tre serioztone:

“Ne tiel afliktu vin, mia bona mastro; vi nur bezonas doni al mi sakon, farigu paron da botoj por mi, por ke mi kuru tra la humo kaj la arbustoj, kaj vi vidos ke via heredo je mi ne estas tiel senesperiga kiel vi supozas.”

La mastro de la Kato ne multe esperis pro tio kion li diris; tamen, li ja ofte vidis lin tre ruze agi por kapti ratojn kaj musojn; ekzemple, li ofte pendis per siaj kalkanoj, aŭ kaŝis sin en la greno, kaj ŝajnis esti morta; tiel ke li ne plene malesperis ke li iom helpos lin en lia mizera stato. Ricevinte kion li petis, la Kato vestis sin tre elegante per la botoj, kaj, metinte sian sakon ĉirkaŭ sian kolon, li tenis ĝiajn du ŝnurojn per siaj du antaŭaj piedoj, kaj eniris kuniklokampon kie multe abundas kunikloj. Li metis branon kaj kardojn en sian sakon, kaj, etendinte sin kvazaŭ morta, li atendis kelkajn kunajn kuniklojn, kiuj ankoraŭ ne konas la trompojn de la mondo, ke ili venu kaj transerĉu lian sakon por trovi kion li metis en ĝin.

Apenaŭ li kuŝiĝis, li akiris kion li celis: trokuraĝa kaj malsaĝa juna kuniklo saltis en lian sakon, kaj Monsieur Kaĉjo, tuj kuntirinte la ŝnurojn, prenis kaj mortigis lin senkompate. Fiera pro sia predo, li portis ĝin al la palaco, kaj petis paroli kun lia Moŝto. Oni gvidis lin al supra etaĝo en la ĉambrojn de la Reĝo, kaj profunde riverencinte, li diris al li:

“Mi alportis al vi, sinjoro, kuniklon el la kuniklokampo, kiun



mia nobla Mastro, la Mastro de Karabaso” (ĉar tiun titolon Kaĉjo decidis doni al sia mastro) “ordonis ke mi donacu al via Moŝto en lia nomo.”

“Diru al via mastro,” diris la Reĝo, “ke mi dankas lin, kaj ke li multe plezurigas min.”

Alifoje li iris kaŝi sin inter iom da altekreska tritiko, ankoraŭ tenante sian sakon malferma; kaj, kiam paro da perdrikoj kuris en ĝin, li kuntiris la ŝnurojn, kaj tiel kaptis ilin ambaŭ. Li iris kaj

donacis ilin al la Reĝo, same kiel antaŭe la kuniklon kiun li kaptis en la kuniklokampo. La Reĝo, simile, akceptis la perdriklojn tre plezure, kaj ordonis doni al li iom da mono, por trinkaĵoj.

Dum du-tri monatoj la Kato daŭrigis porti al lia Moŝto, de tempo al tempo, predon kaptitan de lia mastro. Unu tagon, specife, kiam li sciis tutcerte ke li estos en la libera aero apud la rivero, kun sia filino, la plej bela princino en la mondo, li diris al sia mastro:

“Se vi obeos mian konsilon via fortune estos certa. Nur iru lavi vin en la rivero, en tiu parto kiun mi montros al vi, kaj lasu min fari ĉion alian.”

La Markizo de Karabaso faris kion konsilis al li la Kato, sen kompreni kial aŭ pro kio. Dum li lavis sin la Reĝo pasis, kaj la Kato komencis kii:

“Helpu! helpu! Mia Mastro Markizo de Karabaso dronos.”

Pro tiu bruoj la Reĝo elpuŝis sian kapon tra la fenestro de la kaleŝo, kaj vidinte ke temas pri la Kato kiu tiel ofte portis al li tiel bonan predon, li ordonis la siajn gardistojn ke ili iru tuj helpi lian Moŝton la Markizon de Karabaso. Dum ili tiris la povan Markizon el la rivero, la Kato venis al la kaleŝo kaj diris al la Reĝo ke, dum lia mastro lavis sin, venis kelkaj friponoj, kiuj forportis liajn vestojn, kvankam li kriis: “Rabistoj! rabistoj!” plurfoje, laŭeble plej laŭte.

Tiu ruza Kato kaŝis ilin sub grandan ŝtonon. La Reĝo tuj ordonis al la oficistoj de lia vestaro kuri alporti unu el liaj plej bonaj vestokompletoj por la Moŝto la Markizo de Karabaso.

La Reĝo dorlotis lin tre eksterordinare, kaj ĉar la elegantaj vestoj donitaj al li bonege vindigis lian figuron (ĉar li estis tre bonforma kaj korpe tre bela), la filino de la Reĝo sekrete ekdeziris lin, kaj la Markizo de Karabaso nur bezonis du-trifoje respekto-plene kaj iomete tenere rigardeti ŝin, kaj ŝi ege ekamis lin. La Reĝo insistis ke li venu en la kaleŝon kaj partoprenu en la liberaerado. La Kato, tre ĝoja vidante sian planon komenci sukceson, antaŭeniris, kaj renkontinte kelkajn samlandanojn, kiuj falĉadis en kampo, li diris al ili:

“Bonaj homoj, kiuj falĉas, se vi ne informos al Reĝon ke la kampo kiun vi falĉas apartenas al mia Moŝto Markizo de Karaba-

so, vi dishakiĝos en erojn tiel malgrandajn kiel herboj por la poto.”

Al la Reĝo ne mankis demandi al la falĉistoj al kiu apartenas la kampo kiun ili falĉas.

“Al mia Moŝto Markizo de Karabaso,” respondis ili ĉiuj samtempe, ĉar la minacoj de la Kato terure timigis ilin.

“Vidu, sinjoro,” diris la Markizo, “ĉi tiu kampo senescepte ĉiujare donas grandan rikolton.”

La Mastrokato, kiu ankoraŭ antaŭiris, renkontis kelkajn rikoltistojn, kaj diris al ili:

“Bonaj homoj, kiuj rikoltas, se vi ne informos la Reĝon ke la



tuta tritiko apartenas al mia Moŝto Markizo de Karabaso, vi dishakiĝos en erojn tiel malgrandajn kiel herboj por la poto.”

Al la Reĝo, kiu post momento pasis, ne mankis demandi al la rikoltistoj al kiu apartenas la multa tritiko kiun ili vidas.

“Al mia Moŝto Markizo de Karabaso,” respondis la rikoltistoj, kaj al la Reĝo tre multe plaĉis tio, ankaŭ al la Markizo, kiun li gratulis pro ĝi. La Mastrokato, kiu ĉiam antaŭiris, diris la samajn vortojn al ĉiuj renkontatoj, kaj la Reĝon mirigis la vasta bienaro de mia Moŝto Markizo de Karabaso.

Monsieur Kaĉjo fine venis al eleganta kastelo, kies mastro estis ogro, la plej riĉa ogro iam ekzistinta; ĉar ĉiuj bienoj kiujn la

Reĝo tiam transiras apartenas al ĉi tiu kastelo. La Kato, kiu zorgis informigi sin pri kiu estas tiu ogro kaj kion li povas fari, petis paroli kun li, dirante ke li ne povus pasi tiel proksime al lia kastelo sen la honoro respektoplene saluti lin.

La ogro akceptis lin tiel ĝentile kiel ogro kapablas, kaj sidigis lin.

“Oni certigis al mi,” diris la Kato, “ke vi kapablas ŝanĝi vin en kiajn ajn bestojn vi deziras; vi povas, ekzemple, transformi vin en leonon, aŭ elefanton, aŭ ion tian.”



“Estas vere,” respondis la ogro tre vigle; “kaj por konvinki vin, vi nun vidos min fariĝi leono.”

Kaĉjon tiom malfeliĉe teruris vidi leonon tiel proksime al li ke li tuj eniris la gutujon, ne sen abundaj problemoj kaj danĝero, pro siaj botoj, kiuj tute ne utilis al li por marŝado sur la tegoloj. Post nelonge, kiam Kaĉjo vidis ke la ogro jam reprenis sian naturan formon, li malsuprenvenis, kaj agnoskis ke li estis multe timoplena.

“Oni krome informis min,” diris la Kato, “sed mi ne scias ĉu

kredi, ke vi ankaŭ kapablas surprени la formon de la plej etaj bestoj; ekzemple, ŝanĝi vin en raton aŭ muson; sed mi devas agnoski antaŭ vi ke mi kredas tion neebla.”

“Neebla!” kriis la ogro: “vi tuj vidos tion.”

Kaj samtempe li ŝanĝis sin en muson, kaj komencis kuri sur la planko. Kaĉjo, tuj kiam li perceptis tion, ĵetis sin sur lin kaj manĝis lin.

Intertempe la Reĝo, kiu vidis, dum sia pasado, tiun belan kastelon de la ogro, decidis eniri ĝin. Kaĉjo, kiu aŭdis la bruon de



la kaleŝo de lia Moŝto ruliĝanta trans la baskulponton, elkuris, kaj diris al la Reĝo:

“Via Moŝto estas bonvena al ĉi tiu kastelo de mia Moŝto Markizo de Karabaso.”

“Kio! mia Moŝto Markizo,” kriis la Reĝo, “ĉu ankaŭ ĉi kastelo apartenas al vi? Ne povus ekzisti pli eleganta kortego kaj ĉiuj imponaj konstruaĵoj ĉirkaŭ ĝi; ni eniru ĝin, bonvolu.”

La Markizo donis sian manon al la Princino, kaj sekvis la Reĝon, kiu iris la unua. Ili paŝis en vastan halon, kie ili trovis

grandiozan manĝaĵaron, kiun la ogro estis preparinta por siaj amikoj, kiuj tiun saman tagon intencis viziti lin, sed ne aŭdacis eniri, sciante ke la Reĝo ĉeestas. Lian Moŝton plene ĉarmis la bonaj kvalitoj de mia Moŝto Markizo de Karabaso, ankaŭ lian filinon, kiu jam ekamis lin, kaj vidinte la vastan bienaron kiun li posedas, diris al li, trinkinte kvin aŭ ses glasojn:

“Kulpos nur vi mem, mia Moŝto Markizo, se vi ne estos mia bofilo.”

La Markizo, plurfoje profunde riverencinte, akceptis la honoron donitan al li de lia Moŝto, kaj tuj, jam tiun tagon mem, edzinigis la Princinon.

Kaĉjo fariĝis granda nobelo, kaj neniam denove ĉasis musojn, escepte de por distri sin.¹

¹Charles Perrault.

FELICIO KAJ LA POTO DA DIANTOJ

FOJE estis malriĉa laboristo kiu, sentante ke li ne multe pli longe vivos, volis dividi siajn posedaĵojn inter siaj filo kaj filino, kiujn li elkore amis.

Do li vokis ilin al si, kaj diris: “Via patrino portis al mi kiel sian doton du taburetojn kaj pajlan liton; mi havas, krome, kokinon, poton da diantoj, kaj arĝentan ringon, donitajn al mi de nobla damo kiu iam loĝis en mia povra dometo. Forirante ŝi diris al mi:

“Zorgu miajn donacojn, bonulo; atentu ne perdi la ringon nek forgesu akvumi la diantojn. Rilate al via filino, mi promesas al vi ke ŝi estos pli bela ol iu ajn kiun iam vi vidis en via vivo; nomu ŝin Felicio, kaj kiam ŝi estos kreskinta donu al ŝi la ringon kaj la poton da diantoj por konsoli ŝin pro ŝia malriĉeco.’ Prenu ilin ambaŭ, mia kara infano,” li pludiris, “kaj via frato havu ĉion alian.”

La du infanoj ŝajnis tre kontentaj, kaj post la morto de sia patro ili ploris pro li, kaj dividis liajn posedaĵojn kiel li diris al ili. Felicio kredis ke ŝia frato amas ŝin, sed kiam ŝi sidiĝis sur unu el la taburetoj li diris kolere:

“Tenu vian poton da diantoj kaj vian ringon, sed ne tuŝu miajn posedaĵojn. Mi ŝatas bonordon en mia domo.”

Felicio, kiu estis tre mildmaniera, diris nenion, sed stariĝis plorante nelaŭte; dum Bruno, ĉar tiel nomiĝis ŝia frato, manĝis bongustegan ovon, kaj li ĵetis la ŝelon al Felicio, dirante:

“Jen, nur tion mi povas doni al vi; se ĝi ne plaĉas al vi, eliru kapti ranojn; estas multe da ili en la proksima marĉo.” Felicio ne respondis, sed ŝi ploris ankoraŭ pli amare, kaj foriris al sia propra ĉambreto. Ŝi trovis ĝin plena de la dolĉaodoro de la diantoj, kaj, irinte al ili, ŝi diris malĝoje:

“Belaj diantoj, vi estas tiel dolĉaj kaj tiel belaj, vi estas la sola

konsolo kiun mi havas. Estu tute certaj ke mi bone prizorgos vin, kaj akvumos vin bone, kaj neniam permesos ke iu kruela mano ŝiru vin de viaj tigoj.”

Dum ŝi klinis sin super ili ŝi rimarkis ke ili estas tre sekaj. Do, preninte sian kruĉon, ŝi kuris en la klara lunlumo al la fontano, kiu estis iomete distanca. Atinginte ĝin ŝi sidiĝis sur la bordo por ripozi, sed apenaŭ ŝi faris tion, ŝi vidis imponan virinon veni ŝia-direkte, ĉirkaŭate de multaj servistinoj. Ses ĉefservistinoj portis ŝian trenajon, kaj ŝi apogis sin per la brako de alia.

Kiam ili proksimiĝis al la fonto baldakeno sterniĝis por ŝi, kaj sub ĝi metiĝis sofo el orŝtofo, kaj baldaŭ delikata manĝo estis prezentita, kaj baldaŭ delikata manĝo estis prezentita, kaj kristalo, dum la vento en la arboj kaj la falanta akvo de la fontano murmuris plej dolĉan muzikon.



Felicio, kaŝita en la ombro, estis tro surprizita de ĉio vidata por moviĝi; sed post kelkaj momentoj la Reĝino diris:

“Mi kredas vidi ŝafistinon apud tiu arbo; petu ŝin veni ĉi tien.”

Do Felicio antaŭenvenis kaj salutis la Reĝinon timide, sed tiom gracie ke ĉiuj surpriziĝis.

“Kion vi faras ĉi tie, mia bela infano?” demandis la Reĝino. “Ĉu vi ne timas rabistojn?”

“Ha! sinjorino,” diris Felicio, “malriĉa ŝafistino kiu havas nenion perdeblan ne timas rabistojn.”

“Do vi ne estas tre riĉa, ĉu?” diris la Reĝino ridetante.

“Mi estas tiel malriĉa,” respondis Felicio, “ke poto da diantoj kaj arĝenta ringo estas miaj solaj posedaĵoj en la mondo.”

“Sed vi havas koron,” diris la Reĝino. “Kion vi dirus se iu volus ŝteli tion?”

“Mi ne scias kiel estas kiam oni perdas sian koron, sinjorino,” ŝi respondis; “sed mi ĉiam aŭdis ke sen koro oni ne povas vivi, kaj se ĝi estas rompita oni nepre mortas; kaj malgraŭ mia malriĉeco mi bedaŭrus ne vivi.”

“Vi plene pravas prizorgi vian koron, belulino,” diris la Reĝino. “Sed diru al mi, ĉu vi manĝis?”

“Ne, sinjorino,” respondis Felicio; “mia frato manĝis ĉion manĝeblan.”

Do la Reĝino ordonis pretigi lokon por ŝi ĉe la tablo, kaj ŝi mem ŝarĝis la teleron de Felicio per bonaj manĝaĵoj; sed ŝi tro miregis por manĝi.

“Mi volas scii kion vi celis ĉe la fontano tiel malfrue,” diris la Reĝino baldaŭ.

“Mi venis plenigi kruĉon per akvo por miaj diantoj, sinjorino,” ŝi respondis, klinante sin por preni la kruĉon kiu staris apud ŝi; sed kiam ŝi montris ĝin al la Reĝino ŝin ege surprizis vidi ke ĝi fariĝis ora, scintilis grandaj diamantoj, kaj la akvo, da kiu ĝi estis plena, estis pli belodora ol la plej dolĉaj rozoj. Ŝi timis preni ĝin ĝis la Reĝino diris:

“Ĝi estas via, Felicio; iru akvumi viajn diantojn per ĝi, kaj ĝi memorigu al vi ke la Reĝino de la Arbaro estas via amiko.”

La ŝafistino ĵetis sin al la piedoj de la Reĝino, kaj humile dankis ŝin pro ŝiaj graciaj vortoj.

“Ha! sinjorino,” ŝi kriis, “se mi povus peti vin resti ĉi tie dum momento mi kurus porti mian poton da diantoj al vi—ili ne povus iri en pli bonajn manojn.”

“Iru, Felicio,” diris la Reĝino, karesante ŝian vangon leĝere; “mi atendos ĝis via reveno.”

Do Felicio prenis sian kruĉon kaj kuris al sia ĉambreto, sed dum ŝia foresto Bruno eniris kaj prenis la poton da diantoj, kaj lasis grandan brasikon en ĝia loko. Vidante la misfortunan brasikon Felicio multe malĝojiĝis, kaj ŝi ne sciis kion fari; sed fine ŝi rekuris al la fontano, kaj, surgenue antaŭ la Reĝino, diris:

“Sinjorino, Bruno ŝtelis mian poton da diantoj, do mi havas nenion escepte de mia arĝenta ringo; sed mi petas ke vi akceptu ĝin kiel pruvon pri mia dankemo.”

“Sed se mi prenos vian ringon, mia bela ŝafistino,” diris la Reĝino, “nenio restos al vi; kaj kion vi do faros?”

“Ha! sinjorino,” ŝi respondis simple, “se mi havos vian amikecon mi tre bone statos.”

Do la Reĝino prenis la ringon kaj surfingrigis ĝin, kaj eniris sian ĉaron, kiu konsistis el koralo inkrustita per smeraldoj, kaj estis tirata de ses laktoblankaj ĉevaloj. Kaj Felicio rigardis ŝin ĝis la serpentumado de la arbara pado kaŝis ŝin de ŝi, kaj post tio ŝi reiris al la dometo, pripensante ĉiujn mirindaĵojn okazintajn.

Ŝia unua ago kiam ŝi atingis sian ĉambron estis ĵeti la brasikon el la fenestro.

Sed ŝin tre multe surprizis aŭdi kuriozan voĉeton krei: “Ho! mi estas duone mortigita!” kaj ŝi ne povis konstati el kie ĝi venis, ĉar brasikoj kutime ne parolas.

Tuj je la taglumiĝo, Felicio, kiu estas tre trista pro sia poto da diantoj, eliris serĉi ĝin, kaj ŝi unue trovis la misfortunan brasikon. Ŝi puŝis ĝin per sia piedo, dirante: “Kion vi faras ĉi tie, kaj kial vi aŭdacis meti vin en la lokon de mia poto da diantoj?”

“Se mi ne estus portita,” respondis la brasiko, “estu certa ke mi ne elpensus iri tien.”

Timotremigis ŝin aŭdi la brasikon paroli, sed li pludiris:

“Se vi bonvolos replanti min apud miaj kamaradoj, mi povas diri al vi kie viaj diantoj estas ĉimomente—kaŝitaj en la lito de Bruno!”

Felicio malesperis aŭdante tion, ne sciante kiel reakiri ilin. Sed ŝi replantis la brasikon tre afable en lian malnovan lokon, kaj, fininte tion, ŝi vidis la kokinon de Bruno, kaj diris, kaptante ĝin:

“Venu ĉi tien, ulaĉo! vi suferos pro la malkomplezaĵoj faritaj al mi de mia frato.”

“Ha! ŝafistino,” diris la kokino, “ne mortigu min; mi estas tre klaĉema, kaj mi povas diri al vi kelkajn surprizaĵojn kiujn vi volonte aŭdos. Ne supozu ke vi estas la filino de la malriĉa laboristo kiu prizorgis vin; via patrino estis reĝino kiu jam havis ses filinojn, kaj la Reĝo minacis ke krom se ŝi naskos filon por heredi lian

regnon ŝia kapo estos detranĉita.

“Do kiam la Reĝino naskis plian filinon ŝi multe timis, kaj interkonsentis kun sia fratino (kiu estis feino) interŝanĝi ŝin por



la fileto de la feino. Nu, la Reĝino estis fermita en grandan turon laŭ ordono de la Reĝo, kaj post la forpaso de multaj tagoj ankoraŭ ŝi aŭdis nenion de la Feino do ŝi eskapis tra la fenestro per ŝnura eskalo, kunprenante sian bebeton. Disvaginte ĝis ŝi estis duone morta pro frido kaj laco ŝi atingis ĉi dometon. Mi estis la edzino de la laboristo, kaj estis bona vartistino, kaj la Reĝino konfidis vin al mi, kaj diris al mi ĉiuj siajn misfortunojn, kaj poste ŝi mortis antaŭ

ol havi sufiĉan tempon por diri kio okazu al vi.

“Ĉar dum mia tuta vivo mi neniam povis gardi sekreton, mi ne povis ne diri tiun strangan rakonton al miaj najbaroj, kaj unu tagon bela damo venis ĉi tien kaj mi rakontis ĝin ankaŭ al ŝi. Kiam mi finis rakonti ŝi tuŝis min per sceptro kiun ŝi tenis per sia mano, kaj tuj mi fariĝis kokino, kaj tiel finiĝis mia parolado! Mi estis tre malfeliĉa, kaj mia edzo, kiu forestis dum tio okazis, neniam sciis kio okazis al mi. Serĉinte min ĉie li ekkredis ke sendube mi dronis, aŭ min manĝis sovaĝaj bestoj en la arbaro. Tiu sama damo venis ĉi tien unufoje pli, kaj ordonis nomi vin Felicio, kaj ŝi postlasis la ringon kaj la poton da diantoj por transdono al vi; kaj dum ŝi estis en la domo dudek kvin gardistoj de la Reĝo venis serĉi vin, sendube intencante mortigi vin; sed ŝi murmuris kelkajn vortojn, kaj tuj ili ĉiuj fariĝis brasikoj. Vi ĵetis unu el ili el via

fenestro hieraŭ.

“Mi ne scias kial li povis paroli—ĝis nun mi neniam aŭdis iun el ili diri eĉ vorton, nek mi mem povis paroli ĝis nun.”

La Princinon multe mirigis la rakonto de la kokino, kaj ŝi diris afable: “Mi vere kompatas vin, mia povra vartistino, kaj volegas ke mi povu redoni al vi vian naturan formon. Sed ni ne mal-esperu; ŝajnas al mi, post via rakonto, ke io neeviteble baldaŭ okazos. Ĝuste nun, tamen, mi devas iri serĉi miajn diantojn, kiujn mi amas pli ol ĉion alian en la mondo.”

Bruno estis forinta en la arbaron, lin tute ne trafis supozo ke Felicio serĉos la diantojn en lia ĉambro, kaj ŝin ĝojigis lia ne-anticipita foresto, kaj ŝi kredis ke ŝi povos rehavi ilin sen pliaj problemoj. Sed enirinte la ĉambron ŝi tuj vidis teruran armeon da ratoj, kiuj gardas la pajlan liton; kaj kiam ŝi provis proksimiĝi al ĝi ili saltis kontraŭ ŝin, mordante kaj gratante furioze. Terurite, ŝi retiris sin, kriante: “Ho! miaj karaj diantoj, kiel vi povas resti ĉi tie inter tiaj aĉaj kompanoj?”

Subite ŝi ekpensis pri la kruĉo da akvo, kaj, esperante ke ĝi havas ian magian povon, ŝi kuris preni ĝin, kaj ŝutis kelkajn gutojn sur la ferocaspektan svarmon da ratoj. Post momento nek vosto nek barba haro estis videbla. Ĉiu kuris al sia truo tiel rapide kiel lin povis porti liaj kruroj, tiel ke la Princino povis sekure preni sian poton da diantoj. Ŝi trovis ilin preskaŭ mortantaj pro manko de akvo, kaj haste verŝis la ceteran akvon el la kruĉo sur ilin. Dum ŝi klinis sin super ili, ĝuante ilian bonegan odoron, leĝera voĉo, kiu ŝajnis murmuri inter la folioj, diris:

“Bela Felicio, fine venis la tago kiam mi povas ĝui la feliĉon diri al vi ke eĉ la floroj amas vin kaj ĝuas vian belecon.”

La Princino, plene frapite de la strangeco aŭdi brasikon, kokinon, kaj dianton paroli, kaj terurite vidi armeon da ratoj, ekpaliĝis kaj svenis.

Tiumomente envenis Bruno. Forta laboro en la varmego ne plibonigis lian humoron, kaj kiam li vidis ke Felicio sukcesis trovi siajn diantojn li tiom koleris ke li trenis ŝin en la ĝardenon kaj fermis la pordon kontraŭ ŝi. La freŝa aero baldaŭ instigis ŝin malfermi siajn belajn okulojn, kaj jen antaŭ ŝi staras la Reĝino de la Arbaro, tiel ĉarmaspekta kiel antaŭe.

“Vi havas fikondutan fraton,” ŝi diris; “mi vidis kiel kruele li elpelis vin. Ĉu mi punu lin pro tio?”

“Ha! ne, sinjorino,” ŝi diris, “mi ne koleras kontraŭ li.”

“Sed supozu ke li efektive ne estas via frato, kion tiuokaze vi dirus?” demandis la Reĝino.

“Ho! sed mi kredas ke nepre li estas mia frato,” diris Felicio.

“Kio!” diris la Reĝino, “ĉu vi ne aŭdis ke vi estas princino?”

“Tiel estas dirite al mi antaŭ kelka tempo, sinjorino, sed kiel mi povus kredi tion tute sen pruvo?”

“Ha! kara infano,” diris la Reĝino, “via parolmaniero certigas al mi ke, malgraŭ via humila vivo, vi efektive estas reala princino, kaj mi povas certigi ke neniam oni denove traktos vin tiel.”

Ŝin interrompis tiumomente la alveno de tre bela junulo. Li surhavis mantelon el verda veluro ligitan per smeraldaj agrafoj, kaj havis kronon de diantoj sur sia kapo. Li surgenuiĝis kaj kisis la manon de la Reĝino.

“Ha!” ŝi kriis, “mia dianto, mia kara filo, kiel feliĉige estas vidi vin denove en via natura formo pro la helpo de Felicio!” Kaj ŝi ĉirkaŭbrakis lin ĝoje. Post tio ŝi turnis sin al Felicio kaj diris:

“Ĉarma Princino, mi scias kion diris al vi la kokino, sed vi ne povas esti aŭdinta ke la zefiroj, al kiu estis konfidita la tasko porti mian filon al la turo kie la Reĝino via patrino, tiom fervore atendis lin, lasis lin anstataŭe en florigardeno, dum ili forflugis informi vian patrinon. Tiam feino kun kiu mi estas kverelinta ŝanĝis lin en dianton, kaj mi povis nenion fari por malebligi tion.

“Vi imagu kiom mi koleris, kaj kiel mi penis trovi ian rimedon por malfari la misagojn de ŝi; sed nenia rimedo eblis. Mi nur povis porti Princon Dianton al la loko kie vi kreskas, esperante ke kiam vi estos plenkreskinta li amos vin, kaj per via zorgo li re-akiros sian naturan formon. Kaj vi vidas ke ĉio efektiviĝis konforme al mia espero. Kiam vi donis al mi la arĝentan ringon tio estis signo ke la potenco de la sorĉo estis preskaŭ finita, kaj la lasta oportuno de mia malamiko estas timigi vin per sia armeo de ratoj. Tion ŝi ne sukcesis fari; do nun, mia kara Felicio, se vi edzigos mian filon per ĉi tiu arĝenta ringo via estonta feliĉeco estas certa. Ĉu vi kredas lin sufiĉe bela kaj afabla por voli edzigi lin?”

“Sinjorino,” respondis Felicio, ruĝiĝante, “vi superfortas min

per via afableco. Mi scias ke vi estas la fratino de mia patrino, kaj ke per via arto vi ŝanĝis en brasikojn la soldatojn senditajn mortigi min, kaj mian vartistinon en kokinon, kaj ke vi nur tro honoras min per la propono ke mi edzigu vian filon. Kiel mi povas klarigi al vi la kaŭzon de mia hezito? Mi sentas, la unuan fojon en mia vivo, kiom feliĉigus min esti amata. Ĉu vi vere povas doni al mi la koron de la princo?”



“Ĝi jam estas via, bela Princino!” li kriis, prenante ŝian manon per sia; “sen la terura sorĉo kiu silentigis min mi jam antaŭ longe estus dirinta al vi kiom elkore mi amas vin.”

Tio tre feliĉigis la Princinon, kaj la Reĝino, kiu ne povis toleri vidi ŝin vestita kiel malriĉa ŝafistino, tuŝis ŝin per sia sceptro, dirante:

“Mi volas ke vi estu vestita konforme al viaj rango kaj beleco.”

Kaj tuj la katuna robo de la Princino fariĝis grandioza robo el arĝenta brokaĵo brodita per karbunkoloj, kaj ŝian molan malhelan hararon cirkulis krono el diamantoj, el kiu flosis klara blanka vualo. Pro siaj brilantaj okuloj, kaj la ĉarma koloro en ŝiaj vangoj, ŝi estis ensume tiel blindiga vidaĵo ke la Princo apenaŭ povis toleri ĝian brilon.

“Kiom bela vi estas, Felicio!” li kriis. “Ne dubigu min, mi petas; diru ke vi edzigos min.”

“Ha!” diris la Reĝino, ridetante, “mi kredas ke ŝi ne rifuzos nun.”

Ĝuste tiam Bruno, kiu reiradis al sia laboro, venis el la dometo, kaj kredis sonĝi kiam li vidis Felicion; sed ŝi vokis lin tre afable, kaj petis la Reĝinon kompati lin.

“Kion?” ŝi diris, “kvankam li tiom malamikis al vi?”

“Ha! sinjorino,” diris la Princino, “mi estas tiel feliĉa ke mi volas ke ankaŭ ĉiu alia estu feliĉa.”

La Reĝino kisis ŝin, kaj diris: “Nu, por plaĉi vin, mi trovu kion mi povas fari por ĉi tiu kolerema Bruno.” Kaj farante geston per sia sceptro ŝi ŝanĝis la povran dometon en grandiozan palacon, plenan de trezoroj; nur la du taburetoj kaj la pajla lito restis samaj kiel antaŭe, por memori al li lian antaŭan malriĉecon. Post tio la Reĝino tuŝis Brunon mem, kaj estigis lin milda kaj ĝentila kaj dankema, kaj li dankis ŝin kaj la Princinon milfoje. Fine, la Reĝino redonis al la kokino kaj la brasikoj iliajn naturajn formojn, kaj postlasis ilin ĉiujn tre kontentaj. La Princo kaj la Princino geedziĝis laŭeble plej baldaŭ tre pompe, kaj vivis feliĉe por ĉiam poste.¹

¹*Fortunée.* Par Madame la Comtesse d'Aulnoy.

LA BLANKA KATO

FOJE estis reĝo kiu havis tri filojn kiuj ĉiuj estis tiel lertaj kaj kuraĝaj ke li komencis timi ke ili volos regi la regnon jam antaŭ ol li mortos. Nu, la Reĝo, kvankam li sentis sin maljuniĝanta, tute ne volis cedi la regadon de sia regno dum li ankoraŭ povas tute bone mastri ĝin, do li pensis ke la plej bona metodo vivi pace estos distri la mensojn de siaj filoj per promesoj kiujn li facile povos malplenumi kiam venos la tempo plenumi ilin.

Do li alvokis ilin ĉiujn, kaj, afable parolinte al ili, li pludiris:

“Vi certe konsentos kun mi, miaj karaj infanoj, ke mia granda aĝo malebligas ke mi atentu miajn ŝtataferojn tiel zorge kiel antaŭe. Mi komencas timi ke tio eble misefikos la bonstaton de miaj regatoj, tial mi volas ke unu el vi havu mian kronon; sed kompanse pro tia donaco estas ja juste ke vi faru ion por mi. Nu, ĉar mi pripensas emerite loĝi en la kamparo, ŝajnas al mi ke bela, vigla, fidela hundeto estos tre bona kompano por mi; do, tute sen atenti viajn aĝojn, mi promesas ke tiu kiu portos al mi la plej belan hundeton tuj fariĝos Reĝo anstataŭ mi.”

La tri Princojn multe surprizis la subita deziro de sia patro al hundeto, sed ĉar per tio la du pli junaj havis oportunon fariĝi reĝo, kiun ili alie ne havus, kaj ĉar la plej aĝa estis tro ĝentila por oponi, ili akceptis la komision plezure. Ili adiaŭis la Reĝon, kiu donis al ili donacojn el arĝento kaj valoraj ŝtonoj, kaj aranĝis rendevui ilin je la sama horo, en la sama loko, post la paso de unu jaro, por vidi la hundetojn kiujn ili estos portintaj por li.

Post tio ili iris kune al kastelo kiu estis iom for de la urbo, akompanate de ĉiuj siaj intimaj amikoj, por kiuj ili faris grandan bankedon, kaj la tri fratoj promesis esti ĉiam amikoj, dividi inter

si kian ajn bonfortunon ili trovos, kaj ne apartiĝi unu de la alia pro ia envio aŭ ĵaluzo; do ili eliris, interkonsentinte renkontiĝi ĉe la sama kastelo je la elektita tempo, por kune prezenti sin antaŭ la Reĝo. Ĉiu elektis aliajn vojon, kaj la du plej aĝaj renkontis multajn aventurojn; sed pri la plej juna vi aŭdos. Li estis juna, kaj gaja, kaj bela, kaj sciis ĉion kion devas scii princo; kaj rilate al lia kuraĝo, ĝi simple ne havis finon.

Apenaŭ pasis unu tago dum kiu li ne aĉetis plurajn hundojn—grandajn kaj malgrandajn, grejhundojn, dogojn, spanielojn,



kaj dorlothundojn. Aĉetinte belan hundon li tuj nepre vidis eĉ pli belan, kaj tial li devis senigi sin de ĉiuj aliaj kaj aĉeti tiun, ĉar, estante sola, li sciis ke estas neeble kunhavi tridek aŭ kvardek mil hundojn dum siaj veturoj. Li veturis de tago al tago, ne sciante kien li iras, ĝis fine, je la noktiĝo, li atingis grandan mornan arbaron. Li ne konis la vojon, kaj, des pli malbone, komencis tondri, kaj la pluvo ektorentis. Li elektis la unuan vojon kiun li povis trovi, kaj marŝinte tre longe li kredis vidi feblan lumon, kaj komencis esperi ke li venos al dometo kie li eble trovos ŝirmon

por la nokto. Fine, gvidate de la lumo, li atingis la domon de la plej glora kastelo kiun li povus imagi. Tiu pordo estis el oro kovrita per karbunkoloj, kaj la pura ruĝa lumo brilanta de ili estis montrinta al li la vojon tra la arbaro. La muroj estis el plej bona porcelano kun plej delikataj koloroj, kaj la Princo vidis ke ĉiuj rakontoj kiujn iam li legis estis bildigitaj sur ili; sed ĉar li estis ege terure malseka, kaj la pluvo ankoraŭ torentis, li ne povis resti rigardante pli, sed li revenis al la ora pordo. Tie li vidis piedon de cervo pendanta per ĉeno el diamantoj, kaj li komencis demandi al si kiu povus loĝi en tiel grandioza kastelo.

“Klare ili sentas sin tre sekuraj kontraŭ rabistoj,” li diris al si. “Kio malhelpus iun detranĉi tiun ĉenon kaj elĉizi tiujn karbunkolojn, kaj riĉigi sin per sia tuta vivo?”

Li tiris la piedon de cervo, kaj tuj arĝenta sonorilo sonis kaj la pordo ekmalfermiĝis, sed la Princo povis vidi nur nombron da manoj en la aero, el kiuj ĉiu tenas torĉon. Lin tiom surprizis ke li staris senmove, ĝis li sentis sin antaŭen puŝata de aliaj manoj, tiel ke, kvankam li estis iom maltrankvila, li ne povis ne antaŭenpaŝi. Tenante sian manon sur sia glavo, por esti preta por kio ajn okazos, li eniris halon pavumitan per lazurŝtonoj, dum du belaj voĉoj kantis:

*Vi vidas ke flosas la manoj,
Helpemaj al vi ili estos.
Se l' koro ne timas pri amoj,
Sekure ĉiloke vi restos.*

La Princo ne povis kredi ke post tia bonvenigo ia danĝero povus minaci lin, do, gvidate de la misteraj manoj, li marŝis al pordo el koralo, kiu malfermis sin mem, kaj li trovis sin en vasta halo el perlamoto, el kiu malfermiĝis aro da aliaj ĉambroj, scintilantaj pro miloj da lumoj, kaj plenaj de tiel belaj bildoj kaj valoraĵoj ke la Princo estis tre perpleksa. Trapasinte sesdek ĉambrojn la manoj kondukantaj lin haltis, kaj la Princo vidis ege komfortaspektan fotelon proksimigitan al la kamenangulo; sammomente la fajro ardigis sin, kaj la belaj, molaj, lertaj manoj deprenis la malsekajn kotkovritajn vestojn de la Princo kaj prezentis al li freŝajn vestojn el la plej riĉaj ŝtofoj, ĉiuj broditaj per oro kaj smeraldoj. Li ne

povis ne admiri ĉion vidatan, kaj la lertecon de la manoj servantaj lin, kvankam ili kelkfoje tiel subite ekaperis ke ili saltigis lin.

Kiam li estis tute preta—kaj mi povas certigi vin ke li aspektis tre malsimila al la malseka kaj laca Princo kiu antaŭe staris ekstere in la pluvo, kaj tiris la piedon de cervo—la manoj gvidis lin al grandioza ĉambro, sur kies muroj estis pentritaj la historioj de Kaĉjo en Botoj kaj aro da aliaj famaj katoj. La tablo estis pretigita por vespermanĝo per du oraj teleroj, kaj oraj kuleroj kaj forkoj, kaj la flankabreto estis kovrita per pladoj kaj kristalaj glasoj inkrustitaj per valoraj ŝtonoj. La Princo demandis al si por kiu povas esti la dua loko, kiam subite envenis ĉirkaŭ dek du katoj portantaj gitarojn kaj muzikrulaĵojn, kiuj poziciigis sin ĉe unu ekstremo de la ĉambro, kaj direktate de kato kiu batis la tempojn per papera rulaĵo komencis miaŭi laŭ ĉiu imagebla tonalo, kaj tiri siajn ungojn trans la kordojn de la gitaroj, farante la plej strangan muzikon aŭdeblan. La Princino haste ŝtopis siajn orelojn, sed eĉ post tio vidi tiujn komikajn muzikistojn ridegigis lin.

“Kian komikaĵon mi vidos nun?” li diris al si, kaj tuj la pordo malfermiĝis, kaj envenis eta figuro kovrita per longa nigra vualo. Ĝin kondukis du katoj surhavantaj nigrajn mantelojn kaj portantaj glavojn, kaj granda grupo de katoj sekvis, kiuj enportis kaĝojn plenajn de ratoj kaj musoj.

La Princon tiom surprizis ke li kredis ke nepre li sonĝas, sed la malgranda figuro venis al li kaj depuŝis sian vualon, kaj li vidis ke ĝi estas la plej bela malgranda blanka kato imagebla. Ŝi aspektis tre juna kaj tre trista, kaj per dolĉa voĉeto kiu rekte trafis lian koron ŝi diris al la Princo:

“Filo de Reĝo, vi estas bonvena; la Reĝinon de la Katoj ĝojigas vidi vin.”

“Damo Kato,” respondis la Princo, “mi dankas ke vi akceptas min tiel afable, sed certe vi ne estas ordinara kanjo? Vere, via parolmaniero kaj la grandiozezo de via palaco pruvas tion klare.”

“Reĝfilo,” diris la Blanka Kato, “mi petas ĉesigi tiajn komplimentojn, ĉar mi ne kutimas al ili. Sed nun,” ŝi aldonis, “oni enportu la manĝaĵojn, kaj la muzikistoj silentu, ĉar la Princo ne komprenas kion ili diras.”

Do la misteraj manoj komencis enporti la manĝaĵojn, kaj

unue ili metis sur la tablon du pladojn, el kiuj unu enhavis stufon el kolomboj kaj la alia frikasitajn dikajn musojn. Vidante ĉi tiujn la Princo senvole sentis ke li neniel povos ĝui la manĝon; sed la Blanka Kato vidante tion certigis al li ke la pladoj intencataj por li estis preparitaj en aparta kuirejo, kaj li estu tutcerta ke ili enhavas nek ratojn nek musojn; kaj la Princo estis tiel firme konvinkita ke ŝi ne trompus lin ke li neniom pli hezitis ekmanĝi. Baldaŭ li rimarkis ke sur la piedeto apud li la Blanka Kato portas braceleton en kiu estas portreto, kaj li petis permeson rigardi ĝin.



Surprizigate li trovis ke ĝi montras ege belan junulon kiu tiom similas al li ke ĝi povus esti portreto de li mem! La Blanka Kato ĝemis dum li rigardis ĝin, kaj aspektis eĉ pli trista ol antaŭe, kaj la Princo ne aŭdacis demandi al ŝi pri tio ĉar li timis malplaĉi al ŝi; do li komencis paroli pri aliaj temoj, kaj trovis ke ŝin interesas ĉiuj temoj pri kiuj li mem interesiĝas, kaj ŝajne scias tre bone ĉion okazantan en la mondo. Post la manĝo ili eniris alian ĉambron, kiu estis meblita kiel teatro, kaj la katoj aktoris kaj dancis por distri ilin, kaj post tio la Blanka Kato diris bonan nokton al li, kaj

la manoj gvidis lin en ĉambron kiun li antaŭe ne vidis, en kiu pendis murtapiŝoj inkrustitaj per papiliflugiloj ĉiukoloraj; estis speguloj etendiĝantaj de la plafono ĝis la planko, kaj malgranda blanka lito kun gazaj kurtenoj ligitaj per rubandoj. La Princo enlitiĝis silente, ĉar li vere ne scipovis komenci konversacion kun la manoj kiuj servas lin, kaj en la matenon lin vekis bruo kaj konfuzo ekster lia fenestro, kaj la manoj venis kaj rapide vestis lin per ĉaskostumo. Kiam li elrigardis, ĉiuj katoj estis kunvenintaj en la korton, kelkaj havis grejhundojn, kelkaj blovis kornojn, ĉar la Blanka Kato eliros ĉasi. La manoj gvidis lignan ĉevalon al la Princo, kaj ŝajne supozis ke li rajdos ĝin, pro kio li multe indignis; sed ne utilis liaj kontraŭdiroj, ĉar li rapidis trovis sin sur ĝia dorso, kaj ĝi forfrancis portante lin.

La Blanka Kato mem rajdis simion, kiu grimpis eĉ ĝis la nestoj de la agloj kiam ŝi emis manĝi la junajn aglidojn. Neniam okazis pli plezuriga ĉasfesto, kaj reveninte al la kastelo la Princo kaj la Blanka Kato kune manĝis same kiel antaŭe, sed post kiam ili finis manĝi ŝi proponis al li kristalan kalikon, kiu evidente enhavis magian trinkaĵon, ĉar tuj kiam li glutis ĝian enhavon li forgesis ĉion, eĉ la hundeton kiun li serĉas por la Reĝo, kaj pensis nur pri kiel feliĉigas esti kun la Blanka Kato! Kaj tiel pasis la tagoj, per ĉia distro, ĝis la jaro preskaŭ plene pasis. La Princo estis plene forgesinta ke li devos renkonti siajn fratojn: li eĉ ne sciis al kiu lando li apartenas; sed la Blanka Kato sciis kiam li devos reiri, kaj unu tagon ŝi diris al li:

“Ĉu vi scias ke restas al vi nur tri tagoj por serĉi la hundeton por via patro, kaj ke viaj fratoj trovis belajn hundojn?”

Tiam la Princo ekreakiris sian memoron, kaj kriis:

“Kio povus forgesigi al mi tian gravaĵon? Mia tuta fortune dependas de ĝi; kaj eĉ se mi povus dum tiel mallonga periodo trovi hundon sufiĉe belan por gajni por mi regnon, kie mi trovus ĉevalon kiu povos porti min tiun grandan distancon dum tri tagoj?” Kaj li komencis esti tre ĉagrenita. Sed la Blanka Kato diris al li: “Reĝfilo, ne ĝenu vin; mi estas via amiko, kaj mi faciligos ĉion por vi. Vi povos resti ĉi tie ankoraŭ unu tagon, ĉar la bona ligna ĉevalo povos porti vin al via lando dum dek du horoj.”

“Mi dankas vin, bela Kato,” diris la Princo; “sed kiel utilis al

mi reiri se mi ne havos hundon porteblan al mia patro?”

“Vidu,” respondis la Blanka Kato, montrante glanon; “estas pli bela hundo en ĉi tio ol en la Hundo-stelo!”

“Ho! Blanka Kato kara,” diris la Princo, “kiom malafabla vi estas, mokante min nun!”

“Nur aŭskultu,” ŝi diris, tenante la glanon apud lia orelo.

Kaj el ĝia interno li klare aŭdis voĉeton diri: “Boj! boj!”

La Princo ĝojegis, ĉar la hundo fermebla en glanon nepre estas tre malgranda. Li volis elpreni ĝin kaj rigardi ĝin, sed la Blanka Kato diris ke estos pli bone ke li ne malfermu la glanon antaŭ ol esti antaŭ la Reĝo, por ke la hundeto ne sentu malvarmon dum la veturo. Li dankis ŝin milfoje, kaj adiaŭis tre triste kiam venis la horo por lia foriro.

“La tagoj pasis tiel rapide kun vi,” li diris, “mi volas nur povi kunpreni vin nun.”

Sed la Blanka Kato kapneis kaj profunde ĝemis responde.

Konsekvence la Princo atingis la kastelon la unua, kie li estis konsentinta renkonti siajn fratojn, sed ili post nelonge alvenis, kaj gapis miregante kiam ili vidis la lignan ĉevalon en la korto salti kiel ĉasbesto.

La Princo renkontis ilin ĝoje, kaj ili komencis rakonti al li ĉiujn siajn aventurojn; sed li sukcesis kaŝi de ili kion li faradis, kaj eĉ kredigis al ili ke turnostanga hundo kiun li havis estas la hundo kiun li alportas por la Reĝo. Kvankam ili ĉiuj amis unu la alian, la du plej aĝaj ne povis ne ĝoji ke iliaj hundoj nepre estos pli bonŝancaj. La sekvan matenon ili eliris en unusama ĉaro. La pli aĝaj fratoj portis en korboj du hundojn tiel etajn kaj fragilajn ke ili preskaŭ timis tuŝi ilin. Rilate al la turnostanga hundo, li postkuris la ĉaron, kaj tiel kovriĝis per koto ke oni apenaŭ povis vidi kia li estas. Kiam ili atingis la palacon ĉiuj premis sin ĉirkaŭ ilin dum ili eniris la grandan halon de la Reĝo; kaj kiam la du fratoj prezentis siajn hundetojn neniu povis decidi kiu estas pli bela. Ili jam komencis aranĝi inter si dividi la regnon egale, kiam la plej juna antaŭenpaŝis kaj tiris el sia poŝo la glanon kiun donis al li la Blanka Kato. Li rapide malfermis ĝin, kaj jen ili vidis ke sur blanka kuseno estas hundo tiel malgranda ke facile oni trametus ĝin tra ringon. La Princo metis ĝin sur la teron, kaj ĝi tuj stariĝis kaj

komencis danci. La Reĝo ne sciis kion diri, ĉar estis neeble ke io povus esti pli bela ol tiu besteto. Tamen, ĉar li ne emis haste fordoni sian kronon, li diris al siaj filoj ke, ĉar ili tiom sukcesis la unuan fojon, li petas ilin denove foriri, kaj serĉi surtere kaj surmare pecon de muslino tiel fajna ke oni povas tiri ĝin tra la trueton en kudrilo. La fratoj ne tre volonte reforiris, sed la du plej aĝaj konsentis ĉar tiel ili havos novan oportunon, kaj ili komencis kiel antaŭe. La plej juna denove suriris la lignan ĉevalon, kaj



rerajdis plenrapide al sia amata Blanka Kato. Ĉiu pordo de la kastelo estis malferma, kaj ĉiu fenestro kaj tureto estis iluminata, tiel ke ĝi aspektis pli belega ol antaŭe. La manoj hastis renkonti lin, kaj kondukis la lignan ĉevalon al la stalo, dum li enrapidis por trovi la Blankan Katon. Ŝi dormadis sur blanka satena kuseno, sed ŝi tre baldaŭ vigliĝis aŭdante la Princon, kaj ĝojegis revidi lin.

“Kiel mi povus esperi ke vi revenos al mi, Reĝfilo?” ŝi diris. Kaj li karesis ŝin, kaj rakontis al ŝi pri sia sukcesa veturo, kaj ke li

revenis por peti ŝin helpi, ĉar li kredas ke estas neeble trovi kion postulas la Reĝo. La Blanka Kato ekaspektis serioza, kaj diris ke ŝi devos pripensi kion fari, sed ke, bonŝance, estas kelkaj katoj en la kastelo kapablaj tre bone ŝpini, kaj ili povus sukcesi se la tasko estas sukcese farebla, kaj ŝi mem asignos al ili la taskon.

Ekaperis la manoj portante torĉojn, kaj ili kondukis la Princon kaj la Blankan Katon al longa galerio el kie eblas vidi la riveron, kaj tra la fenestroj de la galerio ili vidis belegan demonstron de piroteknikaĵoj ĉiaspecaj; post tio ili vespermanĝis, kaj tion ŝatis la Princo eĉ pli ol la piroteknikaĵojn, ĉar estis tre malfrue, kaj li malsatis post sia longa rajdado. Kaj tiel la tagoj pasis rapide kiel antaŭe; estis neeble enui kun la Blanka Kato, kaj ŝi havis grandan talenton inventi novajn distraĵojn—efektive, ŝi estis pli lerta ol rajtas esti kato. Sed kiam la Princo demandis al ŝi kiel estas ke ŝi estas tiom saĝa, ŝi diris nur:

“Reĝfilo, ne demandu al mi; divenu laŭplaĉe. Mi ne rajtas diri ion ajn al vi.”

La Princo tiom feliĉis ke lin ne ĝenis la tempopaso, sed baldaŭ la Blanka Kato diris al li ke la jaro jam forpasis, kaj ke li tute ne maltrankvilo pri la peco de muslino, ĉar ili tre bone faris ĝin.


“Ĉifoje,” ŝi aldonis, “mi povas doni al vi taŭgan eskorton;” kaj rigardante en la korton la Princo vidis superban kaleŝon el polurita oro, sur kiu estas mil emajlaj figuroj flamkoloraj. Ĝin tiris dek du neĝblankaj ĉevaloj, jungitaj kvarope; ilia garnituro estis el flamkolora veluro, brodita per diamantoj. Cent kaleŝoj sekvis, ĉiu estis tirata de ok ĉevaloj, kaj plena de oficiroj kun belegaj uniformoj, kaj mil gardistoj ĉirkaŭis la procesion. “Iru!” diris la Blanka Kato, “kaj kiam vi aperos antaŭ la Reĝo tiel lukse li certe ne rifuzos al vi la kronon kiun vi meritas. Kunprenu ĉi tiun juglandon, sed ne malfermu ĝin antaŭ ol esti antaŭ li, tiam vi trovos en ĝi la pecon de ŝtofo kiun vi petis de mi.”

“Bela Blankulineto,” diris la Princo, “kiel mi povas taŭge danki vin pro viaj komplezoj al mi? Nur diru al mi ke tion vi volas, kaj mi fordonos por ĉiam ĉian deziron esti reĝo, kaj mi restos ĉi tie kun vi eterne.”

“Reĝfilo,” ŝi respondis, “montras la bonecon de via koro ke vi tiel amas malgrandan blankan katon, kiu utilas por nenio krom

kapti musojn; sed vi devas ne resti.”

Do la Princo kisis ŝian piedeton kaj foriris. Vi povas imagi kiom rapide li veturis kiam mi diras al vi ke ili atingis la palacon de la Reĝo dum nur duono de la tempo kiun bezonis la ligna ĉevalo. Ĉifoje la Princo tiom malfruis ke li ne provis renkonti siajn fratojn ĉe ilia kastelo, do ili supozis ke li ne venas, kaj iom feliĉis pro tio, kaj montris siajn pecojn de muslino al la Reĝo fiere, certaj pri sukceso. Kaj vere la ŝtofo estis tre fajna, kaj trairis la trueton de tre granda kudrilo; sed la Reĝo, kiu tre volonte kaŭzis embarason, alportigis specifan kudrilon, kiu estis gardata inter la



Kronjuveloj, kaj kiu havis tiel malgrandan okuleton ke ĉiuj tuj vidis ke estas neeble ke la muslino trairus ĝin. La Princoj koleregis, kaj komencis plendi ke li trompis ilin, sed subite la trumpet-oj eksonis kaj envenis la plej juna Princo. Liajn patron kaj fratojn miregigis lia gloro, kaj salutinte ilin li prenis la juglandon el sia poŝo, plene anticipante trovi la pecon de muslino en ĝi, sed anstataŭe estis nur avelo. Li fendis ĝin, kaj en ĝi kuŝis ĉerizkerno. Ĉiuj rigardadis, kaj la Reĝo ridetis al si pro la ideo trovi pecon de muslino en nuksoŝelo.

Tamen, la Princo fendis la ĉerizkernon, kaj ĉiuj ridis kiam li

vidis ke en ĝi estas nur ĝia propra kerno. Li malfermis tion kaj trovis grajnon de tritiko, kaj en tio estis semo de milio. Li komencis dubi nun, kaj murmuris softe:

“Blanka Kato, Blanka Kato, ĉu vi mokas min?”

Tujtuje li sentis ke piedo de kato akre gratas lian manon, kaj esperante ke tio celas kuraĝigi lin li malfermis la milisemon, kaj tiris el ĝi pecon de muslino kvar cent ulnojn longan, teksitan kun plej belaj koloroj kaj plej okulfrapaj desegnoj; kaj kiam oni alportis la kudrilon ĝi trairis la trueton sesfoje tutfacile! La Reĝo paligis, kaj la aliaj Princoj staris silente kaj morne, ĉar neniu povus nei ke ĉi tiu estas la plej bonega peco de muslino trovebla en la mondo.

Baldaŭ la Reĝo turnis sin al siaj filoj, kaj diris, profunde ĝemante:

“Neniu povus konsoli min pli dum mia maljuneco ol konstati vian emon plenumi miajn dezirojn. Do denove foriru, kaj kiu fine de jaro povos reporti la plej belan principinon edzinigos ŝin, kaj, tute sen plia atendo, ricevos la kronon, ĉar mia posteulo nepre devos esti edzo.” La Princo opiniis ke li jam tute juste meritas la regnon duoble, sed li estis tro ĝentila por disputi pri tio, do li nur reiris al sia belega kaleŝo, kaj, ĉirkaŭate de sia eskorto, reiris al la Blanka Kato pli rapide ol li estis veninta. Ĉifoje ŝi anticipis lin, sur la vojon floroj estis ŝutitaj, kaj mil braĝuoj bruligadis odorajn lignojn kiuj parfumis la aeron. Sidante en galerio de kie ŝi povis vidi lian alvenon, la Blanka Kato atendis lin. “Nu, Reĝfilo,” ŝi diris, “jen vi denove, sen krono.” “Sinjorino,” diris li, “dank’ al via malavaremo mi jam meritas ĝin duoble; sed efektive mia patro tiom malemas transdoni ĝin ke al mi preni ĝin donus nenian plezuron.”

“Ne gravas,” ŝi respondis; “estas egale bone peni meriti ĝin. Ĉar vi devos reporti belan principinon kun vi la venontan fojon mi atente serĉos por vi. Intertempe ni ĝuu; ĉinokte mi ordonis batalon inter miaj katoj kaj la riverratoj, cele distri vin.” Do la jaro rapide pasis eĉ pli plaĉe ol la antaŭaj. Kelkfoje la Princo ne povis ne demandi al la Blanka Kato kiel estiĝis ŝia kapablo paroli.

“Eble vi estas feino,” li diris. “Aŭ ĉu iu sorĉisto ŝanĝis vin en katon?”

Sed ŝiaj respondoj al li nur klarigis nenion. La tagoj pasas tiel

rapide kiam oni estas feliĉa ke estas certe ke la Princo tute ne pensus pri la bezono reiri, sed unu vesperon dum ili kune sidis la Blanka Kato diris al li ke se li volas kunpreni belan princinon hejmen la sekvan tagon li devos akcepti fari tion kion ŝi ordonos al li.

“Prenu ĉi glavon,” ŝi diris, “kaj detranĉu mian kapon!”

“Mi!” kriis la Princo, “mi detranĉu vian kapon? Blankulineto amata, kiel mi povus?”

“Mi petegas vin agi laŭ mia ordono, Reĝfilo,” ŝi respondis.



Larmoj fluis en la okuloj de la Princo dum li petegis ŝin ordoni ion ajn alian—devigi lin fari kiun ajn taskon laŭ ŝia deziro kiel pruvon de fideleco, sed evitigi al li la malĝojon mortigi sian amatan Kanjon. Sed nenio dirita de li povis ŝanĝis ŝian firman decidon, kaj fine li tiris sian glavon, kaj malespere, per tremanta mano, detranĉis la malgrandan blankan kapon. Sed imagu lian miron kaj ĝojon kiam subite bela princino staris antaŭ li, kaj, dum li estis ankoraŭ neparolpova pro miro, la pordo malfermiĝis kaj granda nombro da kavaliroj kaj damoj eniris, kaj ĉiu portis

kathaŭton! Ili hastis al la Princino, evidente ĝojaj, kisante ŝian manon kaj gratulante ŝin ĉar ŝi denove reakiris sian naturan formon. Ŝi akceptis ilin gracie, sed post kelkaj minutoj petis ke ili lasu ŝin sola kun la Princo, al kiu ŝi diris:

“Komprenu, Princo, ke vi prave supozis min ne ordinara kato. Mia patro regis ses regnojn. La Reĝino, mia patrino, kiun li elkore amis, pasiis veturadi kaj esploradi, kaj kiam mi aĝis nur kelkajn semajnojn ŝi akiris lian permeson viziti certan monton pri kiu ŝi aŭdis multajn mirigajn rakontojn, kaj ŝi eliris, kunprenante nombron da siaj servistoj. Survoje ili devis pasi proksime al malnova kastelo apartenanta al la feoj. Neniu iam estis en ĝi, sed laŭdire ĝi estis plena de veraj mirindaĵoj, kaj mia patrino memoris esti aŭdinta ke la feoj havas en sia ĝardeno fruktojn kiajn oni povas vidi kaj gustumi nenie alie. Ŝi komencis voli mem provi ilin, kaj turnis siajn paŝojn direkte al la ĝardeno. Atinginte la pordon, kiu brilis pro oro kaj juveloj, ŝi ordonis ke ŝiaj servistoj frapu laŭte, sed estis senutile; ŝajnis kvazaŭ ĉiuj loĝantoj de la kastelo nepre dormas aŭ mortis. Nu, ju pli malfaciliĝis akiri la fruktojn, des pli la Reĝino firme decidis akiri ilin. Do ŝi ordonis ke ili alportu eskalojn kaj grimpu trans la muron en la ĝardenon; sed kvankam la muro ne aspektis tre alta, kaj ili kunligis la eskalojn por tre longigi ilin, estis tute neeble atingi la supron.

“La Reĝino komencis perdi esperon, sed je la komenco de la noktiĝo ŝi ordonis ke ili tendumu ĝuste kie ili estas, kaj mem enlitiĝis, sentante sin tre malsana pro sia granda senespero. En la mezo de la nokto ŝi subite vekiĝis, kaj vidis mirante ke eta hida oldulino sidas apud ŝia lito, kaj la virino diris al ŝi:

“Vere mi devas diri ke laŭ ni estas iom ĝene ke via Moŝto insistas gustumi niajn fruktojn; sed, por evitigi al vi ĉagrenon, miaj fratinoj kaj mi konsentos doni al vi tiom kiom vi povos forporti, laŭ unu kondiĉo—nome, ke vi donu al ni vian filineton por ke ŝi estu nia infano.”

“Ha! kara sinjorino, kriis la Reĝino, ‘ĉu nenion alian vi akceptos kiel rekompencan por la fruktoj? Mi volonte donos al vi miajn regnojn.’

“Ne, respondis la olda feino, ‘ni akceptos nur vian malgrandan filinon. Ŝi estos feliĉa kiel longas la tagoj, kaj ni donos al ŝi

ĉion havindan en felando, sed vi ne rajtos revidi ŝin antaŭ ol ŝi edziniĝos.

“Kvankam la postulo estas severa,” diris la Reĝino, “mi konsentas, ĉar nepre mi mortos se mi ne gustumos la fruktojn, do mi perdis mian filinon ambaŭokaze.”

“Do la olda feino gvidis ŝin en la kastelon, kaj, kvankam ankoraŭ estis la mezo de la nokto, la Reĝino povis vidi klare ke ĝi estas multe pli bela ol oni diris al ŝi, kion vi povos facile kredi, Princo,” diris la Blanka Kato, “kiam mi diros al vi ke ĝi estas ĉi tiu kastelo en kiu ni nun estas. ‘Ĉu vi preferas mem kolekti la fruktojn, Reĝino?’ diris la feino, ‘aŭ ĉu mi alvoku ĝin veni al vi?’

“Mi petas ke mi povu vidi ĝin veni alvokite,” kriis la Reĝino; ‘tio estas io tute nova.’ La olda feino fajfis dufoje kaj poste kriis:

“Abrikotoj, persikoj, nektarinoj, ĉerizoj, prunoj, piroj, melonoj, vitberoj, pomoj, oranĝoj, limonoj, grosoj, fragoj, framboj, venu!”

“Kaj tuĵtuĵe ili envenis rapidege, puŝante unu la alian, tamen ili estis nek polvokovritaj nek difektitaj, kaj la Reĝino trovis ilin egale bonaj kiel ŝi antaŭimagis. Komprenu ke ili kreskis sur la fearboj.

“La olda feino donis al ŝi orajn korbojn per kiuj ŝi povos forpreni la fruktojn, kaj estis tiom kiom povas porti kvarcent muloj. Post tio ŝi memorigis al la Reĝino la interkonsenton, kaj rekondukis ŝin al la tendaro, kaj la sekvan matenon ŝi reiris al sia regno; sed antaŭ ol esti longe foririnta ŝi komencis penti pro sia konsento, kaj kiam la Reĝo eliris renkonti ŝin ŝi aspektis tiel trista ke li divenis ke io okazis, kaj demandis kio ĝenas. Unue la Reĝino timis informi lin, sed, tuj kiam ili atingis la palacon, la feinoj sendis kvin fiaĉajn nanetojn por alporti min, do ŝi devis konfesi kion ŝi promesis. La Reĝo tre koleris, kaj enfermigis la Reĝinon kaj min en grandan turon bone gardatan, kaj pelis la nanetojn el sia regno; sed la feoj sendis grandan drakon kiu manĝis ĉiujn homojn renkontatajn, kaj kies spiro bruligis ĉion dum li pasis tra la lando; kaj fine, vane peninte senigi de si la monstron, la Reĝo, por savi siajn regatojn, devis konsenti ke mi transdoniĝu al la feoj. Ĉifoje ili mem venis akiri min, en kaleŝo el perloj tirata de hipokampoj, sekvata de la drako, kiu estis kondukata per ĉenoj el

diamantoj. Mia lulilo estis metita inter la oldajn feinojn, kiuj kovris min per karesoj, kaj ni forrapidis tra la aero al turo kiun ili konstruis specife por mi. Tie mi kreskis ĉirkaŭate de ĉio bela kaj rara, kaj lernante ĉion iam ajn instruitan al princino, sed sen kompanoj krom papago kaj hundeto, kiuj povis ambaŭ paroli; kaj ĉiutage min vizitis unu el la oldaj feinoj, kiu venis rajdante la drakon. Unu tagon, tamen, sidante ĉe mia fenestro mi vidis belan junan princon, kiu laŭaspekte estis ĉasinta en la arbaro kiu ĉirkaŭis mian karceron, kaj kiu staris rigardante min. Vidinte ke



mi observas lin li salutis min tre respektete. Konceptu ke min ĝojigis havi novan konversacianon, kaj malgraŭ la alteco de mia fenestro nia konversacio daŭris ĝis la noktiĝo, tiam mia princo malvolonte adiaŭis min. Sed poste li revenis multfoje, kaj fine mi konsentis edzigi lin, sed la demando estis: kiel me eskapos el mia turo? La feoj ĉiam donis al mi linon por mia ŝpinado, kaj per multa diligento mi faris sufiĉan ŝnuron por eskalo kiu atingos la piedon de la turo; sed, ve! ĝuste dum mia princo helpis min descendi, la plej kolerema kaj hida de la oldaj feinoj enflugis. Antaŭ ol li havis sufiĉan tempon por defendi sin mian malfeliĉan

amanton glutis la drako. Rilate al mi, la feinoj, furiozaj ĉar iliaj planoj fiaskis, ĉar ili intencis edzinigi min kun la reĝo de la nanoj kaj mi plene rifuzis, ŝanĝis min en blankan katon. Kiam ili portis min ĉi tien mi trovis ĉiujn nobelojn kaj damojn de la kortego de mia patro atendas min simile sorĉite, kaj la malpli altrangaj homoj estis nevidebligitaj, escepte de iliaj manoj.

“Enŝorĉante min la feinoj rakontis al mi mian tutan historion, ĉar ĝis tiam mi plene kredis ke mi estas ilia infano, kaj ili avertis min ke mia sola oportuno regajni mian naturan formon estos gajni la amon de princo kiu ĉiumaniere similas mian misfortunan aminton.”

“Kaj vi gajnis ĝin, bela Princino,” interrompis la Princo.

“Vi vere estas mirinde simila al li,” pludiris la Princino, “laŭ voĉo, laŭ aspekto, laŭ ĉio; kaj se vi vere amas min ĉiuj miaj problemoj estos finitaj.”

“Kaj miaj,” driis la Princo, ĵetante sin al ŝiaj piedoj, “se vi konsentos edzigi min.”

“Mi jam amas vin pli ol ĉiun alian personon en la mondo,” ŝi diris; “sed nun venis la horo reiri al via patro, kaj ni aŭdos kion li diros pri la afero.”

Do la Princo donis al ŝi sian manon kaj elkondukis ŝin, kaj ili kune eniris la kaleŝon; ĝi estis eĉ pli eleganta ol antaŭe, kaj tia estis la tuta servistaro. Eĉ la ŝuoj de la ĉevaloj estis el rubenoj kun diamantaj najloj, kaj mi supozas ke jam la unuan fojon io tia estis vidata.

Ĉar la Princino estis egale afabla kaj lerta kiel bela, vi povas imagi kian ĝuplenan veturon la Princo havis, ĉar ĉio dirita de la Princo al li ŝajnis tute ĉarma.

Kiam ili proksimiĝis al la kastelo kie la fratoj renkontiĝu, la Princino eniris seĝon portatan de kvar el la gardistoj; ĝi estis ĉizita el unusola eleganta kristalo, kaj havis silkajn kurtenojn, kiujn ŝi tiris ĉirkaŭ sin por ke ŝi ne estu videbla.

La Princo vidis siajn fratojn marŝantaj sur la teraso, ĉiu estis kun bela princino, kaj ili venis renkonti lin, demandante ĉu ankaŭ li trovis edzinon. Li diris ke li trovis ion multe pli raran—malgrandan blankan katon! Ili multe ridis pro tio, kaj demandis al li ĉu li timas esti manĝita de musoj en la palaco. Kaj post tio, ili



LA NOVEDZINO DE LA PRINCO

kune ekiris cele la urbon. Ĉiuj princo kaj princino veturis en eleganta kaleŝo; la ĉevaloj estis ornamitaj per plumoj, kaj scintilis pro oro. Ilin sekvis la plej juna princo, kaj plej lasta estis la kristala seĝo, kaj tial ĉiuj rigardis admire kaj scivole. Vidante ilin veni la korteganoj hastis informi la Reĝon.

“Ĉu la damoj estas belaj?” li demandis maltrankvile.

Kaj kiam ili respondis ke neniu iam antaŭe vidis tiel belajn princinojn li aspektis tre ĉagrenita.

Tamen, li akceptis ilin gracie, sed trovis ke estas neeble elekti inter ili.

Post tio li turnis sin al sia plej juna filo kaj diris:

“Ĉu do vi revenis tute sola?”

“Via Moŝto,” respondis la Princoj, “vi trovos en tiu kristala seĝo malgrandan blankan katon, kiu havas tiel molajn piedojn, kaj miaŭas tiel bele, ke mi certas ke ĝi ĉarmos vin.”

La Reĝo ridetis, kaj iris mem retiri la kurtenojn, sed pro tuŝo fare de la Princino la kristalo rompiĝis en mil erojn, kaj jen ŝi staranta plejbela; ŝia hela hararo flosis sur ŝiaj ŝultroj kaj estis kronita per floroj, kaj ŝia softe falanta robo estis plejpure blanka. Ŝi salutis la Reĝon gracie, dum admirmurmuro venis de ĉiuj ĉirkaŭstarantoj.

“Sinjoro,” ŝi diris, “mi ne venis forpreni de vi la tronon kiun vi tiel inde plenigas. Mi jam havas ses regnojn, permesu ke mi donacu unu al vi, kaj po unu al ĉiu el viaj filoj. Mi petas nenion escepte de via amikeco, kaj vian konsenton por la geedziĝo de mi kun via plej juna filo; ni ankoraŭ havas tri regnojn por ni mem.”

La Reĝo kaj ĉiuj korteganoj ne povis kaŝi siajn ĝojon kaj miron, kaj la geedziĝon de la tri Princoj oni festis tuj. La festoj daŭris plurajn monatojn, kaj post tio ĉiuj reĝo kaj reĝino foriris al sia propra regno kaj vivis feliĉe por ĉiam.¹

¹*La Chatte blanche*. Par Madame la Comtesse d'Aulnoy.

LA NIMFEO. LA OR-ŜPINISTOJ

FOJE, en granda arbaro, loĝis maljunulino kaj tri knabinoj. Ĉiuj tri estis belaj, sed la plej juna estis la plej bela. Ilian kabanon plene kaŝis la arboj, kaj neniuj vidis ilian belecon krom la suno tage kaj la luno nokte, kaj la okuloj de la steloj. La maljunulino devigis la knabinojn forte laboradi, de la mateno ĝis la nokto, ili devis ŝpini oran linon en fadenojn, kaj kiam unu ŝpinbastono estis malplena alia doniĝis al ili, tiel ke ili devis labori senpaŭze. La fadeno devis esti fajna kaj senvaria, kaj farite ĝi estis ŝlosita en sekretan ĉambron de la maljunulino, kiu du-trifoje ĉiun someron foriris veturante. Antaŭ ol foriri ŝi asignis laboron por ĉiu tago de sia foresto, kaj ĉiam revenis nokte, tiel ke la knabinoj neniam vidis kion ŝi reportis kun si, nek ŝi diris al ili el kie venis la ora lino, nek por kio ĝi estos uzata.

Nu, kiam revenis la tempo kiam la maljunulino foriros veturante, ŝi donis al ĉiu knabino laboron por ses tagoj, kaj faris sian kutiman averton: “Infanoj, ne lasu viajn okulojn vagi, kaj nenial parolu al viro, ĉar, se vi faros tion, via fadeno perdos sian brilon, kaj ĉiaj misfortunoj sekvos.” Ili ridis pro tiu ofte ripetata averto, dirante unu al la alia: “Kiel nia ora fadeno povus perdi sian brilon, kaj kiam oportunon ni havas paroli al viro?”

La trian tagon post la foriro de la maljunulino juna princo, ĉasante en la arbaro, apartiĝis de siaj kompanoj, kaj plene perdiĝis. Laca pro la peno trovi sian vojon, li ĵetis sin sub arbon, lasante sian ĉevalon paŝti sin laŭdezire, kaj endormiĝis.

La suno jam subiris kiam li vekiĝis kaj komencis denove provi trovi sian vojon el la arbaro. Fine li perceptis mallarĝan padon, kiun li fervore sekvis kaj trovis ke ĝi kondukas al dometo. La knabinoj, sidante ĉe la pordo de sia kabano, vidis lin proksim-

iĝi, kaj la du pli maljunaj multe alarmiĝis, ĉar ili memoris la averton de la maljunulino; sed la plej juna diris: “Neniam antaŭ nun mi vidis personon kia li; mi rigardu unufoje.” Ili petegis ŝin enveni, sed, vidante ke ŝi rifuzas, ili foriris de ŝi, kaj la Princo, alvenante ĝentile salutis la knabinon, kaj diris al ŝi ke li perdis sian vojon en la arbaro kaj estas kaj malsata kaj laca. Ŝi metis manĝaĵojn antaŭ lin, kaj tiom ĝuis lian konversacion ke ŝi forgesis la averton de la maljunulino, kaj restis dum horoj. Intertempe la kompanoj de la Princo serĉis lin ĉie, sed vane, do ili sendis du mesaĝistojn por transdoni la tristan informon al la Reĝo, kiu tuj ordonis pretigon de ĉevalista regimento kaj alia de piedmarŝaj soldatoj por serĉi lin.



Post tri tagoj da serĉado, ili trovis la kabanon. La Princo ankoraŭ sidis apud la pordo kaj estis tiel feliĉa pro la ĉeesto de la knabino ke la tempo ŝajnis al li nur unu horo. Antaŭ ol foriri li promesis reveni kaj konduki ŝin al la kortego de sia patro, kie li edzinigos ŝin. Post lia foriro, ŝi sidiĝis ĉe sia ŝpinrado por regajni la perditan tempon, sed ŝin ĉagrenis trovi ke ŝia fadeno jam perdis sian tutan brilon. Ŝia koro batadis rapide kaj ŝi ploris amare, ĉar ŝi memoris la averton de la maljunulino kaj ne sciis kia misfortuno nun trafos ŝin.

La maljunulino revenis dum la nokto kaj sciis per la senbrileco de la fadeno kio okazis dum ŝia foresto. Ŝi furioze koleris kaj diris al la knabino ke ŝi okazigis mizeron al kaj si kaj al

la Princo. La knabino ne povis ripozi pro sia pensado pri tio. Fine ŝi ne plu povis toleri ĝin, kaj decidis peti helpon de la Princo.

Estante infano ŝi lernis kompreni la parolon de birdoj, kaj tio nun multe utilis al ŝi, ĉar, vidante korakon ordigi siajn plumojn per pinobranĉo, ŝi vokis softe al ĝi: “Kara birdo, plej lerta el ĉiuj birdoj, ankaŭ plej rapidafluga, ĉu vi helpos min?” “Kiel mi povas helpi vin?” demandis la korako. Ŝi respondis: “Forflugu, ĝis atingi grandiozan urbon, kie staras palaco de reĝo; elserĉu la filon de la reĝo kaj diru al li ke granda misfortuno okazis al mi.” Kaj ŝi informis la korakon pri kiel ŝia fadeno perdis sian brilecon, kiel terure koleras la maljunulino, kaj kiom ŝi timas ian grandan katastrofon. La korako promesis fidele plenumi ŝian peton, kaj, etendinte siajn flugilojn, forflugis. La knabino nun hejmeniris kaj laboris forte dum la tuta tago volvante la fadenon kiun ŝpinis ŝiaj pli aĝaj fratinoj, ĉar la maljunulino ne plu permesis ke ŝi ŝpinu. Ĉirkaŭ la vespero ŝi aŭdis la “kra, kra” de la korako de la pinarbo kaj fervore hastis tien por aŭdi la respondon.

Ege bonfortune la korako estis trovinta filon de ventosorĉisto en la ĝardeno de la palaco, kiu komprenis la parolon de birdoj, kaj al li li konfidis la mesaĝon. Kiam la Princo aŭdis ĝin, li tre tristiĝis, kaj konsiliĝis kun siaj amikoj pri kiel liberigi la knabinon. Post tio li diris al la filo de la ventosorĉisto: “Petu la korakon rapide reflugi al la knabino kaj diri al ŝi ke ŝi estu preta la naŭan nokton, ĉar tiam mi venos kaj forportis ŝin.” La filo de la ventosorĉisto faris tion, kaj la korako flugis tiel rapide ke ĝi atingis la kabanon tiun saman vesperon. La knabino elkore dankis la birdon kaj hejmeniris, sed diris al neniuj kion ŝi aŭdis.

Dum la naŭa nokto proksimiĝis ŝi tre tristiĝis, ĉar ŝi timis ke ia terura misfortuno okazos kaj ruinigos ĉion. La nokton mem ŝi rampis senbrue el la domo kaj atendis tremante iom for de la kabano. Baldaŭ ŝi aŭdis la dampitan paŝadon de ĉevaloj, kaj baldaŭ la armitaro aperis, gvidate de la Princo, kiu prudente antaŭmarkis ĉiujn arbojn, por rekoni la vojon. Kiam li vidis la knabinon li saltis de sia ĉevalo, levis ŝin en la selon, kaj poste, regrimpinte malantaŭ ŝin, rajdis hejmen. La luno lumis tiel brile ke al ili tute ne estis malfacile vidi la markitajn arbojn.

Post kelka tempo la venanta matenkrepusko liberigis la lang-

ojn de ĉiuj birdoj, kaj, se la Princo nur sciis kion ili diras, aŭ la knabino aŭskultus, eble ili evitus multan malĝojon, sed ili pensadis nur unu pri alia, kaj kiam ili eliris la arbaron la suno estis alta en la ĉielo.

La sekvan matenon, kiam la plej juna knabino ne venis labori, la maljunulino demandis kie ŝi estas. La fratinoj ŝajnigis ne scii, sed la maljunulino facile divenis kio okazis, kaj, ĉar ŝi en la vero estis fisorĉistino, firme decidis puni la fuĝintojn. Konsekvence, ŝi kolektis naŭ diversajn speciojn de circeo, aldonis iom da salo, kiun ŝi unue sorĉis, kaj volvinte ĉion per tuko tiel ke ĝi havis la formon de lanuga pilko, sendis ĝin sekvi ilin sur la flugiloj de la vento, dirante:

*Kirlovento!—ventpatrino!
Al Pekintino portu finon!
Kunportu ĉi magian pilkon.
De liaj brakoj ĵetu ŝin
Eterne kuŝi en rivera sin'.*

Je la tagmezo la Princo kaj liaj soldatoj venis al profunda rivero, kiun transiras ponto tiom mallarĝa ke rajdantoj nur povas transiri unuope. La ĉevalo sur kiu rajdadis la Princo kaj la knabino ĵus atingis la mezon kiam flugpasis la magia pilko. La ĉevalo pro sia timo eklevis sin, kaj antaŭ ol iu povis haltigi ĝin ĝi ĵetis la knabinon en la rapidan fluon suban. La Princo provis enĵeti sin post ŝi, sed liaj soldatoj retenis lin, kaj malgraŭ lia baraktado ili kondukis lin hejmen, kie dum ses semajnoj li enfermis sin en sekretan ĉambron, kaj rifuzis manĝi aŭ trinki, pro sia grandega malĝojo. Fine li tiom malsaniĝis ke oni malesperis pri lia vivo, kaj tre alarmite la Reĝino vokigis ĉiujn sorĉistojn de la lando. Sed neniu povis resanigi lin. Fine la filo de la ventosorĉisto diris al la Reĝo: “Alvoku la oldan sorĉiston el Finnlando, li scias pli ol ĉiuj sorĉistoj de via regno kune.” Mesaĝisto tuj sendiĝis al Finnlando, kaj post semajno la olda sorĉisto mem alvenis sur la flugiloj de la vento. “Honorinda Reĝo,” diris la sorĉisto, “la vento blovis ĉi malsanon sur vian filon, kaj magia pilko forkaptis lian amatinon. Pro tio li tiom konstante malĝojas. La vento blovu sur lin por ke ĝi forblovu lian malĝojon.” Post tio la Reĝo devigis sian filon eliri en

la venton, kaj li iom post iom resaniĝis kaj rakontis ĉion al sia patro. “Forgesu la knabinon,” diris la Reĝo, “kaj edzinigu alian virinon;” sed la Princo diris ke neniam li povos ami alian personon.

Post jaro li ekvenis al la ponto kie lia amatino mortis. Memorante sian misfortunon li ploris amare, kaj volonte fordonus ĉion posedatan por ke ŝi denove vivu. Meze de sia malĝojo li aŭdis voĉon kanti, kaj ĉirkaŭrigardis, sed povis vidi neniun personon. Sed li denove aŭdis la voĉon, kaj ĝi diris:

*Ve! l' akvo min sorĉita tenas,
Ĉi tie kuŝos mi eterne!
Amato mia ne sin ĝenas
Nek pensas pri l' edzin' tenere.*

Li multege miris, saltis de sia ĉevalo, kaj serĉis ĉie por trovi ĉu iu kaŝiĝis sub la ponto; sed neniu estis tie. Sed li rimarkis flavan nimfeon flosantan sur la surfaco de la akvo, duonkaŝite de siaj larĝaj folioj; sed floroj ne kantas, kaj tre surprizite li atendis, esperante aŭdi pli. Denove la voĉo kantis:

*Ve! l' akvo min sorĉita tenas,
Ĉi tie kuŝos mi eterne!
Amato mia ne sin ĝenas
Nek pensas pri l' edzin' tenere.*

La Princo subite memoris la orŝpinistojn, kaj diris al si: “Se mi tien rajdos, estas eble ke ili povos klarigi ĉi tion al mi.” Li tuj rajdis al la kabano, kaj trovis la du knabinojn ĉe la fonto. Li diris al ili kio okazis al ilia fratino antaŭ jaro, kaj ke li dufoje aŭdis strangan kanton, sed ne povis vidi la kantanton. Ili diris ke la flava nimfeo sendube estas ilia fratino, kiu ne estas morta sed transformita de la magia pilko. Antaŭ sia enlitiĝo, la plej aĝa kuiris kukon el magiaj herboj, kiun ŝi donis al li kiel manĝaĵon. Dum la nokto li sonĝis ke li loĝas en la arbaro kaj povas kompreni ĉion diratan de la birdoj unu al la alia. La sekvan matenon li rakontis tion al la knabinoj, kaj ili diris ke la sorĉita kuko kaŭzis tion, kaj konsilis ke li atentu zorge la birdojn, kaj trovu kion ili povas diri al li, kaj kiam li reakiros sian edzinon ili petis lin reveni



LA ORSPINISTOJ.

kaj savi ilin el ilia mizera sklaveco.

Promesinte tion, li ĝoje reiris hejmen, kaj dum li rajdis tra la arbaro li povis perfekte kompreni ĉion diratan de la birdoj. Li aŭdis turdon diri al pigo: “Kiom stultaj estas la homoj! Ili ne povas kompreni eĉ plejsimplaĵon. Jam pasis plena jaro post la transformiĝo de la knabino en nimfeon, kaj, kvankam ŝi kantas tiel triste ke ĉiu transiranta la ponton neeviteble aŭdas ŝin, tamen neniuj iras helpi ŝin. Ŝia iama edzinigonto transrajdis ĝin antaŭ kelkaj tagoj kaj aŭdis ŝin kanti, sed ne estis pli saĝa ol la ceteraj.”

“Kaj li kulpas pri ĉiuj ŝiaj misfortunoj,” aldonis la pigo. “Se li atentus nur homajn vortojn ŝi restos floro por ĉiam. Ŝi estus rapide savita se li nur petus konsilon de la olda sorĉisto de Finnlando.”

Aŭdinte tion, la Princo demandis al si kiel sendi mesaĝon al Finnlando. Li aŭdis unu hirundon diri al alia: “Jen, ni flugu al Finnlando: ni povos konstrui pli bonajn nestojn tie.”

“Haltu, afablaj amikoj!” kriis la Princo. “Ĉu vi kompleksos al mi?” La birdoj konsentis, kaj li diris: “Portu mil salutojn de mi al la sorĉisto de Finnlando, kaj demandu al li kiel mi povos redoni ŝian naturan formon al knabino transformita en floron.”

La hirundoj forflugis, kaj la Princo rajdis sur la ponton. Tie li atendis, esperante aŭdi la kanton. Sed li aŭdis nenion krom la susuradon de la akvo kaj la ĝemadon de la vento, kaj, senespere, li rajdis hejmen.

Post nelonge, dum li sidis en la ĝardeno pensante ke sendube la hirundoj forĝesis lian mesaĝon, li vidis aglon flugi super li. La birdo iom post iom descendis ĝis ĝi staris sur arbo proksime al la Princo kaj diris: “La sorĉisto de Finnlando salutis vin kaj petas ke mi diru ke vi povos liberigi la knabinon tiel: Iru al la rivero kaj ŝmiru koton sur vin tutan; poste diru: ‘El homo en krabon,’ kaj vi fariĝos krabo. Plonĝu kuraĝe en la akvon, naĝu kiel eble plej proksimen al la radikoj de la nimfeo, kaj liberigu ilin el la koto kaj kanoj. Farinte tion, kaptu la radikojn per viaj krifoj kaj supreniru kun ili al la surfaco. Lasu la akvon flui sur la tutan floron, kaj drivu kun la fluo ĝis veni al monta frakseno sur la maldekstra bordo. Apud ĝi estas granda ŝtono. Haltu tie kaj diru: ‘El krabo en homon, el nimfeo en knabinon,’ kaj vi ambaŭ reakiros viajn

naturajn formojn.”

Plena de dubo kaj timo, la Princo lasis iom da tempo pasi antaŭ ol li sufiĉe kuraĝis provi savi la knabinon. Sed korvo diris al li: “Kial vi hezitas? La olda sorĉisto ne misinformis vin, nek la birdoj trompis vin; hastu sekigi la larmojn de la knabino.”

“Nenio pli malbona ol morto povos okazi al mi,” pensis la Princo, “kaj morto estas pli bona ol senfina tristo.” Do li suriris sian ĉevalon kaj iris al la ponto. Denove li aŭdis la lamenton de la nimfeo, kaj, ne pli hezitante, li ŝmiris koton sur sin tutan, kaj, dirante, “El homo en krabon,” plonĝis en la riveron. Dum mo-



mento la akvo siblis en liaj oreloj, kaj post tio ĉio silentis. Li naĝis al la planto kaj komencis liberigi ĝiajn radikojn, sed ili estis tiel firme fiksitaj en la koto kaj kanoj ke li bezonis longan tempon por fari tion. Post tio li prenis ilin kaj leviĝis al la surfaco, lasante la akvo flui sur la floron. La fluo portis ilin laŭ la rivero, sed nenie li povis vidi la montan fraksenon. Fine li vidis ĝin, kaj apud ĝi la grandan ŝtonon. Tie li haltis kaj diris: “El krabo en homon, el nimfeo en knabinon,” kaj ĝojige al li li trovis sin denove princo, kaj la knabino estis apud li. Ŝi estis dekoble pli bela ol antaŭe, kaj surhavis belegan palflavan robon, scintilantan pro juveloj. Ŝi dankis lin ĉar li liberigis ŝin el la rego de la kruela sorĉistino, kaj

volonte konsentis edzigi lin.

Sed kiam ili venis al la ponto kie li estis lasinta la ĉevalon ĝi estis nenie videbla, ĉar, kvankam la Princo kredis esti krabo dum nur kelkaj horoj, li efektive estis sub la akvo dum pli ol dek tagoj. Demandante al si kiel ili povos atingi la kortegon de lia patro, ili vidis elegantan kaleŝon tiratan de ses gaje ornamitaj ĉevaloj venanta laŭ la bordo. En tiu ili veturis al la palaco. La Reĝo kaj Reĝino estis en preĝejo, plorante pro sia filo, kiun delonge ili lamentas kiel mortintan. Grandaj estis iliaj ĝojoj kaj mirego kiam la Princo eniris, kondukante la belan knabinon per ŝia mano. La geedziĝo tuj celebriĝis, kaj okazis festenado kaj gajeco tra la tuta regno dum ses semajnoj.

Iam poste la Princo kaj lia novedzino sidadis en la ĝardeno, kiam korvo diris al ili: "Sendankemuloj! Ĉu vi forgesis la du povrajn knabinojn kiuj helpis vin dum via mizero? Ĉu ili devos ŝpini linon eterne? Ne kompatu la oldan sorĉistinon. La tri knabinoj estas princinoj, kiujn ŝi forŝtelis kiam ili estis infanoj kunaj, kun ĉiuj arĝentaj manĝiloj, kiun ŝi ŝanĝis en oran linon. Veneno estus plej taŭga puno por ŝi."

La Princo hontis ke li forgesis sian promeson kaj eliris tuj, kaj pro granda bonfortuno li atingis la kabanon dum la oldulino estis for. La knabinoj sonĝis ke li venas, kaj estis pretaj akompani lin, sed unue ili faris kukon en kiun ili metis venenon, kaj lasis ĝin sur la tablo kie la oldulino verŝajne vidos ĝin reveninte. Ŝi ja vidis ĝin, kaj opiniis ĝin tiel alloga ke ŝi avare glutis ĝin kaj tuj mortis.

En la sekreta ĉambro troviĝis kvindek ĉaregoj da ora lino, kaj egala kvanto troviĝis enterigita. Oni detruis la kabanon, kaj la Princo kaj lia edzino kaj ŝiaj du fratinoj vivis feliĉe por ĉiam.

LA TERURA KAPO

FOJE estis reĝo kies sola infano estis knabino. Nu, la Reĝo tre fervoris havi filon, aŭ almenaŭ nepon, kiu sekvu lin, sed al li diris profeto kiun li konsultis ke la filo de lia propra filino mortigos lin. Tiu informo tiom teruris lin ke li firme decidis neniam permesi ke lia filino edziniĝu, ĉar li opiniis ke estos pli bone tute ne havi nepon ol estis mortigita de sia nepo. Tial li kunvokis siajn laboristojn kaj ordonis ke ili fosu profundan rondan truon en la tero, kaj post tio li konstruigis latunan karceron en la truo kaj post tio, kiam ĝi estis finita, li enŝlosis sian filinon. Neniu viro iam vidis ŝin, kaj ŝi neniam vidis eĉ la kampojn kaj la maron, sed nur la ĉielon kaj la sunon, ĉar estis larĝe aperta fenestro en la tegmento de la latuna domo. Do la Princino sidadis supren rigardante al la ĉielo, kaj rigardante la nubojn transflosi, kaj demandante al si ĉu iam ŝi liberiĝos el sia karcero. Nu, unu tagon ŝajnis al ŝi ke la ĉielo malfermiĝis super ŝi, kaj granda pluvo de brilanta oro falis tra la fenestron en la tegmento, kaj kuŝis scintilante en ŝia ĉambro. Post nelonge, la princino naskis bebon, knabeton, sed kiam la Reĝo ŝia patro aŭdis pri tio li multe koleris kaj timis, ĉar nun naskiĝis la infano kiu kaŭzos lian morton. Tamen, kvankam fimalkuraĝa, lia koro ne vere permesis ke li rekte mortigu la Princinon kaj ŝian bebon, sed li metigis ilin en gigantan latunligitan keston kaj ĵetigis ilin en la maron, por ke ili aŭ dronu aŭ mortemalsatu, aŭ eble flosu al lando kie ili ne povos tuŝi lin.

Do la Princino kaj la bebo flosis kaj drivis en la kesto sur la maro dum tutaj tago kaj nokto, sed la bebo ne timis la ondojn nek la ventojn, ĉar li ne sciis ke ili povos damaĝi lin, kaj li dormis tute profunde. Kaj la Princino kantis kanton super li, kaj jen ŝia kanto:

Infano mia, dorm' profundas
Dum patrina tim' abundas!

Ripozas via kor' dum rest'
En streta latunligita kest';
Tra nokton mornan kaj senstelan
Dormas vi, ne aŭdas pelan
Ondon kraŝi, nek la krian
Noktan venton timdefian.
Vi dormas sur mantel' purpura,
Kun via vizaĝet' sur mia,
Ne ĝenas mia ploro dura
Nek la brua akv' ebria.

Nu, fine venis la tagiĝo, kaj la grandan keston drivigis la ondoj sur la bordon de insulo. Tie kuŝis la latunligita kesto, en kiu estis la Princino kaj ŝia bebo, ĝis tiulanda viro venis, vidis ĝin, kaj jen! li vidis belan virinon kaj knabeton. Do li gvidis ilin al sia hejmo, kaj estis tre bonkora al ili, kaj vartis la knabon ĝis li fariĝis juna viro. Nu kiam la knabo plenfortiĝis la Reĝo de tiu lando ekamis lian patrinnon, kaj volis edzinigi ŝin, sed li sciis ke ŝi neniam apartiĝos de sia knabo. Do li elpensis planon detrui la knabon, kaj jen lia plano: grava reĝino de lando ne tre malproksima estis edziniĝonta, kaj ĉi tiu reĝo diris ke ĉiuj liaj regatoj devas porti al li geedziĝdonacojn donotajn al ŝi. Kaj li okazigis festenon al kiu li invitis ilin ĉiujn, kaj ili ĉiuj alportis siajn donacojn; kelkaj alportis orajn tasojn, kaj kelkaj alportis kolĉenojn el oro kaj sukceso, kaj kelkaj alportis belajn ĉevalojn; sed la knabo havis nenion, kvankam li estis filo de princino, ĉar lia patrino havis nenion doneblan al li. Do la ceteraj gastoj komencis moki lin, kaj la Reĝo diris: "Se vi havas nenion alian doneblan, almenaŭ iru akiri la Teruran Kapon."

La knabo estis fiera, kaj parolis senpense:

"Do mi ĵuras ke mi ja alportos la Teruran Kapon, se vivanto ja povas alporti ĝin. Sed mi ne konas tiun kapon pri kiu vi parolas."

Do ili diris al li ke ie, tre for, loĝas tri teruraj fratinoj, monstraj oĝraj virinoj, kun oraj flugiloj kaj krifoj latunaj, kaj serpentoj kreskantaj sur la kapoj anstataŭ haroj. Nu tiuj virinoj estas tiel teruraspektaj ke kiu ajn vidas ilin tuj fariĝas ŝtono. Kaj du el ili ne

estas mortigeblaj, sed la plej juna, kies vizaĝo estas tre bela, ja estas mortigebla, kaj sian kapon la knabo promesis alporti. Vi povas imagi ke tiu aventuro ne estis facila.

Aŭdinte tion eble li bedaŭris ke li ĵuris alporti la Teruran Kapon, sed li firme intencis plenumi siajn ĵuron. Do li eliris de la



festeno, kie ili ĉiuj sidis drinkante kaj gajante, kaj li marŝis sola apud la maro dum la vespera krepusko, ĉe la loko kie la granda kesto, en kiu estis li kaj lia patrino, ĵetiĝis sur la bordon.

Post tio li sidiĝis sur roko, rigardante la maron, kaj demandante al si kiel komenci plenumi sian ĵuron. Kaj li sentis ke iu tuŝas lian ŝultron; li turnis sin, kaj vidis junulon kia filo de reĝo, kun

kiu estas alta bela virino, kies bluaj okuloj brilas kiel steloj. Ili estis pli altaj ol mortipovuloj, kaj la junulo per sia mano tenis sceptron, ĉirkaŭ kiu du oraj serpentoj estis volvitaj, kaj li havis flugilojn sur sia ĉapo kaj sur siaj ŝuoj. Li parolis al la knabo, kaj demandis al li kial li estas tiom malfeliĉa; kaj la knabo diris al li ke li ĵuris alporti la Teruran Kapon, kaj ne scias kiel komenci entrepreni la aventuron.

Ankaŭ la bela virino parolis, kaj diris ke “la ĵuro estis malsaĝa kaj hasta, sed ĝi estas plenumebla se ĝin ĵuris bravulo”. La knabo respondis ke li ne timas, se nur li konus la vojon.

La virino diris ke por mortigi la teruran inon kun la oraj flugiloj kaj la latunaj krifoj, kaj detranĉi ŝian kapon, li bezonas tri aferojn: unue, Ĉapon de Obskuro, kiu malvidebligas lin dum li portos ĝin; due, Glavon de Akro, kiu fendas feron per unu bato; kaj laste, la Ŝuojn de Rapido, per kiuj li povos flugi en la aero.

La knabo respondis ke li ne scias kie akiri tiajn aferojn, kaj ke, sen ili, li nur povas provi kaj malsukcesi. Post tio la junulo, deprenante siajn propraj ŝuojn, diris: “Unue, uzu ĉi tiujn ŝuojn ĝis vi estos depreninta la Teruran Kapon; post tio vi devos redoni ilin al mi. Kaj per ĉi tiuj ŝuoj vi flugos rapide kiel birdo, aŭ penso, trans la teron aŭ trans la ondojn de la maro, kien ajn la ŝuoj konos la vojon. Sed ekzistas vojoj kiujn ili ne konas, vojoj preter la bordoj de la mondo. Kaj tiujn vojojn vi devos veturi. Nu unue vi devos iri al la Tri Grizaj Fratinoj, kiuj loĝas tre for en la nordo, kaj estas tiel oldegaj ke ili kune havas nur unu okulon kaj unu denton. Rampu proksimen al ili, kaj dum unu el ili transdonos la okulon al la alia ekprenu ĝin, kaj rifuzu redoni ĝin antaŭ ol ili diros al vi la vojon al la Tri Feinoj de la Ĝardeno, kaj ili donos al vi la Ĉapon de Obskuro kaj la Glavon de Akro, kaj montrós al vi kiel flugi preter ĉi tiu mondo al la lando de la Terura Kapo.”

Tiam diris la bela virino: “Foriru tuj, kaj ne reiru por diri adiaŭ al via patrino, ĉar ĉio ĉi estas fareda rapide, kaj la Ŝuoj de Rapido mem portos vin al la lando de la Tri Grizaj Fratinoj—ĉar ili konas la kvanton da distanco.”

Do la knabo dankis ŝin, kaj li surligis la Ŝuojn de Rapido, kaj turnis sin por adiaŭi la junulon kaj la virinon. Sed, jen! ili jam malaperis, li ne sciis kiel nek kien! Post tio li saltis en la aeron por

provi la Ŝuojn de Rapido, kaj ili portis lin pli rapide ol la vento, trans la varman bluan maron, trans la feliĉajn landojn de la sudo, trans la nordajn popolojn kiuj trinkas lakton de ĉevalinoj kaj loĝas en grandaj ĉaregoj, vage sekvante siajn gregojn. Trans la larĝajn riverojn, kie la sovaĝaj birdoj altiĝis kaj fuĝis antaŭ li, kaj trans la ebenaĵojn kaj la malvarman Nordan Maron li iris, trans la kampojn da neĝo kaj la montetojn da glacio, al loko kie la mondo finiĝas, kaj ĉiu akvo estas glaciigita, kaj ne ekzistas homoj, nek bestoj, nek verda herbo. Tie en blua kavo de la glacio li trovis la Tri Grizajn Fratinojn, la plej aĝajn vivantojn. Ilia hararo estis



blanka kiel la neĝo, kaj ilia haŭto glaciblua, kaj ili murmuradis kaj kapgestadis iel sonĝe, kaj ilia frostita spiro pendis ĉirkaŭ ili kva-zaŭ nubo. Nu la aperturo de la kavo en la glacio estis mallarĝa, kaj ne estis facile enpaŝi sen tuŝi iun el la Grizaj Fratinoj. Sed, flosante sur la Ŝuoj de Rapido, la knabo ja sukcesis kaŝe eniri, kaj atendis ĝis unu el la fratinoj diris al alia, kiu havas ilian solan okulon:

“Fratino, kion vi vidas? ĉu vi vidas la malnovan epokon reveni?”

“Ne, fratino.”

“Do donu al *mi* la okulon, ĉar eble mi povos vidi pli foren ol vi.”

Do la unua fratino transdonis la okulon al la dua, sed dum la dua palpe serĉis ĝin la knabo lerte kaptis ĝin el ŝia mano.

“Kie estas la okulo, fratino?” diris la dua griza virino.

“Vi mem prenis ĝin, fratino,” diris la unua griza virino.

“Ĉu vi perdis la okulon, fratino? ĉu vi perdis la okulon?” diris la tria griza virino; “ĉu ni neniam retrovos ĝin kaj vidos la malnovan epokon reveni?”

La knabo glitis de malantaŭ ili el la frida kavo en la aeron, kaj li ridis laŭte.

Kiam la grizaj virinoj aŭdis tion ridon ili komencis plori, ĉar nun ili sciis ke fremdulo prirabis ilin, kaj ke ili ne povas helpi sin, kaj iliaj larmoj glaciĝis falante de la kavaĵoj kie ne estas okuloj, kaj bruis sur la glacia tero de la kavo. Post tio ili komencis petegi la knabon redoni al ili ilian okulon, kaj li ne povis ne kompati ilin, ili estis tiom povraj. Sed li diris ke li neniam redonos al ili la okulon antaŭ ol ili diros al li kiun vojon preni al la Feinoj de la Ĝardeno.

Ili tordis siajn manojn mizere, ĉar ili divenis kial li venis, kaj ke li intencas provi gajni la Teruran Kapon. Nu la Teruraj Virinoj estis parencoj de la Tri Grizaj Fratinoj, kaj estis por ili malfacile diri al la knabo la vojon. Sed fine ili diris ke li konstante iru suden, kaj kun la tero maldekstre kaj la maro dekstre, ĝis li atingos la Insulon de la Feinoj de la Ĝardeno. Post tio li redonis al ili la okulon, kaj ili rekomencis rigardi por trovi ĉu la malnova epoko revenas. Sed la knabo flugis suden inter la maro kaj la tero, tenante la teron ĉiam maldekstre, ĝis li vidis belan insulon kronitan per florantaj arboj. Tie li surteriĝis, kaj tie li trovis la Tri Feinojn de la Ĝardeno. Ili estis similaj al tri tre belaj junaj virinoj, unu vestita verde, unu blanke, kaj unu ruĝe, kaj ili dancadis kaj kantadis ĉirkaŭ pomarbo kun oraj pomoj, kaj jen ilia kanto:

LA KANTO DE LA OKCIDENTAJ FEINOJ

Ni ĉirkaŭ la pomoj oraj

Dancas de tempo mita,

Ni dancas de tempoj foraj

Ĉirkaŭ l' arbo sorĉita.
 Konstante ni ĉirkaŭe pluas
 Dum printempo verdas, rivero fluas,
 Kaj vento vigligas maron!
 Neniu gustumos oran frukton
 Ĝis la nova tempo venos;



Multaj arboj elradikos,
 Multajn burĝonojn putro pikos,
 Multajn kantojn silento ĉenos;
 Oni trovos nenian liuton
 Ĝis la tempo nova venos!
 Ni ĉirkaŭ l' arbo ora

Dancas de tempo mita,
Mond' turniĝas de tempo fora,
Somero, vintro, tempo hora,
Kanto kantata, rakonto elkora,
La dancon glutas tempo vora
Ĉirkaŭ l' arbo senevita!

Tiuj solenaj dancantaj feinoj estis tre malsimilaj al la Griza Virino, kaj ili ĝojis vidi la knabon, kaj afable traktis lin. Kaj ili demandis al li kial li venis; kaj li diris al ili ke li estis sendita trovi la Glavon de Akro kaj la Ĉapon de Obskuro. Kaj la feinoj donis ilin al li, kaj sakon, kaj ŝildon, kaj ligis la glavon, kiu havis diamantan klingon, ĉirkaŭ lian talion, kaj la ĉapon ili metis sur lian kapon, kaj diris al li ke nun eĉ ili ne povas vidi lin kvankam ili estas feinoj. Li deprenis ĝin, kaj ĉiu el ili kisis lin kaj deziris al li bonan fortunon, kaj post tio ili rekomencis sian eternan dancon ĉirkaŭ la oran arbon, ĉar ilia tasko estas gardi ĝin ĝis venos la nova epoko, aŭ ĝis la finiĝo de la mondo. Do la knabo metis la ĉapon sur sian kapon, kaj pendigis la sakon de sia talio, kaj la brilantan ŝildon sur siajn ŝultrojn, kaj flugis trans la grandan riveron kiu kuŝas volvite kvazaŭ serpento ĉirkaŭ la tuta mondo. Kaj apud la bordoj de tiu rivero, tie li trovis la tri Terurajn Virinojn dormantajn sub poplo, kaj la mortaj poplofolioj kuŝis tute ĉirkaŭ ili. Iliaj oraj flugiloj estis falditaj kaj iliaj latunaj krifoj estis krucitaj, kaj du el ili dormis kun siaj hidaj kapoj sub la flugiloj kvazaŭ birdoj, kaj la serpentoj en ilia hararo tordetiĝis de sub la plumoj el oro. Sed la plej juna dormis inter siaj du fratinoj, kaj ŝi kuŝis sur sia dorso, kun sia bela trista vizaĝo turnita al la ĉielo; kaj kvankam ŝi dormis ŝiaj okuloj estis plenapertaj. Se la knabo vidus ŝin teruro kaj kompatato ŝanĝus lin en ŝtonon, ĉar ŝi estis tiom fiaspekta; sed li jam elpensis planon mortigi ŝin sen rigardi ŝian vizaĝon. Tuj kiam li ekvidis la trion el tre for li prenis sian brilantan ŝildon de siaj ŝultroj, kaj supre tenis ĝin kvazaŭ spegulon, tiel ke li vidis la Terurajn Virinojn reflektatajn de ĝi, kaj ne vidis la Teruran Kapon mem. Li venis pli kaj pli proksimen, ĝis li taksis estis ne pli ol glavofrapan distancon de la plej juna, kaj li divenis kie li faru retrobaton malantaŭ sin. Li tiris la Glavon de Akro kaj batis unu-

foje, kaj la Terura Kapo tranĉiĝis de la ŝultroj de la ulo, kaj la sango elsaltis kaj batis lin. Sed li ĵetis la Teruran Kapon en sian sakon, kaj forflugis sen retrorigardi. Post tio vekiĝis la du Fifratinoj kiuj restis kaj enaeriĝis kvazaŭ grandaj birdoj; kaj kvankam ili ne povis vidi lin pro lia Ĉapo de Obskuro, ili postflugis lin laŭ la vento, sekvante la odoron tra la nuboj, kvazaŭ hundoj ĉasantaj en arbaro. Ili tiom proksimiĝis ke li povis aŭdi la bruon de iliaj orajflugiloj, kaj iliajn kriojn unu al la alia: “*Ĉi tie, ĉi tie,*” “*Ne, tie; tien li iris,*” dum ili ĉasis lin. Sed la Ŝuoj de Rapido flugis tro rapide por ili, kaj fine iliaj krioj kaj la bruado de iliajflugiloj fadis dum li transiris la grandan riveron kiu fluas ĉirkaŭ la mondon.

Nu, kiam la teruraj uloj estis fore distancaj, kaj la knabo trovis sin ĉe la ĝusta flanko de la rivero, li flugis rekte orienten, penante serĉi sian propran landon. Sed suben rigardante el la aero li vidis tre strangan vidaĵon—belan knabinon ĉenitan al paliso ĉe la altakva marko de la maro. La knabino tiom timis, aŭ estis tiom laca, ke malebligis ŝian falon nur la fera ĉeno ĉirkaŭ ŝia talio, kaj tie ŝi pendis, kvazaŭ morta. La knabo multe kompatis ŝin, kaj suben flugis kaj ekstaris apud ŝi. Kiam li parolis ŝi levis sian kapon kaj ĉirkaŭrigardis, sed lia voĉo ŝajne nur timigis ŝin. Li ekkonsciis ke li surhavas la Ĉapon de Obskuro, kaj ke ŝi povas nur aŭdi lin, ne vidi lin. Do li deprenis ĝin, kaj jen li staranta antaŭ ŝi, la plej bela junulo kiun iam vidis ŝi dum sia tuta vivo, kun nelonga flava hararo, kaj bluaj okuloj, kaj ridanta vizaĝo. Kaj li opiniis ŝin la plej bela knabino en la mondo. Do unue per sola bato per la Glavo de Akro li tranĉis la feran ĉenon kiu ligis ŝin, kaj post tio li demandis al ŝi kial ŝi estas ĉi tie, kaj kial oni traktas ŝin tiel kruele. Kaj ŝi diris al li ke ŝi estas filino de la Reĝo de tiu lando, kaj ke ŝi estis ligite tie por esti manĝita de monstra besto el la maro; ĉar la besto venadis kaj voris knabinon ĉiutage. Nun la loto trafis ŝin; kaj ĝuste dum ŝi diris tion longa feroĉa kapo de kruela marmonstro leviĝis el la ondoj kaj penis kapti la knabinon. Sed la besto estis tro avida kaj tro hasta, do la unuan fojon li miscelis. Antaŭ ol li povis sin levi kaj denove mordi la knabo ektiris la Teruran Kapon el sia sako kaj supre tenis ĝin. Kaj kiam la marbesto saltis denove ĝiaj okuloj ekvidis la kapon, kaj tuj ĝi ŝtoniĝis. Kaj la ŝtona besto restas tie sur la marbordo eĉ hodiaŭ.

Post tio la knabo kaj la knabino iris al la palaco de la Reĝo, ŝia patro, kie ĉiu priploras ŝian morton, kaj ili apenaŭ povis kredi siajn okulojn kiam ili vidis ŝin reveni bonfarta. Kaj la Reĝo kaj la Reĝino multe laŭdis la knabon, kaj ne povis kaŝi sian ĝojegon kiam ili informiĝis ke li deziras edzinigi ilian filinon. Do ili geedziĝis dum plej granda ĝojado, kaj post kelka tempo en la kortego ili hejmeniris en ŝipo al la lando de la knabo. Ĉar li ne povis porti sian novan edzinon tra la aero, li portis la Ŝuojn de Rapido, kaj la Ĉapon de Obskuro, kaj la Glavon de Akro al soleca loko en la montetoj. Tie li postlasis ilin, kaj tie ilin trovis la viro kaj virino kiuj estis renkontitaj lin ĉeĥejme apud la maro, kaj helpis lin komenci sian veturon.

Farinte tion la knabo kaj lia nova edzino ekiris cele lian hejmon, kaj alteriĝis ĉe la haveno de lia propra lando. Sed kiun li renkontis en la strato mem de la urbo? Lian propran patrinon, kiu fuĝas por savi sian vivon kontraŭ la fireĝo, kiu nun volas mortigi ŝin ĉar li sciigis ke ŝi neniam edzigos lin! Ĉar se antaŭe ŝi ne multe ŝatis la Reĝon, ŝi nun multege malpli ŝatas lin post kiam li tiom subite malaperigis ŝian filon. Ŝi ne sciis, kompreneble, kien iris la knabo, sed kredis ke la Reĝo sekrete mortigis lin. Do nun ŝi fuĝas por savi sian vivon, kaj la fireĝo sekvas ŝin portante glavon en la mano. Kaj jen! ŝi kuras en la brakojn de sia filo mem, sed li havas nur sufiĉan tempon por kisi ŝin kaj paŝi antaŭ ŝin, antaŭ ol la Reĝo batis lin per sia glavo. La ŝildo de la knabo ricevis la baton, kaj li kriis al la Reĝo:

“Mi ĵuris alporti al vi la Teruran Kapon, kaj vidu kiel mi plenumas mian ĵuron!”

Kaj li tiris la kapon el sia sako, kaj kiam la okuloj de la reĝo rigardis ĝin, tuj li ŝtoniĝis, ĝuste tia kia estas starante tie kun la glavo levita!

Nun la tuta popolo ĝojis, ĉar la fireĝo ne plu regos ilin. Kaj ili petis la knabon esti ilia reĝo, sed li diris ne, ke li devas reporti sian patrinon al la domo de ŝia patro. Do la popolo elektis kiel reĝon la viron kiu estis afabla al lia patrino kiam unue ŝi ĵetiĝis sur la insulon en la granda kesto.

Post kelka tempo la knabo kaj la patrino kaj lia edzino ekvelis al la lando de lia patrino, el kiu ŝi estis tiel malafable pelita. Sed

survoje ili haltis por viziti en la kortego de reĝo, kaj okazis ke li okazigas ludojn, kaj donos premiojn al la plej bonaj kuristoj, boksistoj, kaj ringojetistoj. La knabo volis provi sian forton kun la aliaj, sed li tiom foren ĵetis la ringon ke ĝi preterpasis ĉiun iam antaŭe ĵetitan ringon, kaj falis en la homamason, kaj batis viron tiel forte ke li mortis. Nu tiu viro estis neniuj alia ol la patro de la patrino de la knabo, kiu fuĝis de sia propra regno pro tio ke lia nepo ja trovos kaj mortigos lin. Tiel lin detruis lia propra mal-kuraĝo kaj hazardo, kaj tiel plenumiĝis la antaŭdiro. Sed la knabo kaj lia edzino kaj lia patrino reiris al la regno kiu apartenas al ili, kaj vivis longe kaj feliĉe post ĉiuj siaj problemoj.



LA HISTORIO DE BELA ORBUKULINO

FOJE estis princino kiu estis la plej bela persono en la mondo. Kaj ĉar ŝi estis tiom bela, kaj ĉar ŝia hararo estis kia la plej altkvalita oro, kaj ondis kaj ondetis preskaŭ ĝis la tero, oni nomis ŝin Bela Orbuklulino. Ŝi ĉiam surportis kronon el floroj, kaj ŝiaj roboj estis broditaj per diamantoj kaj perloj, kaj ĉiu vidanta ŝin ekamis ŝin.

Nu unu el ŝiaj najbaroj estis juna reĝo ne edziĝinta. Li estis tre riĉa kaj bela, kaj kiam li aŭdis ĉion diratan pri Bela Orbuklulino, kvankam li neniam vidis ŝin, li tiom profunde ekamis ŝin ke li ne povis manĝi nek trinki. Do li decidis sendi ambasadoron por peti geedziĝon. Li farigis grandiozan kaleŝon por sia ambasadoro, kaj donis al li pli ol cent ĉevalojn kaj cent servistojn, kaj ordonis al li ke nepre li reportu la Princinon kun si. Post lia elironio alia estis diskutata en la Kortego, kaj la Reĝo estis tiom certa ke la Princino konsentos ke li eklaborigis siajn servistojn pretigi belajn robojn kaj elegantajn meblojn, por ke ili estu pretaj kiam ŝi venos. Intertempe, la ambasadoro venis al la palaco de la Princino kaj transdonis sian mesaĝeton, sed, ĉu ŝi estis malbonhumora tiutage, aŭ ĉu la komplimento ne plaĉis al ŝi, ne estas sciate. Ŝi respondis nur ke ŝi multe dankas la Reĝon, sed ke ŝi ne deziras edziniĝi. La ambasadoro ekiris malfeliĉe hejmen, reportante kun si ĉiujn donacojn de la Reĝo, ĉar la Princino estis tro ĝentila por akcepti la perlojn kaj diamantojn kiam ŝi ne akceptis la Reĝon, do ŝi retenis nur dudek kvin Anglajn pinglojn por ne ĉagreni lin.

Kiam la ambasadoro atingis la urbon, kie la Reĝo atendas senpacience, ĉiuj tre koleris kontraŭ li ĉar li ne kunportis la Princinon, kaj la Reĝo ploris kvazaŭ bebo, kaj neniuj povis konsoli lin. Nu estis en la Kortego junulo, kiu estis pli lerta kaj bela ol ĉiu alia. Li nomiĝis Ĉarmulo, kaj ĉiu amas lin, escepte de kelkaj enviaj

personoj kiuj koleris ĉar li estas plejfavorata de la Reĝo kaj scias ĉiujn sekretajn de la Ŝtato. Okazis unu tagon ke li estis kun kelkaj personoj kiuj parolis pri la reveno de la ambasadoro kaj diris ke lia veturo al la Princino malmulte utilis, kiam Ĉarmulo diris senpripense:

“Se la Reĝo sendus min al Princino Orbuklulino mi estas certa ke ŝi revenus kun mi.”

Liaj malamikoj tuj iris al la Reĝo kaj diris:

“Vi apenaŭ kredos, Sinjoro, kion Ĉarmulo aŭdacis diri—ke se li estus sendita al Princino Orbuklulino ŝi certe revenus kun li. Li ŝajnas kredi ke li estas tiom pli bela ol vi ke la Princino ekamus lin kaj sekvus lin volonte.” La Reĝo tre koleris aŭdinte tion.

“Ha, ha!” diris li; “ĉu li mokas mian malfeliĉon, kaj kredas sin pli fascina ol mi? Iru, fermu lin en mian grandan turon por ke li mortu pro malsato.”

Do la gardistoj de la Reĝo iris kapti Ĉarmulon, kiu ne pli pensis pri sia senpripensa parolo, kaj forportis lin al karcero tre kruele. La povra kaptito havis nur iom da pajlo kiel liton, kaj manke de roĵeto da akvo kiu fluas tra la turo li mortus pro soifo.

Unu tagon dum sia malespero li diris al si:

“Kiel povas esti ke mi ofendis la Reĝon? Mi estas lia plej fidela regato, kaj faris nenion kontraŭ li.”

La Reĝo hazarde pasadis la turon kaj rekonis la voĉon de sia eksfavorato. Li haltis por aŭskulti malgraŭ la malamikoj de Ĉarmulo, kiuj penis persvadi lin ke li neniel plu rilatu kun la perfidulo. Sed la Reĝo diris:

“Silentu, mi volas aŭdi kion li diras.”

Kaj li malfermis la pordon de la turo kaj vokis al Ĉarmulo, kiu venis tre malfeliĉe kaj kisis la manon de la Reĝo, dirante:

“Kion mi faris, sinjoro, tiel ke mi meritas ĉi kruelan trakton?”

“Vi mokis min kaj mian ambasadoron,” diris la Reĝo, “kaj vi diris ke se mi sendus vin al Princino Orbuklulino vi certe revenigus ŝin.”

“Estas tute vere, sinjoro,” respondis Ĉarmulo; “mi tiel priparolus vin, kaj prezentus viajn bonajn kvalitojn tiel, ke mi estas certa ke la Princino trovus vin nerezistebla. Sed mi ne komprenas kial tio kolerigas vin.”

Ankaŭ la Reĝo ne komprenis kialon de kolero kiam la afero estis prezentita al li tiel, kaj li komencis tre feroce sulki la frunton al la korteganoj kiuj tiom misparolis al li pri lia favorato.

Do li reprenis Ĉarmulon al la palaco kun si, kaj doninte al li tre bonan manĝon li diris al li:

“Vi scias ke mi amas Belan Orbuklulinon same kiel antaŭe, ŝia rifuzo tute ne ŝanĝis tion; sed mi ne scipovas ŝanĝi ŝian decidon: mi vere deziras sendi vin, por trovi ĉu eble vi povos persvadi ŝin edziniĝi kun mi.”

Ĉarmulo respondis ke li tre volonte iros, kaj komencos sian veturon jam la sekvan tagon.



“Sed vi devos atendi ĝis mi akiros grandan eskorton por vi,” diris la Reĝo. Sed Ĉarmulo diris ke li volas nur bonan ĉevalon kiun li povos rajdi, kaj la Reĝo, kiu multe ĝojis pro lia preteco tiel baldaŭ komenci, doni al li leterojn al la Princino, kaj deziris al li bonan veturon. Dum lunda mateno li ekiris tute sola por sia tasko, pensante pri nenio alia ol kiel persvadi Princinon Orbuklulinon edziniĝi kun la Reĝo. Li havis kajeron en sia poŝo, kaj kiam ajn feliĉa penso trafis lin li deiris de sia ĉevalo kaj sidiĝis sub la arboj por meti ĝin en la paroladon kiun li preparas por la Princino, antaŭ ol forgesi ĝin.

Unu tagon kiam li komencis je la plej frua krepusko, kaj rajdis trans grandan kampon, li ekhavis bonegan ideon, kaj, salt-

inte de sia ĉevalo, li sidiĝis sub saliko kiu kreskis apud rivereto. Skribante ĝin li ĉirkaŭrigardis, kaj plaĉis al ke li trovas sin en tiel bela loko, kaj subite li vidis grandan oran karpon kuŝantan anhelegante kaj lacega sur la herbo. Saltante por kapti muŝetojn ŝi ĵetis sin alte sur la bordon, kie ŝi kuŝis ĝis ŝi preskaŭ mortis. Ĉarmulo kompatis ŝin, kaj, kvankam li ne povis ne pensi ke ŝi estus tre bona manĝaĵo, li prenis ŝin milde kaj remetis ŝin en la akvon. Tuj kiam Damo Karpo sentis la refreŝigan frideton de la akvo ŝi plonĝis dankeme al la fundo de la rivero, kaj poste, naĝinte al la bordo tute sentime, ŝi diris:

“Mi dankas vin, Ĉarmulo, pro via komplezo al mi. Vi savis mian vivon, iam mi rekompencos vin.” Dirinte tion, ŝi replonĝis sub la akvon, lasante Ĉarmulon tre miroplena pro ŝia ĝentileco.

Alian tagon, dum li pluiris, li vidis korakon tre mizeran. La povran birdon tre proksime ĉasis aglo, kiu baldaŭ vorus ĝin, se Ĉarmulo ne haste metus sagon al sia pafarko kaj mortigus la aglon. La korako ekstaris sur arbon tre ĝoje.

“Ĉarmulo,” diris li, “vi tre malavare savis povran korakon; mi ne estas sendanka, iun tagon mi rekompencos vin.”

Ĉarmulo opiniis tre ĝentila la korakon pro tiu parolo, kaj rekomencis pluiri.

Antaŭ la sunleviĝo li trovis sin en densa arbaro kie estis tro senlume por ke li povu vidi sian vojon, kaj tie li aŭdis strigon muĝadi kvazaŭ senespere.

“Aŭskultu!” diris li, “nepre jen strigo multe embarasata, mi certas ke ĝi eniris kaptilon;” kaj li komencis ĉirkaŭserĉi, kaj baldaŭ li trovis grandan reton kiun disetendis iuj birdokaptistoj la antaŭan nokton.

“Kia domaĝo ke homoj neniam faras alion ol turmenti kaj mistrakti povrajn bestojn kiuj neniam damaĝas ilin!” diris li, kaj li elprenis sian tranĉilon kaj tranĉis la ŝnurojn de la reto, kaj la strigo forflugis en la mallumon, sed post tio, turninte sin, per unu flugilbato ŝi revenis al Ĉarmulo kaj diris:

“Ne necesas multaj vortoj por diri al vi kian grandan servon vi faris al mi. Mi estis kaptita; post kelkaj minutoj la birdokaptistoj estus ĉi tie—sen via helpo mi estus mortigita. Mi dankas, kaj iam mi rekompencos vin.”

Tiuj tri aventuroj estis la solaj gravaj eventoj trafintaj Ĉarmulon dum sia veturo, kaj li laŭeble plej hastis atingi la palacon de Princino Orbuklulino.

Alveninte li opiniis ĉion vidatan plaĉega kaj grandioza. Diamantoj estis abundaj kiel ŝtoneroj, kaj la oro kaj arĝento, la belaj roboj, la frandaĵoj kaj belaĵoj ĉie troveblaj tute mirigis lin; li pensis al si: “Se la Princino konsentos forlasi ĉion ĉi, kaj veni kun mi por edzigi la Reĝon, li nepre opinios sin bonfortuna!”

Li vestis sin zorge per riĉa brokaĵo, kun skarlataj kaj blankaj plumoj, kaj ĵetis grandiozan broditan skarpon sur sian ŝultron, kaj, aspektante laŭeble gaja kaj gracia, li prezentis sin ĉe la pordo de la palaco, portante en sia brako etan belan hundon kiun li aĉetis survoje. La gardistoj salutis lin respektoplene, kaj oni sendis mesaĝiston al la Princino por anonci la alvenon de Ĉarmulo kiel ambasadoro de ŝia najbaro la Reĝo.

“Ĉarmulo,” diris la Princino, “tiu nomo sonas bele; mi ne dubas ke li bone aspektas kaj fascinas ĉiun.”

“Jes ja, sinjorino,” diris ĉiuj ŝiaj servistinoj unuspire. “Ni vidis lin de la fenestro de la mansardo kie ni ŝpinadis linon, kaj ni povis nur rigardadi lin senpaŭze dum li estis videbla.”

“Nu, ĉu, do!” diris la Princino, “tiel vi distras vin, ĉu? Rigardas fremdulojn tra la fenestro! Rapidu doni al mi mian bluan satenan broditan robon, kaj kombu mian oran hararon. Iu faru freŝajn girlandojn el floroj, kaj donu al mi miajn altakalkanumajn ŝuojn kaj mian ventumilon, kaj ordonu ke oni balau mian grandan halon kaj mian tronon, ĉar mi volas ke ĉiuj diri ke mi vere estas ‘Bela Orbuklulino.’”

Imagu kiel diskuris tien kaj tien ĉiuj ŝiaj servistinoj por pretigi la Princinon, kaj kiel pro sia hasto ili kunfrapis siajn kapojn kaj malhelpis unu la alian, ĝis ŝi kredis ke ili neniam finos. Tamen, fine ili kondukis ŝin en la galerion de speguloj por ke ŝi certigu al si ke nenio mankas en ŝia aspekto, kaj post tio ŝi suriris sian tronon el oro, ebono, kaj eburo, dum ŝiaj servistinoj prenis siajn gitarojn kaj komencis softe kanti. Oni enkondukis Ĉarmulon, kaj lin tiom superis mirego kaj admiro ke unue li povis diri eĉ ne unu vorton. Sed baldaŭ li ekkuraĝis kaj faris sian paroladon, brave finante per petego ke la Princino evitigu al li la ĉagrenon

reiri sen ŝi.

“Sinjoro Ĉarmulo,” respondis si, “ĉiuj viaj pledoj estas tre konvinkaj, kaj mi certigas al vi ke al mi multe pli plaĉus komplezi vin ol iun alian, sed sciuj ke antaŭ monato dum mi promenis apud la rivero kun miaj servistinoj mi deprenis mian ganton, kaj dum mi faris tion ringo kiun mi surhavis forglitis de mia fingro kaj ruliĝis en la akvon. Ĉar mi opinias ĝin eĉ pli valora ol mia regno, vi povas kompreni kiom ĉagrenis min perdi ĝin, kaj mi ĵuris neniam aŭskulti geedziĝopropozicion krom se la ambasadoro unue reportos al mi mian ringon. Do nun vi scias kion mi atendas de vi



ĉar se vi parolus dum dek kvin tagoj kaj dek kvin noktoj vi ne povus konvinki min ŝanĝi mian decidon.”

Ĉarmulon multe surprizis tiu respondo, sed li riverencis profunde antaŭ la Princino, kaj petis ŝin akcepti la broditan skarpon kaj la malgrandan hundon kiujn li kunportis. Sed ŝi respondis ke ŝi ne volas donacojn, kaj ke li memoru kion ŝi ĵus diris al li. Reirinte al sia loĝejo li enlitiĝis sen manĝi, kaj lia malgranda hundo, kiu nomiĝis Petol, ankaŭ ne povis manĝi, sed venis kuŝiĝi proksime al li. La tutan nokton Ĉarmulo ĝemis kaj lamentis.

“Kiel mi trovu ringon kiu falis en la riveron antaŭ monato?”

diris li. “Estas senutile provi; la Princino sendube intence ordonis tion al mi ĉar ŝi sciis ke estas neeble.” Kaj li denove ĝemis.

Petol aŭdis lin kaj diris:

“Mia kara mastro, ne perdu esperon; la fortune eble ŝanĝiĝos, vi estas tro bona por estis malfeliĉa. Ni iru al la rivero tuj kiam estos lume.”

Sed Ĉarmulo nur karesis lin dufoje kaj diris nenion, kaj tre baldaŭ li endormiĝis.

Je la unua ekbrilo de la krepusko Petol komencis ĉirkaŭsaltadi, kaj post kiam li vekis Ĉarmulon ili eliris kune, unue en la ĝardenon, kaj poste al la bordo de la rivero, kie ili vagadis tien kaj reen. Ĉarmulo malfeliĉe pensadis pri sia devo reiri sensukcese, kiam li aŭdis iun voki: “Ĉarmulo, Ĉarmulo!” Li ĉirkaŭrigardis kaj kredis sonĝi, ĉar li povis vidi neniun. Do li plumarŝis kaj la voĉo denove vokis: “Ĉarmulo, Ĉarmulo!”

“Kiu vokas min?” diris li. Petol, kiu estis tre malgranda kaj povis rigardi tre zorge en la akvon, kriis: “Mi vidas oran karpon veni.” Kaj efektive jen la granda karmo, kiu diris al Ĉarmulo:

“Vi savis mian vivon en la kampo apud la saliko, kaj mi promesis rekompenci vin. Prenu ĉi tion, ĝi estas la ringo de Princino Orbuklulino.” Ĉarmulo prenis la ringon el la buŝo de Damo Karmo, dankante ŝin milfoje, kaj li kaj malgranda Petol iris rekte al la Palaco, kie iu diris al la Princino ke li petas paroli kun ŝi.

“Ha! povrulo,” diris ŝi, “certe li venis adiaŭi, ĉar li trovis ke estas neeble fari kion mi petis.”

Do envenis Ĉarmulo, kiu prezentis al ŝi la ringon kaj diris:

“Sinjorino, mi plenumis vian peton. Ĉu vi bonvolos edzigi mian mastron?” Vidante sian ringon reportita al ŝi sendifekta, la Princino tiom miris ke ŝi kredis nepre sonĝi.

“Vere, Ĉarmulo,” diris ŝi, “vi nepre estas la favorato de iu feo, alie vi ne povus trovi ĝin.”

“Sinjorino,” respondis li, “min helpis nenio alia ol mia deziro obei vian volon.”

“Ĉar vi estas tiel komplezema,” diris ŝi, “eble vi denove faros servon por mi, ĉar ĝis ĝia plenumiĝo mi neniam edziniĝos. Estas princo ne tre for de ĉi tie nomata Galifrono, kiu iam volis edziniĝi min, sed kiam mi rifuzis li faris teruregajn minacojn kontraŭ

mi, kaj ĵuris detrui mian landon. Sed kion mi povus fari? Mi ne povus edzigi timigan giganton altan kiel turo, kiu manĝas homojn kiel simio kaŝtanojn, kaj kiu parolas tiel laŭte ke ĉiu kiu devas aŭskulti lin plene surdiĝas. Tamen, li ne ĉesas persekuti min kaj mortigi miajn regatojn. Do antaŭ ol mi povos atenti vian proponon vi devos mortigi lin kaj porti al mi lian kapon.”

Ĉarmulon iom ĉagrenis tiu ordono, sed li respondis:

“Bone, Princino, mi batalos tiun Galifronon; mi kredas ke li mortigos min, sed malgraŭe mi mortos defendante vin.”

Pro tio la Princino ektimis kaj diris ĉion elpenseblan por persvadi Ĉarmulon ne batali la giganton, sed estis senutile, kaj li eliris taŭge armi sin, kaj poste, kunprenante malgrandan Petolon, li suriris sian ĉevalon kaj komencis rajdi al la lando de Galifrono. Ĉiu renkontato diris al li kia terura giganto estas Galifrono, kaj ke neniuj kuraĝas proksimiĝis al li; kaj ju pli li aŭdis des pli li timis. Petol penis kuraĝigi lin dirante:

“Dum vi batalos la giganton, kara mastro, mi iros mordi liajn kalkanojn, kaj kiam li klinos sin por rigardi min vi povos mortigi lin.”

Ĉarmulo laŭdis la planon de sia malgranda hundo, sed sciis ke lia helpo malmulte utilis.

Fine li proksimiĝis al la kastelo de la giganto, kaj hororoplene vidis ke ĉiu pado kondukanta al ĝi estas kovrita de ostoj. Post ne longe li vidis Galifronon veni. Lia kapo estis pli alta ol la plej altaj arboj, kaj li kantis per terura voĉo:

Venigu viajn geknabetojn,
Kaj malatentu ĉiujn petojn,
Ĉar mi ja manĝos tiel multajn
Ke saĝajn manĝos mi kaj stultajn.

Responde Ĉarmulo kantis laŭeble plej laŭte laŭ la sama melodio:

Elvenu trovi brav-Ĉarmulon,
Ne timas li gigant-fiulon;
Kvankam li ne ege altas,
Vi falos pro ke li alsaltas.

La versoj ne estis tre korektaj, sed komprenu ke li elpensis ilin

tiel rapide ke estas mirakle ke ili ne estis eĉ malpli bonaj; precipe ĉar li terure timegis tutdume. Kiam Galifrono aŭdis tiujn vortojn li ĉirkaŭrigardis, kaj vidis Ĉarmulon stari, glav-en-mane; tio furiozegigis la giganton, kaj li batis kontraŭ Ĉarmulon per sia giganta fera klabo, kaj tio nepre mortigus lin se ĝi atingus lin, sed tiumomente korako ekstaris sur la kapon de la giganto, kaj, pikante per sia forta beko kaj batante per siaj grandaj flugiloj, tiom konfuzis kaj blindumis lin ke ĉiuj liaj battoj trafis senefike sur la aeron, kaj Ĉarmulo, alkurinte, plurfoje bategis lin per sia akra glavo tiel ke li falis sur la teron. Post tio Ĉarmulo detranĉis lian kapon antaŭ ol li konsciis tion, kaj la korako de apuda arbo kvakis:

“Vidu, mi ne forgesis la bonan agon kiun vi faris por mi mortigante la aglon. Hodiaŭ mi kredis ke mi plenumis mian promeson rekompenci vin.”

“Vere, mi ŝuldas al vi pli da dankoj ol iam vi ŝuldis al mi,” respondis Ĉarmulo.

Post tio li suriris sian ĉevalon kaj forrajdis kun la kapo de Galifrono.

Kiam li atingis la urbon la popolo amase sekvis lin, kriante:

“Jen brava Ĉarmulo, kiu mortigis la giganton!” Kaj iliaj krioj atingis la orelon de la Princino, sed ŝi ne kuraĝis demandi kio okazas, timante ke ŝi aŭdos ke Ĉarmulo estis mortigita. Sed tre baldaŭ li venis al la palaco kun la kapo de la giganto, kiu ankoraŭ teruris ŝin, kvankam ĝi ne plu povis damaĝi ŝin.

“Princino,” diris Ĉarmulo, “mi mortigis vian malamikon; mi esperas ke vi nun konsentos edzigi la Reĝon mian mastron.”

“Ho ve! ne,” diris la Princino, “ne antaŭ ol vi alportos al mi iom da akvo el la Morna Kaverno.

“Ne malproksime de ĉi tie estas profunda kavo, kies enirejon gardas du drakoj kun flamantaj okuloj, kiuj ne permesas ke iu pasu ilin. Kiam vi eniros la kavernon vi trovos enorman truon, en kiun vi devos iri, kaj ĝi estas plena de bufoj kaj serpentoj; ĉe la fundo de tiu truo estas plia kaveto, en kiu estas la Fonto de Sano kaj Belo. Iom de tiu akvo mi nepre devas havi: ĉiu tuŝita de ĝi fariĝas mirinda. La belajoj ĉiam restos belaj, kaj la malbelajoj fariĝos belaj. Kiu estas juna neniam maljuniĝos, kaj kiu estas mal-

juna fariĝas juna. Komprenu, Ĉarmulo, mi ne povus forlasi mian regnon sen kunpreni iom da ĝi.”

“Princino,” diris li, “almenaŭ vi mem neniam bezonos tiun akvon, sed mi estas malfeliĉa ambasadoro, kies morton vi deziras. Kien vi sendos min mi iros, kvankam mi scias ke mi neniam revenos.”

Kaj, ĉar Princino Orbuklulino montris nenian indikon ke ŝi nuligos sian ordonon, li eliris cele la Mornan Kavernon kun sia malgranda hundo. Ĉiu survoje renkontata diris:

“Domaĝe ke bela junulo forĵetas sian vivon tiel facile! Li iras sola al la kaverno, kvankam eĉ se li havus cent virojn kun si li ne povus sukcesi. Kial la Princino postulas neeblaĵojn?”

Ĉarmulo diris nenion, sed li estis tre malfeliĉa. Kiam li estis proksima al la supro de monteto li deĝrimpis sian ĉevalon por ke ĝi paŝtu sin, dum Petol distris sin ĉasante muŝojn. Ĉarmulo sciis ke li ne povas esti malproksima de la Morna Kaverno, kaj ĉirkaŭrigardante li vidis nigran hidan rokon el kiu venis densa fumo, sekvate post momento de unu el la drakoj el kies buŝo kaj okuloj fajro ardis. Lia korpo estis flava kaj verda, kaj liaj krifoj skarлатаj, kaj lia vosto estis tiom longa ke ĝi kuŝis en cent bukloj. Petolon tiom teruris la vidaĵo ke li ne sciis kie kaŝi sin. Ĉarmulo, firme decidinte akiri la akvon aŭ morti, nun eltiris sian glavon, kaj preninte la kristalan flaskon kiun donis al li Princino Orbuklulino por plenigi ĝin, li diris al Petol:

“Mi certas ke mi neniam revenos de ĉi ekspedicio; kiam mi estos morta, iru al la Princino kaj diru al ŝi ke ŝia tasko kostis al mi mian vivon. Poste trovu la Reĝon mian mastron, kaj rakontu al li ĉiujn miajn aventurojn.”

Parolante li aŭdis voĉon voki: “Ĉarmulo, Ĉarmulo!”

“Kiu vokas min?” diris li; kaj li vidis strigon sidantan en kava arbo, kiu diris al li:

“Vi savis mian vivon kiam mi estis kaptita en la reto, nun mi povos rekompenci vin. Konfidu al mi la flaskon, ĉar mi konas ĉiuj vojon de la Morna Kaverno, kaj povos plenigi ĝin el la Fonto de Belo.” Ĉarmulo tute ĝojoplene donis al ŝi la flaskon, kaj ŝi flirtis en la kavernon tute nerimarkate de la drako, kaj post iom da tempo revenis kun la flasko, plena ĝisrande de scintilanta akvo.

Ĉarmulo dankis ŝin plenkore, kaj ĝoje rerapidis al la urbo.

Li iris rekte al la palaco kaj donis la flaskon al la Princino, kiu ne plu povis oponi. Do ŝi dankis Ĉarmulon kaj ordonis ke oni preparu por ŝia foriro, kaj ili baldaŭ kune foriris. La Princino tro-



vis Ĉarmulon tiel agrabla kompano ke ŝi kelkfoje diris al li:

“Kial ni ne restis kie ni estas? Mi povus reĝigi vin, kaj ni estus ege feliĉaj!”

Sed Ĉarmulo respondis nur:

“Mi ne povus fari ion kio tiom ĉagrenus mian mastron, eĉ por regno, nek por plaĉi al vi, kvankam mi opinias vin bela kiel la suno.”

Fine ili atingis la grandan urbon de la Reĝo, kaj li elvenis renkonti la Princinon, kunportante grandiozajn donacojn, kaj oni festis la geedziĝon ege ĝoje. Sed Orbuklulino tiom amis Ĉarmulon ke ŝi ne povis esti feliĉa kiam li ne estis apud ŝi, kaj ŝi konstante laŭdadis lin.

“Sen la agoj de Ĉarmulo,” ŝi diris al la Reĝo, “mi ne estus veninta ĉi tien; vi devus multe dankemi al li, ĉar li faris plej neebajn aferojn kaj akiris por mi akvon el la Fonto de Belo, tiel ke mi neniam povos oldiĝi, kaj mi fariĝos pli bela ĉiujare.”

Tiam diris la malamikoj de Ĉarmulo al la Reĝo:

“Mirigas ke vi ne ĵaluzas, la Reĝino opinias ke neniu en la mondo egalas al Ĉarmulo. Kvazaŭ kiu ajn via sendito ne same sukcesus!”

“Jes, laŭ mia opinio vi pravas,” diris la Reĝo. “Li ĉeniĝu mane kaj piede, kaj estu ĵetita en la turon.”

Do ili prenis Ĉarmulon, kaj rekompence pro lia fidela servado al la Reĝo li fermiĝis en la turo, kie li vidis nur la karceriston, kiu ĉiutage portis al li eron da nigra pano kaj kruĉon da akvo.

Tamen malgranda Petol venis konsoli lin, kaj informis lin pri ĉio okazanta.

Kiam Princino Orbuklulino aŭdis pri kio okazis ŝi ĵetis sin antaŭ la piedojn de la Reĝo kaj petegis lin liberigi Ĉarmulon, sed ju pli ŝi ploris des pli li koleris, kaj fine ŝi komprenis ke ne utilos pli paroli; tamen multe tristigis ŝin. Post tion la Reĝo enkapigis al si ke eble li ne estas sufiĉe bela por plaĉi al Princino Orbuklulino, kaj li pensis bani sian vizaĝon per la akvo el la Fonto de Belo, kiu estis en la flasko sur breto en la ĉambro de la Princino, kien ŝi metis ĝin por povi ofte vidi ĝin. Nu okazis ke unu el la servistinoj de la Princino ĉasante araneon batis la flaskon de sur la breto kaj ĝi rompiĝis, kaj ĉiu guto de la akvo estis elverŝita. Ne sciante kion fari, ŝi haste forbalais la pecojn de kristalo, kaj poste memoris ke en la ĉambro de la Reĝo ŝi vidis flaskon ekzakte samforman, ankaŭ plenan de scintilanta akvo. Do, sen diri eĉ vorton, ŝi alportis ĝin kaj starigis ĝin sur la breto de la Reĝino.

Nu la akvo en tiu flasko estis uzata en la regno por pereigi ĝenulojn. Anstataŭ detranĉi iliajn kapojn laŭ la kutima metodo, oni banis iliajn vizaĝojn per la akvo, kaj ili tuj ekdormis kaj neniam revekiĝis. Do, kiam la Reĝo, celante pliiĝi sian belecon, prenis la flaskon kaj ŝprucigis la akvon sur sian vizaĝon, li ekdormis, kaj neniuj povis veki lin.

Malgranda Petol la unua informiĝis pri tio, kaj li kuris informi Ĉarmulon, kiu sendis lin peti la Princino ne forgesi la povan kaptiton. La tuta palacano konfuziĝis pro la morto de la Reĝo, sed malgranda Petol penetris tra la homamason al la flanko de la Princino, kaj diris:



“Sinjorino, ne forgesu povran Ĉarmulon!”

Kaj ŝi ekmemoris ĉion kion li estis farinta por ŝi, kaj sen diri eĉ vorton al iu ajn ŝi iris rekte al la turo, kaj per siaj propraj manoj deprenis la ĉenojn de Ĉarmulo. Kaj, metinte oran kronon sur lian kapon, kaj la reĝan mantelon sur liajn ŝultrojn, ŝi diris:

“Venu, fidele Ĉarmulo, mi reĝigas vin, kaj edzigos vin.”

Ĉarmulo, denove libera kaj feliĉa, faligis sin al ŝiaj piedoj kaj dankis ŝin pro ŝiaj graciaj vortoj.

Ĉiu ĝojis pro lia reĝigo, kaj la geedziĝo, kiu tuj okazis, estis la plej bela imagebla, kaj Princo Ĉarmulo kaj Princino Orbuklulino vivis feliĉe por ĉiam.¹

¹Madame d'Aulnoy

LA HISTORIO DE WHITTINGTON

RIĈJO WHITTINGTON estis tre juna knabeto kiam liaj patro kaj patrino mortis; tiel juna, ke li neniam konis ilin, nek la lokon kie li naskiĝis. Li vagis tra la lando estante ĉifona kiel ĉevalido, ĝis li renkontis kamioniston irantan al Londono, kiu permesis ke li marŝu la tutan distancon apud la kamiono, sen devi pagi por la veturo. Tio multe plaĉis al malgranda Whittington, ĉar li ege volis vidi Londonon, ĉar li aŭdis ke la stratoj estas pavimitaj per oro, kaj li volis preni buŝelon da ĝi; iam li vidis la stratojn kovritaj de koto anstataŭ oro, kaj trovis sin en nekonata loko, sen amiko, sen manĝaĵo, kaj sen mono.

Kvankam la kamionisto tiom kompleze permesis ke li marŝu senpage apud la kamiono, li atentis ne rekoni lin veninte al la urbo, kaj la povra knabo estis, post nelonge, tiom malvarma kaj tiom malsata ke li vlegis estis en bona kuirejo kaj apud varma kameno en la kamparo.

Dum sia mizero li almozpatis al pluraj personoj, kaj unu el ili diris al li: “Iru labori por pigra fripono.” “Tion mi faros,” diras Whittington, “plenkore; mi laboros por vi, se vi permesos.”

La viro, kiu opiniis tion impertinenta spritaĵo (kvankam la povra knabo nur intencis montri sian pretecon labori), batis lin per bastono kiu tiel vundis lian kapon ke la sango fluus. Tiu-situacie, kaj febla pro manko de manĝaĵoj, li kuŝigis sin ĉe la por-do de iu S-ro Fitzwarren, komercisto, kie la kuiristino vidis lin, kaj ĉar ŝi estis malbonhumora aĉulino, ŝi ordonis ke li foriru atenti siajn aferojn, alie ŝi brogvundos lin. Tiutempe S-ro Fitzwarren venis de la borso, kaj komencis ankaŭ riproĉi la povran knabon, dirante ke li foriru labori.

Whittington respondis, ke volonte li laboros se iu dungos lin,

kaj ke li kapablos se li povos akiri ion por manĝi, ĉar de tri tagoj li ne manĝas, kaj li estas senmona kampara knabo, kaj konas neniun, kaj neniu akceptas dungi lin.

Li strebis stariĝi sed li estis tiel febla ke li tuj refalis, kio instig-



is tiom da kompatato en la komercistoj ke li ordonis al la servistoj enpreni lin kaj doni al li manĝaĵon kaj trinkaĵon, kaj lasu lin helpi la kuiristojn fari kien ajn malpuran laboron kiun ŝi povos transdoni al li. Oni tro emas akuzi almozpeticantojn pri pigreco, sed tute ne entreprenas doni al ili iom da laboro, aŭ konsideri ĉu ili

kapablas fari ĝin, kio ne estas almozo.

Sed ni reiru al Whittington, kiu loĝus feliĉe en tiu inda familio se lin ne mistraktadus la mishumora kuiristino, kiu konstante rostadis aŭ surverŝadis, kaj kiam la turnostango estis neuzata mismanadis povran Whittingtonon! Fine F-ino Alico, la filino de lia mastro, informiĝis pri tio, kaj ŝi ekkompatis la povran knabon, kaj devigis la servistojn afable trakti lin.

Krom la mishumoro de la kuiristino, Whittington havis alian malfacilaĵon superendan por esti feliĉa. Laŭ ordono de lia mastro, li havis ĉifonliton en la mansardo, kie estis multaj ratoj kaj musoj kiuj ofte kuris trans la nazon de la povra knabo kaj ĝenis lin dum lia dormado. Post iom da tempo, tamen, nobelo kiu venis al la domo de lia mastro donis al Whittington pencon ĉar li brosis liajn ŝuojn. Tion li metis en sian poŝon, decidinte uzi ĝin plej avantaĝe; kaj la sekvan tagon, vidante virinon en la strato kun kato sub la brako, li kuris al ŝi por demandi ĝian prezon. La virino (ĉar la kato estis bona muskaptisto) postulis multe da mono por ĝi, sed kiam Whittington diris al ŝi ke en la tuta mondo li havas nur unu pencon, kaj ke li ege volas katon, ŝi lasis ke li havu ĝin.

Tiun katon Whittington kaŝis en la mansardo, timante ke ŝin batos lia malamikego la kuiristino, kaj tie ŝi baldaŭ mortigis aŭ fortimigis la ratojn kaj musojn, tiel ke la povra knabo nun povis dormadi profunde kaj neĝenete.

Baldaŭ poste la komercisto, kiu havis ŝipon pretan veli, alvokis siajn servistojn, laŭ sia kutimo, por ke ĉiu el ili povu kunsendi ion por provi sian fortunon; kaj kion ajn ili sendis estis por pagi nek portokostojn nek impostojn, ĉar li opiniis ĝuste ke Plejpotenca Dio des pli benos lin pro lia akcepto ke la malriĉuloj partoprenu en lia fortune.

Ĉiuj servistoj alvenis escepte de Whittington, kiu, ĉar li havis nek monon nek varojn, ne povis pensi kion sendi por provi sian fortunon; sed lia bona amiko F-ino Alico, kredante ke lia malriĉeco fortenas lin, ordonis venigi lin.

Ŝi tiam proponis enmeti iom en lia nomo, sed la komercisto diris al sia filino ke tio ne taŭgas, ke devas esti io posedata de li. Je tio Whittington diris ke li havas nenion, escepte de kato kiun li aĉetis per la penco donita al li. “Alportu vian katon, knaĉjo,” diris

la komercisto, “kaj sendu ŝin.” Whittington alportis povran kanjon kaj transdonis ŝin al la kapitano, larmante, ĉar li diris ke nun lin ĝenos la ratoj kaj musoj same kiel antaŭe. La tuta grupo ridis pro lia ago sed F-ino Alico, kiu kompatis la povran knabon, donis al li iom da mono por aĉeti novan katon.

Dum kanjo majstris la ondojn de la maro, la tirana mastrino de povra Whittington, la kuiristino, severe batadis lin, kaj tiel kruele mistraktis lin, kaj tiom mokis lin ĉar li sendis sian katon sur la maron, ke fine la povra knabo decidis fuĝi de sia loko, kaj pakinte siajn malmultajn posedaĵojn, li ekiris tre frue dum la mateno de La Tago de Sanktuloj. Li marŝis ĝis Halloway, kaj tie li sidiĝis sur ŝtonon por konsideri kion fari; sed dum li tiel meditadis, la sonoriloj de Bow, da kiuj estis nur ses, komencis sonadi; kaj li kredis ke iliaj sonoj celas lin kaj ke ili kantas:

“Turnu vin, Whittington,
Trifoje Londonestro.”

“Londonestro!” diris li al si; “kion oni ne tolerus por esti Estro de Londono, kaj veturi en tiel eleganta kaleŝo? Nu, mi reiros, kaj trasuferos la batadojn kaj mistraktojn kiun faras Cicely, prefere ol maltrafi la oportunon fariĝi Urbestrol!” Do hejmen li iris, kaj feliĉe eniris la domon kaj komencis labori antaŭ ol S-ino Cicely revenis.

Nun ni devas sekvi F-inon Kanjon al la bordo de Afriko. Kiel danĝeraj estas marvojaĝoj, kiel necertaj estas la ventoj kaj ondoj, kaj kiom da akcidentoj atendas vivon sur la maro!

La ŝipo en kiu estis la kato estis multe batata surmare, kaj fine, de kontraŭaj ventoj, estis pelita sur parton de la Bordo de Barbario, kie loĝis Maŭroj ne konataj de la Angloj. Tiuj homoj akceptis niajn samlandanojn tre ĝentile, kaj tial la kapitano, por negoci varojn kun ili, montris al ili la desegnojn de la varoj kiujn li havas enŝipe, kaj sendis kelkajn el ili al la Reĝo de la lando, al kiu ili tiom plaĉis ke li alvokis la kapitanon kaj la makleriston al sia palaco, kiu estis ĉ. du kilometrojn for de la maro. Tie ili estis lokitaj, laŭ la kutimo de tiu lando, sur riĉajn tapiŝojn, sur kiuj estis oraj kaj arĝentaj flordesegnaĵoj; kaj la Reĝo kaj la Reĝino sidis ĉe la supra finaĵo de la ĉambro; kaj oni enportis la manĝon,

kiu konsistis el multaj pladoj; sed tuj kiam la pladoj estis metitaj antaŭ la homojn miriga nombro da ratoj kaj musoj venis el ĉiu angulo, kaj voris la manĝaĵojn tujtujege.

La makleristo, surprizite, sin turnis al la nobeloj kaj demandis ĉu tiuj fibestoj ne ofendas. “Ho! jes,” diris ili, “ili ege ofendas; kaj la Reĝo donus duonon de sia trezoro por liberiĝi de ili, ĉar ili ne nur detruas lian manĝon, kiel vi vidas, sed ili atakas lin en lia ĉambro, kaj eĉ en la lito, tiel ke li devas esti observata dum li dormas, pro timo al ili.”

La makleristo saltis pro ĝojo; li memoris povran Whittingtonon kaj lian katon, kaj diris al la Reĝo ke li havas enŝipe beston kiu pereigos ĉiuj tiujn fibestojn tuj. La koro de la Reĝo altiĝis tiom pro la ĝojo kiun donis al li tiu informo ke lia turbano falis de lia kapo. “Portu tiun beston al mi,” diris li; “fibestoj estas teruraj en kortego, kaj se ŝi faros kion vi diras mi ŝargos vian ŝipon per oro kaj juveloj interŝanĝe por ŝi.” La makleristo, kiu estis bona negocisto, uzis tiun oportunon por prezenti la meritojn de F-ino Kanjo. Li diris al lia Moŝto ke estus tre ĝene se ŝi mankus, ĉar, post ŝia foriro, la ratoj kaj musoj eble detruus la varojn en la ŝipo—sed por plaĉi al lia Moŝto li alvenigos ŝin. “Kuru, kuru,” diris la Reĝino; “mi malpacienas vidi la karan beston.”

Forkuris la makleristo, dum nova manĝo prepariĝis, kaj li revenis kun la kato ĝuste dum la ratoj kaj musoj voradis ankaŭ tion. Li tuj surteren metis F-inon Kanjon, kiu mortigis grandan nombron da ili.

La Reĝo ĝojegis vidante siajn malnovajn malamikojn detruataj de tiel malgranda besto, kaj al la Reĝino multe plaĉis, kaj ŝi deziris ke oni portu la katon pli proksimen por ke ŝi rigardu ŝin. Do la makleristo vokis “Kanjo, kanjo, kanjo,” kaj ŝi venis al li. Li tiam prezentis ŝin al la Reĝino, kiu retiris sin, kaj timis tuŝi beston kiu tiel kaosis inter la ratoj kaj musoj; tamen, kiam la makleristo karesis la katon kaj diris “Kanjo, kanjo!” la Reĝino ankaŭ tuŝis ŝin kaj diris “Kanjo, kanjo!” ĉar ŝi ne lernis la anglan lingvon.

Li do metis ŝin nur la sinon de la Reĝino, kie ŝi, ronronante, ludis per la mano de ŝia Moŝto, kaj poste perkante endormigis sin.

La Reĝo vidinte la agojn de F-ino Kanjo, kaj informite ke ŝiaj

katidoj stokos la tutan landon, marĉandis kun la kapitano kaj la makleristo por aĉeti la tutan kargon de la ŝipo, kaj post tio donis al ili dekoble pli por la kato ol por la tuta cetera kargo. Post tio, adiaŭinte iliajn Moŝtojn kaj aliajn nobelojn de la kortego, ili velis per bona vento al Anglio, kie ni nun atendu ilin.

Apenaŭ mateniĝis kiam S-ro Fitzwarren ellitiĝis por kalkuli la monon kaj aranĝi siajn negocoplanojn por tiu tago. Li ĵus eniris la kalkulejon, kaj sidigis sin ĉe la labortablo, kiam iu venis, frap,



frap, ĉe la pordo. “Kiu estas?” diris S-ro Fitzwarren. “Amiko,” respondis la alia. “Kiu amiko povas veni je ĉi tia nekonvena horo?” “Vera amiko neniam venas nekonvene,” respondis la alia. “Mi venis porti al vi bonan informon pri via ŝipo Unukornulo.” La komercisto stariĝis tiel haste ke li forgesis sian podagron; li tuj malfermis la pordon, kaj vidiĝis atendante la kapitano kaj la makleristo, kun kofro da juveloj, kaj konosamento, pro kiuj la komercisto levis siajn okulojn kaj dankis la ĉielon ĉar ĝi sendis al li tiel prosperigan vojaĝon. Ili rakontis al li la aventurojn de la

kato, kaj montris al li la kofron da juveloj kiujn ili alportis por S-ro Whittington. Je tio li kriis vere fervore, kvankam ne ege poezie:

“Voku lin per respektoplena ton’
Kaj nomu lin Sinjoro Whittington.”

Ne estas nia tasko komenti pri ĉi tiuj linioj; ni ne estas kritikistoj, ni estas historiistoj. Sufiĉas al ni ke ili estas la vortoj de S-ro Witzwarren; kaj kvankam estas flankafero, kaj eble ni ne kapablas pruvi ke li estas bona poeto, ni baldaŭ konvinkos la leganton ke li estis bonulo, kaj tio estas multe pli grava; ĉar kiam kelkaj ĉeestantoj diris al li ke tiu trezoro estas tro granda por tia malriĉulo kia Whittington, li diras: “Je Dio, mi ne deprenos de li eĉ pencon; ĝi apartenas al li, kaj li ricevos ĉiun moneron.” Li sekve ordonis envenigi S-ron Whittingtonon, kiu tiutempe purigadis la kuirejon kaj verŝajne petis permeson ne eniri la kalkulejon, dirante ke la ĉambro estas balaita kaj liaj ŝuoj estas malpuraj kaj plenaj de plandonajloj. Tamen la negocisto devigis lin enveni, kaj ordonis meti seĝon por li. Je tio, kredante ke ili intencas moki lin, kiel tro ofte okazis en la kuirejo, li petegis sian mastron nek moki povran simplulon kiu planas nenian damaĝon al ili, sed lasu lin okupi sin per siaj taskoj. La negocisto, preninte lian manon, diris: “Efektive, S-ro Whittington, mi seriozas al vi, kaj venigis vin por gratuli vin pro via granda sukceso. Via kato akiris por vi pli da mono ol mi posedas en la mondo, kaj longe vi ĝuu ĝin kaj estu feliĉa!”

Fine, kiam oni montris al li la trezoron, kaj konvinkis lin ke la tuto apartenas al li, li surgenuiĝis kaj dankis la Eternulon pro ĉi ties providenca prizorgo de tia povra mizerulo. Li sekve de tio metis la tutan trezoron antaŭ la piedon de sia mastro, kiu rifuzis preni eĉ eron da ĝi, sed diris al li ke li elkore ĝojas pro lia prosperiĝo, kaj esperas ke la riĉo akirita konsolos lin kaj feliĉigos lin. Post tio li petis al sia mastrino, kaj al sia bona amiko F-ino Alico, kiu rifuzis preni eĉ eron de la mono, sed diris al li ke ŝi elkore ĝojas pro lia bonfortuno, kaj deziras al li ĉian imageblan feliĉon. Post tio li rekompencis la kapitanon, la makleriston, kaj la anaron de la ŝipo pro ilia zorgo al lia kargo. Li simile distribuis donacojn al ĉiuj servistoj en la domo, kaj eĉ ne forgesis sian malnovan mal-

amikon la kuiristinon, kvankam ŝi malmulte meritis donacon.

Post tio S-ro Fitzwarren konsilis S-ron Whittingtonon alvoki la necesulojn kaj vesti sin kiel sinjoron, kaj proponis al li sian domon kiel loĝejon ĝis li povos akiri por si pli bonan.

Nu, okazis, kiam la vizaĝo de S-ro Whittington estis lavita, lia hararo estis frizita, kaj li estis vestita per riĉa vestaro, ke li montrigis noblaspekta junulo; kaj ĉar riĉo multe kontribuas al la memfido de persono, li post kelka tempo forlasis sian ŝafecan konduton kiun precipe kaŭzis deprimi, kaj li baldaŭ fariĝis sprita kaj bona kompano, tiom ke F-ino Alico, kiu antaŭe kompatis lin, nun ekamis lin.

Kiam ŝia patro perceptis ke ili tiel amas unu la alian li proponis geediziĝon, pri kio ambaŭ personoj gaje konsentis, kaj la Ĉefurbestro, Magistrato, Ŝerifoj, la Kompanio de Eldonistoj, la Reĝa Akademio de la Artoj, kaj nombro da eminentaj negocistoj ĉeestis la ceremonion, kaj estis elegante distritaj per prezentaĵo okazigita tiucele.

La historio ankaŭ rakontas ke ili vivis tre feliĉe, naskis plurajn infanojn, kaj mortis tre maljunaj. S-ro Whittington postenis kiel Ŝerifo de Londono kaj estis trifoje Ĉefurbestro. Dum la lasta jaro de sia ĉefurbestreco li gastigis Reĝon Henrikon V kaj ĉi ties edzinon, post kiam ili konkeris Francion, kaj dum tiu vizito la Reĝo, parolante pri la merito de Whittington, diris: “Neniam antaŭe havis princo tian regaton;” kiam tio estis dirita al Whittington ĉetable, li respondis: “Neniam antaŭe havis regato tian reĝon.” Lia Moŝto, omaĝe al lia bona karaktero, honoris lin per kavalireco post nelonga tempo.

Kav-o Rikardo multajn jarojn antaŭ sia morto konstante manĝigis nombron da malriĉaj civitanoj, konstruigis preĝejon kaj kolezion por ili, kun ĉiujara stipendio por malriĉaj studentoj, kaj proksime al ĝi konstruigis hospitalon.

Li ankaŭ konstruigis la karcerejon Newgate-n kaj libere donacis al la Hospitalo Sankta Bartolomeo kaj al aliaj publikaj poralmozulaj institucioj.

LA MIRINDA ŜAFO

FOJE—en la epoko kiam vivis feoj—estis reĝo kiu havis tri filinojn, kiuj ĉiuj estis junaj, kaj lertaj, kaj belaj; sed la plej juna el la trio, kiu nomiĝis Mirando, estis la plej bela kaj la plej amata.

La Reĝo, ŝia patro, donis al ŝi pli da roboj kaj juveloj en unu monato ol al la aliaj en jaro; sed ŝi estis tiel malavara ke ŝi dividis ĉion kun siaj fratinoj, kaj ili ĉiuj estis feliĉaj kaj amis unu la alian kiel eble plej multe.

Nu la Reĝo havis kelkajn kverelemajn najbarojn, kiuj, enuaj pro lia paca vivo, komencis militi lin tiel feroce ke li timis esti tute venkita se li ne multe strebos defendi sin. Do li grupigis grandan armeon kaj eliris batali ilin, lasante la Princinojn kun iliaj guvernistinoj en kastelo al kie oni portis informon pri la milito ĉiutage—kelkfoje ke la Reĝo kaptis urbon, aŭ venkis batalon, kaj, fine, ke li plene superis siajn malamikojn kaj ĉasis ilin el sia regno, kaj revenas al la kastelo kiel eble plej rapide, por vidi sian karan malgrandan Mirandon kiun li tiom amas.

La tri Princinoj surmetis satenajn robojn, kiujn ili faris cele ĉi tiun gravan eventon, unu verdan, unu bluan, kaj la tria estis blanka; iliaj juveloj estis samkoloraj. La plej aĝa surportis smeraldojn, la dua turkizojn, kaj la plej juna diamantojn, kaj tiel vestite ili iris saluti la Reĝon, kantante versojn kiujn ili verkis pri liaj venkoj.

Vidante ilin ĉiujn tiel belaj kaj gajaj li ĉirkaŭbrakis ilin tenere, sed Mirandon li kisis pli ol ambaŭ aliajn.

Baldaŭ oni prezentis grandiozan bankedon, kaj la Reĝo kaj liaj filinoj sidiĝis por manĝi, kaj ĉar li ĉiam opiniis ke estas speciala signifo en ĉio, li diris al la plej aĝa:

“Diru al mi kial vi elektis verdan robon.”

“Sinjoro,” ŝi respondis, “aŭdinte pri viaj venkoj mi opiniis ke verdo esprimos miajn ĝojon kaj esperon ke vi rapide revenos.”

“Jen tre bona respondo,” diris la Reĝo; “kaj vi, mia filino,” li daŭrigis, “kial vi prenis bluan robon?”

“Sinjoro,” diris la Princino, “por montri ke ni konstante esperas vian sukceson, kaj ke vidi vin estas por mi egale bonvene kiel vidi la ĉielon kun ĝiaj plej belaj steloj.”

“Nu,” diris la Reĝo, “viaj saĝaj respondoj mirigas min; kaj vi, Mirando. Pro kio vi vestis vin tute per blanko?”

“Ĉar, sinjoro,” ŝi respondis, “blanko pli konvenas al mia beleco ol ĉio alia.”



“Kio!” diris la Reĝo kolere, “ĉu nur pri tio vi pensis, vanta infano?”

“Mi kredis ke mi plaĉos al vi,” diris la Princino; “jen ĉio.”

La Reĝo, kiu amis ŝin, kontentiĝis pri tio, kaj eĉ ŝajnigis ĝoji ke ŝi ne unue diris al li ĉiujn siajn kialojn.

“Kaj nun,” diris li, “ĉar mi bone manĝis, kaj ankoraŭ ne venis la horo por enlitiĝi, diru al mi kion vi sonĝis hieraŭ nokte.”

La plej aĝa diris ke ŝi sonĝis ke li aĉetis por ŝi robon, kaj la valoraj ŝtonoj kaj ora brodaĵo sur ĝi estis pli brilaj ol la suno.

La sonĝo de la dua estis ke la Reĝo alportis al ŝi ŝpinradon kaj ŝpinbastonon, por ke ŝi ŝpinu por li kelkajn ĉemizojn.

Sed la plej juna diris: “Mi sonĝis ke mia dua fratino estas edziniĝonta, kaj je ŝia edziniĝtago, vi, patro, tenas oran kruĉon kaj diras: ‘Venu, Mirando, kaj mi tenos la akvon por ke vi trempu viajn manojn en ĝin.’”

La Reĝo ege koleriĝis aŭdante tiun sonĝon, kaj li terure sulkis sian frunton; efektive, li tiel hide mienis ke ĉiu komprenis kiom kolera li estas, kaj li stariĝis kaj foriris litten tre haste; sed li ne povis forgesi la sonĝon de sia filino. “Ĉu la fiera knabino volas sklavigi min?” li diris al si. “Ne surprizas min ke ŝi elektis vesti sin per blanka sateno sen pensi pri mi. Ŝi ne opinias min inda je sia konsiderado! Sed mi baldaŭ ĉesigos ŝian vanton!”

Li stariĝis furioze, kaj kvankam ankoraŭ ne estis taglume, li alvokis la Kapitanon de la Korpogardistaro, kaj diris la li:

“Ĉu vi aŭdis la sonĝon de Princino Mirando? Mi opinias ke ĝi signifas strangajn komplotojn kontraŭ mi, tial mi ordonas ke vi forkonduku ŝin en la arbaron kaj mortigu ŝin, kaj por ke mi estu certa ke tio estas farita, vi devos porti al mi ŝiajn koron kaj langon. Se vi povos trompi min mi ekzekutigos vin!”

La Kapitanon de la Gardistaro multe mirigis aŭdi tiun barbaran ordonon, sed li ne kuraĝis oponi la Reĝon ĉar li timis eĉ pli kolerigi lin, kaj kaŭzi ke li sendos iun alian, do li respondis ke li prenos la Princinon kaj agos laŭ la ordono de la Reĝo. Kiam li iris al ŝia ĉambro ili apenaŭ enlasis lin, ĉar estis ankoraŭ iom frue, sed li diris ke la Reĝo alvokis Mirandon, kaj ŝi rapide stariĝis kaj elvenis; malgranda nigra knabino nomata Patipato tenis ŝian tren-aĵon, kaj ŝia dorlotata simio kaj ŝia malgranda hundo postkuris ŝin. La simio nomiĝis Grabuĝono, kaj la malgranda hundo Tintino.

La Kapitano de la Gardistaro petis Mirandon malsupren veni en la ĝardenon kie la Reĝo ĝuas la freŝan aeron, kaj kiam ili iris tien, li ŝajnigis serĉi lin, sed ĉar li ne estis trovebla, li diris:

“Sendube lia Moŝto promenis en la arbaron,” kaj li malfermis la pordeton kiu kondukas al ĝi kaj ili trairis.

Jam la taglumo komencis aperi, kaj la Princino, rigardante sian kondukanton, vidis ke estas larmoj en liaj okuloj kaj li aspektas tro trista por paroli.

“Kio estas?” ŝi diris plej afable. “Vi aspektas tre malĝoja.”

“Ve! Princino,” li respondis, “kiu ne malĝojus ordonite fari tian teruraĵon kian mi devas? La Reĝo ordonis ke mi mortigu vin ĉi tie, kaj portu viajn koron kaj langon al li, kaj se mi malobeos mi mortos.”

La povra Princino terurigis, ŝi tre paliĝis kaj komencis plori softe.

Rigardante la Kapitanon de la Gardistaro per siaj belaj okuloj, ŝi diris milde:

“Ĉu via koro vere permesos mortigi min? Mi neniam faris



malbonon al vi, kaj ĉiam parolis favore pri vi al la Reĝo. Se mi meritis la koleron de mia patro mi suferus sen murmuro, sed, ve! li maljuste plendus pri mi, kvankam mi ĉiam traktis lin ame kaj respekte.”

“Nenion timu, Princino,” diris la Kapitano de la Gardistaro. “Mi multe preferus mem morti ol damaĝi vin; sed eĉ se mi ja mortos vi ne estos sekura: ni devos trovi ian rimedon por ke la Reĝo kredu ke vi estas morta.”

“Kion ni povos fari?” diris Mirando; “krom se vi portos al li miajn koron kaj langon, li rifuzos kredi vin.”

La Princino kaj la Kapitano de la Gardistaro paroladis tiel serioze ke ili ne pensis pri Patipato, sed ŝi aŭdis ĉion diratan de ili, kaj nun venis kaj ĵetis sin al la piedoj de Mirando.

“Sinjorino,” ŝi diris, “mi proponas al vi mian vivon; mi estu mortigita, mi vere tre feliĉe mortos por tiel bonkora mastrino.”

“Sed Patipato,” kriis la Princino, kisante ŝin, “tio nepre konvenus, via vivo estas por mi same valora kiel mia, precipe post tia pruvo pri via amo kian vi ĵus montris al mi.”

“Vi pravas, Princino,” diris Grabuĝono, antaŭen venante, “amante tian fidelan sklavinton kia Patipato; ŝi pli utilas al vi ol mi, mi proponas al vi miajn langon kaj koron plej volonte, precipe ĉar mi volas grandigi mian nomon en Koboldolando.”

“Ne, ne, mia eta Grabuĝono,” respondis Mirando; “mi ne povas toleri la penson mortigi vin.”

“Tia bona hundeto kia mi,” kriis Tintino, “ne povus pensi pri lasi iun el vi morti por sia mastrino. Se iu mortu por ŝi, mortu mi.”

Kaj tiam komenciĝis granda disputo inter Patipato, Grabuĝono, kaj Tintino, kaj ili komencis kolere paroladi, ĝis fine Grabuĝono, kiu estis pli rapida ol la aliaj, kuris al la plejsupro de la plej proksima arbo, kaj lasis sin fali, kapantaŭe, al la tero, kaj tie ŝi kuŝis—tute morta!

La Princino multe bedaŭris, sed ĉar Grabuĝono estis vere morta, ŝi permesis ke la Kapitano de la Gardistaro prenu ŝian langon; sed, ve! ĝi estis tiel malgranda—ne pli granda ol la dikfingro de la Princino, ke ili decidis lamente ke ĝi estas tute senutila: la Reĝon ĝi ne eĉ dum momento trompus!

“Ve! mia simieto,” kriis la Princino, “mi perdis vin, tamen mia situacio ne estas pli bona ol antaŭe.”

“La honoro savi vian vivon estos mia,” interrompis Patipato, kaj, antaŭ ol ili povis haltigi ŝin, ŝi prenis tranĉilon kaj detranĉis sian kapon tuje.

Sed kiam la Kapitano de la Gardistaro volis preni ŝian langon ĝi montriĝis tute nigra, do ankaŭ ĝi ne trompus la Reĝon.

“Ĉu mi ne misfortunas?” kriis la povra Princino; “mi perdas ĉion kion mi amas, kaj ne pli bone statas malgraŭ tio.”

“Se vi estus akceptinta mian oferton,” diris Tintino, “vi bezo-

nus nur min bedaŭri, kaj mi ricevus ĉiujn viajn dankojn.”

Mirando kisis sian hundeton, plorante tiel amare, ke fine ŝi ne povis elteni, kaj ŝi turnis sin en la arbaron. Kiam ŝi retro-rigardis la Kapitano de la Gardistaro estis for, kaj ŝi estis sola, escepte de Patipato, Grabuĝono, kaj Tintino, kiuj kuŝas sur la tero. Ŝi ne povis foriri de tiu loko antaŭ ol enterigi ilin en belan muskan tombon ĉe la piedo de arbo, kaj ŝi skribis iliajn nomojn sur la ŝelo de la arbo, kaj ke ili ĉiuj mortis por savi ŝian vivon. Kaj post tio ŝi komencis pensi pri kien ŝi povos iri por esti sekura—ĉar ĉi arbaro estis tiel proksima al la kastelo de ŝia patro ke ŝi eble estus vidata kaj rekonata de la unua preterpasanto, kaj, krome, ĝi estis plena de leonoj kaj lupoj, kiuj vorus principinon same rapide kiel vagintan kokidon. Do ŝi komencis marŝi laŭeble plej rapide, sed la arbaro estis tiel granda kaj la suno estis tiel varmega ke ŝi preskaŭ mortis pro varmego kaj timego kaj laceco; negrave kiudirekten ŝi rigardis, la arbaro aspektis senfina, kaj ŝi tiom timis ke ĉiuminute ŝi imagis aŭdi la Reĝon postkuri ŝin por mortigi ŝin. Vi povas imagi kiom mizera ŝi estis, kaj kiel ŝi ploris dum ŝi pluiris, ŝi ne sciis kiun padon sekvi, kaj la dornaj arbustoj gratadis ŝin terure kaj disŝiris ŝian belan robon.

Fine ŝi aŭdis la blekadon de ŝafo, kaj diris al si:

“Sendube estas ŝafistoj ĉi tie kun siaj gregoj; ili montros al mi la vojon al iu vilaĝo kie mi povos loĝi maskite kiel kamparanino. Ve! ne ĉiam la reĝoj kaj princoj estas la plej feliĉaj homoj en la mondo. Kiu povas kredi ke iam mi devus fuĝi kaj kaŝi min ĉar la Reĝo, tute senkiale, volas mortigi min?”

Dirante tion ŝi antaŭeniris cele la lokon el kie ŝi aŭdis la blekadon, sed multe surprizis ŝin kiam, en bela malgranda libera spaco, tute ĉirkaŭata de arboj, ŝi vidis grandan ŝafon; ĝia lano estis blanka kiel neĝo, kaj ĝiaj kornoj brilis kiel oro; ĝi havis girlandon de floroj ĉirkaŭ sia kolo, kaj ĉenojn da grandaj perloj ĉirkaŭ siaj kruroj, kaj kolumon de diamantoj; ĝi kuŝis sur dekliveto da oranĝofloroj, sub baldakeno de orŝtofo kiu protektis ĝin kontraŭ la varmego de la suno. Preskaŭ cent aliaj ŝafoj disstaris, ne manĝante la herbon, sed kelkaj trinkis kafon, limonadon, aŭ ŝorbeton, aliaj manĝis glaciaĵon, frambojn kun kremo, aŭ dolĉaĵojn, kaj ankoraŭ aliaj ludis. Multaj el ili surhavis orajn kolumojn kun


juveloj, floroj, kaj rubandoj.

Mirando ekhaltis mirante pro tiu neanticipita vidaĵo, kaj rigardis ĉiudirekten por trovi la ŝafiston de ĉi tiu surpriza grego, kiam la bela ŝafo venis saltante cele ŝin.

“Proksimiĝu, bela Princino,” li kriis; “ne timu bestojn tiel mildajn kaj pacemajn kiel ni.”

“Kia mirindaĵo!” kriis la Princino, retirante sin iomete. “Jen ŝafo kapabla paroli.”

“Via simio kaj via hundo kapablis paroli, sinjorino,” diris li;



“Ĉu vi miras pli pri ni ol pri ili?”

“Feo donis al ili la kapablon paroli,” respondis Mirando. “Do mi kutimiĝis al ili.”

“Eble same okazis pri ni,” li diris, ridetante ŝafe. “Sed, Princino, kio instigis vin veni ĉi tien?”

“Mil misfortunoj, Sinjoro Ŝafo, ŝi respondis. “Mi estas la plej malfeliĉa princino en la mondo, kaj mi serĉas ŝirmon kontraŭ la kolero de mia patro.”

“Venu kun mi, sinjorino,” diris la ŝafo; “mi proponas al vi

kaŝejon pri kiu scios nur vi, kaj kie vi estos la mastrino de ĉio kion vi vidas.”

“Mi vere ne povas sekvi vin,” diris Mirando, “ĉar mi estas tro laca por fari eĉ unu plian paŝon.”

La Ŝafo kun la oraj kornoj ordonis alvenigi lian kaleŝon, kaj post momento aperis ses kaproj, jungitaj al kukurbo, kiu estis tiel granda ke du homoj povus tre facile sidi en ĝi, kaj estis tegita per kusenoj el veluro kaj lanugo. La Princino paŝis en ĝin, multe amuzate de tia nova speco de kaleŝo, la Reĝo de la Ŝafoj prenis si-an lokon apud ŝi, kaj la kaproj forkuris tirante ilin plenrapide, kaj haltis nur kiam ili atingis kavernon, kies enirejon blokis granda ŝtono. Tiun la Reĝo tuŝis per sia piedo, kaj tuj ĝi falis, kaj li invitis la Princinon eniri sentime. Nu, se ŝi ne estus tiom alarmita de ĉio okazinta, nenio instigus ŝin eniri tiun teruran kavon, sed ŝi tiom timis tion kio eble estas malantaŭ ŝi ke ŝi eĉ ĵetus sin en puton tiumomente. Do, senhezite, ŝi sekvis la Ŝafon, kiu iris antaŭ ŝi, suben, suben, suben, ĝis ŝi kredis ke certe ili eliros ĉe la alia flanko de la mondo—efektive, ŝi ne estis certa ke li ne kondukas ŝin en Felandon. Fine ŝi vidis antaŭ si grandan ebenaĵon, tute kovritan de ĉiaspecaj floroj, kiesodoro ŝajnis al ŝi pli plaĉa ol ĉio iam antaŭe flarita; larĝa rivero de oranĝoflora akvo fluis ĉirkaŭ ĝi, kaj fontanoj el vino ĉiuspeca fluis ĉiudirekte kaj estigis plej belajn kaskadetojn kaj rojojn. La ebenaĵon kovris strangeĝaj arboj, estis tutaj avenuoj kie perdrikoj, jam rostitaj, pendis de ĉiu branĉo, aŭ, se oni preferus fazanojn, koturnojn, meleagrojn, aŭ kuniklojn, oni bezonas nur turni sin dekstren aŭ liven kaj neeviteble oni trovas ilin. Kelkloke la aeron obskurigis pluvoj da omarpasteĉoj, blankaj pudingoj, kolbasoj, tortoj, kaj ĉiuspecaj dolĉaĵoj, aŭ da oro kaj arĝento, diamantoj kaj perloj. Tiu nekutima speco de pluvo, kaj la agrableco de la tuta loko, sendube logus nombron da homoj al si, se la Reĝo de la Ŝafo estus pli sociema, sed laŭ ĉiuj raportoj estas klare ke li estis seriozema kiel juĝisto.

Ĉar estis la plej plaĉa parto de la jaro kiam Mirando venis al ĉi tiu plezuriga lando, la sola palaco kiun ŝi vidis estis longa vico de oranĝarboj, jasmenoj, centrantoj, kaj muskorojoj, kaj iliaj interplektiĝintaj branĉoj konsistigis la plej belajn ĉambrojn eblajn, tegitajn per ora kaj arĝenta gazoj, kaj ili havis grandajn

spegulojn kaj kandelingojn, kaj plej belajn bildojn. La mirinda Ŝafo petis ke la Princino konsideru sin reĝino de ĉio kion ŝi vidas, kaj certigis al ŝi ke, kvankam de pluraj jaroj li estas tre trista kaj havas grandajn problemojn, ŝi kapablas forgesigi al li lian tutan malfeliĉon.

“Vi estas tiel afabla kaj malavara, nobla Ŝafo,” diris la Princino, “ke mi ne povas sufiĉe danki vin, sed mi devas agnoski ke ĉio kion mi vidas ĉi tie ŝajnas al mi tiel eksterordinara ke mi ne scias kion pensi pri ĝi.”

Dum ŝi parolis bando de belaj feoj venis kaj proponis al ŝi sukcesajn korbojn plenajn de fruktoj, sed kiam ŝi etendis siajn manojn al ili ili forglitis, kaj ŝi povis senti nenion kiam ŝi penis tuŝi ilin.

“Ho!” ŝi kriis, “kio ili povas esti? Kun kiu mi estas?” kaj ŝi komencis plori.

Tiumomente la Reĝo de la Ŝafoj revenis al ŝi, kaj tiom dolorigis lin la trovo ke ŝi ploras ke li volonte ŝirus sian lanon.

“Kio ĝenas, bela Princino?” li kriis. “Ĉu iu ne dece traktis vin respektoplene?”

“Ho! ne,” diris Mirando; “nur estas ke mi ne kutimas loĝi kun spiritoj kaj kun parolantaj ŝafoj, kaj ĉio ĉi tie timigas min. Vi tre afable kondukis min al ĉi tiu loko, sed mi eĉ pli dankos vin se vi rekondukos min en la mondon supre.”

“Ne timu,” diris la mirinda Ŝafo; “mi petas ke vi paciencu kaj aŭskultu la historion de miaj misfortunoj. Foje mi estis reĝo, kaj mia regno estis la plej grandioza en la mondo. Miaj regatoj amis min, miaj najbaroj enviis kaj timis min. Min respektis ĉiu, kaj oni diris ke neniu reĝo iam meritis tion pli.

“Mi tre amis ĉasadi, kaj unu tagon, ĉasante vircervon, mi postlasis miajn servistojn; subite mi vidis la beston salti en lageton da akvo, kaj mi senpripense urĝis mian ĉevalon sekvi ĝin, sed antaŭ ol ni iris multajn paŝojn mi sentis eksterordinaran varmegon, anstataŭ la malvarmecon de la akvo; la lageto sekiĝis, granda abismo malfermiĝis antaŭ mi, el ĝi fajraj flamoj saltis, kaj mi falis senhelpe al la fundo de klifo.

“Mi kredis min pereanta, sed baldaŭ voĉo diris: ‘Sendanka Princo, eĉ ĉi fajno ne sufiĉas por varmigi vian fridan koron!’

“Kiu plendas pri mia malvarmeco en ĉi morna loko?” mi kriis.

“Malfeliĉulo kiu senespere amas vin,” respondis la voĉo, kaj sammomente la flamoj komencis flagri kaj ĉesi bruli, kaj mi vidis feinon, kiun mi konis ekde mia plej frua memoro, kaj kies hideco ĉiam teruris min. Ŝi apogis sin per la brako de plej bela junulino, kiu havis orajn ĉenojn sur siaj pojno kaj evidente estis ŝia sklavo.

“Nu, Ragoto,” mi diris, ĉar tiel nomiĝis la feino, “kion signifas ĉio ĉi? Ĉu pro viaj ordonoj mi estas ĉi tie?”

“Kaj kiu kulpas,” ŝi respondis, “ke vi neniam komprenis min ĝis nun? Ĉu potenca feino kia mi devas degni klarigi siajn farojn al vi kiu estas ne pli bona ol formiko, kompare kvankam vi ja opinias vin granda reĝo.”

“Nomu min kiel vi deziras,” mi diris senpacience; “sed kion vi volas—mian kronon, aŭ miajn urbojn, aŭ miajn trezorojn?”

“Trezorojn!” diris la feino, malestime. “Se mi volus mi povus fari iun el miaj kuirejservistoj pli riĉa kaj pli potenca ol vi. Mi ne volas viajn trezorojn, sed,” ŝi pludiris softe, “se vi donos al mi vian koron—se vi edzinigos min—mi aldonos dudek regnojn al tiu kiun vi jam havas; vi havos cent kastelojn plenajn de oro kaj kvincent plenajn de arĝento, kaj, mallonge, kion ajn vi petos de mi.”

“Sinjorino Ragoto,” diris mi, “kiam oni estas sur la fundo de truego kie oni plene anticipis esti rostita viva, estas neeble pensi peti tian ĉarman personon kia estas vi, edzigi min! Mi petas ke vi liberigu min, kaj post tio mi esperos taŭge respondi al vi.”



“Ha!” diris ŝi, ‘se vi vere amus min al vi ne gravus kie vi estas—kavo, arbaro, vulpotruo, dezerto, egale plaĉus al vi. Ne supozu ke vi povas trompi min; vi imagas ke vi eskapos, sed mi certigas al vi ke vi restos ĉi tie, kaj la unua tasko kiun mi donos al vi estos prizorgi miajn ŝafojn—ili estas tre agrablaj kompanoj kaj parolas egale bone kiel vi.’

“Dum ŝi parolis ŝi antaŭeniris, kaj kondukis min al ĉi ebenaĵo kie ni nun staras, kaj montris al mi sian gregon, sed mi malmulte atentis ĝin, nek ŝin; efektive mi tiom profundiĝis en admirado al ŝia bela sklavino ke mi forgesis ĉion alian, kaj kruela Ragoto, perceptante tion, turnis al ŝi tiel furiozan kaj teruran rigardon ke ŝi falis senviva sur la teron.

“Pro tiu terura vidaĵo mi eltiris mian glavon kaj kuris kontraŭ Ragoton, kaj nepre mi detranĉus ŝian kapon se ŝi ne per siaj magiaj artoj ĉenus min al la loko sur kiu me staris; ĉiuj penoj miaj movi min estis senutilaj, kaj fine, kiam mi ĵetis min senespere sur la teron, ŝi diris al mi, ridetante malestime:

“Mi intencas ke vi sentu mian potencon. Ŝajnas ke vi nun-momente estas leono, mi intencas ke vi estu ŝafo.’

“Dirinte tion, ŝi tuŝis min per sia sceptro, kaj mi iĝis tia kian vi vidas. Mi ne perdis la kapablon paroli, nek senti la mizeron de mia aktuala stato.

“Dum kvin jaroj, ŝi diris, ‘vi estos ŝafo, kaj mastro de ĉi tiu plaĉa lando, dum mi, ne plu povante vidi vian vizaĝon, kiun mi tiom amis, povos pli bone malami vin, kiel vi meritas esti malamata.’

“Ŝi malaperis kiam ŝi ĉesis paroli, kaj se mi ne estus tro malfeliĉa por ĝoji pri io ajn mi ĝojus ke ŝi foriris.

“La parolantaj ŝafoj akceptis min kiel sian reĝon, kaj diris al mi ke ankaŭ ili estis misfortunaj princoj kiuj, diversmaniere, ofendis la venĝeman feinon, kaj aldoniĝis al ŝia grego por certa nombro da jaroj; kelkaj pli, kelkaj malpli. Fojfoje iu el ili regajnas sian naturan formon kaj reiras al sia loko en la supra mondo; sed la aliaj uloj kiujn vi vidas estas la rivaloj aŭ malamikoj de Ragoto, kiun ŝi enkarcerigis por cent jaroj aŭ pli; kvankam eĉ ili reiros fine. La juna sklavino pri kiu mi parolis al vi estas unu el ili; mi ofte vidas ŝin, kaj tio multe plezurigas min. Ŝi neniam parolas al

mi, kaj se mi pli proksimiĝus al ŝi mi scias ke mi trovus ke ŝi estas nur ombro, kio multe ĉagrenus min. Tamen, mi rimarkis ke unu el miaj kunmisfortunuloj ankaŭ tre atentis tiun spiriteton, kaj mi informiĝis ke li estis antaŭe ŝia amanto, kiun kruela Ragoto, forprenis de ŝi antaŭ longe; post tiam al mi gravas nur, kaj mi pensas nur pri, kiel regajni mian liberecon. Mi ofte eniras la arbaron; tie mi vidis vin, bela Princino, kelkfoje vi ŝoforis vian kaleŝon, kion vi faris plej gracie kaj lerte; kelkfoje vi ĉasadis rajdante sur tiel vigla ĉevalo ke ŝajnis ke nur vi mem povus regi ĝin, kaj kelkfoje vi konkuris sur la ebenaĵo kun la Princinoj de via Kortego—vi kuris tiel rapide ke ĉiam vi gajnis la premion. Ho! Princino, mi de tiom longe amas vin, tamen kiel mi aŭdacas paroli al vi pri mia amo! kia espero povas ekzisti por malfeliĉa ŝafo kia mi?”

Mirandon tiom surprizis kaj konfuzis ĉio kion ŝi aŭdis ke apenaŭ ŝi sciis kian respondon fari al la Reĝo de la Ŝafoj, sed ŝi sukcesis fari ian paroleton, kiu certe ne ordonis ke li perdu esperon, kaj diris ke ŝi ne timos la ombrojn nun sciante ke iun tagon ili reviviĝos. “Ve!” ŝi pludiris, “se mia povra Patipato, mia kara Grabuĝono, kaj bela malgranda Tintino, kiuj ĉiuj mortis por mi, estus egale bonstataj, nenio plia mankus al mi ĉi tie.”

Kvankam kaptito, la Reĝo de la Ŝafoj ankoraŭ havis kelkajn povojn kaj privilegiojn.

“Iru,” diris li al ŝia Ĉevaloprizorgisto, “iru serĉi la ombrojn de la malgranda nigra knabino, la simio, kaj la hundo; ili distros nian Princinon.”

Kaj post nur momentono Mirando vidis ilin veni cele ŝin, kaj ilia ĉeesto multege plezurigis ŝin, kvankam ili ne sufiĉe proksimiĝis por ke ŝi tuŝu ilin.

La Reĝo de la Ŝafoj estis tiel afabla kaj distra kaj tiel elkore amis Mirandon, ke fine si komencis ankaŭ ami lin. Tiel bela ŝafo, kiu estis tiel ĝentila kaj komplezema, apenaŭ povus malplaĉi, precipe se oni scias ke vere li estas reĝo, kaj ke lia stranga enkarceriĝo baldaŭ finiĝos. Do la tagoj de la Princino pasis tre gaje dum ŝi atendis la venon de la estonta feliĉa tempo. La Reĝo de la Ŝafoj, helpate de la tuta grego, okazigis balojn, koncertojn, ĉasogrupojn, kaj eĉ la ombroj partoprenis en la ĝuo, kaj venis, ŝajnigante esti vere realaj.

Unu vesperon, kiam la mesaĝistoj alvenis (ĉar la Reĝo tre zorge serĉis informojn—kaj ili ĉiam alportis la plej bonajn), estis anoncite ke la fratino de Princino Mirando edziniĝos kun granda princo kaj ke nenio povus esti pli grandioza ol la preparaj por la geedziĝo.

“Ha!” kriis la juna Princino, “kiom misfortune ke mi ne vidos tiom da belaĵoj! Jen mi estas en karcero sub la tero, miaj kompanoj estas nur ŝafoj kaj ombroj, dum mia fratino estos ornamita kiel reĝino kaj ĉirkaŭata de ĉiuj kiuj amas kaj admiras ŝin, kaj ĉiu escepte de mi povos iri deziri al ŝi ĝojon!”

“Kial vi plendas, Princino?” diris la Reĝo de la Ŝafoj. “Ĉu mi



diris ke vi ne iros al la geedziĝo? Foriru tuj kiam vi dezirus; nur promesu al mi ke vi revenos, ĉar mi tro amas vin por povi vivi sen vi.”

Mirando multe dankis lin, kaj promesis elkore ke nenio en la mondo povos malhelpi ŝin reveni. La Reĝo pretegis eskorton konvenan por ŝia rango, kaj ŝi vestis sin elegante, forgesante nenion kio plibeligus ŝin. Ŝia kaleŝo estis el perlamoto, tirata de ses grizbrunaj grifoj ĵus venigitaj el la alia flanko de la mondo, kaj ŝin servis nombro da gardistoj en elegantaj uniformoj, kiuj estis ĉiuj almenaŭ 250 centimetrojn altaj kaj venis el malproksime kaj proksime por postrajdi la Princinon.

Mirando atingis la palacon de sia patro ĝuste kiam la

geedziĝo komenciĝis, kaj ĉiun, tuj kiam ŝi envenis, trafis surprizo pro ŝia beleco kaj la grandiozeco de ŝiaj juveloj. Ŝi aŭdis kriojn de admirado de ĉiu; kaj la Reĝo ŝia patro rigardis ŝin tiel atente ke ŝi timis ke nepre li rekonos ŝin; sed li estis tiel certa ke ŝi mortis ke tiu ideo tute ne venis en lian menson.

Tamen timo ke ŝi ne povos foriri instigis ŝin foriri antaŭ la finiĝo de la nupto. Ŝi eliris haste, postlasante malgrandan koralan kesteton inkrustitan per smeraldoj. Sur ĝi estis skribite per diamantaj literoj: “Juveloj por la Nova Edzino”, kaj kiam ili malfermis ĝin, kion ili faris tuj kiam ili trovis ĝin, ŝajnis esti neniam limo de la nombro da belajoj en ĝi. La Reĝo, kiu estis esperinta renkonti la nekonatan Princinon kaj trovi kiu ŝi estas, ege malplezuriĝis kiam ŝi tiel subite malaperis, kaj ordonis ke se iam ŝi revenos oni fermu la pordojn por ke ŝi ne povu tiel facile foriri. Kvankam la foresto de Mirando estis nelonga, ĝi ŝajnis centjara al la Reĝo de la Ŝafoj. Li atendis ŝin apud fontano en la plej densa parto de la arbaro, kaj la tero estis kovrita per grandiozaj donacoj kiujn li preparis por ŝi por montri siajn ĝojon kaj dankojn pro ŝia reveno.

Tuj kiam ŝi vidiĝis li rapidis renkonti ŝin, saltante kiel vera ŝafo. Li karesis ŝin tenere, ĵetante sin al ŝiaj piedoj kaj kisante ŝiajn manojn, kaj diris al ŝi kiom maltrankvila li estis dum ŝia foresto, kaj kiom senpacience li atendis ŝian revenon, tiel elokvente ke li ĉarmis ŝin.

Post longa tempo venis informo ke la dua filino de la Reĝo edziniĝos. Kiam Mirando aŭdis tion ŝi petis la Reĝon de la Ŝafoj permesi ke ŝi iru vidi la geedziĝon, kiel antaŭe. Tiu peto multe tristigis lin, ĉar li sentis ke ia misfortuno nepre okazos pro ĝi, sed lia amo al la Princino estis plej forta kaj li ne deziris rifuzi al ŝi.

“Vi volas foriri de mi, Princino,” diris li; “temas pri mia trista fato—ne kulpas vi. Mi konsentas ke vi iru, sed, kredu min, neniam pli fortan pruvon pri mia amo mi povus fari ol konsenti pri tio.”

La Princino certigis al li ke ŝi restos nur mallonge, same kiel antaŭe, kaj petis lin ne esti maltrankvila, ĉar ŝi same multe malĝojus se ŝi malfruus pri sia reveno kiel li mem.

Do, kun la sama eskorto, ŝi eliris, kaj atingis la palacon je la komenciĝo de la geedziĝa ceremonio. Ĉiuj ĝojis vidi ŝin: ŝi estis tiel bela ke ili supozis ke nepre ŝi estas iu fea princino, kaj la

Princoj tie ne povis formovi de ŝi sian rigardon.

La Reĝo pli ol ĉiuj aliaj ĝojis pro ŝia reveno, kaj ordonis ke oni fermu kaj riglu ĉiujn pordojn tujtue. Kiam la nupto preskaŭ finiĝis la Princino stariĝis rapide, esperante foriri nerimarkate inter la homamaso, sed ĉagrenate ŝi trovis ĉiun pordon ligita.

Ŝi fariĝis pli trankvila kiam la Reĝo venis al ŝi, kaj plej respektete petis ŝin ne tiel baldaŭ forkuri, sed ke almenaŭ ŝi honoru lin per resto dum la grandioza festeno preparita por la Princoj kaj Princinoj. Li gvidis ŝin en grandiozan halon, kie la tuta Kortegano atendis, kaj li mem prenis la oran pelvon plenan de akvo kaj proponis ĝin al ŝi por ke ŝi trempu siajn belajn fingrojn en ĝin.

Je tio la Princino ne plu povis reteni sin; ĵetante sin al la piedoj de la Reĝo, ŝi kriis:

“Mia sonĝo plenumiĝis, malgraŭ ĉio—vi proponis al mi akvon por ke mi lavu miajn manojn dum la tago de la edziniĝo de mia fratino, kaj tio ne ĉagrenis vin.”

La Reĝo tuj rekonis ŝin—efektive, li jam plurfoje pensis kiom simila al lia povra malgranda Mirando ŝi estas.

“Ho! mia kara filino,” li kriis, kisant ŝin, “ĉu iam vi povos forgesi mian kruelecon? Mi ordonis mortigi vin ĉar mi kredis ke via sonĝo antaŭdiras la perdiĝon de mia krono. Kaj tiel estas,” li pludiris, “ĉar nun ambaŭ viaj fratinoj edziniĝis kaj havas proprajn regnojn—kaj mia estos por vi.” Dirinte tion li metis sian kronon sur la kapon de la Princino kaj kriis:

“Vivu Reĝino Mirando!”

La tuta Kortegano kriis: “Vivu Reĝino Mirando!” post li, kaj la du fratinoj de la juna Reĝino venis kurante kaj ĵetis siajn brakojn ĉirkaŭ ŝian kolon, kaj kisis ŝin milfoje, kaj sekvis multaj ridado kaj plorado, parolado kaj kisado, samtempe, kaj Mirando dankis sian patron, kaj komencis demandi pri ĉiu—specife la Kapitano de la Gardistaro, al kiu ŝi tiom ŝuldas; sed tre malĝojige al ŝi, ŝi aŭdis ke li mortis. Baldaŭ ili sidiĝis ĉe la bankedo, kaj la Reĝo petis ke Mirando diru al ili ĉion okazintan al ŝi post la terura mateno kiam li sendis la Kapitanon de la Gardistaro alvenigi ŝin. Tion ŝi faris tiom vigle ke ĉiuj gastoj aŭskultis senpire interesate. Sed dum ŝi tiel distris sin kun la Reĝo kaj siaj fratinoj, la Reĝo de la Ŝafo atendadis senpacience la tempon de

ŝia reveno, kaj kiam ĝi alvenis kaj pasis, kaj aperis neniun Princino, lia maltrankvilo tiom multiĝis ke li ne plu povis elteni.

“Ŝi ne plu revenos,” li kriis. “Mia mizera ŝafvizaĝo malplaĉas al ŝi, kaj sen Mirando kio restas por mi, mizerulo mi! Ho, kruela Ragoto; mia puno kompletiĝis.”

Dumlonge li lamentis sian malfeliĉan faton tiel, kaj poste, vidante ke mallumiĝis, kaj ke ankoraŭ estas nenia spuro de la Princino, li eliris laŭeble plej rapide cele la urbon. Atinginte la palacon li petis renkonti Mirandon, sed jam ĉiu aŭdis la historion de ŝiaj aventuroj, kaj ne volis ke ŝi denove reiru al la Reĝo de la Ŝafoj, do ili severe rifuzis lasi lin renkonti ŝin. Vane li petis kaj petegis rajti eniri; kvankam liaj petoj povus fandi ŝtonajn korojn



ili ne vekis kompaton el la gardistoj de la palaco, kaj fine, kun rompita koro, li falis morta ĉe iliaj piedoj.

Intertempe la Reĝo, kiu tute ne sciis pri la trista evento okazanta ekster la pordo de la palaco, proponis al Mirando ke ŝi estu kondukata en sia kaleŝo tra la urbo, kiun iluminu miloj kaj miloj da torĉoj, metitaj en fenestrojn kaj balkonojn, kaj en ĉiuj grandaj placoj. Sed kia vidaĵo renkontis ŝiajn okulojn ĉe la enirejo mem de la palaco! Tie kuŝas ŝia kara, afabla Ŝafo, silenta kaj senmova, sur la pavimo!

Ŝi ĵetis sin el la kaleŝo kaj kuris al li, plorante amare, ĉar ŝi rekonis ke ŝia rompita promeso kostis al li lian vivon, kaj tre tre longe ŝi estis tiom malfeliĉa ke oni kredis ke ankaŭ ŝi mortos.

Do sciu ke eĉ princino ne estas ĉiam feliĉa—precipe se ŝi forgesas plenumi sian promeson; kaj la plej grandaj misfortunoj ofte okazas al homoj ĝuste kiam ili kredas esti atingintaj tion kion deziras iliaj koroj!¹

¹Madame d'Aulnoy

DIKFINGRETO

FOJE estis viro kaj lia edzino, kies metio estis fari faskojn, kiuj havis sep infanojn, sole knabojn. La plej aĝa estis dekjaraĝa, kaj la plej juna nur sepjara.

Ili estis tre malriĉaj, kaj iliaj sep infanoj multe malfaciligis ilian vivon, ĉar neniuj el ili povis perlabori sian panon. Kio eĉ pli malkvietigis ilin estis ke la plej juna estas tre febla, kaj apenaŭ iam diras vorton, kio instigis ilin supozi stulteco tion kio estis indiko de bona prudento. Li estis tre eta, kaj kiam li naskiĝis li ne estis pli granda ol dikfingro, tiel ke oni nomis lin *Dikfingreto*.

La povra infano estis akuzata pro kio ajn misokazis en la domo, kaj, ĉu aŭ ne kulpa, ĉiam estis juĝata kulpa; li estis, tamen, pli ruza kaj havis multe pli grandan porcion da saĝo ol ĉiuj liaj fratoj kune; kaj, kvankam li parolis nemulte, li aŭdis kaj pensis des pli multe.

Nu okazis ke venis tre malbona jaro, kaj la malsato estis tiom granda ke tiuj povruloj decidis senigi sin de ĉiuj siaj infanoj. Unu versperon, kiam ili estis ĉiuj enlite kaj la fasko-faristo sidis kun sia



edzino apud la fajro, li diris al ŝi, dum lia koro estis preta rompiĝi pro malĝojo:

“Vi vidas klare ke ni ne povas reteni niajn infanojn, kaj mi ne povas toleri vidi ilin morti pro malsato antaŭ mia vizaĝo; mi decidis perdi ilin en la arbaro morgaŭ, kio estos tre facile farita; ĉar, dum ili okupis sin per ligado de la faskoj, ni povos forkuri, kaj lasi ilin, kaj ili tute ne rimarkos.”

“Ha!” kriis la edzino; “kaj ĉu vi povas havi tian koron ke vi kunvenigos viajn infanojn celante perdi ilin?”

Vane ŝia edzo prezentis al ŝi ilian malriĉegecon: ŝi rifuzis konsenti; ŝi ja estis malriĉa, sed ŝi estis ilia patrino. Tamen, konsiderinte kiel malĝoje por ŝi estus vidi ilin morti pro malsato, ŝi fine konsentis, kaj enlitiĝis ploreante.



Dikfingreto aŭdis ĉiun vorton diritan; ĉar, observante, dum li kuŝis en sia lito, ke ili interparolas tre vigle, li ellitiĝis senbrue, kaj kaŝis sin sub la tabureto de sia patro, por aŭdi kion ili diras sen esti vidata. Li reenlitiĝis, sed tute ne dormis dum la cetero de la nokto, pripensante kion li faru. Li ellitiĝis frue en la mateno, kaj iris al la bordo de la rivero, kie li plenigis siajn poŝojn per malgrandaj blankaj ŝtoneroj, kaj poste reiris hejmen.

Ili ĉiuj foriris, sed Dikfingreto diris al siaj fratoj ne eĉ unu silabon de tio kion li scias. Ili eniris tre densan arbaron, kie ili ne povis vidi unu la alian dek paŝojn apartigite. La fasko-faristo komencis tranĉi lignon, kaj la infanoj kolekti la vergojn por fari faskojn. Iliaj patro kaj patrino vidante ilin okupataj de siaj laboro,

foriris de ili kaŝe, kaj ekkuris de ili, laŭ flankavoĵeto tra la serpentumantaj arbustoj.

Kiam la infanoj vidis sin tute solaj, ili komencis plori kiel eble plej laŭte. Dikfingreto lasis ilin ploradi, sciante tute bone kiel reiri hejmen, ĉar, venante, li zorge faligis laŭlonge de la vojo la malgrandajn blankajn ŝtonerojn kiujn li portas en siaj poŝoj. Kaj li diris al ili:

“Ne timu, fratoj: patro kaj patrino lasis nin ĉi tie, sed mi gvidos vin hejmen, nur sekvu min.”



Ili faris tion, kaj li gvidis ilin hejmen laŭ la tutsama vojo per kiu ili venis en la arbaron. Ili ne kuraĝis eniri, sed sidigis sin ĉe la pordo, aŭskultante kion parolas iliaj patro kaj patrino.

Tuj kiam la fasko-faristo kaj lia edzino atingis sian hejmon la bienestro sendis al ili dek kronojn, kiujn de longe li ŝuldis al ili, kaj kiujn ili tute ne anticipis. Tio renovigis ilian vivon, ĉar la povruloj estis preskaŭ mortomalsatintaj. La fasko-faristo tuj sendis sian edzinon al la buĉisto. Ĉar delonge ili ne manĝis, ŝi aĉetis trioble pli da viando ol sufiĉus por du homoj. Manĝinte la virino diris:

“Ve! kie estas nun niaj povraj infanoj? ili bone festenus per la

restantaj vianderoj; sed vi, Vilhelmo, decidis perdi ilin: mi diris al vi ke ni pentos pri tio. Kion ili faras nun en la arbaro? Ve! kara Dio, la lupoj eble jam manĝis ilin: vi estas tre malhumana, akceptante perdi viajn infanojn.”

La fasko-faristo fine plene senpacienciĝis, ĉar ŝi ripetis tion pli ol dudek fojon, ke ili pentos, kaj ke ŝi pravas dirante tion. Li minacis bati ŝin se ŝi ne silentos. Ne estis ke la fasko-faristo ne estis, eble, pli ĉagrenita ol lia edzino, sed ke ŝi turmentis lin, kaj ke li havis humoron similan al tiu de multaj aliaj, kiuj amas bon-parolajn edzinojn, sed opinias tre ĝenaj tiujn kiuj konstante parol-



as. Ŝi duone dronis pro larmoj, kriante:

“Ve! kie nun estas miaj infanoj, miaj povraj infanoj?”

Ŝi diris tion tiel laŭtege ke la infanoj, kiuj estis ĉe la pordo, komencis kune kriadi:

“Jen ni! Jen ni!”

Ŝi tuj kuris malfermi la pordon, kaj diris, ĉirkaŭpremante ilin:

“Mi ĝoje vidas vin, miaj karaj infanoj; vi estas tre malsataj kaj lacaj; kaj mia povra Petro, vi estas terure kotoŝmirita; envenu kaj mi purigu vin.”

Nu, sciu ke Petro estis ŝia plej aĝa filo, kiun ŝi amis pli ol ĉiujn aliajn, ĉar li estis iom karotea, same kiel ŝi. Ili sidiĝis por manĝi,

kaj manĝis tiel bonapetite ke plaĉis al kaj patro kaj patrino, al kiuj ili sciigis kion ili timis en la arbaro, preskaŭ ĉiam parolante samtempe. La bonuloj ege ĝojis revidi siajn infanojn enhejme, kaj tiu ĝojo daŭris dum sufiĉis la dek kronoj; sed kiam la mono estis tute uzita, ilin trafis denove ilia antaŭa malkvieteco, kaj ili decidis denove perdi ilin; kaj por esti pli certaj pri sukceso, porti ilin multe pli foren ol antaŭe.

Ili ne povis diskuti tion tiel sekrete ke ne povis aŭdi ilin Dikfingreto, kiu decidis superi tiun malfacilon same kiel la antaŭen; sed, kvankam li ellitiĝis tre frue en la mateno por eliri kolekti kelkajn malgrandajn ŝtonerojn, li ĉagreniĝis, ĉar li trovis la pordon de la domo duoble ŝlosita, kaj perpleksis kion fari. Kiam ilia patro donis al ĉiu el ili pecon da pano por la matenmanĝo, li ekpensis ke li povos utiligi tion anstataŭ la ŝtonerojn, ĵetante ĝin erigitan laŭlonge de la vojo kiun ili trairos; do li metis ĝin en sian poŝon.

Iliaj patro kaj patrino kondukis ilin en la plej densan kaj plej obskuran parton de la arbaro, kaj, kaŝe foririnte laŭ flankavojo, lasis ilin tie. Dikfingreto ne tre maltrankvilis pro tio, ĉar li kredis ke li facile retrovos la vojon hejmen per sia pano, kiun li disŝutis laŭlonge de la vojo dum li venis; sed lin multe surprizis ke li ne povas trovi eĉ unu paneron: la birdoj venis kaj manĝis ĉiun peceton. Ili nun tre malfeliĉis, ĉar ju pli ili marŝis des pli ili misvagis, kaj pli kaj pli perpleksis en la arbaro.

Nun noktiĝis, kaj ekblovis terura forta vento, kiu ege timigis ilin. Ili imagis aŭdi ĉiuflanke la hurladon de lupoj venantaj vori ilin. Ili apenaŭ kuraĝis paroli aŭ turni siajn kapojn. Post tio, pluvegis, kaj tio malsekigis ilin ĝis la haŭto; iliaj piedoj glitis je ĉiu paŝo kiun ili faris, kaj ili falis en la koton, el kiu ili stariĝis tre malpuraj; iliaj manoj estis tute sensentaj.

Dikfingreto grimpis ĝis la supro de arbo, por trovi ĉu li povos vidi ion; kaj turninte sian kapon ĉiuflanken, li fine vidis flagretantan lumon, kia de kandelo, sed tre distance de la arbaro. Li malsuprenvenis, kaj, kiam sur la tero, li ne plu povis vidi ĝin, kio multe mizerigis lin. Tamen, marŝinte dum longa tempo kun siaj fratoj cele tiun flankon je kiu li estis vidinta la lumon, li re-perceptis ĝin dum li venis el la arbaro.

Ili venis fine al la domo kie estas tiu kandelo, ne sen abunda

timo: ĉar tre ofte ili ekneperceptis ĝin, kio okazis kiam ajn ili eniris valeton. Ili frapis sur la pordon, kaj bonulino venis malfermi ĝin; ŝi demandis al ili kion ili deziras.

Dikfingreto diris al ŝi ke ili estas malriĉaj infanoj kiuj perdiĝis en la arbaro, kaj deziras resti tie pro Dio.

La virino, vidante ke ili estas tre belaj, komencis plori, kaj diris al ili:

“Ve! povraj beboj; kien vi venis? Ĉu vi scias ke ĉi domo apartenas al kruela ogro kiu voras infanetojn?”

“Ha! kara sinjorino,” respondis Dikfingreto (kies ĉiu artikolo tremis, ankaŭ la artikoloj de liaj fratoj), “kion ni faru? Nepre la lupoj de la arbaro voros nin ĉinokte se vi rifuzos ke ni kuŝu ĉi tie; kaj tial ni preferas ke la sinjoro manĝu nin; kaj eble li kompatos nin, precipe se vi bonvolos peti tion de li.”

La Ogredzino, kiu kredis povi kaŝi ilin de sia edzo ĝis la mateno, lasis ilin eniri, kaj kondukis ilin varmigi sin ĉe tre bona fajro; ĉar tie tuta ŝafo estis sur la turnostango, rostiĝante por la vespermanĝo de la Ogro.

Kiam ili komencis iom varmigi ili aŭdis tri aŭ kvar fortajn frapojn sur la pordon; jen la Ogro, veninta hejmen. Je tio ŝi kaŝis ilin sub la lito kaj iris malfermi la pordon. La Ogro baldaŭ demandis ĉu la manĝo pretas kaj la vino estas ĉerpita kaj sidigis sin ĉe la tablo. La ŝafo ankoraŭ estis ankoraŭ kruda kaj sango-plena; sed des pli li ŝatis ĝin tia. Li flaris dekstre kaj live, dirante:

“Mi flaras freŝan viandon.”

“Kion vi flaras,” diris lia edzino, “certe estas la bovido kiun mi ĵus mortigis kaj senhaŭtigis.”

“Mi flaras freŝan viandon, mi ripetas al vi,” respondis la Ogro, kolere rigardante sian edzinon; “kaj estas io ĉi tie kion mi ne komprenas.”

Parolante tiujn vortojn li stariĝis de apud la tablo kaj rekte iris al la lito.

“Aha!” diris li; “nun mi vidas ke vi volis trompi min, damnita virino; mi ne scias kial mi ne voras ankaŭ vin, sed bonfortune por vi vi estas malmola kadavraĵo. Jen bona ĉasaĵo, kiu tre bonŝance venis por ĝuigi tri ograĵn konatojn miajn kiuj vizitos min post unu-du tagoj.”

Dirinte tion li trenis ilin el sub la lito, unu post la alia. La povraj infanoj surgenuiĝis, kaj petis ke li pardonu ilin; sed ilin frontis unu el la plej kruelaj ogroj en la mondo, kiu, tute sen havi kompaton al ili, jam voris ilin per siaj okuloj, kaj diris al sia edzino ke ili estos delikata manĝaĵo spicite per bona bongusta saŭco. Li prenis grandan tranĉilon kaj, veninte al tiuj povraj infa-



noj, akiris ĝin per granda akriĝoŝtono kiun li tenis per sia maldekstra mano. Li jam prenis unu el ili, sed lia edzino diris al li:

“Kial vi bezonas fari tion nun? Ĉu ne estos sufiĉatempe morgaŭ?”

“Ĉesu babili,” diris la Ogro; “ili estos pli mole manĝeblaj.”

“Sed vi jam havas tiom da viando,” respondis lia edzino, “vi

ne havas bezonon; jen bovido, du ŝafoj, kaj duono de porko.”

“Estas vere,” diris la Ogro; “donu al ili ventroplenon por ke ili ne malgrasiĝu, kaj enlitigu ilin.”

La bonulino ĝojegis pro tio, kaj donis al ili bonan vespermanĝon; sed ili tiom timis ke ili tute ne povis manĝi. La Ogro sidiĝis denove por trinki, sentante grandan plezuron ĉar li akiris manĝaĵojn per kiuj li povos regali siajn amikojn. Li trinkis dek glasojn pli ol kutime, kiuj eniris lian kapon kaj devigis lin enlitiĝi.

La Ogro havis sep filinojn, ĉiuj estis malgrandaj infanoj, kaj tiuj junaj ogrinoj ĉiuj havis tre belan aspekton, ĉar ili kutimis manĝi freŝan viandon same kiel ilia patro; sed ili havis malgrandajn grizajn okulojn, tute rondajn hokajn nazojn, kaj tre longajn akrajn dentojn, kiuj staris tre distance unu de alia. Ili ankoraŭ ne estis nekutime petolemaj, sed ili evidente fariĝos tiaj, ĉar ili jam mordis infanetojn, por suĉi ilian sangon.

Ili enlitiĝis frue, ĉiu kun ora krono sur sia kapo. En la sama ĉambro estis egale granda lito, kaj en tiun liton la edzino de la Ogro metis la sep knabetojn, kaj post tio ŝi enlitiĝis kun sia edzo.

Dikfingreto observis ke la filinoj de la Ogro havas orajn kronojn sur siaj kapoj, kaj li timis ke la Ogro pentos ne esti mortiginta la knabetojn. Do li ellitiĝis ĉirkaŭ la noktomezo, kaj preninte la kufojn de siaj fratoj kaj la propran, li tre softe iris al la sep ogrinetoj kaj metis la kufojn sur iliajn kapojn; ĉar li deprenis iliajn orajn kronojn kaj metis ilin sur sian propran kapon kaj la kapojn de siaj fratoj, por ke la Ogro supozu ilin siaj filinoj, kaj supozu siajn filinojn la knabetoj kiujn li volas mortigi.

Ĉio ĉi sukcesis laŭ lia deziro; ĉar la Ogro vekiĝis ĉirkaŭ la noktomezo, kaj bedaŭris esti ĝis la mateno prokrastinta fari kion li povus fari dumnokte, do li haste ĵetis sin el la lito, kaj, preninte sian grandan tranĉilon,

“Ni vidu,” diris li, “kiel statas niaj friponetoj, kaj ne grandigu la taskon pli ol necese.”

Li supreniris, palpante tutdume, en la ĉambron de siaj filinoj, kaj venis al la lito kie kuŝas la knabetoj—ili ĉiuj senescepte profunde dormis, escepte de Dikfingreto, kiu terure timis kiam li trovis la Ogron palpanta lian kapon, same kiel li palpis la kapojn de siaj fratoj. La Ogro, sentante la orajn kronojn, diris:

“Mi devus esti farinta tre bonan taskon, vere; mi trovas ke mi tro drinkis hieraŭnokte.”

Post tio li iris al la lito kie kuŝas la knabinoj; kaj, trovinte la kufetojn de la knaboj,

“Ha!” diris li, “miaj gajaj knaboj, ĉu vi? Ni laboru ĝuste.”

Kaj dirinte tiujn vortojn, senhezite li tranĉis la gorĝojn de ĉiuj siaj sep filinoj.

Bone plaĉite de sia ago, li reenlitiĝis kun sia edzino. Tuj kiam Dikfingreto aŭdis la Ogron ronki, li vekis siajn fratojn, kaj devigis ilin vesti sin tuj kaj sekvi lin. Ili kaŝe iris softe en la ĝardenon, kaj transgrimpis la muron. Ili ĉirkaŭkuris dum la tuta nokto, konstante tremante, sen scii kien ili iras.

La Ogro, vekiĝinte, diris al sia edzino: “Supreniru kaj priententu tiujn junajn friponojn kiuj venis ĉi tien hieraŭnokte.”

La Ogrinon multe surprizis tiu afableco de sia edzo, ne konceptante kiel ŝi priententu ilin; sed, kredante ke li ordonis ke ŝi iru vesti ilin, ŝi supreniris, kaj miregis perceptante siajn sep filinojn mortigitaj kaj kuŝantaj en sia sango.

Ŝi svenis, ĉar jen la unua rimedo trovata de preskaŭ ĉiuj virinoj en tiaj okazoj. La Ogro, timante ke lia edzino tro longe okupos sin farante kion li ordonis, mem supreniris por helpi ŝin. Lin ne malpli mirigis ol lian edzinon tiu timiga spektaklo.

“Ha! kion mi faris?” kriis li. “La fiuloj kompensos pro tio, tujtuje.”

Li ĵetis kruĉon da akvo sur la vizaĝon de sia edzino, kaj, konsciiginte ŝin,

“Rapidu doni al mi,” kriis li, “miajn sepleŭgajn botojn, por ke mi eliru kapti ilin.”

Li eliris, kaj, transkurinte vastan kvanton da tero, kaj ĉiflanke kaj tiuflanke, li fine atingis la straton mem kie estas la malriĉaj infanoj, ne pli ol cent paŝojn for de la domo de ilia patro. Ili ekvidis la Ogron, kiu marŝis per unusola paŝo de monto al monto, kaj trans riverojn tiel facile kiel la plej mallarĝajn kulvertojn. Dikfingreto, vidinte kavan rokon proksiman al la loko kie ili estas, devigis siajn fratojn kaŝi sin en ĝi, kaj mem puŝis sin en ĝin, ĉiam atentante kion faras la Ogro.

La Ogro, kiu trovis sin multe laca pro sia longa kaj sen-

sukcesa veturo (ĉar tiuj sepleŭgaj botoj multe lacigas la surhavanton), multe emis ripozi, kaj, hazarde, iris sidiĝi sur la rokon kie la knabetoj estis kaŝintaj sin. Ĉar ne estus eble esti pli laca, li ekdormis, kaj, ripozinte dum iom da tempo, komencis ronki tiel timige ke la povraj infanoj ne malpli timis lin ol kiam li tenis sian grandan tranĉilon kaj planis tranĉi iliajn gorĝojn. Dikfingreto ne timis tiom kiom liaj fratoj, kaj diris al ili ke ili fuĝu tuj cele la hejmon dum la Ogro dormas tiel profunde, kaj ke ili ne maltrankvilu pri li. Ili obeis lian konsilon, kaj baldaŭ atingis sian



hejmon. Dikfingreto venis al la Ogro, detiris liajn botojn leĝere, kaj metis ilin sur siajn proprajn krurojn. La botoj estis tre longaj kaj grandaj, sed, ĉar ili estis feaj, ili kapablis fariĝi grandaj kaj malgrandaj, konforme al la kruroj de la surhavanto; do ili taŭgis al liaj piedoj kaj kruroj same bone kiel se ili estus faritaj specife por li. Li iris tuj al la domo de la Ogro, kie li vidis lian edzinon ploranta amare pro la perdiĝo de siaj murditaj filinoj.

“Vian edzon,” diris Dikfingreto, “minacas tre granda danĝero; li estas kaptita de bando de ŝtelistoj, kiuj ĵuris mortigi lin se li ne donos al ili ĉiuj siajn oron kaj arĝenton. Tuj kiam ili tenis siajn

ponardojn al lia gorĝo li perceptis min, kaj deziris ke mi venu diri al vi lian situacion, kaj ke vi donu al mi kion ajn valoran li posedas, sen reteni ion ajn: ĉar alie ili senkompatem mortigos lin; kaj, ĉar la afero estas tre urĝa, li deziris ke mi utiligu (vidu ke mi surhavas ilin) liajn botojn, por ke mi pli hastu kaj por indiki ke mi ne trompas vin.”

La bonulino, tre timoplena, donis al li ĉion kion ŝi havas: ĉar tiu ogro estis tre bona edzo, kvankam li kutimis vori infanetojn. Dikfingreto, tiel akirinte la tutan monaron de la Ogro, venis hejmen al la domo de sia patro, kie li estis akceptita ĝojabunde.

Multaj personoj ne akordas pri tio, ili pretendas ke Dikfingreto tute ne prirabis la Ogron, kaj ke li nur supozis ke li tre juste, kaj bonkonsciencie, deprenas liajn sepleŭgajn botojn, ĉar la Ogro uzis ilin nur por postkuri infanetojn. Tiuj homoj asertas ke ili estas tre certaj pri tio, des pli ĉar ili ofte trinkis kaj manĝis ĉe la domo de la fasko-faristo. Ili asertas ke, depreninte la botojn de la Ogro, Dikfingreto iris al la Kortego, kie oni informis lin ke ili tre malkvietas pri certa armeo, kiu estas ducent leŭgojn for, kaj pri la fato de batalo. Li iris, oni diras, al la Reĝo, kaj diris al li ke, se li deziras tion, li portos al li informojn pri la armeo antaŭ la noktiĝo.

La Reĝo promesis al li grandan kvanton da mono se li faros tion. Dikfingreto plenumis sian promeson, kaj revenis tiun saman nokton kun la informo; kaj, ĉar tiu unua ekspedicio famigis lin, li ricevis kion ajn li deziras, ĉar la Reĝo tre bone pagis lin pro lia transportado de ordonoj al la armeo. Post kiam li dumlonge agadis kiel mesaĝisto, kaj tiel akiris grandan riĉon, li hejmeniris al sia patro, kie estis neeble esprimi la ĝojon kiun havis ĉiuj pro lia reveno. Li komfortigis la tutan familion, aĉetis lokojn por sia patro kaj por siaj fratoj, kaj tiumaniere tre belsituaciigis ilin en la mondo, kaj, intertempe, perfektigis sian propran kortegon.¹

¹Charles Perrault

LA KVARDEK ŜTELISTOJ

EN urbeto en Persio loĝis du fratoj, unu nomita Kasimo, la alia Ali Babo. Kasimo estis la edzo de riĉa virino kaj vivis riĉe, dum Ali Babo devis subteni siajn edzinon kaj infanojn per lignohakado en najbara arbaro; li vendadis la lignon en la urbo. Unu tagon, dum Ali Babo estis en la arbaro, li vidis trupon da viroj sur ĉevaloj, venantaj liadirekte en nubo da polvo. Li timis ke ili estas rabistoj, kaj grimpis en arbon por sekureco. Kiam ili atingis lin kaj deĉevaliĝis, li kalkulis ke ili estas kvardek. Ili malbridis siajn ĉevalojn kaj ligis ilin al arboj. La plej eleganta viro inter ili, kiun Ali Babo supozis ilia kapitano, iris iomete inter kelkajn arbustojn, kaj diris: “Apertu, Sezamo!” tiel klare ke Ali Babo aŭdis lin. Pordo malfermiĝis en la rokoj, kaj eniriginte la trupon, li sekvis ilin, kaj la pordo refermis sin mem. Ili restis dum kelka tempo ene, kaj Ali Babo, timante ke ili eliros kaj kaptos lin, devis sidi pacience en la arbo. Fine la pordo remalfermiĝis, kaj la Kvardek Ŝtelistoj elvenis. Ĉar la Kapitano eniris la plejlasta li elvenis la plej unua, kaj devigis ĉiujn pasi lin; post tio li fermis la pordon, dirante: “Fermiĝu, Sezamo!” Ĉiu viro bridis sian ĉevalon kaj surĉevaliĝis, la Kapitano metis sin antaŭ ilin, kaj ili foriris kiel ili venis.

Tiam Ali Babo malgrimpis kaj iris al la pordo kaŝita inter la arbustoj, kaj diris: “Apertu, Sezamo!” kaj ĝi ekmalfermiĝis. Ali Babon, kiu anticipis seninteresan, mornan lokon, multe surprizis la trovo ke ĝi estas granda kaj bone iluminata, kaj ĉizita per homa mano en la formon de kupolo, kiu ricevas la lumon el aperturo en la plafono. Li vidis riĉajn amasojn da varoj—silko, ŝtofbrokaĵoj kunstakigitaj, kaj oro kaj arĝento amasigitaj, kaj mono en ledaj sakoj. Li eniris kaj la pordo fermiĝis malantaŭ li. Li ne atentis la arĝenton, sed elportis tiom da sakoj da oro kiom li kredis povi porti liaj azenoj, kiuj paŝtas sin ekstere, li ŝarĝis ilin per la sakoj,



“Apertu, Sezamo!”

kaj kaŝis ĉion per faskoj da branĉoj. Uzante la vortojn: “Fermiĝu, Sezamo!” li fermis la pordon kaj hejmeniris.

Post tio li irigis la azenojn en la korton, fermis la pordojn, portis la monsakojn al sia edzino, kaj malplenigis ilin antaŭ ŝi. Li ordonis ke ŝi gardu la sekreton, kaj diris ke li iros enterigi la oron. “Unue mi mezuru ĝin,” diris lia edzino. “Mi iros prunti mezurilon de iu, dum vi fosos la truon.” Do ŝi kuris al la edzino de Kasimo kaj pruntis mezurilon. Konante la malriĉecon de Ali Babo, la fratino volis scii kian grenon lia edzino volas mezuri, kaj ruze metis sebon en la fundon de la mezurilo. La edzino de Ali Babo hejmeniris kaj metis la mezurilon sur la amason da oro, kaj plenigis ĝin kaj malplenigis ĝin ofte, tre kontentigante ŝin. Poste ŝi raportis ĝin al sia fratino, sen rimarki ke peco da oro estis gluita al ĝi, kaj ĝin perceptis la edzino de Kasimo tuj kiam ŝi turnis sian dorson. Ŝi fariĝis tre scivola, kaj diris al Kasimo kiam li revenis hejmen: “Kasimo, via frato estas pli riĉa ol vi. Li ne kalkulas sian monon, li mezuras ĝin.” Li petis ŝin klarigi tiun enigmon, kaj ŝi faris tion montrante al li la pecon da mono kaj dirante al li kie ŝi trovis ĝin. Kasimo fariĝis tiel eniplita ke li ne povis dormi, kaj iris al sia frato en la mateno antaŭ la sunleviĝo. “Ali Babo,” li diris, montrante al li la orpecon, “vi ŝajnigas esti malriĉa, tamen vi mezuras oron.” Per tio Ali Babo perceptis ke pro la malsaĝeco de lia edzino, Kasimo kaj lia edzino ekkonis ilian sekreton, do li agnoskis ĉion kaj proponis parton al Kasimo. “Tion mi opinias natura,” diris Kasimo; “sed mi devas scii kie trovi la trezoron, se ne, do mi diskonigos ĉion kaj vi perdos ĉion.” Ali Babo, pli pro komplezemo ol pro timo, informis lin pri la kavo, kaj kiujn vortojn uzi. Kasimo foriris de Ali Babo, intencante atingi ĝin antaŭ li, kaj preni la trezoron por si mem. Li ellitiĝis frue la sekvan matenon, kaj eliris kun dek muloj ŝarĝitaj per grandaj kestoj. Li baldaŭ trovis la lokon, kaj la pordon en la roko. Li diris: “Apertu, Sezamo!” kaj la pordo malfermiĝis kaj fermiĝis malantaŭ li. Li volonte festenigus siajn okulojn dum la tuta tago rigardante la trezorojn, sed li nun hastis kolekti tiom da ĝi kiom eble; sed kiam li estis preta eliri li ne povis memori kion diri pro pensado pri siaj grandaj riĉoj. Anstataŭ “Sezamo”, li diris: “Aparte, Hordeo!” kaj la pordo restis fermita. Li nomis plurajn diversajn specojn de greno, ĉiun escepte

de la ĝusta, kaj la pordo restis firme fermita. Li tiom timis pro sia danĝero ke li forgesis la vorton same kiel se li estus neniam aŭdinta ĝin.

Ĉirkaŭ la tagmezo la rabistoj reiris al sia kavo, kaj vidis la mulojn de Kasimo vagantaj kun grandaj kestoj sur siaj dorsoj. Tio alarmis ilin: ili eltiris siajn sabrojn, kaj iris al la pordo, kiu malfermiĝis kiam ilia Kapitano diris: “Apartu, Sezamo!” Kasimo, kiu aŭdis la tretadon de la piedoj de iliaj ĉevaloj, decidis vendi sian vivon malkare, do kiam la pordo malfermiĝis li elsaltis kaj surter-en ĵetis la Kapitanon. Vane, tamen, ĉar la rabistoj per siaj sabroj baldaŭ mortigis lin. Enirante la kavon ili vidis la sakojn pretigitajn, kaj ne povis imagi kiel iu eniris sen scii ilian sekreton. Ili tranĉis la kadavron de Kasimo en kvar kvaronojn, kaj najlis ilin al la muro en la kavo, por timigi iun kiu aŭdacos eniri, kaj foriris serĉi pli da trezoro.

Kiam noktiĝis la edzino de Kasimo maltrankviliĝis, kaj kuris al sia bofrato, kaj informis lin kien iris ŝia edzo. Ali Babo penis konsoli ŝin, kaj eliris cele la arbaron serĉante Kasimon. La unua afero kiun li vidis enirante la kavon estis lia mortinta frato. Plena de teruriĝo, li metis la kadavron sur unu azenon, kaj sakojn da oro sur la aliajn du, kaj, kovrinte ĉion per kelkaj branĉoj, li reiris hejmen. Li pelis la du azenojn ŝarĝitajn per oro en sian propran korton, kaj gvidis la alian al la domo de Kasimo. La pordon malfermis la sklavino Morgiano, kiu laŭ lia scio estis kaj kuraĝa kaj ruza. Malŝarĝante la azenon, li diris al ŝi: “Jen la kadavro de via mastro, kiu estas murdita, sed kiun ni devas enterigi kvazaŭ li mortis en sia lito. Mi denove parolos kun vi, sed nun diru al via mastrino ke mi venis.” La edzino de Kasimo, informiĝinte pri la sorto de sia edzo, ekkriis kaj ploris, sed Ali Babo proponis ke ŝi loĝu kun li kaj lia edzino se ŝi promesos obei liajn konsilojn kaj lasi ke Morgiano faru ĉion; ŝi konsentis, kaj ŝi sekigis siajn okulojn.

Morgiano, intertempe, elserĉis apotekiston kaj petis de li kelkajn lozanĝojn. “Mia povra mastro,” ŝi diris, “povas nek manĝi nek paroli, kaj neni ŝias pro kio li suferas.” Ŝi portis hejmen la lozanĝojn kaj revenis la sekvan tagon plorante, kaj petis esencon donatan nur al kiuj tuj mortos. Tial, en la vesperon, neniun sur-

prizis aŭdi la mizerajn kriegojn de la edzino de Kasimo kaj de Morgiano, kiuj informis ĉiujn ke Kasimo mortis. La sekvan tagon Morgiano iris al olda ŝuflikisto apud la pordoj de la urbo, kiu frue malfermis sian budon, metis pecon da oro en lian manon, kaj petis lin sekvi ŝin kunportante sian kudrilon kaj fadenon. Liginte mantukon ĉirkaŭ liajn okulojn, ŝi gvidis lin al la ĉambro kie kuŝas la kadavro, deprenis la bandaĝo, kaj petis kunkudri la kvar kvar-



nojn, post tio ŝi denove kovris liajn okulojn kaj gvidis lin hejmen. Post tio ili enterigis Kasimon, kaj Morgiano lia sklavino sekvis lin al la tombo, plorante kaj ŝirtirante sian hararon, dum la edzino de Kasimo restis enhejme lamentokriante. La sekvan tagon ŝi iris loĝi kun Ali Babo, kiu donis la butikon de Kasimo al sia plej aĝa filo.

La Kvardek Ŝtelistoj, reveninte al la kavo, multe miregis kiam

ili trovis ke la kadavro de Kasimo mankas kiel ankaŭ kelkaj el iliaj monsakoj. “Oni certe eltrovis nin,” diris la Kapitano, “kaj ni nepre kaptiĝos se ni ne povos trovi kiu estas la persono kiu scias nian sekreton. Du personoj certe sciis ĝin; ni mortigis unu, nun ni devos trovi la alian. Tiucele unu el vi kiu estas kuraĝa, kaj ruza devos eniri la urbon vestite kiel veturanto, kaj trovi kiu estis la viro kiun ni mortigis, kaj ĉu oni parolas pri la stranga maniero de lia morto. Se la mesaĝisto malsukcesos li devos morti, por ke ni ne estu perfiditaj.” Unu el la ŝtelistoj stariĝis kaj proponis fari tion, kaj post kiam la aliaj multe laŭdis lin pro lia kuraĝo li maskis sin, kaj eniris la urbon je la tagiĝo, ĝuste apud la budo de Baba Mustafon. La ŝtelisto salutis lin, dirante: “Honestulo, kiel vi kapablas vidi sufiĉe bone por kudri je via aĝo?” “Kvankam maljuna,” respondis la ŝuisto, “mi havas tre bonajn okulojn, kaj vi kredos min kiam mi diros al via ke mi kunkudris mortan korpon en loko kie mi havis malpli da lumo ol nun.” La rabisto ĝojegis pro sia bona fortune, kaj, doninte al li pecon da oro, petis esti gvidita al la domo kie li kudris la mortan korpon. Unue Mustafon rifuzis, dirante ke liaj okuloj estis bandaĝitaj; sed kiam la rabisto donis al li duan pecon da oro li komencis pensi ke eble li memorus la vojon se liaj okuloj estus denove bandaĝitaj. Tiu rimedo sukcesis; la rabisto parte gvidis lin, kaj parte estis gvidita de li, rekte al la domo de Kasimo, kies pordon la rabisto signis per peco da kreto. Poste, tre plaĉite, li adiaŭis Baba Mustafon kaj reiris al la arbaro. Post kelka tempo Morgiano, elirinte, vidis la signon faritan de la rabisto, ekdivenis ke ia misfaro planiĝas, kaj alportinte pecon da kreto signis du-tri pordojn ambaŭflanke, sen diri ion al sia mastro aŭ sia mastrino.

La ŝtelisto, intertempe, informis siajn kamaradojn pri sia trovo. La Kapitano dankis lin, kaj ordonis ke li montru al li la domon kiun li signis. Sed kiam ili venis tien ili vidis ke kvin aŭ ses el la domoj estis simile kretsinitaj. La gvidisto estis tiom perpleksa ke li ne scipovis respondi, kaj kiam ili reiris oni tuj senkapigis lin ĉar li malsukcesis. Ili sendis alian rabiston, kaj, subaĉetinte Baba Mustafon, li signis la domon per ruĝa kreto; sed Morgiano denove estis tro lerta por ili, kaj la dua mesaĝisto ankaŭ estis mortigita. La Kapitano nun decidis mem iri, sed, pli saĝe ol la aliaj, li ne signis la domon, sed rigardis ĝin tiel atente ke li ne povos mismemo-

ri ĝin. Li reiris, kaj ordonis al siaj viroj ke ili eniru la najbarajn vilaĝojn kaj aĉetu dek naŭ mulojn, kaj tridek ok ledajn potegojn, tute malplenajn escepte de unu kiu estu plena de oleo. La Kapitano metis unu el siaj viroj, tute armitan, en ĉiun, kaj frotis la eksteron de la potegoj per oleo el la plena ujo. Post tio oni ŝarĝis la dek naŭ mulojn per tridek sep rabistoj en potegoj, kaj per la potego da oleo, kaj atingis la urbon je la vespera krepusko. La Kapitano haltigis siajn mulojn antaŭ la domo de Ali Babo, kaj diris al Ali Babo, kiu sidis ekstere por friskigi sin: "Mi alportis iom da oleo el distanco por vendi ĝin en la bazaro morgaŭ, sed nun estas tiel malfrue ke mi ne scias kie pasigi la nokton, krom se vi kompleksos min per permeso ke mi restu ĉi tie." Kvankam Ali Babo vidis la Kapitanon de la rabistoj en la arbaro, li ne rekonis lin maskitan kiel olekomerciston. Li bonvenigis lin, malfermis siajn pordojn por ke la muloj eniru, kaj iris al Morgiano por peti ŝin prepari liton kaj vespermanĝon por lia gasto. Li gvidis la fremdulon en sian halon, kaj post ilia vespermanĝo li reiris paroli al Morgiano en la kuirejo, dum la Kapitano eniris la korton pretekstante ke li prizorgos siajn mulojn, sed vere por ordoni al siaj viroj kion ili faru. Komence ĉe la unua potego kaj fine ĉe la lasta, li diris al ĉiu viro: "Tuj kiam mi ĵetos ŝtonojn el la fenestro de la ĉambro kie mi kuŝas, malfermu la potojn per viaj tranĉiloj kaj elvenu, kaj mi tuj iros al vi." Li reiris al la domo, kaj Morgiano gvidis lin al lia ĉambro. Post tio ŝi ordonis al Abdalao, ŝia kunsklavo, varmigi la poton por prepari iom da buljono por ŝia mastro, kiu enlitiĝis. Intertempe ŝia lampo estingiĝis, kaj ŝi ne havis pli da oleo en la domo. "Ne malkvietu," diris Abdalao; "eniru la korton kaj prenu iom el unu el tiuj potoj." Morgiano dankis lin pro lia konsilo, prenis la oleujon, kaj eniris la korton. Kiam ŝi venis al la unua potego la rabisto en ĝi diris softe: "Ĉu jam la ĝusta horo?"

Ĉiu alia sklavo ol Morgiano, trovinte viron en la potego anstataŭ la deziratan oleon, kriegus brue; sed ŝi, sciante la danĝeron al sia mastro, elpensis planon, kaj respondis nelaŭte: "Ankoraŭ ne, sed baldaŭ." Ŝi iris al ĉiu el la potegoj, simile respondante, ĝis ŝi atingis la potegon da oleo. Ŝi nun komprenis ke ŝia mastro, kredante gastigi olekomerciston, lasis tridek ok rabistojn en sian domon. Ŝi plenigis sian oleujon, reiris en la kuirejon, kaj, flamiginte

sian lampon, reiris al la olepotego kaj plenigis grandan kaldronon per oleo. Kiam ĝi bolis ŝi iris verŝi sufiĉan oleon en ĉiun potegon



por silentigi kaj mortigi la rabiston en ĝi. Farinte tiun kuraĝan agon ŝi reiris al la kuirejo estingis la fajron kaj la lampon, kaj atendis por vidi kio okazos.

Post kvarono de horo la Kapitano de la rabistoj vekigis, ellitigis, kaj malfermis la fenestron. Ĉar ŝajnis kviete, li ĵetis kelkajn malgrandajn ŝtonerojn kiuj frapis la potegojn. Li aŭskultis, kaj ĉar neniu el liaj viroj ŝajne moviĝis li fariĝis maltrankvila, kaj subeniris en la korton. Irinte al la unua potego kaj dirinte: “Ĉu vi dormas?” li flaris

la varmegan bolintan oleon, kaj tuj eksciis ke lia komploto murdi Ali Babon kaj lian domanaron estis eltrovita. Li trovis sian tutan bandon morta, kaj, trovinte ke mankas oleo en la lasta potego, li konsciiĝis pri kiel ili mortis. Li poste perforte malfermis la seruron de pordo kondukanta en ĝardenon, kaj transgrimpinte plurajn murojn eskapis. Morgiano aŭdis kaj vidis ĉion ĉi, kaj, ĝojante pro sia sukceso, enlitigis kaj endormiĝis.

Je la tagiĝo Ali Babo ellitigis, kaj, vidante ke la olepotoj restas, demandis kial la komercisto ne foriris kun siaj muloj. Morgiano petis lin enrigardi la unua potegon kaj vidi ĉu estas oleo. Vidante viron, li retiris sin terurate. “Ne timu,” diris Morgiano; “la viro ne povas damaĝi vin: li mortis.” Ali Babo, kiam li iomete retrankviliĝis malgraŭ sia mirego, demandis kio okazis al la komercisto. “Komercisto!” diris si, “li ne pli ol mi estas komercisto!” kaj ŝi ra-

kontis al li la tutan historion, certigante al li ke temas pri komploto de la rabistoj el la arbaro, da kiuj restas nur tri, kaj ke la blanka kaj ruĝa kretsinoj iel rilatis al ĝi. Ali Babo tuj liberigis Morgianon, dirante ke li dankas al ŝi sian vivon. Post tio ili enterigis la kadavrojn en la ĝardeno de Ali Babo, kaj la mulojn vendis en la bazaro liaj sklavoj.

La Kapitano reiris al sia soleca kavo, kiu ŝajnis timiga al li sen liaj perditaj kompanoj, kaj firme decidis venĝi ilin mortigante Ali Babon. Li zorge vestis sin, kaj eniris la urbon, kie li ekloĝis en gastejo. Dum tre multaj veturoj al la arbaro li forportis multajn riĉajn ŝtofojn kaj multajn delikatajn linŝtofojn, kaj establis butikon kontraŭ tiu de la filo de Ali Babo. Li nomis sin Kogio Hasano, kaj ĉar li estis kaj ĝentila kaj bone vestita li baldaŭ amikiĝis kun la filo de Ali Babo, kaj per li kun Ali Babo, kiun li daŭre invitis kunvespermanĝi. Ali Babo, volante rekompenci lian afablecon, invitis lin en sian domon kaj akceptis lin ridetante, dankante lin pro lia komplezo al lia filo. Kiam la komercisto estis forironta Ali Babo haltigis lin, dirante: “Kien vi iras, sinjoro, tiel haste? Ĉu vi ne restos por vespermanĝi kun mi?” La komercisto rifuzis, dirante ke estas kialo; kaj, kiam Ali Babo demandis al li kio ĝi estas, li respondis: “Sinjoro, estas ke mi ne povas manĝi ion kio enhavas salon.” “Se nur estas tio,” diris Ali Babo, “mi diru al vi ke ne estos salo aŭ en la viando aŭ en la pano kiujn ni manĝos ĉinokte.” Li iris ordoni tion al Morgiano, kiu multe surpriziĝis. “Kiu estas tiu viro,” ŝi diris, “kiu manĝas neniom da salo kun sia viando?” “Li estas honestulo, Morgiano,” respondis ŝia mastro; “tial agu laŭ mia ordono.” Sed ŝi ne povis nuligi sian deziron vidi tiun strangulon, do ŝi helpis Abdalaon suprenporti la telerojn, kaj vidis tuj ke Kogio Hasano estas la rabista Kapitano, kaj portas ponardon sub sia vesto. “Ne surprizas min,” ŝi diris al si, “ke ĉi tiu fulo, kiu intencas mortigi mian mastron, rifuzas manĝi salon kun li; sed mi malhelpos liajn planojn.”

Ŝi alsendis la vespermanĝon per Abdalao, dum ŝi pretigis sin por unu el la plej aŭdacaj agoj pripenseblaj. Post la deserto Kogio Hasano lasiĝis sola kun Ali Babo kaj lia filo, kiujn li planis ebriigi kaj poste murdi. Morgiano intertempe metis kapveston sur sin similan al tiu de dancoknabino, kaj ligis zonon ĉirkaŭ sian talion,

de kiu pendis ponardo kun arĝenta tenilo, kaj diris al Abdalao: “Prenu vian tambureton, kaj ni iru distri nian mastron kaj lian gaston.” Abdalao prenis sian tambureton kaj ludis antaŭ Morgiano ĝis ili venis al la pordo, kie Abdalao ĉesis ludi kaj Morgiano profunde riverencis. “Envenu, Morgiano,” diris Ali Babo, “kaj lasu Kogio Hasanon vidi kion vi povas fari;” kaj turninte sin al Kogio Hasano, li diris: “Ŝi estas mia sklavino kaj mia mastrumanto.” Al Kogio Hasano tute ne plaĉis, ĉar li timis ke lia oportuno mortigi Ali Babon malaperis por nun; sed li ŝajnis grandan fervoron vidi Morgianon, kaj Abdalao komencis ludi kaj Morgiano komencis danci. Prezertinte plurajn dancojn ŝi eltiris sian ponardon kaj gestis per ĝi, kelkfoje celigante ĝin al sia propra brusto, kelkfoje al tiu de sia mastro, kvazaŭ parton de la danco. Subite, senspire, ŝi ekprenis la tambureton de Abdalao per sia maldekstra mano, kaj, tenante la ponardon per sia dekstra, etendis la tambureton al sia mastro. Ali Babo kaj lia filo metis pecon da oro en ĝin, kaj Kogio Hasano, vidante ke ŝi venas al li, eltiris sian monujon por elpreni donacon por ŝi, sed dum li metis sian manon en ĝin Morgiano puŝis la ponardon en lian koron.

“Fiulino!” kriis Ali Babo kaj lia filo, “kion vi faris por ruinigi nin?” “Mi celis gardi vin, mastro, ne ruinigi vin,” respondis Morgiano. “Vidu,” malfermante la veston de la falsa komercisto kaj montrante la ponardon; “vidu kian malamikon vi gastigis! Memoru, li rifuzis manĝi salon kun vi, kaj kion pli vi volas? Rigardu lin! li estas kaj la falsa olekomercisto kaj la Kapitano de la Kvardek Ŝtelistoj.”

Ali Babo tiom dankemis al Morgiano ĉar ŝi tiel savis lian vivon ke li proponis al ŝi sian filon kiel edzon, la filo volonte konsentis, kaj kelkajn tagojn poste la geedziĝo festiĝis tre grandioze. Fine de jaro Ali Babo, aŭdinte nenion pri la du ceteraj rabistoj, taksis ilin mortintaj, kaj eliris al la kavo. La pordo malfermiĝis kiam li diris: “Apertu, Sezamo!” Li eniris, kaj vidis ke neniuj estis tie post la foriro de la Kapitano. Li forportis tiom da oro kiom li povis porti, kaj reiris al la urbo. Li diris al sia filo la sekreton de la kavo, kiun lia filo transdiris siavice, tiel ke la infanoj kaj prainfanoj de Ali Babo estis riĉaj ĝis la fino de siaj vivoj.¹

¹*Arabaj noktoj*

HANĈJO KAJ GRENJO

FOJE loĝis ĉe la rando de granda arbaro malriĉa lignohakisto kun siaj edzino kaj du infanoj; la knabo nomiĝis Hanĉjo kaj la knabino Grenjo. Li ĉiam havis sufiĉe malmulton per kiu vivi, kaj foje, kiam estis grandega malsato en la lando, li ne povis eĉ provizi al ili la ĉiutagan panon. Unu nokton, dum li malkviete ruliĝadis en la lito, plene de zorgoj kaj maltrankvilo, li ĝemis kaj diris al sia edzino: “Kio fariĝos el ni? kiel ni povos subteni niajn povrajn infanojn, nun kiam ni havas nenion pli por ni?” “Mi diros al vi, edzo,” respondis la virino; “frue morgaŭ matene ni kondukos la infanojn en la plej densan parton de la arbaro; tie ni ardigos fajron por ili kaj donos al ĉiu el ili pecon da pano; post tio ni pluiros al nia laboro kaj lasos ilin solaj. Ili ne povos trovi sian vojon hejmen, kaj tiel ni seniĝos de ili.” “Ne, edzino,” diris ŝia edzo, “tion mi ne faros; kiel mia koro povus permesi ke mi lasu miajn infanojn solaj en la arbaro? la sovaĝaj bestoj baldaŭ venus kaj disŝirus ilin.” “Ho! malsaĝulo!” diris ŝi, “sekve ni ĉiuj kvar devos morti pro malsato, kaj plej bone estas ke vi iru raboti la tabulojn por niaj ĉerkoj;” kaj ŝi donis al li nenian pacon ĝis li konsentis. “Sed mi ne povas ne kompati la povrajn infanojn,” pludiris la edzo.

Ankaŭ la infanoj ne povis dormi pro sia malsato, kaj ili aŭdis kion ilia duonpatrino diris al ilia patro. Grenjo ploris amare kaj parolis al Hanĉjo: “Nun ni vere finiĝis.” “Ne, ne, Grenjo,” diris Hanĉjo, “ne malkvietu, mi povos trovi metodon eskapi, ne timu.” Kaj kiam la olduloj jam endormiĝis li ellitiĝis, surmetis sian manteton, malfermis la malantaŭan pordon, kaj kaŝe eliris. La luno briladis klare, kaj la blankaj ŝtoneroj kuŝantaj antaŭ la domo scintilis kvazaŭ pecoj da arĝento. Hanĉjo klinis sin kaj plenigis sian poŝon per tiom da ili kiom li povis enpuŝi. Post tio li reiris kaj diris al Grenjo: “Konsoliĝu, mia kara fratineto, kaj endormiĝu: Dio ne forlasos nin;” kaj li rekuŝiĝis en la lito.

Je la matena krepusko, eĉ antaŭ ol leviĝis la suno, la virino venis veki la du infanojn: “Ellitiĝu, dormemuloj, ni ĉiuj iros al la arbaro por akiri lignon.” Ŝi donis al ĉiu el ili pecon da pano kaj parolis: “Jen iom por via lunĉo, sed ne manĝu ĝin antaŭe, ĉar vi ne ricevos pli.” Grenjo metis la panon sub sian antaŭtukon, ĉar Hanĉjo tenis la ŝtonojn en sia poŝo. Post tio ili ĉiuj eliris kune survoje al la arbaro. Marŝinte iom, Hanĉjo ekhaltis kaj retro-rigardis la domon, kaj tiun manovron li ripetis denove kaj ree. Lia patro observis kaj parolis: “Hanĉjo, kion vi gapas tie, kaj kial vi ĉiam restas malantaŭ ni? Atentu ne mispaŝi.” “Ho! patro,” diris Hanĉjo, “mi rigardas mian blankan katidon, kiu sidas sur la tegmento gestante adiaŭe al mi.” La virino kriis: “Kia azeno vi estas! jen ne via katido, jen la matena suno brilanta sur la kamentubon.” Sed efektive Hanĉjo ne retrorigardis al sia katido, anstataŭe li ĉiam faligis unu el la blankaj ŝtoneroj el sia poŝo sur la padon.

Kiam ili atingis la mezon de la arbaro la patro diris: “Nun, infanoj, iru alpreni amason da ligno, kaj mi ardigos fajron por ke vi ne malvarmiĝu.” Hanĉjo kaj Grenjo amasigis branĉojn ĝis ili faris stakon preskaŭ tiel altan kiel malalta monteto. La branĉoj brulis, kaj kiam la flamoj saltis alten la virino diris: “Nun kuŝiĝu apud la fajro, infanoj, kaj ripozu: ni eniros la arbaron por dehaki lignon; fininte ni revenos alpreni vin.” Hanĉjo kaj Grenjo sidiĝis apud la fajro, kaj je la tagmezo manĝis siajn pecetojn da pano. Ili aŭdis la batojn de la hakilo, do ili kredis ke ilia patro estas tre proksima. Sed hakilon ili efektive ne aŭdis, nur branĉon kiun li estis liginta al morta arbo kaj kiun blovadis la vento. Kaj post kiam ili sidis longatempe iliaj okuloj fermiĝis pro laco, kaj ili firme endormiĝis. Kiam ili fine vekigis jam estis noktobskure. Grenjo komencis plori, kaj diris: “Kiel ni povos eliri la arbaron?” Sed Hanĉjo konsolis ŝin. “Atendu iomete,” li diris, “ĝis la luno leviĝos, kaj tiam ni tute certe trovos nian vojon.” Kaj post la leviĝo de la plena luno li prenis sian fratinon per la mano kaj sekvis la ŝtonerojn, kiuj brilis kvazaŭ tripencaj moneroj, kaj indikis al ili la padon. Ili marŝis la tutan nokton, kaj je la tagiĝo reatingis la domon de sia patro. Ili frapis sur la pordon, kaj kiam la virino malfermis ĝin ŝi kriis: “Miskondutaj infanoj, kiom longe vi dormis en la arbaro! ni kredis ke vi neniam revenos.” Sed la patro ĝojis, ĉar lia

konscienco riproĉis lin pro lia postlaso de la solaj infanoj.

Post nelonge estis denove granda malsato en la lando, kaj la infanoj aŭdis sian patrinnon paroli al ilia patro enlite unu nokton: “Denove ĉio estas tutmanĝita; ni havas nur duonan panon en la domo, kaj kiam tio estos manĝita ni vere finiĝos. Necesas nuligi la infanojn; ni gvidos ilin pli profunden en la arbaron ĉifoje, por ke ili ne povu retrovi elirvojon. Ekzistas neniam alia rimedo por savi nin.” La koro de la viro forte frapis lin, kaj li pensis: “Nepre estus pli bone dividi la lastan mordaĵon kun la infanoj!” Sed lia edzino rifuzis aŭskulti liajn argumentojn, kaj nur riproĉadis lin kolere. Se oni cedas unufoje oni ne plu rajtas esperi, do, ĉar li ja cedis la unuan fojon, li devis ankaŭ duafoje cedi.

Sed la infanoj estis vekaj, kaj aŭdis la konversacion.



Dum la olduloj dormis Hanĉjo ellitiĝis kaj volis eliri kolekti ŝtonerojn denove, same kiel unuafoje; sed la virino estis riglanta la pordon, kaj Hanĉjo ne povis eliri. Sed li konsolis sian fratineton, kaj diris: “Ne ploru, Grenjo, kaj dormu pace, ĉar Dio certe helpos nin.”

Frue je la mateniĝo la virino venis kaj devigis la infanojn el-litiĝi. Ili ricevis sian pecon da pano, sed ĝi estis eĉ pli eta ol antaŭe. Survoje al la arbaro Hanĉjo dispremis ĝin en sia poŝo, kaj ĉiujn kelkajn minutojn li ekhaltis kaj faligis paneron sur la teron. “Hanĉjo, pro kio vi haltas kaj ĉirkaŭrigardas?” diris lia patro. “Mi rigardas mian kolombeton, kiu sidas sur la tegmento gestante adiaŭe al mi,” respondis Hanĉjo. “Stultulo!” diris la edzino; “jen ne via kolombo, jen la matena suno brilanta sur la kamentubon.”

Sed Hanĉjo iom post iom ĵetis siajn panerojn sur la padon. La virino gvidis la infanojn ankoraŭ pli profunden en la arbaron, pli ol ili iam antaŭe iris dum siaj vivoj. Post tio ili refaris fajron, kaj la patrino diris: “Nur sidu tie, infanoj, kaj se vi estas lacaj vi povos dormi iomete; ni eniros la arbaron por dehaki lignon, kaj vespere ni revenos alpreni vin.” Je la tagmezo Grenjo dividis sian panon kun Hanĉjo, ĉar li disĵetis sian laŭlonge de la pado. Post tio ili ekdormis, kaj la vespero pasis, sed neniŭ venis al la povraj infanoj. Kiam ili vekiĝis jam estis noktobskure kaj Hanĉjo konsolis sian fratinon, dirante: “Nur atendu Grenjo, ĝis la luno leviĝos, tiam ni vidos la panerojn kiujn mi disĵetis laŭlonge de la pado; ili montros al ni la vojon retroen al la domo.” Kiam la luno aperis ili starigis, sed ili trovis neniujn panerojn, ĉar la miloj da birdoj kiuj flugas en la arbaro kaj la kampoj prenis ilin ĉiujn. “Ne gravas,” diris Hanĉjo kaj Grenjo; “vi vidos ke ni tamen trovos eliron;” tamen malgraŭ tio ili ne trovis eliron. Ili vagadis la tutan nokton, kaj la sekvan tagon, de la mateno ĝis la vespero, sed ili ne povis trovi padon el la arbaro. Ili ankaŭ tre malsatis, ĉar ili havis nenion manĝeblan escepte de kelkaj beroj kiujn ili trovis kreskantaj sur la tero. Kaj fine ili tiom laciĝis ke iliaj kruroj rifuzis plu porti ilin, do ili kuŝiĝis sub arbo kaj profunde endormiĝis.

La trian matenon post sia foriro el la domo de sia patro ili rekomencis vagi, sed ili nur pli kaj pli profunden iris en la arbaron, kaj nun ili sentis ke se helpo ne venos al ili baldaŭ ili nepre pereos. Je la tagmezo ili vidis belan neĝeblankan birdon sidantan sur branĉo, kiu kantis tiel dolĉe ke ili ekhaltis kaj aŭskultadis ĝin. Kaj kiam ĝia kanto estis finita ĝi batis per siaj flugiloj kaj antaŭen flugis antaŭ ili. Ili sekvis ĝin kaj atingis dometon, sur kies tegmenton ĝi starigis; kaj kiam ili tre proksimiĝis ili vidis ke la dometo konsistas el pano kaj havas kukan tegmenton, kaj la fenestro konsistas el trasidebla sukero. “Nun ni ekmanĝos,” diris Hanĉjo, “kaj ja vere plenigos nin. Mi manĝos iom de la tegmento, kaj vi, Grenjo, povos manĝi iom de la fenestro, kiun vi trovos tre dolĉa.” Hanĉjo etendis sian manon kaj derompis peceton de la tegmento por trovi kia ĝi estas, kaj Grenjo iris al la fenestroklapo kaj komencis mordeti ĝin. Tuj akra voĉo vokis el la interna ĉambro:

*Mordu, mordu eta mus',
Kiu domon mordis ĵus?*

La infanoj respondis:

*Infan' de l' ĉielo,
De l' tempesta helo.*

kaj plu manĝadis, sen maltrankviliĝi. Hanĉjo, kiu plene amis la tegmenton, elŝiris grandan pecon, kaj Grenjo elpuŝis tutan rond-



an fenestrovitron, kaj sidiĝis por pli bone ĝui ĝin. Subite la pordo malfermiĝis kaj tre olda virino apogiĝanta per bastono ellamis. Hanĉjo kaj Grenjo tiom teruriĝis ke ili lasis fali kion ili havis en la manoj. Sed la maljunulino kapgestis kaj diris: “Oho! karaj infanoj, kiu gvidis vin ĉi tien? Nur envenu kaj restu kun mi, nenio malbona trafos vin.” Ŝi prenis ilin per la mano kaj kondukis ilin en la domon, kaj metis plej bongustegan manĝon antaŭ ilin—lakton

kaj sukerkovritajn patkukojn, kun pomoj kaj nuksoj. Post kiam ili manĝis, du belaj malgrandaj litoj prepariĝis por ili, kaj kiam Hanĉjo kaj Grenjo kuŝiĝis, ili sentis kvazaŭ ili eniris Ĉielon.

La oldulino ŝajnis sin tre amikema, sed efektive ŝi estis olda sorĉistino kiu embuskis la infanojn, kaj konstruis la etan panan domon nur por enlogi lin. Kiam ajn ŝi superfortis iun ŝi mortigis, kuiris, kaj manĝis lin, kaj okazigis veran festentagon por tiu celo. Nu sorĉistinoj havas ruĝajn okulojn, kaj ne povas longadistance vidi, sed, kiel bestoj, ilia flarkapablo estas tre potenca, kaj ili scias kiam preterpasas homoj. Kiam Hanĉjo kaj Grenjo eniris ŝiajn manojn ŝi ridis malice, kaj diris moke: “Mi nun kaptis ilin; ili ne eskapos de mi.” Frue en la mateno, antaŭ ol la infanoj vekiĝis, ŝi ellitiĝis, kaj kiam ŝi vidis ilin ambaŭ tiel pace dormantaj, havantaj rondajn rozajn vangojn, ŝi murmuris al si: “Ili estos delikata mordajo.” Ŝi prenis Hanĉjon per sia osteca mano kaj portis lin en malgrandan stalon, kaj riglis la pordon kontraŭ li; li kriadu laŭdezire, tute ne utilis. Post tio ŝi iris al Grenjo, skuis ŝin ĝis ŝi vekiĝis, kaj kriis: “Ellitiĝu, pigrulino, alportu akvon kaj kuiru ion por via frato. Kiam li dikiĝos mi manĝos lin.” Grenjo komencis plori amare, sed estis senutile: ŝi devis agi laŭ la ordonoj de la fisorĉistino.

Do la plej bonaj manĝaĵoj kuiriĝis por povra Hanĉjo, sed Grenjo ricevis nur krabŝelojn. Ĉiumatene la oldulino lamis al la stalo kaj kriis: “Hanĉjo, elmetu vian fingron, por ke mi sentu ĉu vi dikiĝas.” Sed Hanĉjo ĉiam eletendis oston, kaj la oldulino, kies okuloj malakre vidis, ne povis vidi ĝin, kaj ĉiam kredis ĝin fingro de Hanĉjo kaj ne komprenis kial li tiel malrapide dikiĝas. Post la paso de kvar semajnoj Hanĉjo restis ankoraŭ maldika, kaj ŝi senpacienciĝis kaj decidis ne plu atendi. “He! Grenjo,” ŝi vokis al la knabino, “rapidu alporti akvon. Ĉu dikan ĉu nedikan, mi mortigos lin morgaŭ kaj kuiras lin.” Ho! kiel ploregis la povra fratineto dum ŝi portis la akvon, kaj kiel la larmoj fluis sur ŝiaj vangoj! “Bona ĉielo helpu nin nun!” ŝi kriis; “se nur la sovaĝaj bestoj en la arbaro estus manĝintaj nin, almenaŭ ni kune mortus.” “Nur silentu,” diris la fioldulino; “tio ne helpos vin.”

Frue en la mateno Grenjo devis eliri kaj pendigi la kaldronon plenan de akvo, kaj ardigi la fajron. “Unue ni bakos,” diris la oldulino; “mi jam varmigas la fornon kaj knedis la paston.” Ŝi elpuŝis

Grenjon al la forno, el kiu fajraj flamoj jam flagris. “Enrampu,” diris la sorĉistino, “kaj trovu ĉu ĝi estas ĝuste varmigita, tiel ke ni povos enŝovi la panon.” Ĉar enmetinte Grenjon ŝi intencis fermi la bakujon kaj lasi la knabinon bakiĝi, por povi manĝi ankaŭ ŝin. Sed Grenjo perceptis ŝian intencon, kaj parolis: “Mi ne scias fari tion; kiel mi eniru?” “Stulta anserino!” diris la oldulinaĉo, “la aperturo estas sufiĉe granda; vidu, mi mem povus eniri;” kaj ŝi rampis cele ĝin, kaj puŝis sian kapon en la bakujon. Kaj Grenjo enŝovis ŝin tiel ke ŝi plene eniris, fermis la feran pordon, kaj riglis. Jadi! kiom ŝi kriegis! estis tute terure; sed Grenjo fuĝis, kaj lasis la fiulinon perezi mizere.

Grenjo kuris rekte al Hanĉjo, malfermis la pordon de la malgranda stalo, kaj kriis: “Hanĉjo, ni estas liberaj; la olda sorĉistino mortis.” Do Hanĉjo elrapidis kiel birdo el kaĝo kies pordo estas malfermita. Kiom ili ĝojis, kaj ĉirkaŭbrakis la kolon unu de la alia, kaj saltis pro ĝojo, kaj kisis unu la alian! Kaj ĉar ili ne plu bezonis timi, ili eniris la domon de la oldulinaĉo, kaj tie ili trovis, en ĉiu angulo de la ĉambro, kestojn da perloj kaj valoraj ŝtonoj. “Ĉi tiuj estas eĉ pli bonaj ol ŝtoneroj,” diris Hanĉjo, kaj li pleniĝis siajn poŝojn per ili; kaj Grenjo diris: “Ankaŭ mi portos ion hejmen;” kaj ŝi pleniĝis sian antaŭtukon. “Sed nun,” diris Hanĉjo, “ni iru tute for de la arbaro de la sorĉistinoj.” Vaginte plurajn horojn ili atingis grandan lagon. “Ni ne povos transiri,” diris Hanĉjo; “mi vidas tute nenian ponton.” “Jes, kaj ankaŭ ne estas pramo,” respondis Grenjo; “sed vidu, tie naĝas blanka anaso; se mi petos, ŝi helpos nin transiri;” kaj ŝi vokis:

“Jen vere mornas du infanoj,
Kaj mankas ĉiaj pontoj, pramoj;
Do portu nin sur via dorso,
Sur via forta blanka torso.”

La anaso naĝis cele ilin, kaj Hanĉjo suriris ŝian dorson kaj petis sian fratineton sidi apud li. “Ne,” respondis Grenjo, “ni estus tro peza ŝarĝo por la anaso: ŝi transportu nin unu post la alia.” La bona birdo faris tion, kaj post sia sekura alteriĝo ĉe la alia flankon, ili pluiris dum kelka tempo, kaj la arbaro komencis pli kaj pli familiariĝi al ili, kaj fine ili vidis la domon de sia patro tre for.

Tiam ili komencis kuri, kaj saltinte en la ĉambron ĉirkaŭbrakis la kolon de sia patro. La viro ne pasigis feliĉan horon post kiam li lasis ilin en la arbaro, sed la virino mortis. Grenjo skuis sian antaŭtukon tiel ke la perloj kaj valoraj ŝtonoj ruliĝis en la ĉambron, kaj Hanĉjo deĵetis unu manplenon post alia el sia poŝo. Tiel finiĝis ĉiuj iliaj problemoj, kaj ili ĉiuj vivis feliĉe por ĉiam post tio.

Mia rakonto estas finita. Jen! tie kuras museto; kiu kaptos ĝin, tiu rajtos fari el ĝi grandan felan ĉapon for si.¹

¹Grimm

NEĜ-BLANKA KAJ ROZ-RUĜA

FOJE loĝis malriĉa vidvino en dometo antaŭ kiu estis ĝardeno, en kiu kreskis du rozarboj, unu kun blankaj rozoj kaj la alia ruĝaj. Ŝi havis du infanojn, kiuj estis tute similaj al la du rozarboj; unu nomiĝis Neĝ-blanka kaj la alia Roz-ruĝa, kaj ili estas la plej dolĉaj bonkonduktaj infanoj en la mondo, ĉiam diligentaj kaj ĉiam gajaj; sed Neĝ-blanka estis pli kvieta kaj pli milda ol Roz-ruĝa. Roz-ruĝa amis kuradi en la kampoj, kaj pluki florojn kaj kapti papiliojn; sed Neĝ-blanka sidis enhejme kun sia patrino kaj helpis ŝin mastrumi, aŭ laŭtleĝis al ŝi kiam estis nenia laboro farenda. La du infanoj amis unu la alian tiel elkore ke ili ĉiam marŝis man-en-mane kiam ajn ili eliris kune, kaj kiam Neĝ-blanka diris: “Ni neniam dizertos unu la alian,” Roz-ruĝa respondis: “Ne, ne dum nia vivo;” kaj la patrino aldonis: “Kion ricevos unu el vi, tion ŝi dividos kun la alia.” Ili ofte vagadis tra la arbaro kolektante berojn kaj neniu besto minacis damaĝi ilin; tute male, ili proksimiĝis al ili tre fidoplene; la leporeto manĝis brasikfolion el iliaj manoj, la cervoj paŝtis sin apud ili, la vircervo pretersaltis ilin gaje, kaj la birdoj restis sur la branĉaj kaj kantadis al ili plenforte. Nenia malbono trafis ilin; se ili restis malfrue en la arbaro kaj la nokto renkontis ilin, ili kune kuŝiĝis sur la musko kaj dormis ĝis la mateno, kaj ilia patrono sciis ke ili estas tute sekuraj, kaj neniam maltrankvilis pri ili. Foje, kiam ili dormis tra la nokto en la arbaro kaj ilin vekis la matena suno, ili perceptis belan infanon en brilanta blanka robo sidanta proksime al ilia kuŝejo. La figuro stariĝis, rigardis ilin afable, sed diris nenion, kaj malaperis en la arbaron. Kaj kiam ili rigardis ĉirkaŭ sin ili ekkonsciis ke ili estis dormintaj tre proksime al klifego, kaj ili nepre estus falintaj se ili estus plurintaj kelkajn paŝojn en la mallumo. Kaj kiam ili informis sian

patrinon pri sia aventuro, ŝi diris ke tio kion ili vidis sendube estis la anĝelo kiu gardas bonkonduktajn infanojn.

Neĝ-blanka kaj Roz-ruĝa tenis la dometon de sia patrino tiel bele pura kaj orda ke estis plezurige eniri ĝin. Dum la somero Roz-ruĝa prizorgis la domon, kaj ĉiumatene antaŭ ol vekiĝis ŝia patrino ŝi metis bukedon da floroj antaŭ la liton, unu rozon de ĉiu arbo. Dum la vintro Neĝ-blanka ardigis la fajron kaj supermetis la kaldronon, kiu konsistis el latuno, sed tiel bele polurita ke ĝi brilis kvazaŭ oro. En la vespero dum la neĝoflokoj falis ilia patrino diris: “Neĝ-blanka, iru fermi la fenestroklapojn,” kaj ili proksimiĝis al la fajro, dum la patrino surmetis siajn okulvitrojn kaj voĉlegis al ili el granda libro kaj la du knabinoj aŭskultis dum ili sidis ŝpinante. Apud ili sur la tero kuŝis ŝafideto, kaj malantaŭ ili staris malgranda blanka kolombo kun la kapo puŝita sub la flugilojn.

Unu vesperon dum ili sidis komforte tiel kune iu frapis sur la pordon kiel dezirante eniri. La patrino diris: “Roz-ruĝa, rapidu malfermi la pordon; devas esti iu veturanto deziranta ŝirmon.” Roz-ruĝa hastis malrigli la pordon, kaj kredis vidi povran viron staranta en la ekstera mallumo; sed estis nenio tia, nur urso, kiu puŝis sian dikan nigran kapon tra la pordon. Roz-ruĝa laŭte kriis kaj resaltis terurite, la ŝafido komencis bleki, la kolombo batis per siaj flugiloj, kaj Neĝ-blanka kuris kaŝi sin malantaŭ la lito de sia patrino. Sed la urso komencis paroli, kaj diris: “Ne timu: mi ne damaĝos vin. Mi estas duone frostita, kaj nur volas varmigi min iomete.” “Mia povra urso,” diris la patrino, “kuŝiĝu apud la fajro, nur atentu ne bruligi vian felon.” Kaj ŝi vokis: “Neĝ-blanka kaj Roz-ruĝa, envenu; la urso ne damaĝos vin: li estas bona, honesta ulo.” Do ili ambaŭ venis el siaj kaŝejoj, kaj iom post iom la ŝafido kaj la kolombo ankaŭ proksimiĝis, kaj ili ĉiuj forgesis sian timon. La urso petis la infanojn iomete elbati la neĝon el lia felo, kaj ili alportos broson kaj frotis lin ĝis li sekiĝis. Post tio la besto etendis sin antaŭ la fajro, kaj muĝis tre feliĉe kaj komforte. La infanoj baldaŭ fariĝis tute trankvilaj kun li, kaj vere turmentis sian senhelp-an gaston. Ili tiris lian felon per siaj manoj, metis siajn piedetojn sur lian dorson, kaj rulis lin tien kaj tien, aŭ prenis avelobranĉon kaj batis lin per ĝi; kaj kiam li muĝis ili nur ridis. La urso akceptis

ĉion plejeble bonnature, nur kiam ili trois li kriis: “Ho! infanoj, lasu min vivi!”

Roz-ruĝa, Neĝ-blanka,
Kompatu min surflanka.

Kiam venis la horo dormi dum la nokto, kaj la aliaj enlitiĝis, la patrino diris al la urso: “Vi kuŝu tie antaŭ la fajro, pro la ĉielo; tiel estos ŝirmo por vi kontraŭ la malvarmo kaj malseko.” Tuj je la tagiĝo la infanoj lasis lin eliri, kaj li troitis trans la neĝon en la arbaron. De tiam la urso venis ĉiuvespere je la sama horo, kaj kuŝiĝis



apud la fajro kaj lasis la infanojn petoladi laŭdezire pri li; kaj ili tiel kutimiĝis al li ke la pordo neniam fermiĝis antaŭ ol alvenis ilia nigra amiko.

Kiam printempiĝis, kaj ekstere ĉio estis verda, la urso diris unu matenon al Neĝ-blanka: “Nun mi devos foriri, kaj ne reveni dum la tuta somero.” “Kien vi iros, kara urso?” demandis Neĝ-blanka. “Mi devos iri en la arbaron kaj protekti mian trezoron kontraŭ la finanoj. Vintre, kiam la tero estas dure frostita, ili devas resti subtere, ĉar ili ne povas trabori; sed nun, post kiam la suno degeligis kaj varmigis la teron, ili trarompas kaj suprenvenas por spioni la landon kaj ŝteli kiom ili povas: kio eniras iliajn

manojn kaj iliajn kavojn ne estas facile reportebla en la lumon.” Neĝ-blanka multe tristiĝis pro la foriro de ilia amiko, kaj kiam ŝi malriglis la pordon por li, dum la urso elpaŝis iom da lia felo kap-tiĝis per la pordofrapilo, kaj Neĝ-blanka kredis ekvidi scintilantan oron sub ĝi, sed ŝi ne povis esti certa pri tio; kaj la urso haste forkuris, kaj baldaŭ malaperis malantaŭ la arbojn.

Nelonge post tio la patrino sendis la infanojn en la arbaron por kolekti faskojn da ligno. Dum sia vagado ili venis al granda



arbo kiu kuŝis faligite sur la tero, kaj sur la trunko inter la longaj herbofolioj ili rimarkis saltanton, sed kio ĝi estas, tion ili ne povis klare decidi. Pliproksimiĝinte ili perceptis nanon kun velka viz-aĝo kaj barbo metron longa. La finaĵo de la barbo estis forte premita en fendon de la arbo, kaj la vireto dissaltadis kvazaŭ hundo sur ĉeno, kaj laŭaspekte ne sciis kion fari. Li gapis la knabinojn per siaj arde ruĝaj okuloj, kaj kriegis: “Kial vi staras tie? ĉu vi ne povas veni helpi min?” “Kion vi volis fari, vireto?” demandis Roz-ruĝa. “Stulta demandema ansero!” respondis la nano; “mi volis

fendi la arbon, por akiri etajn lignopecojn por la kuireja fajro; tiuj dikaj ŝtipoj uzataj de krudaj aviduloj kiaj vi bruligas la malmultajn manĝaĵojn kiun ni bezonas. Mi sukcese enprenis la kojnon, kaj ĉio progresis bone, sed la damna ligno estis tiel glitiga ke ĝi ekelsaltis, kaj la arbo refermiĝis tiel rapide ke mi ne havis sufiĉan tempon por elpreni mian belan blankan barbon, do jen mi, firme enfiksita, kaj mi ne povas foriri; kaj vi, folaj glatvizaĝaj lakto-kaj-akvaj knabinoj nur staras ridante! Aĥ! Kiaj fiulaĉoj vi estas!”

La infanoj faris ĉion eblan, sed ili ne povis eligi la barbon; ĝi enfiksiĝis multe tro firme. “Mi kuros venigi iun,” diris Roz-ruĝa. “Frenezaj lignokapuloj!” koleris la nano, “kiel utilis alvoki aliulon? vi du jam estas tro laŭ mia opinio. Ĉu neniam pli bona plano trafis vin ol tio?” “Ne estu tiel senpacienca,” diris Neĝ-blanka, “mi certigos helpon al vi,” kaj preninte sian tondilon el sia poŝo ŝi detranĉis la finaĵon de lia barbo. Tuj kiam la nano estis libera li prenis sakon da oro kaŝitan inter la radikoj de la arbo, levis ĝin, kaj aŭdeble murmuris: “Damnu tiujn fiulaĉojn, ili detranĉis pecon de mia eleganta barbo!” Dirante tiuj vortojn li ŝvingis la sakon sur sian dorson, kaj ekmalaperis sen eĉ rerigardi la infanojn.

Nelonge poste Neĝ-blanka kaj Roz-ruĝa eliris akiri pladon da fiŝoj. Proksimiĝante al la akvoŝtupo ili vidis ion similan al enorma akrido, kvazaŭ ensaltonta la akvon. Ili antaŭenkuris kaj rekonis sian malnovan amikon la nanon. “Kien vi iras?” demandis Roz-ruĝa; “certe vi ne saltos en la akvon, ĉu?” “Tiel stulta mi ne estas,” kriaĉis la nano. “Ĉu vi ne vidas ke tiu damnita fiŝo penas entiri min?” La vireto estis sidanta sur la bordo fiŝkaptante, kaj misfortune la vento implikis lian barbon kun la ŝnuro; kaj kiam tuj poste granda fiŝo mordis, la febluleto ne havis forton por eltiri ĝin; la fiŝo estis tro forta, kaj trenis la nanon cele sin. Li laŭeble plejforte kroĉis sin al ĉiu junko kaj ĉiu herbofolio, sed tio ne multe helpis lin; li devis sekvi ĉiun moviĝon de la fiŝo, kaj grave minacis la danĝero tiriĝi en la akvon. La knabinoj alvenis ĝustamomente, tenis lin firme, kaj faris ĉion eblan por malimpliki lian barbon de la ŝnuro; sed vane, barbo kaj ŝnuro estis senespere kunplektitaj. Nenio eblis escepte de elpreni la tondilon kaj tranĉi la barbon, per kio malgranda parto de ĝi estis oferita.

Kiam la nano perceptis kion ili faras li kriis al ili: “Ĉu vi

nomas tion bonkonduito, vi fungaĉoj! malbeligi vizaĝon de iu? ĉu ne sufiĉis ke vi antaŭe kurtigis mian barbon, kaj nun vi insistas detranĉi ĝiajn plej bonajn partojn. Mi ne aŭdacus aperi ĉi tia antaŭ mia propra popolo. Ke vi jam estu en Infero!” Li prenis sakon da perloj kuŝantan inter la junkoj, kaj sen diri alian vorton li fortrenis ĝin kaj malaperis malantaŭ ŝtonon.

Okazis ke nelonge post tio la patrino sendis la du knabinojn al la urbo por aĉeti kudrilojn, fadenon, punton, kaj rubandojn. Ilia vojo kondukis ilin trans erikejon kie estis gigantaj rokoj diskuŝantaj tie kaj tie. Dum ili marŝadis ili vidis grandan birdon ŝvebi en la aero, cirkle irante nerapide super ili, sed ĉiam mal-suprenirante, ĝis fine ĝi stariĝis sur roko ne malproksima de ili. Tuj poste ili aŭdis akran penetran krion. Ili antaŭenkuris, kaj vidis hororoplene ke la aglo ĵetis sin sur ilian malnovan amikon la nano, kaj estis forportonta lin. La molkoraj infanoj ekprenis la vireton, kaj baraktis tiel longe kontraŭ la birdo ke fine li lasis sian predon. Kiam la nano renormaliĝis post sia unua ŝoko li kriaĉis per sia akrega voĉo: “Ĉu vi ne povus pli zorge trakti min? vi disŝiris mian maldikan manteleton, senutilaj mallertaj inaĉoj vi estas!” Li prenis sakon da valoraj ŝtonoj kaj malaperis sub la rokojn en sian kavon. La knabinoj kutimis al lia maldankemo, kaj plu-marŝis kaj plenumis siajn taskojn en la urbo. Survoje hejmen, dum ili denove trapasis la erikejon, ili neatendite vidis la nanon ŝutanta siajn valorajn ŝtonojn sur nekovritan spacon, ĉar li supozis ke neniuj pasos je tiel malfrua horo. La vespera suno brilis sur la scintilantaj ŝtonoj, kaj ili brilis kaj reflektis tiom bele ke la infanoj staris senmove kaj gapis ilin. “Kial vi staras tie gapante?” kriaĉis la nano, kaj lia cindre griza vizaĝo skarlatiĝis pro furiozo. Li estis tuj forironta dirinte tiujn koleraĵajn vortojn kiam subita muĝo aŭdiĝis, kaj nigra urso trotis el la arbaro. La nano eksaltis pro grandega timo, sed li ne havis sufiĉan tempon por atingi sian rifuĝejon, ĉar la urso jam estis apud li. Do li kriis terurite: “Kara Sinjoro Urso, lasu min vivi! Mi donos al vi mian tutan trezoron. Rigardu tiujn belajn valorajn ŝtonojn kuŝantajn tie. Lasu min vivi! kian plezuron vi akirus el povra febla uleto kia mi? Vi ne sentus min inter viaj dentoj. Jen, prenu tiujn du fiknabinojn, ili estos mola mordajo por vi, dikaj kiel junaj koturnoj; voru ilin, je la

ĉielo.” Sed la urso, tute ne atentante liajn vortojn, batis unufoje la fuleton per sia mano, kaj li neniam denove moviĝis.



La knabinoj ekforkuris, sed la urso vokis al ili: “Neĝ-blanka kaj Roz-ruĝa, ne timu; atendu ĝis mi venos al vi.” Ili rekonis lian voĉon kaj haltis, kaj kiam la urso estis tre proksima lia haŭto defalis, kaj bela viro staris apud ili, tute vestite per oro. “Mi estas filo de reĝo,” li diris, “kaj min destinigis tiu malsankta naneto, kiu ŝtelis mian trezoron, ke mi trakuru la arbaron kiel sovaĝa urso ĝis lia morto liberigos min. Nun li ricevis sian multe meritan punon.”

Neĝ-blanka edzigis lin, kaj Roz-ruĝa lian fraton, kaj ili dividis inter si la grandan trezoron kiun estis kolektinta la nano en sia kavo. La olda patrino loĝis dum multaj jaroj pace kun siaj infanoj; kaj ŝi kunportis la du rozarbojn, kaj ili staris antaŭ ŝia fenestro, kaj ĉiujare ili naskis la plej belajn ruĝajn kaj blankajn rozojn.¹

¹Grimm

LA ANSER-KNABINO

FOJE maljuna reĝino, kies edzo estis morta jam de multaj jaroj, havis belan filinon. Kiam ŝi plenkreskis ŝi fianĉiniĝis kun princo kiu loĝis tre for. Nu kiam proksimiĝis la tempo por ŝia edziniĝo kaj foriro en fremdan regnon, ŝia maljuna patrino donis al ŝi multajn multekostajn valizojn, kaj multajn ornamaĵojn, oron kaj arĝenton, kaj brelokojn, kaj, efektive, ĉion apartenantan al reĝa doto, ĉar ŝi multe amis sian filinon elkore. Ŝi donis al ŝi ankaŭ servistinojn, kiu rajdu kun ŝi kaj transdonu ŝin al la novedzo, kaj ŝi provizis al ĉiu el ili ĉevalon por la veturo. Nu, la ĉevalo de la Princino nomiĝis Falado, kaj kapablis paroli.

Kiam proksimiĝis la horo por foriro la maljuna patrino iris al sia litĉambro, kaj preninte malgrandan tranĉilon ŝi tranĉis siajn fingrojn ĝis ili sangis; post tio ŝi tenis blankan ĉifonon sub ili, kaj lasinte tri gutojn da sango fali sur ĝin, ŝi donis ĝin al sia filino, kaj diris: “Kara infano, zorge gardu ĉi tiun ĉifonon: ĝi eble utilis al vi dum la veturo.”

Do ili triste adiaŭis unu la alian, kaj la Princino puŝis la ĉifonon en la antaŭon de sia robo, suriris sian ĉevalon, kaj ekveturis cele la regnon de sia novedzo. Rajdinte dum eble horo la Princino komencis tre soifi, kaj diris al sia servistino: “Bonvolu deiri kaj porti al mi iom da akvo en mia ora taso el la roĝo tie: mi deziras trinki.” “Se vi soifas,” diris la servistino, “mem deiru, kaj kuŝiĝu apud la akvo kaj trinku; mi intencas ne plu esti via servisto.” La Princino tiom soifis ke ŝi deiris, klinis sin super la roĝon, kaj trinkis, ĉar al ŝi ne estis permesite trinki el la ora kaliko. Trinkante ŝi murmuris: “Ho! ĉielo, kion mi faru?” kaj la tri gutoj da sango respondis:

“Se scius la patrin’ en foro,
Ja disrompiĝus ŝia koro.”

Sed la Princino estis humila, kaj diris nenion pri la malĝentila konduto de sia servistino, kaj trankvile resuriris sian ĉevalon. Ili plu rajdis plurajn kilometrojn, sed la tago estis varmega, kaj la sunradioj feroce batadis ilin, tiel ke la Princinon baldaŭ resuperis



soifo. Kaj pasante rojon ŝi denove vokis al sia servistino: “Bonvolu deiri kaj donu al mi trinkon el mia ora taso,” ĉar jam antaŭ longe ŝi forgesis la malĝentilajn vortoj de sia servistino. Sed la servistino respondis, eĉ pli arogante ol antaŭe: “Se vi volas

trinkon, mem deiru kaj prenu ĝin; mi ne intencas esti via servistino.” La Princinon devigis ŝia soifo deiri, kaj klinante sin super la fluantan akvon ŝi ploris kaj diris: “Ho! ĉielo, kion mi faru?” kaj la tri gutoj da sango respondis:

“Se sciis la patrin’ en foro,
Ja disrompiĝus ŝia koro.”

Kaj dum ŝi trinkis, kaj klinis sin super la akvon, la ĉifono en kiu estis la tri gutoj da sango falis el ŝia sino kaj forfloris sur la roĵo, kaj ŝi pro sia malkvieto tute ne rimarkis la perdon. Sed la servistino observis ĝin plezuroplene, ĉar ŝi sciis ke tiel ŝi akiras potencon kontraŭ la novedzino, ĉar perdante la gutojn da sango la Princino fariĝis febla kaj senpova. Kiam ŝi volis resuriri sian ĉevalon Faladon, la servistino vokis: “Mi intencas rajdi Faladon: vi devos rajdi sur mia besto;” kaj ankaŭ tion ŝi devis akcepti. Post tio la servistino ordonis al ŝi severe ke ŝi deprenu siajn reĝajn robojn, kaj surmetu siajn vulgarajn, kaj fine ŝi devigis ŝin ĵuri je la ĉielo ke ŝi neniun vorton diros pri la afero kiam ili atingos la palacon; kaj se ŝi ne akceptos tiel ĵuri, ŝi estos tuj mortigita. Sed Falado observis ĉion, kaj metis ĝin en sian koron.

La servistino nun suriris Faladon, kaj la vera fianĉino la malpli bonan ĉevalon, kaj tiel ili daŭrigis sian veturon ĝis fine ili atingis la korton de la palaco. Estis multa ĝojado pro la alveno, kaj la Princo antaŭenkuris renkonti ilin, kaj supozante la servistinon sia nova edzino, li delevis ŝin de ŝia ĉevalo kaj gvidis ŝin supren al la reĝa ĉambro. Intertempe la vera Princino restis staranta sube en la korto. La olda Reĝo, kiu rigardis tra sia fenestro, vidis ŝin en tiu situacio, kaj li rimarkis kiel dolĉa kaj milda, eĉ bela, ŝi aspektas. Li tuj iris al la reĝa ĉambro, kaj demandis al la novedzino kiu estas ŝia akompaninto kiu nun restas starante sube en la korto. “Ho!” respondis la novedzino, “mi kunveturigis ŝin por distri min dum la veturo; donu al la knabino ian taskon por ke ŝi ne pigru.” Sed la olda Reĝo ne havis taskon por ŝi, kaj ne povis elpensi ion; do li diris, “Mi havas knabeton kiu prizorgas la anserojn, ŝi helpu lin.” La junulo nomiĝis Kurdkeno, kaj la vera fianĉino devis helpi lin paŝti la anserojn.

Nelonge post tio la falsa novedzino diris al la Princo: “Plej

kara edzo, mi petas komplezon de vi.” Li respondis: “Volonte.” “Do la buĉisto detranĉu la kapon de la ĉevalo kiun mi rajdis, ĉar ĝi tre miskondutis dum la veturo.” Sed la vero estis ke ŝi timis ke la ĉevalo parolos kaj informos pri kiel ŝi traktis la Princinon. Ŝi sukcesis, kaj la fidela Falado estis destinita morti. Kiam la informo atingis la orelojn de la vera Princino ŝi iris al la buĉisto, kaj sekrete promesis al li pecon de oro se li plenumos peton ŝian. Estis en la urbo granda obskura pordo, tra kiun ŝi devis marŝi nokte kaj matene kun la anseroj; ĉu li “bonvolos pendigi la kapon de Falado tie, por ke ŝi povu denove vidi ĝin?” La buĉisto diris ke li agos laŭ ŝia deziro, dehakis la kapon, kaj najlis ĝin firme super la pordejon.

Frue la sekvan matenon, dum ŝi kaj Kurdkeno pelis sian gregon tra la pordon, ŝi diris subirante:

“Ho! Falado, jen tie pendas vi;

kaj la kapo respondis:

“Jen vi; Princin’, trairu tie ĉi:

Se sciis la patrin’ en foro,

Ja disrompiĝus ŝia koro.”

Nun ŝi foriris de la turo kaj pelis la anserojn en kampon. Kaj kiam ili atingis la liberan spacon kie la anseroj manĝadis ŝi sidiĝis kaj malligis sian hararon, kiu estis pure ora. Kurdkeno amis vidi ĝin scintili en la sunlumo, kaj multe volis eltiri kelkajn harojn. Sed ŝi parolis:

“Vento, vento, milde blovu,

Kurdkenĉapon foren ŝovu;

Ĉasu li trans kamp’ kaj ter’

Ĝis miajn buklojn, or’ en ver’

Kiuj nun senorde pendas

Mi en ordon reetendas.”

Kaj ventekblovo forblovis la ĉapon de Kurdkeno, kaj li devis ĉasi ĝin ĝis tre for. Kiam li revenis de la ĉaso ŝi jam finis kombadi kaj bukligadi, kaj lia oportuno preni harojn ne plu ekzistis. Kurdkeno tre koleris, kaj rifuzis paroli al ŝi. Do ili paŝtis la anserojn ĝis la vespero kaj poste hejmeniris.

La sekvan matenon, dum ili pasis sub la pordego, la knabino diris:

“Ho! Falado, jen tie pendas vi;”
kaj la kapo respondis:

“Jen vi; Princin’ trairu tie ĉi:
Se sciis la patrin’ en foro,
Ja disrompiĝus ŝia koro.”



Kaj ŝi pluiris ĝis veni al la libera tero, kie ŝi sidiĝis kaj komencis kombi sian hararon; tiam Kurdkeno kuris al ŝi kaj volis kapti kelkajn harojn de ŝia kapo, sed ŝi kriis haste:

“Vento, vento, milde blovu,
Kurdkenĉapon foren ŝovu;
Ĉasu li trans kamp’ kaj ter’
Ĝis miajn buklojn or’ en ver’,
Kiu nun senorde pendas
Mi en ordon reetendas.”

Ventekblovo forblovis la ĉapon de Kurdkeno, tiel ke li devis ĉasi ĝin; kaj kiam li revenis ŝi jam delonge finis aranĝi siajn orajn buklojn, kaj li ne plu povis preni harojn; do ili paŝtis la anserojn ĝis la senlumiĝo.

Sed tiun vesperon kiam ili hejmeniris Kurdkeno iris al la olda Reĝo kaj diris: “Mi rifuzas plu paŝti anserojn kun tiu knabino.” “Pro kio?” demandis la olda Reĝo. “Ĉar ŝi nur konstante ĉagrenas min tuttage,” respondis Kurdkeno; kaj li listis ĉiujn ŝiajn misfar-ojn, kaj diris: “Ĉiumatene dum ni pelas la gregon tra la obskuran pordon ŝi diras al kapo de ĉevalo kiu pendas sur la maro:

“Ho! Falado, jen tie pendas vi;”

kaj la kapo respondas:

“Jen vi; Princin’, trairu tie ĉi:
Se sciis la patrin’ en foro,
Nun ja rompiĝus ŝia koro.”

Kaj Kurdkeno plu rakontis kio okazis sur la libera kampo kie la anseroj paŝtas sin, kaj ke li devas ĉiam ĉasi sian ĉapon.

La olda reĝo ordonis ke li iru peli sian gregon laŭkutime la sekvan tagon, kaj kiam la mateno vekigis li prenis pozicion malantaŭ la obskura pordo, kaj aŭdis la anser-knabinon saluti Faladon. Li sekvis ŝin tra la kampo, kaj kaŝis sin malantaŭ arbusto sur la libera spaco. Li baldaŭ vidis per siaj propraj okuloj ke la anser-knabo kaj la anser-knabino prizorgas la anserojn, kaj ke post iom da tempo la knabino sidiĝis kaj malligis sian hararon, kiu scintilis kiel oro, kaj deklamis:

“Vento, vento, milde blovu,
Kurdkenĉapon foren ŝovu;
Ĉasu li trans kamp’ kaj ter’

Ĝis miajn buklojn or' en ver',
 Kiuj nun senorde pendas
 Mi en ordon reetendas."

Ventekblovo forblovis la ĉapon de Kurdkeno, kaj li devis ĉasi ĝin ĝis tre for, kaj intertempe la knabino trankvile kombadis kaj bukligadis sian hararon: ĉion ĉi observis la olda Reĝo, kaj li reiris al la palaco sen esti rimarkita de iu ajn. Vespere kiam la anser-knabino hejmenvenis li vokis ŝin flanken, kaj demandis al ŝi kial



ŝi kondukas tiel. "Mi ne rajtas informi vin; kiel mi aŭdacus diri miajn veojn al iu ajn? ĉar mi ĵuris je la ĉielo ke mi ne faros tion, alie mi estus mortigita." La olda Reĝo petegis ŝin diri ĉion al li, kaj li ne lasis ŝin paca, sed li ne povis paroligi ŝin. Fine li diris: "Nu, se vi ne diros al mi, konfidu viajn problemojn al la fera forno tie;" kaj li foriris. Do ŝi rampis al la forno, kaj komencis ploradi kaj elverŝi sian povran koreton, kaj diris: "Jen mi sidas, dizertita de la tuta mondo, mi kiu estas filino de reĝo, kaj malfidela servistino devigis min depreni miajn proprajn vestojn, kaj prenis mian lokon kun mia fianĉo, dum mi devas plenumi la malaltan postenon

de anser-knabino.

“Se sciuis la patrin’ en foro,
Ja disrompiĝus ŝia koro.”

Sed la olda Reĝo staris ekstere ĉe la kamentubo, kaj aŭskultis ŝiajn vortojn. Post tio li reeniris la ĉambron, kaj ordonis ke ŝi foriru de la forno, kaj ordonis vesti ŝin per reĝaj vestoj, kiuj mirinde beligis ŝin. Post tio li alvokis sian filon, kaj sciigis al li ke li havas falsan edzinon, kiu estas nur servistino, kaj ke la vera fianĉino, maskite kiel eks-anser-knabino, staras apud li. La juna Reĝo ankore ĝojis vidante ŝian belecon kaj trovante kiom bona ŝi estas, kaj oni preparis grandan bankedon, al kiu ĉiuj estis invititaj. La novedzo sidis ĉe la kapo de la tablo, la Princino unuflanke de li kaj la servistino aliflanke; sed ŝi estis tiel konfuzita ke ŝi ne rekonis la Princinon en la scintilaj vestoj. Kiam ili estis manĝintaj kaj drinkintaj, kaj estis gajspiritaj, la olda Reĝo petis la servistinon solvi malfacilan problemon por li. “Kio,” diris li, “estas farenda al certa persono kiu trompis ĉiujn?” kaj li rakontis la tutan historion, finante per: “Nu, kiun kondamnon oni faru?” La falsedzino respondis: “Ŝi meritas esti metita tute nuda en barelon tegitan per akraj najloj, kiun trenu du blankaj ĉevaloj tien kaj reen laŭlonge de la strato ĝis ŝi estos morta.”

“Vi estas tiu persono,” diris la Reĝo, “kaj vi kondamnis vin mem; kaj ĝuste tion oni faros al vi.” Kaj post la plenumiĝo de la kondamno la juna Reĝo edzinigis sian veran fianĉinon, kaj ambaŭ regis la regnon pace kaj feliĉe.¹

¹Grimm

BUFOJ KAJ DIAMANTOJ

FOJE estis vidvino kiu havis du filinojn. La plej aĝa estis tiom simila al ŝi vizaĝe kaj humore ke kiu ajn rigardis la filinon vidis la patrinon. Ambaŭ estis tiel malagrablaj kaj tiel arogantaj ke ne eblis toleri ilin.

La plej juna, kiu estis identa kopio de sia patro rilate al ĝentileco kaj dolĉa humoro, estis krome unu el la plej belaj knabinoj iam viditaj. Ĉar oni nature amas sian plejsimilon, tiu patrino dorlotegis sian plej aĝan filinon, kaj samtempe ege malamis la plej junan—ŝi devigis ŝin manĝi en la kuirejo kaj labori konstante.

Inter alie, tiu kompatinda infano devis dufoje ĉiun tagon ĉerpi akvon pli ol du kilometrojn For de la domo, kaj porti hejmen kruĉon plenan de ĝi. Unu tagon, dum ŝi estis ĉe tiu fonto, venis al ŝi malriĉa virino kiu petis permeson trinki.

“Ho! jes, plenkore, Bonulino,” diris ĉi tiu bela knabineto; kaj tuj tralavinte la kruĉon, ŝi ĉerpis iom da akvo el la plej pura parto de la fonto, kaj donis ĝin al ŝi, tenante por ŝi la kruĉon tutdume por ke ŝi pli facile trinku.

La bonulino trinkinte diris al ŝi:

“Vi estas tiel bela, mia kara, tiel bona kaj tiel ĝentila, ke mi ne povas ne doni al vi donacon.” Ĉar ŝi estis feino, kiu surprenis la formon de malriĉa kamparanino, por trovi kiom vastaj estas la ĝentileco kaj bona kondukado de ĉi tiu bela knabino. “Kiel donacon mi donos al vi,” daŭrigis la Feino, “ke, kiam ajn vi parolos vorton, venos el via buŝo aŭ floro aŭ juvelo.”

Kiam ĉi tiu bela knabino hejmenvenis ŝia patrino riproĉis ŝin pro ŝia longa resto ĉe la fonto.

“Pardonu, panjo,” diris la povra knabino, “ke mi ne hastis.”

Kaj dum ŝi parolis tiujn vortojn venis el ŝia buŝo du rozoj, du perloj, kaj du diamantoj.

“Jen kion mi vidas?” diris ŝia patrino, plene surprizite. “Mi kredas vidi perlojn kaj diamantojn veni el la buŝo de la knabino! Kiel estas, infano?”

Nun la unuan fojon ŝi nomos ŝin “infano”.

La povrulino honeste diris al ŝi ĉion, samtempe elfaligante sennombrajn diamantojn.

“Je Dio,” kriis la patrino, “mi devos sendi mian infanon tien. Venu ĉi tien, Faninjo; vidu kio venas el la buŝo de via fratino



kiam ŝi parolas. Ĉu ne ĝojigus vin, mia kara, ricevi la saman donacon? Vi nur bezonos iri kaj ĉerpi akvon el la fonto, kaj kiam certa malriĉa virino petos de vi permeson trinki, tre ĝentile donu al ŝi ĝin.”

“Tre bele aspektos, certe,” diris tiu misedukita fulineto, “kiam mi ĉerpos akvon.”

“Vi tamen iru, aĉulino!” diris la patrino; “jam tuj.”

Do ŝi foriris, sed grumblante la tutan vojon, kunprenante la plej bonan arĝentan ujon en la domo.

Tuj kiam ŝi atingis la fonton ŝi vidis veni el la arbaro damon plej elegante vestitan, kiu venis al ŝi kaj petis trinki. Tiu estis, sciu, la sama feino kiu aperis al ŝia fratino, sed nun ŝi surprenis la mienon kaj vestojn de princino, por trovi kiom vasta estas la malĝentileco de ĉi tiu knabino.

“Ĉu mi venis ĉi tien,” diris la aroganta, malĝentila fiaĉulino,



“servi vin per akvo, ĉu? Mi supozas ke la arĝenta ujo estis alportita sole por via moŝto, ĉu? Tamen, vi rajtas trinki el ĝi, se vi tion deziras.”

“Vi ne estas ege ĝentila,” respondis la Feino, sen multe emociiĝi. “Nu, ĉar vi estas tiel malmulte instruita pri ĝentileco, kaj estas tiel malkomplezema, kiel donacon mi donos al vi ke kiam ajn vi parolos vorton, venos el via buŝo aŭ serpento aŭ bufo.”

Do tuj kiam ŝia patrino vidis ŝin veni ŝi kriis:

“Nu, knabino?”

“Nu, patrino?” respondis la impertinenta aĉulino, ĵetante el sia buŝo du viperojn kaj du bufojn.

“Ho! jadi,” kriis la patrino; “kion mi vidas? Ho! tiu fifratino ŝia okazigis ĉion ĉi; sed ŝi puniĝos,” kaj tuj ŝi kuris bategi ŝin. La povra infano fuĝis de ŝi, kaj kuris kaŝi sen en la arbaro, ne malproksime.

La filo de la Reĝo, kiu tiutempe revenadis de ĉasado, renkontis ŝin, kaj vidante ke ŝi estas tiel ege bela, demandis al ŝi kion ŝi faras tie, sola, kaj kial ŝi ploras.

“Ve! sinjorino, mia panjo pelis min ke mi fuĝu el la domo.”

La filo de la Reĝo, kiu vidis kvin-ses perlojn kaj egalan nombron da diamantoj veni el ŝia buŝo, petis ke ŝi rakontu al li kial estas. Sekve ŝi rakontis al li la tutan historion; kaj tiel la filo de la Reĝo ekamis ŝin, kaj opiniante ke tia donaco valoras pli ol iu ajn doto, kondukis ŝin al la palaco de sia patro la Reĝo, kaj tie edzinigis ŝin.

Rilate al ŝia fratino, ŝi tiom malamigis sin ke ŝia propra patrino forpelis ŝin; kaj la mizerulino, multe disvaginte, sen trovi iun kiu akceptas ŝin, iris al angulo de la arbaro kaj tie mortis.¹

¹Charles Perrault.

PRINCO KARULO

FOJE vivis reĝo kiu estis tiom justa kaj afabla ke liaj regatoj nomis lin “la Bona Reĝo”. Okazis, unu tagon, dum li ĉasadis, ke malgranda blanka kuniklo, kiun ĉasas liaj hundoj, saltis en liajn brakojn por ŝirmiĝi. La Reĝo karesis ĝin, kaj diris al ĝi:

“Nu, kunjo, ĉar vi venis por ke mi protektu vin, mi certigos ke neniuj damaĝos vin.”

Kaj li hejmenportis ĝin al sia palaco, kaj metigis ĝin en belan dometon, kun ĉiaj bonaĵoj kiel manĝaĵo.

Tiun nokton, kiam li estis sola en sia ĉambro, bela damo ekaperis antaŭ li; ŝia longa robo estis blanka kiel neĝo, kaj sur ŝia kapo estis krono el blankaj rozoj. La bonan Reĝon tre multe surprizis vidi ŝin, ĉar li sciis ke lia pordo estis firme fermita, kaj li ne povis elpensi kiel ŝi eniris. Sed ŝi diris al li:

“Mi estas la Feino Vero. Mi trapasis en la arbaro dum vi ĉasadis, kaj mi volis trovi ĉu efektive vi estas bona, kiel ĉiuj diras, do mi alprenis la formon de kuniklo kaj venis al viaj brakoj por ŝirmi, ĉar mi scias ke kiuj estas bonvolaj al bestoj estas des pli bonvolaj al homoj. Se vi rifuzus helpi min mi estus certa ke vi estas fia. Mi dankas vin pro la komplezo kiun vi faris al mi, kiu por ĉiam amikigis min. Vi bezonas nur peti de mi kion ajn vi volas kaj mi promesas doni ĝin al vi.”

“Sinjorino,” diris la bona Reĝo, “ĉar vi estas feino, vi sendube konas ĉiujn miajn dezirojn. Mi havas nur unu filon, kiun mi elkore amas, tial li nomiĝas Princo Karulo. Se vi vere tiom afable deziras komplezi min, mi petas ke vi estu lia amiko.”

“Plenkore,” respondis la Feino. “Mi povos fari vian filon la plej

bela princo en la mondo, aŭ la plej riĉa, aŭ la plej potenca; elektu kion vi prenas por li.”

“Mi petas neniun el tiuj por miaj filo,” respondis la bona Reĝo; “sed se vi faros el li la plej bonan princon, mi estos vere dankema al vi. Kiel valorus al li esti riĉa, aŭ bela, aŭ posedi ĉiujn regnojn de la mondo se li estus malbona? Vi bone scias ke li restus malfeliĉa. Nur bonulo povas esti vere kontenta.”

“Vi plene pravas,” respondis la Feino; “sed mi ne kapablas fari Princon Karulon bonulo krom se li helpos min; li devos mem strebi fariĝi bona; mi povas promesi nur ke mi donos al li bonajn konsilojn, riproĉos lin pro liaj misagoj, kaj punos lin se li ne korektos kaj punos sin mem.”

La bonan Reĝon tute kontentigis tiu promeso; kaj tre baldaŭ poste li mortis.

Princo Karulo multe bedaŭris, ĉar li plenkore amis sian patron, kaj volonte li fardonus ĉiujn siajn regnojn kaj ĉiujn siajn orajn kaj arĝentajn trezorojn se tio restigus la bonan Reĝon kun li. Post du tagoj, kiam la Princo jam enlitiĝis, la Feino ekaperis al li kaj diris:

“Mi promesis al via patro ke mi estos via amiko, kaj por plenumi mian promeson mi venis porti al vi donacon.” Kaj samtempe ŝi metis malgrandan oran ringon sur lian fingron.

“Multe zorgu pri ĉi tiu ringo,” ŝi diris: “ĝi valorus pli ol diamantoj; kiam ajn vi fiagos ĝi pikos vian fingron, sed se, malgraŭ ĝiaj pikoj, vi plu miskondutos, vi perdos mian amikecon, kaj mi



fariĝos via malamiko.”

Dirinte tion, la Feino ekmalaperis, lasante Princon Karulon multe surprizita.

Dum iom da tempo li tiel bone kondutis ke la ringo neniam pikis lin, kaj tio tiom kontentigis lin ke liaj regatoj nomis lin Princo Karulo la Feliĉa.

Unu tagon, tamen, li eliris ĉasi, sed li ne trafis predon, kaj tio tre mishumorigis lin; ŝajnis al li dum li rajdadis ke lia ringo premas lian fingron, sed ĉar ĝi ne pikis lin li ne atentis ĝin. Veninte hejmen li iris al sia propra ĉambro kaj lia hundeto Biba kuris renkonti lin, saltante ĉirkaŭ lin plezuroplene. “Foriru,” diris la Princo, tre malmilde. “Mi ne volas vi, vi ĝenas min.”

La povra hundeto, kiu tute ne komprenis tion, tiris lian mantelon por ke li almenaŭ rigardu ŝin, kaj tio tiom kolerigis Princon Karulon ke li tre forte piedbatis ŝin.

Tuj lia ringo pikis lin akre, kvazaŭ pinglo. Li tre multe surpriziĝis, kaj li sidiĝis en angulo de sia ĉambro sentante grandan honton pri si.

“Mi kredas ke la Feino mokas min,” li pensis. “Certe mi ne grave misagis nur ĉar mi piedbatis ĝenan beston! Kiel utilas esti la reganto de granda regno se al mi eĉ ne estas permesate bati mian propran hundon?”

“Mi ne mokas vin,” diris voĉo, respondante al la pensoj de Princo Karulo. “Vi trioble kulpas. Unue, vi estis mishumora ĉar vi ne ricevis kion vi deziris, kaj vi supozis ke ĉiuj homoj kaj bestoj ekzistas nur por plezurigi vin; poste vi multe koleris, kaj tio estas vere tre grava miso; kaj laste, vi kruelis al povra besteto kiu tute ne meritas mistrakton.

“Mi scias ke vi estas multe pli alta ol hundeto, sed se estus juste kaj permesate ke gravuloj mistraktu ĉiujn subulojn, mi rajtus jam ĉimomente bati vin, aŭ mortigi vin, ĉar feino estas pli alta ol homo. La avantaĝo kiam oni posedas grandan imperion estas ne ke oni povas fari kion ajn fian oni deziras, sed fari ĉion bonan kiun oni kapablas.”

La Princo ekkonsciis pri sia miseco, kaj promesis peni pli bone konduti estonte, sed li ne plenumis sian promeson. Enfakte, lin edukis malsaĝa vartistino, kiu drolotegis lin kiam li estas eta.

Kiam ajn li volis ion li nur bezonis krei kaj grumbladi kaj piedbati kaj ŝi donis al li kion ajn li petis, kaj tio egoistigis lin; ankaŭ ŝi diris al li senĉese, de mateno ĝis nokto, ke iam li estos reĝo, kaj ke reĝoj estas feliĉaj, ĉar ĉiu nepre devas obei kaj respekti ilin, kaj neniu povas malhelpi ke ili faru precize kion ajn ili volas.

Kiam la Princo kreskis sufiĉe por povi kompreni, li baldaŭ lernis ke nenio povas esti pli malbona ol esti fiera, obstina, kaj aroganta, kaj li vere penis kuraci sin kontraŭ tiuj difektoj, sed jam liaj misecoj fariĝis kutimoj; kaj miskutimo estas tre malfacile nuligebla. Li ja ne estis nature mistemperamenta; sed vere bedaŭris pri sia miskonduto, kaj diris:

“Mi tre malfeliĉas ĉar mi devas baraktadi kontraŭ miaj kolero kaj aroganteco ĉiutage; se mi estus punita pro ili dum mi estis eta ili ne tiom ĝenus min nun.”

Lia ringo pikis lin tre ofte, kaj kelkfoje li tuj ĉesis fari kion ajn li faris; sed aliffoje li malatentis ĝin. Strange, ĝi nur piketis lin pro triviala kulpo; sed kiam li vere miskondutis ĝi efektive sangigis lian fingron. Fine lin enuigis tia konstanta memorigo, kaj li volis povi fari kion ajn li volas, do li deĵetis la ringon, kaj opiniis sin la plej feliĉa el la homoj ĉar lin ĝi ne plu ĝene pikas. Li fordonis sin al ĉia malsaĝa ago kiun li elpensis, ĝis li fariĝis tre fia kaj neniu povis plu ami lin.

Unu tagon dum la Princo promenis, li vidis junulinon, kiu estis tiel bela ke li tuj ekdecidis edzinigi ŝin. Ŝin nomo estis Celio, kaj ŝi estis tiel bona kiel bela.

Princo Karulo imagis ke Celio kredus sin vere feliĉega se li proponus fari el ŝi grandan reĝinon, sed ŝi diris sentime:

“Sinjoro, mi estas sur ŝafistino, malriĉulino, tamen, malgraŭ tio, mi ne edzigos vin.”

“Ĉu mi malplaĉas al vi?” demandis la Princo, kiun multe ĉagrenis tiu respondo.

“Ne, mia Princo,” respondis Celio; “mi ne povas ne opinii vin tre bela; sed kiel utilus al mi riĉo, kaj ĉiuj grandiozaj roboj kaj kaleŝoj kiujn vi donus al mi, se la misagoj kiujn mi vidas de vi ĉiutage instigus min malami kaj malestimi vin?”

La Princo multe koleriĝis pro tiu parolo, kaj ordonis al siaj oficiroj kapti Celion kaj forporti ŝin al lia palaco. La tutan tagon

memoro pri kion ŝi diris ĝenis lin, sed ĉar li amis ŝin li ne povis decidi puni ŝin.

Unu el la plej amataj kompanoj de la Princo estis lia kunvartofrato, kiun li plene fidis; sed li tute ne estis bona persono, kaj li tre malbone konsilis Princon Karulon, kaj kuraĝigis ĉiun lian misagon. Kiam li vidis la Princon tiel malfeliĉa li demandis kio ĝenas, kaj kiam li klarigis ke li ne povas toleri la malŝaton kiun havas Celio pri li, kaj li ferme decidis fariĝi pli bona persono por plaĉi al ŝi, tiu miskonsilisto diris al li:

“Vere vi afable ĝenas vin pro tiu knabineto; se mi estus vi mi tre baldaŭ devigus ŝin obei min. Memoru ke vi estas reĝo, kaj ke estus ridinde vidi vin peni plaĉi al ŝafistino, kiu devus volontege esti sklavino via. Tenu ŝin en karcero, kaj manĝigu ŝin per nur pano kaj akvo dum kelka tempo, kaj poste, se ŝi ankoraŭ rifuzos edzigi vin, detranĉigu ŝian kapon, por ke aliaj homoj sciu ke vi estas obeenda. Ho! se vi ne povas devigi tian knabinon fari kion vi volas, viaj regatoj baldaŭ forgesos ke ili ekzistas en la mondo nur por plezurigi nin.”

“Sed,” diris Princo Karulo, “ĉu ne estus domaĝe se mi mortigus senkulpan knabinon? Ĉar vere Celio faris nenio kio meritas punon.”

“Se oni ne faras kion vi ordonas, oni meritas suferi pro tio,” respondis lia kunvartofrato; “sed eĉ se ja estus maljuste, estus pli bone ke viaj regatoj akuzu vin pri tio ol ke ili trovu ke ili povas insulti kaj malobei vin laŭdezire plej ofte.”

Dirante tion li tuŝis feblan parton de la karaktero de lia frato; ĉar la Princo timis perdi potencon kaj tial li tuj formetis sian unuan planon peni bone konduti, kaj decidis provi per timigo devigi la ŝafistinon edzigi lin.

Lia kunvartofrato, kiu volis ke li plenumu tiun decidon, invitis tri junajn korteganojn, egale fiajn kiel li mem, vespermanĝi kun la Princo. Ili persvadis lin multe drinki vinon, kaj daŭre ekscitis lian koleriĝon kontraŭ Celio; dirante al li ke ŝi mokis lian amon al ŝi. Fine, vere furioza, li forkuris trovi ŝin, deklarante ke se ŝi plu rifuzos edzinigi lin ŝi vendiĝos kiel sklavo la tuj sekvan tagon.

Sed kiam li atingis la ĉambron en kiu Celio estis ŝlosita, lin

multe surprizis trovi ke ŝi ne estas en ĝi, kvankam el lia poŝo la ŝlosilo neniam foriris. Lia kolero estis giganta, kaj li ĵuris venĝi sin kontraŭ kiu ajn helpis ŝin eskapi. Liaj fiamikoj, kiam ili aŭdis lin, decidis turni lian koleron kontraŭ oldan nobelon kiu iam estis lia instruisto; kaj kiu ankoraŭ kelkfoje aŭdacis kritiki la Princon pro liaj kulpoj, ĉar li amis lin kvazaŭ sian propran filon. Unue Princo Karulo dankis lin, sed post kelka tempo li senpacientiĝis kaj opiniis ke nur amo al kulpigado devigas lian oldan instruiston kulpigi lin dum ĉiu alia laŭdas kaj flatas lin. Do li ordonis lin retiri sin el la Kortego, kvankam li ankoraŭ, fojfoje, parolis pri li kiel pri indulo kiun li respektas, eĉ kvankam li ne plu amas lin. Liaj malindaj amikoj timis ke iam li ekdecidos revenigi sian oldan instruiston, do ili pensis ke nun estas bona oportuno forpeli lin por ĉiam.

Ili raportis al la Princo ke Sulimano, ĉar tiel nomiĝis la instruisto, fanfaronis esti helpinta Celion eskapi, kaj ili subaĉetis tri homojn ke ili diru ke Sulimano mem informis al ili tion. La Princo, tre kolere, sendis sian kunvartofraton kun nombro da soldatoj por venigi la instruiston antaŭ lin, ĉenita kiel krimulo. Farinte tiun ordonon li iris al sia propra ĉambro, sed apenaŭ li eniris kiam aŭdiĝis tondro tiel forta ke la tero skuiĝis, kaj la Feino Vero ekaperis subite antaŭ li.

“Mi diris al via patro,” diris ŝi severe, “bone konsili vin, kaj puni vin se vi rifuzos obei la konsilon. Vi malestimis miajn konsilojn, kaj laŭiris viajn propran vojon fian ĝis nun vi estas nur laŭaspekte homo; efektive vi estas monstro—hororo por ĉiu kiu konas vin. Venis la tempo ke mi plenumu mian promeson kaj komencu vian punon. Mi kondamnas vin ke vi similu al la bestoj kies kutimojn vi imitis. Vi faris vin simila al leono per via kolero, kaj simila al lupo per via avido. Kiel serpento, vi maldankeme malamikiĝis al persono kiu estis kvazaŭ dua patro via, via krudeco similigis vin al virbovo. Tial, en via nova formo, prenu la aspekton de ĉiuj tiuj bestoj.”

Apenaŭ la Feino ĉesis paroli kiam Princo Karulo terurate vidis ŝiajn vortojn plenumiĝi. Li ekhavis korpon de leono, kornojn de virbovo, piedojn de lupo, kaj korpon de serpento. Sammomente li ektrovis sin en granda arbaro, apud klara lago, en kiu

li povis klare vidi la teruran beston kiu estiĝis el li, kaj voĉo diris:

“Atentu zorge la staton kiun okazigis al vi via fieco; kredu min, via animo estas miloble pli hida ol via korpo.”

Princo Karulo rekonis la voĉon de la Feino Vero, kaj turnis sin furioze por kapti ŝin kaj vori ŝin se iel eble, sed li vidis nenium, kaj la sama voĉo pludiris:

“Min ridigas viaj senpoveco kaj kolero, kaj mi intencas puni vian arogantecon transdonante vin en la manojn de viaj propraj regatoj.”

La Princo komencis pensi ke plej bona ago estos foriri kiel eble plej for de la lago, almenaŭ tiam li ne konstante devos memori sian teruran hidecon. Do li kuris cele la arbaron, sed antaŭ ol iri multajn metrojn li falis en profundan truon faritan por kapti ursojn; kaj la ĉasistoj, kiuj estis kaŝintaj sin en arbo, alsaltis, kaj ligis lin per pluraj ĉenoj, kaj kondukis lin en la ĉefurbon de lia propra regno.

Survoje, anstataŭ rekoni ke liaj propraj misagoj okazigis tiun puniĝon, li akuzis la Feinon kiel la kaŭzon de ĉiuj liaj misfortunoj, kaj li mordis kaj penis ŝiri siajn ĉenojn furioze.

Kiam ili proksimiĝis al la urbo li vidis ke oni ial multe ĝojas, kaj kiam la ĉasistoj demandis kio okazis, oni diris ke la Princo, kiu sole plezuriĝis per turmentado al sia popolo, troviĝis en sia ĉambro, mortigite de fulmo (ĉar oni supozis ke tio okazis al li). Kvar el liaj korteganoj, la homoj kiuj kuraĝigis lian fiagadon, provis ekpreni la regnon kaj dividi ĝin inter si, sed la popolo, sciante ke iliaj miskonsiloj tiom ŝanĝis la Princon, detranĉis iliajn kapojn, kaj proponis la kronon al Sulimano, kiun la Princo estis lasinta en karcero. Tiu noblulo estas ĵus kronita, kaj la saviĝo de la regno estas la kaŭzo de la ĝojado. “Ĉar,” ili diris, “li estas bona kaj justa persono, kaj denove ni spertos pacon kaj prosperon.”

Princo Karulo muĝis pro kolero aŭdante tion; sed estis ankoraŭ pli malbone por li kiam li atingis la grandan placon antaŭ sia propra palaco. Li vidis Sulimanon sidi sur grandioza trono, kaj la tuta popolo premis sin ĉirkaŭ lin, dezirante al li longan vivon por ke li malfaru ĉiujn fiaĵojn faritajn de lia antaŭulo.

Baldaŭ Sulimano gestis per sia mano ke la popolo silentu, kaj diris: “Mi akceptis la kronon kiun vi proponis al mi, sed nur por

gardi ĝin por Princo Karulo, kiu ne estas morta malgraŭ via supozo; la Feino certigis al mi ke ankoraŭ ekzistas espero ke iam vi revidos lin, bona kaj virta kia li estis kiam li unue suriris la tronon. Ve!” li pludiris, “lin misgvidis flatantoj. Mi konis lian koron, kaj mi certas ke sen la misinfluo de liaj ĉirkaŭantoj li estus bona reĝo kaj patro por sia popolo. Ni malamu liajn kulpojn, sed ni kompatu lin kaj esperu lian restaŭrigon. Rilate al mi, volonte mi mortus se tio revenigus nian Princon por denove juste kaj inde regi nin.”

Tiuj vortoj trafis la koron de Princo Karulo; li konsciiĝis pri la veraj amo kaj fideleco de la olda instruisto, kaj la unuan fojon li riproĉis sin pro ĉiuj siaj fiagoj; sammomente li sentis sian tutan koleron fordegeli, kaj li komencis kviete pripensi sian pasintan vivon, kaj agnoski ke lia puno ne estas pli ol li meritas. Li ĉesis ŝirataki la ferajn stangojn de la kaĝo en kiu li estis enfermita, kaj fariĝis milda kiel ŝafido.

La ĉasistoj kiuj kaptis lin portis lin al granda menaĝerio, kie li ĉeniĝis inter ĉiuj aliaj sovaĝaj bestoj, kaj li firme decidis montri sian bedaŭron pri sia estinta miskonduto per milda obeado al la viro kiu devas prizorgi lin. Domaĝe, tiu viro estis tre kruda kaj malafabla, kaj kvankam la povra monstro ofte estis tute kvieta, li ofte batis lin senkiale kaj senkaŭze kiam li hazarde estis mis-humora. Unu tagon dum tiu zorgisto dormis tigro rompis sian ĉenon, kaj kuris al li por vori lin. Princo Karulo, kiu vidis kio okazas, unue plezuriĝis pro la penso ke li liberiĝos de sia turmentanto, sed baldaŭ li ŝanĝis sian opinion kaj volis ke tiu liberiĝu.

“Mi respondu al malbono per bono,” li diris al si, “kaj savu la vivon de la povrulo.” Apenaŭ li esprimis tiun deziron kiam lia fera kaĝo ekmalfermiĝis, kaj li kuris al la gardisto, kiu estis veka kaj defendadis sin kontraŭ la tigro. Vidante la monstron libera li opiniis sin pereonta, sed la timo baldaŭ fariĝis ĝojo, ĉar la afabla monstro ĵetis sin sur la tigron kaj tre baldaŭ mortigis ĝin, kaj poste venis kaŭri ĉe la piedoj de la savita homo.

Plene de dankemo, la gardisto klinis sin por karesi la strangan beston kiu tiel grave servis lin; sed subite voĉo diris en ĉi ties oreilon:

“Bona ago neniŭ okazu sen rekompenco,” kaj sammomente la monstro malaperis, kaj li vidis ĉe siaj piedoj nur belan hundeton!

Princo Karulo, ĝoja pro la ŝanĝiĝo, gaje kuradis ĉirkaŭ la gardisto, montrante sian ĝojon ĉiamaniere, kaj la viro, preninte lin en siajn brakojn, portis lin al la Reĝo, al kiu li rakontis la tutan historion.

La Reĝino diris ke volonte ŝi havos ĉi tiun mirindan hundeton. La Princo estus tre feliĉa en sia nova hejmo se li povus forgesi ke li estis homo kaj reĝo. La Reĝino karesis kaj prizorgis lin, sed ŝi tiom timis ke li tro dikiĝos ke ŝi konsultis la kortegkuraciston, kiu diris ke li manĝu nur panon, kaj ankaŭ eĉ tion ne tro multe ricevu. Do Princo Karulo ege malsatis dum la tuta tago, sed li multe paciencis.

Unu tagon, kiam oni donis al li lian paneton kiel matenmanĝon, li pensis ke li volonte manĝos ĝin ekstere en la ĝardeno; do li portis ĝin en sia buŝo kaj fortrotis cele rojon kiun li konis, tre distance de la palaco. Sed lin surprizis trovi ke la rojo mankas, kaj kie ĝi iam fluis nun situas granda domo laŭaspekte konstruita el oro kaj valoraj ŝtonoj. Nombro da homoj elegante vestitaj eniris ĝin, kaj sonoj de muziko kaj dancado kaj festenado estis aŭdeblaj en la fenestroj.

Sed ŝajnis tre strange ke la homoj venantaj el la domo estis palaj kaj maldikaj, kaj iliaj vestoj estis ŝiritaj kaj pendantaj de ili kiel ĉifonoj. Kelkaj ekfalis mortaj dum ili elvenis, antaŭ ol povi foriri—aliaj rampis pli foren, tre malfacile, dum aliaj kuŝis sur la tero, feblaj pro malsato, kaj petegis eron da pano de la homoj enirantaj la domon, sed ili plene rifuzis eĉ rigardi la povrulojn.

Princo Karulo iris al junulino kiu provis manĝis kelkajn herbofoliojn—tiom ŝi malsatis. Plene de kompato, li diris al ŝi:

“Mi multe malsatas, sed mi ne mortos pro malsato antaŭ ol ricevi mian vespermanĝon se mi donos mian matenmanĝon al ĉi tiu povrulo eble mi savos ŝian vivon.”

Do li metis sian pecon de pano en la manon de la knabino, kaj vidis ŝin manĝi ĝin fervore.

Baldaŭ ŝi ŝajnis denove esti tute bonfarta, kaj la Princo, tre ĝoja ĉar li povis helpi ŝin, pripensis reiri hejmen al la palaco, kiam li aŭdis grandan bruon, kaj turninte sin vidis Celion, kiu estis

portata kontraŭvole en la grandan domon.

La unuan fojon la Princo bedaŭris ne plu esti la monstro; ĉar se li estus tio, li povus savi Celion—nun li nur povas feble boji kontraŭ la homoj forportantaj ŝin, kaj provi sekvi ilin, sed ili ĉasis kaj forbatis lin per siaj piedoj.

Li firme decidis ne foriri de la loko antaŭ ol scii kio okazos al Celio, kaj kulpigis sin pro tio kio okazis al ŝi.

“Ve!” li diris al si, “mi furiozas kontraŭ la homoj kiuj for-



portas Celion, sed ĉu mi mem ne faris ekzakte tion, kaj se mi ne estus malhelpita, ĉu mi ne intencis ankoraŭ pli kruele agi al ŝi?”

Nun lin interrompis bruo super lia kapo—iu malfermas fenestron—kaj li vidis ĝoje ke tiu estas Celio mem, kiu antaŭenvenis kaj elĵetas pladon da plej bongustaspektaj manĝaĵoj. La fenestro refermiĝis, kaj la Princo Karulo, kiu nenion manĝis tiutage, pensis utiligi la oportunon manĝi ion. Li antaŭenkuris por komenci, sed la junulino al kiu li estis doninta sian panon

kriis terurite kaj prenis lin en siajn brakojn, dirante:

“Ne tuŝu ĝin, mia povra hundeto—tiu domo estas la plezur-palaco, kaj ĉiu venanta el ĝi estas venenoplena!”

Sammomente voĉo diris:

“Vidu, bona ago ĉiam okazigas rekompencan pro si,” kaj la Princo trovis sin ŝanĝita en belan blankan kolombon. Li memoris ke blanko estas la plejamata koloro de la Feino Vero, kaj li komencis esperi ke eble li finfine reakiros ŝian favoron. Sed ĝuste



nun lia unua devo estas zorgi pri Celio; kaj enaeriĝinte li flugis ĉirkaŭ la domon ripete ĝis li vidis malferman fenestron; sed vane li traserĉis ĉiun ĉambron. Nenia spuro de Celio estis videbla, kaj la Princo, senespere, decidis traserĉi la mondon ĝis trovi ŝin. Li flugis, pluen kaj pluen dum pluraj tagoj, ĝis veni al granda dezerto, kie li vidis kavernon—kaj ĝojige al li li vidis ke tie sidas Celio, dividante simplan matenmanĝon kun olda ermito.

Ĝojega pro trovi ŝin, Princo Karulo stariĝis sur ŝian ŝultron, penante esprimi per siaj karesoj kiom li ĝojas revidi ŝin, kaj Celio, surprizate kaj mirigate de la malsovaĝeco de ĉi tiu bela blanka kolombo, karesis ĝin softe, kaj diris, kvankam ŝi neniel supozis ke ĝi komprenas ŝin:

“Mi akceptas vian sindonon al mi—kaj mi amos vin ĉiam.”

“Atentu kion vi diras, Celio,” diris la olda ermito; “ĉu vi pretas plenumi tiun promeson?”

“Vere mi esperas ke jes, mia dolĉa ŝafistino,” kriis la Princo, kiu tiumomente ekreakiris sian naturan formon. “Vi promesis ami min ĉiam; diru al mi ke vi vere intencas kion vi diris, alie mi devos peti ke la Feino redonu al mi la formon de la kolombo kiu tiom plaĉis al vi.”

“Ne necesas timi ke ŝi ŝanĝos sian decidon,” diris la Feino, deĵetante la robon de ermito per kiu ŝi estis maskinta sin, kaj ekaperante antaŭ ili.

“Celio amas vin ekde kiam ŝi unue vidis vin, tamen ŝi ne volis diri tion al vi dum vi estis tiom obstina kaj miskonduta. Nun vi pentis kaj intencas bone konduti, kaj vi meritas esti feliĉa, do ŝi rajtas ami vin kiom ŝi deziras.”

Celio kaj Princo Karulo ĵetis sin ĉe la piedojn de la Feino, kaj la Princon ne povis lacigi lia abunda dankado pro ŝia bonkoreco. Celio ĝojegis aŭdi kiom li bedaŭras ĉiujn siajn estintajn malsaĝajn misagojn, kaj promesis ami lin dum sia tuta vivo.

“Stariĝu, miaj infanoj,” diris la Feino, “kaj mi transportos vin al la palaco, kaj Princo Karulo rehavos la kronon kiun li perdis pro sia miskonduto.”

Dum ŝi parolis ili retrovis sin en la halo de Sulimano, kaj lia ĝoje estis granda kiam li revidis sian karan mastron. Li ĝoje redonis la tronon al la Princo, kaj restis ĉiam lia plej fidela regato.

Celio kaj Princo Karulo regis dum multaj jaroj, sed li tiom firme decidis inde regi kaj plenumi sian devon ke lia ringo, kiun li denove portadis, eĉ ne unufoje pikis lin severe.¹

¹*Cabinet des Fées*

BLUBARBULO

FOJE estis viro havanta belajn domojn, kaj en la urbo kaj en la kamparo, multajn arĝentizaĵojn kaj orizaĵojn, broditajn meblojn kaj kaleŝojn plene kovritajn per oro. Sed tiu homo tre misfortune havis bluan barbon, kio tiel terure hidigis lin ke ĉiuj virinoj kaj knabinoj fuĝis de li.

Unu el liaj najbaroj, altasocia virino, havis du filinojn kiuj estis ege belaj. Li deziris ke ŝi donu al li unu el ili kiel edzinon, kaj li lasis ke ŝi elektu kiun el ili ŝi donos al li. Ili ambaŭ plene rifuzis lin, kaj sendis lin de unu al la alia kaj reen, ĉar ili ne povis toleri la personon edziĝi kun viro kiu havas bluan barbon. Krome, multe malplaĉis kaj senvoligis ilin ke li jam edziĝis kun pluraj virinoj, kaj neniu sciis kio okazis al ili.

Blubarbulo, por instigi ilian amon, kondukis ilin, kun ilia dama patrino, kaj tri-kvar damoj kiujn ili konas, kun aliaj gejunuloj el la najbaraĵo, al unu el siaj kamparaj loĝejoj, kie ili restis dum tuta semajno.

Troviĝis tiam nenio escepte de plezurfestoj, ĉasado, fiŝkaptado, dancado, ĝojado, festenado. Neniu enlitigis, sed ĉiuj pasigis la nokton ŝercante inter si. Mallonge: ĉio tiom bone sukcesis ke la plej juna filino komencis pensi ke la mastro de la domo havas barbon ne troege bluan, kaj ke li estas vere ĝentila persono.

Tuj post ilia hejmenreveno, la geedziĝo efektiviĝis. Post proksimume unu monato, Blubarbulo informis sian edzinon ke li devas veturi en la kamparo dum almenaŭ ses semajnoj, por pritrakti tre gravajn aferojn. Li deziras ke ŝi distru sin dum lia foresto, alvenigu siajn amikojn kaj konatojn, veturigu ilin en la kamparo, se ŝi deziras, kaj gaji kie ajn ŝi estas.

“Jen,” li diris, “la ŝlosiloj de la du grandaj ŝrankoj, en kiuj mi

havas miaj plej bonajn meblojn; ĉi tiuj estas de miaj arĝentizaĵoj kaj oraĵoj, kiuj ne uziĝas ĉiutage; ĉi tiuj malfermas miajn fortikajn kestojn, en kiuj estas mia mono: kaj oro kaj arĝento; ĉi tiuj estas por miaj kestoj da juveloj; kaj ĉi tiu estas la mastro ŝlosilo de ĉiuj miaj ĉambroj. Ĉi tiu malgranda ŝlosilo, ĝi estas la ŝlosilo de la kamero ĉe la ekstremo de la granda galerio sur la teretaĝo. Malfermu ĉiujn; eniru ĉiun el ili, escepte de tiu kamereto. Mi malpermesas ke vi eniru tiun, kaj mi tiel malpermesas ke, se vi malfermos ĝin, nur miajn justajn koleron kaj malpardonon vi spertos.”

Ŝi promesis obei, tre ekzakte, ĉion ordonitan de li. Sekve li, ĉirkaŭbrakinte ŝin, eniris sian kaleŝon kaj ekveturis.

Ŝiaj najbaroj kaj bonaj amikoj ne atendis alvokon fare de la nove edziniĝinta damo, ĉar tre multe ili malpaciencis vidi ĉiujn riĉajn meblojn de ŝia domo. Ili ne kuraĝis veni dum ŝia edzo ĉeestis, pro lia blua barbo, kiu timigis ilin. Ili trakuris ĉiujn ĉambrojn, kamerojn, kaj ŝrankojn, kiuj ĉiuj estis tiel elegantaj kaj riĉaj ke ili ŝajnis superi unu la alian.

Post tio ili supreniris en la du grandaj ĉambrojn, kie estas la plej bonaj kaj riĉaj mebloj; ili ne povis sufiĉe admiri la nombron kaj belecon de la tapiŝoj, litoj, kuŝejoj, ŝranketoj, tabletoj, taburettoj, kaj speguloj per kiuj oni povas vidi sin de la kapo ĝis la piedo; kelkaj el ili havis vitrajn kadrojn, aliaj arĝentajn, simplajn kaj orizitajn, la plej bonajn kaj elegantajn iam viditajn.

Ili ne ĉesis laŭdi kaj envii la feliĉecon de sia amikino, kiu intertempe neniel distris sin per rigardado al ĉiuj tiuj riĉaĵoj, pro sia malpacienco iri malfermi la kameron sur la teretaĝo. Ŝin tiom premis ŝia scivolemo ke, sen pripensi ke estas tre malĝentile foriri de siaj gastoj, ŝi malsupreniris per malgranda malantaŭa ŝtuparo, tiel hastege ke ŝi preskaŭ du- aŭ tri-foje rompis sian kolon.

Veninte al la pordo de la kamero, ŝi haltis kaj staris dum kelka tempo, pripensante la ordonojn faritajn de ŝia edzo, kaj pripensante kia malfeliĉo eble trafos ŝin se ŝi malobeos. Sed la tento estis tiel forta ke ŝi ne povis superi ĝin. Do ŝi prenis la ŝlosileton, kaj malfermis ĝin, tremante, sed unue ŝi nenion povis klare vidi, ĉar la fenestroj estis fermaj. Post kelkaj momentoj ŝi komencis percepi ke la planko estas tute kovrita de koaguliĝinta

sango, sur kiu kuŝas la kadavroj de pluraj mortaj virinoj, laŭ la muroflankoj. (Ili ĉiuj estis edzinoj kiujn edzinigis kaj poste murdis Blubarbulo, unu post la alia.) Ŝi anticipis morti pro timo, kaj la ŝlosilo, kiun ŝi tiris el la seruro, falis el ŝia mano.



Iom rekonsciiĝinte post sia surpriziĝo, ŝi reprenis la ŝlosilon, ŝlosis la pordon, kaj supreniris en sian ĉambron por retrankviliĝi; sed ŝi ne povis, tiom ŝi timegis. Rimarkinte ke la ŝlosilo de la kamero estas makulita de sango, ŝi provis du-trifoje viŝi ĝin, sed la sango ne estis forviŝebla; vane ŝi lavis ĝin, kaj eĉ frotis ĝin per sapo kaj sablo, la sango restis, ĉar la ŝlosilo estis magia kaj ŝi neniel povis plene purigi ĝin; kiam la sango estis forviŝita elde unu flanko, ĝi reaperis sur la alia.

Blubarbulo revenis de sia veturo tiun saman vesperon, kaj diris ke li ricevis leterojn survoje, informantajn li ke la afero pri kiu li sin okupas jam finiĝis avantaĝe al li. Lia edzino faris ĉion eblan por konvinki lin ke ŝi ĝojegas pro lia rapida reveno.

La sekvan matenonli petis de ŝi la ŝlosilojn, kiujn ŝi donis al ŝi, sed per tiel trema mano ke li facile divenis kio okazis.

“Kio!” diris li, “ĉu la ŝlosilo de la kamero ne estas inter la aliaj?”

“Sendube,” diris ŝi, “mi lasis ĝin supre, sur la tablo.”

“Nepre,” diris Blubarbulo, “tuj porti ĝin al mi.”

Reirinte tien kaj reen plurfoje ŝi devis porti al li la ŝlosilon. Blubarbulo, tre atente ekzameninte, diris al sia edzino,

“Kial estas ĉi sango sur la ŝlosilo?”

“Mi ne scias,” kriis la povra virino, pli pala ol la morto.

“Vi ne scias!” respondis Blubarbulo. “Mi tre bone scias. Vi insistis eniri la kameron, ĉu ne? Bonege, sinjorino; vi eniros, kaj prenos vian pozicion inter la virinoj kiujn vi vidis tie.”

Je tio ŝi ĵetis sin ĉe la piedojn de sia edzo, kaj petegis lian pardonon montrante ĉian indikon de vera pentito, kaj ĵurante ke neniam ŝi denove malobeos. Ŝi fandus rokon, tiel bela kaj lamentoplena estis ŝi; sed Blubarbulo havis koron pli duran ol ĉia roko!

“Vi devas morti, sinjorino,” diris li, “kaj jam tuj.”

“Ĉar mi devas morti,” respondis ŝi (rigardante lin per siaj okuloj tute banataj de larmoj), “donu al mi iomete da tempo por preĝi.”

“Mi donas al vi,” respondis Blubarbulo, “duonon da kvarono da horo, sed ne eĉ unu momenton pli.”

Kiam ŝi estis sola, ŝi vokis al sia fratino, kaj diris al ŝi:

“Fratino Anno,” (ĉar jen ŝia nomo), “supreniru, mi petas vin, sur la supron de la turo, kaj rigardu ĉu venas miaj fratoj; ili promesis al mi ke ili venos hodiaŭ, kaj se vi vidos ilin, gestu al ili ke ili rapidu.”

Ŝia fratino Anno supreniris sur la supron de la turo, kaj la povra afliktata edzino kriis fojfoje:

“Anno, fratino Anno, ĉu vi vidas iun venanta?”

Kaj fratino Anno diris:

“Mi vidas nur la sunon, kiu kaŭzas polvon, kaj la herbon, kiu aspektas verda.”

Intertempe Blubarbulo, tenante grandan sabron per sia mano, kriis kiel eble plej laŭte al sia edzino:

“Subvenu tuj, alie mi suprenvenos al vi.”

“Unu momenton pli, bonvolu,” diris lia edzino; kaj ŝi kriis tre softe, “Anno, fratino Anno, ĉu vi vidas iun venanta?”

Kaj fratino Anno respondis:

“Mi vidas nur la sunon, kiu kaŭzas polvon, kaj la herbon, kiu aspektas verda.”

“Subvenu tuj,” kriis Blubarbulo, “alie mi suprenvenos al vi.”


“Mi venas,” respondis lia edzino; kaj poste ŝi kriis, “Anno, fratino Anno, ĉu vi vidas iun venanta?”

“Mi vidas,” respondis fratino Anno, “grandan polvaron, kiu venas ĉiflanke ĉi tien.”

“Ĉu ne miaj fratoj?”

“Ve! mia kara fratino, mi vidas gregon da ŝafoj.”

“Ĉu vi ne subenvenos?” kriis Blubarbulo.



“Unu momenton pli,” diris lia edzino, kaj poste ŝi kriis: “Anno, fratino Anno, ĉu vi vidas neniun venanta?”

“Mi vidas,” diris ŝi, “du ĉevalrajdantojn, sed ili ankoraŭ estas tre for.”

“Laŭdatu Dio,” respondis la povra edzino ĝoje: “ili estas miaj fratoj; mi gestos al ili, laŭeble, ke ili hastu.”

Kaj Blubarbulo kriis tiel laŭte ke li tremigis la tutan domon. La afliktata edzino subenvenis, kaj ĵetis sin ĉe liajn piedojn, plor-

egante, kun sia hararo ĉirkaŭ siaj ŝultroj.

“Tio signifas nenion,” diris Blubarbulo; “vi devas morti”; poste, preninte ŝian hararon per unu mano, kaj levinte la glavon per la alia, li estis preta dehaki ŝian kapon. La povrulino, turninte sin al li, kaj rigardante lin per mortantaj okuloj, petis ke li donu al ŝi unu momenteton por retrankviligi sin.

“Ne, ne,” diris li, “donu vin en la manojn de Dio,” kaj estis tuj batonta...

Tiu saman momenton okazis batado sur la pordon tiom laŭta ke Blubarbulo ekhaltis. La pordo malfermiĝis, kaj tuj eniris du ĉevalrajdintoj, kiuj, eltirinte siajn glavojn, kuris rekte kontraŭ Blubarbulon. Li rekonis ilin kiel la fratojn de la edzino, unu estis kavaliro, la alia musketisto; do li tuj forkuris savi sin; sed la du fratoj sekvis lin tiel proksime ke ili atingis lin antaŭ ol li povis atingi la ŝtupojn de la verando, kaj tie ili puŝis siajn glavojn tra lian korpon kaj lasis lin morta. La povra edzino estis preskaŭ same morta kiel sia edzo, kaj ne sufiĉe fortis por stariĝi kaj bonvenigi siajn fratojn.

Blubarbulo ne havis heredontojn, do lia edzino fariĝis estro de lia tuta posedaĵaro. Ŝi utiligis unu parton de ĝi por edzinigi sian fratinon Anno al juna nobelulo kiu jam de longe amas ŝin; alian parton por aĉeti kapitanpostenojn por siaj fratoj, kaj la ceteron por edzinigi sin al tre inda viro, kiu forgesigis al ŝi la mispertojn kun Blubarbulo.¹

¹Charles Perrault.

FIDELA JOHANO

FOJE estis maljuna reĝo kiu estis tiom malsana ke li pensis al si, “mi plej verŝajne mortas.” Do li diris, “Sendu Fidindan Johanon al mi.” Nu, Fidinda Johano estis lia plej amata servistino, kaj nomiĝis tiel ĉar dum sia tuta vivo li servis lin tiel fidele. Kiam li



apudiĝis al la lito la Reĝo parolis al li. “Plej fidela Johano, mi sentas ke mia finiĝo estas proksima, kaj mi povus fronti ĝin sentime se ne zorgigus min mia filo. Li estas ankoraŭ tro juna por decidi ĉion por ŝi, kaj krom se vi promesos al mi ke vi instruos al

li ĉion kion li bezonas scii, kaj esti kia patro por li, mi ne pace fermos miajn okulojn.” Fidela Johano respondis: “Mi neniam dizertos lin, kaj servos lin fidele eĉ kvankam kostus al mi mian vivon.” Kaj la olda Reĝo diris: “Nun mi mortas konsolite kaj pace;” kaj li daŭrigis: “Post mia morto montru al li la tutan kastelon, ĉiujn ĉambrojn kaj ĉambrarojn kaj gardejojn, kaj ĉiujn trezorojn kuŝantajn en ili; sed nepre ne montru al li la lastan ĉambron en la longa koridoro, kie kaŝiĝis la portreto de la Princino de la Ora Tegmento. Kiam li rigardos tiun bildon li ekamegos ŝin kaj profunde eksvenos, kaj pro ŝi li renkontos multajn danĝerojn; vi devos gardi lin kontraŭ tio.” Kaj post kiam Fidela Johano denove promesis tion al la Reĝo la oldulo eksilentis, metis sian kapon sur la kusenon, kaj mortis.

Post la portiĝo de la olda Reĝo en la tombon, Fidela Johano diris al la juna Reĝo kion li promesis al lia patro dum li mortis, kaj pludiris: “Kaj mi nepre plenumos mian promeson, kaj estos fidela al vi kiel al li, eĉ kvankam kostus al mi mian vivon.”

Nu, post la fino de la funebroperiodo, Fidela Johano diris al li: “Venis la tempo kiam vi vidu vian heredaĵojn. Mi montros al vi vian hereditan kastelon de viaj prapatroj.” Do li gvidis lin tra la tuto, kaj lasis lin vidi ĉiujn riĉaĵojn kaj elegantajn ĉambrarojn, nur la unu ĉambron kie estas la portreto li ne malfermis. Sed la portreto estis tiel lokita ke kiam la pordo malfermiĝis oni rekte rigardas ĝin, kaj ĝi estis tiel bele pentrita ke oni imagas ke ĝi vivas kaj moviĝas, kaj ke ĝi estas la plej amiga kaj bela aĵo en la tuta mondo. Sed la juna Reĝo rimarkis ke Fidela Johano ĉiam preteriras unu pordon, kaj diris: “Kial vi neniam malfermas ĉi tiun por mi?” “Interne estas io kiu terurus vin,” li respondis. Sed la Reĝo respondis: “Mi vidis la tutan kastelon, kaj mi intencas trovi kio estas en tie;” kaj dirinte tiujn vortojn li proksimiĝis al la pordo kaj volis perforte malfermi ĝin. Sed Fidela Johano retenis lin, kaj diris: “Mi promesis al via patro antaŭ ol li mortis ke vi ne vidos kio estas en tiu ĉambro. Ĝi eble ege suferigus vin kaj min.” “Ha! ne,” respondis la juna Reĝo; “se mi ne eniros, tio nepre detruos min; mi ne estus paca nokte nek tage ĝis vidi per miaj propraj okuloj kio estas en la ĉambro. Nu, mi ne movos min de ĉi tie antaŭ ol vi malfermos la pordon.”

Nu, Fidela Johano komprenis ke ne eblas eviti la aferon, do pezakore kaj multe ĝemante li prenis la ŝlosilon el la granda aro. Malferminte la pordon li enpaŝis la unua, kaj provis kovri la bildon tiel ke la Reĝo ne perceptos ĝin; sed estis senutile: la Reĝo staris sur siaj piedpintoj kaj rigardis trans lian ŝultron. Kaj vidinte la portreton de la junulino, tiel bela kaj scintilanta pro oro kaj valoraj ŝtonoj, li ekfalis svene sur la teron. Fidela Johano levis lin, portis lin al la lito, kaj pensis lamente: “La veo trafis nin; Jadi! Kiel ĉio finiĝos?” Post tio li verŝis vinon en lian gorgon ĝis li rekonsciiĝis. Liaj unuaj parolitaj vortoj estis: “Ho! kiu estas la originalo de la bela portreto?” “Ŝi estas la Princino de la Ora Tegmento,” respondis Fidela Johano. La Reĝo pludiris: “Mia amo al ŝi estas tiel granda ke se ĉiuj folioj sur la arboj havus langojn ili ne povus esprimi ĝin; mia vivo mem dependas de mia sukcesa amindumado al ŝi. Vi estas mia plej fidela Johano: vi devos subteni min.”

La fidela servisto longe primeditis kiel ili entreprenu tion, ĉar laŭdire estis malfacile eĉ renkonti la Princinon. Fine li elpensis planon, kaj parolis al la Reĝo. “Ĉio ĉirkaŭ ŝi—tabloj, seĝoj, teleroj, kalikoj, bovloj, kaj ŝia tuta endoma meblaro—estas el oro. Vi havas en via trezoro kvin tunojn da oro; la oristoj de via regno fabriku el ili ĉiajn vazojn kaj ujojn, ĉiajn birdojn kaj ĉasbestojn kaj mirindajn vivaĵojn; tio plaĉos al ŝi. Ni portos ilin al ŝi kaj provos nian fortunon.” La Reĝo alvokis ĉiujn siajn oristojn, kaj ili devis laboregi tage kaj nokte, ĝis fine la plej grandiozaj aĵoj estis kompletigitaj. Post kiam ŝipo estis ŝarĝita per ili la fidela Johano maskis sin kiel komerciston, kaj la Reĝo devis simile age, tiel ke ili estos tute nerekoneblaj. Kaj tiaj ili transiris la marojn kaj veturis ĝis atingi la urbon kie loĝas la Princino de la Ora Tegmento.

Fidela Johano devigis la Reĝon postresti sur la ŝipo kaj atendi lian revenon. “Eble,” li diris, “mi revenigos la Princinon kun mi, por certigi ke ĉio estas en ordo; oni aranĝu la orajn ornamaĵojn kaj beligu la tutan ŝipon.” Post tio li prenis kelkajn oraĵojn en sia antaŭtuko, surteriĝis, kaj marŝis rekte al la palaco. Veninte al la korto li trovis belan knabinon staranta ĉe la puto, ĉerpanta akvon per du oraj siteloj. Kaj dum ŝi pretigis sin forporti la scintilantan akvon ŝi turnis sin kaj vidis la fremdulon, kaj demandis al li kiu li

estas. Li respondis: “Mi estas komercisto;” kaj malferminte sian antaŭtukon, li lasis ŝin enrigardi. “Ho! Jadi!” ŝi kriis; “kiaj belaj oraĵoj!” Ŝi demetis siajn sitelojn, kaj ekzamenis la oraĵojn, unu post alia. Sekve ŝi diris: “Nepre la Princino vidu ĉi tion, ŝi tiom amas oraĵojn ke certe ŝi aĉetos ĉion kion vi havas.” Ŝi prenis lian manon kaj gvidis lin en la palacon, ĉar ŝi estis persona servistino de la Princino.

Vidante la varojn la Princino raviĝis, kaj diris: “Ili ĉiuj estas tiel bele faritaj ke mi aĉetos ĉion kion vi havas.” Sed Fidela Johano diris: “Mi estas nur servisto de riĉa komercisto, tio kion mi havas ĉi tie estas nenio kompare kun kion havas mia mastro sur sia ŝipo; liaj varoj estas pli artismaj kaj multekostaj ol ĉio iam antaŭe farita el oro.” Ŝi deziris ke oni alportu ĉion al ŝi, sed li diris: “Estas tiom ke necesus multaj tagoj por alporti ilin, kaj ili plenigus tiom da ĉambroj ke vi ne havus sufiĉan spacon en via domo.” Tio ekscitis ŝiajn deziron kaj scivolemon tiom ke fine ŝi diris: “Konduku min al via ŝipo; mi mem iros tien kaj rigardos la trezorojn de via mastro.”

Tio plene ĝojigis Fide-
lan Johanon, kaj li kon-
dukis ŝin al la ŝipo; kaj la
Reĝo, vidante ŝin, vidis ke
ŝi estas eĉ pli bela ol la por-
treto, kaj kredis ĉiumomente ke lia koro eksplodos. Ŝi paŝis nur la ŝipon, kaj la Reĝo gvidis ŝin en la internon. Sed Fidela Johano postrestis kun la stiristo, kaj ordonis ke oni ekirigu la ŝipon. “Etendu ĉiujn velojn, por ke ni flugu sur la oceano kvazaŭ birdo tra la aero.” Intertempe la Reĝo montris al la Princino, en la ŝipo, ĉiujn siajn orajn varojn, ĉiun eron—teleron, kalikojn, la birdojn kaj ĉasbestojn, kaj ĉiujn mirindajn vivaĵojn. Multaj horoj tiel pasis, kaj ŝi estis tiom feliĉa ke ŝi ne rimarkis ke la ŝipo forvelas.



Vidinte la lastan eron ŝi dankis la komerciston kaj pretigis hejmeniri; sed veninte al la flanko de la ŝipo ŝi vidis ke ili estas sur la profunda maro, tre distance de la tero, kaj ke la ŝipo forrapidas per ĉiuj veloj. “Ho!” ŝi kriis hororoplene; “mi estas trompita, forportita kaj perfidita al komercisto; mi preferas esti mortinta!” Sed la Reĝo ekprenis ŝian manon kaj parolis: “Mi ne estas komercisto, sed reĝo tiel altranga kiel vi mem; kaj mia granda amo al vi instigis min forporti vin per ruĝoj. Tuj kiam mi vidis vian bildon mi ekfalis svene sur la teron.” Kiam la Princino de la Ora Tegmento aŭdis tion ŝi konsoliĝis, kaj ŝia koro ekamis lin, tiel ke ŝi volonte konsentis fariĝi lia edzino.

Nu, unu tagon okazis, dum ili velis sur la profunda maro, ke Fidelo Johano, sidante sur la antaŭa parto de la ŝipo, violonante al si, rimarkis tri korakojn de la aero flugantaj cele lin. Li ĉesis ludi, kaj aŭskultis kion ili diras, ĉar li komprenis ilian lingvon. Unu kvakis: “Ah, ha! Do li hejmenportas la Princinon de la Ora Tegmento.” “Jes,” respondis la dua, “sed li ankoraŭ ne akiris ŝin.” “Jes ja,” parolis la tria, “ĉar ŝi sidas apud li sur la ŝipo.” Rekomencis numero unu kriante: “Tio ne helpas lin! Kiom ili atingos la teron kaŝtana ĉevalo ekkuros antaŭen renkonti ilin: la Reĝo volos suriri ĝin, kaj se li faros tion ĝi forgalopos portante lin, kaj malaperos en la aeron, kaj li neniam revidos sian novan edzinon.” “Ĉu ne eblas ke li eskapu?” demandis numero du. “Ho! jes, se iu alia rapide suriros kaj mortepafos la ĉevalon per la pistolo trovebla en la ingo, per tio saviĝos la juna Reĝo. Sed kiu scios tion? kaj tiu kiu ja scios kaj informos lin fariĝos ŝtona de siaj piedoj ĝis siaj genuoj.” Post tio parolis numero du: “Mi scias ankoraŭ pli: eĉ se oni mortigos la ĉevalon, tamen la Reĝo ne plu posedos sian novan edzinon: kiam ili kune eniros la palacon ili trovos jampretigitan nuptoĉemizon en ŝranko, aspektantan kvazaŭ tekstita el oro kaj arĝento, sed efektive konsistanta nur el sulfuro kaj gudro: kiam la Reĝo surmetos ĝin ĝi bruligos lin ĝis liaj medolo kaj ostoj.” Numero tri demandis: “Ĉu do ne ekzistas metodo eskapi?” “Ho! jes,” respondis numero du: “se iu ekprenos la ĉemizon per gantekovritaj manoj kaj ĵetos ĝin en la fajron, kaj lasos ĝin bruli, tiel saviĝos la juna Reĝo. Sed kiel gravas? Kiu scios tion kaj informos pri ĝi, duono de ties korpo fariĝos ŝtona, de la genuoj ĝis la koro.”

Sekve parolis numero tri: “Mi scias ankoraŭ pli: eĉ kvankam la nuptoĉemizo brulos, la Reĝo ankoraŭ ne firme havos sian novan edzinon: kiam okazos la danco post la geedziĝo, dum dancos la juna Reĝino, ŝi subite ekfariĝos blanka kiel la morto, kaj falos kvazaŭ mortinte, kaj krom se iu levos ŝin kaj elsuĉos tri gutojn da sango el ŝia dekstra flanko, kaj elkraĉos ilin, ŝi mortos. Sed se iu kiu scias tion informos pri ĝi, li ekfariĝos ŝtona de la verto de sia kapo ĝis la plandoj de siaj piedoj.” Tiel konversaciinte la korakoj forflugis, sed Fidela Johano aŭskultis la tuton, kaj estis trista kaj deprimita ekde tiam; ĉar se li silentos al sia mastro pri sia aŭdaĵo, li misfortunigos lin; sed se li informos lin pri la aŭdaĵo, li mem perdos sian vivon. Fine li diris: “Mi subtenos mian mastron, eĉ kvankam tiel mi pereos.”

Nu kiam ili proksimiĝis al la tero okazis precize kiel antaŭdiris la korakoj, kaj grandioza kaŝtana ĉevalo rapidis antaŭen. “Bonege!” diris la Reĝo; “tiu besto portos min al mia palaco,” kaj li estis tuj surironta, sed Fidela Johano estis tro rapida, kaj, eksaltinte, li prenis la pistolon el la ingo, kaj mortepafis la ĉevalon. Tuj la aliaj servistoj de la Reĝo, kiuj nenian ŝatis Fidelan Johanon, kriis: “Kiel peke estis mortigi la belan beston kiu devus porti la Reĝon al lia palaco!” Sed la Reĝo parolis: “Silentu! lasu lin; li estas mia ĉiam fidela Johano. Kiu scias por kia bona celo li faris tion?” Do ili pluiris kaj eniris la palacon, kaj tie en la halo staris ŝranko en kiu kuŝas la jampretigita nuptoĉemizo, efektive aspektanta kvazaŭ farita el oro kaj arĝento. La juna Reĝo marŝis cele ĝin kaj estis tuj prenonta ĝin, sed Fidela Johano flankenpuŝis lin, ekprenis ĝin per siaj gante kovritaj manoj, ĵetis ĝin haste en la fajron, kaj lasis ĝin bruli. La aliaj servistoj rekomencis grumbladi, kaj diris: “Vidu, li eĉ bruligas la nuptoĉemizon de la Reĝo.” Sed la juna Reĝo parolis: “Kiu scias por kia bona celo li faras tion? Lasu lin, li estas mia plej fidela Johano.” Post tio celebriĝis la geedziĝo, la danco komenciĝis, kaj la nova edzino partoprenis, sed Fidela Johano rigardis ŝian vizaĝon atente. Subite ŝi ekiĝis morte blanka, kaj falis sur la teron kvazaŭ morta. Li tuj haste saltis al ŝi, levis ŝin, kaj portis ŝin al ĉambro, kie li kuŝigis ŝin, kaj surgenuiĝinte apud ŝi li suĉis tri gutojn da sango el ŝia dekstra flanko, kaj elkraĉis ilin. Ŝi baldaŭ respiradis kaj rekonsciigis; sed la juna Reĝo rigardis la

eventojn, kaj ne sciante kial Fidela Johano agis tiel, li furioziĝis kaj kriis: “Ĵetu lin en karceron.” La sekvan matenon oni kondamnis ke pendumiĝu Fidela Johano. Starante sur la pendumejo li diris: “Ĉiu kondamnita morti rajtas unufoje paroli antaŭ ol morti; ĉu mi ricevos tiun privilegion?” “Jes,” diris la Reĝo, “al vi tio estos permesata.” Do Fidela Johano parolis: “Mi estas maljuste kondamnita, ĉar mi ĉiam fidelis al vi;” kaj li sekve rakontis kiel sur la maro li aŭdis la konversacion de la korakoj, kaj kiel li devis fari ĉion faritan por savi sian mastron. Ekkriis la Reĝo: “Ho! mia plej



fidela Johano, pardonu! pardonu! Deprenu lin.” Sed dum li diris la lastan vorton Fidela Johano falis senvive al la tero, kaj fariĝis ŝtono.

La Reĝo kaj Reĝino ekmalesperis, kaj la Reĝo parolis: “Ha! kiel mi misrekompencis tian grandan fidelecon!” kaj li devigis ilin levi la ŝtonan statuon kaj meti ĝin en lian litoĉambron apud lia lito. Kiam ajn li rigardis ĝin li ekploris kaj diris: “Ho! se nur mi povus revivigi vin, mia plej fidela Johano!” Post iom da tempo la

Reĝino naskis ĝemelojn, du filetojn, kiuj bone fartis kaj kreskis, kaj estis por ŝi konstanta ĝojaĵo. Unu tagon dum la Reĝino estis en la preĝejo, kaj la du infanoj sidis ludante kun sia patro, li re-rigardis la ŝtonan statuon plene de lamento, kaj ĝemanto li ploris: “Ho! se mi nur povus revivigi vin, mia plej fidela Johano!” Subite la ŝtono komencis paroli, kaj diris: “Jes, vi povos revivigi min, se vi pretas oferi tion kio estas al vi plej kara.” Kaj la Reĝo kriis: “Ĉion kion mi havas en la mondo mi oferos por vi.” La ŝtono pludiris: “Se per via propra mano vi detranĉos la kapojn de viaj du infanoj, kaj ŝmiris ilian sangon sur min, mi reviviĝos.” La Reĝo plene konsterniĝis aŭdante ke li mem devos mortigi siajn infanojn; sed pripensinte la fidelecon de Fidela Johano, kaj ke li eĉ mortis por li, li eltiris sian glavon, kaj per sia propra mano li detranĉis la kapojn de siaj infanoj. Kaj kiam li ŝmiris ilian sangon sur la ŝtonon, la vivo revenis, kaj Fidela Johano denove staris tute sana kaj bonfarta antaŭ li. Li parolis al la Reĝo: “Via lojaleco estos rekompencita,” kaj preninte la kapojn de la infanoj, li metis ilin sur iliajn korpojn, ŝmiris ilian sangon sur la vundojn, kaj post minuto ili estis denove vivaj kaj ĉirkaŭsaltadis kvazaŭ nenio estis okazinta. Tiam la Reĝo pleniĝis per ĝojo, kaj kiam li vidis la Reĝinon venanta, li kaŝis Fidelan Johanon kaj la du infanojn en granda ŝranko. Dum ŝi eniris li diris al ŝi: “Ĉu vi preĝis en la preĝejo?” “Jes,” ŝi respondis; “sed miaj pensoj konstante temis pri Fidela Johano, kaj pri kion li suferis pro ni.” Do li diris: “Kara edzino, ni povos revivigi lin, sed la prezo postulata estas niaj du filetoj; ni devos oferi ilin.” La Reĝino blankiĝis kaj ŝia koro peziĝis, sed ŝi respondis: “Ni ŝuldas al li tion, pro lia granda fideleco.” Pro tio li ĝojegis ĉar ŝi samopinias kiel li, kaj antaŭenirinte li malfermis la ŝrankon, kaj elvenigis la du infanojn kaj Fidelan Johanon, dirante: “Laŭdatu Dio! Fidela Johano denove estas libera, kaj ni rehavas niajn du filetojn.” Kaj li rakontis al ŝi ĉion okazintan, kaj post tio ili kune vivis feliĉe por ĉiam.¹

¹Grimm.

LA BRAVA TAJLORETO

UNU someran tagon malgranda tajloro sidis sur sia tablo apud la fenestro en plej bona humoro, kaj kudregis. Dum li sidis tiel kamparulino venis laŭlonge de la strato, kriante: “Bonan konfitaĵon mi vendas, bonan konfitaĵon mi vendas.” Tio sonis dolĉe en la oreloj de la tajloro; li puŝis sian delikatan kapeton tra la fenestron, kaj kriis: “Ĉi tie supre, bonulino, ĉi tie vi trovos aĉetonton.” La virino grimpis la tri ŝtuparojn kun sia peza korbo al la ĉambro de la tajloro, kaj li devigis ke ŝi elmetu ĉiujn siajn potojn laŭvice antaŭ lin. Li ekzamenis ilin ĉiujn, levis ilin kaj flaris ilin, kaj fine diris: “Ĉi tiu konfitaĵo impresas bone, elpesu por mi cent gramojn da ĝi, bonulino; kaj eĉ se ĝi pezos dekonon da kilogramo mi ne malakceptos.” La virino, kiu estis esperinta ke li multe aĉetos, donis al li kion li petis, sed foriris grumblante kolerege. “Nun la Ĉielo benos ĉi tiun konfitaĵon por mi,” kriis la malgranda tajloro, “kaj ĝi nutros kaj fortigos min.” Li prenis iom da pano el ŝranko, detranĉis eron, kaj ŝmiris la konfitaĵon sur ĝin. “Tio ne misgustos,” li diris; “sed unue mi finos ĉi veŝton antaŭ ol mordi.” Li metis la panon apud sin, plu kudris, kaj leĝerkore pli kaj pli grandigis siajn stebojn. Intertempe laodoro de la dolĉa konfitaĵo leviĝis al la plafono, kie amasoj da muŝoj sidis, kaj logis ilin tiom ke ili svarmegis sur ĝin. “Ha! kiu invitis vin?” diris la tajloro, kaj li forĉasis la nebonvenajn gastojn. Sed la muŝoj, kiuj ne komprenis lian lingvon, rifuzis foravertiĝi, kaj daŭre revenis ankoraŭ pli amase. Fine la tajloreto, tute senpaciiginte, etendis sian manon al sia kamenangulo por preni tukon, kaj kriante: “Atendu, mi trafos vin!” li batadis ilin senkompate per ĝi. Kiam li ĉesis li kalkulis la mortigitojn, kaj ne malpli ol sep kuŝis mortaj antaŭ li, kun la kruroj etenditaj. “Kia timenda persono mi estas!” diris li, kaj li pleniĝ-

is per admiro al sia propra kuraĝo. “La tuta urbo nepre sciu pri ĉi tio;” kaj tre haste la tajloreto eltondis zonon, orlis ĝin, kaj brodis ĝin per grandaj literoj, “Sep per unu bato.” “Kion mi diris, la urbo? ne, la tuta mondo aŭdos pri ĝi,” li diris; kaj lia koro batis pro ĝojo kiel ŝafido svingas sian voston.



La tajloro ligis la zonon ĉirkaŭ sian talion kaj eliris en la larĝan mondon, ĉar li opiniis sian laborĉambron tro malgranda por sia braveco. Antaŭ ol eliri li ĉirkaŭrigardis, por trovi ĉu estas kunprenebla por la veturo io en la domo; sed li trovis nur malnovan fromaĝon, kiun li prenis. Antaŭ la domo li rimarkis birdon kiu estis kaptita en kelkaj arbustoj, kaj tion li metis en sian

sakon apud la fromaĝo. Post tio li gaje promenis, kaj ĉar li estis nepeza kaj facilmova li neniam laciĝis. Lia vojo kondukis trans monton, sur kies supro sidis fortega giganto, kiu trankvile pri-rigardas la pejzaĝon. La tajloreto marŝis al li, kaj gaje salutante lin diris: “Bonan tagon, amiko; tie vi sidas trankvile rigardante la tutan larĝan mondon. Mi ĝuste nun marŝas tien. Ĉu vi deziras akompani min?” La giganto rigardis la tajloron malestime, kaj diris: “Kia povra mizeruleto vi estas!” “Vere bona ŝerco,” respondis la tajloreto, kaj malbutoninte sian mantelon li montris al la giganto la zonon. “Jen, do, vi povas legi kia persono mi estas.” La giganto legis: “Sep per unu bato;” kaj supozante ke homojn mortigis la tajloro, li ekrespektis la vireton. Sed li pensis unue provi lin, do preninte ŝtonon per sia mano, li premis ĝin ĝis fluis el ĝi kelkaj gutoj da akvo. “Nun vi faru similon,” diris la giganto, “se vere vi volas krediĝi forta.” “Ĉu nur tion?” diris la tajloreto; “por mi tio estas infanludo,” do li serĉis en sia sako, elprenis la fromaĝon, kaj premis ĝin ĝis la selakto elfluis. “Mi premo estis efektive pli bona ol via,” diris li. La giganto ne sciis kion diri, ĉar antaŭe li ne povis kredi ke la uleto kapablas tion. Por denove provi lin, la giganto levis ŝtonon kaj ĵetis ĝin tiel alten ke la okulo apenaŭ povis sekvi ĝin. “Nun, mia pigmeeto, mi vidu vin fari tion.” “Vi bone ĵetis,” diris la tajloro; “tamen, via ŝtono ja falis sur la teron; mi ĵetos ŝtonon kiu tute ne falos.” Denove li serĉis en sia sako, kaj preninte la birdon per sia mano, li ĵetis ĝin supren en la aeron. La birdo, ĝojega pro sia liberiĝo, soris en la ĉielon, kaj forflugis neniam revenonte. “Nu, kiel vi taksas tiun ageton, amiko?” demandis la tajloro. “Vi certe scias ĵeti,” diris la giganto; “sed nun ni vidu ĉu vi povas porti taŭgan pezon.” Dirante tiujn vortojn li kondukis la tajloron al giganta kverko kiu estis faligita sur la teron, kaj diris: “Se vi estas sufiĉe forta, helpu min porti la arbon el la arbaro.” “Tute certe,” diris la tajloreto: “Vi metu la trunkon sur vian ŝultron; mi portos la supron kaj la branĉojn, tio certe estas la plej peza parto.” La giganto metis la trunkon sur sian ŝultron, sed la tajloro sidis komforte inter la branĉoj; kaj la giganto, kiu ne povis vidi kio okazas malantaŭ li, devis porti la tutan arbon, kaj krome ankaŭ la tajloreton. Tie li sidis plej bonhumore, fervore fajfante melodion, kvazaŭ porti la arbon estas simpla distraĵo. La giganto,

treninte la grandan pezon dum longa temo, ne povis plu iri, kaj kriis: “Ho! mi devas faligi la arbon.” La tajloro vigle desaltis, prenis la arbon per ambaŭ manoj kvazaŭ portinte ĝin senpaŭze, kaj diris al la giganto: “Kiu kredus ke grandulo kia vi ne povas porti arbon!”

Ili pluiris kune, kaj dum ili pasis ĉerizarbon la giganto prenis ĝian supron, kie pendas la plej maturaj fruktoj, metis la branĉojn en la manon de la tajloro, kaj proponis ke li manĝu. Sed la tajloro estis multe tro febla por malsuprenteni la arbon, kaj kiam la giganto ĉesis teni ĝin la arbo resaltis en la aeron, kunportante la tajloreton. Kiam li refalis surteren sen damaĝi sin, la giganto diris: “Kio! ĉu vi serioze diras al mi ke vi ne sufiĉe fortas por malsuprenteni feblan vergeton?” “Ne mankis la forto,” respondis la tajloro; “ĉu vi supozas ke tio estus malfacila por viro kiu mortigis sep per unu bato? Mi transsaltis la arbon ĉar la ĉasistoj pafas inter la branĉoj proksime al ni. Faru same se vi kuraĝas.” La giganto provis, sed li ne povis transiri la arbon, kaj fiksiĝis en la branĉoj, tiel ke ankaŭ tiurilate la tajloro superis lin.

“Nu, efektive vi ja estas kapablulo,” diris la giganto; “venu pasigi la nokton kun ni en nia kavo.” La tajloreto volonte konsentis fari tion, kaj li sekvis sian amikon dum ili marŝis ĝis atingi kavon kie pluraj aliaj gigantoj sidas ĉirkaŭ fajro, en ĉies mano estis rostita ŝafo, kiun li manĝas. La tajloreto ĉirkaŭrigardis, kaj pensis: “Jes, certe estas pli da spaco por sin turni ĉi tie ol en mia laborĉambro.” La giganto montris al li liton, kaj proponis ke li kuŝiĝu kaj bone dormu. Sed la lito estis tro granda por la tajloro, do li ne eniris ĝin, sed forrampis en la angulon. Je la nokto-mezo, kiam la giganto supozis ke la tajloreto profunde dormas, li ellitiĝis, kaj per sia granda fera marŝbastono li disrompis la liton per bato, kaj kredis estis fininta la akrideton. Je la matena krepusko la gigantoj eliris el la arbaro, plene forgesinte la tajloreton, ĝis subite ili renkontis lin paŝanta plej gaje. La gigantojn teruris la fantomo, kaj, timante ke li mortigos ilin, ili ĉiuj forkuris laŭeble plej rapide.

La tajloreto plumarŝis sekvante sian nazon, kaj vaginte dumlonge li atingis la korton de reĝa palaco, kaj laciĝinte li kuŝiĝis sin sur la herbo kaj ekdormis. Dum li kuŝis tie la homoj venis, kaj

ekzamenante lin legis sur lia zono: “Sep per unu bato.” “Ho!” ili diris, “kion celas ĉi tiu heroo de cent bataloj en nia paca lando? Nepre li estas potenca bravulo.” Ili iris informi la Reĝon pri li, kaj diris kia potenca utila persono li estus dum tempo de milito, kaj ke estus bone dungi lin ne grave je kia prezo. Tiu konsilo plaĉis al la Reĝo, kaj li sendis unu el siaj korteganoj al la tajloreto, por proponi al li, kiam li vekigos, oficirecon en ilia armeo. La mesaĝisto restis starante apud la dormanto, kaj atendis ĝis li etendis siajn membrojn kaj malfermis siajn okulojn, kaj tiam li diris la proponon. “Jen precize tiucele mi venis ĉi tien,” li respondis; “mi plene pretas ekservi la Reĝon.” Do oni akceptis lin plenhonore, kaj donis al li specialan domon kiel loĝejon.

Sed la aliajn oficirojn ĉagrenis la sukceso de la tajloreto, kaj ili volis ke li estu mil kilometrojn for. “Kio rezultos?” ili demandis unu al la alia; “se ni kverelos kun li, li ekbatalos nin, kaj je ĉiu bato sep falos. Baldaŭ postvivos neniun el ni.” Do ili decidis grupe iri al la Reĝo, kaj senescepte ekŝigi. La Reĝo malfeliĉigis la penso ke li perdos ĉiujn siajn fidelajn servistojn por unu persono, kaj li elkore volis neniam esti vidinta lin, aŭ iel malestigi lin. Sed li ne aŭdacis forsendi lin, ĉar li timis ke li eble mortigos lin kaj liajn soldatojn, kaj surtronigos sin. Li longe kaj profunde meditis pri la afero, kaj fine decidis. Li alvokis la tajloron kaj diris al li ke, ĉar li ja estas tiel forta kaj militema heroo, li deziras fari proponon al li. En certa arbaro de la regno loĝas du gigantoj kiuj multe misfaras; ili rabas, murdas, bruligas, kaj ŝtelas ĉion atingeblan; “neniu povas proksimiĝi al ili sen endanĝerigi sian vivon. Sed se li povos superi kaj mortigi tiujn du gigantojn li ricevos lian solan filinon kiel edzinon, kaj duonon de lia regno aldone; li ankaŭ rajtos kunpreni cent ĉevalrajdantajn soldatojn, por subteni lin.” “Ĝuste tio konvenas al persono kia mi,” pensis la tajloreto; “oni ne proponas doni belan principon kaj duonon de regno ĉiutage.” “Konsentite,” li respondis; “mi baldaŭ nuligos la gigantojn. Sed mi neniel bezonas viajn cent ĉevalrajdantojn; kiu povas mortigi sep homojn per unu bato, tiu ne bezonas timi nur du.”

La tajloreto eliris, kaj la cent ĉevalrajdistoj sekvis lin. Atinginte la randon de la arbaro li diris al la sekvantoj: “Atendu ĉi tie, mi mem pritraktos la gigantojn;” kaj li pluiris en la arbaron, per

siaj akraj okuletoj rigardante dekstren kaj liven. Post kelka tempo li ekvidis la du gigantojn kuŝantaj dormante sub arbo, kaj ronkante tiom ke la branĉoj mem kliniĝis pro la aerblovo. La tajloreto tuj plenigis sian sakon per ŝtonoj, kaj poste grimpis la arbon sub kiu ili kuŝas. Atinginte proksimume ĝian mezon li rampis laŭlonge de branĉo ĝis sidi tuj super la dormantoj, kaj de tie li ĵetis ŝtonojn unu post alia sur la plej proksiman giganton. La giganto sentis



nenion dumlonge, sed fine li vekiĝis, kaj pinĉante sian kompanion diris: “Pro kio vi frapis min?” “Mi ne frapis vin,” diris la alia, “certe vi sonĝas.” Ili ambaŭ rekuŝiĝis por dormi, kaj la tajloreto ĵetis ŝtonon sur la duan giganton, kiu eksaltis kaj kriis: “Pro kio do? Kial vi ĵetis ion sur min?” “Mi nenion ĵetis,” grumblis la unua. Ili kverelis dum iom da tempo, ĝis, ĉar ambaŭ estis lacaj, ili reamikiĝis kaj reekdormis. La tajloreto rekomencis sian ludon, kaj plen-

forte ĵetis la plej grandan ŝtonon troveblan en sia sako, kaj trafis la bruston de la unua giganto. “Jen tro da bubeco!” li kriis, kaj saltinte kvazaŭ frenezulo, li batis sian kompanon kontraŭ arbon ĝis li ektremis. Tamen li rekompencis egale forte, kaj ili tiom furioziĝis ke ili elŝiris arbojn kaj batis unu la alian per ili, ĝis ambaŭ ekfalis mortaj samtempe sur la teron. Post tio la tajloreto desaltis. “Estas nur pro bona fortune,” li diris, “ke ili ne elŝiris la arbon sur kiu mi sidis, alie mi devus salti sur alian kvazaŭ sciuro, kaj tio, malgraŭ mia kapablo vigle moviĝi, ne estus facila.” Li elteris sian glavon kaj lerte pikis unu-dufoje la bruston de ĉiu giganto, kaj poste iris al la ĉevalrajdantoj kaj diris: “Estas farite. Mi nuligis ilin ambaŭ; sed mi certigas al vi ke tute ne estis facile, ĉar ili eĉ elŝiris arbojn penante defendi sin; sed ĉio tia neniel utilas kontraŭ persono kiu mortigas sep homojn per unu bato.” “Ĉu vi estas vundita?” demandis la ĉevalrajdantoj. “Neniel,” respondis la tajloro; “ili eĉ ne tuŝis unu haron de mia kapo.” Sed la ĉevalrajdantoj ne kredis lin, ĝis ili rajdis en la arbaron kaj trovis la gigantoj ruliĝintaj en sia sango, kaj la elŝiritajn arbojn ĉirkaŭkuŝantaj.

La tajloreto nun postulis la promesitan premion de la Reĝo, sed li pentis pri sia promeso, kaj denove primeditis kiel mankiĝi al si la heroon. “Antaŭ ol ricevi la manon de mia filino kaj duonon de mia regno,” li diris al li, “vi devos fari alian bravan agon. Unukornulo diskuradas libere en la arbaro, kaj multe misagadas; unue vi devos kapti ĝin.” “Mi eĉ malpli timas unu unukornulon ol du gigantojn; sep per unu bato, jen mia devizo.” Li kunprenis pecon de ŝnuro kaj hakilon, eliris al la arbaro, kaj denove diris al la viroj kunsenditaj kun li ke ili restu ekstere. Li ne bezonis longe serĉi, ĉar la unukornulo baldaŭ pasis, kaj, perceptante la tajloron, kuris rekte cele lin kvazaŭ trapikonte lin tuj. “Milde, milde,” diris li, “ne tiel rapide, mia amiko;” kaj starante kviete li atendis ĝis la besto estis tute proksima, kaj tiam li leĝere saltis malantaŭ arbon; la unukornulo kuris plenforte kontraŭ la arbon, kaj puŝis sian kornon tiel firme en la trunkon ke mankis al ĝi forto reeltiri ĝin, kaj tiel ĝi estis sukcese kaptita. “Nun mi jam kaptis mian birdon,” diris la tajloro, kaj li venis el malantaŭ la arbo, metis la ŝnuron ĉirkaŭ ĝian kolon unue, kaj poste elbatis la kornon el la arbo per sia hakilo, kaj kiam ĉio estis en ordo li kondukis la beston antaŭ

la Reĝon.

Ankoraŭ la Reĝo ne volis doni al li la promesitan premion, kaj faris trian postulon. La tajloro kaptu por li sovaĝan apron, kiu multe damaĝas en la arbaro; kaj li rajtas kunpreni la ĉasistojn kiel helpantojn. “Volonte,” diris la tajloro; “tio estas nur infanludo.” Sed li ne kunprenis la ĉasistojn en la arbaron, kaj al ili multe plaĉis postlasiĝi, ĉar la sovaĝa apro ofte renkontis ilin laŭ maniero kiu ne instigis ilin plu deziri koni ĝin. Tuj kiam la apro perceptis la tajloron ĝi kuris kontraŭ lin kun ŝaŭmanta buŝo kaj brilantaj dentoj, kaj penis alteren bati lin; sed nia vigla amiketo kuris en kapelon apudestarantan, kaj reeliris tra la fenestro salte. La apro sekvis lin en la preĝejon, sed la tajloro kuris al la pordo kaj firme fermis ĝin. Tiel kaptiĝis la furiozanta besto, ĉar ĝi estis multe tro peza kaj malgracia por trasalti la fenestron. La tajloreto kunvokis la ĉasistojn, por ke ili proprokule vidu la kaptiton. Post tio la heroo iris al la Reĝo, kiu nun devis, ĉu aŭ ne volonte, plenumi sian promeson, kaj transdoni al li sian filinon kaj duonon de la regno. Se li sciis ke ne herobatalisto, sed nur tajloreto staras antaŭ lin, eĉ pli bedaŭrus lia koro. Do la geedziĝo okazis tre elegante sed ne tre ĝoje, kaj la tajloro fariĝis reĝo.

Post iom da tempo la Reĝino aŭdis sian edzon diri unu nokton dum li dormis: “Knabo, kudru tiu veŝton kaj fliku ĉi tiun pantalonon, se vi ne volas ke mi batu viajn orelojn.” Tiel ŝi informiĝis pri la naskiĝrango de la juna sinjoro, kaj la sekvan tagon ŝi elverŝis siajn veojn al sia patro, kaj petegis lin helpi ŝin pereigi edzon kiu estas nur tajloro nek pli nek malpli. La Reĝo konsolis sin, kaj diris: “Lasu malferma la pordon de via dormoĉambro ĉinokte, miaj servistoj staros apude, kaj kiam via edzo profunde dormas ili eniros, sekure ligos lin, kaj portos lin sur ŝipon, kiu forvelos sur la larĝan oceanon.” La Reĝinon bone kontentigis la plano, sed la kirasportisto, kiu aŭdis ĉion, kaj kiu multe amis sian junan mastron, iris rekte al li kaj konigis al li la tutan planon. “Mi baldaŭ ĉesigos tion,” diris la tajloro. Tiun nokton li kaj lia edzino enlitiĝis je la kutima horo; kaj kiam ŝi kredis ke li ekdormis ŝi ellitiĝis, malfermis la pordon, kaj poste reenlitiĝis. La tajloreto, kiu nur ŝajnigis dormi, komencis voki per klara voĉo: “Knabo, kudru tiun veŝton kaj fliku ĉi tiun pantalonon, se vi ne

volas ke mi batu viajn orelojn. Mi mortigis sep per unu bato, mortigis du gigantojn, mi kaptis unukornulon kaj mi kaptis sovaĝan apron, do kial mi timu tiujn virojn kiuj staras apud mia pordo?” La viroj, aŭdante la tajloron diri tiujn vortojn, tiom teruriĝis ke ili fuĝis kvazaŭ sekvate de sovaĝa armeo, kaj ne kuraĝis reproksimiĝi al li. Do la tajloreto estis kaj restis reĝo dum sia tuta vivo.



VOJAĜO AL LILIPUTO

ĈAPITRO I

MIA patro posedis malgrandan bienon en Nottinghamshire, kaj mi estis la tria el kvar filoj. Li sendis min al Cambridge kiam mi estis dekkvarjara, kaj studinte tie tri jarojn mi fariĝis metilernanto de S-ro Bates, fama kirurgo en Londono. Tie, ĉar mia patro fojfoje sendis al mi malgrandajn sumojn da mono, mi elspezis ilin per lernado de navigado, kaj de aliaj artoj utilaj por veturantoj, ĉar mi ĉiam kredis ke iam aŭ tiam mi faros tion.

Tri jarojn post kiam mi ĉesis labori por li, mia bona mastro S-ro Bates rekomendis min kiel ŝipkirurgon por la “Hirundo”, sur kiu mi vojaĝis tri jarojn. Reveninte mi ekloĝis en Londono, kaj akirinte parton de malgranda domo, mi edzinigis F-inon Mary Burton, filinon de S-ro Edmund Burton, kulotisto.

Sed mia bona mastro Bates mortis post du jaroj; kaj ĉar mi havis malmultajn amikojn mia entrepreno komencis bankroti, kaj mi decidis denove vojaĝi surmare. Post pluraj vojaĝoj mi akceptis oferton faritan de Kapitano W. Pritchard, mastro de la Antilopo, kiu intencas vojaĝi al la Suda Maro. Ni ekvelis el Bristol, la 4an de majo 1699; kaj unue nia vojaĝo estis tre prospera.

Sed dum nia vojaĝo al la Orientaj Hindioj nin pelis violenta ŝtormo al la nordokcidento de la Lando Van Diemen. Dek du el nia ŝipanaro mortis pro laborego kaj netaŭga nutrado, kaj la ceteraj fariĝis tre feblaj. La 5an de novembro, kiam la vetero estis tre nebula, la ŝipanoj ekvidis rokon ne pli ol 110 metrojn for de la ŝipo; sed la vento tiom fortis ke ni peliĝis rekte sur ĝin, kaj tuj la ŝipo fendiĝis. Ses ŝipanoj, el kiuj mi estis unu, surmarigis la boaton, liberiĝis de la ŝipo, kaj ni remis ĉirkaŭ 15 kilometrojn, ĝis ni ne plu povis strebi. Sekve ni konfidis nin al la ondoj; kaj post eble duona horo la vento per subita bato renversis la boaton. Kio poste okazis al miaj kunuloj en la boato, aŭ tiuj kiuj eskapis sur la rokon

aŭ restis en la ŝipo, mi ne scias; sed mi konkludas ke ĉiuj pereis. Rilate al mi, mi naĝis laŭ mia bontrovo, kaj min antaŭen puŝis la vento kaj la tajdo; sed kiam mi ne plu kapablis barakti mi trovis ke mi estas en malprofunda akvo. La ŝtormo jam multe mildiĝis. Fine mi atingis la bordon, ĉirkaŭ la oka horo de la vespero, kaj antaŭeniris preskaŭ kilometron sur la tero, sed mi ne trovis ian spuron de loĝantoj. Mi estis lacega, kaj pro la varmego de la vetero mi trovis min forte dormema. Mi kuŝiĝis sur la herbo, kiu estis tre mallonga kaj mola, kaj dormis pli profunde ol iam antaŭe dum mia vivo ĉirkaŭ naŭ horojn. Kiam mi vekigis, nur ĵus sunleviĝis. Mi provis stariĝi, sed ne povis; ĉar okazis ke mi kuŝas sur mia dorso, kaj mi trovis ke miaj brakoj kaj kruroj estis ambaŭflankeigitaj al la tero; kaj mia hararo, kiu estas longa kaj densa, estas sammaniere ligita. Mi nur povis rigardi supren. La suno komencis varmegiĝi, kaj la lumo vundis miajn okulojn. Mi aŭdis konfuzitan bruon ĉirkaŭ mi, sed mi povis vidi nenion krom la ĉielon. Post nelonge mi sentis iom vivantan moviĝi sur mia maldekstra kruro, kaj ĝi, milde antaŭenirante sur mia brusto, venis al preskaŭ mia mentono, kiam, turninte miajn okulojn suben, mi perceptis ke ĝi estas homo, eĉ ne 15 centimetrojn alta, kun pafarko kaj sago en la manoj, kaj sagujo sur la dorso. Intertempe mi sentis almenaŭ kvardek aliajn sekvi la unuan. Mi plejege miris, kaj muĝis tiel laŭte ke ili ĉiuj retrokuris time; kaj kelkaj el ili vundiĝis pro la faloj kiujn ili spertis saltante de miaj flankoj sur la teron. Tamen, ili baldaŭ revenis, kaj unu el ili, kiu marŝis tiel ke li povis plene vidi mian vizaĝon, levis siajn manojn mirante. Tute mi kuŝis tre malkviete; sed fine, baraktante liberiĝi, mi sukcesis rompi la ŝnurojn kiuj ligis mian maldekstran brakon al la tero; kaj samtempe, per violenta tiro kiu ege dolorigis min, mi iomete malstrikigis la ŝnurojn kiuj ligas mian hararon, tiel ke mi povis turneti mian kapon ĉirkaŭ kvin centimetrojn. Sed la uloj forkuris duafoje antaŭ ol mi povis kapti lin, kaj tuj mi sentis pli ol cent sagojn pafitajn sur mian maldekstran manon, kiuj pikis min kvazaŭ egala nombro da pingloj. Plie, ili pafis novan sagaron en la aeron, el kiuj kelkaj falis sur mian vizaĝon, kiun mi tuj kovris per mia maldekstra mano. Kiam ĉesis tiu pluvo da sagoj mi ĝemis pro malĝojo kaj doloro, kaj post kiam mi denove strebis liberiĝi, ili

sendis novan flugon da sagoj pli grandan ol la unua, kaj kelkaj el ili penis piki min per siaj lancoj; sed bonfortune mi surhavis ledan jakon, kiun ili ne povis trapiki. Jam tiam mi pensis ke estos plej prudente kuŝi kviete ĝis la nokto, kiam, ĉar mia maldekstra mano jam estas libera, mi povos facile liberigi min; kaj rilate al la loĝantoj, mi pensis ke mi estos egale forta kiel la plej granda armeo kiun ili povos marŝigi kontraŭ min se ili estas ĉiuj sam-dimensiaj kiel tiu kiun mi vidis. Kiam la homoj rimarkis ke mi estas kvieta ili ne plu pafis sagojn, sed per la bruo kiun mi aŭdis mi sciis ke ilia nombro pligrandiĝis; kaj ĉirkaŭ kvar metrojn for de mi, dum pli ol horo, estis batado, kvazaŭ oni laboras. Tiam, turninte mian kapon tiudirekten kiom permesis la kejlaj kaj ŝnur-



oj, mi vidis podion starigita, ĉirkaŭ duonon metron super la tero, kun du aŭ tri eskaloj por grimpi sur ĝin. De tie, unu el ili, kiu aspektis persono altranga, faris longan paroladon al mi, el kiu mi komprenis neniun vorton, kvankam mi povis scii per lia tono ke li kelkfoje minacas min, kaj kelkfoje parolas komplete kaj afable. Mi respondis per nemultaj vortoj, sed plej cedeme; kaj, ĉar mi preskaŭ mortemalsatis, mi ne povis ne montri mian senpaciencon metante mian fingron ofte al mia buŝo, por signi ke mi volas manĝi. Li tre bone komprenis min, kaj, deirinte de la podio, ordonis ke oni metu plurajn eskalojn ĉe miajn flankojn, kiujn grimpis pli ol cent el la loĝantoj, kaj ili marŝis cele mian buŝon portante korbojn plenajn de manĝaĵoj, senditajn laŭ ordono de la

Reĝo kiam li unue informiĝis pri mi. Estis kruroj kaj ŝultroj ŝafsimilaj, sed malpli grandaj ol la flugiloj de alaŭdo. Mi manĝis ilin du-triope, kaj panojn triope. Ili donis al mi laŭeble rapide, milmaniere indikante sian miron pro mia apetito. Post tio mi gestis ke mi volas trinki. Ili divenis ke malgranda kvanto ne sufiĉos por mi, kaj, ĉar ili estis tre genia popolo, ili alportis unu el siaj plej grandaj bareloj, rulis ĝin cele mian manon, kaj de-batis la supron. Mi trinkis ĝin per unu gluto, kion mi facile faris, ĉar ĝi enhavis ne pli ol kvaronon da litro. Ili portis al mi duan barelon, kiun mi trinkis, kaj mi gestis petante pli; sed ili neniom pli havis. Tamen, mi ne povis sufiĉe miri pro la aŭdaco de tiuj uletoj, kiuj kuraĝis grimpi kaj marŝi sur mia korpo, dum unu el miaj manoj estas libera, sen tremi pro simpla vido al tiel giganta ulo kia mi sendube aspektis al ili. Post iom da tempo ekaperis antaŭ mi altarangulo de lia Imperia Moŝto. Lia Ekscelenco, grimpinte mian dekstran vizaĝon, antaŭeniris al mia vizaĝo, kun ĉirkaŭ dekduo de sia sekvantaro, kaj parolis dum ĉirkaŭ dek minutoj, ofte gestante antaŭen, kio, kiel mi poste trovis, estis cele la ĉefurbon, ĉirkaŭ kilometron for, al kie laŭ ordono de lia Moŝto mi estu portita. Mi gestis per mia mano kiu estis libera, metante ĝin al la alia (sed super la kapo de lia Ekscelenco, ĉar mi timis vundi lin aŭ lian sekvantaron), por indiki ke mi deziras liberiĝi. Li ŝajnis sufiĉe bone kompreni min, ĉar li kapneis, kvankam li faris aliajn gestojn por sciigi al mi ke mi ricevos sufiĉajn manĝaĵojn kaj trinkaĵojn, kaj ke mi estos tre bone traktata. Mi denove pensis provi eskapi; sed kiam mi sentis la doloron de iliaj sagoj sur miaj vizaĝo kaj manoj, kiuj estis kovritaj de blazoj, kaj ankaŭ observis ke la nombro da miaj malamikoj pliiĝis, mi gestis por indiki al ili ke ili faru pri mi kion ajn ili deziras. Post tio ili ŝmiris miajn vizaĝon kaj manojn per dolĉodoraĵo, kiu post kelkaj minutoj forigis ĉian doloron de la sagoj. La liberiĝo el doloro kaj malsato dormemigis min, kaj baldaŭ mi ekdormis. Mi dormis ĉirkaŭ ok horojn, kiel oni informis min poste; kaj ne mirigas, ĉar la kuracistoj, laŭ ordono de la Imperiestro, miksis dormigilon en la barelojn da vino.

Ŝajnis ke, kiam oni trovis min dormanta sur la tero post mia surteriĝo, la Imperiestro frue informiĝis, kaj decidis ke oni ligu min, kiel mi rakontis (tion oni faris nokte, dum mi dormas), ke

oni sendu al mi multajn manĝaĵojn kaj trinkaĵojn, kaj preparu aparaton por porti min al la ĉefurbo. Oni eklaborigis tuj kvincent ĉarpentistojn kaj inĝenierojn por prepari la aparaton. Ĝi konsistis el ligna kadro, levita ok centimetrojn de la tero, ĉirkaŭ du metrojn longa kaj unu kaj kvaronan metrojn larĝa, moviĝanta sur dudek du radoj. Sed malfacile estis meti min sur ĝin. Oni starigis okdek stangojn tiucele, kaj ligis tre fortajn ŝnurojn al bandaĝoj kiujn la laboristoj ligis ĉirkaŭ miajn kolon, manon, korpon, kaj krurojn. Naŭcent el la plej fortaj viroj estis utiligataj por tiri la ŝnurojn per pulioj ligitaj al la stangoj, kaj post malpli ol tri horoj mi estis levita kaj puŝita en la aparaton, kaj tie firme ligita. Dek kvin cent el la plej grandaj ĉevaloj de la Imperiestro, ĉiu estis ĉirkaŭ dekdu centimetrojn alta, estis uzataj por tiri min cele la ĉefurbon. Sed dum ĉio ĉi fariĝis mi ankoraŭ kuŝis profunde dormante, kaj mi vekigis nur kvar horojn post la komenco de nia veturo.

La Imperiestro kaj lia tuta Kortego elvenis renkonti nin kiam ni atingis la ĉefurbon; sed liaj ĉefoficistoj ne permesis ke lia Moŝto risku sin per grimpo sur mian korpon. Kie haltis la portaparato tie staris antikva templo, laŭdire la plej granda en la tuta regno, kaj oni decidis ke mi loĝu en ĝi. Proksime al la ĉefpordo, tra kiun mi povis facile rampi, ili fiksas naŭdek unu ĉenojn, similajn al tiuj kiuj pendas de la horloĝo de virino, ŝlositajn al mia maldekstra kruro per tridek ses seruroj; kaj kiam la laboristaro trovis ke estas neeble por mi rompliberiĝi, ili tranĉis ĉiujn ŝnurojn ligantajn min. Post tio mi stariĝis, sentante melankolion egalan al la plej granda en mia vivo. Sed la bruo kaj miro de la homoj vidantaj min stariĝi kaj marŝi estis neesprimeblaj. La ĉenoj tenantaj mian maldekstran krurojn estis ĉirkaŭ du metrojn longaj, kaj donis al mi ne nur liberon marŝi tien kaj reen laŭ duoncirklo, sed enrampi kaj kuŝi plene etendite en la templo.

ĈAPITRO II

LA Imperiestro, antaŭenvenante al mi el inter siaj korteganoj, ĉiuj plej grandioze vestite, rigardadis min tre admire, sed li restis

preter la etendolongo de mia ĉeno. Li estis pli alta je ĉirkaŭ la larĝo de mia ungo ol ĉiu alia persono en sia Kortego, kaj jam tio sufiĉis por instigi respekton en la rigardantoj, kaj li estis gracia kaj majesta. Por pli bone vidi lin, mi kuŝiĝis sur mian flankon, tiel ke mia vizaĝo estis samnivela kun lia, kaj li staris tri metrojn for.



Tamen, post tiam mi multfoje tenis lin en mia mano, sekve mi ne povas erari. Lia vestaro estis tre simpla; sed li surhavis leĝeran kaskon el oro, ornamitajn per juveloj kaj plumo. Li tenis sian el-tiritan glavon per sia mano, por defendi sin se mi rompliberiĝos; ĝi estis preskaŭ ok centimetrojn longa, kaj ĝia tenilo estis el oro, pliriĉigita per diamantoj. Lia voĉo estis akra, sed tre klara. Lia

Imperia Moŝto parolis ofte al mi, kaj mi respondis; sed neniu el ni povis kompreni eĉ vorton.

Post ĉirkaŭ du horoj la Korteganoj foriris, kaj restis kun mi forta gardistaro por fortendi la homamason, el kiuj kelkaj impertinente pafis siajn sagojn kontraŭ min dum mi sidis apud la pordo de mia domo. Sed la kolonelo ordonis kapti ses el ili kaj transdoni ilin en miajn manojn. Mi metis kvin el ili en la poŝon de mia mantelo; kaj al la sesa mi grimacis kvazaŭ voronte lin vivan. La povrulo kaj liaj oficiroj estis malĝojigitaj, precipe kiam ili vidis min elpreni mian poŝtrancilon. Sed mi baldaŭ trankviligis ilin,



ĉar, tranĉinte la ŝnurojn per kiuj li estis ligita, mi metis lin leĝere sur la teron, kaj li forkuris. Mi traktis la aliajn sammaniere, prenante ilin el mia poŝo unu post la alia; kaj mi vidis ke kaj al la soldatoj kaj al la popolo multege plaĉis tiu signo de mia afableco.

Kiam komencis noktiĝi mi iom malfacile eniris mian domon, kie mi kuŝiĝis sur la tero, kion mi devis fari dum la sekvaj du semajnoj, ĝis oni preparis liton por mi el sescent litoj ordinare grandaj.

Oni postenigis sescent servistojn por mi, kaj tricent tajloroj faris por mi vestokompleton. Krome, ses el la plej gravaj kleruloj de lia Moŝto dungigis por instrui al mi sian lingvon, tiel ke

baldaŭ mi povis iomete konversacii kun la Imperiestro, kiu ofte honoris min per siaj vizitoj. La unuaj vortoj kiujn mi lernis estis peto ke li bonvolu liberigi min, kaj mi ĉiutage ripetis tion surgenue; sed li respondis ke tio devos atendi, kaj ke unue mi devos ĵuri pacon kun li kaj lia regno. Li ankaŭ diris al mi ke laŭ la leĝoj de la nacio min devos traserĉi du el liaj oficistoj, kaj ĉar tio ne estos farebla sen mia helpo, li konfidis ilin al miaj manoj, kaj kion ajn li prenos de mi estos redonita kiam mi foriros de la lando. Mi prenis la du oficistojn, kaj metis ilin en la poŝojn de mia mantelo. Tiuj sinjoroj, havante plumojn, inkon, kaj paperon kun si, faris ekzaktan liston de ĉio kion ili vidis, kiun mi poste tradukis en la Anglan, kaj kiu diris ĉi tion:

“En la dekstra poŝo de la mantelo de la granda *Viro-Monto* ni trovis nur unu grandan pecon de kruda ŝtofo, sufiĉe grandan por kovri la tapiŝon de la ĉefa solena ĉambro de via Moŝto. En la maldekstra poŝto ni vidis gigantan arĝentan keston, kun arĝenta kovrilo, kiun ni ne povis levi. Ni petis ke li malfermu ĝin, kaj unu el ni paŝis en ĝin kaj trovis sin ĝis la mezo de sia genuo en ia polvo, el kiu iom flugis en niajn vizaĝojn kaj kaŭzis ke ni ekternadu. En la dekstra poŝo de lia veŝto ni trovis nombron da blankaj maldikaj substancoj, falditaj per forta ŝnurego, kaj signitaj per nigraj markoj, kiun ni humile supozas esti skribaĵoj. En la maldekstra estis ia aparato, el kies dorso etendiĝis dudek longaj stangoj, per kiu, ni konjektas, la *Viro-Monto* kombas sian kapon. En la malpli granda poŝo sur la dekstra flanko estis pluraj rondaj platoj pecoj el arĝenta kaj ruĝa metaloj, diversadimensiaj. Kelkaj el la blankaj, kiuj aspektis arĝentaj, estis tiel grandaj kaj pezaj ke mia kamarado kaj mi apenaŭ povis levi ilin. El alia poŝo pendis giganta arĝenta ĉeno, kun miriga speco de ilo ligita al ĝi, globo duone arĝenta kaj duone el ia travidebla metalo; ĉar sur la travidebla flanko ni vidis certajn strangajn markojn, kaj supozis povi tuŝi ilin sed ni trovis ke niaj fingroj haltigis la brilanta substanco. Tiu aĵo faris senpaŭzan bruon, kiel de akvomuelilo, kaj ni konjektas ke ĝi estas aŭ ia nekonata besto, aŭ la dio kiun li adoras, verŝajne la dio, ĉar li diris al ni ke li malofte agas sen konsulti ĝin.

“Ĉi tio estas listo de tio kion ni trovis sur la korpo de la *Viro-*

Monto, kiu tre ĝentile traktis nin.”

Mi havis unu privatan poŝon kiun ili ne rimarkis, en kiu estis paro da okulvitroj kaj malgranda teleskopeto, kiujn mi ne supozis konigendaj, malgraŭ mia honoropromeso, ĉar ili havus nenian gravecon por la Imperiestro.

ĈAPITRO III

MIAJ mildeco kaj bona konduto tiom imponis al la Imperiestro kaj liaj Korteganoj, kaj, efektive, la popolo ĝenerale, ke mi komencis esperi ke mi post nelonge liberigos. La indiĝenoj komencis iom post iom malpli timi danĝeron de mi. Kelkfoje mi kuŝiĝis kaj lasis kvin aŭ ses el ili danci sur mia mano; kaj fine la geknaboj kuraĝis veni kaj ludi Kaŝu-Vin-Serĉu-Min en mia hararo.



La ĉevaloj de la armeo kaj de la reĝaj staloj ne plu timis, ĉar ili estis ĉiutage kondukataj antaŭ min; kaj unu el la ĉasistoj de la Imperiestro, sur granda kurĉevalo, trans saltis miajn piedon, ŝuon k.c., kio ja estis grandega salto. Mi distris la Imperiestron unu tagon laŭ tre eksterordinara maniero. Mi prenis naŭ vergetojn, kaj firme fiksitis ilin en la teron por formi kvadraton. Post tio mi prenis kvar

pliajn vergetojn, kaj ligis ilin paralele ĉe ĉiu angulo, ĉirkaŭ sesdek centimetrojn super la tero. Mi ligis mian poŝtukon al la naŭ rekte starantaj vergetoj, kaj etendis ĝin ĉiuflanke ĝis ĝi estis streĉita kiel la supro de tamburo; kaj mi petis la Imperiestron lasi trupon de liaj plej bonaj ĉevaloj, dudek kvar sume, veni kaj ekzerci sin sur ĉi tiu ebenaĵo. Lia Moŝto aprobis la proponon, kaj mi levis ilin, unu post la alia, kun la konvenaj oficiroj por ekzercigi ilin. Tuj kiam ili ordigis sin ili dividis sin en du grupojn, pafis malakrajn sagojn, eltiris siajn glavojn, fuĝis kaj sekvis, kaj, mallonge, montris la plej bonan militistan disciplinon kiun iam mi vidis. La paralelaj vergetoj malebligis ke ili kaj iliaj ĉevaloj falu de la podio, kaj al la Imperiestro tiom plaĉis ke plurajn tagojn li ordonis ripeti tiun distraĵon, kaj li persvadis la Imperiestrinon mem lasi min teni ŝin en ŝia seĝo malpli ol du metrojn for de la podio, de kie ŝi povis vidi la tutan prezentadon. Bonfortune okazis nenia akcidento, escepte de unufoje kiam tre vigla ĉevalo, skrapante per sia hufo, faris truon en mian poŝtukon, kaj renversis sian rajdanton kaj sin mem. Sed mi tuj ekprenis ilin ambaŭ, kaj kovrante la truon per unu mano, mi demetis la trupon per la alia same kiel mi antaŭe levis ilin. Ŝultro de la falinta ĉevalo tro streĉiĝis, sed la rajdanto ne estis vundita, kaj mi riparis laŭeble mian poŝtukon. Tamen, mi ne denove fidus ĝian forton por tia danĝera distraĵo.

Mi sendis tiom multajn petojn liberiĝi ke lia Moŝto fine longe diskutis la aferon en plena konsilio, kie ĝin oponis neniue escepte de Skireŝo Bolgolamo, admiralo de la regno, kiu decidis tute senkiale esti fervore malamika al mi. Tamen, li konsentis fine, kvankam li sukcesis mem decidi la kondiĉojn laŭ kiuj mi liberiĝos. Post kiam ili legiĝis oni petis min ĵuri plenumi ilin laŭ la metodo preskribita de iliaj leĝoj, kio konsistis el teni mian dekstran piedon per mia maldekstra mano, kaj meti la mezan fingron de mia dekstra mano sur la verton de mia kapo, kaj mian dikfingron sur la supron de mia dekstra orelo. Sed mi faris tradukon de la kondiĉoj, kiun mi nun proponas al la publiko.

“Golbaste Momarem Evlame Gurdile Ŝefin Mully Ullly Gue, Plej Potenca Imperiestro de Liliputo, ĝojo kaj teroro de la universo, kies regnoj etendiĝas ĝis la ekstremoj de la globo, monarko de ĉiuj monarkoj, pli alta ol la homidoj, kies piedoj premas ĝis la centro, kaj kies kapo frapas kontraŭ la sunon, je kies kapgesto tremas la genuoj de la princoj de la tero, plaĉa kiel la printempo, komforta kiel la

somero, fekunda kiel la aŭtuno, timiga kiel la vintro: Lia Plej Sublima Majesto proponas al la Viro-Monto, ĵus veninta al niaj ĉielaj regnoj, la ĉisekvajn paragrafojn, kiujn laŭ solena ĵuro li devos plenumi:

“Unue. La *Viro-Monto* ne foriris de nia regno sen nia permeso signita per la granda sigelo.

“Due. Li ne aŭdacos veni en nian metropolon sen nia specifa ordono, kaj tiutempe la loĝantoj ricevos du horan antaŭaverton ke ili restu endome.

“Trie. La nomita *Viro-Monto* limigos siajn promenojn al niaj ĉefaj ŝoseoj, kaj ne provos marŝi aŭ kuŝiĝi en herbokampo aŭ agro de tritiko.

“Kvare. Marŝante sur la nomitaj ŝoseoj li plejege zorgos ne surtreti la korpojn de iuj el niaj amantaj regatoj, iliaj ĉevaloj aŭ kaleŝoj, nek prenos iun el niaj regatoj en siajn manojn sen konsento de ili mem.

“Kvine. Se ekspreso necesigos eksterordinaran rapidon la *Viro-Monto* devos porti en sia poŝo la mesaĝiston kaj ĉevalon ses tagojn da veturado, kaj reporti la diritan mesaĝiston (se tiel necesos) sekure al nia imperiestro ĉeesto.

“Sese. Li estos nia aliancano kontraŭ niaj malamikoj en la insulo Blefuskuo, kaj plej strebos detrui ilian ŝiparon, kiu nuntempe pretiĝas invadi nin.

“Laste. Post lia solena ĵuro plenumi ĉiujn ĉisuprajn paragrafojn, la dirita *Viro-Monto* ricevos ĉiutage manĝaĵojn kaj trinkaĵojn sufiĉajn por 1724 niaj regatoj, rajton laŭdezire veni al nia reĝa persono, kaj aliajn indikojn de nia favoro.—Proklamita en nia palaco ĉe Belfaborako, la dekduan tagon de la naŭdekunua luno de nia regado.”

Mi ĵuris konforme al tiuj paragrafoj tre gaje, kaj tujsekve oni malŝlosis miajn ĉenojn, kaj mi fariĝis plene libera.

Unu matenon, ĉirkaŭ du semajnojn post mia liberiĝo, Reldresalo, la sekretario pri privataj aferoj de la Imperiestro, venis al mia domo, asistate de nur unu servisto. Li ordonis sian kaleŝon atendi iom for, kaj petis ke mi permesu al li unuhoran aŭdiencon. Mi proponis kuŝiĝi por ke li povu pli facile atingi mian orelon; sed li preferis ke mi tenu lin en mia mano dum nia konversacio. Li komencis per komplimentoj pro mia liberiĝo, sed li aldonis ke, se ne ekzistus la aktuala stato de aferoj ĉe la Kortego, eble mi ne tiel baldaŭ akiris

ĝin. “Ĉar,” li diris, “kvankam ni eble aspektas prosperaj al fremduloj, nin minacas invado el la insulo Blefuskuo, kiu estas la alia granda imperio de la universo, preskaŭ tiel granda kaj tiel potenca kiel ĉi tiu de lia Moŝto. Ĉar pri tio kion ni aŭdis vin diri, ke estas aliaj regnoj en la mondo, loĝataj de homuloj egale grandaj kiel vi mem, niaj filozofoj multe dubas, kaj preferas konjekti ke vi falis de la luno, aŭ unu el la steloj, ĉar cent homoj viadimensiaj baldaŭ detruus ĉiujn produktaĵojn kaj brutojn de la regnoj de lia Moŝto. Krome, niaj historioj de sesmil lunoj tute ne mencias aliajn regionojn ol la du potencaj imperioj Liliputo kaj Blefuskuo, kiuj, kiel mi estis dironta al vi, okupas sin per obstinega milito, kiu komenciĝis ĉimaniere:— Estas konsentite de ĉiuj ke la prametodo rompi ovojn estis ĉe la pli granda finaĵo; sed la avo de nia aktuala Moŝto, dum li estis knabo, manĝonte ovon, kaj rompante ĝin laŭ la antikva kutimo, tranĉis fingron sian. Pro tio la Imperiestro, lia patro, starigis leĝon kiu ordonas al ĉiuj regatoj ke ili rompu la malpli grandan finaĵon de siaj ovoj. La popolo tiom fervore malŝatis tiun leĝon ke okazis jam ses ribeloj pro tio, dum kiuj unu imperiestro perdis sian vivon, kaj alia sian kronon. Oni kalkulas ke dekunucent personoj diversfoje suferis morton prefere ol rompi siajn ovojn ĉe la malpli granda finaĵo. Sed tiuj ribelistoj, la Grandfinaĵuloj, ricevis tiom da subteno ĉe la Kortego de la Imperiestro de Blefuskuo, ĉe kiu ili ĉiam serĉis rifuĝon, ke sango-plena milito, kiel mi diras, okazas inter la du imperioj jam de seskaj-tridek lunoj; kaj nun la Blefuskuanoj ekipis grandan ŝiparon, kaj pretiĝas ataki nin. Tial lia Imperiestra Moŝto, multe fidante viajn kuraĝon kaj forton, ordonis ke mi prezentu la kazon al vi.”

Mi petis la sekretarion prezenti mian humilan akcepton al la Imperiestro, kaj sciigi al li ke mi pretas, riske al mia vivo, defendi lin kontraŭ ĉiuj invadantoj.

ĈAPITRO IV

POST nelonge mi komunikis al lia Moŝto la planon kiun mi faris por kapti la tutan ŝiparon de la malamikoj. La Imperio Blefuskuo estas insulo apartigita disde Liliputo nur de markolo sep cent metrojn larĝa. Mi konsultis la plej spertajn maristojn pri la profundo de la markolo, kaj ili informis min ke en la mezo, je alta akvo, ĝi estas sesdek glumglufojn (ĉirkaŭ du metroj laŭ Eŭropa mezurado). Mi marŝis cele la marbordon, kie, kuŝante malantaŭ altaĵeto, mi

elprenis mian malgrandan teleskopon, kaj rigardis la ankritan ŝiparon de la malamikoj—proksimume kvindek militŝipoj, kaj aliaj ŝipoj. Post tio mi revenis al mia domo kaj ordonis alporti grandan kvanton de la plej fortikaj kabloj kaj feraj stangoj. La kabloj estis proksimume tiel dikaj kiel kudroŝnuro, kaj la stangoj tiel longaj kaj grandaj kiel trikilo. Mi kunvolvis tri kablojn por fari fortikan kablون, kaj samcele mi kunvolvis tri ferajn stangojn, kaj faldis la finaĵojn por fari hokon. Tiel liginte kvindek hokojn al egala nombro da kabloj, mi reiris al la marbordo, kaj depreninte miajn mantelon, ŝuojn, kaj ŝtrumpojn, marŝis en la maron en mia leda jako ĉ. duonan horon antaŭ la alta akvo. Mi vadis laŭeble haste, kaj naĝis en la mezo ĉ. tridek metrojn, ĝis mi sentis teron, kaj tiel mi atingis la ŝiparon post malpli ol duona horo. La malamikoj tiom timis kiam ili vidis min ke ili saltis el siaj ŝipoj kaj naĝis surteren, kie ne povis esti malpli ol tridek mil. Liginte hokon al la truo ĉe la antaŭo de ĉiu ŝipo, mi kunligis ĉiujn ŝnurojn ĉe la finaĵo. Intertempe la malamikoj pafis plurmil sagojn, el kiuj multaj pikinte restis en miaj manoj kaj vizaĝo. Mi plej multe timis pri miaj okuloj, kiujn mi certe perdus se mi ne ekpensus pri la paro da okulvitroj kiujn ne rimarkis la serĉistoj de la Imperiestro. Tiujn mi elprenis kaj fiksas al mia nazo, kaj tiel armite mi daŭrigis mian laboron malgraŭ la sagoj, el kiuj multaj frapis la vitrojn, sed sen efiko alia ol moveti ilin tre malmulte. Post tio, preninte la nodon per mia mano, mi komencis tiri; sed eĉ ne unu ŝipo moviĝis, ĉar ilin tro firme tenis iliaj ankroj. Sekve la plej aŭdaca parto de mia entrepreno restis farota. Do mi lasis la ŝnuron, kaj firme tranĉis per mia tranĉilo la kablojn ligantajn la ankrojn, dum mi ricevis pli ol ducent pafojn en miaj vizaĝo kaj manoj. Post tio mi reprenis la nodon finaĵon de la kabloj al kiuj estis ligitaj miaj hokoj, kaj tre facile mi trenis kvindek el la plej grandaj militŝipoj de la malamikoj.

Kiam la Blefuskuanoj vidis la ŝiparon moviĝi laŭvice, kaj min tiri la finaĵon, ili faris tian kriegon pro malĝojo kaj malesperigo ke ne eblas priskribi ĝin. Irinte preter danĝeron mi haltis dum kelka tempo por elpreni la sagojn kiuj restis en miaj manoj kaj vizaĝo, kaj surŝmiris iom de la sama ŝmiraĵo kiun oni donis al mi je la alveno. Mi deprenis miajn okulvitrojn, kaj atendinte ĉ. horon ĝis la tajdo iom malaltiĝis, mi plu vadis al la reĝa haveno de Liliputo.

La Imperiestro kaj lia tuta Kortegano staris sur la bordo atendante min. Ili vidis la ŝipojn moviĝi antaŭen laŭ granda duon-

cirklo, sed ne povis vidi min, kiu, en la mezo de la markolo, estis sub la akvo ĝis mia kolo. La Imperiestro konkludis ke mi dronis, kaj ke la ŝiparo de la malamikoj proksimiĝis militocelo. Sed li baldaŭ



trankviliĝis, ĉar, pro tio ke la markolo fariĝis malpli profunda je ĉiu mia paŝo, mi tre rapide venis al aŭskultodistanco, kaj suprentenante la finaĵon de la kablo per kiu la ŝiparo estis ligita, mi kriis laŭtvoĉe: “Longe vivu la plej potenca Imperiestro de Liliputo!” La Princo

akceptis min ĉe mia alteriĝejo kiel eble plej ĝoje, kaj nomumis min Nardalo jam tie, tio estas la plej altaranga honortitolo inter ili.

Lia Moŝto petis ke mi uzu oportunon alporti ĉiujn ceterajn ŝipojn de la malamikoj en liajn havenojn, kaj ŝajnis pensis pri nenio alia ol konkeri la tutan Imperion Blefuskuan, kaj fariĝi la sola monarko de la mondo. Sed mi klare protestis ke mi neniam akceptus esti rimedo por sklavigi liberan kaj bravan popolon; kaj kvankam la plej saĝaj Ministroj partoprenis en mia opinio, mia klara rifuzo tiom kontraŭis la ambicion de lia Moŝto ke li neniam pardonis min. Kaj de tiam inter li kaj tiuj liaj Ministroj kiuj estis malamikaj al mi komenciĝis komploto kiu preskaŭ finiĝis per mia plena perejo.

Ĉ. tri semajnojn post tiu heroo ago venis ambasadoroj el Blefuskua, kun humilaj pacproponoj, kaj baldaŭ fariĝis packontrakto, laŭ kondiĉoj tre avantaĝaj por nia Imperiestro. Estis ses ambasadoroj, kun asistantaro konsistanta el kvincent personoj, ĉiuj tre elegantaj. Ĉar ili private informiĝis ke mi amikemis al ili, ili vizitis min, kaj faris multajn komplimentojn pri miaj braveco kaj malavido, invitante min al sia regno en la nomo de sia mastro la Imperiestro. Mi petis ilin prezenti miajn plej humilajn esprimojn de respekto al ilia mastro la Imperiestro, kies reĝan personon mi firme intencas viziti antaŭ ol reiri al mia propra lando. Konforme, kiam mi sekvafoje ricevis la honoron vidi nian Imperiestron mi petis lian ĝeneralan permeson viziti la Blefuskuan monarkon. Tion li donis al mi, sed tre malafable, kies kaŭzon mi poste ekkonis.

Ĝuste dum mi preparis min respektoplene viziti la Imperiestron de Blefuskua, multe honorata Kortegano, al kiu mi iam faris grandan servon, venis al mia domo tre sekrete dum la nokto, kaj sen sciigi sian nomon petis eniri. Mi metis lian moŝton en poŝon de mia mantelo, kaj, ordoninte al fidinda servisto enlasi neniun, mi riglis la pordon, metis mian vizitanton sur la tablon, kaj sidiĝis apud ĝi. La vizaĝo de lia moŝto montris multan maltrankvilon; kaj li petis ke mi pacience aŭskultu lin, rilate al afero kiu multe rilatas al miaj honoro kaj vivo.

“Vi konscias,” li diris, “ke Skireŝo Bolgolamo profunde malamiĝas al vi ekde via alveno, kaj lia malamo pligrandiĝis post via granda sukceso kontraŭ Blefuskua, pro kiu lia gloro kiel admiralo obskuriĝis. Tiu sinjoro kaj aliaj akuzis vin pri perfido, kaj pluraj konsilioj kunvenis plej sekrete pro vi. Pro mia dankemo pro viaj favoroj mi akiris informojn pri la tuta protokolo, riskante mian

kapon por servi vin, kaj jen la akuzo kontraŭ vi:

“Unue, ke vi, portinte la imperian ŝiparon de Blefuskuo en la reĝan havenon, ricevis ordonon de lia Moŝto kapti ĉiujn aliajn ŝipojn, kaj mortigi ĉiujn Grandfinajulajn ekzilitojn, kaj ankaŭ ĉiujn homojn de la imperio kiuj rifuzas tuj konsenti rompi siajn ovojn ĉe la malpligranda finaĵo. Kaj ke, kiel falsista perfidulo kontraŭ lia Plej Serena Moŝto, vi ekskuzis vin de tiu servo pretendante malvoli trudi kredojn kaj detrui la liberon kaj vivon de senkulpa popolo.

“Krome, kiam alvenis ambasadoroj de la Kortego de Blefuskuo, kiel falsista perfidulo, vi helpis kaj gastigis ilin, kvankam vi sciis ke ili estas servantoj de princo kiu lastatempe malkaŝe militis kontraŭ lia Imperia Moŝto.

“Kaj, vi nun preparas vin, kontraŭe al la devo de fidela regato, vojaĝi al la Kortego de Blefuskuo.

“En la debato pri tiu akuzo,” mia amiko pludiris, “lia Moŝto ofte rimarkigis la servojn kiujn vi faris al li, dum la admiralo kaj kasisto insistis ke vi estu hontinde mortigita. Sed Reldresalo, sekretario pri privataj aferoj, kiu ĉiam pruvis sin via amiko, proponis ke lia Moŝto bonvolu ŝpari vian vivon kaj ordonu nur ke ambaŭ viaj okuloj blindiĝu, tiel justeco povus iom kontentiĝi. Je tio Bolgolamo stariĝis furiozante, demandante kiel povas la sekretario aŭdace deziri konservi la vivon de perfidulo; kaj la kasisto, indikinte la elspezojn necesajn por pluvivigi vin, ankaŭ postulis vian morton. Sed lia Moŝto gracie decidis diri ke ĉar la konsilio opinias la perdon de viaj okuloj tro malsevera puno, alia puno estas poste plenumenda. Kaj la sekretario, humile petinte denove aŭdiĝi, diris ke rilate al elspezoj, viaj provizaĵoj povus iom post iom malpliigi, tiel ke, pro manko de sufiĉaj nutraĵoj, vi malfortiĝus kaj febliĝus, kaj mortus post kelkaj monatoj, kaj tiam la regatoj de lia Moŝto povus tranĉi vian karnon de viaj ostoj kaj enterigi ĝin, lasante la skeleton por rigardado fare de la posteuloj.

“Tiel estis decidite, pro la granda amikeco de la sekretario. Estis ordonite ke restu sekreta la plano mortmalsatigi vin iom post iom; sed la kondamno ke viaj okuloj blindiĝu estis skribite en la librojn. Post tri tagoj via amiko la sekretario venos al via domo kaj legos la akuzon al vi, kaj indikos ke la granda kompatato de lia Moŝto postulas nur ke vi perdu viajn okulojn—kion vi tute sendube akceptos humile kaj dankeme. Dudek el la kirurgoj de lia Moŝto ĉeestos, por certigi ke la operacio estas ĝuste farita; oni pafos tre akrapintajn sagojn en

la pupilojn de viaj okuloj dum vi kuŝos sur la tero.

“Mi lasas vin,” diris mia amiko, “ke vi pripensu kiujn rimedojn uzi; kaj, por eviti suspekton, mi devas tuj reiri, sekrete kiel mi venis.”

Lia moŝto faris tion; kaj mi restis sola, tre perpleksa. Unue mi intencis rezisti; ĉar dum mi restos libera mi povos facile per ŝtonoj disbati la metropolon; sed mi baldaŭ forpuŝis tiun ideon hororoplene, memorante la ĵuron kiun mi faris al la Imperiestro, kaj la komplezojn kiujn mi ricevis de li. Fine, ĉar mi havis permeson de lia Moŝto respektive viziti la Imperiestron de Blefuskuo, mi decidis uzi tiun oportunon. Antaŭ ol pasis la tri tagoj mi sendis leteron al mia amiko la sekretario informante lin pri mia decido; kaj, sen atendi respondon, mi iris al la marbordo, kaj, enirinte la markolon, per vadado kaj naĝado mi atingis la havenon de Blefeskua, kie la popolo, kiu de longe atendis min, kondukis min al la ĉefurbo.

Lia Moŝto, kun la reĝa familio kaj grandaj oficistoj de la Kortego, elvenis akcepti min, kaj ili gastigis min laŭ maniero taŭga por la malavaremo de tiel granda princo. Mi ne menciis, tamen, mia hontiĝon antaŭ la Imperiestro de Liliputo, ĉar mi ne supozis ke tiu princo konigos la sekreton dum mi estas ekster la atingopovo de lia potenco. Sed pri tio, baldaŭ montriĝis, mi eraris.

ĈAPITRO V

TRI tagojn post mia alveno, marŝinte pro scivolemo al la nordorienta bordo de la insulo, mi observis tre for en la maro ion aspektantan boato renversita. Mi detiris miajn ŝuojn kaj ŝtrumpojn, kaj vadinte du-tricent metrojn, mi klare vidis ke ĝi estas vera boato, kiu, laŭ mia supozo, eble estis drivigita de iu tempesto for de ŝipo. Mi reiris tuj al la urbo por akiri helpon, kaj post multega laboro mi sukcesis venigi mian boaton al la reĝa haveno de Blefuskuo, kie granda amaso da homoj aperis, mirante pro sia vido je tiel giganta ŝipo. Mi diris al la Imperiestro ke mia bonfortuno sendis ĉi boaton direkte al mi por porti min ien kie mi povos reiri al mia propra lando, kaj mi petis ke li ordonu provizi por ĝi materialojn, kaj mi petis permesos forveturi—kion, post multaj afablaj paroloj, li bonvolis permesi.

Intertempe la Imperiestro de Liliputo, maltrankvila pro mia longa foresto (sed tute ne konjektante ke mi eĉ iomete informiĝis pri

liaj planoj) sendis altarangulon por informi la Imperiestron de Blefuskuo pri mia malhonoriĝo; al tiu mesaĝisto estis ordonite sciigi la grandan kompaton de lia mastro, kiu kontentas puni min per la perdiĝo de miaj okuloj, kaj kiu anticipis ke lia frato Blefuskua sendigos min al Liliputo, ĉenitan mane kaj piede, por puniĝi kiel perfidulo. La Imperiestro de Blefuskuo respondis per multaj ĝentilaj ekskuzoj. Li diris ke rilate al la resendo de mi ĉenita, lia frato scias ke tio estas malebla. Krome, kvankam mi forprenis lian ŝiparon li dankemas al mi pro multaj afablecoj kiujn mi faris al li kiam mi pacfaris. Sed ke ambaŭ Moŝtoj baldaŭ povos kvietiĝi; ĉar mi trovis gigantan ŝipon sur la bordo, kapablan porti min sur la maro, kiun li ordonis priprovizi; kaj ke li esperas ke post kelkaj semajnoj ambaŭ imperioj liberiĝos de mi.



Kun tiu respondo la mesaĝisto reiris al Liliputo; kaj mi (kvankam la monarko de Blefuskuo sekrete proponis al mi sian sekretan protektadon se mi akceptos plu servi lin) hastigis mian forveturon, firme decidinte neniam denove fidi princojn.

Post ĉ. monato mi estis preta foriri. La Imperiestro de Blefuskuo, kun la Imperiestrino kaj la reĝa familio, venis el la palaco; kaj mi kuŝiĝis vizaĝmalsupre por kisi iliajn manojn, kiujn ili bonvolis proponi al mi. Lia Moŝto donacis al mi kvindek bursojn da sprugoj (ilia plej granda ora monero) kaj sian plendimensian portreton, kiun mi tuj metis en unu el miaj gantoj, por ke ĝi ne damaĝiĝu. Multaj aliaj ceremonioj okazis kiam mi forveturis.

Mi plenigis la boaton per manĝaĵoj kaj trinkaĵoj, kaj kunprenis ses bovinojn kaj du taŭrojn vivantajn, kun egala nombro da ŝafinoj

kaj virŝafoj, intencante porti ilin en mian propran landon; kaj por manĝigi ilin surŝipe mi havis grandan amason da fojno kaj sakon da tritiko. Mi volonte kunprenus dekduon da indiĝenoj; sed tion la Imperiestro neniel permesus, kaj krom diligentan serĉon en miaj poŝoj, lia Moŝto postulis mian promeson ne forporti iujn el liaj regantoj, eĉ se ili mem konsentus kaj dezirus.

Tiel laŭeble preparinte ĉion, mi ekvelis. Irinte cent kilometrojn, laŭ mia kalkulo, de la insulo Blefuskuo, mi vidis velon irantan nord-orienten. Mi signis al ĝi, sed ne povis ricevi respondon; tamen mi trovis ke mi proksimiĝas al ĝi, ĉar la vento malfortiĝis; kaj post duona horo ĝi ekvidis min, kaj pafis. Mi apudiĝis al ĝi inter la kvina kaj sesa horo en la vespero, la 26an de septembro, 1701; sed mia koro saltis en mi vidante ĝian Anglan standardon. Mi metis miajn bovinojn kaj ŝafojn en poŝojn de mia mantelo, kaj enŝipiĝis kun mia tuta kargeto. La kapitano akceptis min afable, kaj petis min diri al li en kiu loko mi lastatempe estis; sed pro mia respondo li kredis min freneza. Tamen, mi prenis miajn nigrajn brutojn kaj ŝafojn el mia poŝo, kio, post la surprizego, klare konvinkis lin.

Ni alvenis en Anglio la 13an de aprilo, 1702. Mi restis du monatojn kun miaj edzino kaj familio; sed mia fervora deziro vidi fremdajn landojn ne permesis ke mi plu restu. Tamen, estante en Anglio mi multege profitis montrante miajn brutojn al altranguloj kaj aliaj homoj; kaj antaŭ ol komenci mian duan vojaĝon mi vendis ilin kontraŭ £600. Mi lasis £1500 kun mia edzino, kaj provizis al ŝi bonan domon; post tio, adiaŭinte ŝin kaj miajn filon kaj filinon, dum ni ĉiuj larmis, mi ekvelis sur la ŝipo Aventuro.¹

¹Swift.

LA PRINCINO SUR LA VITRA MONTETO

FOJE estis viro kiu posedis kampon kiu kuŝis sur la flanko de monto, kaj sur la kampo estis grenejo en kiu li konservis fojnon. Sed jam de du jaroj ne estas multa fojno en la grenejo, ĉar ĉiam la vesperon antaŭ la Tago de Sankta Johano, kiam la herbo estis plej forta, ĝi estis plene vorata, same kiel se tuta grego da ŝafoj mordus ĝin ĝis la tero dum la nokto. Tio okazis unufoje, kaj okazis duafoje, sed post tio la viron enuigis ke li perdas sian rikolton, kaj diris al siaj filoj—li havis tri, kaj la tria nomiĝis Cindruloknabo—ke unu el ili devos dormi en la grenejo la nokton antaŭ Sankta Johano, ĉar estus absurde lasi la herbon denove voriĝi, foliojn kaj tigojn, kiel dum la pasintaj du jaroj, kaj la gvatonto devos tre akre gvati, la viro diris.

La plejaĝa deklaris ke li tute volonte iros al la kampo; li gvatos la herbon, li diris, kaj li faros tion tiel bone ke nek homo, nek besto, nek eĉ la diablo mem manĝos iom da ĝi. Do kiam vesperiĝis li iris al la grenejo, kaj kuŝiĝis por dormi, sed kiam proksimiĝis la nokto okazis tia bruego kaj tia tertremo ke la muroj kaj tegmento retremegis, kaj la knabo eksaltis kaj forkuris laŭeble plej rapide, kaj eĉ ne unufoje retrorigardis, kaj la grenejo restis malplena tiun jaron same kiel dum la pasintaj du.

La sekvan antaŭsanktajohanan vesperon la viro denove diris ke li ne povos daŭrigi tiel, perdante la tutan herbon en la pretera kampo jaron post jaro, kaj ke unu el liaj filoj devos iri tien kaj gvati ĝin, kaj ja bone gvati. Do la preskaŭplejaĝa filo akceptis montri kion li povos fari. Li iris al la grenejo kaj kuŝiĝis por dormi, same kiel agis lia frato; sed kiam proksimiĝis la nokto okazis granda bruego, kaj post tio estis tertremo, kiu estis eĉ pli forta ol tiu dum la antaŭa antaŭsanktajohana nokto, kaj kiam la junulo aŭdis ĝin li terurigiĝis, kaj foriris, kurante kvazaŭ vetlude.

La sekvan jaron estis la vico de Cindruloknabo, sed kiam li pretiĝis iri la aliaj priridis kaj mokis lin. “Nu, certe vi estas la ĝusta persono gvati la fojnon, vi kiu neniam lernis ion ajn escepte de sidi inter la cindroj kaj baki vin!” diris ili. Cindruloknabo, tamen, ne ĝenis sin pro kion ili diris, sed kiam proksimiĝis la vespero li forvadis al la pretera kampo. Veninte tien li eniris la grenejon kaj kuŝiĝis, sed post ĉ. horo la bruado kaj krakado komenciĝis, kaj estis timige aŭdi ĝin. “Nu, se ne estos pli malbone ol tiel, mi povos elteni,” pensis Cindruloknabo. Post kelka tempo



la krakado rekomenciĝis, kaj la tero tremis tiel ke la tuta fojno disflugis ĉirkaŭ la knabo. “Ho! se ne estos pli malbone ol tiel, mi povos elteni,” pensis Cindruloknabo. Sed sekvis tria bruado, kaj tria tertremo, tiom fortega ke la knabo kredis ke la muroj kaj tegmento falis, sed post ĉi ties ĉeso ĉio fariĝis kvieta kiel la morto ĉirkaŭ li. “Mi preskaŭ certas ke reokazos,” pensis Cindruloknabo, sed ne, ne reokazis. Ĉio estis kvieta, kaj ĉio restis kvieta, kaj kuŝinte kvieta dum nelonga periodo li aŭdis sonon kia de ĉevalo staranta maĉante tuj ekster la pordo de la grenejo. Li silente marŝis al la pordo, kiu staras iomete malferma, por vidi kio estas

tie, kaj ĉevalo staras manĝante. Ĝi estis tiel granda, kaj dika, kaj altakvalita ĉevalo ke Cindruloknabo neniam antaŭe vidis similan, kaj selo kaj bridilo kuŝis sur ĝi, kaj kompleta kiraso por kavaliro, kaj ĉio estis el kupro, kaj tiel brila ke ĝi reflektis. “Ha, ha! do vi estas kiu manĝas nian fojnon,” pensis la knabo; “sed mi ĉesigos tion.” Do li haste elprenis sian ŝtalaĵon kiun li uzis por estigi fajron, kaj ĵetis ĝin trans la ĉevalon, kaj rezulte ĝi tute ne kapablis moviĝi de sia pozicio, kaj fariĝis tiel malsovaĝa ke la knabo povis obeigi ĝin laŭdezire. Do li suriris ĝin kaj forrajdis al loko kiun konas nur li mem, kaj tie li ligis ĝin. Kiam li reiris hejmen liaj fratoj ridis kaj demandis pri lia sukceso.

“Vi ne longe kuŝis en la grenejo, eĉ se vi vere iris ĝis la kampo!” diris ili.

“Mi kuŝis en la grenejo ĝis la sunleviĝo, sed mi vidis nenion kaj aŭdis nenion, ne mi,” diris la knabo. “Dio scias kio povis tiom timigi vin ambaŭ.”

“Nu, ni baldaŭ vidos ĉu aŭ ne vi gvatis la kampon,” respondis la fratoj, sed kiam ili venis tien la herbo ja plu staris tiel alta kaj densa kiel dum la antaŭa nokto.

La sekvan vesperon antaŭ la Tago de Sankta Johano tute same okazis: neniu el la du fratoj kuraĝis iri al la pretera kampo por gvati la rikolton, sed Cindruloknabo iris, kaj ĉio okazis precize kiel dum la antaŭa vespero antaŭ la Tago de Sankta Johano: unue estis bruado kaj tertremo, sekvis alia, kaj post tio sekvis tria; sed ĉiuj tri tertremoj estis multe pli violentaj ol dum la antaŭa jaro. Post tio ĉio refariĝis kvietaj la morto, kaj la knabo aŭdis ion maĉanta ekster la pordo de la grenejo, do li marŝis laŭeble silente al la pordo, kiu staras iomete malferma, kaj denove tie ĉevalo staras manĝante kaj maĉante, kaj ĝi estis multe pli granda kaj dika ol la unua ĉevalo kaj selo estis sur ĝia dorso, kaj ankaŭ bridilo kuŝis sur ĝi, kaj kompleta kiraso por kavaliro, ĉio estis el brilanta arĝento, kaj kiel eble plej bela. “Ho, ho!” pensis la knabo, “do vi estas kiu manĝas nian fojnon dum la nokto? Sed mi ĉesigos tion.” Do li elprenis sian ŝtalaĵon kiun li uzis por estigi fajron, kaj ĵetis ĝin trans la kolharojn de la ĉevalo, kaj rezulte la besto staris tie kviete kiel ŝafido. Sekve la knabo forrajdis ankaŭ ĉi tiun ĉevalon al la loko kie li havas la alian, kaj poste reiris hejmen.

“Mi supozas ke vi diros al ni ke vi denove bone gvatis ĉifoje,” diris la fratoj.

“Nu, tiel estis,” diris Cindruloknabo. Do ili reiris tien, kaj tie estas la herbo, starante alta kaj densa kiel antaŭe, sed tio ne pli afabligis ilin al Cindruloknabo.

Kiam venis la tria nokto de Sankta Johano neniu el la du pliaĝaj fratoj kuraĝis kuŝi en la pretera grenejo por gvati la herbon, ĉar ili tiom elkore timegis dum la nokto kiam ili ja dormis tie ke ili ne povis kvietiĝi, sed Cindruloknabo kuraĝis iri, kaj ĉio okazis tute same kiel dum la du antaŭaj noktoj. Okazis tri tertremoj, ĉiu pli violenta ol la alia, kaj la lasta ĵetis la knabon de unu muro de la grenejo al la alia, sed post tio ĉio ekfariĝis kviete kiel la morto. Kuŝinte nur tre mallongan tempon li aŭdis ion maĉanta ekster la pordo de la grenejo; do li denove marŝis silente al la pordo, kiu staras iomete malferma, kaj jen ĉevalo staras tuj ekster la pordo, kaj ĝi estas multe pli granda kaj dika ol la du aliaj kiujn li kaptis. “Ho, ho! do estas vi kiu manĝas nian fojnon ĉifoje,” pensis la knabo; “sed mi ĉesigos tion.” Do li elprenis sian ŝtalaĵon kiun li uzis por estigi fajron, kaj ĵetis ĝin trans la ĉevalon, kaj rezulte ĝi staris kviete kvazaŭ pernajle fiksita al la kampo, kaj la knabo povis fari per ĝi kion ajn li volis. Sekve li suriris ĝin kaj forrajdis al la loko kie li havas la du aliajn, kaj poste li reiris hejmen. Tie la du fratoj mokis lin same kiel antaŭe, kaj ili diris al li ke ili povas vidi ke sendube li tre atente gvatis la herbon dum tiu nokto, ĉar li aspektas precize kvazaŭ promenante en sia dormo; sed Cindruloknabo ne ĉagreniĝis pro tio, li nur petis ke ili mem iru al la kampo por vidi. Ili ja iris, kaj ankaŭ ĉifoje la herbo staris, aspektante bona kaj dika kiel antaŭe.

La Reĝo de la lando kie loĝis la patro de Cindruloknabo havis filinon kiun li rifuzis edzinigi al persono ne kapabla suprenrajdi al la supro de la vitra monteto, ĉar estis altega monteto el vitro, glitiga kiel glacio, kaj ĝi estis proksima al la palaco de la Reĝo. Sur la plejsupro de tio la filino de la Reĝo sidu tenante tri orajn pomojn en sia sino, kaj la viro kiu povos suprenrajdi kaj preni la tri orajn pomojn edziĝos kun ŝi kaj ricevos duonon de la regnon. La Reĝo proklamigis tion en ĉiu preĝejo en la tuta regno, kaj ankaŭ en multaj aliaj regnoj. La Princino estis tre bela, kaj ĉiuj vidante

ŝin ekamegis ŝin, eĉ kontraŭ sia volo. Do ne necesas diri ke ĉiuj princoj kaj kavaliroj fervoris gajni ŝin, kiel ankaŭ duonon de la regno, kaj tiucele ili venis rajdante tien el la ekstremo mem de la mondo, tiel elegante vestite ke iliaj vestoj scintilis en la sunbrilo, kaj rajdante ĉevalojn kiuj kvazaŭ dancis paŝante, kaj al neniuj el tiuj princoj mankis la kredo ke nepre li mem gajnos la Princinon.

Kiam venis la tago fiksita de la Reĝo, tiel granda estis la amaso da kavaliroj kaj princoj ĉe la piedo de la vitro monteto ke laŭ-aspekte ili svarmis, kaj ĉiu kapabla marŝi aŭ eĉ rampi ankaŭ estis tie, por vidi kiu gajnos la filinon de la Reĝo. Ankaŭ la du fratoj de Cindruloknabo estis tie, sed ili rifuzis permesi ke li akompanu ilin, ĉar li estis tiel malpura kaj nigra pro dormado kaj ludado inter la cindroj ke ili diris ke ĉiu mokos ilin se ili vidiĝos akompanate de tia stultulo.

“Nu, do, mi iros tute sola,” diris Cindruloknabo.

Kiam la du fratoj atingis la vitran monteton, ĉiuj princoj kaj kavaliroj jam provadis suprenrajdi ĝin, kaj iliaj ĉevaloj ŝaŭmis; sed estis tute vane, ĉar tuj kiam la ĉevaloj metis piedon sur la monteton ili suben glitis, kaj neniuj povis supreniri eĉ du metrojn. Nek tio estis miriga, ĉar la monteto estis glata kiel la vitro en fenestro, kaj kruta kiel la flanko de domo. Sed ĉiuj fervoris gajni la filinon de la Reĝo kaj duonon de la regno, do ili rajdis kaj ili glitis, kaj tiel daŭradis. Fine ĉiuj ĉevaloj tiom lakis ke ili ne povis plu peni, kaj tiel varmegaj ke la ŝaŭmo gutis de ili, kaj la rajdantoj devis cedi. La Reĝo estis pensanta ke li proklamigos ke oni rekomencu la rajdadon la sekvan tagon, kiam eble la sukceso estos pli bona, kiam subite kavaliro venis rajdante tiel bonan ĉevalon ke neniuj iam antaŭe vidis similan, kaj la kavaliro surhavis kupran kirason, kaj ankaŭ lia bridilo estis el kupro, kaj ĉiuj liaj ekipaĵoj estis tiel brilaj ke ili reflektis. Ĉiuj aliaj kavaliroj vokis al li ke estos plej bone ke li ŝparu al si la ĝenon provi suprenrajdi la vitran monteton, ĉar tute ne utilas provi; sed li ne atentis ilin; kaj rajdis rekte al ĝi, kaj supreniris kvazaŭ tute senprobleme. Tiel li rajdis longe—eble trionon de la vojo supren—sed tien irinte li turnis sian ĉevalon kaj resubrajdis. Sed la Princino pensis ke ŝi ĝis nun neniam vidis tiel belan kavaliron, kaj dum li suprenrajdadis li sidis pensante: “Ho! mi esperegas ke li povos veni ĝis la supro!” Kaj

vidante ke li returnas sian ĉevalon ŝi ĵetis al li unu el la oraj pomoj, kaj ĝi ruliĝis en ŝuon lian. Sed reveninte de sur la monteto li forrajdis, tiel rapide ke neniu sciis kien li iris.

Do ĉiuj princoj kaj kavaliroj estis petitaj prezenti sin antaŭ la Reĝo tiunokte, tiel ke tiu kiu tiom suprenrajdis sur la vitra monteto montru la oran pomon kiun alĵetis la filino de la Reĝo. Sed neniu havis ion montreblan. Unu kavaliro prezentis sin post la alia, kaj neniu povis montri la pomon.

Ankaŭ dum la nokto la fratoj de Cindruloknabo revenis hejmen kaj longe rakontis pri la suprenrajdo sur la vitra monteto. Unue, ili diris, tute neniu povis eĉ unu paŝon fari, sed venis kavaliro kun kupra kiraso, kaj bridilo el kupro, kaj liaj kiraso kaj garnituro estis tiel brilaj ke ili videblis jam el granda distanco, kaj estis mirinda vidaĵo vidi lin rajdantan. Li rajdis trionon de la vojo supren laŭ la vitra monteto, kaj se li volus li facile povus rajdi tutsupren; sed li returnis sin, ĉar li decidis ke tio sufiĉas por unu fojo. “Ho! volonte ankaŭ mi estus vidinta lin, mi ja,” diris Cindruloknabo, kiu kiel kutime sidis apud la kamentubo inter la cindroj. “Ĉu vi!” diris la fratoj, “vi aspektas taŭga esti inter tiel grandaj moŝtoj, fibesto kia vi sidanta tie!”

La sekvan tagon la fratoj volis denove eliri, kaj ĉifoje Cindruloknabo petegis ke ili lasu lin akompani ilin por vidi kiu rajdas; sed ne, ili diris ke li ne taŭgas fari tion, ĉar li estas multe tro malbela kaj malpura. “Nu, nu, do mi iros tute sola,” diris Cindruloknabo. Do la fratoj iris al la vitra monteto, kaj ĉiuj princoj kaj kavaliroj komencis denove rajdi, kaj ĉifoje ili atentis malglatigi la hufumojn de siaj ĉevaloj; sed tio ne helpis ilin: ili rajdis kaj ili glitis same kiel dum la antaŭa tago, kaj neniu el ili povis supreniri eĉ unu metron sur la monteto. Laciginte siajn ĉevalojn, tiel ke ili nenion plian povis fari, denove ili devis tute ĉesi. Sed ĝuste kiam la Reĝo pensis ke estos plej bone proklami ke la rajdado okazos la sekvan tagon lastafoje, por ke ili havu unu plian oportunon, li subite ekpensis ke estos bone atendi iomete pli por vidi ĉu la kavaliro en kupra kiraso ankaŭ ĉitage venos. Sed tute ne eblis vidi lin. Ĝuste dum ili ankoraŭ serĉis lin, tamen, venis kavaliro rajdanta sur ĉevalo multege pli bona ol tiu kiun rajdis la kavaliro en kupra kirason, kaj ĉi kavaliro surhavis arĝent-

an kirason kaj arĝentajn selon kaj bridilon, kaj ĉio estis tiel brila ke ĝi brilis kaj scintilis kiam li estis tre multe for. Denove la aliaj kavaliroj vokis al li, kaj diris ke estos plej bone ke li ĉesu provi suprenrajdi la vitran monteton, ĉar tute ne utilas provi; sed la kavaliro ne atentis tion, sed rajdis rekte al la vitra monteto, kaj supreniris eĉ pli ol la kavaliro en kupra kiraso; sed suprenirinte



du trionojn de la vojo li turnis sian ĉevalon kaj resobrajdis. La Princino amis ĉi tiun kavaliron eĉ pli ol la alian, kaj sidis sopirante ke li atingos la supron, kaj vidante ke li returnas sin ŝi ĵetis al li la duan pomon, kaj ĝi ruliĝis en lian ŝuon, kaj reirinte de sur la monteto li forrajdis tiel rapide ke neniuj povis scii kien li iris.

Vespere kiam ĉiu devis prezenti sin antaŭ la Reĝo kaj Princino, por ke kiu havas la oran pomon povu montri ĝin, unu kavaliro eniris post la alia, sed neniuj havis oran pomon montreblan.

Je la nokto la du fratoj hejmeniris kiel la antaŭan nokton, kaj parolis pri kiel okazis la eventoj, kaj ke ĉiu rajdis, sed ke neniuj sukcesis supreniri la monteton. “Sed plej laste,” ili diris, “venis kavaliro en arĝenta kiraso, kaj li havis arĝentan bridilon sur sia ĉevalo, kaj arĝentan selon, kaj ho, li bonege rajdis! Li suprenmarŝigis sian ĉevalon du trionojn de la vojo sur la monteto, sed tie li returnis sin. Li estis bonega,” diris la fratoj, “kaj la Princino ĵetis la duan oran pomon al li!”

“Ho, volonte ankaŭ mi estus vidinta lin!” diris Cindrukno.

“Ho, ĉu! Li estis iom pli brila ol la cindroj en kiuj vi sidas ludante, vi malpura nigra ulo!” diris la fratoj.

La trian tagon ĉio okazis ĝuste kiel dum la antaŭaj tagoj. Cindrukno volis akompani ilin por rigardi la rajdadon, sed la du fratoj rifuzis ke li estu ilia kompano, kaj kiam ili venis al la vitra monteto estis neniuj kiu povis supreniri eĉ unu metron, kaj ĉiuj atendis la kavaliron en arĝenta kiraso, sed li estis nek videbla nek aŭdebla. Fine, post longa tempo, venis kavaliro rajdanta sur ĉevalo kiu estis tiel bona, ke neniuj egala antaŭ tiam estis vidita. La kavaliro surhavis oran kirason, kaj la ĉevalo orajn selon kaj bridilon, kaj tiuj estis tiom brilaj ke ili brilis kaj blindumis ĉiujn, eĉ dum la kavaliro estis tre multe for. La aliaj princoj kaj kavaliroj eĉ ne povis voki al li por diri al li kiel senutile estas provi supreniri la monteton, ĉar ili tiom miregis pro la aspekto de lia grandiozeco. Li rajdis tuj al la vitra monteto, kaj suprenalopis ĝin kvazaŭ ĝi tute ne estus monteto, tiel ke la Princino eĉ ne havis sufiĉan tempon por voli ke li povu iri la tutan vojon. Rajdinte al la supro, li tuj prenis la trian oran pomon el la sino de la Princino, kaj poste turnis sian ĉevalon kaj resobrajdis, kaj malaperis el ilia vidpovo antaŭ ol iu povis diri eĉ unu vorton al li.

Reveninte hejmen nokte, la du fratoj rakontis multe pri kiel okazis la rajdado tiutage, kaj fine ili parolis ankaŭ pri la kavaliro en ora kiraso. “Li estis bonega, li ja! Simila grandioza kavaliro ne troveblas sur la tero!” diris la fratoj.

“Ho, volonte ankaŭ mi estus vidinta lin!” diris Cindruloknabo.

“Nu, li brilis preskaŭ tiom kiom la karbamasoj inter kiuj vi ĉiam kuŝas, malpura nigra ulo vi!” diris la fratoj.

La sekvan tagon ĉiuj kavaliroj kaj princoj devis prezenti sin antaŭ la Reĝo kaj Princino—ĉar estis tro malfrue la antaŭan



nokton por fari tion—por ke kiu havas la oran pomon povu montri ĝin. Ili ĉiuj iris laŭvice, unu princoj, poste kavaliroj, sed neniuj el ili havis oran pomon.

“Sed nepre iu havas ĝin,” diris la Reĝo, “ĉar per niaj propraj okuloj ni ĉiuj vidis viron suprenrajdi kaj preni ĝin.” Do li ordonis ke ĉiu en la regno venu al la palaco, kaj indiku ĉu li povas montri la pomon. Kaj unu post la alia ili ĉiuj venis, sed neniuj havis la

oran pomon, kaj poste ege longa tempo la du fratoj de Cindruloknabo simile venis. Ili estis la plej lastaj, do la Reĝo demandis al ili ĉu restas neniu cetera persono en la regno, kiu ne jam venis.

“Ho! jes, ni havas fraton,” diris la du, “sed ne li prenis la oran pomon! Li neniam foriris de la cindramaso dum iu el la tri tagoj.”

“Ne grave,” diris la Reĝo; “ĉar ĉiu alia venis al la palaco, ankaŭ li venu.”

Do Cindruloknabo devis iri al la palaco de la Reĝo.

“Ĉu vi havas la oran pomon?” demandis la Reĝo.

“Jes, jen la unua, kaj jen la dua, kaj jen ankaŭ la tria,” diris Cindruloknabo, kaj poste li deĵetis siajn cindrokovritajn ĉifonojn, kaj aperis tie antaŭ ili en sia brila ora kiraso, kiu scintilis dum li staris.

“Vi ricevos mian filinon kaj la duonon de mia regno, kaj vi tre merite gajnis ambaŭ!” diris la Reĝo. Do okazis geedziĝo, kaj Cindruloknabo prenis la filinon de la Reĝo, kaj ĉiuj gaje festis dum la geedziĝo, ĉar ili ĉiuj kapablis gaje festi, kvankam ili ne povis suprenrajdi la vitran monteton, kaj se ili ne jam ĉesis festi do sendube ili ankoraŭ festas nun.¹

¹ Asbjornsen kaj Moë

*LA RAKONTO PRI PRINCO AĤMEDO KAJ
LA FEINO PARIBANUO*

ESTIS sultano, kiu havis tri filojn kaj nevinon. La plej aĝa el la Princoj nomiĝis Husejno, la dua Alio, la plej juna Aĥmedo, kaj la Princino, lia nevino, Nuroniharo.

La Princino Nuroniharo estis filino de la pli juna frato de la Sultano, kiu mortis, kaj lasis la Princinon tre junan. La Sultano prenis sur sin prizorgon de la eduko de lia filino, kaj hejmgigis ŝin en sia palaco kun la tri Princoj, intencante edzinigi ŝin kun iu najbara princo kiam ŝi atingos konvenan aĝon, kaj tiel estigi aliancon. Sed perceptante ke la tri Princoj liaj filoj amegas ŝin, li prikonsideris la aferon pli profunde. Li estis tre perpleksa; li antaŭvidis malfacilon interkonsentigi ilin, kaj instigi la du pli junajn konsenti cedi ŝin al sia pli aĝa frato. Ĉar li trovis ilin vere obstinaj, li alvokis ilin ĉiujn kune, kaj diris al ili: “Infanoj, ĉar por viaj bonstato kaj travkvileco mi ne sukcesis persvadi vin ne pli aspiro la Princino, vian kuzinon, mi kredas ke ne estos mise se vi ĉiuj veturos en apartajn landojn, tiel ke vi ne renkontos unu la alian. Kaj, ĉar vi scias ke mi estas tre scivolema, kaj ĝuas ĉion nekutiman, mi promesas edzinigi mian nevinon kun tiu el vi kiu portos al mi la plej eksterordinaran raraĵon; kaj por aĉeti la raraĵon kiun vi serĉos, kaj por la elspezoj dum veturado, mi donos al ĉiu el vi monsumon.”

Ĉar la tri Princoj ĉiam cedis kaj obeis la volon de la Sultano, kaj ĉiu flatis sin per la kredo ke fortune favoros lin, ili ĉiuj konsentis. La Sultano pagis al ili la promesitan monon; kaj tiun tagon mem ili ordonis preparojn por siaj veturoj, kaj adiaŭis la Sultanon, por estis des pli pretaj foriri la sekvan matenon. Konforme, ili ĉiuj eliris tra la sama pordo de la urbo, ĉiu estis vestita kiel komercisto, estis servata de fidinda oficiro vestita kiel

sklavo, kaj ĉiu estis bone rajdopreta kaj ekipita. Ili kuniris la unu-tagon de la veturo, kaj tranoktis en gastejo, kie la vojo dividiĝis en tri apartajn vojojn. Nokte, dum ili kunmanĝis ili interakordis veturi dum jaro, kaj renkontiĝi ĉe tiu gastejo; kaj ke la unua kiu venos devos atendi la aliajn; tiel ke, ĉar ili ĉiuj tri kune adiaŭis la Sultanon, ili povos reiri ĉiuj kune. La sekvan matenon je la tagiĝo, ĉirkaŭbrakinte unu la alian kaj dezirinte unu al la alia bonan sukceson, ili suriris siajn ĉevalojn kaj ĉiu elektis apartan vojon.

Princo Husejno, la plej aĝa frato, alvenis ĉe Bisnagaro, la ĉefurbo de la samnoma regno, kaj la loĝloko de ĝia Reĝo. Li iris loĝi en gastejo establita por fremdaj komercistoj; kaj, sciiginte ke estas kvar ĉefaj kvartaloj kie ĉiaj komercistoj vendas siajn varojn, kaj mastrumas butikojn, kaj en kies mezo staras la kastelo, pli ĝuste la palaco de la Reĝo, li iris al unu el tiuj kvartaloj la sekvan tagon.

Princo Husejno ne rigardis ĉi tiun kvartalon senadmire. Ĝi estis granda, kaj dividita en plurajn stratojn, kiuj ĉiuj estis kupolkovritaj kaj ombrataj kontraŭ la suno, tamen tre lumoplenaj. La butikoj estis ĉiuj samdimensiaj, kaj ĉiuj komercantoj pri aparta speco de varoj loĝis en unu strato; ankaŭ la metiistoj, kiuj mastrumis siajn butikojn en la malpli grandaj stratoj.

La granda nombro da butikoj, stokitaj per ĉiaj varoj, ekz. la plej fajnaj tolaĵoj el pluraj partoj de Hindio, iuj pentritaj per plej viglaj koloroj, kun bildoj de bestoj, arboj, kaj floroj; silkajoj kaj brokaĵoj el Persio, Ĉinio, kaj aliaj lokoj, porcelano el Japanio kaj Ĉinio, kaj tapiŝoj, surprizis lin tiom ke li ne sciis kredi siajn proprajn okulojn; sed kiam li atingis la oristojn kaj juvelistojn li kva-zaŭ ekstaziĝis rigardante tiel grandegajn kvantojn da oraĵoj kaj arĝentaĵoj, kaj liajn okulojn blindumis la brilo de la perloj, diamantoj, rubenoj, smeraldoj, kaj aliaj juveloj ofertataj por vendo.

Alia afero specife admirata de Princo Husejno estis la granda nombro da rozvendistoj kiuj amase plenigis la stratojn; ĉar la Hindianoj tiom multe amas tiun floron ke neniu el ili moviĝas sen bukedo en la mano aŭ girlando sur la kapo; kaj la komercistoj tenas ilin en potoj en siaj butikoj, tiel ke la aero estas perfekte parfumata.

Kiam Princo Husejno estis trairinta tiun kvartalon, straton post strato, kun siaj pensoj plene okupataj de riĉaĵoj kiujn li vidis,

li estis tre laca, kion perceptis komercisto kiu ĝentile invitis lin sidiĝi en lia butiko, kaj li akceptis; sed li ne longe sidis antaŭ ol vidi kriiston pasi portantan pecon de tapiŝo sur sia brako, la tapiŝo estis ĉ. 180 centimetrojn ĉiuflanke, kaj li kriis ke la prezo estas tridek monsaketoj. La Princo vokis la kriiston kaj petis rigardi la tapiŝon, kies prezon li opiniis multe ekscesa, ne nur por vidi ĝian grandecon sed ankaŭ ĝian fajnecon; bone ekzameninte ĝin, li diris al la kriisto ke li ne povas kompreni kial eblas postuli



tiel grandan prezon por tiel malgranda peco da tapiŝo, tiel malimponaspekta.

La kriisto, kiu supozis lin komercisto, respondis: “Se ĉi tiu prezo ŝajnis tiel ekscesa al vi, des pli granda estos via miro kiam mi diros al vi ke al mi estas ordonite plialtigi ĝin ĝis kvardek monsaketoj, kaj ne vendi ĝin por malpli granda prezo.” “Nepre,” respondis Princo Husejno, “ĝi devas havi ian tre eksterordinaran karakteron, kiun mi tute ne konas.” “Vi ĝuste divenis, sinjoro,” respondis la kriisto, “kaj vi agnoskos tion kiam vi informiĝos ke

kiu sidas sur ĉi tiu peco da tapiŝo, tiu povas esti transportita tuj-tuje al kie ajn li deziras, sen esti haltigita de ia ajn obstaklo.”

Aŭdinte tiun parolon de la kriisto, la Princo el la Hindioj, pri-pensante ke la ĉefa celo de lia veturo estas hejmenporti ian raraĵon al la Sultano, lia patro, pensis ke li ne povus trovi alian kiu povus pli kontentigi lin. “Se la tapiŝo,” diris li al la kriisto, “havas la naturon kiun vi atribuas al ĝi, mi ne opinios kvardek monsaketajn tro multaj sed mi ankaŭ donacos iom pli al vi.” “Sinjoro,” respondis la kriisto, “mi diris al vi la veron; kaj estos facile konvinki vin pri tio, tuj kiam vi pagos la kvardek monsaketajn, kondiĉe ke mi montros al vi la pruvon. Sed, mi supozas ke vi ne kunportas tiom da monsaketaj, kaj por ricevi ilin mi devos akompani vin al via gastejo, kie vi loĝas. Se permesos la butikestro, ni eniros la malantaŭan parton de la butikoj, kaj mi etendos la tapiŝon. Kiam ni ambaŭ sidos, kaj vi esprimos volon transportiĝi en vian ĉambron en la gastejo, se ni ne transportiĝos tien la interkonsento iĝos senvalida, kaj vi estos libera. Rilate al via donaco, kvankam mian laboron pagas la vendanto, mi akceptos ĝin kiel komplezon, kaj multe dankos al vi.”

Kredante la kriiston, la Princo akceptis la kondiĉojn, kaj ili interkonsentis. Akirinte permeson de la estro, ili eniris la malantaŭon de lia butikoj. Ili ambaŭ sidiĝis sur la tapiŝo, kaj kiam la Princo esprimis sian volon transportiĝi en sian ĉambron en la gastejo, li tuj trovis sin kaj la kriiston tie; kaj, ĉar li ne bezonis pli kontentigan pruvon pri la kapablo de la tapiŝo, li kalkulis por la kriisto kvardek monsaketajn da oro, kaj donis al li dudek orpecojn kiel aldonan donacon.

Tiel Princo Husejno fariĝis la posedanto de la tapiŝo, kaj li ĝojegis ke je sia alveno ĉe Bisnagaro li trovis tian raraĵon; li neniel dubis ke ĝi gajnos por li la manon de Nuroniharo. Mallonge, li opiniis ke estas neeble ke la Princoj liaj pli junaj fratoj trovos ion kompareblan kun ĝi. Li kapablis, sidante sur sia tapiŝo, esti jam tiutage ĉe la renkontejo; sed, ĉar li devus resti tie por atendi siajn fratojn, laŭ ilia interkonsento, kaj ĉar li volis vidi la Reĝon de Bisnagaro kaj lian Kortegon, kaj li volis informi sin pri la fortoj, leĝoj, moroj, kaj religio de la regno, li preferis pli longe resti tie, kaj pasigi plurajn monatojn kontentigante sian scivolemon.

Princo Husejno eble pli longe loĝus en la regno kaj Kortego de Bisnagaro, sed li tiom fervoris esti pli proksima al la Princino ke, etendinte la tapiŝon, li kaj la oficiro kiu akompanis lin sidiĝis, kaj tuj kiam li esprimis sian volon ili transportiĝis al la gastejo kie renkontiĝos li kaj liaj fratoj, kaj kie li pretendis esti komercisto ĝis ilia veno.

Princo Alio, dua frato de Princo Husejno, kiu planis veturi en Persion, ekveturis; tri tagojn post apartiĝi de siaj fratoj li aniĝis al karavano, kaj post kvar tagoj da veturado li atingis Ŝirazon, kiu estis la ĉefurbo de la regno Persio. Tie li pretendis esti juvelisto.

La sekvan matenon Princo Alio, kiu veturis nur por plezurigi sin, kaj kunportis nur necesajojn, vestinte sin komencis promeni en tiun parton de la urbo kiun en Ŝirazo oni nomas la bezestejno.

Inter ĉiuj kriistoj kiuj pasis tien kaj reen kun diversaj specoj de varoj, kaj proponis vendi ilin, lin multe surprizis vidi viron kiu tenas eburan teleskopon en sia mano, proksimume tridek centimetrojn longan kaj dikan kiel la dikfingro de viro, kaj krias ke la prezo estas tridek monsaketoj. Unue li opiniis la kriiston freneza, kaj por informiĝi iris al butikoj, kaj diris al la komercisto, kiu staras ĉe la pordo: “Pardonu, sinjoro: ĉu tiu viro” (li indikis la kriiston kiu krias ke la prezo de la ebura pligrandigvidilo estas tridek saketoj) “estas freneza? Se ne, mi tre multe eraras.” “Vere, sinjoro,” respondis la komercisto, “li estis sanmensa hieraŭ; kaj mi povas certigi al vi ke li estas unu el la plej kapablaj kriistoj kiujn ni havas, kaj la plej uzata kiam io valoras estas vendenda. Kaj se li krias ke la prezo de la ebura pligrandigvidilo estas tridek saketoj nepre ĝi valoras tiom aŭ pli, pro io. Li baldaŭ pasos, kaj ni vokos lin, kaj vi kontentiĝos; intertempe sidiĝu sur mia sofo, kaj ripozu.”

Princo Alio akceptis la komplezan proponon de la komercisto, kaj baldaŭ la kriisto pasis. La komercisto vokis lin pernome, kaj, gestante al la Princo, diris al li: “Diru al tiu sinjoro, kiu demandis min ĉu vi estas sanmensa, kial vi krias ke la prezo de tiu ebura pligrandigvidilo, kiu aspektas ne multevalora, estas tridek saketoj. Ankaŭ min multe mirigus, se mi ne konus vin.” La kriisto, parolante al Princo Alio diris: “Sinjoro, vi ne estas la sola persono kiu supozas min freneza pro ĉi tiu ebura pligrandigvidilo. Vi mem juĝu ĉu aŭ ne mi estas freneza, kiam mi diros al vi

ĝian karakteron: kaj mi esperas ke vi tiel altetaksos ĝian prezon kiel la aliaj personoj al kiuj mi jam montris ĝin, kiuj egale mistaksis min kiel vi.

“Unue, sinjoro,” pludiris la kriisto, prezentante la eburan tubon al la Princo, “observu ke al ĉi tiu tubo vitro estas provizita ambaŭekstreme; kaj konsideru ke rigardante tra unu el ili vi vidas kiun ajn objekton vi deziras vidi.” “Mi,” diris la Princo, “pretas ĉiel ajn imageble kompensi vin pro la skandalo kiun mi ŝutis sur vin,



se vi demonstros la veron de via pretendo.” Kaj ĉar li tenis la eburan tubon en sia mano, rigardinte la du vitrojn li diris: “Montru al mi tra kiun el ĉi tiuj ekstremo mi rigardu por kontentiĝi.” La kriisto tuj montris al li, kaj li trarigardis, samtempe dezirante vidi la Sultanon sian patron, kiun li tuj vidis plene bonfarta, sidanta sur sia trono, en la mezo de sia konsilio. Poste, ĉar estis nenio alia en la mondo tiel kara por li, escepte de la Sultano, kiel la Princino Nuroniharo, li deziris vidi ŝin; kaj li vidis ŝin en ŝia tualetejo, ridanta kaj bonhumora, kun ŝiaj servistinoj ĉirkaŭ ŝi.

Princo Alio bezonis nenian alian pruvon por persvadiĝi ke ĉi

tiu ebura pligrandigvidilo estas la plej valora aĵo en la mondo, kaj li kredis ke se li evitus aĉeti ĝin li neniam denove trovus alian tian raraĵon. Tial li kunprenis la kriiston al la gastejo kie li loĝas, kaj kalkulis por li la monon, kaj ricevis la eburan pligrandigvidilon.

Princo Alio ĝojegis pro sia bonaĉeto, kaj persvadis sin ke, ĉar liaj fratoj ne povos trovi ion egale raran kaj admirindan, la Princo Nuroniharo estos rekompenco pro liaj laceco kaj penoj; ke li pensis nur pri vizito al la Kortego de Persio kiel inkognito, kaj vidi kio ajn estas kurioza en Ŝiraza kaj la najbaraj lokoj, ĝis la karavano kun kiu li venis reiros al la Hindioj. Tuj kiam la karavano estis preta ekveturi, la Princo aniĝis al ĝi, kaj alvenis feliĉe tute sen akcidento aŭ problemoj, aliaj ol la longeco de la veturo kaj laceco pro veturado, ĉe la rendevuloko, kie li trovis Princon Husejnon, kaj ambaŭ atendis Princon Aĥmedon.

Princo Aĥmedo, kiu prenis la vojon al Samarkando, la tagon tuj post sia alveno iris, kiel liaj fratoj, en la bezestejnnon, kaj ne longe marŝinte tie li aŭdis kriiston, kiu tenas artefaritan pomon en sia mano, kaj krias ke ĝia prezo estas tridek kvin saketoj; je tio li haltigis la kriiston, kaj diris al li: “Mi rigardu tiun pomon, kaj diru al mi kiajn karakteron kaj eksterordinarajn kapablojn ĝi havas, tiel ke ĝi tiel alte valoras.” “Sinjoro,” diris la kriisto, metante ĝin en lian manon, “se vi rigardas la eksteron de ĉi pomo, ĝi estas tre senvalora, sed se vi konsideros ĝiajn kapablojn, kaj ĝiajn grandajn utilon kaj helpon al la homaro, vi diros ke ĝi estas eksterpreza, kaj ke kiu posedas ĝin estas la mastro de granda trezoro. Mallonge, ĝi resanigas ĉiujn malsanulojn kiuj suferas la plej mortigajn malsanojn; kaj se la paciento mortas ĝi revivigas lin tuj kaj perfekte resanigas lin; kaj tio fariĝas laŭ la plej facila metodo en la mondo, nome ke la paciento flaras la pomon.”

“Se mi povas kredi vin,” respondis Princo Aĥmedo, “la kapabloj de ĉi pomo estas mirigaj, kaj ĝi estas plejvalorega; sed per kio mi, malgraŭ via parolo, persvadiĝu pri la vereco de ĉi tiu afero?” “Sinjoro,” respondis la kriisto, “la aferon scias kaj asertas la tuta urbo Samarkando; sed, sen enketi aliloke, demandu al ĉi tiuj komercistoj kiujn vi vidas ĉi tie, kaj aŭdu kion ili diros. Vi trovos ke pluraj el ili informos vin ke ili ne vivus hodiaŭ ne uzinte ĉi tiun bonegan sanigilon. Kaj por ke vi pli bone komprenu kio ĝi estas,

mi diru al vi ke ĝi estas la rezulto de la studo kaj eksperimentoj de renoma filozofo de ĉi tiu urbo, kiu dediĉis sin dum sia tuta vivo al la studo kaj scio pri la kapabloj de plantoj kaj mineraloj, kaj fine atingis ĉi tiun miksaĵon, per kiu li efektivigis surprizajn resanigojn kiaj neniam forgesiĝos en ĉi tiu urbo, sed li mem subite mortis, antaŭ ol li povis utiligi sian unikan sanigilon, kaj li postlasis sian edzinon kaj tre multajn junajn infanojn, en tre malkontentigaj statoj, kiu, por subteni sian familion kaj provizi necesojn al siaj infanoj, decidis vendi ĝin.”



Dum la kriisto informis Princon Aĥmedon pri la kapabloj de la artefarita pomo, tre multaj personoj ekĉirkaŭis ilin kaj konfirmis kion li diris; kaj unu inter la aliaj diris ke li havas amikon kiu estas danĝere malsana, pri kies vivodaŭro oni malesperas: kaj ke jen favora oportuno montri al Princo Aĥmedo la sperton. Je tio Princo Aĥmedo diris al la kriisto ke li donos al li kvardek saketojn se li resanigos la malsanulon.

La kriisto, al kiu estis ordonite vendi ĝin je tiu prezo, diris al

Princo Aĥmedo: “Venu, sinjoro, ni iru fari la provon, kaj la pomo estos via; mi povas certigi al vi ke ĝi ĉiam faros la deziratan efektan.” Mallonge, la provo sukcesis, kaj la Princo, kalkulinte kvardek saketojn por la kriisto, kaj ricevinte la pomon, atendis pacience la unuan karavanon irontan al Hindioj, kaj alvenis perfekta-farte al la gastejo kie atendas lin la Princoj Husejno kaj Alio.

Kiam la princoj renkontiĝis ili montris siajn trezorojn unu al la alia, kaj tuj vidis per la teleskopo ke la Princino mortas. Post tio ili sidiĝis sur la tapiŝo, esprimis deziron esti kun ŝi, kaj tie ekestis tujtuje.

Tuj kiam Princo Aĥmedo perceptis sin en la ĉambro de Nuroniharo li paŝis de la tapiŝo, same kiel ankaŭ la aliaj du Princoj, kaj iris apud la liton, kaj metis la pomon sub ŝian nazon; kelkaj momentojn poste la Princino malfermis siajn okulojn, kaj turnis sian kapon de-flank’-al-flanke, rigardante la personojn starantojn ĉirkaŭ ŝi; post tio ŝi ellitiĝis, kaj petis vestiĝi, same kvazaŭ ŝi vekigis el profunda dormo. Ŝiaj servistinoj baldaŭ informis ŝin, laŭ maniero montranta ilian ĝojon, ke ŝi ŝuldas al la tri Princoj la subitan reakiron de sia sano, kaj precipe al Princo Aĥmedo. Ŝi tuj esprimis sian ĝojon pro revidi ilin, kaj dankis ilin ĉiujn kune, kaj poste precipe Princon Aĥmedon.

Dum la Princino vestis sin la Princoj iris ĵeti sin ĉe la piedojn de la Sultano ilia patro, kaj respekte honori lin. Sed veninte antaŭ lin ili trovis ke lin jam informis pri ilia alveno la ĉefeŭnuko de la Princino, kaj pri la rimedo per kiu la Princino estis perfekte resanigita. La Sultano akceptis kaj ĉirkaŭbrakis ilin plej ĝoje, kaj pro ilia reveno kaj pro la resaniĝo de sia nevino la Princino, kiun li amis tiom kiom se ŝi estus lia propra filino, kaj pri kiu la kuracistoj estis plene malesperintaj. Post la kutimaj ceremoniaj kaj komplimentoj ĉiu el la Princoj prezentis sian raraĵon: Princo Husejno sian tapiŝon, kiun li atentis ne postlasi en la ĉambro de la Princino; Princo Alio sian eburan pligrandigvidilon, kaj Princo Aĥmedo sian artefaritan pomon: kaj post kiam ĉiu el ili laŭdis sian donacon, metante ĝin en la manojn de la Sultano, ili petis lin deklari ilian sorton, kaj sciigi al kiu el ili li donos la Princinon Nuroniharon kiel edzinon, konforme al sia promeso.

La Sultano de la Hindioj, aŭdinte, sen interrompi ilin, ĉion

kion la Princoj povis pli diri pri siaj raraĵoj, kaj bone informite pri kio okazis rilate al la resanigo de la Princino Nuroniharo, restis silenta dum kelka tempo, kvazaŭ pripensante kiun respondon fari. Fine li rompis la silenton, kaj diris al ili: “Mi deklarus unu el vi sukcesa, infanoj, tre plezure, se mi povus juste fari tion: sed pripensu ĉu aŭ ne mi povas. Estas vere, Princo Aĥmedo, ke la Princino mia nevino ŝuldas al via artefarita pomo sian kuraciĝon; sed mi devas demandi al vi ĉu aŭ ne vi povus esti tiel utila al ŝi se vi ne estus sciinta per la pligrandigvidilo de Princo Alio pri la danĝero en kiu ŝi estas, kaj se la tapiŝo de Princo Husejno ne alportus vin tiel rapide. Via pligrandigvidilo, Princo Alico, informis vin kaj viajn fratojn ke vi verŝajne perdos la Princinon vian kuzinon, kaj per tio vi multe ŝuldigis ŝin.

“Vi devas ankaŭ agnoski ke tiu scio estus senutila sen la artefarita pomo kaj la tapiŝo. Kaj laste, Princo Husejno, la Princino estus tre maldankema se ŝi ne agnoskus la servon faritan de via tapiŝo, kiu estis tiel necesa rimedo por ŝia kuraciĝo. Sed pripensu, ĝi estus malmulte utila se vi ne sciis per la vidigilo de Princo Alio pri la malsano de la Princino, kaj se Princo Aĥmedo ne utiligus sian artefaritan pomon. Tial, ĉar nek tapiŝo, ebura pligrandigvidilo, nek artefarita pomo estas eĉ ete preferenda unu pli ol la alia, sed, male, ili estas perfekte egalegravaj, mi ne povas doni la Princinon al iu el vi; kaj la sola premio kiun vi gajnis per viaj veturoj estas la gloro ke ĉiu el vi egale kontribuis al ŝia resanigo.

“Ĉar ĉio ĉi estas vera,” pludiris la Sultano, “vi komprenas ke mi devos uzi alian metodon decidi certe pri la elekto inter vi kiun mi devas fari; kaj, ĉar estas sufiĉa tempo inter nun kaj ĉi nokto, mi faros tion hodiaŭ. Ĉiu el vi iru alpreni pafarkon kaj sagon, kaj marŝu al la granda ebenaĵo, kie oni ekzercas ĉevalojn. Mi baldaŭ venos al vi; kaj mi deklaras ke mi donos la Princinon Nuroniharon al tiu kiu plej foren pafos.”

La tri Princoj neniel oponis la decidon de la Sultano. Elirinte de antaŭ li ĉiu el ili alprenis por si pafarkon kaj sagon, kiujn ili transdonis al unu el siaj oficiroj, kaj eliris al la ebenaĵo inditita, sekvate de granda amaso da homoj.

La Sultano ne longe atendigis ilin, kaj tuj kiam li alvenis Princo Husejno, ĉar li estis la plejaĝa, prenis siajn pafarkon kaj

sagon kaj pafis la unua; Princo Alio pafis post li, kaj multe preter lian sagon; kaj Princo Aĥmedo pafis la lasta, sed okazis ke neniu povis vidi kien falis lia sago; kaj malgraŭ la multa diligenteco uzita de li mem kaj ĉiu alia, ĝi ne estis trovebla ĉu malproksime ĉu proksime. Kaj kvankam oni kredis ke li pafis plej foren, kaj ke li tial meritas la Princino Nuroniharon, tamen estis necesi trovi lian sagon por pli evidentigi kaj certigi la aferon; kaj malgraŭ liaj protestoj, la Sultano juĝis favore al Princo Alio, kaj ordonis prepari la geedziĝon, kiu celebriĝis kelkajn tagojn poste tre grandioze.



Princo Husejno rifuzis honori la feston per sia ĉeesto. Mal-longe, lia tristo estis tiel violenta kaj netolerebla ke li foriris de la Kortego, kaj forrifuzinte ĉian rajton heredi la kronon, li fariĝis ermito.

Ankaŭ Princo Aĥmedo ne venis al la geedziĝo de Princo Alio kaj la Princino Nuroniharo, ne pli ol lia frato Husejno, sed li ne forrifuzis la mondon kiel li. Sed, ĉar li ne povis koncepti kio okazis al lia sago, li kaŝe foriris de siaj servistoj kaj decidis serĉi

ĝin, por ke li ne havu kialon riproĉi sin. Tiucele li iris al la loko kie la sagoj de la Princoj Husejno kaj Alico preniĝis, kaj, rekte marŝante de tie, li rigardis atenti ambaŭflanke, kaj li tioman distancon marŝis ke fine li komencis kredi sian entreprenon tute vana; tamen li ne povis deteni sin de iri antaŭen, ĝis li atingis kelkajn krutajn apikajn rokojn, kiuj estis limoj de lia veturo, kaj kiuj situis en dezerta lando, ĉ. dek ses kilometrojn de lia forirpunkto.

II.

VENINTE tre proksime al tiuj rokoj Princo Aĥmedo perceptis sagon, kiun li prenis, rigardis detale, kaj miroplene li trovis ke ĝi estas la sago kiun li estis pafinta. “Certe,” diris li al si, “nek mi nek iu alia vivanta persono povus tiom foren pafi sagon;” kaj, trovinte ĝin kuŝanta etendite, ne fiksita en la teron, li konkludis ke ĝi resaltis de la roko. “Nepre estas iom da mistero en ĉi tio,” diris li, denove parolante al si, “kaj eble estos avantaĝe por mi. Eble la fortune, por kompensi la forprenon de tio kion mi supozis la plej granda feliĉigaĵo, rezervis pli grandan benon por konsoli min.”

Ĉar tiuj rokoj estis plenaj de kavoj kaj kelkaj el tiuj kavoj estis profundaj, la Princo eniris kavon, kaj, ĉirkaŭrigardante, ekvidis feran pordon, kiu laŭaspekte ne havas seruron, sed li timis ke ĝi estas riglita. Tamen, kiam li puŝis ĝin ĝi malfermiĝis, kaj li trovis facilan subklinaĵon sed mankis ŝtupoj, kaj li sobmarŝis tenante sian sagon en la mano. Unue li kredis ke li iras en senluman obskuran lokon, sed baldaŭ tute alia lumo anstataŭis tiun el kiu li venis. Enirinte grandan spacoplenan lokon, ĉ. kvindek aŭ sesdek paŝojn for, li perceptis grandiozan palacon, sed li ne havis sufiĉe da tempo tiam por rigardi ĝin. Samtempe damo tre majestamiena antaŭeniris ĝis la verando, servate de granda nombro da virinoj, tiel elegante vestitaj kaj belaj ke estis malfacile scii kiu estas la mastrino.

Tuj kiam Princo Aĥmedo perceptis la damon, li kiel eble plej haste iris respekte honori ŝin; kaj la damo, siaflanke nebligis ke li unue parolu al ŝi, kaj diris al li: “Pliproksimiĝu, Princo Aĥmedo,

vi estas bonvena.”

Ne estis malgranda surprizo al la Princo aŭdi sin nomata en loko pri kiu li neniam antaŭe aŭdis, kvankam tiel proksima al la ĉefurbo de lia patro, kaj li ne povis kompreni kiel li estas konata de damo kiu estas nekonata de li. Fine li respondis al la saluto de la damo per sinĵeto ĉe ŝiajn piedojn, kaj, restariĝinte, li diris al ŝi: “Sinjorino, mi diras al vi mil dankojn pro via certigo ke mi estas bonvena en loko kien mia malprudenta scivolemo instigis min tro eniri. Sed, sinjorino, ĉu mi, sen kulpi malĝentilecon, aŭdacas demandi al vi kiel vi konas min? kaj kiel vi, loĝante najbare al mi, estas tiel profunde nekonata de mi?” “Princo,” diris la damo, “ni eniru la halon, tie mi plenumos vian scivolon.”

Post tiuj vortoj la damo gvidis Princon Aĥmedon en la halon. Tie ŝi sidiĝis sur sofon, kaj kiam la Princo, petite de ŝi, samon faris, ŝi diris: “Vin surprizas, laŭ via diro, ke mi konas vin sed estas nekonata de vi, sed tio ne plu surprizos vin kiam mi informos vin pri kiu mi estas. Sendube vi konscias ke via religio instruas vin kredi ke la mondon loĝas ĝinoj kaj ne nur homoj. Mi estas filino de unu el la plej potencaj kaj plej honorindaj ĝinoj, kaj mi nomiĝas Paribanuo. Nur necesas pludiri ke laŭ mia opinio vi meritas pli feliĉan sorton ol posedi la Princinon Nuroniharon; kaj por ke vi atingu ĝin, mi ĉeestis kiam vi pafis vian sagon, kaj mi antaŭvidis ke ĝi ne preteriros tiun de Princo Husejno. Mi prenis ĝin en la aero, kaj donis al ĝi la necesan moviĝon por ke ĝi frapiĝu kontraŭ la rokojn apud kiuj vi trovis ĝin, kaj mi diras al vi ke vi povas uzi la favoran oportunon kiu prezentas sin, por feliĉigi vin.”

Ĉar la Feino Paribanuo prononcis ĉi tiujn lastajn vortojn per alia tono, kaj rigardis, samtempe, tenere Princon Aĥmedon, kun modesta ruĝiĝo de la vangoj, ne estis malfacile por la Princo kompreni pri kia feliĉo ŝi parolas. Li baldaŭ konsciiĝis ke la Princino Nuroniharo neniam povos esti lia, kaj ke la Feino Paribanuo preteras ŝin multe rilate al beleco, agrableco, spirito, kaj, juĝante laŭ la grandiozeco de la palaco, giganta riĉo. Li benis la momenton kiam li decidis duafoje serĉi sian sagon, kaj, cedante al sia amo: “Sinjorino,” respondis li, “se dum mia tuta vivo mi havos la feliĉon esti via sklavo, kaj admiranto de la multaj ĉarmoj kiuj ravas mian animon, mi kredos min la plej benita el homoj.

Pardonu mian aŭdacon kiu inspiras min peti ĉi tiun komplezon, kaj ne rifuzu min en vian Kortegon, princon kiu plene dediĉis sin al vi.”

“Princo,” respondis la Feino, “ĉu vi ne ĵuros fidelecon al mi, same kiel mi donos mian al vi?” “Jes, sinjorino,” respondis la Princo, ĝojekstaze; “kion pli bonan mi povus fari, kaj pli plezure? Jes, mia sultanino, mia reĝino, mi donos al vi mian koron plene senrezerve.” “Konsekvence,” respondis la Feino, “vi estas mia edzo, kaj mi via edzino. Sed, ĉar mi supozas,” pludiris ŝi, “ke vi neni-



on manĝis hodiaŭ, malgranda manĝo serviĝos al vi, dum oni faros preparojn por nia geedziĝa festo dum la nokto, kaj poste mi montros al vi la ĉambrojn de mia palaco, kaj vi juĝos ĉu ĉi tiu halo ne estas la plej modesta en ĝi.”

Kelkaj el la servistinoj de la Feino, kiuj venis en la halon kun ili, kaj divenis ŝiajn intencojn, tuj eliris, kaj baldaŭ revenis kun kelkaj bonegaj manĝaĵoj kaj vinoj.

Kiam Princo Ahmedo finis manĝi kaj trinki kiom li deziris, la Feino Paribanuo gvidis lin tra ĉiujn ĉambrojn, kie li vidis dia-

mantojn, rubenojn, smeraldojn, kaj ĉiajn altkvalitajn juvelojn, intermiksitajn kun perloj, agatoj, jaspoj, porfirioj, kaj ĉiaj plej valoraj marmoroj. Sed, krom la riĉeco de la mebloj, kiu estis preter imageblo, estis tioma multeco ke la Princo, anstataŭ iam esti vidinta ion similan al ĝi, agnoskis ke li ne povus imagi ke ekzistas io egala en la mondo. “Princo,” diris la Feino, “se vi admiras tiom mian palacon, kiu, efektive, estas tre bela, kion vi dirus pri la palacoj de la ĉefo de niaj ĝinoj, kiuj estas pli belaj, grandaj, kaj grandiozaj? Mi povus ankaŭ ĉarmi vin per miaj ĝardenoj, sed ni lasos tion ĝis alia tempo. La nokto proksimiĝas, kaj estos la horo vespermanĝi.”

La sekva halo en kiun la Feino gvidis la Princon, kaj kie la tuko estis etendita por la festeno, estis la lasta ĉambro ne jam vidita de la Princo, kaj neniel malpli eleganta ol la aliaj. Je sia eniro en ĝin li admiris la sennombran nombron da kandelinoj, en kiuj estis kandeloj parfumitaj per sukceso, kaj tiu multo, anstataŭ esti konfuzita, estis tiel lokita ke simetrio faris agrablan kaj plaĉan vidaĵon. Sur granda flankatablo estis aranĝitaj ĉiaj origaĵoj, tiel fajne faritaj ke la metia lerteco estis multe pli valora ol la pezo de la oro. Pluraj ĥoroj el belaj virinoj riĉe vestitaj, kaj kies voĉoj ravis, komencis koncerton, akompanate de ĉiaj plej harmoniaj instrumentoj. Kaj kiam ili sidis ĉe la tablo la Feino Paribanuo atente helpis Princon Aĥmedon pri la plej delikataj manĝaĵoj, kiujn ŝi nomis dum ŝi invitis lin manĝi ilin. Ilin trovis la Princo tiel eksterordinare bonegaj ke li laŭdis ili tre troige, kaj diris ke la gastigado multe superas tiun inter homoj. Li trovis ankaŭ la saman superecon en la vinoj, kiujn nek li nek la Feino gustumos antaŭ ol serviĝis la deserto, kiu konsistis el la plej bonaj dolĉaĵoj kaj fruktoj.

La geedziĝfesteno daŭris la sekvan tagon, aŭ, pli ĝuste, la tagoj sekvantaj la celebraĵon estis daŭra festo.

Je la fino de ses monatoj Princo Aĥmedo, kiu ĉiam amis kaj honoris la Sultanon sian patron, ekhavis grandan deziron scii kiel li fartas, kaj tiu deziro ne povis kontentiĝi sen persona enketo; li parolis pri tio al la Feino, kaj petis ke ŝi permesu lin foriri.

“Princo,” diris ŝi, “iru kiam vi volos. Sed unue, ne ĉagrenu vin ke mi donos al vi konsilon pri kiel kondukti tie kien vi iros. Unue,

mi opinias ke estos nekonvene informi la Sultanon vian patron pri nia geedziĝo, nek pri mia rango, nek pri la loko kie vi estis. Petu lin kontentiĝi per la scio ke vi estas feliĉa, kaj ne deziri scii pli; kaj sciigu al li ke la sola celo de via vizito estas trankviligi lin, kaj informi lin pri via sorto.”

Ŝi komisiis dudek nobelojn, bone vestitajn kaj ekipitajn, por servi lin. Kiam ĉio estis preta Princo Aĥmedo adiaŭis la Feinon, ĉirkaŭbrakis ŝin, kaj ripetis sian promeson baldaŭ reveni. Post tio



oni kondukis al li lian ĉevalon, kiu estis elegantege ornamita, kaj estis la plej bela besto en la staloj de la Sultano de la Hindioj, kaj li suriris ĝin eksterordinare gracie; kaj, lastafoje adiaŭinte ŝin, li komencis sian veturon.

Ĉar la vojo al la ĉefurbo de lia patro ne estis longa, Princo Aĥmedo baldaŭ alvenis tie. La popolo, ĝoja pro revidi lin, akceptis lin per huraoj, kaj sekvis lin amase al la ĉambraro de la Sultano. La Sultano akceptis kaj ĉirkaŭbrakis lin tre ĝoje, samtempe

plendante, per la tenereco de patro, pro la malĝojo kiun kaŭzis al li lia longatempa foresto. Lia malĝojo estis des pli granda, li diris, pro tio ke ĉar la fortune favoris lian fraton Princon Alion, li timis ke li eble faris ion malsaĝan.

La Princo rakontis siajn aventurojn sen paroli pri la Feino, ĉar ŝi diris ke li nepre ne menciui ŝin, kaj finis: “La sola komplezo kiun mi petas de via Moŝto estas permeso ke mi ofte venu por saluti vin, kaj por sciigi pri kiel vi fartas.”

“Filo,” respondis la Sultano de la Hindioj, “mi ne povas rifuzi al vi la permeson kiun vi petas de mi; sed mi multe preferus ke vi decidu resti kun mi. Almenaŭ diru al mi kien mi sendu mesaĝon se vi ne venos, aŭ kiam mi kredos ke necesas ke vi ĉeestu.” “Sinjoro,” respondis Princo Aĥmedo, “tio kion petas via Moŝto de mi estas parto de la mistero pri kiu mi parolis al via Moŝto. Mi petas vin permesi ke mi restu silenta pri tio temo, ĉar mi tiel ofte venos ke mi timas ke pli verŝajne mi opiniigos ĝena ol ne plenumanta mian devon.”

La Sultano de la Hindioj ne pli insistis, sed diris al li: “Filo, mi ne pli penetros viajn sekretojn, sed lasos vin libera: sed mi povas diri al vi ke vi ne povus pli plezurigi min ol per via veno; kaj per via ĉeesto vi redonas al mi la ĝojon kiun de longe mi ne sentis. Vi ĉiam estos bonvena kiam vi venos, sen interrompi viajn aferojn aŭ plezuron.”

Princo Aĥmedo restis nur tri tagojn ĉe la Kortego de sia patro la Sultano, kaj la kvaran tagon li reiris al la Feino Peribanuo, kiu ne anticipis tiel baldaŭan revenon lian.

Reveninte de la vizito al sia patro, Princo Aĥmedo rakontis al la Feino Peribanuo pri sia veturo, sia konversacio kun sia patro, kaj petis rajti viziti lin ofte. Sed post tio li neniam menciis la Sultanon, kvazaŭ estis neniu tia persono en la mondo, kvankam antaŭe li konstante parolis pri li. Ŝi supozis ke li faras tion pro ŝi; tial, monaton post lia reveno, ŝi uzis oportunon diri al li unu tagon: “Princo, diru al mi, ĉu vi forgesis vian patron la Sultanon? Ĉu vi ne memoras vian promeson viziti lin ofte? Miaflanke, mi ne forgesis kion vi diris al mi post via reveno. Do mi memorigas tion al vi por ke vi ne longe prokrastu plenumi vian promeson.”

Do Princo Aĥmedo iris la sekvan matenon kun la sama serv-

istaro kiel antaŭe, sed multe pli eleganta, kaj li mem estis pli grandioze preparita, ekipita, kaj vestita, kaj la Sultano akceptis lin same ĝoje kaj kontente. Dum pluraj monatoj li konstante vizitis, kaj ĉiam pli riĉ- kaj belaspekte.

Fine kelkaj veziroj, favoratoj de la Sultano, kiuj taksis la grandecon kaj potencon de Princo Aĥmedo laŭ lia aspekto, ĵaluzigis la Sultanon pri lia filo. Ili diris ke ili timas ke li favorigos la popolon al si kaj sentronigos la Sultanon.

La Sultano de la Hindioj tute ne kredis ke Princo Aĥmedo planus tiel fie kiel kredigas liaj favoratoj, kaj li diris al ili: “Vi eraras; mia filo amas min, kaj mi estas certa pri liaj amo kaj fideleco, ĉar mi donis al li neniun kialon malŝati min.”

Sed la favoratoj daŭre fiparolis pri Princo Aĥmedo ĝis la Sultano diris: “Estos kiel estos. Mi ne kredas ke mia filo Aĥmedo estas tiel fia kiel vi volas kredigi min. Tamen, mi dankas vin pro via boncela konsilo, kaj mi ne dubas ke ĝin kaŭzas via bonvolo.”

La Sultano de la Hindioj diris tion por ke liaj favoratoj ne sciu kiom konvinka ŝajnis al li ilia parolado. Ĝi tiom alarmis lin ke li decidis gvatigi Princon Aĥmedon, kvankam ne scios tion lia ĉefveziro. Do li alvenigis magiistinon, kiun oni envenigis tra malantaŭa pordo de lia loĝejo. “Iru tuj,” li diris, “sekvi mian filon, kaj rigardadu lin zorge por informiĝi kien li iras, kaj informu min.”

La magiistino foriris de la Sultano, kaj, ĉar ŝi sciis pri la loko kie Princo Aĥmedo trovis la sagon, ŝi iris tuj tien, kaj kaŝis sin proksime al la rokoj tiel ke neniuj povos vidi ŝin.

La sekvan matenon Princo Aĥmedo ekveturis je la tagiĝo, sen adiaŭi aŭ la Sultanon aŭ iun el lia Kortego, laŭ sia kutimo. La magiistino, kiu vidis lin veni, sekvis lin per siaj okuloj, ĝis subite ŝi ne plu vidis lin kaj lian servistaron.

Ĉar la rokoj estis tre krutaj kaj apikaj, tiel ke ili estis negrimp-ebla bariero. Do la magiistino decidis ke estas nur du ebloj: la Princo eniris aŭ iun kavernon, aŭ loĝejon de ĝinoj aŭ feinoj. Sekve ŝi venis el sia kaŝejo, kaj iris rekte al la pado, laŭ kiu ŝi iris ĝis ĝia finaĵo, atente rigardante ĉiuflanke; sed malgraŭ sia diligenteco, ŝi povis percepti neniun malfermaĵon, eĉ ne la feran pordon kiun trovis Princo Aĥmedo. Tiun pordon povis vidi kaj malfermi nur viroj, kaj nur tiuj viroj kies ĉeesto plaĉas al la Feino Peribanuo.

La magiistino, kiu komprenis ke estus vane plu serĉi, devis kontentiĝi per sia trovo, kaj reiris informi la Sultanon.

Al la Sultano tre multe plaĉis la agado de la magiistino, kaj li diris al ŝi: “Agu laŭ via bontrovo; mi paciente atendos la plenumiĝon de viaj promesoj;” kaj por kuraĝigi ŝin li donacis al ŝi multevaloran diamanton.

Ĉar Princo Aĥmedo akiris permeson de la Feino Peribanuo viziti la Kortegon de la Sultano de la Hindioj unufoje ĉiun monato, li ĉiam vizitis. La magiistino, sciante la daton, iris unu-du tagojn antaŭe al la piedo de la roko, kie ŝi eknevidis la Princon kaj lian servistaron, kaj atendis tie.

La sekvan matenon Princo Aĥmedo eliris, kiel kutime, tra la fera pordo, kun la sama servistaro kiel antaŭe. Pasante la virinon, kvankam li ne sciis ke ŝi estas magiistino, kaj vidante ŝin kuŝi kun la kapo kontraŭ la roko, kaj plendi kvazaŭ ŝi suferas multajn dolorojn, li kompatis ŝin. Li turnis sian ĉevalon kaj iris al ŝi, kaj demandis al ŝi kio ĝenas, kaj kion li povus fari por komfortigi ŝin.

La ruza sorĉistino rigardis la Princo tre kompatige, tute sen levi sian kapon, kaj respondis per rompitaĵ vortoj kaj ĝemoj, kvazaŭ ŝi apenaŭ povas spiri. Ŝi rakontis ke ŝi estis survoje al la ĉefurbo, sed survoje tien ŝin atakis tiel violenta febroy ke ŝi senfortiĝis; tial ŝi devis kuŝiĝi tie kie li vidis ŝin, tre for de ĉiu loĝejo, kaj sen espero esti helpata.

“Bonulino,” respondis Princo Aĥmedo, “vi ne estas tiel malproksima de helpo kiel vi supozas. Mi pretas helpi vin, kaj porti vin tien kie vi trovos rapidan kuracon. Nur stariĝu, kaj lasu unu el miaj servistoj kunpreni vin.”

Je tiuj vortoj la magiistino, kiu ŝajnis malsanon nur por informiĝi kie loĝas la Princo kaj kion li faras, ne rifuzis lian proponon helpi. Kaj por ke ŝiaj agoj simulu ŝiajn vortojn, ŝi multafoje ŝajnis ke ŝi vane penas stariĝi. Samtempe du el la servistoj de la Princo, deirinte de siaj ĉevaloj, helpis ŝin stariĝi, kaj sidigis ŝin malantaŭ alia servisto. Ili resuriris siajn ĉevalojn kaj sekvis la Princon, kiu turnis sin al la fera pordo, kiun malfermis unu el liaj antaŭrajdantaj servistoj. Kaj veninte en la eksteran korton de la Feino, sen deiri de sia ĉevalo, li sendis mesaĝiston por diri al ŝi ke li volas paroli kun ŝi.

La Feino Peribanuo venis kiel eble plej haste, ĉar ŝi ne sciis kial Princo Aĥmedo revenis tiel baldaŭ. Sen doni al ŝi sufiĉe da tempo por demandi la kialon, li diris: “Princino, mi deziras ke vi kompatu ĉi tiun bonulinon.” Li gestis al la magiistino, kiun subtenas du liaj servistoj. “Mi trovis ŝin samastata kiel vi nun vidas ŝin, kaj promesis al ŝi la helpon kiun ŝi bezonas. Mi estas certa ke vi, pro via boneco, kiel ankaŭ pro mia peto, ne rifuzos ŝin.”

La Feino Paribanuo fiksas siajn okulojn sur la virinon kiu ŝajnigas sin malsana, tutdum la Princo parolis al ŝi. Ŝi ordonis ke



du el ŝiaj sekvantaj servistinoj prenu la virinon de la du viroj tenantaj ŝin, kaj portu ŝin en ĉambron de la palaco, kaj zorgu ŝin kvazaŭ temus pri la Feino mem.

Dum la du virinoj plenumis la ordonojn de la Feino, ŝi apudiĝis al Princo Aĥmedo, kaj flustris en lian orelon: “Princo, tiu virino ne estas tiel malsana kiel ŝi kredigas; kaj mi multe eraras se ŝi ne estas trompisto, kiu kaŭzos multajn problemojn al vi. Sed ne ĝenu vin, negrave kia ruzo estos farita kontraŭ vi. Estu

konvinkita ke mi savos vin el ĉiuj kaptiloj pretigitaj por vi. Iru, okazigu vian veturon.”

Tiu parolo de la Feino tute ne timigis Princon Aĥmedon. “Mia Princino,” diris li, “ĉar mi ne memoras iam fari aŭ plani domaĝon kontraŭ iu ajn, mi ne povas kredi ke iu planus fari tion al mi. Tamen eĉ se ili ja planas tiel, mi tamen ne hezitos bonfari kiam ajn mi povos.” Dirinte tion li reiris al la palaco de sia patro.

Intertempe la du virinoj portis la magiistinon en tre elegantan ĉambron, riĉe meblitan. Unue ili sidigis ŝin sur sofon, kun ŝia dorso subtenata de kuseno el oro brokaĵo, dum ili pretigis liton sur la sama sofo, kies kovrilo estis tre fajne brodita per silko, plej fajna linaĵo, kaj ortuko. Post kiam ili enlitigis ŝin (ĉar la olda sorĉistino ŝajnis ke ŝia febro estas tiel violenta ke ŝi tute ne povas helpi sin) unu el la virinoj eliris, kaj baldaŭ revenis portante porcelanan pladon en sia mano. Ĝi estis plena de certa likvo, kiun ŝi prezentis al la magiistino, dum la alia helpis ŝin sidiĝi. “Trinku ĉi likvon,” diris ŝi; “ĝi estas la Akvo de la Leonfonto, potenca kuracilo por ĉiaj ajn febroj. Vi sentos ĝian efikon post malpli ol horo.”

La magiistino, por pli bone trompi, akceptis ĝin post tre multaj petoj; sed fine ŝi prenis la porcelanan pladon, kaj retroklininte sian kapon, ŝi glutis la likvon. Rekuŝiginte ŝin la du virinoj kovris ŝin. “Kuşu kviete,” diris la virino kiu portis al ŝi la porcelanan tason, “kaj dormetu se vi povos. Ni lasos vin, kaj ni esperas ke ni trovos vin plene resanigita kiam ni revenos post horo.”

La du virinoj revenis je la tempo dirita, kaj trovis ke la magiistino ellitiĝis kaj vestis sin kaj sidas sur la sofo. “Ho admirinda trinkaĵo!” ŝi diris: “ĝi efektivigis sian resanigon multe pli rapide ol vi diris, kaj mi povos daŭrigi mian veturon.”

La du virinoj, kiuj estis feinoj same kiel ili mastrino, diris al la magiistino ke ili multe ĝojas ke ŝi tiel baldaŭ resaniĝis. Ili marŝis antaŭ ŝi, kaj gvidis ŝin tra pluraj ĉambroj, ĉiuj pli noblaj ol tiu en kiu ŝi estis kuŝinta, en grandan halon, la plej riĉe kaj grandioze meblitan en la tuta palaco.

Paribanuo sidis en tiu halo sur trono el masiva oro, pliriĉigita per diamantoj, rubenoj, kaj perloj eksterordinare grandaj, kaj servate ambaŭflanke de granda nombro da belaj feinoj, ĉiuj riĉe

vestitaj. Vidante tiom da majesteco, la magiistino ne nur blindumiĝis, sed konfuziĝis tiom ke, sterninte sin antaŭ la trono, ŝi ne povis malfermi siajn lipojn por danki la Feinon kiel ŝi intencis. Tamen, Paribanuo ŝparis al ŝi la ĝenon, kaj diris al ŝi: “Bonulino, min ĝojigas ke mi havis oportunon komplezi vin, kaj certigi ke vi povos daŭrigi vian veturon. Mi ne retenos vin, sed eble ne malplaĉos al vi vidi mian palacon; sekvu miajn virinojn, kaj ili montros ĝin al vi.”

Poste la magiistino reiris kaj rakontis al la Sultano de la Hin-



dioj ĉion okazintan, kaj kiel tre riĉa estas Princo Aĥmedo post sia edziĝo kun la Feino, pli riĉa ol ĉiuj reĝoj en la mondo, kaj ke estas danĝero ke li venos forpreni la tronon de sia patro.

Kvankam la Sultano de la Hindioj estis forte konvinkita ke la normala karaktero de Princo Aĥmedo estas bona, tamen li ne povis ne perturbiĝi pro la parolo de la olda sorĉistino, al kiu, kiam ŝi pretis foriri, li diris: “Mi dankas vin pro viaj penoj, kaj via bonnatura konsilo. Mi tiom sentas ĝian grandan gravecon por mi ke mi diskutigos ĝin en la konsilio.”

Nu, la favoratoj konsilis mortigi la Princon, sed la magiistino alikonsilis: “Devigu lin doni al vi ĉiajn mirindaĵojn, helpate de la Feino, ĝis ŝi enuos pro li kaj forsendos lin. Ekzemple, kiam ajn via Moŝto enkampen iras, vi devas multe elspezi, ne nur por pavilonoj kaj tendoj por via armeo, sed ankaŭ muloj kaj kameloj por porti iliajn pakaĵojn. Nu, kial ne peti lin uzi sian influon al la Feino por akiri por vi tendon porteblan en la mano de unu persono, tamen kiu estos tiel granda ke ĝi ŝirmos vian tutan armeon kontraŭ malfavora vetero?”

Kiam la magiistino ĉesis paroli, la Sultano demandis al siaj favoratoj ĉu ili povas proponi ion pli bona; kaj trovinte ilin ĉiuj silentaj, decidis sekvi la konsilon de la magiistino, kiel plej racian kaj plej konforman al sia milda regmaniero.

La sekvan tagon la Sultano agis laŭ la konsilo de la magiistino, kaj petis la pavilonon.

Princo Aĥmedo tute ne anticipis ke la Sultano lia patro petus ion tian, kiu unue ŝajnis tre malfacila, eĉ tute neebla. Kvankam li ne sciis precize kiom granda estas la povo de ĝinoj kaj feinoj, li dubis ke ĝi estas tiel granda ke ĝi ampleksas tian tendon kian deziras lia patro. Fine li respondis: “Kvankam kiel eble plej malvolonte, mi nepre petos de mia edzino la komplezon deziratan de via Moŝto. Sed mi ne promesas akiri ĝin; kaj se mi ne denove havos la honoron reveni por respektate saluti vin, tio indikos ke mi ne sukcesis. Sed, antaŭe, mi petas vin pardoni min, kaj konsideri ke vi mem kaŭzis min tiel ekstreme agi.”

“Filo,” respondis la Sultano de la Hindioj, “min multe bedaŭrigus se mia peto al vi kaŭzus por mi la malplezuron neniam revidi vin. Mi trovas ke vi ne scias kiom da potenco edzo havas rilate al edzino; kaj via edzino montrus ke ŝia amo al vi estas tre malprofunda, se ŝi, malgraŭ sia fepovo, rifuzus tiel trivialan peton kia estas tiu kiun mi volas ke vi faru por mi.”

La Princo reiris, kaj estis tre malfeliĉa pro sia timo ofendi la Feinon. Ŝi konstante urĝis lin diri al ŝi kio ĝenas, kaj fine li diris: “Sinjorino, eble vi rimarkis ke ĝis nun min kontentigis via amo, kaj mi neniam petis de vi alian komplezon. Konsideru do, mi petegas vin, ke ne mi, sed la Sultano mia patro, maldiskrete—laŭ mia opinio—petas de vi pavilonon sufiĉe grandan por ŝirmi lin, liajn

Kortegon kaj armeon kontraŭ la violenteco de la vetero, kaj kiun unu persono povas porti en sia mano. Sed memoru ke la Sultano mia patro estas la petanto.”

“Princo,” respondis la Feino, ridetante, “bedaŭrigas min ke tiel malgranda afero ĝenas vin, kaj maltrankviligas vin tiom kiom ŝajnas al mi.”

Post tio la Feino venigis sian kasistinon, al kiu, kiam ŝi venis, ŝi diris: “Nurgihano,”—jen ŝia nomo—“portu al mi la plej grandan pavilonon en mia trezorejo.” Nurgihano baldaŭ revenis kun la



pavilono, kiun ŝi povis ne nur teni en sia mano, sed en sia man-plato eĉ ferminte siajn fingrojn, kaj prezentis ĝin al sia mastrino, kiu donis ĝin al Princo Aĥmedo por ke li rigardu ĝin.

Kiam Princo Aĥmedo vidis la pavilonon kiu, laŭ la Feino, estas la plej granda en ŝia trezorejo, li supozis ke ŝi intencas moki lin, kaj sekve signoj de lia surpriziĝo videblis baldaŭ sur lia vizaĝo. Kiam Paribanuo perceptis tion ŝi ekridis: “Kio! Princo,” kriis ŝi, “ĉu vi kredas ke mi mokas vin? Vi baldaŭ vidos ke mi seriozas. Nurgihano,” diris ŝi al sia kasistino, prenante la tendon el la manoj de Princo Aĥmedo, “eliru kaj starigu ĝin, por ke la Princo

juĝu ĉu ĝi estas sufiĉe granda por la Sultano lia patro.”

La kasistino tuj portis ĝin el la palaco, kaj prenis ĝin al loko tre distanca; kaj kiam ŝi starigis ĝin unu ekstremo ĝi atingis la palacon mem. Tiam la Princo, kiu supozis ĝi eta, trovis ĝin sufiĉe granda por ŝirmi du armeojn pli grandajn ol tiu de la Sultano lia patro, kaj li diris al Paribanuo: “Mi milfoje petas pardonon de la Princino pro mia manko de kredo. Post tio kion mi vidis mi kredas ke nenio estas malebla por vi.” “Vi vidas,” diris la Feino, “ke la pavilono estas pli granda ol kion bezonos via patro; ĉar sciuj ke ĝi havas specialan karakteron—ke ĝi estas pli aŭ malpli granda, laŭ la grandeco de la armeo ŝirmenda.”

La kasistino malstarigis la tendon, kaj portis ĝin al la Princo, kiu prenis ĝin, kaj ne restinte pli ol ĝis la sekva tago, li suriris sian ĉevalon, kaj iris kun la sama servistaro al la Sultano sia patro.

La Sultanon, kiu estis persvadita ke ne povus ekzisti io kia la tendo kiun li petis, multe surprizis la diligento de la Princo. Li prenis la tendon, kaj admirinte ĝian malgrandecon, li tiom mirigis ke li ne povis renormaligi sin. Kiam la tendo estis starigita en la granda ebenajo, kiun ni jam antaŭe menciis, li trovis ĝin sufiĉe granda por ŝirmi armeon duoble tiel grandan kiel armeo kiun li povus surkampigi.

Sed la Sultano ankoraŭ ne estis kontenta. “Filo,” diris li, “mi jam esprimis al vi kiom mi dankas al vi la donacon de la tendo kiun vi akiris por mi: ke mi opinias ĝin la plej valora aĵo en mia tuta trezorejo. Sed vi devos fari unu alian aferon por mi, kiu estos plene tiel agrabla al mi. Mi informiĝis ke la Feino via edzino utiligas certan akvon, nomatan la Akvo de la Leonfonto, kiu kuracas ĉiajn febrojn, eĉ la plej danĝerajn. Ĉar mi estas plene persvadita ke mia farto gravas al vi, mi ne dubas ke vi petos de ŝi botelon de tiu akvo por mi; kaj ke vi portos ĝin al mi kiel gravegan medikamenton, kiun mi povos utiligi laŭbezone. Plenumu por mi ĉi tiun alian gravan servon, kaj tiel kompletigu la devon de bona filo al tenera patro.”

La Princo reiris kaj diris al la Feino kion diris lia patro. “Estas multa fieco en tiu postulo,” ŝi respondis, “kiel vi komprenos per tio kion mi diros al vi. La Leonfonto situas en la mezo de korto de granda kastelo, kies enirejon gardas kvar ferocaj leonoj, kiuj dor-



LA LEONFONTO

mas po du, dum la aliaj du estas vekaj. Sed tio ne timigu vin; mi donos al vi rimedon por pasi ilin sendanĝere.”

La Feino Peribanuio tiutempe tre forte laboris, kaj, ĉar ŝi havis ĉe si pluraj rulaĵojn da fadeno, ŝi prenis unu, kaj, prezentante ĝin al Princo Aĥmedo, diris: “Unue prenu ĉi tiun rulaĵon de fadeno. Mi baldaŭ diros al vi kiel utiligi ĝin. Due, vi devos preni du ĉevalojn: unu vi mem rajdu, kaj la alian vi devos konduki. Ĝi estu ŝarĝita per ŝafo tranĉita en kvar egalajn partojn, kiu estas mortigenda hodiaŭ. Trie, vi devos kunhavi botelon, kiun mi donos al vi, en kiu vi portos la akvon. Eliru frue morgaŭ matene, kaj trapasinte la feran pordon ĵetu la rulaĵon de fadeno antaŭ vin, ĝi ruliĝos ĝis ĝi atingos la pordojn de la kastelo. Sekvu ĝin, kaj kiam ĝi haltos, ĉar la pordoj estos malfermitaj, vi vidos la kvar leonojn. La du vekaj per sia muĝado vekos la aliajn du, sed ne timu, ĵetu al ĉiu kvaronon de la ŝafo, kaj post tio premu vian ĉevalon per spronoj kaj rajdu al la fonto. Plenigu vian botelon sen deiri de la ĉevalo, kaj poste reiru same rekte. La leonoj tiom okupados sin per manĝado ke ili lasos vin pasi.”

Princo Aĥmedo eliris la sekvan matenon je la tempo asignita de la Feino, kaj sekvis ŝiajn direktojn zorge. Veninte al la pordoj de la kastelo li distribuis la kvaronojn de ŝafo inter la kvar leonoj, kaj, pasinte inter ili kuraĝe, li atingis la fonton, plenigis sian botelon, kaj reiris tiel sekure kaj bonfarte kiel li venis. Irinte iom for de la pordoj de la kastelo li turnis sin, kaj, perceptante du el la leonoj venantaj al li, li elteris sian sabron kaj preparis defendi sin. Sed antaŭenirante li vidis unu el ili turninta sin de la vojo iom for, kaj montranta per siaj kapo kaj vosto ke li ne venas damaĝi lin, sed nur por iri antaŭ li, kaj la alia postrestis sekvante. Li remetis sian glavon en ĝian ingon. Tiel gardate, li venis al la ĉefurbo de la Hindioj, sed la leonoj ne delasis lin antaŭ ol konduki lin al la pordoj de la palaco de la Sultano. Post tio ili reiris laŭ la vojo per kiu ili venis, kvankam ne sen timigi ĉiujn vidantojn, eĉ kvankam ili tre milde kondutis kaj montris nenian ferocecon.

Tre multaj oficiroj venis servi la Princon dum li deiris de sia ĉevalo, kaj poste kondukis lin en la ĉambrojn de la Sultano, kiun tiutempe ĉirkaŭis liaj favoratoj. Li proksimiĝis al la trono, metis la botelon ĉe la piedojn de la Sultano, kaj kisis la riĉan tapiŝon kiu

kovras lian piedapogilon, kaj poste diris: “Mi portis al vi, sinjoro, la sanigan akvon kiun via Moŝto tiom deziris gardi inter viaj aliaj raraĵoj en via trezorejo. Sed samtempe mi volas al vi tiel eksterordinaran sanon ke vi neniam bezonos utiligi ĝin.”

Post kiam la Princo finis sian komplimenton la Sultano metis lin dekstre de si, kaj poste diris al li: “Filo, mi multe dankas vin pro ĉi tiu valora donaco, ankaŭ pro la granda danĝero al kiu vi riskis vin pro mi (pri tio min informis magiistino kiu konas la Leonfonton); sed bonvolu,” daŭrigis li, “informi min de kia ilo, aŭ, pli ĝuste, kia nekredebla potenco, vi estas helpita.”

“Sinjoro,” respondis Princo Aĥmedo, “mi tute ne rajtas partopreni en la komplimento kiun via Moŝto bonvolas fari al mi. La tuta honoro ŝuldiĝas al la Feino mia edzino, kies bonan konsilon mi sekvis.” Kaj li informis la Sultanon kiuj estis tiuj ordonoj, kaj per rakonto pri sia ekspedicio sciigis al li kiel bone li kondukis. Kiam li finis, la Sultano, kiu ekstere montris ĉiajn signojn de granda ĝojo, sed sekrete fariĝis pli ĵaluza, retiris sin en internan ĉambron, kien li alvokis la magiistinon.

La magiistino, veninte, ŝparis al la Sultano la ĝenon informi ŝin pri la sukceso de la veturo de Princo Aĥmedo. Ŝi jam aŭdis pri ĝi antaŭ ol veni, kaj tiel preparis sin per nefiaskopova metodo, laŭ ŝia pretendo. Tiun metodon ŝi komunikis al la Sultano, kiu deklaris ĝin sekvatage al la Princo, inter ĉiuj siaj korteganoj, per ĉi tiuj vortoj: “Filo,” diris li, “mi petas de vi unu plian aferon, post kiu mi atendos nenian plian obeon, nek plian peton al via edzino. Mia peto estas: venigu al mi viron ne pli ol kvardek kvin centimetrojn altan, kaj kies barbo estas naŭ metrojn longa, kiu portas sur sia ŝultro feran stangon kiu pezas dudek kvin mil kilogramojn, kiun li uzas kiel bastonon.”

Princo Aĥmedo, kiu ne kredis ke ekzistas tia viro en la mondo kian postulis lia patro, volonte ekskuzus sin; sed la Sultano persistis pri sia postulo, kaj diris al li ke la Feino povas fari nekredeblaĵojn.

La sekvan tagon la Princo reiris al sia kara Paribanuo, al kiu li rakontis la novan postulon de sia patro, kion, li diris, li opinias pli malebla ol la unuaj du postuloj. “Ĉar,” li pludiris, “mi ne povas imagi ke povas ekzisti tia viro en la mondo. Sendube li enmensas

provi ĉu aŭ ne mi estas tiel malsaĝa ke mi serĉus, aŭ li planas pereigi min. Mallonge, kiel li povus supozi ke mi kaptus viron tiel bone armitan, eĉ kvankam nur etan? Kiajn armojn mi povus uzi por devigi lin obei? Se rimedo ekzistas, bonvolu diri al mi, kaj lasu min honorinde sukcesi ĉiĉfoje.”

“Ne timigu vin, Princo,” respondis la Feino; “vi defiis riskon akirante la Akvon de la Leonfonto por via patro. Sed neniel estas danĝere serĉi ĉi viron, kiu estas mia frato Ŝajbaro. Li estas ege malsimila al mi, kvankam ni ambaŭ havis la saman patron. Li estas tiel violentanatura ke nenio povas malhelpi ke li kruele esprimu sian reagon al eĉ malgranda ofendo. Tamen, aliflanke, li volonte komplezas, negrave kion oni deziras. Li estas ekzakte tia kian priskribis la Sultano via patro, kaj li havas neniun alian armon ol feran stangon dudek kvin mil kilogramojn pezan. Li neniam eliras sen ĝi, kaj ĝi respektigas lin. Mi alvokos lin, kaj vi povos taksi la verecon de tio kion mi diras. Sed nepre preparu vin ne timi lian eksterordinaran aspekton kiam vi vidos lin.” “Kion! mia Reĝino,” respondis Princo Aĥmedo, “ĉu vi diras ke Ŝajbaro estas via frato? Negrave kion hida aŭ misforma li estas mi tiom multmalsimilaj vidi lin ke mi honoros kaj amos lin kiel nian fraton.”

La Feino ordonis ke oni metu oran varmigpoton, sub kiu estas fajro, sub la verando de ŝia palaco. Kaj ŝi ordonis alporti oran skatolon, kiu estis donacita al ŝi, el kiu ŝi prenis parfumon. Ŝi ĵetis la parfumon en la fajron, kaj ekiĝis densa nubo de fumo.

Kelkajn momentojn poste la Feino diris al Princo Aĥmedo: “Vidu, venas mia frato.” La Princo tuj perceptis Ŝajbaron venanta solene kun sia peza stango sur sia ŝultro, sia longa barbo kiun li suprentenas antaŭ si, kaj densaj lipharoj kiujn li premis malantaŭ siajn orelojn kaj kiuj preskaŭ kovras lian vizaĝon. Liaj okuloj estis tre malgrandaj, kaj profundaj en lia kapo, kiu estis neniel eksterordinare malgranda, kaj sur sia kapo li portis ĉapon de elitsoldato. Krome, li estis tre ĝibdorsa.

Se Princo Aĥmedo ne sciis ke Ŝajbaro estas frato de Paribanuo, li ne povus rigardi lin sentime. Sed, jam sciante kiu li estas, li staris apud la Feino tute neĝenate.

Ŝajbaro, antaŭenvenante, rigardis la Princon sufiĉe serioze por frosti la sangon en liaj vejnoj, kaj demandis al Paribanuo,

kiam li unue salutis ŝin, kiu estas tiu viro. Al tio ŝi respondis: “Frato, li estas mia edzo. Li nomiĝas Aĥmedo; li estas filo de la Sultano de la Hindioj. Mi ne invitis vin al la nupto ĉar mi ne volis forpreni vin de ekspedicio kiun vi partoprenas. Sed mi plezure aŭdis ke vi revenis venkinte, do mi aŭdacis nun alvoki vin.”

Je tiuj vortoj Ŝajbaro, rigardante Princon Aĥmedon favore, diris: “Ĉu iel, fratino, mi povas servi lin? Sufiĉas por mi ke li estas



via edzo, por ke mi akceptu fari kion ajn li deziras.” “La Sultano, lia patro,” respondis Paribanuo, “deziremas vidi vin, kaj mi deziras ke li gvidu vin al la Kortego de la Sultano.” “Li nur montru al mi la vojon, mi sekvos lin.” “Frato,” respondis Paribanuo, “estas tro malfrue hodiaŭ, tial restu ĝis la mateno morgaŭa. Intertempe mi informos vin pri ĉio okazinta inter la Sultano de la Hindioj kaj Princo Aĥmedo depost nia geedziĝo.”

La sekvan matenon, informite pri la afero, Ŝajbaro ekiris cele la Kortegon de la Sultano, kun Princo Aĥmedo. Tuj kiam ili atingis la pordojn de la ĉefurbo la popolo vidante Ŝajbaron ekkuris kaŝi sin. Kelkaj fermis siajn butikojn kaj ŝlosis sin en siajn domojn, kaj aliaj fuĝante konigis sian timon al ĉiuj renkontatoj, kiuj ne restis retrorigardi sed ankaŭ fuĝis. Tiel estis ke Ŝajbaro kaj Princo Aĥmedo, marŝante, trovis la stratojn tute dizertitaj ĝis ili atingis la palacon, kie la pordistoj, anstataŭ gardi la pordojn, ankaŭ forkuris. Do la Princo kaj Ŝajbaro antaŭeniris senobstakle al la konsilhalo, kie la Sultano sidas sur sia trono por aŭdiencoj. Tie ankaŭ la kondukistoj forlasis siajn postenojn, kaj lasis ilin libere eniri.

Ŝajbaro aŭdace kaj feroce iris al la trono, sen atendi por ke Princo Aĥmedo prezentu lin, kaj alparolis la Sultanon de la Hindioj per ĉi tiuj vortoj: “Vi petis ke mi venu,” diris li, “do jen mi: kion vi volas?”

La Sultano, anstataŭ respondi lin, metis siajn manojn sur siajn okulojn por eviti vidi tiel teruran ulon. Tiu kruda malĝentila malsaluto tiom provokis Ŝajbaron, kiu tiom ĝenis sin por veni el tiel for, ke li tuj levis sian feran stangon kaj mortigis lin, antaŭ ol Princo Aĥmedo povis pledi por li. Li nur povis malhelpi lin mortigi ankaŭ la ĉefveziron, kiu sidas ne malproksime, dirante al li ke li ĉiam bone konsilis la Sultanon lian patron. “Jen kiuj, do,” diris Ŝajbaro, “malbone konsilis lin,” kaj dirante tiujn vortojn li mortigis ĉiujn aliajn vezirojn kaj flatemajn favoratojn de la Sultano kiuj estis malamikoj de Princo Aĥmedo. Ĉiam kiam li batis li mortigis iun personon, kaj eskapis nur tiuj kiuj ne tiom timis ke ili staris gapante sed savis sin per fuĝo.

Post tiu terura ekzekutado Ŝajbaro venis el la konsilhalo en la mezon de la korto kun la fera stango sur sia ŝultro, kaj, severe rigardante la ĉefveziron, kiu ŝuldis sian vivon al Princo Aĥmedo, li diris: “mi scias ke ĉi tie estas certa magiistino kiu estas pli granda malamiko de mia bofrato ol ĉiuj tiuj fifavoratoj kiujn mi punis. Tuj venigu la magiistinon al mi.” La ĉefveziro tuj alvokis ŝin, kaj tuj kiam ŝi venis Ŝajbaro diris dum li batis ŝin per sia fera stango: “Akceptu rekompencan pro via fikonsilado, kaj lernu denove ŝajnigi vin malsana.”

Post tio li diris: “Ankoraŭ ne sufiĉas; mi same agos al la tuta urbo se ili ne tuj agnoskos Princon Aĥmedon, mian bofraton, kiel sian Sultanon kaj Sultanon de la Hindioj.” Kaj ĉiuj ĉeestantoj reeĥigis la aeron per ripetata akklamado: “Vivu Sultano Aĥmedo”; kaj tuj li estis akklamata tra la tuta urbo. Ŝajbaro vestigis lin per la reĝaj vestoj, instalis lin sur la tronon, kaj devigis ĉiujn ĵuri obeon kaj fidelon al li. Post tio li iris alveniĝi sian fratinon Paribanuon, kiun li venigis kun ĉiaj pompo kaj grandiozeco imageblaj, kaj agnoskigis ŝin Sultanino de la Hindioj.



Rilate al Princo Alio kaj Princino Nuroniharo, ĉar ili tute ne partoprenis en la konspiro kontraŭ Princo Aĥmedo, kaj tute ne sciis pri ĝi, Princo Aĥmedo asignis al ili grandan provincon, kun ĝia ĉefurbo, kie ili loĝis dum sia cetera vivo. Post tio li sendis oficiron al Princo Husejno por sciigi al li la ŝanĝon kaj oferti al li tiun provincon kiun li plej preferas. Sed tiu Princo opiniis sin tiel feliĉa pro sia soleco ke li petis la oficiron danki la Sultanon lian fraton pro lia komplezo, certigante sian submetiĝon; kaj diris ke

la sola komplezo kiun li deziras estas permeso loĝi emerite en ĉi tiu loko kiun li elektis por tiu celo.¹

¹Arabaj Noktoj

LA HISTORIO DE JOĈJO LA GIGANTOMORTIGISTO

DUM la regno de la fama Reĝo Arturo loĝis en Kornvalo knabo nomita Joĉjo, kiu estis knabo tre kuraĝa, kaj multe ĝuis aŭdi aŭ legi pri magiistoj, gigantoj, kaj feoj; kaj aŭskultadis fervore la agojn de la kavaliroj de la Ronda Tablo de Reĝo Arturo.

Dum tiu epoko loĝis sur la Monto Sankta Mikaelo, apud Kornvalo, grandega giganto, ses metrojn alta kaj kun talio tri metrojn ronda. Lia feroca sovaĝa aspekto teruris ĉiun rigardanton.

Li loĝis en trista kaverno sur la supro de la monto, kaj kutimis vadi al la ĉeftero serĉante predon. Ĉasinte li metis ses bovojn sur sian dorson, kaj ligis dek ok ŝafojn kaj porkojn ĉirkaŭ sian talion, kaj remarŝis al sia propra loĝejo.

La giganto jam de multaj jaroj faris tion kiam Joĉjo decidis mortigi lin.

Joĉjo prenis kornon, ŝovelilon, pioĉon, sian kirason, kaj senluman lanternon, kaj unu vintran vesperon li iris al la monto. Tie li fosis truon sep metrojn profundan kaj preskaŭ egale larĝan. Li kovris ĝin tiel ke ĝi aspektis solida tero. Post tio li tiel brue blovis la kornon ke la giganto vekiĝis kaj venis el sia kavo, kriante: “Aŭdaculaĉo! vi pagos pro tio. Mi rostos vin por mia matenmanĝo!”

Ĝuste post sia parolo li faris unu plian paŝon kaj falis kapantaŭe en la truon, kaj Joĉjo batis lian kapon per sia pioĉo kaj tiel mortigis lin. Post tio Joĉjo reiris hejmen por feliĉigi siajn amikojn per tiu informo.

Alia giganto, nomita Blunderboro, ĵuris venĝi sin je Joĉjo se iam li superfortos lin. Tiu giganto havis sorĉitan kastelon en la mezo de soleco arbaro; kaj iom post la morto de Kormorano Joĉjo promenis tra arbaro, kaj pro laceco sidiĝis kaj ekdormis.

La giganto pasante vidis Joĉjon, kaj portis lin al sia kastelo, kie li enŝlosis lin en grandan ĉambron. La planko de la ĉambro estis kovrita per la korpoj, kranioj, kaj ostoj de viroj kaj virinoj.

Post nelonge la giganto iris venigi sian fraton, kiu ankaŭ estis giganto, por manĝi la karnon de Joĉjo. Kaj Joĉjo vidis terurate tra la bariloj de sia karcero la du gigantojn proksimiĝi.

Joĉjo, perceptante fortikan ŝnuron en unu angulo de la ĉambro, kuraĝiĝis, kaj farinte glitnodon ĉe ĉiu finaĵo, ĵetis ilin super iliaj kapojn kaj ligis ĝin al la fenestrostangoj. Post tio li tiris ĝis sufoki ilin. Kiam ilia vizaĝoj nigriĝis li glitis laŭlonge de la ŝnuro kaj pikis ilin ĝis la koro.



Post tio Joĉjo prenis grandan amason da ŝlosiloj el poŝo de Blunderboro, kaj reeniris la kastelon. Li zorge traserĉis ĉiujn ĉambrojn, kaj en unu el ili trovis tri virinojn ligitajn per la hararo de siaj kapoj, kaj preskaŭ mortaj pro malsalto. Ili diris al li ke iliajn edzojn mortigis la gigantoj, kiuj poste kondamnis ilin al malsatmorto ĉar ili rifuzis manĝi la karnon de siaj propraj mortaj edzoj.

“Virinoj,” diris Joĉjo, “mi pereigis la monstron kaj lian fian fraton; kaj mi donas al vi ĉi tiun kastelon kaj ĉiujn riĉaĵojn en ĝi,

por iomete kompensi vin pro via teruraj suferoj.” Li tre ĝentile donis al ili la ŝlosilojn de la kastelo, kaj plu iris veturante al Kimrio.

Ĉar Joĉjo havis tre malmultan monon, li marŝis laŭeble plej rapide. Fine li atingis belan domon. Joĉjo frapis sur la pordon, kaj elvenis Kimra giganto. Joĉjo diris ke li estas misvaginta veturanto, kaj la giganto bonvenigis lin, kaj gvidis lin en ĉambron kie estas bona lito en kiu li povos dormi.

Joĉjo senvestigis sin rapide, sed kvankam laca li ne povis endormiĝi. Nelonge post tio li aŭdis la giganto marŝanta tien kaj reen en la apuda ĉambro, kaj diranta al si:

“Kun mi vi loĝas dum ĉi-nokto,
Sed vi ne aŭdos vekalvokon,
Vi morta estos en ĉi-loko.”

“Ĉu vi kredas?” pensis Joĉjo. “Ĉu tiel vi ruzas al veturantoj? Sed mi esperas montriĝi egale ruza kiel vi.” Ellitiĝinte li ĉirkaŭ-palpis en la ĉambro, kaj fine trovis grandan dikan ŝtipon. Li metis ĝin en sian lokon en la lito, kaj poste kaŝis sin en senluma angulo de la ĉambro.

La giganto, ĉirkaŭ la noktomezo, eniris la ĉambron, kaj per sia klabo multfoje batis la liton, ĉe la loko kie Joĉjo estis metinta la ŝtipon; kaj post tio li reiris al sia propra ĉambro, supozante ke li rompis ĉiujn ostojn de Joĉjo.

Frue en la mateno Joĉjo brave paŝis en la ĉambron de la giganto por danki lin pro la gastigo. La giganto alarmiĝis vidante lin, kaj komencis balbuti: “Ho! Jadi. Ĉu vi? Diru, kiel vi dormis dum la pasinta nokto? Ĉu vi aŭdis aŭ vidis ion dum la mezo de la nokto?”

“Nenion menciindan,” diris Joĉjo senzorge: “rato, mi kredas, tri-kvarfoje frapetis min per sia vosto, kaj iomete ĝenis min; sed mi baldaŭ reendormiĝis.”

La giganto pli kaj pli miris pro tio: tamen li respondis per nenia vorto, sed nur iris alporti du grandajn bovlojn da kaĉo por ilia matenmanĝo. Joĉjo volis ke la giganto kredu ke li povas manĝi tiom kiom la giganto mem, do li ruze ligis ledan sakon al la interna flanko de sia mantelo, kaj verŝis la kaĉon en tiun sakon,

ŝajnigante meti ĝin en sian buŝon.

Post la matenmanĝo li diris al la giganto: “Nun mi montros al vi ion belan. Mi povas resanigi ĉiujn vundojn per tuŝo. Mi povus detranĉi mian kapon unu minuton kaj la sekvan minuton remeti ĝin, senvundan, sur miajn ŝultrojn. Vi vidos ekzemplojn.” Li prenis tranĉilon, ŝiris la ledan sakon, kaj la tuta kaĉo verŝiĝis sur la plankon.

“Jadi jadi jadi!” kriis la giganto, kiu hontis ke uleto kia Joĉjo superas lin, “mi mem povas fari tion.” Do li ekprenis la tranĉilon, puŝis ĝin en sian propran stomakon, kaj post momento falis morta.

Joĉjo, ĝis nun sukcesa en ĉiuj entreprenoj siaj, firme intencis ne estonte esti pigra. Do li prenis por si ĉevalon, ĉapon de scio, glavon de akro, ŝuojn de rapido, kaj nevidebligan mantelon, por pli bone efektivigi la mirigajn entreprenojn kiun li faros.

Li veturis trans altajn montetojn, kaj la trian tagon li atingis vastan grandan arbaron tra kiu iras lia vojo. Li apenaŭ eniris la arbaron kiam li ekvidis monstran giganton, kiu trenas per la hararo de iliaj kapoj belan kavaliron kaj lian damon. Joĉjo deiris de sia ĉevalo, kaj liginte ĝin al kverko, li surmetis sian nevidebligan mantelon, sub kiu li portis sian glavon de akro.

Veninte al la giganto li plurfoje batis lin, sed li ne povis atingi lian korpon, sed li vundis lian femurojn plurloke. Fine, preninte sian glavon per ambaŭ manoj kaj plenforte batante, li detranĉis ambaŭ liajn krurojn. Post tio Joĉjo, metinte sian piedon sur lian kolon, puŝis sian glavon en la korpon de la giganto, la monstro ĝemis kaj pereis.

La kavaliro kaj lia damo dankis Joĉjon pro sia saviĝo, kaj invitis lin al sia domo por ricevi taŭgan premion pro lia servo. “Ne,” diris Joĉjo, “mi ne povos esti trankvila antaŭ ol trovi la loĝejon de ĉi tiu monstro.” Do, laŭ informoj de la kavaliro, li suriris sian ĉevalon, kaj baldaŭ poste li ekvidis alian giganton, kiu sidas sur ligna bloko atendente la revenon de sia frato.

Joĉjo deiris de sia ĉevalo, kaj, surmetinte sian nevidebligan mantelon, li proksimiĝis kaj batis celante la kapon de la giganto, sed li maltrafis kaj detranĉis nur lian nazon. Je tio la giganto ekprenis sian klabon kaj komencis ĉirkaŭbatadi tre senkompute.

“Ne,” diris Joĉjo, “se estas tiel, pli bone estos mortigi vin!” do saltinte sur la blokon, li puŝis sian glavon en la dorson, kaj la giganto ekfalis morta.

Joĉjo daŭrigis sian veturon, kaj veturis trans montetojn kaj valojn, ĝis atingi la piedon de alta monto. Li frapis sur la pordon de soleca domo, kaj maljunulo enlasis lin.

Dum Joĉjo sidis la ermito tiel parolis al li: “Mia filo, sur la supro de ĉi tiu monto estas sorĉita kastelo, mastrata de la giganto Galiganto kaj fimagiisto. Mi lamentas la sorton de filino de duko,



kiun ili ekkaptis dum ŝi promenis en la ĝardeno de sia patro, kaj portis tien transformita en cervon.”

Joĉjo promesis ke matene, riskante sian vivon, li rompos la sorĉon; kaj post profunda dormo li frue ellitiĝis, surmetis sian nevidebligan mantelon, kaj pretiĝis por la entrepreno.

Grimpinte al la supro de la monto li vidis du ardantajn grifojn; sed li pasis inter ili tute sen timi danĝeron, ĉar ili ne povis vidi lin pro lia nevidebliga mantelo. Sur la pordo de la kastelo li trovis oran trumpeton, sub kiu estis skribitaj ĉi tiuj linioj:—

Kiu ĉi trumpeton blovos,
Li giganton morten ŝovos.

Leginte tion li tuj prenis la trumpeton kaj blovis per ĝi akre, kio ekmalfermigus la pordojn kaj kaŭzis ke la kastelo mem tremu.

La giganto kaj la magiisto nun sciis ke ilia fikariero finiĝis, kaj ili staris mordante siajn dikfingrojn kaj tremante pro timo. Joĉjo, per sia glavo de akro, baldaŭ mortigis la giganton, kaj la magiiston tiam forportis kirlovento; kaj ĉiuj kavaliroj kaj belaj damoj kiuj estis ŝanĝitaj en birdojn kaj bestojn reakiris siajn naturajn formojn. La kastelo ekmalaperis kvazaŭ fumo, kaj la kapon de la giganto Galiganto li sendis al Reĝo Arturo.

La kavaliroj kaj damoj ripozis tiunokte en la ermitejo de la maljunulo, kaj la sekvan tagon ili ekveturis al la Kortego. Joĉjo iris al la Reĝo, kaj raportis al lia Moŝto ĉiujn siajn ferocajn batalojn.

La famo de Joĉjo nun disvastiĝis tra la tuta lando, kaj je peto de la Reĝo la duko donis al li sian filinon kiel edzinon, tiel ĝojigante sian tutan regnon. Post tio la Reĝo donis al li grandan bienon, sur kiu li kaj lia edzino loĝis sian ceteran vivon ĝoje kaj kontente.¹

¹Malnova populara broŝuro.

LA NIGRA VIRBOVO DE NOROVEGIO

Kaj ofte sonis la ĉaskant'
 Pri ludo kaj pri ĝoj'
 Lamente sonis post ĉant'
 "Skotlanda ama voĵ."
 Sed nun pli viglas kanta bru':
 "De Norvegi' la Nigra Taŭr'!"
 Ekĉesas ĉia torĉa brul'
 Kaj menestrela daŭr'.

"The Cout of Keeldar" de J. Leyden.

FOJE en Norovegio loĝis certa virino, kaj ŝi havis tri filinojn. La plejaĝa el ili diris al sia patrino: "Patrino, kuiru por mi pankukon, kaj rostu por mi pecon de viando, ĉar mi foriros serĉi mian fortunon." Ŝia patrino faris tion; kaj la filino foriris al olda sorĉista lavistino kaj diris al ŝi sian celon. La oldulino petis ŝin resti tiun tagon, kaj iri rigardi tra ŝia malantaŭa pordo, por vidi kion ŝi povas vidi. Ŝi vidis nenion la unuan tagon. La duan tagon ŝi same agis, kaj vidis nenion. La trian tagon ŝi rerigardis, kaj vidis kaleŝon kun ses ĉevaloj venanta laŭ la vojo. Ŝi enkuris kaj raportis al la olda virino kion ŝi vidis. "Nu," diris la oldulino, "ĝi estas por vi." Do ili prenis ŝin en la kaleŝon, kaj forgalopis.

La dua filino sekve diras al sia patrino: "Patrino, kuiru por mi pankukon, kaj rostu por mi pecon de viando, ĉar mi foriros serĉi mian fortunon." Ŝia patrino faris tion; kaj ŝi foriris al la oldulino, kiel faris ŝia fratino. La trian tagon ŝi rigardis tra la malantaŭa pordo, kaj vidis kaleŝon kun kvar ĉevaloj venanta laŭ la vojo. "Nu," diris la oldulino, "ĝi estas por vi." Do ili enprenis ŝin en la kaleŝon, kaj forveturis.

La tria filino diris al sia patrino: "Patrino, kuiru por mi pankukon, kaj rostu por mi pecon de viando, ĉar mi foriros serĉi mian fortunon." Ŝia patrino faris tion; kaj ŝi foriris al la olda sorĉ-

istulino. Ŝi petis ŝin rigardi tra la malantaŭa pordo, kaj vidi kion ŝi povas vidi. Ŝi faris tion; kaj reveninte diris ke ŝi vidis nenion. La duan tagon ŝi same agis, kaj vidis nenion. La trian tagon ŝi rerigardis, kaj reveninte diris al la oldulino ke ŝi vidis nenion krom grandan Nigran Virbovon kiu venas muĝante laŭ la vojo. “Nu,” diris la oldulino, “ĝi estas por vi.” Aŭdinte tion ŝi preskaŭ freneziĝis pro malĝojo kaj teruriĝo; sed ŝi leviĝis kaj metiĝis sur lian dorson, kaj ili forveturis.

Jes, ili veturis, kaj plu veturis, ĝis la knabino fariĝis febla pro malsato. “Manĝu el mia dekstra orelo,” diris la Nigra Virbovo, “kaj trinku el mia maldekstra orelo, kaj satigu vin.” Do ŝi faris kiel li diris, kaj bone refreŝigis sin. Kaj ili veturis longe, kaj plu rajdis, ĝis ili ekvidis tre grandan belan kastelon. “Tie ni devos resti ĉinokte,” diris la virbovo; “ĉar mia pli aĝa frato loĝas tie,” kaj baldaŭ ili atingis la lokon. Oni prenais ŝin de lia dorso, kaj enkondukis ŝin, kaj forsendis lin al parko por la nokto. En la mateno, kiam ili hejmenvenigis la virbovon, ili gvidis la knabinon en belan brilantan salonon, kaj donis al ŝi belan pomon, dirante al ŝi ke ŝi ne rompu ĝin krom se ŝi estos en la plej granda danĝero kiun iam renkontis homo en la mondo, kaj ĝi savos ŝin. Denove ŝi leviĝis sur la dorson de la virbovo, kaj post kiam ŝi rajdis longe, pli longe ol mi povas diri, ili ekvidis multe pli belan kastelon, multe pli foran ol la lasta. Diras la virbovo al ŝi: “Tie ni restos dum la nokto, ĉar mia dua frato loĝas tie.” Kaj ili rapide atingis la lokon. Oni deprenis ŝin kaj enkondukis ŝin, kaj forsendis la virbovon al kampo por la nokto. En la mateno ili gvidis la knabinon en belan riĉan ĉambron, kaj donis al ŝi la plej belan piron kiun iam ŝi vidis, dirante al ŝi ke ŝi ne rompu ĝin krom se ŝi estos en la plej granda danĝero ebla por homo, kaj ĝi savos ŝin. Denove ŝi leviĝis sur lian dorson kaj ili foriris. Kaj ili veturis longe, kaj plu rajdis, ĝis ili ekvidis la multe plej grandan kastelon, kaj plej multe foran, kiun ĝis tiam ili vidis. “Tie ni restos dum la nokto,” diras la virbovo, “ĉar mia juna frato loĝas tie.” Kaj ili rapide atingis la lokon. Oni deprenis ŝin kaj enkondukis ŝin, kaj forsendis la virbovon al kampo por la nokto. En la mateno ili gvidis la knabinon en ĉambron, la plej belan el ĉiuj, kaj donis al ŝi prunon, dirante al ŝi ke ŝi ne rompu ĝin krom se ŝi estos en la plej

granda danĝero en kiu povus esti homo, kaj ĝi savos ŝin. Ili hejmenvenigis la virbovon, metis la knabinon sur lian dorson, kaj ili foriris.

Do ili iris, kaj pli rajdis, ĝis atingi senluman malplaĉegan valon. Tie ili haltis, kaj la knabino deiris de la virbovo. Diras la virbovo al ŝi: “Restu ĉi tie dum mi iros batali la diablon. Sidu sur tiu ŝtono, kaj movu nek manon nek piedon ĝis mi revenos, alie mi neniam retrovos vin. Kaj se ĉio ĉirkaŭ vi fariĝos blua, mi estos venkinta la diablon; sed se ĉio fariĝos ruĝa, li estos venkinta min.”



Ŝi sidiĝis sur la ŝtonon, kaj post iom da tempo ĉio ĉirkaŭ ŝi fariĝis blua. Ĝojege ŝi levis unu piedon kaj krucis per ĝi la alian, pro ŝia ĝojo ke ŝia kompano venkis. La virbovo revenis kaj serĉis ŝin sed tute ne povis trovi ŝin.

Longe ŝi sidis, kaj longe atendis, ĝis ŝi enuis. Fine ŝi stariĝis kaj foriris, ŝi ne sciis kien. Ŝi vagadis ĝis atingi grandan vitran monton, sed negrave kiom ŝi penis ŝi ne povis supreniri ĝin. Ĉirkaŭ la malsupron de la monto ŝi iris, serĉante vojon per kiu ŝi povos transiri, ĝis fine ŝi atingis la domon de forĝisto; kaj la forĝisto promesis ke se ŝi servos lin dum sep jaroj, li faros por ŝi

ferajn ŝuojn per kiuj ŝi povos transiri la vitran monton. Je la fino de sep jaroj ŝi ricevis siajn ferajn ŝuojn, supreniris la vitran monton, kaj hazarde venis al la loĝejo de la olda lavistino. Tie ŝi informiĝis pri brava juna kavaliro kiu transdonis al ŝi kelkajn sangomakulitajn ĉemizojn, kaj tiu kiu purigos tiujn ĉemizojn fariĝos lia edzino. La olda lavistino lavis ĝis laciĝi, kaj post tio ŝi alvokis sian filinon, kaj ambaŭ lavis, kaj lavis pli, kaj lavegis, esperante akiri la junan kavaliron; sed malgraŭ ĉiuj siaj klopodoj ili ne povis ellavi la makulojn. Post multa tempo ili eklaborigis la fremdan knabinon; kaj kiam ŝi komencis la makuloj malaperis kaj la ĉemizoj fariĝis puraj, sed la oldulino kredigis al la kavaliro ke ŝia filino purigis la ĉemizojn. Do la kavaliro kaj la plejaĝa filino estis geedziĝontaj, kaj la fremda knabino multe ĉagreniĝis pro tio, ĉar ŝi profunde amis lin. Do ŝi ekpensis pri sia pomo, kaj rompi ĝin, trovis ĝin plena de oro kaj valoraj juveloj, la plej riĉaj kiujn iam ŝi vidis. “Ĉiujn ĉi,” ŝi diris al la plejaĝa filino, “mi donos al vi, kondiĉe ke vi prokrastu vian nupton je unu tago, kaj lasu min iri sola al lia ĉambro en la nokto.” Do la filino konsentis; sed intertempe la oldulino pretigis dormigan trinkaĵon, kaj donis ĝin al la kavaliro, kiu trinkis ĝin, kaj ne vekiĝis antaŭ la sekva mateno. La tutan nokton la knabino ploris kaj kantis:

Servis longjarojn sep por vi,
Grimpis vitran monton por vi,
Lavis sangĉemizon por vi,
Ĉu vi dormos, ne vekiĝos por mi?

La sekvan tagon ŝi ne sciis kion fari, pro sia malĝojo. Do ŝi rompis la piron, kaj trovis ĝin plena de juveloj multe pli riĉaj ol la enhavo de la pomo. Per la juveloj ŝi marĉandis por permeso resti duan nokton en la ĉambro de la juna kavaliro; sed la oldulino donis al li plian dormigan trinkaĵon, kaj li denove dormis ĝis la mateno. La tutan nokton ŝi ĝemadis kaj kantis kiel antaŭe:

“Servis longjarojn sep por vi,” kc.

Ankoraŭ li dormis, kaj ŝi preskaŭ tute perdis esperon. Sed tiun tagon dum li ĉasadis, iu demandis al li kio estis la bruo kaj ĝemado kiun ili aŭdis dum la tuta nokto el lia litĉambro. Li diris

ke li aŭdis nenian bruon. Sed ili certigis al li ke ĝi okazis; kaj li decidis resti veka tiunokte por trovi kion li aŭdos. Ĉar tiu estis la tria nokto, kaj la knabino estis inter espero kaj malespero, ŝi rompis sian prunon, kaj ĝi enhavis multe pli riĉan juvelaron ol la aliaj. Ŝi marĉandis kiel antaŭe; kaj la oldulino, kiel antaŭe, portis la dormigan trinkaĵon en la ĉambron de la juna kavaliro; sed li diris al ŝi ke li ne povos trinki ĝin tiunokte sen dolĉigo. Kaj kiam ŝi estis foririnta por mielo por dolĉigi ĝin, li elverŝis la trinkaĵon, kaj tiel kredigis al la oldulino ke li trinkis ĝin. Denove ĉiuj enlitiĝis, kaj la knabino komencis, kiel antaŭe, kanti:

Servis longjarojn sep por vi,
Grimpis vitran monton por vi,
Lavis sangĉemizon por vi,
Ĉu vi dormos, ne vekiĝos por mi?

Li aŭdis kaj turnis sin al ŝi. Kaj ŝi rakontis al li ĉion kio okazis al ŝi, kaj li rakontis al li ĉion kio okazis al li. Kaj li bruligis la oldulinon kaj ŝian filino. Kaj ili geedziĝis, kaj li kaj ŝi plu vivas feliĉe ankoraŭ nun, krom se mi eraras.¹

¹Chambers. *Popular Traditions of Scotland*



LA RUĜA OGRO

FOJE estis du vidvinoj kiuj loĝis sur malgranda parcelo, kiun ili luis de farmisto. Unu el ili havis du filojn, kaj la alia havis unu filon. Pasis la jaroj kaj venis la tempo kiam la virino kiu havas du filojn forsendu ilin serĉi sian fortunon. Do unu tagon ŝi diris al sia plejaĝa filo ke li prenu ujon kaj portu al ŝi akvon el la puto, por ke ŝi baku kukon por li; kaj kiom da akvo li alportos, tiom granda aŭ malgranda estos la kuko; kaj tiu kuko estos ĉio kion ŝi povos doni al li kiam li iros veturante.



La knabo foriris kun la ujo al la puto, kaj plenigis ĝin per akvo, kaj poste revenis hejmen; sed la ujo estis rompita kaj la plejparto de la akvo elfluis antaŭ ol li revenis. Do lia kuko estis tre malgranda; tamen kvankam ĝi estis malgranda, lia patrino demandis ĉu li akceptos preni duonon de ĝi kun ŝia beno, dirante al li ke, se li preferos havi la tuton, li ricevos ĝin nur kun ŝia malbeno. La junulo, pensante ke li eble devos tre foren veturi, kaj ĉar li ne sciis kiam aŭ kiel li akiros alian provianton, diris ke li prefer-

as ricevi la tutan kukon, ĉu aŭ ne estos kun malbeno farita de lia patrino. Do ŝi donis al li la tutan kukon, kaj sian malbenon kun ĝi. Post tio li flankentiris sian fraton, kaj donis al li tranĉilon kiun li tenu ĝis li revenos, petante ke ĉiumatene li rigardu ĝin. Dum ĝi restos hela, li povos esti certa ke ĝia posedanto bone statas. Sed se ĝi fariĝos malhela kaj rusta, nepre ia misfortuno trafis lin.

Do la junulo foriris serĉi sian fortunon. Kaj li marŝis tiun tutan tagon, kaj la sekvan tagon; kaj la trian tagon, posttagmeze, li atingis lokon kie sidas ŝafisto kun grego da ŝafoj. Kaj li rigardis la ŝafiston kaj demandis al li al kiu apartenas la ŝafoj; kaj la viro respondis:

“La Ruĝa Ogr’ Irlanda
 Loĝis en Beligano.
 Ŝtelis la Reĝfilinon
 De Malkom, Reĝ’ Skotlanda.
 Li batas ŝin, ligas ŝin,
 Ligas ŝin en fono;
 Li ĉiutage batas
 Per arĝentbastono.
 Kiel Roma Julian’,
 Timigas lin nek man’.
 Laŭdire venos homo
 Mortige trovos lin;
 Ne jam naskiĝis tiu,
 Kaj longe manku li.”

La junulo daŭrigis sian veturon; kaj li ne longe iris antaŭ ol vidi maljunulon kun blankaj haroj kiu paŝtas gregon da porkojn; kaj li iris al li kaj demandis al kiu apartenas la ŝafoj; kaj la viro respondis:

“La Ruĝa Ogr’ Irlanda”—[k.c.]

La junulo iris iom pli, kaj venis al alia tre maljuna viro paŝtanta kaprojn; kaj kiam li demandis al kiu apartenas la kaproj, la respondo estis:

“La Ruĝa Ogr’ Irlanda”—[k.c.]

Tiu maljunulo ankaŭ diris al li ke li evitu la bestojn kiujn li renkontos, ĉar ili estas tre malsimilaj al ĉiaj kiajn li ĝis tiam vidis.

Do la junulo pluiris, kaj post kelka tempo li vidis amason da tre timigaj bestoj, ĉiu el ili havis du kapojn, kaj sur ĉiu kapo estis kvar kornoj. Kaj li timegis, kaj forkuris de ili laŭeble plej rapide; kaj li ĝojis atingi kastelon kiu staris sur monteto kun malfermita pordo. Kaj li eniris la kastelon por ŝirmi sin, kaj tie li vidis maljunulinon sidantan apud la fajro en la kuirejo. Li demandis al la virino ĉu li rajtos resti tie dum la nokto, ĉar li lacas pro longa veturo; kaj la virino diris jes, sed ke ne estas bona loko por li, ĉar ĝi apartenas al la Ruĝa Ogro, kiu estas terurega besto, kun tri kapoj, kaj ŝparas neniun vivanton kiun li povas kapti. La junulo volonte forirus, sed li timis la bestojn ekster la kastelo; do li petis la maljunulinon kaŝi lin laŭeble, kaj ne diri al la Ogro ke li ĉeestas. Li pensis ke se li povos traresti la nokton, eble li povos foriri en la mateno sen renkonti la bestojn, kaj tiel eskapi. Sed li ne longe estis en sia kaŝejo antaŭ ol la terura Ogro envenis; kaj tuj kiam li eniris li aŭdeblis kriante:

“Kuireje, malantaŭe,
Homon flaras mi tralaŭe;
Ĉu viva plu, ĉu morta jam,
Lia koro estos mia pan.”

La monstro baldaŭ trovis la povran junulon, kaj tiris lin el lia truo. Eltirinte lin li diris al li ke se li povos respondi al li tri demandojn lia vivo ŝpariĝos. La unua estis: Ĉu Irlando aŭ Skotlando unue estis loĝata? La dua estis: Ĉu la viro fariĝis por virino, aŭ virino por la viro? La tria estis: Ĉu homoj aŭ brutoj fariĝis unue? Ĉar la knabo ne povis respondi eĉ unu el tiuj demandoj, la Ruĝa Ogro prenis klabon kaj batis lian kapon, kaj transformis lin en ŝtonan kolonon.

La matenon post tiu evento la plijuna frato elprenis la tranĉilon por rigardi ĝin, kaj lin ĉagrenis vidi ĝin bruna pro rusto. Li diris al sia patrino ke nun venis la tempo kiam ankaŭ li foriru veturante. Do ŝi petis lin ke li prenu la ujon al la puto, por ke ŝi baku kukon por li. Ĉar la ujo estis rompita li reportis hejmen same malmultan akvon kiel la alia, kaj la kuko estis egale mal-

granda. Ŝi demandis ĉu li preferas la tutan kukon kun ŝia malbeno, aŭ duonon kun ŝia beno; kaj, kiel lia frato, li pensis ke estos plejbone havi la tutan kukon, negrave kio okazos pro la malbeno. Do li foriris; kaj ĉio okazis al li kiu okazis al lia frato!

La alia vidvino kaj ŝia filo aŭdis de feo pri kio okazis, kaj la junulo decidis ankaŭ forveturi, kaj trovi ĉu li povos fari ion por helpi siajn du amikojn. Do lia patrino donis al li ujon por iri al la puto kaj porti akvon hejmen, por ke ŝi baku por li kukon por lia veturo. Kaj li iris, kaj dum li hejmenportis la akvon, korako super lia kapo kriis ke li rigardu, kaj li vidos ke la akvo elfluas. Li estis prudenta junulo, kaj vidante la akvon elflui, li prenis iom da argilo kaj flikis la truon, tiel ke li portis hejmen sufiĉe da akvo por baki grandan kukon. Kiam lia patrino proponis ke li prenu duonon de la kuko kun ŝia beno, li prenis ĝin prefere ol la tuton kun ŝia malbeno; tamen la duono estis pli granda ol kion ricevis la aliaj knaboj kune.

Do li foriris veturante; kaj kiam li estis veturinta iom longe li renkontis oldulinon, kiu petis ke li bonvolu doni al ŝi pecon de la kuko. Kaj li diris ke li volonte faros tion, do li donis al ŝi pecon de sia kuko; kaj pro tio ŝi donis al li magian sceptron, dirante ke ĝi eble estos utila por li se li atentos ĝuste uzi ĝin. Kaj la oldulino, kiu estis feino, antaŭdiris al li multon kiu okazos al li, kaj kion li faru en ĉiaj cirkonstancoj; kaj post tio ŝi ekmalaperis. Li multe pludiris, kaj renkontis la maljunulon kiu paŝtas la ŝafojn; kaj kiam li demandis al kiu apartenas tiuj ŝafoj, la respondo estis:

“La Ruĝa Ogr’ Irlanda
 Loĝis en Beligano.
 Ŝtelis la Reĝfilinon
 De Malkom, Reĝ’ Skotlanda.
 Li batas ŝin, ligas ŝin,
 Ligas ŝin en fono;
 Li ĉiutage batas
 Per arĝentbastono.
 Kiel Roma Julian’,
 Timigas lin nek man’.
 Sed nun alvenas fin’

De l' sorto jen la rand';
Kaj estas vi, ja vidas mi,
Heredonto de la land'!"

La junulo iris pli, kaj venis al la maljuna viro paŝtanta porkojn; kaj kiam li demandis al kiu apartenas la porkoj, la respondo estis:

"La Ruĝa Ogr' Irlanda"—[k.c.]

La junulo iris pli, kaj venis al la viro paŝtanta kaprojn; kaj kiam li demandis al kiu apartenas la kaproj, la respondo estis:

"La Ruĝa Ogr' Irlanda"—[k.c.]



Veninte al la loko kie staras la monstraj bestoj, li nek haltis nek forkuris, sed trairis ilin kuraĝe. Unu venis kun malfermita buŝo muĝante, por vori lin, sed li batis ĝin per sia sceptro kaj tuj sternis ĝin morta ĉe siaj piedoj. Li baldaŭ atingis la kastelon de la Ogro, kie li frapis, kaj li permesigis eniri. La maljunulino sidanta

apud la fajro avertis lin pri la terura Ogro, kaj diris al li la sorton de la du fratoj; sed li ne senkuraĝiĝis. La monstro baldaŭ envenis, dirante:

“Kuireje, malantaŭe,
Homon flaras mi tralaŭe;
Ĉu viva plu, ĉu morta jam,
Lia koro estos mia pan.”

Li rapide ekvidis la junulon, kaj ordonis ke li antaŭenvenu sur la planko. Kaj li faris la tri demandojn al li; sed al la junulo la bona feino jam antaŭe diris ĉion, do li povis respondi ĉiujn demandojn. Kiam la Ogro trovis tion li konsciis ke li jam perdis sian potencon. Sekve la junulo prenis hakilon kaj dehakis la tri kapojn de la monstro. Post tio li petis ke la maljunulino montru al li kie kuŝas la filino de la Reĝo; kaj la maljunulino gvidis lin al la supra etaĝo kaj malfermis tre multajn pordojn, kaj el ĉiu pordo venis bela virino enkarcerigita tie de la Ogro; kaj unu el la virinoj estis la filino de la Reĝo. Ŝi ankaŭ gvidis lin en malsupran ĉambron, kaj tie staris du ŝtonaj kolonoj kiujn li nur bezoni tuŝi per sia sceptro, kaj liaj du amikoj kaj najbaroj ekvivis. Kaj ĉiuj kaptitoj ĝojegis pro sia saviĝo, kaj ili ĉiuj agnoskis ke ili ŝuldas ĝin al la prudenta junulo. La sekvan tagon ili ĉiuj ekiris cele la Kortegon de la Reĝo, kaj brava grupo ili estis. Kaj la Reĝo edzinigis sian filinon al la junulo kiu savis ŝin, kaj donis filinon de nobelo al ĉiu el la aliaj junuloj; kaj sekve ili vivis feliĉe ĉiujn siajn ceterajn tagojn.¹

¹Chambers. *Popular Traditions of Scotland*

NEKUTIMAJ VORTOJ

agro: kultivata kampo. *Agrodomo*: domo en kiu loĝas kultivisto kaj ties familio.

aperta: ne fermita.

apika: krute vertikala.

bobeli: fari etajn aervezikojn pro bolado.

braĝo: karbopecoj jam parte bruligitaj, uzataj kiel bruligaĵo.

damaĝi: malutili al iu, kaŭzi difekto(j)n, misago al iu aŭ io.

dampi: mallaŭtigi, kutime per speciala ilo.

descendi: iri malsupren.

dizerti: forlasi, tiel ke neniu aŭ nenio restas.

dizerta: neokupata, senenhava.

drivi: flosi laŭhazarde, puŝate de la akvofluo aŭ la vento.

dura: malmola.

enorma: eksterordinare grandega.

eskalo: ŝtupetaro, kutime movebla, el ligno aŭ metalo.

febla: malforta, ne kapabla multe efiki.

fola: frenezeta. (Adjektivo por esprimi malestimon.)

frida: tre malvarma, ege malvarma.

frikasi: metodo kuiri viandon dispecigitan, kun saŭco.

gapi: rigardadi kvazaŭ surprizite aŭ nekredante.

gvati: (kaŝe) observi, ekz. por sekrete informiĝi.

ĝino: supernatura spirito, en la Araba tradicio. En ĉi tiuj rakontoj

ĝinoj ofte servas magiistojn.

hasti: nekutime rapidi, pro iu devo.

hida: Ege, malagrabla malbela.

hororo: Sento de teruro kaj abomeno, dum kiu oni tremas.

klapo: Parto de ĉapo, kovranta la orelojn.

kompano: kamarado, kunulo, kuniranto.

krifo: piedo kun grandaj ungoj per kiu besto kaptas kaj ŝiras.

lanta: malrapida, malrapide iranta.

leĝera: malpeza.

liva: maldekstra.

makabra: Tia, ke per ridaĉo oni teruras.

morna: malhela, malĝojiga, malgaja.

nupto: geedziĝa ceremonio.

ogro: Fabela giganto kiu manĝas homojn.

olda: maljuna, malnova.

pigra: mallaborema.

poka: malmulta.

polmo: la plata flanko de la mano.

povra: kompatinda.

provianto: manĝaj provizaĵoj.

rara: malofta.

rojo: akvofluo, treege malgranda rivero.

scintili: brileti de tempo al tempo, rapide, kiel stelo.

softa: tre milda, nelaŭta.

spindelo: fera vergo ĉirkaŭ kiun oni volvas ŝpinitan fadenon.

strangoli: mortigi personon, ĉirkaŭpremane ties kolon.

stufi: kuiri viandon en poto kun iom da akvo, super neforta fajro.

superba: bonega, belega, efektoplena, tre impona.

timida: ema timeti, ema esti ne tre kuraĝa.

trista: malfeliĉa, malĝoja.

violenta: senbride perforta.

vori: manĝi kiel sovaĝa besto.